

La Familio

Verkis Bakin tradukis Vejdo

E-librigita de ELERNO



Bakin (1904-2005) estis prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio. Jam en sia juneco li komencis sian literaturan karieron. Li verkis multajn romanojn, novelojn kaj eseojn, kiuj trovis ŝaton ĉe ĉinaj kaj eksteraj legantoj.

Li estis ankaŭ aktiva en la ĉina Esperanto-movado. Multaj el liaj verkoj same kiel lia vivo estis intime ligitaj kun la internacia lingvo.

La esperantaj versioj de liaj verkoj *Aŭtuno en la Printempo*, *Frosta Nokto*, kaj *La Familio* estis eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo.

Antaŭparolo

Li Cunguan^①

Bakin (Li Yaotang) naskiĝis la 15-an de novembro 1904 en familio de feŭda burokrata bienulo en Chengdu, Sichuan-provinco, sudokcidenta Ĉinio. En kanbeco lia tenera patrino fariĝis lia unua instruanto. Ŝi ofte diris al li : “Honeste vivu, sincere amu kaj helpu aliajn.” Tio fundamentis lian karakteron. Post kiam okazis en Ĉinio la Movado de la 4-a de Majo 1919^② li kaj liaj gefratoj eklegis progreseman revuon *Nova Junularo* kaj aliajn periodaĵojn propagandantajn novan ideologion kaj novan kulturon. Influate de la kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma spirito kaj demokratia ideologio, li, 16-jara, partoprenis en sociaj aktivadoj kontraŭ militarismo kaj aŭtokratio kaj publikigis humanismajn poemojn kaj artikolojn kritikantajn la malnovan soci-sistemon kaj prikasantajn novan vivon. En 1923 li forlasis sian hejmlokon kune kun sia frato kaj iris al Ŝanhajo kaj Nankino por perfektigi sian studon. Januare de 1927 li veturis al Francio. Tie li verkis la romanon *Pereo* , kiu trovis ŝaton de legantoj.

De 1927 ĝis 1949, antaŭ kiam fondiĝis la popola respubliko, Bakin verkis 20 romanojn, ĉ. 100 novelojn kaj multegajn eseojn, fariĝis unu el la elstaraj junaj verkistoj de Ĉinio.

La verkoj de Bakin kun originala stilo plenas de fortaj sentoj. Ili priskribas junajn intelektulojn, kiuj batalis kontraŭ la malluma socio kaj

sin dediĉis al efektivigo de bela idealo, malkaŝas kaj akuzas la dekadencan feŭdan autokration kaj feŭdan etikon, kiuj kaŭzis homajn tragediojn. Kun simpatio al la suferoplenaj laboristoj, kamparanoj kaj urbaj malriĉuloj, li priskribis ilian barakton inter vivo kaj morto. En la krizaj jaroj de la ĉina nacio li malkovris per sia plumo la kruelaĵojn de la japanaj agresantoj kaj prikantis la malcedemon de la ĉina popolo en la naci-sava movado.

La ĉefaj verkoj de Bakin estas *Trilogio de Torento* el *La Familio*, *Printempo* kaj *Aŭtuno*, kiuj skurĝas la feŭdan familian sistemon kaj feŭdan etikon ; *Pereo* kaj *Trilogio de Amo* el *Nebulo*, *Pluvo* kaj *Fulmo* , kiuj priskribas la revoluciajn agadojn de junaj intelektuloj kaj ilian internan mondon; kaj *Frosta Nokto*[®], kiu prezentas la tragedian familion de mizera oficisto en la 40-aj jaroj. Fine de 1986 aperis lia esearo *Kapricaj Pensoj* en kvin kajeroj, al kies verkado li dediĉis ok jarojn. La esearo registris liajn verajn pensojn kaj sentojn pri la realo kaj historio kaj montris lian fortan respondecon pri la socio kaj ricevis laŭdojn de ĉinaj kaj alilandaj legantoj .

Bakin estas ne nur fekunda verkisto, sed ankaŭ eminenta tradukisto, redaktisto kaj eldonisto. Li ĉinigis verkojn de Turĝenev, Gorkij, Wilde, Gercen kaj multaj aliaj fremdlandaj verkistoj. Li redaktis plurajn literaturajn periodaĵojn kaj laboris kiel ĉefkompilinto de multaj libro-serioj. Nun li estas prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio.

En la aĝo de 17 jaroj, Bakin eklernis Esperanton. Li estis redaktoro de la Esperanta revuo *La Verda Lumo* kaj verkis eseojn pri la Esperanta literaturo. Li elesperantigis la rusan popolkanton *Volgo*, *Volgo*, la dramon de Akita Uĵaku *Danco de Skeletoj*, la dramon de E. Amicis *La Floro de l' Pasinto*, la dramon de A. Tolstoj *La Morto de Danton* kaj la romanon de Julio Baghy *Printempo en la Aŭtuno*^④. Li pasie amas la internacian lingvon kaj rigardas ĝin kiel gravan parton de sia vivo. En 1980 li, 76-jara, partoprenis en la 65-a UK en Stokholmo. En 1981 li fariĝis membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Li estas honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

Liaj verkoj estas tradukitaj en ĉ. 30 lingvojn. Pro lia granda kontribuo al literaturo li ricevis la italan “Internacian Premion de Dante” en 1982, kaj en la sekvanta jaro la prezidanto de Francio donis al li en Ŝanhajo la francan ordenon de “Honora Legio”. Krome, li ricevis ankaŭ multajn aliajn premiojn kaj honorajn titolojn.

La plej influa el la verkoj de Bakin estas *Trilogio de Torento*. Ĝia unua parto *La Familio* estas unu el la modernaj ĉinaj realismaj majstroverko. La romano *La Familio* priskribas la vivon de Chengdu inter la vintro de 1920 kaj la somero de 1921. En la romano la aŭtoro rakontas pri 4-generacia burokrat-bienula familio Gao en la tumulta socio post la Movado de 4-a de Majo. La romano priskribas la amon de gejunuloj de tiu familio, la konfliktojn inter juna kaj maljuna

generacioj kaj la tragedian sorton de junaj virinoj, kaj spegulas la fortan puŝon de nova ideologio kontraŭ la feŭda familia sistemo en tiu epoko.

La familio Gao en la romano estas miniaturo de la ĉina feŭda socio. La plej aĝa Grandsinjoro Gao, lia filo Gao Keming kaj Feng Leshan, kiuj havas malsamajn karakterojn, senescepte estas apologiantoj kaj reprezentantoj de la feŭda socio. Ili ĉiamaniere defendas la disfalontajn tradiciajn etikon kaj patriarkan sistemon. Iliaj agoj montras la hipokritecon, kruelecon kaj putriĝon de la feŭda etiko. La aŭtoro sentoplene priskribis la malfeliĉajn travivaĵojn de bonkoraj junaj virinoj Mei, Mingfeng kaj Ruijue, kaj aliaj gejunuloj de la familio kaj per do akuzis la damnindan feŭdan aŭtokration.

La Familio manifestas la vekiĝon de juna generacio inspirata de nova ideologio de la Movado de la 4a de Majo kaj prikantas ilian sencedan batalon kontraŭ la feŭda forto kaj ilian kuraĝan rompon kun la feŭda etiko kaj feŭda familio. Juehui, Qin kaj aliaj gejunuloj estas reprezentantoj de la kreskanta demokratia forto en la familio. Juehui, la unua perfidulo de la familio, sin montras kiel la plej brila figuro el la vekiĝintaj junuloj. Li ne estas kontenta pri la vivmaniero de la maljuna generacio kaj deziras fariĝi homo tute alia ol ili. Li ne volas resti kiel sinjorido en la familio kaj kompatas homojn de la malsupera soci-tavolo. Li, aktive partoprenas en sociaj aktivadoj kontraŭ militarismo kaj feŭdismo. En multaj flankoj li akre batalas kontraŭ la maljuna

generacio en la familio, sentime kaj senkompromise. Por serci novan vivon, finfine li forlasas la familion.

Kiel unu el la plej vaste legataj modernaj romanoj de Ĉinio, *La Familio* reprezentas la plej grandajn sukcesojn de la ideologio kaj arto de Bakin. La profunda ideologia signifo de la romano montriĝas per originala arta esprimo.

La plej distingiĝa arta sukceso de *La Familio* estas tio, ke ĝi kreis karakterizitajn figurojn, kiuj enkorpiĝas la enhavoriĉan vivon, la amon kaj malamon de la aŭtoro kaj lian belan idealon. Inter ili Juexin, Juehui, Mingfeng kaj Grandsinjoro Avo Gao estas tipaj figuroj vaste konataj en la moderna literatura historio de Ĉinio. Juexin, subtile kreita kun la plej aĝa frato de la aŭtoro kiel prototipo, estas homo, kiu havas komplikajn karakteron. Kiel junulo ankaŭ li estas influita de nova ideologio, sed kiel heredanto li ankoraŭ havas iluziojn pri la malnova familio kaj la malnova sistemo. Li estas timema kaj honesta, tolerema kaj malkontenta. Lia duobla karaktero faras lin viktimo kaj defendanto de la malnova sistemo kaj malnova forto.

La Familio ludis grandan edifan rolon en la 30-40-aj jaroj de Ĉinio. Inspirite de ĝi multaj junaj intelektuloj liberigis sin de sia feŭda familio kaj de la feŭda etiko kaj partoprenis en la popola revolucia batalo. La epoko de *La Familio* estas jam malproksima, sed la arto de *La Familio* ankoraŭ brilas en la nuna tempo.

Majon 1999, Pekino

- ① Profesoro de la Esplor-studenta Instituto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, studanta la literaturajn verkojn de Bakin.
- ② La Movado de 4-a de Majo okazis en 1919 en Pekino, kun partopreno de pli ol 3,000 studentoj de la Pekina Universitato kaj aliaj 12 superlemejoj . Ĝi estis kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma revolucio, kaj ankaŭ nova kultura movado kun demokratio kaj scienco kiel sia standardo.
- ③ Eldonita Esperant-lingve de la Ĉina Esperanto-Eldonejo en 1990.
- ④ En 1932 Bakin siavice verkis la romanon *Aŭtuno en la Printempo*, kies Esperanta traduko estis eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo post 50 jaroj.

1

Vento blovis furioze. Neĝflokoj, kiel disŝiritaj vatpecoj, flirtis en la aero kaj falis sencele ĉiudirekten. Ĉe la piedoj de la muroj en ambaŭflankoj dekstra kaj maldekstra kuŝis po blanka , vojstreko, kvazaŭ larĝaj rubandoj borderantaj la kotplenan straton el ŝtonplatoj .

Sur la strato piedirantoj kaj palankenistoj , lacaj kaj deprimitaj baraktis kontraŭ la neĝblovado. La neĝo pli kaj pli densiĝis, vualis la ĉielon blanke kaj ŝutiĝis ĉien sur la ombrelojn, la kovrilojn de la palakenoj, la bambuĉapelojn de iliaj portistoj kaj la vizaĝojn de la piedirantoj .

La vento skue ludadis kun la ombreloj, kelkfoje eĉ forŝiris iujn el la manoj de piedirantoj. Ĝia trista hurlado kaj la knara paŝbruo fandiĝis kaj sonis kiel stranga muziko, kiu pikis la orelojn kvazaŭ avertante: vento kaj neĝo regos eterne kaj la bela printempo ne revenos.

Jam vesperiĝis. Tamen la stratlampoj ankoraŭ ne estis lumigitaj. Ĉio sur la strato perdiĝis en la malhelo de la krepusko. La strato plenis de akvo kaj koto. La aero frostis. Sola espero spronis la elĉerpitajn piedirantojn sur la dezerteca strato — ilia varma kaj lumplena hejmo.

“Tria Frato, pli rapide,” diris dek-ok-jara junulo, tenante ombrelon en unu mano kaj la baskon de la vatkitelo per la alia. Li returns sian kapon por rigardi sian fraton. Lia ronda vizaĝo jam ruĝiĝis de frostoj. Orkadritaj okulvitroj rajdis sur ha nazo.

Malantaŭe iris lia frato Juehui, iom pli juna, kun sama staturo kaj samaj vestoj, kun malpli grasa vizaĝo, tamen kun paro da okuloj tre brilaj.

“Ne urgu. Baldaŭ jam hejmen... Dua Frato, hodiaŭ vi provludis plej bone. Vi parolis en la angla senafekte kaj flue. Vi bone ludis la rolon de kuracisto sinjoro Liversey,” li diris gaje, rapidigante siajn paŝojn. Kotakvo disŝprucis sur liajn krurumojn.

“Tio estas nenio. Mi nur estas pli kuraĝa,” ridetante diris la pliaĝa frato Juemin. Li haltigis siajn paŝojn kaj atendis la fraton por iri ŝultron ĉe ŝultro. “Vi estas tro timema. Vi fuŝis la rolon de Old Sea Dog. Vi parkeris tiujn parolojn hieraŭ, ĉu ne? Kial vi ne povis reciti ilin, tuj post kiam vi suriris la scenejon hodiaŭ? Se sinjoro Zhu ne suflorus al vi, vi ne povus reciti ĝis la fmo!” Juemin parolis afable, sen riproĉa tono.

Juehui ruĝiĝis. Li maltrankvile replikis, “Kiam mi suriris la podion, mi ne scias, kial mi sentis konsternon. Ŝajnis al mi, ke multaj rigardoj fiksiĝis sur mi. Mi volas, ke mi faru la parolojn sen perdo de ajna vorto...”

Ekblovo turnis la ombrelon en lia mano. Li tuj ĉesis paroli kaj firme tenis ĝin. La ekblovo forpasis palpebrume. Meze de la strato jam akumuliĝis glimbrile blanka neĝo, en kiu videbliĝis malnovaj kaj freŝaj piedsignoj, unuj sur aliaj, freŝaj sur malnovaj.

“Mi volas, ke mi povu fari la parolojn sen perdo de ajna vorto,”

Juehui daŭrigis sian nefinitan parolon. “Sed tuj kiam mi malfermis la buŝon, mi forgesis ĉion. Eĉ tiujn frazojn, kiujn mi plej bone memoris antaŭe, mi ne povis rememori . Nur post kiam sinjoro Zhu sufloris al mi unu aŭ du vortojn, mi povis paroli plu. Mi ne povas antaŭscii, ĉu simila okazos en la vera prezento. Se tiel, kia honto!” Seriozeco aperis sur lia infane naiva vizaĝo. La mola nego plezure knaradis sub iliaj piedoj .

“Tria Frato, ne timu,” Juemin konsolis lin, “post ankoraŭ du au tri provludoj, vi jam bone memoros ilin. Nur agu kuraĝe ... Verdire, sinjoro Zhu nebone adaptis *Trezorinsulon* al teatraĵo. Mi timas, ke la prezentado ne sukcesos.”

Juehui silentis. Li sentis dankemon al sia frato pro ties amo. Li cerbumis, kiel li povos bone ludi la rolon por rikolti laudojn de honoraj gastoj kaj kunlernantoj kaj por plaĉi al sia frato. Li enpensiĝis. Post kelka tempo, li sentis, ke li iom post iom venis en mirlandon. Ĉio ŝanĝiĝis antaŭ liaj okuloj. Li alfrontis la Hotelon Benbow, kie lia malnova amiko Bill loĝis.

Perdinte du fingrojn kaj spertinte multajn aventurojn, li — Old Sea Dog kun kavalireca temperamento — fine trovis la spuron de Bill. Lin kaptis miksaĵo de venĝa ĝojo kaj neesprimebla teruro. Li pripensis, kiamaniere li iru renkonti Bill, kiajn vortojn li diru al li kaj kiel li riproĉu lin, ke tiu malfidele kaj perfide kaŝis la trezorojn. Pensante, li

eksentis, ke tiuj konataj anglalingvaj paroloj nature svarmas en lian cerbon. Kvazaŭ vekiĝinte, li ĝojplene kriis, “Mi komprenas, frato.”

Ĵetinte miran rigardon al li, Juemin demandis, “Pro kio vi tiel ĝojas?”

“Mi ekkonis, frato, la sekreton de teatroludo nun,” Juehui fiere diris kun infaneca rideto. “i pensis, ke mi mem estas *Old Sea Dog*. Tiuj paroloj nature elfluis kaj ne bezonis mian penan rememoradon.”

“Jes, ĝuste tia estas la teatroludo,” diris Juemin ridetante. “Se vi jam konas tion, vi certe sukcesos ... La neĝo maldensiĝis. Ni fermu la ombrelojn. Estas lacige teni malfermitan ombrelon en tia vento.” Dirante, li forskuis neĝerojn de sur sia ombrelo kaj fermis ĝin. Ankaŭ Juehui fermis la sian. Kun la ombreloj surŝultre, ili paŝis ŝultro-ĉe-ŝultre.

La neĝado ĉesis. La vento reduktis iom post iom sian furiozon. Sur mursuproj kaj tegmentoj akumuligis dika tavolo de neĝo, kiu glimbrilis en la malhela krepusko. Inter riĉulaj kortodomaroj * kun nigre lakitaj pordegoj troviĝis kelkaj butikoj brile lumigitaj, kiuj iluminis la solecan straton. En la frosta vespero de vintro, ili disradiis iom da varmo kaj lumo.

“Ĉu vi sentas malvarmon, Tria Frato?” Juemin abrupte demandis amzorge.

“Ne, estas varme. Interbabilante kun vi, mi sentas neniom da frosto.”

“Sed kial vi tremetas?”

“Ĉar mi estas tre ekscitita. Ĉiufoje kiam mi ekscitiĝas, mi tremetas kaj mia koro forte batadas. Je ekpenso pri teatroludo, mi sentas streĉitecon. Verdire, mi tre deziras sukcesi en tio. Ĉu vi ne ridas pri mia naiveco, Dua Frato?” Dirante, Juehui turnis sian kapon kaj ĵetis rigardon al Juemin.

“Tria Frato,” Juemin ameme diris al li, “ne, neniel. Ankaŭ mi deziregas sukceson. Ni ambaŭ same. Kiu ajn el ni gajnas laŭdon, de sinjoro Zhu eĉ simplan, en la klasĉambro, ankaŭ la alia ĝojas por li.”

“Jes, vi pravas.” La korpo de la juna frato pli alproksimiĝis al tiu de la pli aĝa frato Ili ambaŭ iris antaŭen flanko ĉe flanko, forgesante la froston, forgesante la venton kaj neĝon, forgesante la obskuran nokton.

“Vi estas vere bona, Dua Fato.” Rigardante la vizaĝon de Juemin, Juehui ekridetis naive. Kaj Juemin, turninte la kapon kaj rigardante liajn radiantajn okulojn, ekridetis Poste li malrapide diris, “Ankaŭ vi estas bona.” Li faris ĉirkaŭrigardon kaj konstatis, ke ili tuj atingos la hejmon.” “Rapidu, Tria Frato,” li diris, “post la stratangulo, ni jam alvenos la hejmon.”

Juehui kapjesis, kaj ili rapidigis siajn paŝojn. Baldaŭ ili jam eniris en alian straton pli kvietan.

Tiam la stratlampoj jam estis lumigitaj. En la kuba vitrokovrilo la

flamo de olelampo impresis des phi solece en la frosta vento. La lampfosto ĵetis sian palan ombron sur la neĝkovritan teron. Malmultaj piedirantoj hasteme trains la straton kaj malaperis senbrue, forlasante piedsignojn en la neĝo. Tiuj profundaj piedsignoj lace kuŝis tie sen ajna intenco moviĝi ĝis novaj piedsignoj premiĝis sur ilin, kaj nur tiam ili eligis mallaŭtan veon kaj prenis malregulajn formojn sub la premado. Kaj sekve ne plu restis klaraj piedsignoj, sed nur grandaj kaj malgrandaj kavoj sur la longa strato, kie senlima blanko etendiĝis.

La riĉulaj kortodomaroj kun nigre lakitaj pordegoj, silente viciĝis en la frosta vento. Paro da eterne mutaj ŝtonleonoj kaŭris ĉe ambaŭ flankoj de ĉiu pordego. La oscedantaj pordegoj similis al faŭko de monstro. Neniu povis distingi, kio troviĝis en la malluma kavernosimila kortodomaro. Ĉiu riĉula kortodomaro havis longan historion aŭ travivis la ŝanĝadon de multaj posedantoj. Kaj ĉiu tens sian sekreton for de la publiko. La nigra lako defalis kaj oni denove farbis. Kvankam ŝanĝado multe okazis, ĝia sekreto tamen ne malkasiĝis al la ekstera mondo.

Ambaŭ fratoj haltis, kiam ili atingis la pordon de relative granda kortodomaro, kiu sin trovis en la meza parto de la strato. Skrapinte la plandojn de siaj ledsuoj sur la ŝtonŝtupo kaj deskuinte neĝon de sur la vestoj, ili eniris grandpaŝe, kun la ombreloj enmane. Rapide ilia paŝbruo perdiĝis en la malluma kaverno, kaj la antaŭa kvieto

denove regis ĉe la pordo.

Kiel aliaj kortodomaroj, ĉi tiu havis paron da ŝtonaj leonoj gardantaj ĉe la pordo kaj paron da grandaj lanternoj el ruĝa papero pendantaj de la tegmenta alero. Krom tio, aldoniĝis paro da ŝtonaj cisternoj longformaj ĉe la piedo de la ŝtuparo antaŭ la pordo. Sur la flankaj muroj de la pordo pendis po unu ligna tabulo, sur kies ruĝa fono estis skribita la sekva nigra versduo: Bonfara ŝtato, feliĉa familio; Longa vivo, bona rikolto. Sur ambaŭ klapegoj de la pordo estis algluita po kolora figuro de pordogardanta dio kun glavego enmane kaj aspekto impona kaj majesta.

* Kortodomaro -- aro de (ofte 4) domoj konstruitaj ĉirkaŭ korto (j) kvadrata (j) por loĝado.

2

La vento ĉesis, tamen la aero same frostis kiel antaŭe. Nokto falis, sed ĝi ne alportis mallumon. La griza ĉielo kontrastis kun la ŝtonplata grundo kovrita de neĝo. En la mezo de la granda korto plena je neĝo, sterniĝis iom alta irejo pavimita per kvadrataj ŝtonplatoj, kaj ambaŭflanke de la irejo vidiĝis kelkaj vazoj kun umearbetoj.

La pliaĝa frato Juemin antaŭiris. Apenaŭ li supreniris la ŝtupon al la maldekstra domo kaj estis transpasonta la sojlon, kiam audiĝis knabina voĉo fluganta el la fenestro de la maldekstra ĉefa halo

“Dua Sinjorido, Tria Sinjorido, vi revenis ĝustatempe. Oni ĝus ĉetabliĝis. Bonvolu rapidi. Ni havas gastojn ene.”

La parolanta servoknabino nomiĝis Mingfeng, 16-jara, kun longa harplektaĵo. Ŝi surhavis indigan vatitan bluzon sur sia svelta korpo. Ŝia ovala vizaĝo estis plena kaj freŝa. Kiam ŝi parolis kun rideto, du kavetoj aperis sur siaj vangoj. Ŝi naive rigardis ilin per siaj brilaj okuloj. Irante malantaŭe, Juehui ĵetis rideton al ŝi.

“Bone! Unue ni demetu la ombrelojn,” laŭte respondis Juemin. Li grandpaŝe transpasis sojlon kaj eniris sen doni al ŝi ekrigardon.

“Kiu gastas, Mingfeng?” demandis Juehui, kiu jam supreniris la ŝtonan ŝtupon kaj staris sur la sojlo.

“Sinjorino Zhang kaj Fraŭlino Qin. Rapidu.” Post tio, ŝi sin turnis al la ĉefhalo.

Rigardante ŝian dorson, Juehui ridetis. Li staris tie ĝis ŝi malaperis en la ĉefhalo, kaj nur tiam eniris en sian cambron. Lin renkontis Juemin ĝuste eliranta.

“Pri kio vi interparolis kun Mingfeng?” Juemin demandis. “Rapidu por altablīgi. Se vi prokrastos, ili jam finos la manĝon.” Dirinte tion, li foriris.

“Do mi iru kune kun vi . Ne necesas ŝanĝi mian veston, ĉar ĝi ne malsekiĝis,” Juehui respondis. Ĵetinte la ombrelon sur la plankon, li tuj eliris.

“Malordemulo ! Vi neniam akceptas mian fojrefojan konsilon. La proverbo prave diras : Estas pli facile movi monton ol ŝanĝi homan karakteron.” Kvankam Juemin riproĉe grumblis, li tamen mienis ridete. Li reiris en la ĉambbron, levis la ombrelon, malfermis ĝin kaj zorgeme starigis ĝin sur la plankon.

“Kion mi povas fari?” diris Juehui kun rideto, rigardante sian fraton fari tion, “ĉiam tiel mi estas. Vi urĝis min, sed el tio rezultas, ke vi mem malfruigas nin.

“Vi havas pikan langon. Mi ne povas vin konvinki.” Juemin ekridetis kaj paŝis antaŭen.

Lin sekvis Juehui ridetante. En lia cerbo reveliĝis knabina figuro. Tamen ĝi tuj malaperis, ĉar li jam eniris en la ĉefan halon kaj nova vidaĵo altiris lin.

Ses personoj sidis ĉirkaŭ kvadrata tablo. Sur la honoraj sidlokoj estis lia duonpatrino sinjorino Zhou kaj lia patroflanka onklino sinjorino Zhang, ĉe la maldekstra flanko sidis lia kuzino Qin, kiu estis filino de sinjorino Zhang, kaj lia bofratino Ruijue. Kontraŭ la honoraj sidlokoj sin trovis lia plej aĝa frato Juexin kaj lia pli juna fratino Shuhua, kaj la du dekstraj sidlokoj restis vakaj.

Post kiam Juehui kaj lia frato riverencis al sia onklino kaj salutis Qin, ili prenis la vakajn sidlokojn servistino Bofranjo Zhang rapide alportis al ili du bovlojn da rizaĵo.

“Kial vi revenis tiel malfrue? Se via onklino ne venus viziti nin, antaŭlonge ni jam finintus manĝon,” diris afable sinjorino Zhou, kun bovlo en la mano.

“Hodiaŭ posttagmeze sinjoro Zhu ekzercis nin en provludo de teatraĵo, tial ni povas reveni nur nun,” respondis Juemin.

“Antaŭ momento neĝis dense. Estas certe malvarmege, mi supozas. Ĉu vi revenis per palankeno?” demandis sinjorino Zhang kaj amzorge kaj komplezeme.

“Ne, ni revenis piede. Ni neniam prenas palankenon!” respondis Juehui hasteme.

“Mia frato ĉiam timas rimarkigon, ke li uzis palankenon. Li estas humanisto,” klarigis Juexin ridetante. Ĉiuj ĉeestantoj eksplodis per rido.

“Ne estas tro malvarme efektive. La vento jam ĉesis. Survoje, ni interbabiladis, estis agrable,” Juemin ĝentile respondis al sia onklino.

“Dua kuzo, vi ĵus menciis ekzercon pri prezentado,” Qin demandis lin, “Ĉu vi preparas tion por la amuza kunveno? Kiam ĝi okazos en via lernejo?” Ŝi estis pli juna ol li je kelkaj monatoj. Qin estis sia lak-tonomo, sia plena nomo estis Zhang Yunhua. La membroj de la familio Gao ŝatis nomi ŝin Qin. Ŝi estis la plej bela kaj vigla el la parencaj knabinoj de la familio Gao. Nun ŝi studis kiel tria-klasano en la Provinca Nonrnala Lernejo por Knabinoj.

“Ĝi eble okazos ĉe la komenco de la venonta printempa semestro. Ĉi-semestre restas nur iom pli ol unu semajno. Kaj kiam via lernejo komencos libertempon, kuzino Qin?” demandis Juemin.

“Nia libertempo komenciĝis jam en la pasinta semajno. Oni diras, ke mankas monrimedoj, tial fruis la libertempo,” respondis Qin, kiu jam finmanĝis kaj demetis siajn manĝilojn.

“La mono por edukado estas ĉiom uzita por kovri militajn elspezojn. Ĉiuj lernejoj suferas monmankon. Tamen nia lernejo estas escepto tial, ke nia lernejestro havas kontrakton kun fremdlandaj instruistoj. Laŭ la kontrakto, ili devas esti pagataj, ĉu ili donas lecionojn aŭ ne. Ju pli da lecionoj ili donas, des pli multe ni profitas ... Kaj oni diras, ke nia lernejestro havas specialan rilaton kun la provincestro, tial mono ne tiel mankas al nia lernejo.” Juemin ankaŭ demetis sian bovlon.

Mingfeng alportis al li mantukon.

“Estas bone, se vi povas lerni. Ne zorgu pri aliaj aferoj,” intermetis Juexin.

“Kia estas la nomo de ilia lernejo? Tion mi forgesis,” abrupte demandis sinjorino Zhang al sia filino Qin.

“Kiel malbonan memoron vi havas, panjo,” diris Qin kun rideto. “Ĝi estas la Lernejo de Fremdaj Lingvoj. Mi ja sciigis vin pri tio antaŭ longe.”

“Vi pravas. Mi jam maljuniĝis kaj malboniĝis mia memoro. Hodiaŭ mi eĉ preterlasis bonŝancon por gajno en maĝango-ludo,” diris sinjorino Zhang kun rideto.

Nun ĉiuj finis sian manĝon kaj viŝis sian vizaĝon per malseka mantuko. “Fratino, iru en mian cambron por interbabili,” sinjorino Zhou proponis al sinjorino Zhang, kaj starigis flanken puŝante la seĝon. Ankaŭ la aliaj stariĝis kaj sekvis ilin

Qin postiris. Juemin atingis ŝin kaj diris al ŝi mallaŭte, “Nia lernejo varbos knabinojn en la venonta somera libertempo.”

Aŭdinte tion, ŝi ĝoje turnis sian kapon. Ŝia vizaĝo radiis kaj ŝia paro da grandaj, brilaj okuloj fiksiĝis sur lia vizaĝo, kvazaŭ ŝi estus informita pri ĝojiga sensacio.

“Ĉu vere?” ŝi demandis, kun iom da nekredemo. Ŝi pensis, ke li eble ŝercas.

“Tute vere. Ĉu iam mi mensogis al vi?” diris Juemin serioze ĵetinte rigardon al Juehui staranta apude, li aldonis, “Se vi ne kredas, demandu mian fraton.”

“Mi ne diris, ke mi ne kredas vin. La ĝojiga novaĵo alvenas tro abrupte,” ridete diris Qin kun ekscitiĝo.

“Li diris la veron. Sed ankoraŭ ne certiĝis ĝia efektivigo,” intermetis Juehui. “En nia provinco Sichuan estas tro multaj feŭdismaj moralistoj, kiuj havas grandan potencon. Ili certe oponos kontraŭ tio. Knaboj kaj knabinoj en la sama lernejo? ii neniam povas imagi tion al si eĉ en sonĝo!” li diris indigne.

“Tio ne tre gravas ! Ĉio dependas de la decidemo de nia lernejestro,” diris Juemin, “li certiĝis, ke se neniuj knabino kuraĝos sin anonci, li varbos sian edzinon kiel la unuan lernantinon.”

“Mi la unua anonciĝu !” Qin varme deklaris, kvazaŭ kuraĝigate de granda idealo.

“Qin, kial vi ne envenas? Kion vi priparolas ekstere?” demandis sinjorino Zhang el interne.

“Diru al via patrino, ke ni invitas vin al nia ĉambro. Tie mi sciigos al vi la detalojn,” kuraĝigis sin Juemin mallaŭte.

Ŝi senvorte kapjesis kaj direktis sin al la patrino. Ŝi flustris kelkajn vortojn ĉe sia orelo. Tiu ridetis kaj diris, “Bone, sed ne restu tie longe.”

Qin jese balancis sian kapon kaj paŝis al Juemin kaj lia frato. Ili

forlasis la ĉefan halon. Apenaŭ ŝi transpasis la sojlon, ŝi aŭdis bruon de ludpecoj de maĝango miksataj sur la tablo. Ŝi sciis, ke ŝia patrino ludados almenaŭ kvar rundojn.

3

“Ĉi-semestre ni jam finlernis *Trezorinsulo*-n . Ni lernos *Reviviĝo* de L. Tolstoj en la venonta semestro,” Juemin diris al Qin, kun fieraj rideto. Forlasinte la ĉefan halon kaj deirinte laŭ la ŝtona ŝtuparo, ili sin direktis al la ĉambro de Juemin kaj Juehui. “En la venonta semestro, ni havos alian instruiston sinjoro Wu Youling pri ĉina literaturo, kiu publikigis la artikolon *Hommanĝanta Moralo de Konfuceanismo* en la revuo *Nova Junularo*.”

“Pri li mi jam aŭdis, ke li estas tiu, kiu batalas kontraŭ konfuceanismo unuope, ĉu ne? Kiel feliĉaj vi estas!” Qin ekscitite diris kun iom da envio. “Ni ĉiam havas malnovmodajn klerulojn kiel niajn instruistojn pri ĉina literaturo, kiuj ĉiam lernigas al ni tajn librojn kia *El Ĉinaj Antikvaj Eseoj*. Rilate al la angla lingvo, ni ĉiam okupiĝas pri la legolibro *Chamber's English Reader* por la lastaj jaroj. Ĉiam tiaj antikvaĵoj ! ... Mi vere deziras, ke via lernejo tuj abolu la malpermeson al varbo de lernantinoj.”

“Ne malbonas tiu legolibro. Ĉu ne jam tradukita en la ĉinan fare de la fama Lin Qinnan, sub la titolo *Ridetoj de Poetoj*?” moke diris Juehui, kiu postiris.

Turninte sian kapon kaj ĵetinte rigardon al li, Qin grumblis, “Vi ĉiam ŝercas. Mi parolis serioze.”

“Nu, mi tenos la buŝon fermita,” diris Juehui kun- rideto, “Daŭrigu

vian konversacion.” Li intence malrapidigis siajn paŝojn, ke Juemin kaj Qin eniru en la ĉambron, tamen li mem restis staranta sur la sojlo.

En la ĉefhalo briletis la lampo, dum hele brilis la lampoj en la ĉambroj de la dekstra kaj maldekstra aloj kaj en la kontraŭa ĉambro. La bruoj de mikado de maĝango-ludpecoj alflugis el la maldekstra alo de la ĉefa domo. Ĉie aŭdiĝis voĉoj. Kiel bela kaj pura la neĝo faris la korton. Juehui ĉirkaŭrigardis kun levita kapo kaj koro plezurplena. Li eksentis impulson krei kaj ridegi. Li svingis siajn brakojn, por certigi al si ke ĉirkaŭe estas vasta spaco. Kaj, ke li estas libera, katenita kaj maihelpata de nenio.

Li memoris, ke li, frapante la tablon, laŭte ordonis kelneron alporti vinon, kiam li ludis la rolon de Old Sea Dog en la teatraĵo *Trezonnsulo*. Tia fiero abrupte sin levis en lian gorĝon denove. Li kriegis pretervole, “Mingfeng, teon! Tri tasojn!”

Aŭdiĝis respondo el la ĉefa ĉambro de la maldekstra alo. Kelkajn minutojn poste, la servoknabino eliris el ĝi, kun du tasoj da teo en la manoj.

“Kiel nur du tasojn? Mi ja diris tri!” li demandis same laŭte. La alproksimiĝanta servoknabino ŝajne surpriziĝis de lia laŭta demando, kaj iom da teo elverŝiĝis el la tasoj en siaj tremantaj manoj. Poste ŝi levis la kapon kaj ridete rigardis lin, dirante, “Mi havas nur du manojn.”

“Kial vi ne uzas pleton?” ankaŭ li ekridetis. “Nu, alportu ilin al fraŭlino Qin kaj Dua Sinjorido.” Li sin klinis maldekstren kaj apogis al la pordofosto, por ke ŝi povu eniri .

Mingfeng eliris post tempeto. Kiam li aŭdis paŝojn, li intence disigis la krurojn starante meze de la pordo kaj baris al ŝi la vojon.

Ŝi silente staris malantaŭ li kaj, diris post paŭzeto, “Tria Sinjorido, lasu min trapasi.” Ŝi tion diris ne lawte.

Aŭ li ne aŭdis aŭ li afektis neaŭdon, unuvorte, li neniom sin movis. Ŝi ankoraŭfoje diris la samon kaj aldonis averton, ke lia duonpatrino volas ŝian servadon. Sed li ignoris ŝin kiel antaŭe kaj firme staris, kvazaŭ ŝtoniĝinta ĉe la pordo.

“Mingfeng ... Mingfeng !” sonis la voĉo de lia duonpatrino el la ĉefa cambro.

“Lasu min trapasi. Sinjorino Zhou vokas min,” ĝi mallaŭte petis kun maltrankvilo post lia dorso, “ŝi riproĉos min, se mi malfruos.”

“Tio ne gravas,” li ridetis kaj flegme dawrigis, “diru al Sinjorino, ke mi bezonis vin.”

“Tion Sinjorino ne kredos. Se ŝi flamiĝos, ŝi forte min insultos, post kiam la gastoj foriros,” ŝi voĉis mallaŭte.

Tiutempe aŭdiĝis alia knabina voĉo. Lia fratino Shuhua laŭte diris, “Mingfeng , Mingfeng, Sinjorino volas, ke vi plenigu la forneton de ŝia nargileo per tabako.”

Li flankeniĝis kaj cedis vojon al ŝi, kiu tuj elkuris. Shuhua eliris el la ĉefa ĉambro kaj renkontis Mingfeng. Ŝi riproĉis, “Kien vi iris? Kial vi ne respondis, kiam vi estis vokita?”

“Mi alportis teon al Tria Sinjorido,” ŝi respondis kun mallevita kapo.

“Ĉu tio bezonas tiom da tempo ! Vi ja ne estas muta! Kial vi ne respondis, kiam vi estis vokita?" Shuhua aĝis nur dek kvar jarojn, ŝi tamen komencis riproĉi servoknabinon, imitante la manieron de plenkreskuloj, kaj ŝi faris tion tre nature. “Rapidu. Se Sinjorino scios vian prokraston, ŝi riproĉos vin.” Dirinte tion, ŝi sin turns kaj reiris en la ĉefan ĉambron. Mingfeng senvorte sekvis ŝin.

Tiuj vortoj sonis klare kaj penetris en la orelojn de Juehui. Ili vipis lian kapon. Lia vizaĝo tuj ekbrulis. Li sentis honton. Li sciis, ke li mem kaŭzis la riproĉon al la servoknabino. La sinteno de lia fratino vekis antipation ĉe li. Li volus defendi Mingfeng per argumentado, sed io retenis lin. Li observis la okazaĵon , silente starante en mallumo, kvazaŭ tio ne koncernus lin.

Ili foriris kaj li sola restis tie. La vizaĝo de tiu servoknabino denove riveliĝis antaŭ liaj okuloj. La carma vizaĝo ĉiam surhavas obeemon, toleremon kaj senplendemon . Ĝi similas al la maro, kiu akceptas kaj forglutas ĉion , tames eligas nenian muĝon.

La inaj voĉoj el la ĉambro alflugis en liajn orelojn de tempo al tempo, kaj tio vidigis al li alian knabinan vizaĝon. Ankaŭ ĝi estas bela.

Tamen ĝia mieno estas tute malsama ol tiu de la antaŭa. Ribelemo, ardeco, firmeco kaj netoleremo al ĉio riveliĝas sur ĝi. Tiuj du vizaĝoj reprezentas du vivojn kaj du sortojn. Komparante ambaŭ vizaĝojn, li ne sciis kial, li sentis sin pli korinklina al la unua vizaĝo, kvankam li legis pli da feliĉo kaj brila perspektivo sur la alia.

Tiam, antaŭ liaj okuloj, la unua vizaĝo grandiĝas kaj ĝia esprimo de toleremo kaj petego fariĝas pli kortuŝa. Li volus konsoli ŝin kaj ion donaci al ŝi. Sed li ne sciis, kion li donu al ŝi. Li pretervole ekpensis pri ŝia sorto. Li bone sciis, ke ŝia sorto jam estis destinita ĉe ŝia naskiĝo. Kiel multaj aliaj knabinoj de la sama speco, ankaŭ ŝi spertos la saman sorton. Ŝi kredeble ne estas escepto. Pensante pri tio, li sentis la maljustecon de la fatalo. Li volis ribeli kontraŭ tio kaj ŝanĝi tion. Subite li estis kaptita de alia stranga penso. Post kelka tempo li kontraŭvole ekridetis.

“Neeble, tio estas neebla,” li murmuris al si.

“Se tia afero vere okazus?” li demandis sin. Sed kiam li imagis al si la diversajn sekvojn, li tuj perdis sian kuraĝon. Li ridis, dirante, “Kia revo ! Kia revo !”

Tamen tiu revo estis altira. Ŝajnis, ke li ne volis tute ĝin forlasi. Li reveme elmetis al si alian demandon, “Se ŝi sin trovas en la pozicio de Qin?”

“Tiam kompreneble ne prezentigis problemoj!” li decideme

respondis. Tiam, ŝajnis al li, ke ŝi vere sin trovas en la pozicio de Qin, kaj ĉio inter li kaj ŝi farigas natura kaj laŭmora .

Post kelka tempo, li denove ekridis, ridis pri si mem, “Kial tiu stulta penso koviĝas en vi ! ... Tio ne estas amo, sed nur interesiĝo.”

La knabina vizaĝo kun toleremo malaperis iom post iom, kaj alia knabina vizaĝo kun ribeleco kaj varmece denove reveliĝis antaŭ liaj okuloj. Ĝi tamen foriĝis post momento.

“Kiel oni povus resti hejme, kiam la hunoj ankoraŭ ne estas ekstermitaj?” Kvankam li ne ŝatis tiun gurditan frazon, nun li tamen trovis ĝin la plej bona solvo de liaj problemoj. Tial li laŭte eldiris ĝin kun braveco. Per “hunoj” li ne aludis fremdlandanojn, kaj li des malpli volis sin pretigi preni armilon por ekstermi ilin sur batalkampo. Laŭ lia opinio la viroj devas forlasi la hejmon kaj fari eksterordinaran aferon. Sed pri tia afero, li mem eĉ ne havis tre klaran koncepton. Tiel kriante, li eniris en la ĉambron.

Interne, Juemin sidanta ĉe skribtablo babilis kun Qin en kanseĝo antaŭ ĝi. Aŭdinte la voĉon de Juehui, li levis sian kapon kaj ĵetis rigardon al li, kaj poste li ridetante diris al Qin, “Jen , Tria Frato frenezas denove!”

Levinte sian kapon, ankaŭ Qin rigardis al Juehui kaj moke respondis al Juemin, “Ĉu vi ne scias, ke li estas heroo?”

“Eble vi aludis, ke li estas Old Sea Dog. Ankaŭ Old Sea Dog

estas heroo!” diris Juemin kun rideto. Ankaŭ Qin ekridetis.

Juehui, embarasita pro ilia mokrido, kolere resnondis. “Malgraŭ ĉio. Old Sea Doe estas pli bona ol kuracisto sinjoro Liversey, kiu estas ĝentilhomo.”

“Kion vi celas?” Juemin demandis duonmire kaj duonŝerce, “ankaŭ vi farigos ĝentilhomo, ĉu ne?”

“Jes, jes!” respondis Juehui indigne. “Ĉu ni devas nepre fariĝi ĝentilhomoj, nur pro tio, ke niaj avo kaj patro estas ĝentilhomoj?” li fermis sian buŝon kaj ŝajne atendis la respondon de sia frato.

Komence Juemin nur ŝercis kun sia frato. Kiam ĉi tiu vere ekkoleris, li provis trovi konvenajn vortojn por konsoli tin, sed vane. Ankaŭ Qin nenion elbuŝigis, kaj nur silente rigardis ilin.

“Sufiĉe! Tian vivon mi jam ne plu volas,” daŭrigis Juehui. Li ruĝiĝis kaj fariĝis pli ekscitita, dum li plue parolis, “Kial nia plej aĝa frato ofte vespiradas? Ĉar li ne povas vivi plu en la atmosfero de ĉi tiu ĝentilhoma familio, ĉu ne? Tion vi bone scias... Nia familio nun havas kvar generaciojn sub la sama tegmento kaj ankoraŭ ne atingas la kunvivon de kvin generacioj. Sed jam fariĝis tia, kia ĝi estas. En nia familio, ne mankas malkaŝaj kvereloj kaj sekretaj luktoj en ĉiu tago. Ili celas nur kapti iom da familia havaĵo! ...” Ĉe tio, li pli koleriĝis, kvazaŭ io ŝtopus lian gorgon. Ŝajnis, ke li havas multon por paroli, sed li ne povis elverŝi ĝin en la momento. Fakte li koleriĝis ne pro lia

frato, sed pro io alia: pro tiu knabina vizaĝo kun tolerema esprimo. Li pensis, ke li kaj ŝi povus intimiĝi unu kun la alia. Malfeliĉe, alta nevidebla muro jam staras inter ili, nur pro tio, ke li vivis en la ĝentilhoma familio, kiu malebligis lin akiri, kion li volis. Tial ĝin li des pli malamis.

Rigardante la ruĝiĝintan vizaĝon kaj brile radiantajn okulojn de sia frato, Juemin alpaŝis lin. Li premis al li la manon, frapetis lian ŝultron kaj diris emocie, “Mi ne devus ŝerci pri vi. Vi estas prava. Ankaŭ mi dividas vian suferon ... Ni ambaŭ fratoj estu kune por ĉiam...” Li tiam tute ne konsciis, ke Juehui havas knabinon en la menso.

Kiam Juehui aŭdis tiujn vortojn, lia kolero tuj forvaporigis. Li nur balancis sian kapon silente.

Ankaŭ Qin stariĝis. Ŝi diris kun emocio, “Ankaŭ mi ne devus primoki vin, Tria Kuzo. Ankaŭ mi kunestu kun vi por ĉiam. Miaparte, mi des pli pene strebu, ĉar mi troviĝas en pli malfacila situacio ol vi.”

Ambaŭ ili turnis sian rigardon al ŝi. Malĝojo aperis en ŝia paro da grandaj kaj belaj okuloj, en kiuj io tremetis. Anstataŭ la viglan mienon en ordinaraj tagoj, ĝi surhavis penseman kaj malhelan vizaggesprimon, kiu montris ŝian mensan konflikton. Kvankam ili rimarkis tian esprimon sur ŝia vizaĝo la unuan fojon, ili tuj komprenis, pro kio ŝi afliktiĝis.

Tio, kion ŝi diris, estis prava: ŝi troviĝis en pli malfacila situacio ol ili. Ĉar maloftis ŝia malgoja mieno, ŝi aspektis eĉ pli ĉarma. Ili naskis en ŝi deziron: ili volontis oferi ĉion sian, por ke pli frue realiĝu tio, kion tiu knabino aspiris. Sed tiu penso estis nur malplena espero, ĉar ili ne havis konkretajn rimedojn malgraŭ ke ili rigardis tion kiel sian devon.

Ili tute forgesis siajn proprajn ĉagrenojn kaj dronis en penso pri la situacio de Qin.

“Tio ne gravas, kuzino Qin,” Juemin konsolis ŝin, “ni faros ion por vi. Trankviliĝu! Mi kredas, ‘Kiu volas, tiu povas.’ Ĉu vi ankoraŭ memoras tiujn tagojn, kiam vi varbiĝis en la moderna lernejo? Komence mia avo forte kontraŭstaris tion, sed fine ni sukcesis.”

Qin faris kelkajn retropaŝojn, premis la skribtablon per unu mano, sin apogante al ĝi, kaj per la alia palpis la tempion. Ŝi senpense rigardis ilin, kvazaŭ vekiĝinte el sonĝo.

“Tio, kion li diris, estas prava. Trankviliĝu,” Juehui sincere diris al Qin. “Bone preparu viajn lecionojn. Dediĉu pli da tempo al lernado de la angla. Se vi nur sukcesos en la enira ekzameno de la Lernejo de Fremdaj Lingvoj, ekzistos nenia problemo nesolvebla.”

Ŝi milde levis la harojn ĉe la tempio. Ŝi ridetis kaj diris kun iom da maltrankvilo, “Mi tiel esperas. Mia patrino estas prudenta kaj ŝi konsentos pri tio. Mi nur timas, ke mia avino kontraŭstaros. Kaj miaj parencoj klaĉos kontraŭ tio. En via familio, escepte de vi ambaŭ,

ĉiuj kontraŭos.”

“Kio ilin koncernas? Lernado estas via propra afero. Kaj krome, vi ne apartenas al nia familio!” Juehui diris kun miro kaj indigno.

“Vi ne scias, ke mia patrino jam estas multe superŝutita per babilaĉoj pro mia eniĝo al la Normala Lernejo por Knabinoj. La parencoj de mia familio senescepte diris, ke tio estas skandalo en la okuloj de aliuloj ke tia granda fraŭlino kia mi iradas tra stratoj ĉiutage. Kaj mi devas kondukti laŭ la mondumaj moraloj. Lastjare mia onklino primokis min. Kvankam mi sentis nenion, mia patrino tamen multe suferis. Mia patrino estas malnovmoda. Ŝi ne estas tiel rigida kiel aliaj malnovmodaj virinoj, sed ŝi havas sian limon. Ŝi amas min, tial ŝi volonte prenas sur sin ĉiajn sekvojn, ignorante la klaĉojn de parencoj. Ŝi ne opinias, ke mia lernado en la lernejo estas ĝusta. Por ŝi jam sufiĉas mia vizitado al la lernejo. Kial eniri en la lernejon por knaboj kaj eĉ lerni kune kun ili en la sama ĉambro! Pensu, kiu el miaj parencoj kuraĝas aserti, ke tio estas ĝusta?” Ju pli ŝi parolis, des pli ŝi ekscitiĝis. Ŝi rektigis sin. Ŝia brila okulparo alnajliĝis al la vizaĝo de Juemin, kvazaŭ serĉante definitivan respondon de li.

“Mia plej aĝa frato ne kontraŭstaros tion,” diris Juemin preteratente.

“Se li estas la nura aprobanto, kian rolon li povas ludi? Onklino Zhou kontraŭos tion. Kaj onklino Wang kaj onklino Shen ekhavos temon por babilaĉi,” Qin diris.

“Ignoru iliajn babilaĉojn!” diris Juehui. “Krom plenigi siajn stomakojn, ili havas nenion por fari . Ili kompreneble trovas temojn por babilaĉi. Eĉ se vi faras nenion riproĉindan, ili fabrikos ion. Ni tamen ne kapablas kovri ilian buŝon. Ĉiaokaze ili primokas nin. Se tiel, ni ignoru ilin, kiel ajn ili babilacas.”

“Tria Frato bone parolis, kuzino Qin. Ni tiel decidu,” Juemin kuraĝigis ŝin.

“Mi jam decidis,” Ŝiaj okuloj subite ekbrilis kaj vigleco kaj firmeco revenis al ŝi. Ŝi decideme daurigis, “Mi scias, ke oni devas oferi multon por akiri sukceson en reformado. Ĉi-foje mi oferu min mem.”

“Kun tia decidemo vi certe sukcesos,” kuraĝigis ŝin Juemin .

Qin ekhavis rideton kaj ŝi diris kun la sama decidemo, “Estas egale, ĉu mi sukcesos aŭ ne. Malgraŭ ĉio, mi devas fari provon.”

Juemin kaj Juehui ŝin rigardis kun admiro.

En la najbara ĉambro la horloĝo batis la naŭan.

Qin glatigis siajn harojn kaj diris, “Mi devas foriri. Eble ankaŭ ili baldaŭ finos la 4 rundojn de ludo de maĝango.” Forirante, ŝi turnis sian kapon kaj diris, “Vizitu min, kiam vi estos liberaj. Mi havas nenion por fari en la hejmo.”

“Jes,” respondis ambaŭ fratoj unuvoĉe. Ili akompanis ŝin ĝis la pordo. Post kiam ŝi malaperis en la ĉefa ĉambro, ili revenis en la sian.

“Kuzino Qin estas vere kuraĝa knabino,” Juemin ne povis retenigi sian

admiron. Li profundiĝis en meditado. Post momento, li diris, “Mi neniam imagis al mi, ke viglaj knabinoj kia fratino Qin havas siajn suferojn.”

“Ĉiu havas sian suferon. Same mi,” eĥis Juehui. Kiam li eligis tiujn vortojn, li tuj haltigis sian parolon, kvazaŭ li jam malkaŝus, kion li ne volus diri.

“Ankaŭ vi havas suferon? Kian suferon?” demandis Juemin mirigite.

Kun ruĝiĝinta vizaĝo, Juehui defendis sin, “Estas nenio. Mi nur ŝerce diris.” Sen pluaj vortoj Juemin dubeme fiksas sian rigardon sur lia vizaĝo.

“La palankenon de sinjorino Zhang!” aŭdiĝis la sonora voĉo de Mingfeng ekstere.

“La palankenon de sinjorino Zhang!” eĥis la voĉo de Yuan Cheng, mezaĝa servisto. Post kelka tempo la pordo interne de la korto malfermiĝis kaj du portistoj envenis kun la malplena palankeno surŝultre. Ili metis ĝin sur la perono antaŭ la halo.

Sur la strato gongo de gardisto eksonis, peze kaj malgaje. Estis la deka en la nokto.

4

Senviva nokto. Formortis ankaŭ la radioj de la elektraĵaj lampoj. Mallumo regis en ĉi tiu granda sinjora kortodomaro. En la aero ankoraŭ ŝvebis la trista krio, kiun la lampoj eligis, kiam ili formortis. Kvankam mallaŭta, la krio penetris ĉien. Eĉ ĉe murangulo ŝajne aŭdiĝis distingebla plorsingulto. La tempo de ĝojo jam forpasis. Nun alvenis la tempo por plori malĝoje.

La homoj kuŝiĝis kaj, demetinte la tagan maskon, komencis pripensi, kion oni faris en la tago. Ili malfermis sian kaŝejon, “la angulon de la animo”. Ili pentis kaj malgojis pro la vana trapaso de la tago, pro sia perdo dum la tago kaj pro sia mizera vivo en la tago. Nature, malmultaj el ili, tre kontentaj pri ĉio jam komforte endormiĝis. Sed la malfeliĉaj kaj malesperaj personoj bedaŭris sian sorton en la malvarma lito. Ĉu en la brila tago, ĉu en la malluma nokto, ekzistis du malsamaj vizaĝoj de la mondo por ĉi tiuj du malsamaj specoj de homoj.

En la ĉambro de servistinoj, olelampo disŝutis funebre feblan lumon. Sur la meĉo pendis granda brulaĵo siblanta en la flameto, tiel ke en la ĉambro ŝajnis ankoraŭ pli obskure. Dekstre sur du lignotabulaj litoj dormis ĉirkaŭ-tridek-jara servistino He kaj servistino Zhang, kiuj estis taskitaj prizorgi la filon de Juexin kaj sinjorinon Zhou respektive. Ili eligis obtuzan ronkadon intermite. Maldekstre kuŝis grizhara servistino

Huang en samspeca lito, kaj alia pli malgranda lito estis por Mingfeng, la 16-jara servoknabino. Nun ŝi sidis sur la litrando kaj alnajlis sian rigardon al la meĉbrulaĵo de la lampo.

Nun kiam la sinjorinoj kaj fraŭlinoj jam enlitiĝis, ŝi rehavis provizoran liberon de la korpo post tuttaga penado. Ŝi devus ripozi pli frue, sed ŝi alte taksis la liberan tempon en tiuj tagoj. Ŝi volis ĝui tiun tempon kaj ne lasi ĝin forgliti . Tial ŝi ne volis endormiĝi frue. Ŝi cerbumis kaj dronis en rememoro. Dum tiu malfacile akirebla tempo, kiun ŝi ĝuis, neniue intrudiĝis en sian meditadon kaj tute malaperis ĉiuj ordonoj kaj riproĉoj, kiuj sonadis ĉe siaj oreloj tuttage .

Kiel la aliaj, kun masko sur la vizaĝo, ŝi devis laboregi “gaje”, ridi dum la tago. Sed nun, en ĉi tiu valora horo libera, ankaŭ ŝi demetis la maskon, malfermis sian koron kaj ekrigardis en “la angulon de la animo”.

“Mi vivis ĉi tie jam sep jarojn.” Tio estis ŝia unua penso, kiu ofte sin turmentis lastatempe. Sep jaroj were estis longa daŭro. Ŝi ofte miris, ke ŝi pasigis tiujn sep jarojn tiel banale. En tiu tempdaŭro ĝi elverŝis multajn larmojn kaj ricevis nemalmultajn riproĉojn kaj batojn. Sed tio estis nur ordinaraĵoj, kiuj jam fariĝis ornamo de ŝia vivo. Ŝi pensis, ke tio estas neevitebla, kvankam ŝi ne volontis akcepti ĝin, ŝi devas elteni ĝin , kiam ĝi alvenas. Ŝi pensis, ke ĉio en la mondo estas prete aranĝita de ĉiopova kaj ĉioscia dio ; ankaŭ ŝia nuna

situacio estas destinita. Tio estis ŝia simpla kredo, kiu ankaŭ konformis al tio, kion oni diris al ŝi.

Tamen alio naskiĝis en ŝia koro. Ŝi mem ne konsciis pri ĝia estiĝo, sed ĝi komencis moviĝi kaj veki ĉe ŝi aspiro.

“Mi vivis ĉi tie jam sep jarojn kaj la oka baldaŭ alvenos!” Subite ŝi sentis la monotonecon de sia ekzisto kaj ekmalĝojis. Kiel aliaj samsortaj knabinoj, ankaŭ ŝi komencis veadri pri sia sorto. “Kiam Unua Fraŭlino estis vivanta, ŝi ofte parolis al mi pri la lasta ripozejo. Kiu scias, kie estos la mia?” Antaŭ ŝiaj okuloj aperis vasto de sovaĝa tero, kie troviĝis neniuj lumplena loko. Konata vizaĝo flagris en ŝia menso. “Se Unua Fraŭlino ankoraŭ vivus, ŝi prizorgus min, instruus al mi rezonadon kaj lernigus min legi. Nun ŝi jam mortis. Kiel kompatinda homo ! Bonkorulo vivas mallonge.” Ŝi diris en si. Ĉe tio, larmoj jam malsekigis ŝiajn okulojn.

“Kiom da tiaj tagoj mi pasigos?” ŝi demandis sin tragike. La pasinta sceno terure revenis en ŝian menson. Kiel ŝi rememoris, iun neĝan tagon antaŭ sep jaroj, mezaĝa virino kun malica vizaĝo forĝvidis sin disde sia vidviĝinta patro kaj kondukis ŝin al ĉi tiu sinjora domo. Kaj en ŝian vivon enstrudiĝis ordonoj, penadoj kaj larmoj sinsekve. Ĉio ĉi fariĝis nemalhavebla, ordinara, eterne banala afero en ŝia vivo. Kiel aliaj samaĝaj knabinoj, ŝi havis belajn songojn, kiuj malaperis tuj poste. La rigora kaj kruela realo ĉiam alfrontis ŝin. Ŝi songis ankaŭ pri

ĉarmaj ludiloj, luksaj vestoj, bongustaj frandaĵoj kaj varma lito, kiel tiuj, kiujn ĝuis la fraŭlinoj priservataj de ŝi . Tamen tagoj sencese fluadis for kun sia sufero, kaj neniam alportis al ŝi ion novan kaj eĉ esperigan.

“Sorto, ho, ĉio estas destinita de la sorto,” ŝi konsolis sin mem per tiuj vortoj, eĉ kiam ŝi estis batata aŭ riproĉata. Ŝi revis, “Se mi havus favoran sorton kiel la fraŭlinoj!” Ŝi tiel naĝis en tia revo : ŝi portas belajn vestojn ; ŝiaj gepatroj dorlotas ŝin ; sinjoridoj ami ŝin. Kaj poste iu bela sinjorido edzinigas ŝin kaj ili vivas feliĉan vivon.

“Neeble , tio estas revo stulta!” ŝi ridetante riproĉis sin mem. “Mi absolute ne havos tian sorton!” Pensante pri tio, ŝi ĉesis rideti. Ŝi sciis pri tio tute klare. Kontraŭe, kiam ŝi atingos maturan aĝon, la sinjorino diros al ŝi, “Vi jam faris sufiĉe da servado.” Kaj ŝi estos forportita per eta palankeno kaj edzinigita al nekonata viro, kiun la sinjorino elektos por ŝi. Eble tiu viro havos la aĝon de ĉirkaŭ kvardek jaroj. Sekve ŝi malriĉe vivos kune kun li, faros hejmaferojn kaj naskos infanojn por li. Eble okazos, ke ŝi revenos al la antaŭa sinjora domo por priservi sian malnovan mastron post sia edziniĝo. La diferenco nur kuŝos en tio, ke ŝi tiam povos ricevi iom da pago kaj ne estos insultata tiel ofte kiel nun. Tio okazis al Xi'er, la servistino de sinjorino Shen, ŝi pensis.

“Kiel terura afero! Ĉu tio ne signifas, ke ekzistos neniam brila

estonteco?” Kun tiu ideo en la menso, ŝi tremis pretervole. Ŝi rememoris, ke, reveninte post edziniĝo, Xi'er portis jam hartuberon anstataŭ la harplektaĵon. Ŝi ofte vidis Xi'er larmi sola en la ĝardeno. Kelkfoje ĉi tiu rakontis al aliaj, kiel malbone sia edzo traktis ŝin. Tio estis nenio alia ol antaŭdiro al Mingfeng pri ŝia estonteco.

“Estus pli bone morti, kiel Unua Fraŭlino,” ŝi malĝoje veis. Mallumo sufoke ĉirkaŭvolvis ŝin. La lamplumo des pli malfortiĝis pro grandiĝo de la debrulaĵo sur la meĉpinto. Ronkado el la kontraŭaj litoj penetris en ŝiajn orelojn. Ŝi malvigle stariĝis, forigis la meĉobrulaĵon kaj pliheligis la lampon. Jam multe pli hele antaŭ ŝi. Ŝi eksentis sin iom faciligita. Ŝi ĵetis rigardon al la kontraŭaj litoj: la grasa bofratino Zhang dormis sur la flanko, kun peza litkovrilo, el sub kiu montriĝis nur distaŭzitaj haroj kaj malgranda parto de ŝia vizaĝo. Ŝia bleksimila ronkado elŝoviĝis el sub la kovrilo de tempo al tempo. “Kia morta dormo!” blasfemis Mingfeng kun amara rideto.

Tamen la rideto ne malpezigis la ŝarĝon subpremantan ŝian koron. Mallumo atakis ĝin de ĉirkaŭe. Sennombraj minace ridetantaj vizaĝoj svagis antaŭ ŝiaj okuloj. Ili alpremiĝis al ŝi, kelkaj el ili fariĝis koler-mienaj kaj blasfemis. Ŝi timeme kovris siajn okulojn per la manoj kaj denove sidiĝis.

Ekstere la vento komencis hurli. Ĝi forte skuadis fenestrojn kaj triste frapadis la paperojn gluitajn sur la fenestraj kadroj. Frostoj enfiltriĝis tra

fenestropaperoj kaj la ĉambro malvarmiĝis. La lamplumo tremis. Frosto penetris en ŝian manikon kaj kuris tra ŝia korpo. Ŝi ricevis duan frostotremon. Demetinte siajn manojn de sur la okuloj, ŝi rigardis ĉirkaŭen.

“Ne timigu min per Sinjorino,” ensonĝe diris bofratino. He en la kontraŭa lito. Mingfeng surpriziĝis kaj, streĉinte la kolon, direktis sian rigardon al ŝi. Bofratino He sin turnis sur alian flankon vizaĝe al la muro kaj eligis neniun plian sonon.

“Ve, mi prefere enlitiĝu,” Mingfeng suspiris kaj pensis malvigle. Ŝi malbutonis ĉiujn vestojn escepte de la ĉemizo, sub kiu reliefiĝis du supraj mamoj.

“Mia aĝo jam ne estas malgranda. Kia estonteco atendas min?” Mingfeng vespiris. Antaŭ ŝiajn okulojn subite alnaĝis vizaĝo de juna viro. Li verŝajne ridetis al ŝi. Ŝi konis lin klare kaj ŝia koro ĝojiĝis. Radio de espero varmigis ŝian koron kaj ŝi deziris, ke li etendu la manojn al ŝi. Si pensis, ke li eble elsavos ŝin el tia vivo. Sed la vizaĝo soris pli kaj pli alten al la ĉielo ĝis ĝi subite malaperis. Ŝi reveme rigardadis la polvokovritan plafonon.

Frosta ekblovo pikis ŝian bruston kaj ŝi vekiĝis el la revo. Frotante ŝiajn okulojn, ŝi vespire diris, “Ĝi estas nur sonĝo.” Kun bedaŭro ŝi denove rigardis ĉirkaŭen. Demetinte la vatitan pantalonon kaj metinte la vestojn sur la litkovrilon, ŝi rapide ŝovis sin sub ĝin.

Tiam en ŝia menso ekzistis nenio krom du vortoj kirliĝantaj. Ili estis “malfavora sorto”, la vortoj, kiujn Unua Fraŭlino ofte diris al ŝi.

Tiuj du vortoj vipadis ŝian koron. Ŝi ekploris sub la litkovrilo, tre mallaŭte, ke aliaj ne vekiĝu. La lamplumo pli kaj pli malheliĝis. La vento hurlis ekstere, eligante laŭtajn vespirojn.

5

Sur la neĝkovrita strato, obtuza kaj trista gongado tranĉis la kvietan nokton. Du palankenoj sekvis gongobatanton. La portistoj faris malrapidajn paŝojn, kvazaŭ timante perdi la majestan kuniranton. Trapasinte du stratojn, la gongobatanto sin turnis for kaj nur malkreskanta sono de gongo ŝvebis ĉe la oreloj de la portantoj kaj portatoj, la sono, pri kies foresto ili sentis bedaŭron.

Zhang Sheng, pli-ol-kvardekjara servisto gvidis la du palankenojn, kun lanterno en la mano. Pro la severa frostoj, li iris kun ŝultroj kuntiritaj. Liaj okazaj ektusoj rompis la timigan kvieton de la nokto.

Sub la peza ŝarĝo sur la ŝultroj, la portistoj silentis kaj neatenteme paŝegis. Frostoj ĉirkaŭvolvis ilin kaj glacia neĝo pikis iliajn nudajn piedojn en pajlosandaloj. Tamen ili jam kutimiĝis al tio. Ili marŝis per maltrankvilaj kaj egalaj paŝoj. Kelkfoje ili transmetis la ŝarĝon sur la alian ŝultron aŭ demetis unu manon de sur la portostango kaj varmige blovis ĝin. Iom post iom la sango cirkuligis varmecon tra ilia korpo. Eĉ ŝviteroj eliĝis sur iliaj dorsoj kaj malsekigis iliajn malnovajn vatitajn jakojn maldikajn.

Sinjorino Zhang, la patrino de Qin, sidis en la antaŭa palankeno. Kvankam nur 43-jara, ŝi jam portis maljuniĝajn signojn. Post dekdu-runda ludo de maĝango, ŝi elĉerpiĝis. En la palankeno, ŝi pensis nenion en sia vertiĝa kapo. La vento kelkfoje levis la kurtenon de la

palankeno, sed ŝi tion ne rimarkis.

Kontraŭe al sia patrino, Qin ekstreme ekscitiĝis. Ŝi pripensis la gravan aferon, kiu estis okazonta unuafoje en ŝia vivo. Simila al io aminda kaj brile radiant, ĝi kuŝis tuj antaŭ ŝiaj okuloj. Ŝi jam decidis preni ĝin, sed ŝi sciis, ke ŝia etendita mano estos retenita de aliaj, kaj ŝi ankoraŭ ne estis certa, ĉu ŝi povos enmanigi ĝin. Kvankam ŝi jam decidis tion fari, ŝi tamen timis malsukceson. Ŝi ne kuraĝis etendi sian manon por atingi ĝin. Tiuj komplikaj pensoj okupis ŝin. Kaj ŝi sentis jen ĝojon jen melankolion. Ŝi ne atentis la ĉirkaŭaĵojn kaj ŝi absorbiĝis en pensado ĝis ŝia palankeno trairis la pordon kaj estis metita en la halon.

Kiel kutime, ŝi sekvis la patrinon en ties ĉambron. Post kiam la servistino Bofratino Li ŝanĝis la veston de la patrino, Qin faldis la demetitan veston de la patrino, la novan veston por vizitado, kaj metis ĝin en ŝrankon.

“Mi ne scias, kial mi sentas min tiel laca hodiaŭ,” veis sinjorino Zhang, kiu jam surmetis peltan jakon kaj falis en kanseĝon antaŭ la lito.

“Tro longe vi ludis maĝangon, panjo,” diris Qin. Ŝi sidiĝis sur la seĝo apud la tablo kaj ridetante rigardis la patrinon sidantan. “Maĝango-ludo, estas laciga, kaj vi ludis eĉ dek du rundojn. ”

“Vi ĉiam kulpigas min pro maĝango-ludo. Vi ne scias, kion mi, en tia aĝo, povas fari krom ludi maĝangon,” sinjorino Zhang ridetis.

“Alie mi devus preĝi tutan tagon, kiel via avino. Sed estas neeble por

mi tion fari .”

“Mi ne diris, ke vi ne ludu maĝangon. Mi nur diris, ke longa ludado konsumas energion,” Qin senkulpigis sin.

“Tion mi scias,” afable diris sinjorino Zhang. Subite ŝi rimarkis ke la servistino malvigle staras kapkline ĉe la ŝranko, ŝi diris al tiu, “Enlitiĝu, Bofratino Li. Ni ne bezonas vian servon. Tuj kiam tiu estis foriranta, ŝi demandis, “Ĉu teo jam estas infuzita?”

“Jes, ĝi estas preta.” Dirinte, ŝi foriris.

Sinjorino Zhang daŭrigis, “Kion vi diris? — Oh, vi diris, ke longa ludado konsumas energion. Tion ankaŭ mi scias. Mi tamen laciĝas egale, ĉu mia energio estas konsumita aŭ ne. Ĉar mi havas nenion por fari , mia vivo ne vekas intereson ĉe mi. Tiu, kiu vivas longe, fariĝas tedaĵo en la okuloj de aliaj.” Post tiuj vortoj, ŝi fermis siajn okulojn, kun krucigitaj manoj sur la brusto, kvazaŭ endormiĝanta.

Escepte de tiktakado de la horloĝo, kvieto regis en la ĉambro.

Qin volis diri ion gravan al sia patrino. Sed vidinte tiun fermi la okulojn, ŝi sciis, ke ne estas ŝanco paroli. Ŝi stariĝis kaj volis atentigi, ke ŝia patrino enlitiĝu por eviti malvarmumiĝon. Sed apenaŭ ŝi stariĝis, ŝia patrino malfermis la okulojn kaj rigardis ŝin, dirante, “Alportu tason da teo.”

Jesinte, Qin iris al la tetableto kaj prenis tason. Tenante tekruĉon, ŝi plenigis la tason per teakvo kaj alportis ĝin al la patrino. Ŝi metis la tason

sur la apudan tabureton kaj diris al la patrino, “Jen teo, panjo.” Tamen ŝi ne foriris Starante ĉe la flanko de la patrino, ŝi ekscitite rigardis ŝin. Ŝi pensis, ke estas ŝanco paroli, sed ŝi estis iom timema. La vortojn venintajn en la buŝon ŝi englutis.

“Filinjo, ankaŭ vi jam laciĝis hodiaŭ . Enlitiĝu,” la patrino diris mildvoĉe. Ŝi levis la tason de sur la tabureto kaj ektrinkis.

“Panjo,” Qin varme vokis anstataŭ foriri .

“Kio?” Sinjorino Zhang levis sian kapon por rigardi la filinon.

“Panjo,” ŝi denove vokis kun klinita kapo, fingrumante sian jakrandon. Ŝi komencis malrapideme, “Juemin diris, ke la venontan semestron lia lernejo varbos knabinojn. Mi volas anonci min al la lernejo.”

“Kion vi diras? La lernejo por knaboj varbos knabinojn? Kaj vi volas anonci vin?” demandis sinjorino Zhang surprizite, dubante ĉu ŝiaj oreloj ĝuste komunikis al ŝi, kion la filino diris.

“Jes,” Qin certigis mallaŭte. Poste ŝi klarigis, “Tio ne estas strangaĵo. La fama Pekina Universitato jam varbis tri knabinojn. Ankaŭ en Nankino kaj Ŝanhajo estas geaj lemejoj.”

“Kia fariĝos la mondo ! Ne sufiĉas por ĝi havi lernejojn por knabinoj, kaj oni eĉ fondas geajn lernejojn?” veis sinjorino Zhang. “Kiam mi estis knabino, mi neniam imagis al mi tiajn strangaĵojn.”

Tiuj vortoj ŝutiĝis sur Qin kiel malvarma akvo. Ŝi sentis sin frosta tra la

korpo, kaj ŝi silentis. Sed ŝi ankoraŭ ne perdis sian esperon kaj kuraĝo revenis al ŝi iom post iom.

Ŝi daŭrigis, “Panjo, la nuna epoko estas malsama, ol tiu antaŭ pli ol dudek jaroj. La mondo noviĝas tagon post tago. Knaboj kaj knabinoj estas egalaj. Kial mi ne povas lerni kune kun knaboj ? ...”

Ŝi volis diri pli, sed ŝia patrino retenis ŝin. Sinjorino Zhang ridetis, dirante, “Mi ne argumentos kun vi. Mi ne povas venki vin per argumentado . Ĉar vi vizitadis la lernejon por kelkaj jaroj, nature vi havas elokventan langon. Vi povas refuti min per argumentoj el la novaj libroj. Vi nomus min obstina konservativulino.”

Ankaŭ Qin ekridetis, sed tamen ŝi petegis, “Panjo, konsentu pri mia peto. Vi ĉiam fidas min. Vi neniam malkonsentas, kiam mi petas !”

Sinjorino Zhang estis iom kortuŝita. Ŝi diris, “Ĝuste pro tio, mi devis elteni multajn malicajn babilaĉojn de aliaj. Tamen mi ne timas tion. Mi tre fidas vin ... Sed tio estas afero tro grava. Via avino kontraŭstaros la unua kaj al aliaj parencoj levos malfavorajn babilaĉojn.”

“Ĉu vi ne diris, ke vi timas neniajn babilaĉojn, panjo?” Qin varme diris. “Avino loĝas en la monaĥinejo. Ŝi pasigas hejme nur du aŭ tri tagojn en ĉiu monato. Ŝi eĉ ne revenis ĉi tiujn lastajn monatojn . Ne zorgu, kion ŝi diros ! Nun ŝi ne zorgas pri hejmaj aferoj, vi decidu mem, kiel vi decidis pasintfoje, ke mi varbiĝu en la Normala Lernejo por

Knabinoj. La parencoj ne rajtas kontraŭi. Ni ignoru iliajn babilaĉojn .”

Post momenta silento sinjorino Zhang deprimate diris, “Antaŭe mi havis kuraĝon, sed nun mi maljuniĝas . Mi ne ŝatas plu aŭdi babilaĉojn de parencoj. Mi deziras vivi trankvile por jaroj kaj ne impliki min en embarason. Vi scias , ke mi ne estas tiaspeca patrino, kiu konsideras neniom pri la interesoj de la gefiloj. Via patro mortis, kiam vi estis tre juna, kaj mi devas porti la devon kreskigi vin Mi ne vindis viajn piedojn laŭ la malnova moro. Kiam vi estis ankoraŭ tre juna, mi lasis vin lerni kune kun viaj kuzoj en la hejmo de via avo. Poste vi volis lerni en la lernejo, mi sendis vin en la lernejon por knabinoj. Via kuzino Shuzhen havas paron da vinditaj piedetoj, kaj apenaŭ scias legi. Ankaŭ via kuzino Shuhua ĉesis lerni antaŭ longe. Ĉiaokaze mi estas via bona patrino, ĉu ne?” Ŝi volis diri plu, sed laco mutigis ŝin. Ŝi silente rigardis al Qin. Kiam ŝi rimarkis sian filinon en malespera malĝojo, ŝia koro moliĝis. Sekve ŝi mildvoĉe admonis , “Enlitiĝu, filinjo. Feliĉe ni havas multan tempon, ĉar via varbiĝo okazos aŭtune en la venonta jaro. Ni diskutu poste. Mi ĉiel vin helpos.”

Post malĝoja jeso, Qin senespere foriris. Ŝi trairis la malgrandan halon kaj revenis en sian ĉambron. Ŝi sentis sin senespera, sed ŝi ne riproĉis sian patrinon. Fakte ŝi estis tre dankema pro sia amo kaj zorgo.

La ĉambro aspektis morna, kvazaŭ senigita je espero. Eĉ la portreto de ŝia mortinta patro kvazaŭ ekploris. Ŝiaj okuloj malsekiĝis. Ŝi demetis la

jupon kaj metis ĝin sur la liton, kaj poste ŝi iris al la skribotablo, ardigis la flamon de stana olelampo kaj sidiĝis sur kvadrata tabureto ĉe la tablo. En la pliheligita lamplumo ŝiajn okulojn kaptis revuo *Nova Junularo*, kiu kuŝis sur la tablo. Sencele foliumante ĝin, ŝi vidis jenajn frazojn:

“ ... mi kredas, ke antaŭ ĉio mi estas homo, egala homo kiel vi... aŭ almenaŭ mi klopodas fariĝi homo ... Mi ne kredas tion, kion la plej multaj diris ... Mi devas pripensi ĉiujn problemojn kaj klopodi por ilin solvi...”

Ŝi hazarde legis la liniojn el la teatraĵo *La Pseudomo* de Ibsen.

Tiuj vortoj estis revelacio al ŝi, kaj ŝiaj okuloj fariĝis brilaj. Ŝi komprenis, ke ŝi ne estas senespera kaj ĉio dependas de ŝia klopodo. Unuvorte, espero estas kaj dependas de ŝi mem, sed ne de aliaj. Je tiu penso, ŝi sentis, ke tute malaperis ŝiaj malespero kaj malĝojo. Ŝi ĝoje prenis plumon kaj skribis mallongan leteron al Qianru, unu el ŝiaj kunlernantinoj

Kara Qianru,

Hodiaŭ mia kuzo diris al mi, ke la Lernejo de Fremdaj Lingvoj jam decidis varbi knabinojn en la aŭtuna semestro de la venonta jaro. Mi decidis partopreni en ĝia enira ekzameno. Kio estas via opinio? Ĉu vi deziras partopreni kune kun mi? Mi esperas, ke vi ne havos skrupulon. Ĉiamaniere ni devas firme lukti por elhaki novan vojon kaj krei feliĉon

por knabinoj de venontaj generacioj.

Vizitu min, kiam vi estos libera. Mi detale rakontos al vi. Mia patrino bonvenigos vin.

Qin

Fininte la leteron, ŝi tralegis ĝin, aldonis daton kaj interpunkciojn laŭmode. Ŝia patrino opiniis, ke letero skribita en la buŝa lingvo estas pli longa, ol tiu skribita en la klasika lingvo, kaj eĉ netolereble vulgara. Qin tamen ŝatis skribi parollingve. Por lerni pri tio, ŝi zorgeme studis leterojn sub la rubriko *Nia Leterkesto* de la revuo *Nova Junularo*.

6

Gao Juexin estis la plej aĝa frato de Juemin kaj Juehui. Kvankam ili estis naskitaj de la sama patrino kaj vivis en la sama familio, ili tamen havis malsamajn poziciojn. En la granda familio, Juexin estis la plej aĝa filo de la plej aĝa filo de Grandsinjoro Gao. Pro do lia sorto jam destiniĝis je lia naskigo.

Belaspekta kaj inteligenta, li estis dorlotata de la gepatroj, kaj laŭdita de la instruisto de privata lernejo. Ĉiuj, kiuj lin vidis, antaŭdiris, ke estonte li akiros grandajn sukcesojn, kaj liaj gepatroj ĝojis, ke estas feliĉe por ili havi tian filon.

Ĉirkaŭata de dorlotaj zorgoj, Juexin kreskadis kaj poste eniris en mezlernejon. Tiam li estis unu el la plej bonaj lernantoj kaj, post kvarjara lernado en mezlemejo, akiris la unuan lokon en la diplomitiga ekzameno. Li multe interesiĝis pri kemio kaj intencis daŭrigi sian studon en fama universitato de Pekino aŭ Ŝanhajo, eĉ ankaŭ studi en Germanio. Lia kapo plenis je multaj belaj revoj. Tiutempe li fariĝis enviinda inter siaj kunlernantoj .

Tamen malfeliĉo venis al li. Dum studado en la mezlernejo li perdis sian patrinon kaj lia patro edzinigis pli junan kuzinon de lia mortinta patrino kiel lian duonpatrinon. La cirkonstancoj ŝanĝiĝis. Kaj li perdis la patrinan amon. Li profunde sciis, ke nenio povas anstataŭi la

patrinan amon. Sed tio ne postlasis rimarkeblan vundon en lia koro ; li havis ion pli gravan — la estontecon kaj belan revon. Krome, li havis en la koro sian kuzinon Mei, kiu povis lin kompreni kaj konsoli.

Sed finfine lia revo frakasiĝis, frakasiĝis kruele. Tiun vesperon kiam li hejmenvenis, kun sia diplomo kaj la laŭdoj de la instruistoj kaj kunlernantoj, lia patro venigis lin en sian ĉambron kaj diris al li

“Ĉar vi jam diplomitiĝis el la mezlernejo, mi volas edzigi vin. Via avo deziras havi pranepojn, kaj mi nepon pli frue. Nun vi jam atingis la aĝon por edziĝi. Mi volas edzigi vin frue por plenumi mian deziron. Mi akumulis iom da mono dum mi funkciis kelkajn jarojn kiel ŝtatoficisto. Kvankam ĝi ne estos granda sumo, ĝi povas kovri la elspezojn por vivbezono. Nun mi ne tute sanas kaj volas ripozi hejme, kaj ke vi helpu min prizorgi la familion, tial vi certe bezonos edzinon kiel helpanton. Mi planas edzigi vin al la filino de la familio Li. La 13-a de la venonta monato estos bonaŭgura tago kaj ni anoncos vian fianciĝon. Vi edziĝos antaŭ la jarfino...”

Tiuj vortoj frapis lin tute neatendite. Li komprenis ilin, tamen malklare. Li nur kapjesis senvorte. Li ne kuraĝis ĵeti rigardon al la okuloj de la patro, kvankam tiu restis tiel afabla kiel antaŭe.

Li diris neniun oponan vorton kaj li havis nenian ribeleman ideon en la kapo. Li nur balancis sian kapon por montri, ke li voluntas obei la patron. Post kiam li revenis en sian ĉambron kaj fermis la pordon, li

tamen ekploris en la lito, kun sia kapo volvita per litkovrilo. Li priploris siajn diskrevintajn revojn.

Rilate edziĝon al la filino de la familio Li, Juexin iam aŭdis ion neklaran. Ĉar aliaj kaŝis tion de li, li sentis ĝeniĝon por informiĝi pri tio. Kaj aliflanke li ne kredis tiun onidiron. Fakte, antaŭ kelka tempo, kelke da ĝentilhomoj kun needziniĝintaj filinoj estis treege impresitaj de lia belaspekto kaj inteligento. Sekve svatistinoj vizitadis lian hejmon. Post interkonsiligo de liaj patro kaj duonpatrino, ili prenis el ili du fraŭlinojn kiel kandidatojn, ĉar lia patro ne estis certa, kiu el ili pli taŭgas por la filo. Kaj plie, la du familioj, kiuj sendis svatistinojn ĝuis saman influhavan reputacion. Senhelpa, la patro lotis por solvi la elekton. Li skribis la familiajn nomojn de la du fraŭlinoj sur du pecetoj de ruĝa papero kaj ilin buligis en la mano. Pie preĝinte antaŭ la portretoj de praavoj, li prenis unu senelekte. Tiamaniere la filino de la familio Li estis elektita. Tamen Juexin informiĝis pri tio nur tiuvespere.

Jes, li iam sonĝis pri ideala geedziĝo. En la koro li havis idealan fraŭlinon — lian kuzinon Mei, kiu povis kompreni kaj konsoli lin. Dum kelka tempo li eĉ estis kaptita de la revo, ke ŝi estos lia edzino, kaj pregadis pri tio, ĉar en la familioj de ĝentilhomoj, geedziĝo de gekuzoj de patra kaj patrina flankoj estis ordinara afero. Li enamiĝis al ŝi, sed lia patro estis edzigonta lin al alia fraŭlino, kiun li ne konis, kaj plie la dato de geedziĝo estos en ĉi tiu jaro. Ankaŭ lia espero pri plua

lernado krevis kiel veziko. Tio vere estis granda frapo al li. Lia estonteco estis ruinigita kaj li disreviĝis.

Li dronis en malespera plorado kun la kapo volvita en litkovrilo. Li ne ribelis nek volis ribeli. Li toleris tion. Li obeis al la volo de sia patro, sen plendo. Lia koro tamen ploris per sangaj larmoj pri li mem kaj pri la fraŭlino de li amata.

En la tago de fianciĝo, li estis manipulata kiel marioneto kaj ameme elmontrata kiel trezoro. Nek kun ĝojo nek kun malĝojo li faris, kion oni ordonis, kvazaŭ li farus sian devon. Nokte, kiam la farso finiĝis kaj la gastoj foriris, li elĉerpiĝis kaj falis en profundan dormon sen memoro pri ĉio.

Post tio, li disiĝis de sia amata ĉevaleto — kemio, kaj de ĉio, kion li lernis en la lernejo. Li metis siajn librojn orde en librokeston kaj ne volis foliumi ilin plu. Tuttage li vagadis sencele. Li nur ludis maĝangon rigardis teatraĵojn, drinkis alkoholaĵon aŭ faris preparojn por geedziĝo laŭ la ordono de sia patro.

Li ne plu funkciigis sian cerbon por pripensi, nek kuraĝis tion fari .

Post malpli ol duonjaro lia novedzino alvenis. Por fari la geedziĝan ceremonion liaj avo kaj patro konstruigis provizoran scenejon por teatra prezentado. La geedziĝa ceremonio ne estis tiel simpla kiel li imagis al si. Fakte li mem kvazaŭ ludis teatraĵon dum tri tagoj antaŭ ol akiri sian novedzinon. Denove li estis manipulata kiel marioneto kaj ameme

elmontrata kiel trezoro dum tiuj tagoj. Li sentis nek ĝojon nek malĝojon. Lin akompanis nur laco kaj iom da ekscito. Sed kiam la farso finiĝis kaj la gastoj foriris, li ankoraŭ ne povis fali en profundan dormon, ĉar la nekonata fraŭlino kuŝis ĉe li. Li devis daŭrigi sian roladon.

Li edziĝis. La avo havigis al si bonepinon, kaj la patro bofilinon kaj la aliaj gajecon dum mallonga tempo. Kaj li mem ekposedis ion. Li akiris mildan edzinon, kiu povis ameme zorgi pri li kaj ne estis malpli bela ol lia kuzino Mei. Li kontentiĝis. Dum mallonga tempo li ĝuis diversajn ĝojojn, kiujn li ne antaŭsupozis. Li por mallonga tempodaŭro forgesis siajn revojn kaj brilan estontecon kaj forgesis la alian fraŭlinon. Li kontentiĝis kaj ebriiĝis pro la amo de sia edzino. Kun ofta rideto sur la vizaĝo li akompanis sian novedzinon tuttage en la ĉambro. Oni enviis lian feliĉon kaj li mem pensis, ke li estas feliĉa.

Unu monato pasis. Iun vesperon lia patro denove venigis lin en sian ĉambron kaj diris al li:

“Nun vi jam edziĝis. Vi devas vivteni vin sendepende, por ke oni ne babilaĉu kontraŭ vi. Mi vin plenkreskigis kaj edzigis. Mi jam plenumis mian devon kiel patro. Kaj de nun, vi devas zorgi pri viaj propraj aferoj. Kvankam ni havas sufiĉan monon por daŭrigi vian lernadon en malsupra baseno, tamen vi jam havas edzinon kaj aliflanke mi kaj miaj fratoj ankoraŭ ne dividis inter ni la hejmajn havaĵojn. Kiel kontisto de la tuta familio, mi ne povas maldece lernigi

vin en malsupra baseno. Kaj krome, via avo certe ne aprobos tion. Estas ankaŭ ne bone por vi restadi hejme senfare ... Tial mi trovis oficon por vi en la Komerca Kompanio de Okcidenta Sichuan. Kvankam la salajro ne estas tiom granda, ĝi tamen sufiĉas por poŝmono de vi ambaŭ. Se vi laboros diligente, vi vidos viajn brilajn tagojn. Morgaŭ mi gvidos vin al la kompanio kaj vi jam komencos vian oficon. Nia familio havas multajn akciojn de la kompanio kaj mi estas unu el ĝiaj direktoroj. Miaj amikoj en la kompanio donos helpon kaj zorgon al vi.”

Tion la patro diris senemocie vorton post vorto, kvazaŭ lia parolo estus ekstreme ordinara. Juexin aŭskultis kaj kapjesis. Li tamen ne esprimis sian aprobon aŭ malaprobon. En lia cerbo turniĝis nur unu ideo — ĉio estas finita. Li havis multon en la koro, sed li diris nenion.

Posttagmeze de la sekva tago, lia patro komprenigis al li kiel li devas kondukti al aliuloj en la kompanio, kaj Juexin enbatis tion en la kapon. Du palankenoj portis ilin al la malantaŭa pordo de la Komerca Kompanio de Okcidenta Sichuan. Juexin sekvis sian patron en la oficejon. La patro prezentis lin al la pli-ol-kvardekjara ĝiba administranto Huang kun liphararo en formo de inversa V, al la kontisto Chen kun trajtoj de maljunulino, al la maldika, alta kasisto Wang kaj du au tri aliaj oficistoj sen distingindaj trajtoj. La administranto elmetis al li kelkajn demandojn kaj li facile respondis kvazaŭ el memoro. Kvankam ili sin montris tre ĝentilaj al li, li tamen opiniis, ke li ne apartenas al ilia

speco, ĉu en dirmaniero, ĉu en sinteno. Li eĉ miris, kial li malofte vidis tiuspecajn personojn antaŭe.

Lia patio foriris restigante lin tie. Konsternita kaj soleca, li estis kvazaŭ forlasita sur dezerta insulo. Li havis nenion por fari. Sidante en la oficejo de la administranto, li stulte rigardis lin interparolantan kun aliaj. Li sin trovis en tia embaraso dum pli of du horoj. Subite la administranto rimarkis lin kaj ĝentile diris al li, “Hodiaŭ estas nenio farinda, frato. Hejmeniru.”

Kvazaŭ liberigita kaptito, li ĝoje hejmeniris per luita palankeno. Dumvoje li urĝigis la portistojn. Tiam, en liaj okuloj, nenio en la mondo estis pli bona ol la hejmo.

Li atingis la hejmon. Li sin anoncis unue ĉe la avo, kiu donis al li instrukcion, kaj poste ĉe la patro, ankaŭ kiu dons al li instrukcion. Fine li reiris en sian ĉambron. Lia edzino demandis lin pri tio kaj alio. Malgraŭ ĉio, li trovis konsolon ĉe sia edzino.

La sekvan tagon je la deka, post la matenmanĝo, li iris al la kompanio kaj hejmeniris je la kvara posttagmeze. En tiu tago li ekhavis sian propran oficejon kaj komencis sian oficon sub direktado de la administranto kaj aliaj kolegoj.

Tiamaniere, Juexin, 19-jara, paŝis en la socion. Iom post iom li konis la medion kaj alproprigis al si novan manieron por vivi en ĝi. Samtempe liaj scioj, kiujn li akiris en la lernejo, reduktigadis ĝis nulo.

Tiuspeca vivo ne estis plu fremda al li. Kiam li unuafoje ricevis sian salajron de 30 juanoj, li pleniĝis de ĝojo kaj malĝojo . Unuflanke ĝi estis la unua monsumo, kiun li perlaboris, sed aliflanke ĝi estis la pago por lia perdita estonteco. Sed poste li pasigis la tempon monotone monaton post monato kaj kiam li ricevis sian salajron en ĉiu monato, nenia speciala sento estiĝis en li, nek ĝojo nek malĝojo.

Tamen tia vivo estis tolerebla por li, sen gojo aŭ malĝojo. Kvankam ĉiutage li rutine alfrontis tiujn samajn vizaĝojn, aŭskultis tiujn gurditajn parolojn kaj faris tiujn tedajn laborojn, ĉio ĉirkaŭ li tamen restis trankvila kaj stabila. Cetere familianoj ne ĝems lian pacan vivon kun la edzino.

Post malpli of duonjaro, alia granda ŝanĝo okazis en lia vivo. Epidemio forrabis lian patron ; larmoj de li kaj liaj gefratoj ne povis savi la patron. La respondeco de la familio falis sur liajn ŝultrojn. Li devis zorgi pri la duonpatrino, du pli junaj fratinoj kaj du pli junaj fratoj, kiuj vizitis lernejon. Tiam li havis nur dudek jarojn.

Kun la koro plena de malĝojo, li priploris sian mortintan patron, tamen li ne imagis al si, ke lia situacio fariĝos pli plorinda. Nelonge poste lia malĝojo malaperis. Li ŝajne plene forgesis sian patron, nur post mallonga tempo jam ties ĉerko enteriĝis. Ne nur sian patron, sed ankaŭ ĉion en la pasinteco kaj eĉ sian junecon li tute forgesis. Li kviete metis la pezan ŝarĝon de la granda familio sur siajn junajn ŝultrojn.

Dum la unuaj monatoj la ŝarĝo sur liaj ŝultroj ne estis tre peza kaj li

ne sentis sin streĉita sub ĝi. Tamen post mallonga tempo multaj videblaj kaj nevideblaj sagoj pafiĝis al li. Kelkajn el ili li evitis, sed li estis trafita de aliaj. Li eltrovis ion ne rimarkitan — la alian flankon de la ĝentilhoma familio.

Sub la kamuflaĵo de paco kaj amo, li vidis malamon kaj konflikton. Kaj li mem fariĝis la objekto celata kaj atakata de aliaj. Kvankam li forgesis sian junecon pro la ĉirkaŭa medio, la fajro, de juneco ankoraŭ brulis en lia koro. Li indignis kaj luktadis. Li pensis, ke liaj agoj estas ĝustaj. Tamen la rezulto de lia luktado nur kaŭzis al li pli multajn ĉagrenojn kaj havigis al li pli multajn malamikojn.

La familio Gao konsistis el kvar branĉoj. Lia avo havis kvin filojn, el kiuj la dua mortis antaŭlonge. Krom la parencoj de la branĉo de lia patro, pli intiman rilaton li tenis kun sia tria onklo. Liaj kvara kaj kvina onkloj kun siaj familibranĉoj malbone rilatis al li. La kaŭzo kuŝis en tio, ke lia duonpatrino senkonscie ofendis lian kvaran onklinon. Krom ĉikane kvereli kun lia duonpatrino, tiu ankaŭ instigis lian kvinan onklinon malpaciĝi kun lia familibranĉo. Pro ilia fabrikado komencis cirkuli klaĉoj pri li kaj lia familibranĉo.

Lia luktado estis tute senrezulta. Kaj li elĉerpiĝis. “Kian bonon alportos tia seneesa konflikto?” li sin demandis. Tiaj virinoj kiaj liaj kvara kaj kvina onklinoj kaj la kromedzino de la avo neniam ŝanĝos sin kaj kondutos alimaniere. Li mem ne povis persvadi ilin ĉesigi la

konflikton, kial do li ĝenu sin kaj malŝparu sian energion en tio? Li do elpensis novan rimedon por ilin trakti. Li ĉiamaniere evitis konflikton kun ili kaj sin plaĉigis al ili laŭeble. Li montris tre grandan respekton al ili. Li akompanis ilin en ludado de maĝango kaj faris aĉetojn por ili ... Unuvorte, li oferis ioman tempon por plezurigi ilin, por ke li povu vivi kviete .

Post nelonge lia juna fratino Shurong mortis de ftizo. Kvankam malĝojo naskiĝis en li pro tio, li tamen sin sentis iom faciligita, kvazaŭ lia ŝarĝo pli malpeziĝus.

Pli poste venis en la mondon lia unua bebo — filo. Li estis tre dankema al sia edzino, ĉar tio alportis al li grandan ĝojon. Antaŭ tio li konsideris sin senespera homo, kiu neniam havis ŝancon realigi la belajn revojn de la pasinteco. Li plu vivis nur por surŝultrigi la familian ŝarĝon kaj vivteni la familiobranĉon postlasitan de lia patro. Nun tamen li ekhavis sian karegan filon el siaj sango kaj karno, kaj li povis bone nutri kaj eduki lin, por ke tiu realigu lian ambicion. Ĉar la filo estis parto de li, la feliĉo de la filo estis ĝuste tiu de li mem. Per tiu penso li iom konsoliĝis. Li pensis, ke lia ofero ne estas vana.

Post du jaroj okazis la Movado de la Kvara de Majo. Fervoraj priskriboj pri tiu Movado aperis en ĵurnaloj kaj vekis la forgesitan junecon ĉe Juexin. Kiel siaj du fratoj, li avide legadis en loka ĵurnalo novaĵojn el Pekino, kaj poste novaĵojn el Ŝanhajo kaj Nankino, kie

okazis grandskalaj strikoj de komercistoj komence de junio. Kiam la loka ĵurnalo reaperigis artikolojn el *Nova Junularo* kaj *Semajna Revuo*, li rapidis al la ununura vendejo de gazetoj kaj ĵurnaloj en la urbo kaj aĉetis ekzempleron de freŝa numero de *Nova Junularo* kaj du aŭ tri ekzemplerojn de *Semajna Revuo*. Ĉiu vorto en la revuoj, kiel fajrero, bruligis entuziasmon de li kaj liaj fratoj. La originalaj argumentoj kaj patosaj frazoj, kiuj posedis nekontraŭstareblan forton, frapis kaj tuj konvinkis ilin tri.

Sekve, *Nova Junularo*, *Nova Tajdo*, *Semajna Revuo*, *Dimanĉa Revuo*, *Geknaboj en Ĉinio* kaj aliaj gazetoj venis en iliajn manojn unu post alia. Nove eldonitajn kaj eĉ malnovajn numerojn de *Nova Junularo* kaj *Nova Tajdo*, se nur haveblaj ĉe la vendejo, ili senescepte aĉetis. La vendisto, priserĉinte amason da malnovaj eldonaĵoj, trovis eĉ kelkajn numerojn de *Junulara Gazeto* la malnova eldono de *Nova Junularo*, kaj sendis al ili.

Ĉiuvespere li kaj liaj du fratoj alterne legis tiujn ĵurnalojn kaj gazetojn, eĉ ne preterlasante la rubrikon *De la Legantoj*. Kelkfoje ili diskutis pri diversaj problemoj pritraktataj en la revuoj. Liaj du fratoj havis pli radikalajn ideojn ol li. Ili ofte nomis lin subtenanto de la “riverencismo” de la konservativa profesoro Liu Bannong. Li mem ofte konfesis, ke li ŝatas la “nerezistismon” de L. Tolstoj. Fakte, krom *Ivan la Malsaĝulo*, li legis nenion de L. Tolstoj pri tiu temo.

Por li, “riverencismo” kaj “nerezistismo” efikis tre utile, ear

dank' al tiuj ideoj, li povis pacige kombini la teoriojn en *Nova Junularo* kun la realo de sia granda familio. El tio li akiris konsolon. Unuflanke li konvinkiĝis pri la novaj teorioj, kaj aliflanke li obeeme daŭrigis sian rutinan vivon en la malnova medio. Kaj li eĉ ne trovis kontraŭdiron inter ili.

Pro tio li ekhavis duoblan personecon : en la malnova socia vivo kaj en la malnovmoda familio, li sin montris kiel malfirman kaj maldecideman sinjoridon; sed kiam li kunestis kun siaj du fratoj, li aspektis kiel novmoda junulo kun radikala pensmaniero. Kompreneble liaj du fratoj ne komprenis ĉi tiun por ili strangan konduton. Kiam ili ofte ŝutis riproĉojn super lin, li tamen tolereme eltenis. Spite al tio, li ankoraŭ daŭre legadis la librojn kun novaj pensoj kaj ankoraŭ daŭre vivis malnovmodan vivon.

Lia filo komence rampadis, poste lernis piediri kaj eldiri kelkajn simplajn vortojn. Li kreskis iom post iom. Tiun procedon Juexin zorgeme observis. La infano estis aminda kaj inteligenta. Juexin verŝis preskaŭ sian tutan amon sur la infanon. “Tion, kion mi volis fari sed ne povis plenumi,” li pensis, “li devos realigi anstataŭ mi”. Pro profunda amo al sia filo, li ne volis dungi mamnutristinon, sed volis, ke lia edzino lin mamnutru. Feliĉe ŝi havis sufiĉan lakton. En ĝentilhoma familio tio estis senprecedenca afero kaj pro do estiĝis klaĉoj. Li tamen toleris. Li kredis, ke li faras tion por la feliĉo de sia filo.

Tion lia edzino komprenis kaj kontente aprobis.

Ĉiuvespere lia edzino kaj filo ĉiam enlitiĝis pli frue ol li . Antaŭ ol enlitiĝi, li ĉiam iris al la lito kaj pririgardis la naivan vizaĝon de sia fileto, kiu dormis ĉe lia edzino aŭ sur ties brako. La vizaĝeto forgesigis al li ĉion. Kun senlima amo al sia fileto, li emis klini sin kaj kisi la belan vizaĝeton, murmurante kelkajn malklarajn vortojn. Kvankam tiuj vortoj ne portis multan sencon, ili tamen nature elfluis el lia buŝo, kvazaŭ akvo fontanus. Tiuj vortoj nur montris liajn dankemon, esperon kaj amon.

Li ne sciis, ke liaj gepatroj estis donintaj la saman amon al li, kiam li estis infano. Ankaŭ li aŭdis de ili tiujn vortojn plenajn de dankemo, espero kaj amo.

7

Dimanĉon posttagmeze, Juexin iris al la Komerca Kompanio de Okcidenta Sichuan pro ofico kiel kutime. Tie la dimanĉoj ne estis ferioj.

Li apenaŭ eksidis en la oficejo kaj englutis kelkajn plenbuŝojn da teo, kiam Juemin kaj Juehui eniris. Preskaŭ en ĉiuj dimanĉaj posttagmezoj ili venis en lian oficejon por interbabili. Kiel kutime, ili aĉetis kelke da novaj revuoj kaj alportis ilin al la oficejo.

La kompanio, kie Juexin oficis, krom luigi butikojn en la bazaro, funkciigis malgrandan elektrejon, kiu provizis per porlumiga elektro siajn luantojn kaj la butikojn de la najbaraj stratoj. La bazaro okupis grandan areon, kie instaligis butikoj de diversaj specoj. La kompania oficejo zorgis pri la aferoj de luigo, pagigo k. a. La vendejo de novaj ĵurnaloj kaj gazetoj troviĝis ĉe la maldekstra angulo antaŭ la malantaŭa pordo de la bazaro. Tial la vendejo estis oportuna por Juexin kaj liaj fratoj, kaj ĝi tenis intiman rilaton kun ili.

“Ekzempleroj de ci tiu numero de *Nova Junularo* estas malmultaj. Kiam ni atingis la vendejon, nur unu ekzemplero restis. Se ni estus malfruaj kelkajn minutojn, ĝi estus aĉetita de alia,” diris Juehui kun rideto. Dorsen klininte sin en kanseĝo ĉe la fenestro, li malfermis la gazeton tiel zorgeme, kvazaŭ ĝi estus trezoro en liaj manoj.

“Mi jam petis mastron Chen de la vendejo, ke li nepre rezervu unu

ekzempleron por mi, ĉiufoje kiam nova numero alvenos,” pretervole diris Juexin, kiu laboris super la kontolibro, kiam li aŭdis la vortojn de Juehui.

“Via peto neniom helpas, ĉar estas multaj legantoj, el kiuj la plejparto estas abonantoj. Ĉi-foje nur tri pakoj alvenis kaj ili elĉerpiĝis en malpli ol du tagoj,” Juehui ekscitige klarigis. Li rimarkis eseon en la gazeto kaj komencis legi kun intereso.

“Aliaj pakoj baldaŭ alvenos. Chen diris, ke ili jam estas survoje, ĉu ne? Tiuj tri pakoj estis eksprese senditaj,” intermetis Juemin, ham li eksidis. Li denove stariĝis kaj prenis ekzempleron de *Geknaboj en Ĉinio* de sur la skribotablo. Sidante en la antaŭa sidloko, li ĝin foliumis Krom lia seĝo dekstre, estis du aliaj seĝoj en vico ĉe la muro. Du tetabletoj estis metitaj inter ili. Lia seĝo estis plej proksima al la fenestro ; inter ili estis la turnseĝo de Juexin.

Tiuj tri silentis. Nur aŭdiĝis kontinua kaj klara tiktakado de abak-globetoj. La varmaj radioj de la vintra suno deklive filtriĝis tra la helblua kurteno katuna.

Alflugis paŝbruoj de ekstere. El ili klare supersonis paŝbruo de ledaj ŝuoj sur la cementa grundo kaj ĝi pli kaj pli alproksimiĝis. La ledŝuoj suriris la peronon kaj eniris la pordon de la oficejo. Tuj poste la por-dokurteno de la ĉambro estis ŝovita flanken kaj aperis maldika, alta junulo. Ili tri levis la kapon kaj rigardis lin. Juexin salutis lin ridetante, “Jianyun.”

La enirinto estis Chen Jianyun. Interŝanĝinte salutvortojn kun Juexin kaj liaj fratoj, li prenis la freŝdatan lokan ĵurnalon de sur la tablo kaj sidiĝis apud Juemin. Post kiam li fluglegis lokajn novaĵojn, li metis ĝin sur la tetableton. Turninte sian kapon al Juemin, li demandis, “Ĉu via lemejo jam komencis la vintran libertempon?”

“Oni jam finis la instruadon kaj atendas la finan ekzamenon en la sekva semajno,” flegme respondis Juemin, levinte sian kapon kaj ĵetinte rigardon al li. Kaj li denove klinis sian kapon super *Geknaboj en Ĉinio*.

“Mi aŭdis, ke la Studenta Federacio prezentos dramojn en la Teatro Wanchun por kolekti monon por fondi lernejon por popolanoj, ĉu?” demandis Jianyun kun la sama fervoro.

“Eble jes, mi ne priatentis tion,” respondis Juemin same tiel flegme kun la kapo iom levita. “Ne estas certe, ke la Studenta Federacio faros tion. Eble du aŭ tri lernejoj iniciatis tion.”

Juemin diris la veron : ordinare li ne priatentis aferojn de tiu speco. Ĉiutage li iris al la lernejo por lecionoj kaj hejmeniris tuj post kiam la lecionoj finiĝis . Li estis ludonta la rolon de kuracisto sinjoro Liversey en la teatraĵo *Trezorinsulo* dum la amuza kunveno de la venonta Printempa Festo nur pro do, ke lia angla instruisto taskis al li tiun rolon.

“Ĉu vi ne iros por rigardi? Oni diras, ke ili prezentos *Kiam Fraŭlino Edzinigas* de Hu Shi kaj *La Pupodomo* de Ibsen. Ili certe estos ne

malbonaj, mi supozas.

“La teatro tre malproksimas. En ĉi tiuj tagoj, ni faras preparojn por ekzameno kaj ne inklina rigardi teatraĵon,” respondis Juemin. Ĉi-foje li eĉ ne levis sian kapon.

“Miaflanke mi volus vidi ĝin. Ambaŭ teatraĵoj estas bonaj,” intermetis Juexin, manipulante abakon, “malfelice, mi ne havos liberan tempon.”

“Eĉ se vi havus liberan tempon, jam tro malfruas por tio,” Juehui levis sian kapon kaj ridetante diris, post kiam li finlegis unu pecon en la gazeto kaj fermis ĝin sur siaj genuoj.

Jianyun denove klinis sian kapon. Preninte la ĵurnalon de sur la tetableto, li malvigle ĝin foliumis.

“Jianyun, ĉu vi ankoraŭ instruas guverniste la infanojn de sinjoro Wang? Kial vi ne venis ĉi tien dum multaj tagoj? Kiel vi fartas?” Fininte la kalkuladon, Juexin rimarkis lian sinĝenan konduton kaj elmetis la demandojn kun amzorgo.

“Mi malvarmumis kaj restis hejme kelkajn tagojn, tial mi ne vizitis vin dumlonge. Mi ankoraŭ instruas la infanojn de sinjoro Wang kaj ofte renkontas tie fraŭlinon Qin.”

Kie ajn Jianyun renkontis ŝin aŭ menciis ŝin, li ĉiam nomis sin “Fraŭlino Qin”. Li estis malproksima parenco de la familio Gao, kaj apartenis al la sama generacio de Juexin. Li estis pli juna ol ĉi tiu, do li

nomis lin “Granda Frato”, same kiel Juemin kaj Juehui. Liaj gepatroj mortis antaŭlonge kaj li vivis ĉe la pli aga frato de la patro. Post diplomitiĝo el la mezlemejo li ne havis monrimedon por daŭrigi sian lernadon. Li devis trovi mizeran okupon por sin vivteni — instrui kiel guvernisto al la infanoj de sinjoro Wang la anglan lingvon kaj aritmetikon. Sinjoro Wang estis parenco de sinjorino Zhang. Ili loĝis en la sama kortodomaro. Tial Jianyun ofte renkontis Qin tie.

“Vi aspektas anemia kaj multe pli malgrasa ol antaŭe. Vi havas debilan konstitucion kaj vi devas bone prizorgi ĉin mem,” Juexin admonis lin zorgoplene.

“Vi pravas, Granda Frato,” Jianyun montris sian dankemon, “tion ankaŭ mi mem scias.”

“Do, kial vi ĉiam portas ĉagrenan mienon?” zorgeme demandis Juexin.

Jianyun ekridetis. Sed la vizaĝo perfidis, ke lia rideto estis trudita. Li diris, “Ĉiuj tiel diris, sed mi mem ne sentas tion. Mi atribuas tion al mia debileco aŭ al la frua morto de miaj gepatroj.” Liaj lipoj tremetis. Ŝajne li ekploros, sed li retenis la larmojn.

Juemin levis sian kapon kaj diris senzorge, “Se vi havas malfortan sanon, vi devas multe sporti. Nenion helpas malĝojo.” Antaŭ ol li finis siajn vortojn, aŭdiĝis paŝbruo ekstere. Iu knabino vokis, “Granda Kuzo.”

“Jen estas fraŭlino Qin,” diris Jianyun mallaŭte. Malforta lumo fulmis tra lia vizaĝo.

“Ho, bonvolu eniri,” diris Juexin laŭte kaj stariĝis.

La pordokurteno moviĝis. La vizitanto vere estis Qin. Ŝin sekvis ŝia patrino kaj servisto Zhang Sheng, kiu tuj foriris.

Qin surhavis helbluan vatitan jakon el silko kaj nigran jupon. Ŝiaj haroj ĉe la tempioj pendis ĝis la oreloj kaj bele konturis sian ovalan vizaĝon. Sub sia nete tondita logbuklo, du sveltaj brovoj arkiĝis super paro da grandaj okuloj, kvazaŭ inkrustaĵoj ambaŭflanke de iom alta nazo. La okuloj estis tre brilaj. La varmeco radianta el ili ne nur alportis brilecon al ŝia ridetanta vizaĝo, sed ankau Ŝajne pliheligis la ĉambron, kiam ŝi eniris. Ĉiuj ĉeestantoj koncentris la rigardon sur ŝin. Ridetante, ŝi kaj ŝia patrino salutis ilin.

Juexin kaj la aliaj reciprokis la salutojn. Juemin kaj Jianyun haste stariĝis, cedis siajn seĝojn al ili, kaj eksidis sur la seĝojn kontraŭ la fenestro. Juexin tintiĝis kaj ordonis prepari teon por ili.

“Mi aŭdis, ke novaj ŝtofoj estas haveblaj en la Ŝtofbutiko Xinfaxiang. Mi ne scias, ĉu estas konvena ŝtofo por mi?” sinjorino Zhang demandis al Juexin, post kelkminuta konversacio kun ili.

“Jes, estas multaj specoj de poplino,” Juexin respondis senhezite.

“Ĉu vi bonvolus akompani min por pririgardi?”

“Kompreneble, kun plezuro. Ĉu jam nun?” Dirante, Juexin stariĝis.

Rigardante ŝin per plezuraj okuloj, li atendis ŝian respondon.

SinJORino Zhang ekĝojis. “Ĉu vi estas libera nun? Do ni iru.” Ankaŭ ŝi stariĝis kaj turnis sian rigardon al la filino.

Kun rideto, Qin diris, “Panjo , mi ne iros. Mi atendas vin ĉi tie.” Ankaŭ ŝi stariĝis kaj iris al la skribotablo.

“Do bone,” diris sinJORino Zhang. Juexin levis la pordokurtenon kaj ŝi transpasis la sojlon. Juexin sekvis ŝin eksteren.

“Kion vi legas, Juehui?” demandis Qin, kiu starts ĉe la skribotablo kaj rigardis la gazeton en la mano de Juehui.

“La nove eldonitan numeron de *Nova Junularo*, li respondis fiere, sin rigardante kun levita kapo. Li firme tenis la gazeton, kvazaŭ li timus, ke Qin forprenus ĝin de li.

Vidinte lian sintenon, Qin ekridetis pretervole,

“Ne timu. Mi ne forprenos ĝin.”

Ankaŭ Juemin ekridetis, “Kuzino Qin, ni havas novajn numerojn de *Geknaboj en Ĉinio*, prenu kaj legu?”

Juehui leviĝis kaj enmanigis la gazeton al Qin. “Legu , legu, alie vi diros, ke mi tenas la novajn gazetojn kiel trezoron. ”

Ne etendinte sian manon por ĝin akcepti, Qin nur dins, “Vi legu la unua. Post via legado mi prunteprenos kaj legos ĝin hejme.” Tion ŝi diris al ili ambaŭ.

Juehui retiris sian manon kaj kuŝiĝis denove por daŭrigi la legadon.

Post momento li tamen subite demandis ridetante, “Vi estas tre gaja. Ĉu via patrino jam konsentis pri tio, kuzino Qin?”

Ŝi faris kapskuon. “Ankaŭ mi ne scias kial mi estas tiel gaja. Estas egale, ĉu ŝi konsentas aŭ ne. Mian aferon mi mem decidas. Samkiel vi, ankaŭ mi estas homo,” tion dirante, ŝi iris al la seĝo de Juexin kaj sidiĝis. Ŝi sencele foliumis la kontolibron.

“Prave !” laŭdis Juemin, “vi ja estas novtipa knabino.”

“Ne primoku min,” diris Qin ridetante. Abrupte serioziĝis ŝia mieno kaj ŝi daŭrigis per alia tono, “Mi diru al vi novaĵon neordinaran. Via onklino sinjorino Qian jam revenis en la provincan ĉefurbon.”

La novaĵo ja estis neordinara. “Kaj kuzino Mei?” Juehui rektigis sin kaj amzorge demandis.

“Ankaŭ ŝi revenis. Ŝia edzo mortis malpli ol unu jaron post ilia geedziĝo. Ĉar ŝia bopatrino malbone traktis ŝin, ŝi do iris loĝi kun sia patrino. Ĉi-foje ŝi venis ĉi tien kun la patrino.”

“Kiel vi sciiĝis pri tiuj detaloj ? Kiu diris tion al vi?” demandis Juemin kun miro. Lia okulparo sub la orkadritaj okulvitroj ronde larĝiĝis kaj fiksiĝis sur Qin.

“Ŝi vizitis nin hieraŭ,” ŝi respondis mallaŭte.

“Ĉu kuzino Mei iris al via hejmo? Ĉu ŝi fartas kiel antaŭe?” demandis Juemin kun amzorgo.

“Ŝi aspektas iom astenia, sed ne tiel malgrasa. Ŝajne iom pli bela ol

antaŭe. Tra ŝia paro da akvecaj okuloj, oni povas vidi multon. “Mi ne kuraĝis multe ŝin demandi, timante, ke mi memorigos ŝin pri la mizera pasinteco. Ŝi iom parolis al mi nur pri la moroj kaj kutimoj de la loĝantoj en la urbeto Yibin, kie ŝi vivis, kaj pri si mem. Ŝi nenion diris koncerne al la Granda Kuzo.” La voĉo de Qin fariĝis malgaja kaj poste ŝi demandis al Juemin per ŝanĝita tono, “Kiel nia Granda Kuzo sintenas al ŝi?”

“Granda Frato ŝajne tute forgesis kuzinon Mei, ĉar li neniam menciis ŝian nomon kaj plie li tre kontentas pri la vivo kun sia edzino,” malkaŝeme diris Juemin.

Qin skuis sian kapon. Ŝi diris kun sufiĉe malgaja tono, “Eble estas malfacile por kuzino Mei tute forgesi lin. Mi povas legi el ŝiaj okuloj, ke ŝi pensas pri li ... Panjo ne volas, ke mi komuniku al li pri la alveno de kuzino Mei.”

“Tio ne gravas. Ĉar kuzino Mei kaj ŝia patrino ne vizitos nin, do ili ne havos ŝancon por renkontiĝi. Granda Frato jam tute forgesis tion. Ĉio ŝanĝiĝis post kelkaj jaroj. Kaj cetere, li kaj lia edzino kunvivas feliĉe. Kial do ni maltrankviligu?” intermetis Juehui.

“Estas pli bone ne diri tion al li. Se li jam forgesis tion, ni devas ne vekti liajn rememorojn. Kiu estas certa, ke li forgesis kuzinon Mei?” Juemin elmetis sian opinion serioze.

“Miaopinie, prefere ne diru tion al li,” Qin aprobis kapjesante.

Sur la seĝo en la angulo de la ĉambro sidis Jianyun kun malserena mieno. Li ŝajne volis diri ion, li tamen ne eligis vortojn, kvankam liaj lipoj moviĝis. Li rigardadis la vizaĝon de Qin kaj atente aŭskultis, kion ŝi diris. Sed ŝi ne atentis lin. Poste li fiksis sian envian rigardon sur Juemin kaj Juehui. Profunde emociita de sia parolo — ankaŭ pro alia kaŭzo — li nereteneble vespiris, “Se Granda Frato kaj kuzino Mei geedziĝus, tio estus perfekta feliĉo.”

Qin ĵetis mildan rigardon al li kaj tuj deturnis ĝin. Por li ŝia rigardo ŝajne estis beno. Li zorgeme remaĉis ŝian respondon, “Kiu ne dezirus tion al ili?”

“Mi ne scias, kiu dissemis malakordon inter mia patrino kaj sinjorino Qian. Ili malpaciĝis kaj pro tio detruigis la feliĉo de Granda Kuzo kaj kuzino Mei,” Juehui diris indigne.

“Vi ne scias, sed mi scias. Mia patrino diris tion al mi. Eĉ Granda Kuzo ne scias pri tio,” Qin diris en malgaja tono. “La fakto estas, ke via patro jam sendis svatistinon por peti ŝian manon kaj sinjorino Qian konsentis. Laŭ onidiro, sinjorino Qian iris konsulti sortodiveniston. Li diris, ke la sortoj de Granda Frato kaj kuzino Mei estas kontraŭstaraj kaj ili ne povas geedziĝi, alie kuzino Mei mortos juna. Tial sinjorino Qian rifuzis la geedziĝan proponon. Fakte estas alia kaŭzo. Iun tagon ŝi kaj via duonpatrino havis kvereleton, kiam ili ludis maĝangon. Ŝi sin sentis ofendita, sekve venĝis ŝin per rompo de la geedziĝa promeso. Via

duonpatrino tre ŝatis kuzinon Mei — ja ĉiuj anoj en via familio ŝatis ŝin — kaj ŝi multe malkontentiĝis pri la rompo de la geedziĝa promeso. Poste, kiam la fianciĝo de Granda Kuzo al la fraŭlino de la familio Li estis anoncita, ankaŭ sinjorino Qian malkontentiĝis. La rilato inter ili malboniĝis kaj fine eĉ rompiĝis.”

“Tio do okazis. Ni ne sciis tion antaŭe,” subite Juemin komprenis ĉion. “Ni ne sciis, ke ilia geedziĝo jam estis proponita. Ni atribuis kulpon al niaj patro kaj duonpatrino pro tio, ke ili ne konis la koron de Granda Frato kaj ne zorgis pri lia feliĉo. Ni miskulpigis ilin.”

“Jes ja. Kiu ne deziris ilian geedziĝon tiam? Kiam ni eksciis pri lia fianciĝo, ni ankaŭ malĝojis kaj sentis, ke kuzino Mei suferas de la maljustaĵo. Ni riproĉis al Granda Frato, ke li ne kontraŭstaris kaj anstataŭe stulte konsentis. Poste kuzino Mei ne plu vizitis nian hejmon kaj baldaŭ forlasis la provincan ĉefurbon. Kvankam li edziĝis al la fraŭlino de la familio Li, ni sentis bedaŭron por kuzino Mei kaj kaŝe riproĉis lin. Estas ridinde, ke ni zorgis pri tio pli multe ol li mem ... Tiutempe ni konsideris, ke la geedziĝo de Granda Frato kaj kuzino Mei estas senduba,” diris Juehui. Kiam finiĝis lia parolo, li nereteneble ekridis.

“Eble amsento ne estiĝis en ili,” Juemin klarigis, “la nura fakto estis, ke li kaj ŝi estis preskaŭ samaĝaj kaj ili plaĉis unu al la alia en temperamento. Tial post disiĝo, li ne estis tiel malĝoja.”

“Kion vi diris ! ... ‘li kaj si estis preskaŭ samaĝaj kaj ili plaĉis unu al la alia en temperamento’! Ĉu tio ne sufiĉas por enamiĝo!” Juehui kontraŭdiris.

Jianyun vespiradis sola en la angulo de la ĉambro.

“Kio okazas al vi, Jianyun? Kial vi vespiras en soleco?” demandis Juemin mirigita.

Jianyun ne respondis, kvazaŭ li ne aŭdus lin.

“Li kutime tion faras,” diris Juehui kun rideto.

Tri paroj da okuloj sin turnis kaj fokusiĝis sur Jianyun. Li rimarkis tion kaj klinis sian kapon. Post momenteto li levis sian kapon kaj direktis sian malserenan rigardon al la vizaĝo de Qin. Ŝi ne evitis ĝin, sed li tuj deturnis sian rigardon. Skuante sian kapon, li diris, “Vi ne komprenas Grandan Fraton, vi ne komprenas lin. Li absolute ne povas forgesi kuzinon Mei. Mi jam antaŭlonge rimarkis, ke li ofte pensas pri ŝi.”

“Kial ni ne rimarkis signon de tio? Li preskaŭ ne menciis la nomon de kuzino Mei. Laŭ via diro, ju pli oni enamiĝas unu al la alia en la koro, des pli da flegmo oni devas montri unu al la alia, ĉu ne?” Juemin pensis, ke li donis konvinkan refuton.

“Ne tiel diru. Mi opinias ke tio estas fakto. Kelkfoje eĉ li mem ne komprenis kial,” Jianyun defendis sin.

“Mi ne kredas tion !” diris Juehui firme.

“Ankaŭ mi tiel opinias,” diris Qin sincere, “ne okazas tia afero en la mondo. Ĉar amo estas justa afero, estas ne necese kaŝi ĝin de aliaj. Kiel oni povus aspekti malvarma se oni havas ardan amon?”

Jianyun paliĝis, kvazaŭ lin trafus granda frapo. Liaj lipoj tremetis kaj liaj okuloj malleviĝis. Li diris nenion, kun klinita kapo.

Rimarkinte la vizaĝesprimon de Jianyun, Qin stariĝis kaj demandis, surprizite, “Kio okazas al vi, sinjoro Chen?”

Jianyun levis sian kapon kaj rigardis la vizaĝon de Qin. Lia vizaĝo prezentis hezitemon. Tuj poste, li faris delikatan rideton. Liaj okuloj ekbrilis, tamen melankolio restis en ili. La rideto malaperis kaj malsereneco tuj revenis al lia vizaĝo.

Sekvante tiun de Qin, ankaŭ la rigardoj de Juemin kaj Juehui falis sur la vizaĝon de Jianyun. Ili tri rimarkis la ŝanĝiĝon de lia mieno, sed ne povis deĉifri la kaŭzon.

“Vi estas pala, sinjoro Chen. Ĉu vi malsaniĝas?” demandis Qin kun simpatio. “Ĉu vi renkontis ian malfacilon?”

Jianyun embarasiĝis. Li rigardis la ridetantan vizaĝon de Qin, vane serĉante konvenajn vortojn por respondi. Li mallerte kaj pene diris, “Nenio, nenio min ĝenas en la koro.” Li skuis sian kapon kaj daŭrigis, “Mi havas malbonan cerbon kaj mi ne povas klare esprimi, kion mi volas.” Li ekridetis malgaje.

“Kial vi ĉiam montras vin tiel modesta, sinjoro Chen? Ni ofte

kunestas. Ni ne estas fremduloj,” milde diris Qin.

“Tio ne estas pro modesto. Mi vere ne kapablas esprimi min mem. Komparante min kun vi, mi ĉiam sentas min multege malpli kapabla ol vi. Mi ne meritas troviĝi en via rondo.” Li rugigis pro sia sincera kaj ekscita parolo, sed ne pro hontemo. Timante, ke oni ne kredas, kion li dirs, li pli laŭtigis sian voĉon.

“Ne tiel diru. Tion ni ne aŭskultas. Ni prefere turnu nian konversacion al alia temo,” Qin abrupte diris al Jianyun, en ordoneca sed simpatia tono.

Juemin diris nenion. Li direktis sian rigardon jen al Qin jen al Jianyun. Kelkfoje li montris fieran rideton, atente aŭskultante ilian interparolon. Dume Juehui malfermis ekzempleron de *Nova Junularo* kaj legis, neniom atentante pri ili.

La vizaĝesprimo de Jianyun ŝanĝiĝadis. Estis tre facile legi sur lia vizaĝo tion, kion li pensas en si. La vorto “ni” en la parolo de Qin ŝajne pikis al li la koron.

“Ni interparolu poste, fraŭlino Qin. Mi havas aferojn por fari . Mi devas foriri .” Jianyun abrupte stariĝis kaj volis foriri .

Qin surprizite rigardis lin, dirante nenion.

Juemin diris, “Restu iom pli longe. Ni babilu kune. Granda Frato baldaŭ revenos.”

“Dankon. Mi devas foriri,” li respondis iom hezitinte. Li balancis la

kapon por adiaŭi la ĉeestantojn kaj eliris.

“Kion li kaŝas en la koro?” Qin dubeme demandis al Juemin.

“Kiu povas scii tion !” Juemin koncize respondis.

“Certe io muelas lian koron, alie li ne fariĝus tiel stranga. Antaŭe li ne estis tia,” Qin penseme diris.

“Vi pravas. Lastatempe li fariĝas pli kaj pli stranga. Mi supozas, ke li vivas en malbona situacio kaj ofte dronas en ekscita malgojo . Tio estas kial li fariĝas tiel stranga,” diris Juemin.

“Mi volas alproksimiĝi al li, sed ĉiufoje kiam mi vidas lin kaj retenas lin por plua konversacio, li tamen bridas la vortfluon el sia koro,” Qin sincere klarigis. Vidinte, ke Juemin kaj Juehui restas silentaj, ŝi daŭrigis, “Li ŝajne kaŝas sekreton de aliaj. Tiakaze, kiu povas alproksimiĝi al li? Kelkfoje, kiam mi renkontis lin, mi serioze alparolis, li tamen laŭeble evitis min, kvazaŭ li estus timigita.”

“La malĝojanto verŝajne havas sian propran ambicion. Malfeliĉe li naskiĝis en la malĝusta epoko,” Juemin moke diris. “Li tamen foj-refoje legas novajn gazetojn,” li aldonis.

“Ne zorgu pri li!” laŭte kriis Juehui, frapante sian genuon, kun fermita gazeto en la mano. “Tiaj homoj troviĝas ĉie. Ĉu vi povas zorgi pri ili ĉiuj?”

Ili tri silentis momenton. Fremda vizaĝo enŝovigis tra la pordokurteno. Ĉirkaŭrigardinte, li diris al si, “Sinjorido Gao jam eliris.” Post tio la

vizaĝo tuj malaperis.

Subite Qin ekmemoris ion. Ŝi diris al Juemin serioztone, “Mi jam faris decidon. Nun mi devas diligente fari preparojn por la enira ekzameno. Ĉu vi bonvolus helpi min en lernado de la angla?”

“Kompreneble jes !” ĝoje diris Juemin. “Sed la tempo...”

“Laŭ via bontrovo. Nature vesperoj estas konvenaj, ĉar tage ni ĉiuj havas lecionojn ... Ne necesas atendi ĝis la komenco de la venonta semestro. Mi preferas komenci baldaŭ .”

“Bone. Post momento ni diskutu pri tio en via hejmo... Via patrino kaj Juexin revenas,” li diris, aŭdinte ilin interbabili ekstere.

Juexin levis la pordokurtenon kaj lasis sinjorinon Zhang eniri la unua. Li ŝin sekvis. Servisto Zhang Sheng eniris la lasta, kun pako en la manoj.

“Filinjo, ni hejmeniru. Estas malfrue,” diris sinjorino Zhang, tuj post kiam ŝi sidiĝis kaj ektrinkis teon. Rimarkinte la serviston en la ĉambro, ŝi ordonis, “Elportu la pakon unue.”

La servisto jesis kaj obeeme eliris. Post momento ankaŭ Qin kaj ŝia patrino eliris. Juexin akompanis ilin ĝis la pordo de la oficejo, dum Juemin kaj Juehui iris kun ili ĝis la malantaŭa pordo de la bazaro. Juemin kaj Juehui revenis al la oficejo, nur post kiam ili eniris en palankenojn.

8

Elirinte tra la antaŭa pordo de la bazaro, Juemin direktis sin al la hejmo de Qin, dum Juehui prenis alian vojon por viziti sian amikon.

Trairinte kelkajn stratojn, Juehui renkontis sian kunlernanton Zhang Huiru ĉe la vojkruciĝo. Tiu rapidis spiregante kun mallevita kapo. Juehui kaptis lin je la brako.

“Huiru , kian urĝan aferon vi havas? Kiom rapide vi kuras!” mire demandis Juehui.

La junulo kun triangula vizaĝo levis sian kapon kaj ĵetis rigardon al Juehui. Kun ŝvitgutoj sur la frunto, li anhelis kaj ne sukcesis eligi vortojn pro momenta maltrankviliĝo. Post momento, li murmuris, “Fulmotondro ! ... Terura afero okazis!”

“Tuj diru, kio okazis !” Juehui konsternite demandis.

Tiam spiregado de Huiru iom kvietiĝis. Li tamen ekscitiĝis kaj lia voĉo tremetis pro indigno kaj maltrankvilo, “Soldataĉoj batis nin... en Teatro Wanchun.”

“Kio? Diru, diru !” Juehui senĉese skuadis lian maldekstran brakon per sia tremanta mano. “Kio ! Soldatoj batis studentojn? Sciigu al mi la detalojn !”

“Mi iras informi la kunlernantojn pri tio en la lernejo. Ni iru kune kaj mi rakontos al vi survoje...” El la okuloj de Huiru sparkis malamo.

Juehui pretervole sin turnis kaj sekvis lin. Varma sango bolis en lia korpo. Kunpremante siajn lipojn, li atendis Huiru rakonti.

“Aŭskultu ! Aŭskultu !” Huiru komencis per ekcitiĝa voĉo, “Hodiaŭ teatraĵo estis prezentata en la Teatro Wanchun. Mi estis nek aktoro nek zorganto pri la prezentado, sed nur spektanto. La afero okazis ĉi tiel: kiam la teatraĵo komenciĝis , du aŭ tri soldatoj entrudiĝis sen aĉeti biletojn. La biletisto diris al ili, ke ili ne rajtas eniri , se ili ne pagas por biletoj, ĉar tiu ĉi teatro ne estas kiel aliaj ordinaraj. Ili ne obeis kaj insistis eniri . Kaj fine ili estis elpelitaj. Poste ili venigis dekelkajn soldatojn kaj insistis eniri, kriante kaj sakrante Timante, ke ili faros ĝenadon, oni enlasis ilin por kvietigi la aferon. Kiam ili eniris kaj sidiĝis ili kriis kaj aplaŭdis eĉ pli tumulte ol ili kutime faras en aliaj teatroj. Ne plu povante tion toleri , oni persvadis ilin kvietigi kaj ne ĝeni aliajn spektantojn, sed vane. Fine niaj kunlernantoj intervenis por teni bonan ordon. Tiel ni ofendis ilin. Ili do komencis batadi. Kelkaj soldataĉoj eĉ suriris la scenejon por fari ĝenadon. La tumulto pligrandiĝis kaj daŭris ĝis garnizona ĉefstabo alsendis roton da soldatoj kiu ilin sub-premis. La teatro tamen troviĝis en terura malordo. Kelkaj studentoj estas vunditaj. La soldatoj, kiuj faris la tumulton, ĉiuj forkuris kaj neniuj el ili estas kaptita. Kiu povus kredi, ke roto da armitaj soldatoj eĉ ne povas kapti kelkajn senarmilajn soldatojn? Evidente, tion ili jam antaŭaranĝis...”

“Jes, tio sendube estas antaŭaranĝita!” Juehui rapide prenis la temon. Premante sian bruston per la mano, li ŝajne sentis, ke indigna fajro estas eruptonta kaj la brusto krevonta. “Dum la lastaj tagoj, oni diras, ke la aŭtoritatoj alprenos paŝojn malfavore al la studentoj. Laŭdire, studentoj emas fari tumultojn dum la lastaj du jaroj. Ili jen ekzamenas, ĉu la butikoj vendas japanajn varojn, jen okazigas manifestaciojn. La aŭtoritatoj volas bridi nian altan batalemon. Oni ĉiamaniere incitas malamon ĉe soldatoj al la studentoj kaj instigas ilin kontraŭstari studentojn. Tio estas la unua paŝo. Atendu, aliaj paŝoj certe sekvos!”

“La ĉeestantaj studentoj urĝe kunvenis en la Parko Shaocheng kaj decidis, ke ĉiuj lernantoj restantaj en lernejoj kolektiĝu kaj prezentu peticion al la provincestro. La postuloj estas deciditaj. Ĉu vi iru kun ni?” dirante, Huiru rapidigis siajn paŝojn.

“Certe jes!” respondis Juehui. Ili jam alproksimiĝis al la lernejo. Kun granda emocio ili grandpaŝe eniris en ĝin.

Sur la sportejo estis multaj studentoj loĝantaj en la lernejo, diskutantaj en kelkaj grupoj. La tuta lernejo, plena de rumoro, ŝajne moviĝus. Huiru komprenis, ke la novaĵo pri la okazajo certe alvenis pli frue. Jen li vere vidis Cunren paroli tie. Li ludis la rolon de la patro en *Kiam Fraŭlino Edziniĝas*. Kiam la tumulto okazis, tiu teatraĵo jam finiĝis.

Se ili jam sciiĝis pri la afero, jam ne necesis por Huiru diri tion al ili.

Li kaj Juehui iris al iu grupo por aŭskulti, kion oni diras. Ankaŭ li rakontis ĉion, kion li sciis. Ili diskutis, tre varme diskutis. Fine ĉiuj ekiris por prezenti peticion.

La Parko Shaocheng estis la kolektejo. Antaŭ ol studentoj de ilia lernejo alvenis, jam estis tie studentoj de aliaj lernejoj. Tiu tago estis dimanĉo, regula ferio, studentoj ne estis facile alvokeblaj. Cetere, iuj lernejoj jam komencis la vintran libertempon, tial ne ĉiuj studentoj, sed nur tiuj de la ĉefaj lernejoj alvenis. Kompare kun la nombro de partoprenintoj de la manifestacio por malkovri japanajn varojn, ĉifoja nombro de studentoj ŝajnis multe malpli granda. Tamen jam pli ol du cent kolektiĝis tie.

La ĉielo jam griziĝis. La lampoj en la ĉirkaŭaĵo lumiĝis. La vicaro de studentoj sin direktis al la ofica domo de la provinestro.

Kun streĉita koro Juehui ĉirkaŭrigardis. Sur la trotuaroj staris nemalmultaj scivolaj rigardantoj. Iuj mallaŭte babilis kaj aliaj timeme foriris.

“Plejeble ili iras malkovri varojn de malamika lando. Kiu butikisto suferos ĉifoje?” La fremda voĉo alflugis en la orelon de Juehui. Returninte sian kapon, li rimarkis paron da ruzaj okuletoj sur malgrasa vizaĝo. Li kuntiris la brovojn. Li tamen ne estis certa, ĉu li misaŭdis la lastan frazon. Li marŝis plu en la vicaro.

Kiam ili atingis la oficejan domon de la provinestro, jam falis nokto.

Mallumo subpremis ilin kaj ĉiuj sentis sin duoble streĉitaj. Stranga sento venis al ili, ke tio estis ne nur la mallumo de la ĉielo, sed ankaŭ la mallumo de la socio kaj politiko. Kun juna koro ili luktadis kontraŭ ĉio ĉi, ĉirkaŭate de indiferentaj urbanoj.

La vicaro atingis la placon antaŭ la oficeja domo. Vico da soldatoj atendis tie, kun pafiloj, kies bajonetoj celis al la brustoj de la studentoj. Kun serioza mieno la soldatoj silente rigardis la studentojn, kaj ĉi tiuj kriis kaj agitite petis eniron. La soldatoj rifuzis cedi. La du flankoj sin tenis unu kontraŭ la alia. Post interkonsiliĝo la studentoj decidis elekti ok reprezentantojn por vidi la provincestron. Sed ankaŭ la reprezentantoj ne povis eniri, ĉar la soldatoj ilin retenis. Post momento suboficiro alpaŝis kaj krude diris al la studentoj, “La provincestro jam hejmeniris. Vi ĉiuj reiru!”

La reprezentantoj postulis mildvoĉe sed firme, ke lia sekretario donu intervjuon anstataŭ la provincestro, se tiu forestas. La suboficiro skuis sian kapon, dirante, “Neeble.” Li portis fieran mienon, montrante, ke li havas potencon en la mano kaj li sola jam povas kontraŭstari ĉiujn studentojn.

La reprezentantoj raportis la rezulton de la intertraktado al la studentoj. La tuta placo tuj tumultigis.

“Neeble, ni nepre devigu la provincestron elveni!”

“Ni nepre eniru, eiru !”

“Se la provincestro forestas, elvenigu lian sekretarion anstataŭe !”

“Ni enkuru, spite al ĉio, unue ni enkuru!” Voĉoj bruis en la aero. Sur la placo moviĝis sennombraj kapoj. Iuj kuraĝuloj vere puŝiŝis antaŭen, tamen estis retenataj.

“Gekamaradoj , kviete ! Ordon. Ni tenu nin en ordo!” laŭte kriis iu reprezentanto.

“Ordon , ordon!” eĥis parto de la partoprenantoj . “Ne zorgu pri la ordo ! Ni enkuru !” iu diris. “Neeble, ili havas pafilojn,” alia respondis.

“Ordon , ordon ! Aŭskultu la reprezentantojn !” admonis plejparto.

La rumoro kvietiĝis iom post iom. Ordo revenis al la vicaro. Delikataj pluveroj ekfalis el la malluma ĉielo .

“Gekamaradoj, ili ne lasas nin eniri kaj la provincestro ankaŭ ne volas sendi personon por vidi nin. Kion fari nun? Ĉu ni reiru aŭ atendu ĉi tie?” Por ke ĉiuj ĉeestantoj povu aŭskulti lin, la parolanta reprezentanto kriis tiel laŭte, ke lia voĉo raŭkiĝis .

“Ni ne reiros !” bore respondis ĉiuj ĉeestantoj.

“Ni nepre renkontiĝu kun iu aŭtoritatulo ! Ni nepre akiru rezulton el ĉifojaj postuloj ! Ni ne estu trompitaj de ili !” kriis multaj.

La suboficiro alpaŝis antaŭ la reprezentantojn kaj diris, “Ekpluvas. Ĉiuj hejmeniru. Mi garantias al vi ĉiuj, ke mi transdonos viajn postulojn al lia provincestra moŝto. Kial vi vane atendu la tutan nokton?” Lia sinteno fariĝis mult malpli kruda of antaŭe. Iu reprezentanto laŭte

transdiris liajn vortojn al la studentoj .

“Neeble, neeble!” Alia atako de bruoj leviĝis skuanter la tutan placon. Post kelka tempo kvieto restariĝis .

“Bone, ĉiuj atendu ĉi tie. Ni faru alian provon. Ni ne foriru ĝis ni atingos nian celon!” laŭte diris reprezentanto kun la manoj en formo de funelo ĉe la buŝo .

Kelkaj komencis manklaki, kaj ĉiuj sekvis ilian ekzemplon. Manklakante, la reprezentantoj denove ekiris direkte al la oficeja domo. Ĉifoje ĉiuj ok reprezentantoj sukcesis eniri en la domon.

En la homamaso ankaŭ Juehui forte manklakis. Pluveroj senĉese falis sur lian senĉapan kapon kaj malsekigis liajn harojn. Li vane ŝirmis siajn okulojn per la mano aŭ tenis sian antaŭbrakon sur la frunto, por klare vidi la vizaĝojn de la kunlernantoj apudaj. Li vidis nur bajonetojn de la soldatoj, du grandajn lanternojn pendantajn antaŭ la oficeja domo kaj sennombrajn moviĝantajn kapojn sur la malluma placo. Li neniel povis subpremi sian koleregon kaj li volis laŭplaĉe kriadi por eligi ĝin. Li sentis sin sufokata. La evento okazis tute neatendite ! Kvankam cirkulis onidiro, ke la aŭtoritatoj punos la studentojn, oni neniam imagis al si, ke ili agos tiamaniere. Kiel malnoble! “Kial ili traktas nin tiamaniere? Ĉu patriotismo estas krimo? Ĉu la puraj kaj honestaj studentoj estas vere malutilaj al la nacio?” Li ne povis kredi tion.

Alflugis sonoj de gongado de malproksime. Jam la deka horo !

“Kial ankoraŭ ne elvenas sciigo? Kial la reprezentantoj ankoraŭ, ne eliras?” bruis la ĉeestantoj malpacience. La homamaso agitiĝis. Pluveroj grandiĝis. Juehui eksentis ke malvarmo enpenetras tra la malsekaj vestoj. Li frostotremis. “Ĉu mi eĉ ne povas elteni ci tiun bagatelon?” Je la penso li tuj elstarigis sian bruston kun krucigitaj brakoj. Li vidis kunlemantojn apude starantajn kun la ŝultroj kuntiritaj kaj malsekaj haroj algluitaj al la frunto, sed ili ne montris malkuraĝecon. Iu alparolis apudstaranton, “Se ni ne akiros kontentigan rezulton, ni absolute ne hejmeniros. Ankaŭ ni montru nin tiel kuraĝaj kiel studentoj en Pekino. Kiam ili faris paroladojn kaj propagandon sur la stratoj, ili kunportis litaĵojn kaj sin pretigis por esti arestitaj. Kial ni ne povas stari tutan nokton ĉi tie por realigi niajn postulojn?”

Tiuj vortoj klare bloviĝis en la orelojn de Juehui. Li emociiĝis preskaŭ ĝis larmoj. Li volis atente pririgardi la parolanton, sed liaj okuloj larme vualitaj ne povis klare vidi. La parolanto eligis nur ordinarajn vortojn, kiajn Juehui mem povis diri. Tiumomente li jam forgesis ĉion, inkluzive de la lumplena hejmo kaj komforta lito Li pensis ke li volas fari ion ajn, kion la parolanto postulas de li, eĉ spite al lukto tra akvo kaj fajro.

La noktogardisto gongis, anoncante la noktomezon. La reprezentantoj ankoraŭ ne elvenis, nek estis sciigo pri ili. Malvarmo pliiĝis. Ĉiuj ĉeestantoj eksentis malvarmon kaj malsaton. Tiom pli, la stagna situacio malpaciencigis ilin, iuj jam elmetis la demandon “Ĝis

kiam ni atendos?”

En la mallumo brilis la bajonetoj de vice starantaj soldatoj antaŭ la pordego, kvazaŭ avertante la studentojn .

“Ni prefere hejmeniru. Morgaŭ ni interkonsiliĝu por alia kontraŭrimedo. Estos senutile, ec se ni atendos ĝis tagiĝo,” ekgrumblis kelkaj malfortikaj studentoj . Sed neniuj donis atenton al ili. Ŝajnis, ke ili pretas atendi ĝis la tagiĝo.

Post ankoraŭ kelka malplezura tempo, Juehui aŭdis iun en la antaŭa vico diri, “La reprezentantoj revenas.” La tuta placo tuj falis en silenton.

“Gekamaradoj, sekciestro Zhao parolos al ni,” laŭte diris iu reprezentanto

“Sinjoroj, la provincestro jam hejmeniris, tial mi intervidiĝas kun vi anstataŭe. Mi sentas grandan bedaŭon pro via longa atendado,” komencis fremda kaj sonora voĉo. “Ĝus mi interparolis kun la reprezentantoj kaj mi akceptis viajn postulojn. Morgaŭ mi raportos tion al lia provincestro moŝto. Li certe povos alpreni paŝojn kontentigajn al vi ĉiuj. Trankviliĝu, sinjoroj. Morgaŭ la provinca oficejo sendos oficistojn por konsoli la vunditojn. Nun estas jam malfrue. Bonvolu hejmeniri, alie vi malvarmumos. Sciu, lia provincestro moŝto ĉiam amzorgas pri vi ĉiuj. Bonvolu hejmeniri baldaŭ. Neatendita afero eble okazos, se vi restos ĉi tie longe...” la voĉo ĉesis. Diversaj komentoj tuj aŭdiĝis en la

homamaso.

“Kion li diris? Kion li aludis?” iu studento demandis al Juehui.

“Li diris, ke la provinestro alprenos paŝojn, kaj li admonas nin hejmeniri. Li ne volas preni sur sin respondecon. Kia ruzulo!” sakris Juehui indigne.

“Miaopinie ni prefere hejmeniru. Estas senutile resti ĉi tie. Ni povos interkonsiliĝi en la lernejo por trovi kontraŭrimedon. La lastaj vortoj , kiujn li diris, meritas nian pripenson,” iu diris.

Tiam, alia reprezentanto alparolis en la antaŭo, “Gekamaradoj , ĉu vi aŭdis, kion sekciestro Zhao diris? Li jam akceptis niajn postulojn. Li diris , ke la provinestro donos kontentigan solvon. Nun ni jam akiris kelkajn rezultojn. Miaopinie, ni povas hejmen iri.”

“Rezultoj? Kio estas la rezultoj?” kelkaj studentoj kaŝe demandis indigne. Tamen la plejparto de studentoj ĥore kriis, “Ni hejmeniru por trovi solvon, hejmeniru!” Ili ja ne kredis tion, kion sekciestro Zhao diris, sed ili komprenis, ke vana atendado alportos nenian bonon al ili. Krome, estis malvarmege kaj pluvadis. Ĉiuj volis nek vane atendi nek malŝpari sian energion. La penso naskiĝis en ĉies menso : Ni hejmeniru. Ni elpensos alian kontraŭrimedon morgaŭ.

“Konsentite, ni hejmeniru. Morgaŭ ni interkonsiliĝos pri la aferoj,” multaj studentoj eĥis.

La pli ol ducent studentoj komencis forlasi la placon.

Grandaj pluvgutoj forte falis kaj senkompate frapis la kapon kaj korpon de la studentoj, postlasante eterne neforgeseblan impreson al ili.

9

Efektive la studentoj atingis nenian sukceson el la manifestacio de peticio-prezentado. Ne estis plenumita eĉ la promeso, ke la provincestro sendos oficistojn por konsoli la vunditajn studentojn. Tial studentoj de lernejoj strikis post du tagoj. Ĉar la plimulto de la lernejoj jam komencis sian libertempon, la strikon partoprenis nur studentoj de parto de la lernejoj.

La sekvan tagon post la ekstriko, la Studenta Federacio sub la regado de studentoj de la Lernejo de Fremdaj Lingvoj kaj la Supera Normala Lernejo oficiale publikigis striko-deklaracion, kiu entenis kelkajn malrespektajn vortojn pri la provincestro. Pluraj teroraj tagoj sekvis. Preskaŭ ĉiutage okazis malgrandaj konfliktoj inter studentoj kaj soldatoj. La loĝantaro de la tuta urbo estis en maltrankvilo, kvazaŭ nova tumulto de soldatoj okazos. Studentoj ne kuraĝis iri sur la stratoj unuope ; se ili devis iri surstrate, ili tion faris kvinope aŭ sesope, alie ili suferus de soldatoj. Iun vesperon unu studento el la Supera Normala Lernejo estis kruele batita de tri soldatoj de la Suda Pordego de la urbo, kaj la ĉeestanta policano ne kuraĝis interveni. En la tuta urbo regis malordo. La aŭtoritatoj donis nenian atenton al tio kaj ŝajnis sin nescia pri la situacio. La promeso, ke la provincestro trovos solvon, pruviĝis nur falsaj vortoj. Dum tiuj tagoj la provincestro okupiĝis pri

festado de la naskiĝtago de sia patrino, tute forgesinte tiun malgrandan incidenton. La soldatoj, precipe la invalidaj, fariĝis pli kaj pli arogantaj. Ili laŭplaĉe tirnadis sur la stratoj kaj neniu kuraĝis interveni.

Tamen la studentoj ne estis facile subigeblaj. Ili brave sin ĵetis en la “Sindefendan Movadon por Studenta Digno”. Dum la periodo de la striko, ili disdonis flugfoliojn kaj faris paroladojn. La Studenta Federacio aktivis per elsendado de telegramoj al diversaj rondoj tra la lando por ties subteno ; ĝi sendis reprezentantojn al guberniaj urbetoj por fari propagandon ; la plej grava afero estis, ke ĝi vekis eĥon ĉe studentoj en la gubernioj de la provinco por pligrandigi la movadon. Vere la movado pligrandiĝis tagon post tago, sed la solvo promesita de la provinestro neniam realiĝis.

Juehui donis multe pli grandan atenton al la movado ol Juemin. Tiu ĉi sin okupis pri helpado al Qin en lernado de la angla lingvo, malmulte atentante aliajn aferojn.

Iun posttagmezon, kiam Juehui revenis de la kunveno kunvokita de la Studenta Federacio, li renkontis servistinon Bofratino Qian en la halo. Ŝi diris, “Tria Sinjorido, la Granda Sinjoro vokas vin. Rapidu.” Li sekvis ŝin en la ĉambron de sia avo.

Lia avo, kun aĝo de pli ol sesdek jaroj, dorskuŝis en la kanseĝo antaŭ la lito. Li ŝajnis tre longa. Lia longa vizaĝo estis malhele flava. Li surhavis grizan liphararon en formo de inversa V. Nur malmultaj

blankaj haroj restis sur lia kalva kapo. Kun fermitaj okuloj li eligis apenaŭ aŭdeblajn spirojn tra la naztruoj

Juehui fiksitis sian rigardon sur la maljunulo duone dormanta. Starante timema antaŭ sia avo, li kuraĝis nek vekti lin nek foriri. Komence li sentis maltrankvilon, kvazaŭ la aero en la tuta ĉambro subpremus lin kaj li devis starante atendi. Li esperis, ke lia avo baldaŭ vekigos, ke li povu foriri frue. Poste lia timego iom post iom malpliigis kaj li atente ekzamenis la malhele flavan vizaĝon kaj la kalvan verton de sia avo.

Ekde kiam li ekhavis memorkapablon, li encerbigis la seriozan mienon de sia avo, kiu estis respektata kaj adorata de ĉiuj familianoj. La avo ofte portis timigan mienon de neofendebleco. Tial Juehui interparolis kun li malofte kaj tre malmult, kiam ili kunestis. Escepte de tio, ke li devis laŭkutime diri bondeziron al li en mateno kaj nokto ĉiutage, Juehui ĉiamaniere provis eviti lin, se nur estis eble. Li ĉiam sentis sinĝenon, kiam la avo ĉeestis. En liaj okuloj, la avo estis tute ne afabla homo.

Nun, antaŭ liaj okuloj, la avo kuŝis senenergia kaj malforta. De tempo al tempo salivo elfluis el lia iom malfermita buŝo kaj malsekigis parton de la vesto sub lia mentono. “Eble la avo ne estas tiel severa kaj rigora denaske,” li pensis en si. En lia menso emerĝis antikvastila poemo:

Ŝminki milde ol farb-riĉe vi preferas,

vian rondon per natura bel'konkeras.

Finfine kompaton naskas mi al vi,

vi obsedas tamen dandojn en pasi'.

Li murmuris tiujn liniojn, kiujn lia mortinta avino skribis dediĉe al hetajro (La dediĉitan poemon li legis en la poemkolekto de sia avino antaŭ kelka tempo). Imagante la figuron de sia avo dum liaj junaj tagoj, Juehui ridetis. La avo certe estis dando tiam kaj fariĝis severmora nur poste. Kaj lia avo, li rememoris, ankaŭ skribis nemalmultajn versojn dediĉe eĉ al pli of unu hetajro. Kompreneble tio okazis antaŭ tridek jaroj. Eble, post kiam li maljuniĝis, li fariĝis obstina moralisto de Konfuceanismo.

Sed eĉ nun la avo okaze amuzis sin kun aktorinoj, kiuj ludis rolon de junulino en teatraĵo. Iufoje li kaj lia kvara filo invitis faman aktorinon al la hejmo kaj fotiĝis kune kun ŝi speciale en teatra kostumo. Juehui propraokule vidis ŝin ŝminki sin kaj kombi sian perukon en la salono.

Fakte tia afero ne estis strangaĵo en la provinca ĉefurbo. Antaŭ nelonge kelkaj veteranaj konfuceanoj, kiuj oficistis en la pereinta Qing-dinastio, eĉ sensacie publikigis liston de la plej bonaj aktorinoj de la teatro kaj elektis la ĉampionon el ili. Oni diris, ke tio estas monduma afero. Kiel renoma ĝentilhomo, la avo de Juehui aperigis kelkajn kolektojn de siaj poemoj por donaci al amikoj kaj ŝatis kolekti antikvajn librojn kaj pentraĵojn. Tiurilate li kredeble ne povis deflankiĝi de la modo de tiuj

konfuceanoj.

Tamen, kiel oni povus akordigi “la monduman” aferon kun defendado de konfuceaj moraloj ? Tio estis nekomprenebla al la juna koro de Juehui.

Lia avo havis konkubinojn: sinjorino Chen. Kvankam ŝi ĉiam dike ŝminkis sin kaj parfumis sin, ŝi tamen perdis sian allogecon. Ŝi ŝajnis sin koketa, kiam ŝi akutvoĉe parolis. Ŝi estis aĉetita por priservi la avon, post kiam mortis la avino de Juehui. La avo ŝajne tre ŝatis ŝin kaj ili kunvivis jam preskaŭ dek jarojn. Ŝi naskis filon, kiu malsaniĝis kaj mortis nur kvinjara.

Komparante la ŝaton de la avo al antikvaj libroj kaj pentraĵoj kun lia kunvivo kun sinjorino Chen, Juehui eligis aŭdeblan ridon pretervole.

“La homa vivo estas ja nekonsekvenca,” li meditis. Ju pli li cerbumis, des malpli li komprenis sian avon. En liaj okuloj lia avo jam fariĝis enigmo, nesolvebla enigmo.

Subite la avo malfermis siajn okulojn kaj ekrigardis lin. Lia mieno montris surprizigon, kvazaŭ li ne konus lin. Li mansignis, ke li foriru. Juehui miris, kial la avo venigis lin, atendigis lin longe kaj ordonis lin foriri sen diri al li ajnan vorton? Kiam li estis demandonta la avon pri kialo, li subite rimarkis malĝojan esprimon sur lia vizaĝo. Li sciis, ke se li faros demandon, li kaŭzos riproĉon al si mem. Li do senbrue sin direktis al la pordo.

Apenaŭ li atingis la pordon, kiam li aŭdis la voĉon de la avo:

“Revenu. Mi volas diri ion al vi.”

Juehui sin turnis kaj reiris antaŭ la avon.

“Kien vi iris? Ni serĉis vin longe, sed ne trovis vin!” La voĉo de la avo estis severa. Li jam rektigis sin.

La demando ĵetis Juehui en embarason. Li sciis, ke li ne povas diri la veron pri la kunveno de la Studenta Federacio, sed li ne povis tuj fabriki mensogon. La severa rigardo de la avo pafiĝis sur lian ruĝiĝintan vizaĝon. Nur post momenta hezito, li diris, “Mi vizitis mian kunlernanton.”

La maljunulo ekridis sardone. Lia malafabla rigardo balae esploris lian vizaĝon. Kaj poste li diris, “Ne mensogu. Ĉion mi jam scias. Ili diris tion al mi. Dum ĉi tiuj tagoj studentoj kaj soldatoj konfliktiĝis, kaj vi miksis vin en tion ... La lernejo jam libertempas, sed vi forestas ĉiutage de la hejmo por kunvenoj de la Studenta Federacio... Ĵus sinjorino Chen diris al mi, ke oni vidis vin disdoni flugfoliojn surstrate ... Vi studentoj vere estas arogantaj kaj sendisciplinaj, jen malkaŝante japanajn varojn, jen kaptante komercistojn por eksponi ilin tra stratoj. Vi tute ignoras la leĝojn. Kial vi enmiksas vin kun ili? ... Laŭdire la situacio tre streĉiĝas. La aŭtoritatoj baldaŭ faros agadon malfavoran al la studentoj. Se vi daŭrigos ĝenadon tiamaniere, vi perdos vian junan vivon.” Dum la riproĉado la avo kelkfoje paŭzis aŭ tuis. Aŭskultante, Juehui murmuris

jes. Kelkfoje, kiam li volis malfermi sian buŝon por senkulpigi sin, la avo tuj daŭrigis sian parolon. Fine, la avon trafis atako de tusado kaj li cesis paroli. La parfumita sinjorino Chen, svingante sian korpon, alrapidis el la najbara ĉambro kaj pugne masaĝis la dorson de la avo per frapetado.

La avo iom post iom ĉesis tusadi. Rimarkinte ke Juehui ankoraŭ staras antaŭ li, li denove koleriĝis, “Vi studentoj emas fari ĝenadon tuttage anstataŭ lerni. Kiel aĉegajn lernejojn ni havas nun ! Nur tumultemuloj produktiĝas el ili. Antaŭe mi jam diris, ke vi ne lernu en la lernejo. La nuntempaj knaboj fariĝas malbonkonduktaj, tuj post kiam ili eklernas en la lernejo. Vidu, via kvina onklo ne lernis en la novtipa lernejo, sed li posedas fortan legpovon kaj en kaligrafio li estas pli lerta ol vi. Li nur legas, skribas kaj verkas poemojn endome tuttage kaj ne faras tumultadon kiel vi. Se vi iros tiamaniere, vi certe perdos vian junan vivon !”

“Ne estas ni, kiuj ŝatas tumulton,” Juehui milde defendis sin, retenante sian koleron. “Ni ĉiam atenteme lernas en la lernejo. Ĉifoje ni celas nur sindefendon. La soldatoj atakis nin senkaŭze. Nature ni ne povas facile pardoni ilin...”

“Kian argumenton vi prezentis ! Vi eĉ ne akceptas mian admonon ! ... De hodiaŭ mi malpermesas al vi eliri el la domo... Sinjorino Chen, venigu lian Grandan Fraton,” la maljunulo diris tremetante. Li denove komencis laŭte tusadi kaj peze spiri. Post tio, li kraĉis sur la plankon.

“Tria Sinjorido, jen kiel vi kolerigis vian avon. Ĉesu paroli, por ke li iom kvietiĝu,” diris sinjorino Chen kun kolera mieno al Juehui. Ŝiaj vortoj estis pikaj, sed li retenis sian koleron antaŭ la avo. Mor-dante sian lipon, Juehui deturnis la vizaĝon.

“Sinjorino Chen, venigu lian Grandan Fraton kaj ankaŭ Keming!” ordonis la avo post ĉeso de la tusado.

Sinjorino Chen jesis kaj eliris. Juehui restis staranta vid-al-vide kontraŭ sia avo.

La avo pli kvietiĝis kaj diris nenion plu. Li direktis sian maljunajn nebulecajn okulojn sencele ĉirkaŭen, antaŭ ol fermi ilin.

La rigardo de Juehui alnajiĝis sur la avo. Li ekzamenis lian longan kaj malgrasan korpon. Subite tra lia cerbo fulmis stranga ideo, ke tiu, kiu kuŝas antaŭ li, ne estas lia avo, sed la reprezentanto de la tuta malnova generacio. Juehui sciis, ke lia avo kaj li estas por eterne nekompreneblaj unu al la alia. Li scivolis, kio kaŝiĝas en ĉi tiu longa kaj malgrasa korpo kaj igas la konversacion inter ili simila al tiu inter du malamikoj, ne al tiu inter avo kaj nepo. Li sentis korporemon, kvazaŭ liaj ŝultroj portus pezegan ŝarĝon. Li skuadis sian korpon por esprimi sian kontraŭstaron al ĉio cirkaŭa.

Tamen sinjorino Chen eniris. Ŝiaj altaj vangostoj, maldikaj lipoj, peĉe nigraj brovoj kaj pudrita vizaĝo fulmis antaŭ liaj okuloj. Ŝi alportis nazpikan parfuman blovon. La Granda Frato sin sekvis. Ambaŭ

fratoj interŝanĝis malplezurajn rigardojn. Konsciente lian embarasan situacion, Juexin kviete iris antaŭ la avon.

Aŭdinte paŝojn, la avo malfermis siajn okulojn. Vidinte, ke nur Juexin staras sola antaŭ li, li demandis al sinjorino Chen, “Kaj la tria sinjoro Keming?”

“Li iris al la advokata oficejo,” estis ŝia respondo.

“Li okupiĝas nur pri juĝaferoj de aliaj kaj ne zorgas pri la hejmaj okazaĵoj!” riproĉis la avo. Poste li sin turnis al Juexin, “Mi metas vian fraton sub vian zorgon. Priatentu lin. Mi ne permesas al li forlasi la domon. Prenu la respondecon.” Kvankam la voĉo de la avo estis severa, ĝi tamen estis pli milda ol antaŭe.

Juexin jesis respektoplene, okulsignante al Juehui, ke li ne malfermusian buŝon por kontraŭdiri. Tiu ĉi montris nenian malobeemon.

“Nu, forkonduku lin. Mi jam estas sufiĉe ĝenita de li.” La avo diris lace post longa paŭzo kaj denove fermis la okulojn.

Juexin jesis kiel antaŭe. Li mansignis al Juehui kaj ambaŭ silente eliris.

Ili iris el la ĉambro de la avo, trains la halon kaj venis en la korton. Farinte longan elspiron, Juehui duonmoke diris, “Nur nun mi sentas ke mi estas la mastro de mi mem.” Juexin ĵetis riproĉan rigardon al li. Subite tiu ĉi elmetis seriozan demandon al Juexin, “Granda Frato, kion fari do?”

“Mi ne havas pli bonan rimedon, krom obei la ordonon de la avo.

Ne eliru kaj restu hejme por kelkaj tagoj,” diris Juexin, disetendante siajn brakojn.

“Neeble. Nia movado ardas ĝuste nun. Kiel mi povus trankvile resti hejme?” li malespere diris, konsciante la seriozecon de la afero.

“Tion la avo postulas de vi. Kion ni povas fari?” diris Juexin pace. Dum tiuj tagoj li kondukis sen ekscitiĝo al ĉiuj aferoj, grandaj kaj malgrandaj.

“Jen, denove. aplikiĝas via politiko de nerezistemo. Vi prefere konvertiĝu al kristanismo. Kiam iu frapas vian maldekstran vangon, vi tuj prezentu vian dekstran...” indigne kontraŭdiris Juehui. Li ŝajnis elverŝi al Juexin sian tutan plendon kontraŭ la avo.

“Vi vere estas flamiĝema,” Juexin ridetis anstataŭ koleriĝi. “Kial vi koleras kontraŭ mi? Por kio utilas via riproĉo al mi?”

“Mi nepre eliros! Kaj mi tuj eliros! Kion li povos fari kontraŭ mi?” Juehui ekscitite diris al si, piedfrapante la teron.

“Rezulte de tio nur ke mi rikoltos pliajn riproĉojn,” respondis Juexin. Lia voĉo fariĝis melankolia.

Juehui levis siajn okulojn, ekrigardis sian fraton kaj silentiĝis.

“Nun mi parolas al vi serioze,” diris Juexin ameme kaj paceme en konsola tono. “Mi admonas vin, ke vi unue restu hejme kelkajn tagojn por ne kolerigi la avon. Vi estas juna kaj flamiĝema. Kiam la avo riproĉas vin, vi aŭskultu senvorte kaj ne interrompu lian parolon.

Post kiam li estas suface parolinta kaj fariĝinta kvieta, diru nur jes kaj eliru. Poste ĉion forgesu, kvazaŭ li diris nenion al vi . Ĉu do ne estas pli simpla? Vi povas akiri nenion bonan el argumentado kun li.”

Juehui silentis. Li levis sian kapon kaj rigardis la plumban ĉielon. Fakte li ne konsentis pri tio, kion la frato diris, sed li ne plu volis argumenti kun li. Ja pravis la vortoj de lia frato. Kial oni penu fari tion, kio ne alportas bonon? Sed, ĉu la juna koro povas ĉiam alkroĉiĝi al kalkulado pri personaj profito aŭ malprofito en la aferoj ? Ĉiflanke lia frato ne komprenis lin.

Juehui rigardis flugantajn grizajn nubojn sur la ĉielo . En lia cerbo konfliktiĝis kelkaj kontraŭdiraj pensoj. Fine li faris decidon. Li milde diris al Juexin, “Mi decidis ne eliri dum ĉi tiuj tagoj. Mi faras tion ne laŭ la ordono de la avo, sed por ne kaŭzi al vi pli grandan malagrablaĵon.”

Juexin mienis faciliĝon de la koro kaj kontente ridetis, “Multan dankon. Fakte, se vi insistus eliri, mi povus fari nenion kontraŭ vi, ĉar mi devas ofici en la kompanio ĉiutage. Hodiaŭ mi revenis pli frue pro io privata, kaj hazarde renkontis vian aferon ... Por paroli honeste, la avo ne lasas vin eliri ja por via bono .”

“Tion mi scias,” Juehui senpripense respondis, ne konsciante, kion li mem diris. Starante rigide en la korto, li rigardis Juexin foriri. Li langvore iris apud flolvazon. Ruĝaj umefloroj prosperis; aromo penetris

en lian nazon de tempo al tempo. Derompinte mallongan branĉeton, li forte disigis ĝin en kelkajn pecojn, kaj poste li forŝiris la florojn kaj forte premis ĝin en la mano, tiel ke la petaloj fariĝis malseketa buleto.

Li faris tion senkonscie. Li tamen kontentiĝis, ke li detruis ion. Li pensis, ke iun tagon, se lia mano fariĝus sufiĉe granda, li povus tiamaniere detrui la tutan malnovan sistemon. Kiel ĝojiga afero do estus ...

Post kelka tempo li ĉagreniĝis. Li sciis, ke nun li ne povas eliri por partopreni la studentan movadon.

“Kontraŭdiroj , kontraŭdiroj ...” li murmuradis. Li sciis, ke kontraŭdirojn posedas ne nur la avo kaj Granda Frato, sed ankaŭ li mem.

10

La homa korpo povas esti malliberigita, sed ne la koro. Kvankam Juehui ne forlasis la kortodomaron dum ĉi tiuj tagoj, lia koro tamen kunestis kun liaj kunlernantoj en la movado. Tion lia avo ne povis imagi al si.

Juehui desegnis en sia menso la situacion de la disvolviĝanta movado; li ekstreme avide legis ĵurnalojn pri la movado. Tie la sciigoj pri ĝi tamen estis bedaŭrinde malmultaj. Li ricevis numeron de la semajna revuo *Tajdo de Studentoj* redaktata de la Studenta Federacio, en kiu aperis kelkaj stimulaj eseoj kaj nemalmultaj ĝojigaj novaĵoj. La tumulto iom post iom kvietiĝis; la sinteno de la provincestro iom post iom moliĝis. Finfine li sendis sekciestron Zhao por konsoli la vunditajn studentojn kaj publikigis du pacigajn anoncojn. Kaj pli ol tio, li ordonis sian ĝeneralan sekretarion skribi, en lia nomo, leteron al la Studenta Federacio por peti pardonon kaj por garantii la sekurecon de la studentoj. Sekve de tio, la ĵurnalo aperigis anoncon de la Garnizona Stabo, en kiu ĝi deklaris, ke soldatoj estas severe malpermesitaj bati studentojn. Laŭdire, du soldatoj, kiuj konfesis, ke ili batis studentojn tiutage, estis severe punitaj. Tiun anoncon Juemin legis surstrate.

Ju pli da ĝojigaj novaĵoj alflugis, des pli maltrankvila fariĝis Juehui, malliberigita en la hejmo. Li ofte piedfrapetis la plankon en la ĉambro kaj kelkfoje eĉ ne havis inklinon legi. Rigide kuŝante en la lito, li stulte

fiksrigardis la tegmenton de la kontraŭmoskita vualo.

“Hejmo! Tia estas la miela hejmo!” Juehui ofte kriis indigne. Kelkfoje, aŭdinte lian kriadon, Juemin ridetis sed diris nenion.

“Pro kio vi ridas? Ĉar vi povas eliri, vi kompreneble ĝojas. Ankaŭ vi havos kiel mi!” Juehui fariĝis des pli kolera pro la rido de sia frato.

“Mi ridas. Ĉu tio koncernas vin? Ĉu vi volas malpermesi al mi ridi?” diris Juemin ridetante.

“Jes, mi malpermesas al vi ridi!” kriis Juehui, frapante sian piedon sur la plankon.

Juemin fermis la libron legatan kaj silente eliris, ne argumentante kun li.

“Hejmo! Kia hejmo! Ĝi estas nenio alia ol mallarĝa kaĝo!”* Juehui paŝis tien kaj reen en la ĉambro. “Mi volas eliri. Mi nepre elirs. Kion ili povas fari al mi!” dirante, li sin direktis eksteren.

Apenaŭ li malsupreniris la ŝtonŝtuparon, li vidis sinjorinon Chen kaj onklinon Shen interbabili ĉe la fenestro de la ĉambro de la avo. Li haltigis siajn paŝojn, kaj post hezito, li ŝanĝis sian direkton kaj iris al la ĉefhalo. Proksime al ĝi, li turns sin dekstren en la koridoron. Trairinte la koridoron, li preterpasis la fenestron de la ĉambro de Juexin kaj sin direktis al la ĝardeno.

Li trapasis rondan pordon. Antaŭ li staris artefarita monteto. La grua vojeto forkiĝis en dekstra kaj maldekstra direktoj. Li prenis la

maldekstran deklivan vojeton. Ĝi estis mallarga kaj sinu. Ĉe ĝia fino troviĝis tunelo tra la monteto. Ĉe la alia flanko de la tunelo, la vojo deklivis malsupren. Delikata aromo ŝvebis ĉien. Irinte parton de la vojo, li trovis ĝin ne plu videbla. Li malrapide antaŭeniris kaj prenis alian videblan vojeton ĉe la maldekstra flanko. Tuj kiam li ĉirkaŭiris vojkurbon lia vidkampo subite larĝiĝis, kaj li vidis ruĝetan arbaron antaŭ si. Ĝi estis umearbaro. Ruĝaj kaj blankaj floroj floris prospere. En la arbareto, tretante dise falintajn petalojn, li vagis malrapide dispuŝante pendantajn branĉojn

Li levis pretervole sian kapon kaj vidis ion bluan moviĝantan en malproksimo. Dispuŝante malalte pendantajn branĉojn, li paŝis en tiu direkto. Post kelkaj paŝoj li konstatis, ke tio estas homo iranta sur kurba ponteto renkonte al li. Li nun klare vidis la tutan figuron kaj harligon de la venanto. Estis Mingfeng.

Li volis ŝin voki, sed antaŭ ol li ŝin vokis ŝi jam eniris en la pavilonon en la mezo de lago. Li do atendis ŝin.

Post kelka tempo, li ne vidis ŝin eliri kaj miris, kion ŝi faras tie. Fine Mingfeng eliris en akompano de alia knabino en purpura vatita jako. Li povis vidi nur la longan harligon kaj la dorson de la svelta knabino, kiu interparolis kun Mingfeng. Ĉar ŝi vizaĝis al alia direkto, li ne povis rekonii ŝin. Tamen kiam ili alproksimiĝis al la bordo, trapasinte kelkajn kurbojn sur la ponteto, ŝia vizaĝo frontis al li kaj li tuj rekonis en ŝi

Qian-er, servoknabinon de sia onklo Ke-an.

Vidinte, ke ili pli kaj pli alproksimiĝas, li sin turns kaj kaŝis en la densejon de la arbareto.

“Reiru unua, ne atendu min. Mi devas pluki kelkajn frondojn de umefloroj por ŝia sinjorina moŝto,” aŭdiĝis la arĝenta voĉo de Mingfeng.

“Bone. Mi reiru unua. Mia sinjorino Wang estas ĉikanema. Se ŝi ne vidas min dum tempeto, ŝi skoldas senĉese,” diris Qian er.

Ŝi malrapide trairis la umearbareton kaj laŭiris la vojeton, kiun Juehui antaŭe prenis.

Vidinte sian figuron malaperi, li grandpaŝe sin direktis al Mingfeng. Li rimarkis, ke ŝi disrompas pendantan umefloran frondon.

“Kion vi faras, Mingfeng?” li demandis kun rideto.

Tiam ŝi absorbite penis rompi la branĉeton kaj ne rimarkis lin alproksimiĝi. Aŭdinte lian abruptan voĉcon, ŝi ellasis la frondon surprizite. Kiam ŝi rekonis Juehui, ŝi faciligite ekridetis. Ŝi diris, “Ho, estas vi, Tria Sinjorido.” Ŝi etendis sian manon kaj derompis la frondon. Tenante ĝin en la mano, ŝi ĝin rigardis.

“Kiu volas, ke vi faru tion? Kial vi desiras ĉimomente anstataŭ matene?”

“Ŝia sinjorina moŝto. Ŝi diris, ke sinjorinoj Zhou kaj Zhang volas kelkajn. Post momento Dua Sinjorido portos la frondojn al ili,” dirante, ŝi rimarkis belforman frondon kun prosperaj umefloroj en la maldekstra

flanko. Ŝi etendis sian manon por deŝiri , sed ŝi ne povis atingi ĝin pro sia malalteco. Kvankam ŝi stariĝis piedpinte, ŝi ankoraŭ ne povis atingi ĝin.

“Mi derompu por vi. Vi iom tro malaltas. Post unu aŭ du jaroj, vi povos fari tion,” nereteneble ridis Juehui ŝin rigardante.

“Bone, derompu por mi, kondiĉe ke ŝia sinjorina moŝto ne eksciu pri tio.” Mingfeng flankenigis kaj staris apude, por ke li povu derompi la frondon por ŝi.

“Kial vi tiel timas Sinjorinon? Ŝi fakte ne estas malbonkora. Ĉu ŝi ofte riproĉis vin lastatempe?” ridetante demandis Juehui. Alpaŝinte, li stariĝis piedpinte kaj streĉis sin por deŝiri la frondon de umefloroj. Li derompis ĝin kaj donis ĝin al Mingfeng.

“Ŝia sinjorina moŝto malofte riproĉis min dum pli ol unu jaro. Mi tamen ĉiumomente maltrankviliĝas kaj timas misfaron,” respondis ŝi mallaŭte. Ŝi prenis la frondon de li. “Pri tio, oni diras, ke la sklavo ĉiam estas senhelpa...” li ekridetis, sed li ne havis intencon primoki ŝin.

Awdinte tion, ŝi ne respondis. Ŝia kapo kliniĝis ĝis la frondoj, kiujn ŝi tenis en la mano.

“Vidu , tie estas bela branĉo,” li diris ĝoje.

Levinte la kapon, ŝi ridetante demandis, “Kie?”

“Jen tie, ĉu ne?” Li fingre montris la supron de la apuda arbeto. Ŝi

rigardis laŭ la direkto montrata de li. Vere bela branĉeto troviĝis tie. La frondo alte pendis, kun nemalmultaj floroj, el kiuj plejparto estis ekfloronta. La kurba frondo aspektis firma kaj alloga.

“Jes , ĝi estas tre bona, sed iom tro alta,” ŝi parolis al si, rigardante la frondon.

“Ne gravas . Estas facile akiri ĝin.” Esplorinte la trunketon de la arbeto, li diris, “Mi grimpu sur la arbeton por akiri ĝin.” Li komencis malbutoni sian vatitan robon.

“Ne, ne faru tion,” ŝi malhelpis, “se vi falos, vi vundiĝos.”

“Tio ne okazos,” li diris kun rideto. Demetinte sian vatitan robon, li pendigis ĝin sur la apudan arbeton. Malhele verda pulovero ĉirkaŭis lin. Grimpante, li diris, “Tenu firme la trunkon.”

Li surgrimpis la arbon nur per kelkaj piedmovoĵoj. Kiam li atingis la arboforkegon, li starigis unu piedon sur la forkon kaj alian sur unu fortikan brancon. Rajdante super dika branĉo, li etendis la manon, sed li ne povis atingi la frondon. Li retiris sian manon. La branĉo forte skuiĝis kaj petaloj flirte falis. Mingfeng kriis sube, “Zorgu pri vi, zorgu pri vi.”

Dirante “Ne timu”, li ŝanĝis sian pozicion kaj firme alkroĉiĝis al la dika branĉo per sia dekstra brako. Unue li faris pezajn piedpremojn sur alian branĉon per la maldekstra piedo por vidi, ĉu ĝi estas sufiĉe fortika, kaj poste li movis la dekstran piedon sur la saman

branĉon. Klininte sin, li provis trifoje kaj fine sukcesis derompi la frondon. Tenante ĝin en la mano, li denove movis la dekstran piedon al la antaŭa loko. Li klinis sian kapon malsupren kaj vidis la suprenrigardantan vizaĝon de Mingfeng.

Dirante “Mingfeng , kaptu la frondon!”, li lasis ĝin malpeze fali, dispuŝante branĉojn por ke ĝi ne kroĉiĝu. Vidinte, ke ĝi falis en ŝiajn manojn, li malsupreniĝis de la arbeto.

“Sufiĉe , ĉi tiuj tri frondoj sufiĉas,” gaje diris Mingfeng.

“Sufiĉe. Se ni kolektus pli, Dua Sinjorido ne povus forporti ilin tute.” Li prenis la robon kaj ĵetis ĝin sur siajn ŝultrojn. Li demandis : “Ĉu vi ĵus vidis Duan Sinjoridon?”

“Li legas sur la fiŝhoka teraso de la lageto,” ŝi respondis, ordigante la frondojn. Rimarkinte, ke li nur pendigas la robon sur siajn ŝultrojn, ŝi zorgeme diris, “Surmetu ĝin , alie vi malvarmumus.”

Juehui surmetis la robon. Rimarkinte, ke ŝi subite sin turnas kaj foriras laŭ la vojo, kiun li prenis antaŭe, li vokis, “Mingfeng”.

Ŝi haltis kaj turniĝis. Ŝi demandis kun rideto, “Kion vi volas?” Vidinte, ke li ne parolas kaj nur ridete rigardas ŝin, ŝi denove sin turnis kaj iris antaŭen.

Li faris kelkajn hastajn paŝojn antaŭen kaj vokis ŝin kelkfoje. Ŝi denove haltis kaj sin turnis, elmetante la saman demandon, “Kion vi

volas?”

“Venu ĉi tien,” li petis.

Ŝi alpaŝis.

“Ŝajne vi timas min lastatempe kaj ne volas longe interbabili kun mi. Por kio do?” li demandis duonŝerce kaj duonserioze ludante kun pendanta branĉo per unu mano.

“Kiu timas vin?” ŝi ne povis deteni sin de brua ekrido. “Mi estas multe okupita de mateno ĝis vespero. Kiu havas tempon por babili senfare?” Fininte, ŝi volis foriri.

Haste Juehui mansignis, ke ŝi haltu, dirante, “Mi scias, mi scias, ke vi vere timas min. Vi diras, ke vi ne havas tempon, kial vi ludis kun Qian-er tie? Mi ankaŭ vidis vin interbabili kun ŝi en la pavilono en la lageto.”

“Vi estas sinjorido kaj mi servoknabino. Kiel mi kuragus multe babili kun vi?” ŝi diris, ŝajne indifere.

“Sed kial vi ofte ludis kun mi antaŭe? Tiam ni havis la samajn poziciojn, ĉu ne?” li daŭrigis sian demandadon.

Ŝi ĵetis brilan rigardon al lia vizago. Ŝi altrudis al si rideton. Mallevinte la kapon, ŝi klarigis en melankolia tono, “Nun estas malsame. Ni ambaŭ jam plenkreskiĝis.”

“Plenkreskiĝi? Kion koncernas tio? Ĉu niaj koroj malboniĝis?” demandis Juehui surprizite.

“Mi ne celas tion. Kiel plenkreskuloj, ni ne devas ofte kunesti,

alie oni babilaĉus kontraŭ ni. Kaj en nia domaro estas multaj klaĉemuloj. Ne gravas mia persono, sed vi, vi devas zorgi pri vi mem. Ne forgesu vian sinjoridecon,” ŝi diris ankoraŭ kun klinita kapo. Ŝia voĉo entenis amaron.

“Ne foriru. Ni trovu konvenan lokon kaj interbabilu por longa tempo. Mi prenu la frondojn.” Li prenis la frondojn de ŝi, sen konsidero pri do, ĉu ŝi konsentas aŭ ne. Li pririgardis ilin kaj forŝiris du aŭ tri vergetojn.

Li laŭiris la padon apud la lageto kaj ŝi lin sekvis senvorte. Li kelkfoje returnis la kapon por demandi ŝin. Kaj ŝi koncize respondis aŭ nur ridetis

Ili trairis la umearbareton, preterpasis longforman florbedon kaj atingis pordeton. Enirinte, ili alfrontis kavernon post dekkelkaj paŝoj. En ĝi estis malhele, sed troviĝis mallonga kaj rekta vojeto. Murmurado de fonto aŭdeblis tie. Ekster la kaverno la vojo kondukis supren. Ili supreniris pli ol dudek ŝtupojn kaj post kelkaj turniĝoj, ili atingis la supran ebenaĵon.

Ĉi tiu loko estis malgranda kaj oblonge rektangula kovrita per sableca tero. Tie troviĝis malgranda ŝtontablo kaj kvar rondaj taburetoj el ŝtono. Ĉe granda roko starts pinarbo, kies densa branĉaro pendis super la ŝtona tableto, kiel baldakeno.

Ĉi tie estis kviete, escepte de la murmurado de fonto. La fontfluo eliris el fendo en la alia flanko de la granda roko kaj fluis malsupren tra

ŝtonetoj. Tial oni povis nur aŭdi la murmuradon, sed ne vidi la fluon.

“Kiel kvieta loko ĝi estas!” pretervole admiris Juehui, kiu antawiris. Li iris al la ŝtona tableto kaj metis la umeflorojn sur ĝin. Forviŝinte la polvon de sur la tabureto per sia poŝtuko, li sidiĝis. Mingfeng alpaŝis kaj sidiĝis sur la tabureto kontraŭ li. La frondoj sur la tableto malebligis ilin vidi unu la alian.

Juehui ridetis. Li prenis ilin kaj metis sur la tabureton dekstre de li. Montrante la tabureton maldekstran, li diris, “Nu, sidiĝu ĉi tie. Kial vi ne kuraĝas sidi proksime al mi?”

Mingfeng silente paŝis al la montrita tabureto kaj sidiĝis.

Ili rigardis vid-al-vide kaj interŝanĝis per siaj rigardoj multajn esprimojn, kiujn vortoj ne povis.

“Mi devas foriri . Mi jam restis longe en la ĝardeno. Se ŝia sinjorina moŝto ekscios pri ĉi tio, ŝi riproĉos min,” ŝi diris, kvazaŭ vekiĝinte, kaj stariĝis.

“Ne gravas. Sinjorino ne riproĉos vin. Ni diris nur malmultajn vortojn. Mi ne lasas vin foriri.” Li kaptis ŝian maldekstran brakon kaj denove sidigis ŝin.

Ŝi restis silenta, sed ŝajne timida, kvazaŭ ŝi timus lian mantuŝon al ŝia korpo, tamen ŝi ne montris rifuzemon.

“Kial vi ne parolas? Ĉi tie ne estas aliaj ĉeestantoj . Ĉu vi ne plu ŝatas min?” Li afektis malesperan mienon.

Ŝi ankoraŭ restis senvorta, kvazaŭ ŝi ne aŭdus lian parolon.

“Mi scias, ke via koro jam ne estas en nia domo. Mi diros al Sinjorino, ke ŝi edzinigu vin pli frue, ĉar vi jam plenkreskiĝis,” li diris kun ŝajnigita flegmo pri ŝia sorto. Fakte li ŝtele observis ŝiajn okulojn.

Subite ŝi paliĝis kaj ŝiaj brilaj okuloj malheliĝis. Ŝi ne povis eligi vorton dum longo tempo. Ŝi movetis siajn lipojn sed diris nenion. Ŝiaj okuloj denove ekbrilis kiel vitro, kaj la okulharoj movetiĝis. “Ĉu vere?” estis ŝia mallonga demando. Larmoj perlis sur ŝiaj vangoj. Tamen ŝi ne elmetis plian demandon.

Vidinte ŝian egan malĝojon, li sciis, ke liaj vortoj estas nekonvenaj. Sed li ne havis intencon vundi ŝian senton. Li faris tion nur por sondi ŝian koron kaj aliflanke por fari venĝon kontraŭ ŝia flegmo. Li ne imagis al si, ke lia parolo povas malĝojigi ŝin tiagrade. La rezulto de la sondado kontentigis lin, sed li ankaŭ pentis pri do.

“Tion mi diris nur ŝerce. Kial vi prenis tion kiel veron? Kial mi elpelus vin?” li konsolis ŝin ameme kaj emociite.

“Kiu scias, ĉu tio estas vera aŭ ne? Vi sinjoridoj aŭ sinjoroj ĉiam estas kapricaj. Kiam vi malplezuriĝas, vi povas fari ian ajn aferon,” ŝi plorsingultis. “De longe mi scias, ke mi neeviteble sekvos la ekzemplon de Xi-er iun tagon. Sed kial tiel frue?”

“Kion vi diris?” li milde demandis, nekompreneble ŝian lastan frazon.

“Via parolo...” ŝi ankoraŭ plorsingultis.

“Mi ĵus diris, ke mi nur ŝercis. Mi neniel lasos vin elpeliĝi nek suriri la vojon de Xi-er.” Li, tute sincera, altiris ŝian maldekstran manon sur sian genuon kaj ĝin karesis senĉese.

“Se ŝia sinjorina moŝto havas tian intencon, kiel do... ?” Mingfeng demandis. Ŝi jam ĉesis plori, sed ŝia voĉo sonis iomete triste kaj larmomakuloj ankoraŭ videblis sur ŝiaj vangoj.

Li ne donis tujan respondon, li nur rigardis ŝiajn okulojn. Iome hezitinte, li decideme diris, “Mi havas rimedon kaj mi scias kiel devigi Sinjorinon fari laŭ mia volo. Mi diros al ŝi, ke mi prenos vin kiel edzinon...” Tiuj vortoj vere elverŝiĝis el la fundo de lia koro. Sed tiam li ne zorgeme pripensis ŝian situacion.

“Ne, ne. Ne prene ne diru!” ŝi kriis konsternite kaj hasteme kovris lian buŝon per la dekstra mano netenata de li. “Ŝia sinjorina moŝto certe ne konsentos pri do. Se tiel, ĉio estos perdita. Bonvolu ne diri tion al ŝi ... Mi ne havas tiel bonan sorton.”

“Ne timu,” li diris fortirante ŝian manon de sur la buŝo. “Jen, via vizaĝo kovriĝas de larmoj. Mi forviŝu ilin.” Li elpoŝigis poŝtukon kaj zorge viŝis ŝian vizaĝon. Ŝi tamen ne rifuzis tion. Viŝante, li diris kun rideto, “Vi virinoj ja estas riĉaj je larmoj.”

Al ŝia vizaĝo revenis rideto, tamen rideto malgaja. Ŝi malrapide diris, “Poste mi ne ploros plu. Mi jam sufiĉe larmis en via domo. Ĉi tie

kun via ĉeesto, mi ne plu ploros.”

“Trankviliĝu . Nun ni ambaŭ estas junaj . Kiam la tempo venos, mi diros tion al Sinjorino. Mi certe havos rimedojn. Mi absolute ne trompas vin.” Li konsolis ŝin mildvoĉe, ankoraŭ tenante ŝian maldekstran manon.

“Ankaŭ mi konas vian koron,” ŝi diris danke. Ĝojmiena, ŝi diris reveme, “Lastatempe mi ofte sonĝis vin. Foje mi sonĝis, ke grego da lupoj postkuras min. Ili estas kuratingontaj min, kiam iu alkuras de monttalo kaj forpelas ilin. Post pririgardo, mi konstatas, ke estas vi. Sciu, mi ĉiam prenas vin kiel mian savanton.”

“Kial vi ne diris tion al mi pli frue? Mi ne sciis, ke vi tiel fidis min.” Lia tremetanta voĉo perfidis lian internan eksciton.” Vi multe suferis en mia hejmo. Kaj ankaŭ mi ne bone traktis vin. Mi petas de vi pardonon. Mingfeng, vi ne riproĉas min, ĉu ?”

“Ĉu mi kuraĝus riproĉi vin?” ŝi diris kun rideto, skuante la kapon. “Dum mia tuta vivo mi havas tri personojn en mia koro : mia patrino, la Unua Fraŭlino, kiu instruis al mi legi kaj skribi, komprenigis al mi multajn aferojn kaj ofte zorgis pri mi. Ili ambaŭ mortis. Nun restas nur vi. ..”

“Mingfeng , kiam mi pensas pri vi, mi tre hontas. Mi vivas komforte, dum vi elportas suferojn en mia hejmo,” li diris emocie.

“Tio estas nenio por mi. Mi jam eltenis sep jarojn ĉi tie. Nun mi

havas multe pli bonan vivon kaj jam ne sentas mizeron ... Se mi nur pensas pri vi aŭ vidas vin, ĉiam ajn gigantan suferon mi povas elporti. Mi ofte vokas vian nomon en mia menso, sed mi ne povas fari tion publike.”

“Vi vere suferis tre multe, Mingfeng. Je via aĝo, vi devus lerni en la lernejo. Tiel saĝa knabino, kiel vi, certe lernus pli bone ol fraŭlino Qin... Se vi naskiĝus en riĉa familio ! Se vi troviĝus en la pozicio de Qin!” Lia voĉo plenis je bedaŭro.

“Mi tie deziras, ke mi naskiĝu kiel fraŭlino en riĉa familio, ĉar mi ne havas tiel bonan sorton. Mi nur petas ke vi ne elpelu min. Mi volas penlabori kiel servoknabino en via domo por priservi vin ĉiumomente... Vi ne scias, kiel mi ĝojas, kiam mi vidas vin. Mia koro trankviliĝas, se mi laboras proksime al vi... Vi ne scias, kiel mi respektas vin... Kelkfoje, ŝajnas al mi , ke vi similas la lunon alte sur la ĉielo kaj mi ne povas tuŝi vin.”

“Tion ne diru. Mi estas nur ordinara homo, kiel vi. Estonte mi nepre edziniĝos vin. ..” Lia voĉo tremetis. Kelkaj larmoj elfluis el liaj okuloj.

“Bonvolu, Tria Sinjorido, ne diri plu tion!” haste interrompis Mingfeng. “Kial vi ĉiam mencias mian edziniĝon al vi? Ĉu ne estas pli bone, se mi priservus vin kiel servoknabino mian tutan vivon? Tiamaniere ŝia sinjorina moŝto ne koleriĝos kontraŭ mi, kaj viaflanke vi ofendos neniun. Mi kontentos, se mi povos vivi ĉe vi la tutan vivon.

Sed mi sentas iom da timo. Mi timas, ke tro bela sonĝo ne daŭros longe. Tria Sinjorido, neniel revu tro multe kaj tro bele !”

“Kion vi diras, Mingfeng ! Se mi disponus vin kiel servoknabinon dum la tuta vivo, do estus mia kulpo. Mi absolute ne faros tion. Mi devas trakti vin dece,” li diris sincere kaj emociite.

“Silentu,” ŝi diris mallaŭte, subite kaptinte lian maldekstran brakon. “Aŭdu, iu estas malsupre.”

Ili ambaŭ silente aŭskultis. La malforta homvoĉo alflugis de malsupre. Pro murmurado de la fonto, ili ne povis aŭdi klare. Tamen ili sciis, ke estas Juemin, kiu kantas malsupre.

“Dua Sinjorido revenas,” diris Juehui, kiu stariĝis kaj iris al la rando por rigardi. Li distingis moviĝantan grizan figuron en la ruĝeta umearbareto. “Jes, estas li,” li parolis al ŝi. Li sin turnis kaj diris al Mingfeng, “Jes, estas Dua Sinjorido.”

Mingfeng tuj stariĝis kaj diris, “Mi devas foriri. Jam tiel longe mi restis ĉi tie ... Eble estas tempo por tagmango.” Ŝi volis preni la umeflorojn. Juehui tamen jam prenis ilin kaj dons al ŝi. Li diris, “Se Sinjorino pridemandos vin, kial vi forestas tiel longan tempon, respondu... ke vi faris aferojn por mi.”

“Bone. Mi foriru sole, ke ni ne estu kune viditaj de aliaj .” Returninte sian kapon kaj farinte rideton al li , ŝi malsupreniris.

Li sekvis ŝin kelkajn paŝojn kaj haltis. Li okule akompanis ŝin

malsuprenin la ŝtonan ŝtuparon ĝis ŝi malaperis malantaŭ rokmuron.

Li paŝadis tien kaj reen kelkan tempon sur la teraso. Ŝia vizaĝo okupis lian tutan menson. Li diris al si mallaute, “Mingfeng, vi estas kaj bonkora kaj pura. Nur vi ... ” Li reiris al la ŝtona tabureto, sur kiu ŝi sidis, kaj sidiĝis kun ambaŭ kubutoj sur la ŝtona tableto. Tenante la kapon ambaŭmane, li fiksrigardis malproksimen, kvazaŭ sonĝe murmurante, “Kiel pura vi estas, kiel pura vi estas...”

Post kelka tempo li subite stariĝis, kvazaŭ vekiĝinte el sonĝo. Ĵetinte sian rigardon ĉirkaŭen, li malsupreniris.

Ĉi-nokte la luno bele brilis. Juehui ne volis ekdormi kaj ankoraŭ promenadis post la noktomezo en la korto.

“Kial vi ankoraŭ ne enlitiĝis, Tria Frato? Estas tre malvarme en la korto!” demandis Juemin, kiu elirinte el la ĉambro kaj starante sur la ŝtona ŝtuparo, rimarkis lin ankoraŭ restanta en la korto.

“Tiel belas la luno, ke mi ne volas dormi,” respondis Juehui senzorge.

Juemin descendis de la ŝtuparo. Li ekstremsis pro frosto . “Kiel malvarme!” li diris , kaj levis sian kapon por rigardi la lunon.

Sur la ĉielo estis neniueco da nuboj. La ronda luno glitis solece, kvazaŭ en la blua vasto de maro. Ĝi disverŝis puran kaj malvarman lumon sur la teron kaj tegolojn kaj ilin argente. Silento regis.

“Kiel hele!” admiris Juemin. “Jen vere ‘la lunlumo similas al

prujno’.” Li promenis kune kun Juehui.

“Qin estas vere inteligenta ... vere brava. Ŝi vere estas bona,” Juemin nereteneble admiris. Kontenta rideto aperis sur lia vizaĝo.

Juehui restis senvorta, ĉar lia menso estis okupita de alia junulino. Li nur sekvis la paŝadon de la frato.

“Ĉu vi ŝatas ŝin? Ĉu vi amas ŝin?” subite demandis Juemin, kaptante la dekstran brakon de sia frato.

“Kompreneble,” senhezite respondis Juehui. Li tamen tuj korektis sin mem, “Ĉu vi parolis pri fraŭlino Qin? ... Ankaŭ mi ne scias. Mi pensas, ke vi amas ŝin.

“Jes,” diris Juemin, kiu ankoraŭ tenis lian brakon. “Mi amas ŝin. Mi kredas, ke ankaŭ ŝi amas min. Mi ankoraŭ ne scias, kion mi devas fari. Kaj vi? Ĉu vi diris, ke ankaŭ vi amas ŝin?”

Juehui ne rigardis la vizaĝon de sia frato, sed li sentis, ke lia frato troviĝas en granda eksciteco, juĝante laŭ ties neordinara voĉo kaj tremanta mano, kiu tens lian brakon. Juehui frapetis lian mandorson per la maldekstra mano kaj diris ridetante, “Estu kuraĝa. Mi deziras al vi sukceson ... Mi amas fraŭlinon Qin kvazaŭ ŝi estus mia fratino. Plie mi volas havi sin kiel mian bofratinon...”

Juemin levis la kapon kaj senvorte rigardis la lunon kelkan tempon. Poste li diris al Juehui, “Vi ja estas mia bona frato ! ... Ĉu vi priridas min?”

“Ne, Dua Frato, mi ne priridas vin,” sincere dins Juehui, “mi elkore simpatias kun vi. ..” Subite li ŝanĝis sian tonon, “Aŭskultu, kio estas tio?”

Alblovĝis de ie ploreto, mallaŭta kaj subpremita. Ĝi saturis la aeron, ŝvebis ĉien kaj plenigis la tutan lunan nokton. Ĝi estis nek homvoĉo nek malgaja ĉirpado de insektoj kaj birdoj. La sono estis multe pli malpeza kaj multe pli klara. Kelkfoje ĝi iom akutiĝis, kvazaŭ mildaj plendoj el la fundo de animo. Poste ĝi malkreskis preskaŭ ĝis malapero, kiel pasanta venteto. Tamen oni estis certa, ke io vibris en la aero kaj kirlis la aeron tiel ke ĝi plenas de malĝojo.

“Kio sonas?” mire demandis Juehui.

“Granda Frato ludas bambuan flageleton. Dum la lastaj noktoj, li ludis ĝin en malfrua horo. Mi aŭdis ĉiunokte,” klarigis Juemin.

“Kio turmentas lin? Antaŭe li ne estis tia. Kiel korŝira la melodio!” Miro pliiĝis ĉe Juehui.

“Ankaŭ mi ne klare scias la kaŭzon. Eble li informiĝis, ke kuzino Mei jam revenis al la provinca ĉefurbo, mi supozas. Tian malgajan melodion li ludas ĉi tiujn noktojn ... Kio povas lin turmenti, se ne amo al ŝi? Mi ne povas dormi ĝuste pro tia melodio ... kiu ŝajne alportas al mi teruron ... Nun la situacio inter Qin kaj mi estas preskaŭ sama kiel tiu inter Granda Frato kaj kuzino Mei. Aŭskultante lian ludadon, mi sentas vole-nevole maltrankvilon pri tio ke mi prenos la

saman vojon de Granda Frato en la estonteco. Mi ne kuraĝas imagi la situacion. Se mi vere troviĝos en la dilemo de Granda Frato, mi timas, ke mi ne plu povos vivi. Mi ne fariĝos tia, kia li!”

Aŭskultante lian parolon, Juehui subite rimarkis lian kvietan voĉon fariĝi tremanta kaj malĝoja. Li simpatie konsolis al Juemin, “Trankviliĝu. Vi absolute ne iros la vojon de Granda Frato, ĉar la nuna epoko estas malsama.”

Li levis la kapon kaj rigardis la ĉielon. Li rigardis la brilan lunon disverŝantan lumon. Ŝajnis al li, ke antaŭ lin junulina vizaĝo estis alpuŝata per nerezistebla forto. Li murmuris, “Kiel pura vi estas ! Nur vi similas ĉi tiun klaran kaj brilan lunon !”

*Aludo al la fabelo «Mallarĝa Kaĝo»de la rusa blinda esperantisto-poeto Eroŝenko, kiun ĉinigis s-ro Lusin.

11

La konflikto inter la soldatoj kaj la studentoj kvietiĝis iom post iom. La studentoj, kiuj venis de aliaj lokoj por subteni la movadon, forlasis la provincan ĉefurbon por celebri hejme la Printempan Feston. Iuj malsukcesintoj el la studentoj loĝantaj en la urbo intense okupiĝis pri relernado de lecionoj por reekzameno ĉe la komenco de la venonta semestro. La plilongigita striko en la lernejo donis la impreson, ke la vintra libertempo jam komenciĝis. La lerneja instanco faris la finlaborojn de la semestro kaj sin preparis por la ferioj de la Printempa Festo. Rilate al la rezulto de la movado, la studentoj ŝajne gajnis venkon.

Juemin ĉiuvespere iris al la hejmo de sia onklino por helpi Qin en lernado de la angla lingvo. Kaj Juehui ankoraŭ restis fermita en la hejmo kaj legis ĵurnalojn. En ili aperis multaj informoj, pri kiuj li ne interesiĝis. Raportaĵoj pri la studenta movado malpliigis kaj fine tute malaperis. Pro tio Juehui eĉ ne plu foliumis ilin.

“Kia vivo ! Ĝi vere estas vivo de malliberulo !” li ofte sakris. Kelkfoje, kiam li sentis iritiĝon en la koro, li eĉ ne volis renkonti iun ajn el la familianoj. Tio, kio plej ĉagrenis lin, estis, ke Mingfeng ŝajne evitis lin intence. Li havis malmultajn ŝancojn por interbabili kun ŝi.

Kiel kutime, li iris al sia avo por diri bondeziron matene kaj nokte. Tial li ne povis ne alfronti la lacan kaj malhele flavan vizaĝon de la avo

kaj la ruĝe kaj blanke pudritan vizaĝon de sinjorino Chen. Krome multaj senesprimaj kaj dube ridetantaj vizaĝoj ofte frapis liajn okulojn. Kiam li jam vere ne povis plu tion elteni, li indigne diris, “Atendu, iun tagon...” Kio finfine okazos iun tagon? Ankaŭ li ne klare sciis. Sed li konvinkiĝis, ke iun tagon ĉio en la mondo tute aliiĝos kaj ĉio, kion li abomenas, tute elradikiĝos. Li denove sin turnis al malnovaj numeroj de *Nova Junularo*, *Nova Tajdo* kaj aliaj revuoj. Legante la artikolon *Pri la Malnovmoda Familio*, li sentis grandan ĝojon, kvazaŭ li jam sin venĝus.

Tamen la ĝojo estis momenta. Kiam li demetis la legajojn kaj eliris el la ĉambro, liajn okulojn ree frapis ĉio, kion li ne volis vidi. Soleco tuj kaptis lin, kaj li reiris al la ĉambro en enuo. Tiamaniere li pasigis la tempon.

Kvankam Juemin loĝis en la sama ĉambro kun Juehui, li tamen okupiĝis pri siaj propraj aferoj dum tiuj tagoj. Eĉ en la hejmo li malofte restis en la ĉambro kaj li legis librojn en la ĝardeno tuttage. Li ankaŭ montris grandan zorgon pri la lernado de Qin. Juehui ne ĝenis lin.

“Kia soleco!” ofte veis Juehui en la ĉambro. Li ne plu interesiĝis pri novaj gazetoj kaj ĵurnaloj, kio pliigis lian senton de soleco. Li elprenis la longe forlasitan taglibron kaj skribis la sekvajn liniojn pri sia tagvivo:

Matene mi iris al la avo por diri bondeziron. Li interparolis kun onklo Ke-an en la kabineto. Li petis tiun skribi paron da skribrulaĵoj kiel

donacon por festi la 60-an naskiĝtagon de malnova amiko Feng Leshan. La avo jam ekzamenis la gratulajn vortojn ellaboritajn de onklo Keding. Onklo Ke-an obeeme jesadis. Post kiam li foriris, delikata rideto aperis sur la vizaĝo de la avo. Li donis al mi libron de klasikaĵo, dirante, “Legu ĝin zorgeme kaj plurfoje.” Mi diris jes kaj estis elironta, kiam onklo Keming venis. La avo haltigis min. Onklo Keming prezentis poemojn nove verkitajn de li al la avo por ties polurado. Preninte la kajeron kaj foliuminte kelkajn paĝojn, la avo eligis admirojn kaj poste sin turnis al mi, dirante, “Vi devas sekvi la ekzemplon de via onklo. Lernu skribi poemojn kaj artikolojn en la hejmo.” Timante, ke li instrukcios senfine, mi haste diris jesojn kaj elrapidis. Preterpasante la najbaran ĉambron, mi vidis sinjorinon Chen kombanta siajn harojn. Mi turnis min alidirekte. Kiam mi revenis en mian ĉambron, mi sentis min multe faciligita. Mi ne scias kial, en miaj okuloj, la ĉambro de la avo similas juĝejon. La avo volas, ke mi sekvu la ekzemplon de onklo Keming, tamen mi absolute ne faros tion. Mi ĉiam konsideras tiun onklon kiel hipokritulon, kiu nur trompas la avon.

La titolo de la libro, kiun la avo ĵus donis al mi, estas «Instruado de s-ro Liu Zhitang pri Fileco kaj Abstinado de Diboĉo». Ĝi dolorigas mian koron. Ĵetinte ĝin sur la tablon, mi iris promeni sola en la ĝardeno.

En la umearbareto mi vidis bofratinon pluki umefflorojn, kune kun sia fileto Haiĉjo, malpliolkvar jara . Rigardante sian afablan kaj plenan vizaĝon kun paro da grandaj vivecaj okuloj radiantaj per bonkoreco, mi naskis simpaton en la koro. Mi diris, “Bofranjo, vi estas sufiĉe frua ĉi-matene. Vi povas sendi Mingfeng pluki anstataŭ vi. Kial vi mem faras tion ?” Post kiam ŝi derompis frondon, ŝi turnis sian rigardon al mi, ekridis kaj diris, “Via Granda Frato ŝatas umefflorojn. Ĉu vi ne rimarkis la umefflorojn en lia cambro ? . Mi ofte plukas umefflorojn por li. Mi timas, ke tiuj kiujn Mingfeng elektas ne plaĉas al li, tial mi ciam mem faras tion.” Poste ŝi alvokis Haiĉjon por diri bonan matenon al mi. Haiĉjo estas inteligenta kaj obeema. Ĉiuj ni ŝatas lin. Tamen alia penso venis en mian kapon kaj mi diris, “Granda Frato ankaŭ ŝatas umefflorojn.” Bofratino daŭrigis, “Antaŭ kelkaj tagoj mi desegnis umefflorojn kaj brodis ilin sur la rubandon ĉe la antaŭa supro de nia kulvualo. Vi certe rimarkis ĝin.” Ŝia vizaĝo iom ruĝiĝis kaj milde ridetis, kaj du kavetoj aperis sur la vangoj. Kiam ŝi mencias Grandan Fraton, ŝia voĉo sonas amoplena. Mi scias, ke Ŝi tre amas Grandan Fraton. Tamen mi ĉagreniĝis. Se ŝi scius, kial Granda Frato ŝatas umefflorojn kaj kion umeffloroj signifas por li, ŝi dronus en granda malĝojo.

“Tria Frato, ŝajne vi malĝojas. Mi scias, ke vi suferas multe ĉi tiujn tagojn, pro tio, ke ili enfermas vin en la hejmo kaj ne lasas vin eliri. Eble

la kolero de la avo jam forvaporigis nun. Post kelkaj tagoj vi estos libera. Ne maltrankviliĝu, alie vi eble malsaniĝos pro tio,” ŝi ameme konsolis min. Sed mi pensis, “Vi ne scias, ke mi maltrankvilas pro vi. Granda Frato, kiun vi arde amas, ankoraŭ korinklinas al alia virino ..”*

Sed rigardante ŝian kvietan kaj simpatiecan vizaĝon, mi ne kuraĝis vortigi mian penson.

“Mi devas reiri kaj kuiri ovojn por via Granda Frato.” Ŝi forgvidis Haiĉjon, tenante umefflorojn en la mano. Returninte la kapon, ŝi diris kun rideto, “Venu post momento al mia ĉambro por ludi ŝakon. Vi certe sentas vin enua en la hejmo tuttage.” Mi jesis kaj stulte rigardis al ŝia dorso. Mi sentis korinklinon al ŝi. Mi pensas, ke mia amo al ŝi ne alportos malbonon al Granda Frato, ĉar mi amas ŝin kiel pli aĝan fratinon. Sed mi estas singena por diri tion al iu ajn, eĉ al Juemin, mia dua pliaga frato, kiun mi antaŭe tre fidis.

Lastatempe Juemin estas tre korinklina al kuzino Qin, kion li jam malkaŝis al mi. Tamen juĝante laŭ la konversacio inter ni, li ŝajne ankoraŭ ne esprimis sian amon al ŝi. Li fariĝas stranga tagon post tago kaj tute ne zorgas pri hejmaj aferoj. Li ĉiumatene iras al sia hejmo tre frue kaj eĉ ne revenas por vespermanĝo. Mi iom maltrankviliĝis pro li, ĉar lia konduto estos rimarkita de tiuj klaĉemuloj. Kaj tiam.. .

Lastatempe, kiam li konversis kun mi, lia parolo ĉiam tuŝis Qin. Ŝajnis, ke li estas la nura posedanto de kuzino Qin. Sed tio ne gravas. Al la studenta striko li tamen montris nenian zorgon. En lia mondo ekzistas nur kuzino Qin. Troa ĝojo kondukos al malvenko. Tamen mi ne deziras, ke li malvenku en la estonteco.

Mi paŝadis sola en la umearbareto. Dua Frato venis kaj babilis kun mi kelkan tempon . Post lia foriro mi ankoraŭ restis tie, ĝis Mingfeng vokis min por tagmanĝo.

Mingfeng intence evitis min ĉi tiujn tagojn . Mi ne scias kial. Ekzemple, hodiaŭ , vidinte min de malproksime, ŝi salutis min kaj tuj foriris. Mi kuratingis ŝin kaj demandis, “Kial vi evitas min?” ŝi haltis kaj timeme rigardis min per siaj mildaj okuloj. Kun klinita kapo, ŝi mallaŭte diris, “Mi tre timas... timas, ke Sinjorino kaj aliaj sciigos pri nia afero.” Tre kortuŝite, mi ambaŭmane levis ŝian kapon kaj ridetante skuis mian kapon, dirante, “Ne timu. Amo estas pura, sed ne hontiga afero.” Post tio, mi lasis ŝin foriri . Nun mi fine komprenas.

Post la tagmanĝo mi iris en la ĉambron kaj komencis legi la anglalingvan version de “Reviviĝo” de L. Tolstoj aĉetitan de Dua Frato. Mi legis dekojn da paĝoj kaj subite ektimis kaj ne plu povis legi. Mi timis, ke la libro fariĝos mia portreto, kvankam la heroo vivas en tute malsama medio. Lastatempe mi multe dronadis en revoj. Mi ofte pensis, kia sekvaĵo atendas mian familion.

Mi estas tre soleca! Mia familio similas kaj dezerton kaj mallarĝan kaĝon. Mi bezonas aktivadon kaj mi bezonas vivon. En mia familio, mi ne povas trovi iun, al kiu mi povas elverŝi mian koron. Mi sidiĝis. Sur la tablo kuŝis la libro «Instruo de Sinjoro Liu Zhitang pri Fileco kaj Abstinado de Diboĉo» donita de la avo. Foliumante ĝin, mi trovis, ke la tuta libro lernigas, kiel oni konduitu sklave. Ĝi plenas de tiaj malnovaj dogmoj, kiaj “kortegano, kiu ne volantas morti je la ordono de la monarko, ne estas lojala; filo, kiu ne volantas morti je la volo de la patro, ne estas fileca” kaj “obsceno estas la plej granda el ĉiuj krimoj, fileco estas la plej bona el ĉiuj virtoj”. Ju pli mi legis tiajn malnovajn sentencojn, des pli mi koleris. Fine mi nereteneble disŝiris tiun maldikan libron. Mi penis, ke la detruigo de unu tia libro malpliigos la nombron de venenitoj je kelkaj personoj.

Tamen mi ankoraŭ sentas korpremon, kvazaŭ diversaj malplaĉaj aferoj kirliĝus en mia menso. Monotoneco ĉiam regas en la ĉambro kaj malhelo ĉiam alkroĉiĝas ekster la fenestro. Mi deziris havigi al mi paron da flugiloj kaj forflugi, sed mi estis fermita en la malhela ĉambro. Mi falis sur la liton kaj ekĝemis.

“Ĉu vi ŝatus ludi ŝakon kun mi, Tria Frato?” alflugis la voĉo de la bofratino el la najbara ĉambro. “Jes. Tuj mi venas,” mi respondis. Fakte mi ne inklinis ludi ŝakon, sed mi ne povis rezisti al la bona intenco de la bofratino, kiu celis nenion alian ol mildigi mian ĉagrenon. Post kelka

hezito mi iris laŭ ŝia invito. Dum la ludado mi koncentris mian tutan atenton, preskaŭ forgesante ĉion alian. Kvankam la bofratino pli lerte ludas ol Granda Frato, ŝi tamen ne povas rivali kun mi. Mi gajnis tri partiojn sinsekve. Malgraŭ tio ŝi portis mildan rideton, montrante nenian malgajon.

Tiam servistino Bofratino He enportis Haiĉjon, kaj la bofratino ekludis kun li, babilante kun mi. Sencele paŝante en la ĉambro, mi rimarkis la broditan rubandon sur la kulvualo.

“Bofranjo, la desegno de la brodaĵo estas bone farita,” mi admiris. Kvankam mi ne scias multe pri pikturo, mi tre ŝatas ĝin. Mi pensas, ke ĝi estas la plej bela peco el ĉiuj, kiujn ŝi desegnis.

“Mi ne tiel lerte desegnas, sed ĉi tiun pecon mi desegnis atentoplene. Via Granda Frato jam kelkfoje petis min fari tion,” ŝi diris kaj montris kontentan rideton. Ŝi aldonis, “Ankaŭ mi ŝatas umeflorojn.”

“Ĉu pro tio, ke Granda Frato ŝatas?” mi ŝerce demandis.

Ruĝeta nubo ŝvebis sur ŝia vizaĝo. Ŝi diris kun rideto, “Nun mi ne diros. Vi komprenos tion poste.”

“Mi komprenos? Kion mi komprenos?” mi ŝajnigis min nekompreninta.

“Pikan langon vi ja havas. En estonteco vi komprenos post la edziĝo.”

Mi ne kontraŭdiris kaj forturnis miajn okulojn. Frondoj de

umefloroj estis plantitaj en diversaj porcelanaj vazoj, grandaj kaj malgrandaj, sur kvadrata tablo kaj skribtablo. La ruĝetaj floroj ŝajne pikis miajn okulojn. En mia menso aperis alia vizaĝo de kuzino Mei malĝoja sed bela. Mi volus diri al la bofratino, “Gardu vin, ke tiuj umefloroj ne dividu la amon de Granda Frato.” Sed mi ne havis kuraĝon por eldiri.

“Mi longan tempon ne desegnis ion. Pro tio, ke mi devas zorgi pri Haiĉjo dum la lastaj du-tri jaroj, mi preskaŭ perdis ĉion, kion mi antaŭe lernis. Verŝajne ankaŭ mi fariĝis triviala,” ŝi serĉis vortojn. Ŝiaj okuloj ekbrilis, kvazaŭ ŝi dronus en belaj rememoroj pri la pasinteco.

Mi pensis, ke ŝi eble rememoras sian vivon dum la knabineco, belan kiel ĉielarko. Laŭ mia memoro ŝi nemulte ŝanĝiĝis de post kiam ŝi unuafoje alvenis al nia hejmo, escepte de tio, ke ŝia konduto fariĝis pli malkaŝe natura kaj ŝia timideco jam malaperis.

“Desegnado dependas de humoro. Bonhumoro produktas bonan desegnaĵon. Kaj krome vi desegnis laŭ la peto de Granda Frato, tial ĉi tiu peco montriĝas eksterordinare bona.” Post tio mi ŝanĝis la temon. Mi demandis, “Ĉu vi memoras la tempon, kiam vi vivis kun viaj gepatroj, bofranco?”

Balancante la kapon, ŝi diris, “Jes... Tiamaj aferoj pasis kvazaŭ sonĝo. Kiam mi vivis kun miaj gepatroj, la situacio estis malsama ol la nuna.

Krom pliaĝa frato, mi havis ankaŭ fratinon pliaĝan ol mi je tri jaroj. Ni kune lernis desegnadon kaj poemfaradon ĉiutage. Mia patro estis la guberniestro de Guangyuan, kaj nia familio loĝis en la Rezidejo por Funkciuloj. Ni ambaŭ fratinoj loĝis en ĉambro super la teretaĝo. Nia fenestro rigardis al granda placo, sur kiu kreskis multaj morusarboj. Frumatene nin vekis pepantaj pigoj sur la arboj. Nokte lunlumo verŝiĝis en la ĉambro tra la malfermita fenestro kaj kvieto regis. Mia patrino enlitiĝis frue, dum mi kaj mia fratino malfrue enlitiĝis pro nia ŝato al lunĝuado. Rigardante la lunon tra la fenestro, ni aŭ babilis aŭ lernis verki poemojn. Kelkfoje en profunda nokto aŭdiĝis akuta fajfado de kuriero de malproksime. Sciu, tiam urĝaj leteroj kaj dokumentoj transportiĝis per aparta kuriero, kiu ŝanĝis rajdĉevalon ĉe ĉiu etapo. Li ekfajfis de malproksime, por ke oni aŭdu lin kaj prepari freŝan ĉevalon por li. La fajfado sonis tre malgaje. Kiam ni estis surprizite vekitaj de ĝi el la dormo, ni ne povis ree endormiĝi dum la tuta nokto.

Poste mia patrino breidis silkraŭpojn kaj ni ofte helpis ŝin. En profunda nokto, tenante olelampon, ni ofte malsupreniris al la ĉambro de silkraŭpoj por kontroli, ĉu morusfolioj mankas. Tiam mi estis juna, sed mi jam vivis kiel plenkreskulo. Tiuj tagoj estis vere interesaj. Post nelonge okazis la Revolucio de 1911. Mia patro forlasis sian oficon kaj revenis al la provinca ĉefurbo. Dumtempe ni jam iĝis plenkreskaj. Konsiderante, ke nia desegnado ne estas malbona, nia patro volis, ke

ni pripentru ventumilojn por iu butiko de ventumiloj. Ni faris multajn pentraĵojn kaj pro tio ni ricevis monon, per kiu ni aĉetis farbojn kaj librojn de poemoj. Mi kaj mia fratino tre amis unu la alian. Antaŭvespere de ŝia edziniĝo, ni ambaŭ ne volis disiĝi kaj ploradis tutan nokton. En malpli ol unu jaro post sia edziniĝo, ŝi mortis de aborto. Laŭdire ŝia bopatrino traktis ŝin malbone. Kaj ŝi ĉiam havis aĉan kutimon de flamiĝemo. En nia hejmo mia patrino indulgis ŝin en ĉiuj aferoj kaj tro dorlotis ŝin. Kredeble ŝi ne povis elteni penadon kaj pikajn vortojn en la hejmo de sia bopatrino... Tiuj aferoj okazis kvazaŭ en sonĝo.” La bofratino aspektis malĝoja kaj ŝiaj okuloj ruĝiĝis. Kaj ŝi ĉesis paroli.

Mi timis, ke la bofratino larmos, sed mia malsaĝa kapo ne povis elpensi ion por konsoli ŝin. Mi demandis, “Bofranjo, ĉu vi lastatempe ricevis leteron de viaj patrino kaj frato? Kiel ili fartas?” “Antau nelonge, mia frato skribis al mi, ke ili fartas bone,” ŝi respondis, “kaj ke ili ne povos reveni al la urbo en unu aŭ du jaroj.” Post kelktempa babilado, dirinte, ke mi devas prepari lecionojn, mi adiaŭis ŝin kaj revenis en mian ĉambron. Kvankam mi ankoraŭ pripensis ŝiajn vortojn, mi tamen sukcesis kvietigi min kaj komencis legi «Trezorinsulo». Post legado de pli ol dudek paĝoj, mi denove eksentis solecon kaj malkvieton de la animo. Demetinte la libron, mi faris longajn paŝojn tien kaj reen en la ĉambro. Mi penis pri ĉio okazanta ekster mia ĉambro. Tian vivon mi ne plu povas elporti. En la hejmo ĉie regas subpremado, kaj miaparte, mi

devas kontraŭstari ĝis la fino.

Ĉe vespermanĝo mi aŭdis duonpatrinon kaj Grandan Fraton diskuti pri la taktiko de Kvara Onklino, Kvina Onklino kaj Sinjorino Chen. Rigardante ilian seriozan mienon dum la interparolado, mi ne povis deteni min de rido. Post vespermanĝo nokto ankoraŭ ne falis. En la ĉambro de Granda Frato mi diskutis kun li pri fileco. Li estas tre mola kaj skrupulema. Mi malkontentas pri li, ĉar li malprogresas tagon post tago. Kiam ni varme diskutis, Wan-er, la servoknabino de Tria Onklino petis lin ludi maĝangon kun la sinjorinoj, kaj li tuj konsentis sen ajna hezito. Mi malgaje demandis, “Ĉu vi denove ludos maĝangon, Granda Frato?” Li simple respondis, “Kiel mi povus ne konsenti, se ili petas min?” Li foriris kune kun la servoknabino.

Mi havas du pliaĝajn fratojn. Granda Frato ĉiutage ludas maĝangon por plezurigi aliajn; la dua pli aĝa frato ĉiutage iras al fraŭlino Qin por lernigi al ŝi la anglan lingvon kaj ĉiam forestas nokte de la hejmo. Mi pensas, ke mi devas fari min tute malsama persono ol ili...

Ve, kia vivo! Mia taga vivo estas tia. Tiamaniere, mi malŝparas mian junecon...

Mi ne povas submetiĝi, mi nepre ribelos, ribelos kontraŭ la ordono de la avo. Mi nepre eliros... .

Nur tiun tagon skribiĝis notoj en lia taglibro. La sekvan tagon li vere

eliris.

* La nomo de tiu “alia virino” estas Mei, kiu signifas “umeon”.

12

Alproksimiĝis la lunkalendara Novjara Tago, la unua grava festo de la jaro. Ĉiuj, escepte de tiuj en profunda ŝuldo, ĝin entuziasme bonvenigis. La festo, kiu ne falis subite, malrapide alproksimiĝis tagon post tago, alportante novan aspekton. La tuta urbo bolis je vivo. Pli multaj homoj vidiĝis sur la stratoj. Lanternoj, ludiloj kaj petardoj subite aperis en la vendejoj. Ĉie aŭdiĝis sonoj de festotagaj trumpetoj.

Kvankam la kortodomaro de la familio Gao situis en kvieta strato, tamen vigliĝis ankaŭ la ĝentilhoma familio ŝajne kvieta. Tie oni okupiĝis pri preparado de necesaĵoj por la festo. Servistoj sin okupis pri ĉio, kion la okupitaj mastroj ordonis, kaj ili certe atendis trinkmonon kaj amuzajn aktivadojn en la festotagoj. Nokte, en la kuirejo, kuiristoj preparis diversspecajn kukojn; tage la mastrinoj de ĉiuj familibranĉoj kolektiĝis en la ĉambro de la avo kaj faldis el ora kaj arĝenta paperoj briketojn uzotajn dum oferado al praavoj aŭ tondis bildojn el ruĝa kaj verda paperoj algluotajn al fenestroj aŭ almetotajn sur la subteleron de olelampoj. En tiuj tagoj, la avo malofte restis hejme kiel kutime. Li aŭ iris al teatro aŭ ludis maĝangon en la hejmo de siaj malnovaj amikoj. Antaŭ pli ol du jaroj, li kaj kelkaj malnovaj amikoj organizis la “Societon de Naŭ Maljunuloj”. Ili alterne okazigis festenojn aŭ aprezis kaligrafaĵojn, pentraĵojn kaj antikvajn objektojn kolektitajn de ili mem. Hejme Juexin kaj lia onklo Keming direktis servistojn fari

preparojn por la lunkalendara Novjara Tago. En la ĉefhalo pendis koloraj festonoj kaj lanternoj ; ruĝaj broditaj brokajĵpecoj ornamis ambaŭ flankojn de vando el ligna tabulo. Ankaŭ la portretoj de praavoj estis elprenitaj el la kestoj kaj pendigitaj sur la antaŭan vandon, atendente la oferon por la jaro.

Laŭ la tradicio de la familio Gao, du tagojn antaŭ la lunkalendara Novjara Festo ĉiuj familianoj devis kune festeni por celebri la feston. Tiun posttagmezon Juehui kaj Juemin iris al la oficejo de Juexin. Survoje ili aĉetis de la librovendejo Huayang kelkajn novajn gazetojn kaj ĉinan version de la novelo *Antaŭvespero* de Turgenev. Apenaŭ atinginte la pordon de la oficejo ili aŭdis klakadon de abako-manipulado. Ili levis la kurtenon kaj eniris. Juexin levis sian kapon kaj rigardis Juehui. Surprizite li demandis, “Vi eliris?”

“Ĉu vi ankoraŭ ne scias, ke mi eliris jam de antaŭ kelkaj tagoj?” kontraŭdemandis Juehui kun rideto.

“Kion fari do, se la avo ekscios pri via eliro?” Juexin montris embarasitan mienon, sed li ankoraŭ daŭrigis manipuladon de abakglobetoj kun mallevita kapo.

“Mi ne zorgas pri tio. Eĉ se li ekscios, mi ne timos,” flegme diris Juehui.

Juexin levis la kapon, ĵetis rigardon al , Juehui, kaj silentis. Kuntirinte siajn brovojn, li daŭrigis la abakadon.

“Ne gravas. Ĉu la avo povas memori tian bagatelon? Mi supozas, ke li forgesis jam antaŭlonge,” diris Juemin pacige. Li sidiĝis en la kanseĝo ĉe la fenestro.

Tenante *Antaŭvespero*, Juehui sidis en kanseĝo ĉe la muro. Li foliumis la libron kaj laŭte legis el iu paĝo:

Amo estas granda vorto, granda sento... sed kian amon vi priparolas?

Kia amo ? Ĝi povas esti la amo de kia ajn speco. Miaopinie, ne esters diversaj specoj de

amoj. Se vi enamiĝas... amu tutanime.

Juexin kaj Juemin levis la kapon kaj ĵetis miran rigardon al li. Sed li ne rimarkis tion kaj legis plu:

Aspiro al amo, aspiro al feliĉo. Krom ili, nenio ekzistas en la mondo!

Ni estas junuloj, sed ne monstroj nek malsaĝuloj. Ni devas strebi por akiri nian feliĉon!

Ondo da varmo trakuris la korpon de Juehui. Liaj manoj tremetis de ekscito. Ne povante legi plu, li fermis la libron kaj englutis teon per grandaj buŝplenoj.

Jianyun envenis.

“Juehui, kion vi ĵus diris kun tiel granda entuziasmo?” demandis Jianyun kun seka voĉo, tuj kiam li transpasis la sojlon.

“Mi legis libron,” respondis Juehui. Malferminte la libron denove, li

legis:

La universo vekas nian bezonon de amo, sed ne plenforte kontentigas nian amon.

La ĉambro falis en portempan kvieton. Ankaŭ la klakado de la abako ĉesis.

En la universo estas vivo kaj mono... Ankaŭ en la amo estas vivo kaj morto.

“Kion tio signifas?” mallaŭte demandis Jianyun. Aŭdiĝis respondo el neniu.

Neesprimebla teruro ŝvebis en la malgranda ĉambro kaj peze subpremis iom post iom. Komuna sento afliktis ilin kvar en malsamaj situacioj.

“Nur en ĉi tia socio ekzistas tia vivo!” indigne diris Juehui por ellasi sian koleron en la koro. “Tia vivo simple estas malŝparo de juneco, malŝparo de vivo!”

Tiu penso lastatempe senĉese turmentis lin. Estante infano, li havis deziron — li volis fariĝi tute malsama persono ol liaj pliaĝuloj. Kune kun sia patro, kiu siatempe oficis kiel guberniestro, li trairis multajn montojn kaj riverojn kaj vidis multajn vidindaĵojn. Li ofte revis vojaĝi sola en miraklan landon kaj tie fari kelkajn neordinarajn aferojn. La vivo en la guberniestrejo de lia patro donis al li miraĝan impreson. Sed kiam li revenis al la provinca ĉefurbo, lia vivo alproksimiĝis al la

banala realo, kaj li komencis havigi al si novan konon pri la reala mondo. En la granda ĝentilhoma familio estis dekoj da “subuloj” kiaj servistoj kaj palankenistoj, kiuj, alveninte el diversaj lokoj, unuiĝis per la sama sorto. Por akiri mizeran pagon, tiuj nekonataj homoj vivis kune kaj priservis komunajn mastrojn. Kvazaŭ anoj de klano, ili pace kaj eĉ intime kunvivis, ĉar ili estis samsortanoj. Se ili ofendis la mastron, ili ne sciis, de kie ili morgaŭ povos akiri manĝon. Ilia sorto vekis simpatian ĉe Juehui. Li pasigis parton de sia knabeco en ĉi tiu medio kaj ĝuis respekton kaj ŝaton de la servistoj. En la ĉevalstalo, li ofte kuŝis en la lito de la palankenisto kaj aŭskultis ĉe opia lampo, kion tiu opifumanta maljunulo, malgrasa kaj malfortika, rakontis pri siaj travivaĵoj dum la juneco. Li ofte sidis surtere en la ĉevala stalo kune kun “subuloj” ĉirkaŭ fajro, aŭskultante iliajn rakontojn pri kavaliraj herooj. Tiam li ofte fantaziis, ke, kiam li estos plenkreska, li fariĝos kavaliro, kiu rabas riĉulojn kaj helpas malriĉulojn, kaj li, sen ia familia impiikaĵo, vagos ĉien kun glavo surdorse. Poste, kiam li eniris en mezlernejon, li ŝanĝis sian opinion pri la mondo. Lernolibroj kaj instruistoj inokulis al li entuziasmon por patriotismo kaj kredon al reformismo. Li fariĝis fervora leganto de la agitaj artikoloj de Liang Qichao, kiu pledis por konstitucia reformado. Tiam liaj verkoj, kia *La Animo de Ĉinio*, estis liaj ŝatataj legaĵoj. Li eĉ aprobis la proponon de Liang Qichao en *Rudimentaj Scioj pri Politiko por Civitanoj*, ke nacia

konskripcio anstataŭu rekrutadon de apartaj militaristoj. Li eĉ volis forlasi la lernejon por fariĝi soldato. Tamen la Movado de la Kvara de Majo subite portis lin en novan mondon. La propono de Liang Qichao estis frakasita. Li tuj akceptis pli novan kaj pli radikalan teorion kun pli granda entuziasmo. Tiel li gajnis la titolon “humanisto”, per kiu lia Granda Frato moke nomis lin. La unua kialo de Granda Frato por tiu titolo estis, ke Juehui rifuzis veturi per palankeno. Tiutempe, pro tio, ke Juehui legis multajn artikolojn kiel *Vera Signifo de la Vivo* kaj *Komenca Komento pri la Viva Problemo*, li por la unua fojo komencis konsideri la problemon de la signifo de la vivo. Li komence havis nur kelkajn malklarajn konceptojn. Sed liaj travivaĵoj, precipe la mallibera vivo dum la lastaj tagoj, mensa konflikto kaj legado de novaj libroj iom post iom vastigis lian vidkampon. Li ekkomprenis, kio estas la vivo kaj kiel li devas kondukti, kaj samtempe li komencis malami la vivon, en kiu juneco kaj vivo malŝpariĝas. Tamen ju pli li malamis tian vivon, des pli li trovis, ke pli kaj pli multe da nevideblaj palisaroj baras lin ĉirkaŭe kaj li ne povas sin liberigi el ĝi.

“Kiel damninda vivo!” Lia kolero pliiĝis. Liaj okuloj okaze renkontis la senhelpan rigardon de Juexin., kaj li tuj deturnis sian kapon. Rigardinte la melankolian kaj tolereman vizaĝesprimon de Jianyun, li direktis siajn okulojn al Juemin, kiu legis la libron kun klinita kapo. En la ĉambro regis tomba silento. Juehui sentis, ke io rongas lian koron. Li

neelteneble ekkriis, “Kial vi ĉiuj ne parolas? ... Vi, vi ĉiuj devas esti damnitaj !”

La tri ĉeestantoj surprizite rigardis lin, ne sciante, kial li kriis.

“Kial?” milde demandis Juemin, ferminte la libron. “Samkiel vi, ni ĉiuj vivas nian vivon en la granda familio.”

“Ĝuste pro tio!” Juehui indigne diris. “Vi ĉiam toleras, sed neniom rezistas. Ĝis kiam daŭros via tolero? Buŝe vi kontraŭas la malnovtipan familion, sed fakte vi subtenas ĝin. Vi moderne pensas, dum vi agas laŭ malnova maniero. Vi ne havas kuraĝon! Vi plenas de kontraŭdiroj, vi ĉiuj!” Tiumomente Juehui forgesis, ke ankaŭ li mem plenas de kontraŭdiroj.

“Tria Frato kvietiĝu. Kian bonon via kriado alportos? Ĉiuj aferoj plenumiĝas laŭgrade,” Juemin milde diris. “Kion vi sola povas fari? Vi devas scii, ke la sistemo de patriarka familio havas sian ekonomian kaj socian bazon.” La lastan frazon li ĵus lernis el iu gazeto kaj eldiris nature. Li aldonis, “Sciu, ke nia sufero ne estas certe malpli granda ol la via.”

Juehui okaze tumis sian kapon kaj liaj okuloj ankoraŭfoje renkontis tiujn de Juexin, kiu malĝoje rigardis lin, kvazaŭ riproĉe. Juehui mallevis sian kapon kaj malfermis la libron. Post momento, lia voĉo denove sonis:

Deturnu vin de ili! Mia patro prave diris, “Ni ne estas sibaritoj,

mia filo, ni ne estas nobeloj, la preferataj infanoj de la naturo kaj sorto, ni eĉ ne estas martiroj — ne, ni estas nur laboristoj. Surportu vian ledan antaŭtukon, laboristo, kaj iru al la stablo en via malhela laborejo! Cedu la sunlumon al aliaj. Estas fiero kaj feliĉo eĉ en nia obskura ekzistado.

“Tiuj vortoj estas la priskribo pri mi,” Jianyun pensis en si. “Sed kie estas mia fiero? Kie estas mia feliĉo?”

“Feliĉo? Kie feliĉo troviĝas finfine? Ĉu vere ekzistas tiel nomata feliĉo en la mondo?” veis Juexin.

Juehui ĵetis rigardon al Juexin. Li ree klinis sian kapon, turnis paŝojn returne kaj haltis ĉe la pago markfaldita de li antaŭe. Li laŭtlegis la sekvajn vortojn, kvazaŭ respondante al Juexin:

Ni estas junuloj, sed ne monstroj nek malsaĝuloj. Ni devas strebi por akiri al ni feliĉon!

“Ne legu plu, Tria Frato,” Juexin malĝoje petegis.

“Pro kio?” demandis Juehui.

“Vi ne scias, kiel malĝoja mi min sentas. Mi ne estas junulo kaj mi ne havas junecon. Mi ne havas feliĉon, ne havos feliĉon por eterne.” Iu ajn alia eble dirus tiujn vortojn indigne, sed Juexin nur diris ilin en malĝoja tono.

“Ĉar vi ne havas feliĉon, do vi timas aŭdi, ke om parolas pri luktado por ĝi?” malĝentile diris Juehui. Li tute ne kontentiĝis pri la

cedema sinteno de Granda Frato pri la vivo.

“Ho ve, vi ne komprenas min. Via situacio estas malsama ol la mia,”
veis Juexin, forpuŝinte la abakon kaj rigardante Juehui. “Vi pravas. Mi
vere timas aŭdi mencion pri feliĉo, ĝuste pro tio, ke mi ne havas es-
peron akiri al mi feliĉon. Mia tuta vivo jam finiĝis. Mi ne kontraŭstaras,
ĉar mi ne volas tion fari. Mi mem volonte fariĝas viktimo ... Kvankam
mi havis belajn sonĝojn kiel vi, ili ĉiuj tamen frakasiĝis. Neniu el miaj
esperoj realiĝis. Mia feliĉo estas deprenita jam antaŭlonge. Tamen mi ne
riproĉas aliajn, ĉar mi mem volonte transprenis sur miajn ŝultrojn la
ŝarĝon de paĉjo. Mian suferon vi ne povas kompreni ... Mi ankoraŭ
memoras la vortojn diritajn de paĉjo en malsano. La nokton antaŭ la
morto de paĉjo, nia plej juna fratino mortis, por kiu la duonpatrino
preparis ĉerkon. Kvankam la fratino mortis tre juna — sesjara, la funera
sciigo tre afliktis malsanan paĉjon. Preninte mian manon, li diris kun
larmoj, ‘Mia filo, kiam via patrino mortis, ŝi postlasis al mi vin ses
gefratojn. Nun unu el vi mortis. Mi vanigas la esperon de via patrino!’
Post tio, li ploris. Li aldonis, ‘Mi timas, ke mi ne povas resaniĝi. Mi
metas viajn duonpatrinon kaj gefratojn sub vian zorgon. Mi konas vian
temperamenton. Vi ne vanigos mian esperon.’ Mi nereteneble ploregis.
Tiam avĉjo preterpasis la fenestron kaj aŭdis min. Pensante, ke la patro
mortis, li anhelante eniris. Je la ekvido de tiu sceno, li riproĉis min, ke
mi ne devas aflikti la patron, kaj li konsolis lin per kelkaj vortoj. Poste

avêjo alvokis min en sian ĉambron kaj demandis min, kio okazis. Mi diris al li la tutan veron kaj li eklarmis, kaj svingis sian manon al mi ke mi reiru prizorgi la malsanulon. En la profunda nokto de tiu tago, la patro alvokis min al sia litrando por noti lian testamenton. La duonpatrino tenis kandelon kaj via plej aĝa fratino inkujon apude. La patro diktis kaj mi skribis kun larmoj. La sekvan tagon li mortis kaj la ŝarĝo sur liaj ŝultroj transiĝis sur la miajn. Poste, ĉiufoje kiam mi pensis pri tiuj vortoj de la patro, mi ne povis deteni min de larmoj. Kaj samtempe mi konsideris, ke mi povas fari nenion alian ol oferi min mem, kaj mi volas fariĝi viktimo. Tamen eĉ tiel mi ne plenumis liajn esperojn, ĉar mi perdis vian plej aĝan fratinon... “Ju pli li diris, des pli malĝoja li fariĝis. Per laj larmoj aperis kaj fluis en lian buŝon. Li balbutis la lastajn vortojn kaj fine kliniĝis sur la tablon.

La larmoj de Juehui estis elfluontaj, sed li penis reteni ilin. Li rigardis ĉirkaŭen. Li vidis, ke Jianyun forviŝas larmojn per poŝtuko kaj Juemin kovras sian vizaĝon per gazeto.

Juexin levis la kapon de sur la tablo kaj forviŝis siajn larmojn. Li daŭrigis, “Ankoraŭ multajn aferojn vi ne scias. Mi rakontu al vi malnovan historieton. Iun jaron la patro estis sendita al la gubernio Dazu kiel guberniestra asistanto pri kriminalaj aferoj. Tiam mi havis nur iom pli ol kvin jarojn kaj vi ankoraŭ ne estis naskitaj. Paĉjo kaj panjo iris tien, kunportante min kaj vian pliaĝan fratinon. Tiutempe la loko estis ne en

paco. Pro do paĉjo ĉiunokte iris gardi la urbon kaj hejmenvenis ĉiam post la unua horo matene. En la hejmo ni enlitiĝis nur post kiam li revenis. Tiutempe mi jam estis konsiderata en la familio kiel komprenanto de aferoj sociaj. Ĉiunokte, manĝante pinsemojn aŭ akvomelonajn semojn, ilin senŝeligante per dentoj, mi babiladis kun panjo. Ŝi volis, ke mi diligente lernu kaj gajnu gloron por ŝi. Kun larmoj ŝi rakontis al mi la suferojn, kiujn ŝi spertis kiel bofilino en nia familio. Mi tiukaze aŭ larmis kune kun ŝi aŭ ŝerce ridigis ŝin. Mi diris, ke mi nepre lernos diligente kaj kiam mi fariĝos altranga kortegano, panjo povos ĝui honoron. Poste mi vere lernis diligente kaj panjo trankviliĝis. Post kelkaj monatoj la provinca instanco sendis alian personon por anstataŭi paĉjon. Antaŭ ol ni forlasis la lokon, panjo larmante rakontis al mi la suferojn de paĉjo. Tiutempe panjo estis graveda je Juemin jam pli ol sep monatojn. Paĉjo tre maltrankviliĝis, timante, ke ŝi suferos survoje. Kion fari? Ni ja devis forlasi la lokon. Malpli ol du monatojn post kiam ni revenis al la provinca ĉefurbo, panjo naskis vin, Juemin. La sekvan jaron panjo estis alvokita al Pekino por aŭdienco de la imperiestro. Panjo maltrankvile atendadis lin hejme. Poste Juehui naskiĝis. Paĉjo tiam tamen ne ricevis aŭdiencon pro diversaj kaŭzoj kaj estis devigita loĝi tie. Informiĝinte pri tio, avĉjo ofte flamiĝis kaj aliaj familianoj rikane klaĉis de tempo al tempo. Panjo sentis grandan afliktiĝon. Nur mi kaj via pli aĝa fratino konsolis ŝin. Ĉiufoje kiam ŝi ricevis leteron de

paĉjo, ŝi larmis unu aŭ du tagojn. Kiam paĉjo skribis, ke li jam ricevis aŭdiencon kaj hejmenrevenos post la Aŭtunmeza Festo, ŝi eligis longan vespiron kaj trankviliĝis. Sed ŝi jam sufiĉe suferis. Unuvorte, de la edziniĝo ĝis la morto, panjo neniam ĝuis plezuron en nia familio. Ŝi amis min tiel arde kaj metis sur min tiel grandan esperon. Per kio do mi rekompencu ŝin? ... Por panjo mi volonte fordonas ion mian, eĉ mian tutan estontecon. Se nur la gefratoj sane plenkreskiĝos kaj bone edukiĝos sub mia zorgo por glorigi paĉjon kaj panjon, mia deziro jam realiĝos...”

Juexin elpoŝigis poŝtukon kaj forviŝis larmojn sur la vizaĝo.

“Ne malĝoju, Granda Frato. Ni komprenas vin,” diris Juemin kun gazeto kovranta la vizaĝon.

Larmoj de Juehui elfluis, sed li tuj retenis ilin. “La pasintaĵo estu jam enterigita,” li pensis. “Kial elfosi ilin el la tombo?” Sed li ne povis ne malĝoji pri siaj mortintaj gepatroj.

“Tria Frato, do, kion vi ĵus legis, estas ĝusta. Mi ne estas sibarito, ne estas preferata infano de la naturo kaj sorto. Mi estas nur laboristo. Mi surportas mian propran antaŭtukon kaj faras miajn proprajn laborojn en mia propra malhela laborejo.” Iompostiome Juexin kvietiĝis. Rigardante Juehui, li triste ridetis, dirante, “Tamen mi estas laboristo sen propra feliĉo, mi ...” Subite li montris konsterniĝon pro aŭdo de tusado ekster la fenestro. Ŝanĝinte sian tonon, li mallaŭte diris al Juehui, “La

avo alvenas. Kion fari? Juehui montris iom da surpriziĝo, sed li tuj trankviliĝis. Li flegme diris, “Nenio grava okazos. Li ne manĝos nin.”

La eniranto vere estis Grandsinjoro Gao — ilia avo. Servisto sekvis lin kaj haltis ĉe la pordo. La kvar en la ĉambro ĉiuj stariĝis por saluti lin. Juemin cedis sian kanseĝon al li.

“Vi ĉiuj estas ĉi tie!” Rideto aperis sur lia malhele flava vizaĝo. Eble pro ĝojo en la koro, li ŝajnis afabla. Li diris milde, “Vi povas hejmeniri. Hodiaŭ okazos festeno por celebri la Novjaran Tagon. Reiru frue.” Li sidiĝis en la kanseĝo ĉe la fenestro, tamen post momento li stariĝis kaj diris, “Juexin, mi volas fari kelkajn aĉetojn. Ni iru kune.” Post kiam Juexin jesis, li levis la kurtenon kaj eksteren direktis siajn piedojn en vatitaj ŝuoj Juexin kaj la servisto Su Fu sekvis.

Vidinte, ke li malaperis, Juemin elŝovis sian langon al Juehui kaj ridetante diris, “Li vere forgesis vian aferon.”

“Se mi estus tiel obeema kiel Granda Frato, mi timas, ke mi estus malliberigita en la hejmo por eterne,” diris Juehui. “Fakte mi estas sufiĉe stulta. La kolero de la avo estas nur momenta. Kiam lia kolero foriĝis, li forgesas ĉion okazintan. Kiel ili povus memori mian malliberan vivon en la hejmo? ... Ni reiru. Ne necesas atendi Grandan Fraton. Li ĉiam veturas per palankeno. Ni foriru frue, por ke ni ne renkontu la avon.”

Juemin jesis kaj demandis al Jianyun, “Ĉu vi hejmeniru?”

“Ankaŭ mi foriros. Ni iru kune.”

La tri elĉambriĝis kune.

Survoje Juehui montris grandan ekscitiĝon. Li denove firme fermis la tombon de la pasinteco. Li pensis en si, “Mi estas junulo, sed ne monstro nek malsaĝulo. Mi devas strebi por akiri al mi feliĉon.”

Li sekrete gratulis sin mem pro tio , ke li ne troviĝas en la sama pozicio de Granda Frato.

13

Vespera krepusko falis en la korton de la familio Gao. En la halo, krom elektra ampolo de cent vattoj nove instalita, brilis “eterne lumanta” olelampo pendanta de sur la centra trabo, granda kerosena lampo kaj kvar palacaj lanternoj kun vitraj kovriloj ornamitaj per desegnitaj homfiguroj. La mikskolora lumo brile prilurnis bildajn pendrulaĵojn sur la vando kaj la portretojn de Qing-dinastiaj praavoj de la familio Gao sur la altaro. Eĉ la juntoj inter pavimaj brikoj de la planko estis klare videblaj.

Estis la festeno de la lunkalendara Novjara Tago. Meze de la halo staris du grandaj rondaj tabloj, sur kiuj estis orde metitaj paroj da manĝbastonetoj el eburo, arĝentaj tasoj, kuleroj kaj teleroj. Sub la teleroj estis po unu ruĝa paperslipo, sur kiu estis skribita la nomo de familiano. Ĉe la tabloj staris po tri servistoj servopretaj: du por elverŝi vinon kaj alia por alporti pladojn. Ankaŭ servistinoj kaj servoknabinoj apudstaris sub la dispono de la mastroj. La pladojn oni unue portis el la kuirejo al la kvadrata tablo kun glazura lampo ĉe la fenestro, kaj poste pli aĝaj servistinoj ilin portis en la halon kaj transdonis al servistoj Su Fu kaj Zhao Sheng, kiuj metis ilin sur la rondajn tablojn.

Post kiam ok pladoj da malvarmaj mangaĵoj kaj du pladoj da melonsemoj kaj migdaloj metiĝis sur la tablon, ĉiuj familianoj, kiuj jam kolektiĝis en la halo, rapide trovis sian propran sidlokon kaj altabliĝis je

la ordono de Grandsinjoro Gao.

Ĉirkaŭ la ĉeftablo sidis dek familianoj de la maljuna generacio laŭ siaj titoloj. La unua estis Grandsinjoro kaj la sekvantaj estis laŭvice sinjorino Chen, sinjorino Zhou, tria sinjoro Keming kun sia edzino sinjorino Zhang, kvara sinjoro Ke-an kun sia edzino sinjorino Wang, kvina sinjoro Keding kun sia edzino sinjorino Shen, kaj sinjorino Zhang, la filino de Grandsinjoro kaj la patrino de Qin. Ĉirkaŭ alia tablo sidis dek du familianoj. Krom Li Ruijue, la edzino de Juexin, kaj fraŭlino Qin, ili estis Juexin, Juemin kaj Juehui de la unua familibranĉo, kun siaj kuzoj, Jueying de la tria familibranĉo, Juequn kaj Jueshi de la kvara familibranĉo, kaj kun sia pli juna fratino Shuhua kaj kuzinoj, la dek-kvinjara Shuying de la tria familibranĉo, la sepjara Shufen de la kvara familibranĉo, kaj la dek-dujara Shuzhen de la kvina familibranĉo. Mankis Jueren de la tria familibranĉo, kaj Juexian kaj Shufang de la kvara familibranĉo, ĉar ili estis tro junaj por altabliĝi. Sed Haichen, la fileto de Juexin estis alportita al la tablo, ĉar Grandsinjoro deziris, ke la kvar generacioj altabliĝu kune ĉe la festeno. Ruijue lasis lin sidi sur siaj genuoj kaj manĝi iom dum kelka tempo.

Levinte tason da vino, Grandsinjoro ĉirkaŭrigardis. Vidinte, ke la halo estas homplena kaj ridantaj vizaĝoj montriĝas ĉie, li konsciis, ke li havas multajn gefilojn kaj genepojn kaj ke lia deziro “kvar generacioj sub la sama tegmento” jam realiĝis. Kun kontenta rideto, li

prenis grandan buŝplenon da vino. Turninte siajn okulojn al alia tablo, li vidis la gejunulojn ĝoje babili kaj trinki vinon. Ĉie ŝvebis freŝaj kaj klaraj voĉoj: “Alportu vinon!” aŭ “Elverŝu por mi unue!” Du servistoj Yuan Cheng kaj Wen De kun vinkruĉoj navete rapidis de loko al loko por plenigi tasojn. “Vi, junuloj, trinku malmulte, alie vi ebriiĝos! Prenu pli multe da mangaĵoj,” kriis Grandsinjoro kun rideto. Li aŭdis jesan respondon de Juexin kaj aŭtomate relevis la tason kaj prenis elsuĉon da vino kun plezuro kaj senzorgo. Tiumomente leviĝis ĉiuj tasoj ĉe la ĉeftablo. Kiam Grandsinjoro demetis la tason, ankaŭ ĉiuj demetis la sian. Ĉiuj, krom Grandsinjoro, rekte sidis. Kiam li levis la manĝbastonetojn, la aliaj sekvis lin; kiam li demetis ilin, ankaŭ la aliaj faris la samon. Okaze kelkaj vortoj estis interŝanĝitaj inter sidantoj. Rimarkinte tian embarasan situacion, la duonebria Grandsinjoro diris, “Ne estu tiel ceremoniaj. Malstreĉiĝu, vi ĉiuj. Vidu, tiu tablo plenas de voĉbruo kaj rido, dum nia tablo sin montras tro kvieta. Ĉar ni ĉiuj estas samfamilianoj, ne estu sinĝenaj.” Levinte sian tason, li eltrinkis la restantan vinon per unu tiro kaj aldonis, “Vidu, kiel mi ĝojas ĉi-vespere!” Li sin turnis al Keding kaj ridete diris, “Vi estas juna. Ne gravas por vi drinki pli multe okaze de la festo.” Kaj li ordonis al servistoj Li Gui kaj Gao Zheng, “Plenigu la tason de la gesinjoroj pli ofte!” Lia neordinara ĝojo animis la tutan sidantaron ĉe lia tablo. Keding kaj Ke-an, sinjorino Chen kaj sinjorino Wang komencis vinludon. Pli da vino

elverŝiĝis kaj iliaj manĝbastonetoj pli aktiviĝis.

Vidinte la vizaĝojn ruĝiĝintajn de ekscito kaj aŭdinte ĝojan rumoron, Grandsinjoro sin sentis des pli ĝoja. Li relevis la tason nove plenigitan kaj faris trinketon. Pasintaĵoj komencis svarmi en lian menson. Antaŭe li diligente lernadis, gajnis sukceson kaj oficis kiel ŝtata funkciulo multajn jarojn. Poste li havigis al si ricaĵojn — aĉetis bienon kaj konstruigis domojn. Jaron post jaro li ricevis gefilojn, genepojn, eĉ pranepojn. Ĉiuj familianoj ricevis klerigadon kaj vivas bone. Se tia prospero daŭros dum pliaj unu aŭ du generacioj, la familio Gao certe disvolviĝos en pli grandan kaj prosperan familion ... Raviĝante, li fiere ekridetis pretervole kaj prenis longan eltiron da vino. Poste li demetis la tason kaj diris, “Estas jam sufiĉe por mi. Pliaj du tasoj da vino ebriigos min. Por vi ne gravas trinki pli multe.” Li ordonis al servistoj, “Plenigu la tasojn por la gesinjoroj pli ofte.”

Kiel la avo diris, la tablo de la juna generacio viglis pli multe. La manĝbastonetoj movigis de plado al plado senhalte. Tuj kiam la pladoj metiĝis sur la tablon, ili fariĝis malplenaj. La pli junaj knaboj Juequn kaj Jueshi, kiuj ankoraŭ ne kapablis manipuli manĝbastonetojn sufiĉe lerte, prenis mangaĵon el pladoj per kuleroj, surgenuante sur taburetoj.

“Ne estas dece manĝi tiel haste. Vi knabegoj vere estas glutemaj. Vidu, kiel ĝentilaj estas tiuj ĉe la tablo de la avo ! Ĉar ni sidas ĉe la festeno por bonvenigi la novan jaron, ni devas manĝi malrapide sed ne

tiel haste!” diris ridetante Li Ruijue, la edzino de Juexin. Ŝi jam detabligis sian infanon Haichen, kaj petis servistinon He konduki lin eksteren.

Kiam Zhao Sheng, la servisto de la kvara familibranĉo, alportis pladon da frititaj haliotpecoj, la dek-tri-jara Jueying rapide prenis pecon kaj metis gin en sian buŝon. Kiam li aŭdis, kion Ruijue diris, li ekridetis kaj formetis siajn manĝbastonetojn, dirante, “Kiel mizera nia Granda Bofranjo aspektigas sin per tiuj vortoj ! Estas pli bone, ke ni ne plu manĝu kaj restigu iom al ŝi.” Kaj ĉiuj manĝantoj de la tuta tablo demetis la manĝbastonetojn kaj ekridis. Juehui , kiu sidis oblikve kontraŭ Ruijue, stariĝis kaj puŝis la pladon antaŭ ŝin, ridete dirante, “Granda Bofranjo, mi oferas ĉi tiun pladon al vi por ke vi ĝuu sola.”

Ruijue, konsciante, ke ĉiuj rigardoj fokusas sur ŝi, ruĝiĝis kaj repuŝis la pladon al Juehui, replikante, “Dankon . Sed mi ne ŝatas markreskaĵon, bonvole manĝu anstataŭ mi.”

“Neeble! Mi ne povas anstataŭi vin. Se vi ne manĝos, ni punos vin per vintrinko,” diris Juehui, stariĝinte .

“Prave, Granda Bofratino meritas puniĝi per vintrinko ,” ĉiuj eĥis.

Kiam la voĉbruo kvietiĝis, ŝi senhaste sin defendis, “Kial mi devas puniĝi per vintrinko? Se vi ŝatas trinki vinon, ni prefere faru vintrinkan ludon. Ni ludu, ĉu bone?”

“Bone, mi konsentas,” Juexin eĥis la unua.

“Per kia vinludo ni nin amuzu?” demandis Qin, kiu sidis najbare de Ruijue.

“Mi havas bambuan sliparon en mia ĉambro. Ni petu Mingfeng ĝin alporti,” Ruijue proponis.

“Ne necesas ĝin preni. Ni nin amuzu per simpla vinludo,” Juemin esprimis sian opinion.

“Do ni vinludu per la vorto ‘floro’,” Qin tuj diris.

“Mi ne partoprenos,” kriis la ok-jara Juequn. “Ankaŭ mi ne scipovas tion ludi,” Shufen diris seriozmiene.

“Kiu volas, ke vi partoprenu ! Do, ni ne inkludu Kvinan Kuzon, Sesan Kuzinon kaj Sesan Kuzon. Ni naŭ vinludu,” Ruijue decidis.

Tiam Juehui neatente faligis manĝbastoneton sur la plankon kaj servisto Yuan Cheng, ĝin levinte kaj puriginte, redonis al li. Metinte la manĝbastoneton sur la tablon, Juehui volis esprimi sian opinion, sed kiam li rimarkis, ke ĉiuj konsentas pri la propono de Qin, li restis senparola.

“Do mi ludu la unua. Tria Kuzo, jen vi devas trinki vinon la unua,” diris ridete Qin, rigardante Juehui.

“Kial? Vi ne diris eĉ unu vorton,” Juehui protekte kovris sian tason.

“Ne demandu kial, nur trinku ... ĉar mi citis la version ‘Eksterporde marŝas homoj jen por florojn spekti’. Ĉu vi ne devas trinki vinon!” Oni kalkulis laŭvice, ekskluzive de Shufen, Jueshi kaj Juequn inter ili, kaj

“floro” , la sepa vorto de la verso ĝuste falis sur Juehui. Kaj ĉiuj ekkriis, “Nu , trinku vinon.”

“Vi mistifikas min. Mi ne trinkos,” neis Juehui, skuante sian kapon.

“Neeble, Tria Frato, vi nepre devas trinki. La regulo de vinludo estas tiel rigora kiel milita ordono. Vi ne devas ĝin malobei,” urĝis Ruijue.

Juehui ne povis ne preni grandan buŝplenon da vino. Rideto tuj aperis sur lia vizaĝo. Li fiere diris al Qin, “Nun estas via vico trinki vinon. ‘En printempa briz’ prosperas florar’ persika’ .”

Oni kalkulis ekde Juehui kaj “florar” , la kvina vorto de la verso falis sur Qin. Kaj silente levinte la tason, ŝi trinkis per eta eltiro. Tuj poste ŝi citis, “La floroj persikaj tumulte faladis kiel ruĝa pluvo.” Estis la vico de Shuying sidanta najbare de Qin detrinki vinon.

Kaj Shuying diris, “Kiam floroj falis, vin renkontis mi.”

La vico transiris al Shuhua najbare al ŝi. Pensinte momenton, Shuhua citis la version “Ĝis kiam en arbareto floroj belas kiel brokato.”

Oni kalkulis, ne inkludante Shufen, Juequn, kaj la kvina vorto de la verso “floroj” , trans Shuzhen, Jueying kaj Juehui, falis sur Juemin.

Trinkinte vinon, tiu citis la version “Lageto Persikflora ja profundas je mil futoj.”

Kaj Juexin trinkis vinon laŭ kalkulo kaj diris, “Post florspektad’ aromas la ĉevalaj hufoj.”

La vico venis al Ruijue kaj ŝi trinkis vinon. Ŝia citita verso estis “Lastjare en floroj mi ree vin vidis.”

La vico transiris al Shuying, kiu, trinkinte vinon, citis, “Ree venas flora temp’ post unu jaro.”

Shuzhen devas trinki laŭvice. Ŝi honteme suĉetis vinon kaj malgraŭvole citis, “Bovpaŝtista knabo montras al Vilago Abrikotflora malproksima.” Denove la sesa vorto de la verso “flora” falis sur Ruijue.

Trinkinte vinon, ŝi ridete diris, “En la venteto orienta velkas floroj ĉiuspecaj.” La vico iris al Jueying, kiu levis la tason kaj forglutis la restantan vinon el ĝi. Kaj li elbuŝigis version, “Ce emocio floroj larmojn ŝprucas.”

“Ne! Tio ne taŭgas! Vi ne devas citi kvinvortan version. Diru alian,” diris Ruijue, ne obeante al la kalkulado. Ankaŭ Shuhua pravigis ŝin. Sed Jueying insistis ne eldiri alian version anstataŭe. Kun malpacienco Juehui kriis, “Ne ludu tiamaniere . Vi emas citi versojn malĝojigajn kaj malpezurajn al oreloj . Mi preferas vinludi per rapida demando kaj respondo.”

“Bone, mi konsentas la unua. Mi fariĝu Naŭdrakulo Shi Jin *,” manklakante diris Jueying, konsiderante, ke la vinludo estas bona rimedo liberigi lin de la embarasa situacio.

La vinludo de rapidaj demando kaj respondo estis akceptita. Ruijue estis elektita kiel la komandanto de la vinludo. Post kiam ĉiuj havigis al si

la nomon de heroo, ŝi elmetis demandon, “Kiu kapablas trinki vinon?”

“Leoparda Kapo kapablas,” Qin prenis la temon. “Lin Chong ne kapablas,” haste diris Juemin, rolante kiel Leoparda Kapo Lin Chong.

“Kiu kapablas trinki vinon?” Qin demandis laŭvice.

“Naŭdrakulo kapablas,” tuj respondis Juemin. “Shi Jin ne kapablas,” Jueying haste neis.

“Kiu kapablas trinki vinon?” tuj demandis Jue min.

“Migra Bonzo kapablas,” estis la respondo de Yueying.

“Wu Song ne kapablas,” neis Juehui, kiu rolis kiel Migra Bonzo Wu Song.

“Kiu kapablas trinki vinon?” Jueying urĝe elpuŝis la demandon. “Jad-unikorno kapablas,” Juehui tuj eligis la pretigitan respondon.

“Lu Junyi ne kapablas,” Qin ridete respondis, tuj post kiam ŝi kraĉis buŝplenon da teo sur la plankon.

“Kiu kapablas trinki vinon?” Juehui premis ŝin per la demando, ridete rigardante ŝin.

“Malgranda Ciklono kapablas,” respondis Qin, direktante sian rigardon al Ruijue.

“Chai Jin ne kapablas,” senhaste respondis Rui jue.

“Kiu kapablas trinki vinon?” ridetante demandis Qin.

“Jakŝaino** kapablas,” seriozmiene diris Ruijue, fingre montrante al Juexin. Ĉiuj manĝantoj eksplodis per rido. Por ridigi la pli junajn

gefratojn, Juexin intence elektis la rolon de Jakŝaino Sun Ermang. Nun lia edzino elmetis la demandon al li, kio ridigis ankoraŭ pli forte ĉiujn ĉeestantojn. Kun rideto, li respondis, “Sun Emiang ne kapablas.” Ne atendante la demandadon de sia edzino, li tuj diris, “Saĝa Stelo kapablas trinki vinon.”

“Wu Yong ne kapablas,” replikis Shuying.

“Kiu kapablas trinki vinon?” Juexin premis per la demando.

“Granda Bofranjo kapablas,” senpripense respondis Shuying.

Denova eksplodo de rido eliĝis el ĉiuj ĉeestantoj. “Punon al ŝi! Punon al ŝi!” ĉiuj kriis unuvoĉe. Shuying estis devigita akcepti la punon ŝi ordonis serviston alporti tason da varmigita vino kaj elsuĉis buseton. La vinludo iris plu. Demandoj kaj respondoj alterne ŝanĝiĝis pli kaj pli rapide, kaj punitoj ankaŭ pli kaj pli multiĝis. La punitoj trinkis aŭ vinon aŭ teon anstataŭe, se ili ne volis trinki vinon. Tiuj gejunuloj ludadis kaj ĝoje ridadis, forgesante ĉion, ĝis kiam la festeno iris al la fino.

Kiam la festeno finiĝis, plejparto el ili jam fariĝis ebrietaj. Qin kaj ŝia patrino hejmeniris. Komence, Juemin, Juehui, Shuying, Shuhua kaj aliaj persvadis ŝian patrinon restigi ŝin por celebri la Novjaran Tagon kune, sed sinjorino Zhang diris, ke ili havas farindajn aferojn hejme, kaj forkondukis ŝin. Ruijue reiris en sian ĉambron por zorgi pri Haichen. Juexin, Juemin kaj Shuhua emis reiri en sian ĉambron por enlitiĝi, pro troa drinkado. Tiel la entuziasmo de ĉiuj ĉeestantoj

malaperis kaj ankaŭ ili reiris en sian propran ĉambron. Denove kvieto regis en la granda kortodomaro. En la halo nur kelkaj geservistoj ordis la manĝilaron kaj faris purigadon.

Ankaŭ Juehui sentis sin ebrieta. Lia vizaĝo brulis kaj la koro varmiĝis. Li ne emis dormi. Sur la strato krakfajraĵoj sonegis kiel hufbatoj de dekmil galopantaj ĉevaloj. Aŭdante tion, li ne povis teni sin en la ĉambro. Li eliris por promeni. En la halo kelkaj palankenoj solece kuis. Tri aŭ kvar portistoj mallaŭte interbabilis, sidante sur la sojlo. En la najbaraj kortodomaroj krakado de eksplodantaj petardoj plidensiĝis. Starinte momenton en la halo, li direktis sin al la pordego. Kiam li atingis ĝin, la krakado de petardoj ĉesis kaj nur okazaj eksplodoj aŭdiĝis. Sulfuraodoro ŝvebis en la aero. Ĉe la pordego pendis paro da grandaj lanternoj el ruĝa papero. La brulantaj kandeloj en ili ĵetis feblan ruĝan lumon kaj malklaran ombron sur la teron.

Sur la strato regis kvieto. Restaĵoj de eksplodintaj petardoj malorde kuŝis sur la tero, eligante sian lastan varmon. Mallaŭta ploro aŭdiĝis de ie.

“Kiu ploras? Kial ploro aŭdiĝas, kiam miloj kaj miloj da familioj dronas en granda ĝojo?” Juehui mire pensis. Lia ebrio iom post iom malaperis. Li rigardis ĉirkaŭen zorge priserĉante kaj trovis nigran ombron de la ŝtona cisterno de la dekstra flanko. Li scivole iris al ĝi.

La ploranto estis knaba almozetanto en malpuraj kaj ĉifonaj vestoj. Apogante sin kontraŭ la cisterno, li mallaŭte ploris kun klinita kapo,

kies distaŭzitaj haroj dise flosis sur la akvosurfaco. Aŭdinte paŝbruon, la knabo levis sian kapon kaj rigardis Juehui, kiu ne povis klare distingi la knaban vizaĝon. Ili staris vid-al-vide kaj restis senparolaj. Ĉe la oreloj de Juehui sonis nur lia propra rapida spirado kaj la mallaŭta ploro de la knabo.

Juehui sentis, kvazaŭ pelvo da malvarma akvo estus verŝita sur lin. Ĉe liaj oreloj klare sonis arĝentaj moneroj en lia poŝo. Lin kaptis stranga kaj neniam spertita sento. Li elpoŝigis du monerojn de duonjuano kaj metis ilin en la malseketajn manojn de la knabo. Li diris sinforgese, “Akceptu ilin. Iru al varma loko. Ĉi tie estas malvarmege ... terure malvarme. Vi tremetas tra la korpo. Aĉetu por vi varman mangaĵon per ili.”

Antaŭ ol la knabo respondis, li grandpaŝe eniris la kortodomaron, kvazaŭ forfuĝante pro tio, ke li faris ion hontindan. Kiam li trairis la korton, subite aperis la mokanta vizaĝo de Granda Frato el mallumo, dirante, “Humanisto.” Kaj tuj post tio, ĝi malaperis. Kiam li transpasis la internan pordon kaj iris al la halo, li kvazaŭ aŭdis iun diri en la tomba silento, “Ĉu vi opinias, ke vi povas ŝanĝi la mondon per tiaj agoj ? Ĉu vi opinias, ke vi povas per tiaj agoj liberigi la knabon de malsato dum la tuta vivo? ... Vi, vi hipokrita humanisto!”

Kovrante siajn orelojn per la manoj, li timeme eniris en sian ĉambron. Li deprimate falis sur la liton, dirante al si, “Mi ebriiĝis, ebriiĝis.”

* La vinludo plenumiĝas per kunigo de la alinomo kaj nomo de herooj el la ĉina antikva romano *Ĉe Akvorando*. Ekzemple, Shi Jin estas unu el la herooj de la

romano, kies plena nomo konsistas el la alinomo Naŭdrakulo kaj persona nomo Shi Jin. Ludantoj prenas la nomon de heroo kiel sian nomon kaj devas bone memori la du partojn de la plena nomo de la heroo. Kiam la ordonanto de la vinludo aŭ demandanto eldiras la alinomon aŭ personan nomon de heroo, la ludanto, kiu rolas kiel la nomita heroo, devas tuj respondi per ties persona nomo aŭ alinomo. Se ludanto hezitas aŭ ne povas respondi, li estas punata per vintrinko.

* Jaksao — sanskrite Yaksa, spirito en la hinda mitologio, demono en la ĉina mitologio.

14

La sekva tago estis la lasta tago de la jaro lunkalendara. Matene Juehui vekiĝis tre malfrue. Kiam li malfermis siajn okulojn, sunlumo jam enpafiĝis tra la fenestro kaj hele prilumis la ĉambron. Ĉe lia lito, Juemin rigardis lin kun rideto, dirante, “Vidu, kiamaniere vi dormis lastnokte.”

Juehui direktis sian rigardon al sia korpo. Vatita litkovrilo kovris duonon de lia korpo. Levinte ĝin, li komprenis, ke li malzorge falis sur la liton eĉ sen malvesti sin. Li ridetis al Juemin, levis sin en sidan pozicion kaj mane frotis siajn okulojn pro la pika sunlumo. Tiumomente la maljuna servistino Huang, kiu speciale priservis ilin ambaŭ, eniris, ambaŭmane portante lavpelson.

“Hieraŭ vespere vi trinkis tro da vino kaj tiel ebriiĝis, ke vi ne senvestigis vin, antaŭ ol enlitiĝi. En tiel malvarmaj tagoj, oni facile malvarmumiĝas. Kiam mi nokte venis por kovri vin per litkovrilo, vi profunde endormiĝis sternaĝinte en la lito. Kaj vi vekiĝis nur nun!” grumblis la servistino Huang kun rideto sur sia sulkoplana vizaĝo. Ŝi ofte riproĉis ilin, kiel siajn proprajn filojn. Bone konante ŝian temperamenton kaj ŝian amzorgon al ili, ili ambaŭ tre ŝatis ŝin.

Juemin ridetis kaj ankaŭ Juehui nesindeteneble ekridis.

“Vi ja estas babilema, onjo Huang,” Juehui intence plendis por priŝerci ŝin, “lastan vesperon ĉe la festeno, ĉiuj tre gajis. Kial vi riproĉas

min pro troa vintrinkado? Oho, mi memoras. Lastvespere vi staris apud mi kaj rigardis min kiel demono. Kiel embarasita mi sentis min tiam ! Dum festtagoj vi devus esti malsevera al ni. Vi ja estas multe pli severa ol nia duonpatrino, kiu ne tiel bridas nian agmanieron.”

“Ĝuste pro tio, ke ŝi ne estas severa al vi, mi rigore subigas vin,” diris servistino Huang, kiu estis ordanta la liton, kiam ŝi aŭdis la lastan frazon de Juehui. “Ĉi-jare mi havas la aĝon de pli ol kvindek jaroj kaj mi prizorgis vin ĉi tie jam dekelkajn jarojn : Mi vidas vin plenkreskiĝi. Vi estas bonaj al mi kaj neniam ĵetas al mi insulton. Mi jam de longe volas hejmeniri, sed mi ne povas liberiĝi de zorgoj pri vi. Ĉi tie mi vidis ĉiajn aferojn. La nuna situacio ĉi tie ne estas tiel bona kiel la pasinta. Mi ofte pensas, ke estus pli bone por mi hejmeniri . Ne estas inde, ke mi plonĝu el klara akvo en kotan. Tamen mi sentus bedaŭron, se mi forlasus vin. Kiu povus prizorgi vin anstataŭ mi? Vi ambaŭ estas vere bonaj sinjoridoj, same kiel via forpasinta patrino. Se ŝi ankoraŭ vivus kaj vidus vin plenkreski, ŝi sentus ekstreme grandan ĝojon. Ankaŭ via bofratino estas bona. Kiu el la familianoj ne ŝatas ŝin? Estu bona al ŝi ! Via patrino benas vin en la ĉielo. Estonte, kiam vi akiros sukceson en lernado kaj fariĝos altranguloj, ankaŭ mi maljunulino ĝuos honoron.”

“Se ni vere fariĝus altranguloj , ni jam tute forgesus vin. Kiel ni povus pensi pri vi tiam?” ridis Juehui.

“Vi ne farus tion,” ŝi sincere diris, ameme rigardante ilin. “Mi ne

dezirus ion de vi. Mi trankviliĝos, se vi diligente lernos kaj akiros famon.”

“Ni ne forgesos vin, onjo Huang,” diris Juemin, kiu alpaŝis kaj frapetis ŝian ŝultron. Ŝi ridetis al li kaj iris al la pordo, ambaŭmane portante lavpelson. Kiam ŝi transpasis la sojlon, ŝi returnis sian kapon, dirante, “Ne plu trinku vinon hodiaŭ.”

“Ne gravas, se mi trinkos malmulte,” diris Juehui kun rideto. Tiumomente la maljunulino jam eliris el la ĉambro kaj ne aŭdis lin.

Post ŝia foriro Juemin emocie diris, “Ŝi ja estas bona. Tiaj bonkoruloj kia ŝi estas raraj inter ‘subuloj’.”

“Jen estas via granda eltrovo, ke ankaŭ ‘subuloj’ havas kaj senton kaj konsciencon, kiel iliaj mastroj,” moke diris Juehui.

Vidante, ke Juehui primokas lin, li eksilentis kaj direktis siajn piedojn eksteren.

“Ĉu vi ree iras al la hejmo de kuzino Qin?” Juehui laŭte demandis post li.

Juemin apenaŭ transpasis la sojlon, kiam li aŭdis la demandon de Juehui. Li returns sian kapon kaj ĵetis riproĉan rigardon. Li tamen afable respondis, “Ne. Mi volas promeni en la ĝardeno. Ĉu vi volas iri kun mi?”

Juehui kapjesis kaj lin sekvis. Kiam ili preterpasis la pordon de Juexin, ili aŭdis Qian-er, la servoknabinon de la kvara familibrando,

voki Grandan Sinjoridon. Ne donante atenton al tio, ili rekte iris al la ĝardeno.

“Ni iru dekstren. Mi scias, ke la avo nun estas en la umearbareto,” Juemin diris, enirinte la rondan pordon. Dekstre estis zigzaga klostro, kies interna flanko estis blanke kalkita muro, inkrustita per pecoj de ornama marmoro. Ili pluiris kaj preterpasis fenestrojn de ekstera salono. Ekstere etendiĝis ŝtona balustrado, trans kiu staris artefarita monteto kaj kuŝis longforma ĝardeneto. Krome estis florbedo, en kiu kelkaj senfoliaj peonioj fiere staris en la frosta aero. Ĉiu branĉa ekstremo de la plantoj estis vindita per kotona volvaĵo .

“Ili estas ekzemploj,” Juehui admiris, rigardante la bedon. “Kvankam ili estas nudaj, ili tamen ne tremetas en la frosta vento. Ni devus lerni de ili, ne lerni de herboj, kiuj tuj velkas, kiam prujno tuŝas ilin.”

“Vi denove faras paroladon,” Juemin diris kun rideto. “Kvankam la peonioj tiamaniere povas travivi la rigoran vintron kaj poste burĝonos kaj ekfloros, ili tamen ne povos eskapi el tondilo de la avo.”

“Tio ne gravas. La sekvan jaron ili denove ekfloros,” Juehui varme kontraŭdiris. Ili iris plu antaŭen.

Elirinte el la klostro kaj malsuprenirinte ŝtonŝtuparon, ili eniris ĝardenon, en kiu kaŝis diversformaj ŝtonoj altaj kaj malaltaj. Iuj similis kurbiĝintan maljunulon, aliaj muĝantan leonon kaj triaj longakolan

gruon. Ili ĉirkaŭiris la kuriozajn ŝtonojn kaj supreniris laŭ ŝtona ŝtuparo. Antaŭe staris bambua barilo kun pordeto en la mezo, mallargha nur por unupersona trairo. Ĉe la pordeto bambuaro baris al ili la vojon. Ŝajnis al ili, ke vojo ne ekzistas, sed enirinte tra la pordeto, ili trovis vojeton tra la bambua densejo. Kiam ili atingis la ekstremon de la densejo, ili aŭdis akvan murmuradon. Defluante de sur la artefarita monteto, rivereto preterfluis ekster la bambuaro. La akvo estis tiel kristale klara, ke oni povis vidi ŝtonetojn kaj falintajn foliojn sur la fundo. Ligna ponteto kondukis ilin al alia ĝardeneto. En ĝi troviĝis kiosko kun pajlotegmento. Antaŭ la kiosko kreskis kelkaj osmantoj* kaj kamelioj. Trairinte la kioskon, ili renkontis alian blanke kalkitan muron kun pordeto en la maldekstra angulo. Tuj kiam ili ĉirkaŭiris kurbiĝon, subite atakis ilin bruo de ondado.

Nun ili troviĝis inter labirinto-similaj balustradoj. Nur post longa zigzaga irado, ili sukcesis eliri el la labirinto. Antaŭ iliaj okuloj aperis granda placo, sur kiu kreskis multe da altaj pinoj. Nur vento murmuris en la pinaro. Irante, ili vidis angulon de ruĝe lakita fenestro de etaĝdomo, kiu elrigardis malantaŭ maldensaj pinoj ĉe la dekstra flanko. Ili eliris el la pinaro kaj alfrontis glimbrile klaran lagakvon. La lago similis lunarkon, ĉirkaŭbrakumanta la transan bordon. De tie, kie ili staris, ili povis vidi kaj la enlagan pavilonon kaj zigzagan ponteton.

Ili staris ĉe la lago kaj rigardis la ondetantan akvosurfacon dum

kelka tempo. Kiel infano, Juehui levis kelkajn ŝtonetojn kaj ĵetis ilin al la transa bordo. Ili tamen falis en la akvon. Ankaŭ Juemin levis du aŭ tri ŝtonetojn kaj ĵetis, same vane. Kvankam tiu parto de la lago estis relative mallarĝa, la distanco inter la ĵetantoj kaj la transa bordo tamen estis sufiĉe granda kaj la ĵetitaj ŝtonetoj ne povis ĝin atingi.

“Sufiĉe. Ni trovu lokon por ripozi trans la lago,” diris Juemin, retenante ĵeton de Juehui. Ili suriris mallarĝan arkan ponteton kaj atingis la transan bordon.

Descendinte de la ponteto, ili transiris strion de razeno larĝan nur je pli ol unu futo kaj suriris ŝtonŝtuparon. Tie estis granda garden kun kelkaj magnolioj. En la mezo de la ĝardeno kuŝis grua voĵeto, apud kiu sin lokis ok verdaj taburetoj el fajenco. Suririnte alian ŝtonŝtuparon, ili atingis la nove farbitan etaĝdomon. Escepte de la tegoloj, ĝi estis farbita per okulfrapa cinabra koloro. Sub la tegmentrando pendis ligna tabulo, sur kiu oni skribis tri ideogramojn “Aromo ĉe Vesperigo”.

Sidiĝinte sur fajenca tabureto, Juemin rigardis la surskribon de la avo.

Juehui sencele paŝis sola sur la perono. Li ridetis kontraŭ sia frato sur la tabureto kaj diris, “Ni iru al la monteto malantaŭ la etaĝdomo.”

“Mi volas ripozi pli longe,” Juemin rifuzis, ĉar li ne volis tuj forlasi la tabureton.

“Nu bone. Do mi eniru por pririgardi,” diris Juehui kaj puŝmalfermis la pordon.

Kiel kutime, li donis nur kelkajn neatentajn rigardojn al la pendrulaĵoj kaj mebloj en la domo. Li iris al la malantaŭa parto kaj suriris la ŝtuparon.

En la supra etaĝo estis homo. Juexin tie kuŝis febla en granda lito, kun duonfermitaj okuloj kaj malsanecaj trajtoj .

“Kio? Granda Frato, vi dormas ĉi tie! Tute sola!” Juehui ekkriis mirege.

Juexin malfermis siajn okulojn kaj rigardis Juehui. Li altrudis al si rideton, dirante, “Mi violas kaŝi min ĉi tie por ripozi kelkan tempon. Dum la lastaj tagoj mi ege laciĝis. En mia ĉambro ne povas esti kvieto. Jen unu konsultas min pri unu afero, jen alia pri alia afero. Ĉi-nokte mi devos vigli tra la tuta nokto. Do mi kaptas tempon ripozi, por ke mi tiam povu elporti la dormemon.”

“Qian-er ĵus serĉis vin. Mi ne scias, kian aferon ŝi havas,” diris Juehui.

“Ĉu vi diris al ŝi, ke mi estas ĉi tie?” haste demandis Juexin.

“Ne. Mi ne vidis ŝin kaj nur aŭdis ŝin voki en via ĉambro.”

“Bone,” diris Juexin kun trankviliĝinta koro. “Mi estas certa, ke Kvara Onklo volas, ke mi faru ion. Estas bone eviti lian peton.”

Evidente Granda Frato ŝanĝis sian taktikon. Subite demando venis en la kapon de Juehui: Kio rezultigos el tio, ke Granda Frato uzas tian taktikon por pli-malpli bone plu vivi kun aliaj ?

“Lastnokte vi trinkis multe da vino, Granda Frato. Lastatempe vi emas trinki vinon, ne kiel en la pasinteco. Vi havas nefortan sanon. Kial vi trinkas vinon tiel malsobre? Vintrinkado ne alportas bonon al vi,” admonis lin Juehui serioze. Li ne estis ĉirkaŭparolanto.

“Vi ofte priridas mian taktikon. Tio ja estas mia alia taktiko,” diris Juexin kun amara rideto, residiĝinte. “La realo tre peze subpremas min kaj mi morte afliktiĝas. Kiam mi trinkas vinon kaj ebriiĝas, mi tamen sentas min trankvila.” Post paŭzeto, li daŭrigis, “Mi konfesas, ke mi estas malkuraĝulo, mi ne kuraĝas alfronti la vivon kaj mi ne havas sufiĉan kuraĝon. Kion fari? Mi do estu malklarkapa. Tiamaniere mi povas pasigi tagojn, forgesinte ĉion.”

“Kion oni povas fari kun homo, kiu konfesas, ke li estas malkuraĝulo?” pensis Juehui malĝoje. Komence li kompatis lin kaj poste li simpatiis kun li. Li volis diri kelkajn vortojn por konsoli Grandan Fraton, tamen li timis, ke tio eble eltiros pli malagrablajn vortojn de li. Li eksilentis kaj volis malsupreniri.

“Ne foriru, Tria Frato,” retenis Juexin voke. Li serioze aldonis, “Mi havas demandon al vi.”

Juehui paŝis al li kaj tiu, rigardante lin, demandis, “Ĉu vi vidis kuzinon Mei?”

“Kuzino Mei? Kiel vi scias, ke ŝi venis al la urbo?” Juehui demandis kun miro. Li ne atendis, ke Juexin elmetos tiun demandon.

“Kuzino Qin vidis ŝin, sed ne mi.”

Juexin balancis sian kapon kaj diris, “Antaŭ pluraj tagoj, mi vidis ŝin ĝuste en la bazaro ĉe la pordo de butikoj Xinfaxiang.” Ĉe tio li ĉesis paroli, kvazaŭ li penus rememori tiaman scenon. Starante antaŭ li, Juehui restis senparola kaj nur rigardis lian vizaĝon. Li volis legi sur la vizaĝo liajn senton kaj penson.

“Ŝi eliris kun sia patrino, kiu babilis kun iu en la butikoj kaj ŝi rigardis ŝtofojn ĉe la pordo. Vidinte ŝin, mi preskaŭ eligis ekkrion. Ŝi levis sian kapon kaj vidis min. Ŝi kapbalancis al mi, kvazaŭ salutante, kaj post tio ŝi turnis sian vizaĝon internen de la butikoj. Mi rigardis laŭ la direkto de ŝia vizaĝo kaj vidis ŝian patrinon tie. Mi ne kuraĝis proksimiĝi al ŝi, sed mi volenevole rigardis sin de malproksime. Ankau ŝi rigardis min dum Tonga momento per sia paro da akvecaj okuloj. Ŝia buŝo movetiĝis. Mi pensis, ke ŝi volas diri ion, sed ŝi turniĝis kaj eniris, sen ajna vorto kaj sen plia rigardo al mi.”

Knabaj ridoj entrudiĝis en la ĉambron kaj tuj malaperis. Post paŭzeto, Juexin daŭrigis, “La renkontiĝo inter ni vekis miajn memorojn pri pasintaĵoj. Efektive mi jam forgesis ŝin. Via bofratino estas tre bona al mi kaj mi amas ŝin. Sed nun Mei revenis kaj ŝi memorigis min pri ĉio pasinta. Kiel mi povus ne pensi pri ŝi, vivante en ĉi tia medio? Mi deziras sciiĝi pri ŝia nuna sento. Eble ŝi malamas min, ĉar mi malfeliĉigis ŝin. Mi scias, ke ŝi edziniĝis, poste ŝia edzo mortis kaj fine ŝi reiris al sia patrino

por kunvivi...” Li paŭzis. Sur lia vizaĝo aperis esprimo de malĝojo kaj pento. Li eligis subtilan vespiron.

“Ne povas esti, ke ŝi malamas vin. Ĉar longa tempo jam pasis kaj multaj ŝanĝoj okazis. Ĉiu povas forgesi sian pasintecon. Kial vi ĉiam ĝenas vin mem per via pasinteco? Enterigu ĝin! Ni devas pensi nur pri la nuno kaj la estonteco. Cetere, kuzino Mei eble jam tute forgesis vin.” Juehui konsciis, ke li mensoge fabrikis la lastan frazon.

“Vi ne komprenas,” Juexin skuis sian kapon.

“Kiel ŝi povus forgesi la pasintecon? Virinoj emas rememori okazintaĵojn. Se ŝi vivus en pli bonaj kondiĉoj kaj havus zorgeman edzon, eble ŝi povus forgesi. Se tiel, ankaŭ mi sentus min trankvila. Tamen la malbona sorto, ĉiam alkroĉiĝanta al ŝi, igis ŝin vivi senedze, kiam ŝi ankoraŭ estas tre juna, kaj pelis ŝin al ŝia obstina patrino por vivi kiel bonzino. Kiel mi povus trankviliĝi kaj kiel mi povus forgesi ŝin? Tamen se mi donas lokon al ŝi en la koro, mi sentas kulpon kontraŭ via bofratino. Tiu amas min tre arde, dum mi amas alian virinon. Tiamaniere, mi suferigas ilin ambaŭ. Kiel mi povas pardoni min mem? ... La realeco estas kruela. Pro do mi volas malklarigi mian menson per ofta vintrinkado. Sciu, mi ofte ploras secrete — kompreneble mi ne faras tion malkage. Post mallonga tempo la ebriiga efiko de la vino malaperas kaj mi sentas malĝojan pripenton. Mi malamas min mem, ke mi fariĝas tiagrade malforta kaj malkuraĝa.”

Komence Juehui volis riproĉi lin, “Jen vi havas ! Kial vi ne kontraŭstaris kaj ne insistis pri via opinio dekomence? Nun vi meritas tion. “Rigardante lian vizaĝesprimon pli tragika ol tiu de ploro, li sentas, ke li ne havas sufiĉan pravecon por riproĉi lin. Li admonis duonkompate kaj duonkonsole, “Tio povus esti solvita. Se nur kuzino Mei enamiĝus al aliulo kaj reedziniĝus, ĉiuj problemoj estus plene solvitaj.”

Skuante sian kapon, Juexin diris kun amara rideto, “Neeble, do nur okazas en viaj libroj. Vi devas malfermi viajn okulojn por rigardi la realan situacion. Ĉu vi opinias, ke reedziniĝo povas okazi en familioj kia la ŝia? Ne nur ŝia patrino ne konsentos pri tio, sed ankaŭ ŝi mem absolute ne povas havi tian ideon.”

Ŝajne Juehui ne havis ion por diri. Li konsideris, ke neutila estas lia argumentado kun Juexin. Ideologie ili distancis inter si pli malproksime nun. Li vere ne povis kompreni Juexin. Se la afero estas ĝusta, kial ĝi ne povas esti plenumita? Estas nenecese, ke oni oferu ŝian dumvivan feliĉon nur pro la reala situacio, kiu tamen estas ŝanĝebla. Tio alportas nenion bonan kaj nur plilongigas la vivon de la malnovmoda familio. Kial kuzino Mei ne havas rajton reedziniĝi? Kial Granda Frato edziĝis al Ruijue, se li amas kuzinon Mei? Kial li ankoraŭ sopiras al kuzino Mei eĉ post la geedziĝo? Juehui ŝajne komprenis ĉion ĉi, tamen meditinte iom da tempo li trovis sin

senkomprena. Ĉio de la patriarka familio vere estas nodo tiel komplika, ke lia juna koro, sincera kaj varma, ne povas malligi ĝin. Starante kaj rigardante la malĝojan vizaĝon de Juexin, li subite estis atakata de terura ideo: Estas malĝojinda vero, ke personoj kiel Juexin havas nenian esperon kaj ne estas elsaveblaj. Alporti novajn ideojn al ili kaj malfermi iliajn okulojn por rigardi la veran vizaĝon de la mondo, tio nur pliigas ilian malĝojon. Tio vere similas al tio, ke oni starigas kadavrojn por ke ĝi vidu sian putriĝon.

La tragika vero turmentis lian junan koron. Li ŝajnis kompreni ĉion kaj antaŭvidi la pli amaran estontecon. Imagante, li vidis, ke tiaj personoj, kia lia Granda Frato, direktas sin al fosego kuŝanta antaŭ ili, senhezite kaj spiteme, kvazaŭ ili ne scius pri tio. Fakte estas pli bone, se ili ne scias pri sia ekzisto, ĉar ili estas definitive nesaveblaj. Kaj li mem troviĝas en tia situacio: Vidinte, ke ili sin direktas al la fosego, li ne kapablas savi ilin. Kiel malĝojiga afero al li! Enpensigante, li fariĝis malserena. Li kvazaŭ eniris en mallarĝan strateton kaj ne povis trovi elirejon. Ridoj penetris en liajn orelojn tra la fenestro, kvazaŭ primokante lin.

“Lasu do,” li pensis en si, “mia malgranda kapo ne povas enteni tiom da problemoj. Estas sufiĉe se mi mem vivas kiel vera homo.” Ŝajnis al li, ke li per tio jam havigis al si bonan solvon, kaj li ne plu okupiĝis pri la problemoj. Li paŝis al la fenestro kaj elŝovis sian kapon

por rigardi. Tie gefratoj Jueying, Juequn, Shuying, Shuhua, Shuzhen kaj Shufen piedludis ĝianzi**-on, ankaŭ Juemin aliĝis al la ludo.

“Jen vi ĉiuj venis,” Juehui laŭte diris kun rideto. “Ne estas tempo por tagmango?”

Tiumomente Shuhua estis piedfrapanta ĝianzi-on, kalkulante kiomfoje ŝi sukcesas piedfrapi sen lasi ĝin fali teren. Aŭdinte la voĉon de Juehui, pro surpriziĝo, ŝi instinkte levis sian kapon por rigardi kaj tial maltrafis la ĝianzi-on, kvankam ŝi penis atingi ĝin per sia piedo. La ĝianzi-o falis sur la teron kun brueto, kaj ŝiaj poentoj estis nur cent kvardek kvin.

Juemin kaj aliaj gefratoj, kiuj kalkulis malpacience starante apude, ĝojkriis je la vido de ŝia maltrafo. Shuhua piedbatadis la teron pro kolero, postulante ke Juehui ŝin kompensu.

“Pro kio mi kompensu? Mi ne alparolis speciale vin,” Juehui respondis kun rideto. Li deturniĝis de la fenestro kaj volis malsupreniri. Kiam li sin turnis, li trovis, ke Juexin foriris, kaj aŭdis malsupreniran paŝadon sur la ŝtuparo. Li malrapide iris al la ŝtuparo kaj malsupreniris. Dume li aŭdis Juexin paroli sube, sed kiam li atingis la teretaĝon, Juexin jam komencis piedludi la ĝianzi-on kun siaj gefratoj.

“Estas la horo por tagmanĝo. Se vi ankoraŭ piedludas ĝianzi-on ĉi tie, la servistoj devas serĉi vin ĉie,” Juehui diris.

“Estas frua! La avo jam ordonis, ke oni hodiaŭ elmetu la tagmanĝon iom malfrue. Ĉar ĉiuj trinkis tro da vino hieraŭ vespere, ili malfrue

ellitiĝis,” Shuhua respondis. Dirinte tion, ŝi ekkalkulis kiom da fojoj Juexin piedfrapas la ĝianzi-on .

“Tria Frato, ĉu vi ne volas aligi al ni?” ridetante demandis la infaneca Jueying, levinte la kapon kaj grimacinte al Juehui.

Kiam Juehui volis respondi, Shuhua diris, “Li ne kapablas piedfrapi. Li ne povas piedfrapi dek fojojn !” Ŝi primokis lin kvazaŭ sin venĝante por ĵusa malsukceso pro li. Sur sia ronda pudrita vizaĝo aperis fiera rideto.

Tiumomente Juexin maltrafis la ĝianzi-on. Estis la vico de Shuying. Ŝi lerte piedfrapadis la ĝianzi-on. En la komenco ŝi altiris ĉies rigardon. Ŝiaj movoj estis nek rapidaj nek malrapidaj. Kalkulante, ŝi ritme movis sian korpon, kun la harplekto tenata en la mano. La ĝianzi-o fariĝis obeema al ŝi kaj saltadis laŭtakte de ŝia piedfrapado. Ĝi ĉiam falis sur ŝian piedon, kvazaŭ ŝia piedo estus magneto. Ŝi piedludis longan tempon, sed ŝi ne movis sin malproksimen de sia loko.

Ĉiuj kalkulis kaj envie rigardis ŝin piedfrapi. Kaj ĉiuj esperis, ke ŝi tuj maltrafos la ĝianzi-on. Tamen fakte, ju pli ŝi piedfrapis, des malpli la ĝianzi-o volis forlasi ŝian piedon. Sajnis, ke ŝi ne maltrafos la ĝianzi-on por eterne. Pro tio ĉiuj ekgrumblis kaj iuj eĉ laŭte kriis por deturni sian atenton.

Sidante sur fajenca tabureto en la korto, Juehui silente rigardis la konkurson. Sola li sidis tie, ne povante dividi kun ili la ĝojon. Kaj plie li rigardis ilin kun envio. Por la unua fojo, li eksentis la plorindecon de

sia nescio pri diversaj ludoj.

Sed tio nur daŭris momenton. Soleco subite atakis lin kaj rapide forpasis. Li trankvile kaj interesplene observis kiel la ludo iras.

Finfine Shuying maltrafis la ĝianzi-on. La sekva ludantino estis Shuzhen. La dek-dujara knabino malfacile movis siajn pintigitajn piedetojn en broditaj ŝuoj el ruĝa sateno. Ŝia paro da deformitaj kaj gracilaj piedetoj altiris ĉies atenton. Kiel aliaj, Juehui jam observis ĉi tiun paron da piedetoj famaj en la tuta kortodomaro, sed ili ne vekis kompaton ĉe li. En liaj okuloj ĉi tiu paro da piedetoj similis kuglotruojn en la fronta muro. Ili revokis al li suferplenan rememoron. La plorado, kiun Shuzhen eligis pro perforta vindigo de la piedoj, revenis al liaj oreloj de antaŭ multaj jaroj

Sed nun, antaŭ liaj okuloj klaris la samaj piedetoj, kiuj vekis kompaton ĉe kelkaj kaj kiujn ŝi ricevis per siaj suferoj kaj sangaj larmoj. Sed ŝi ĝoje ridis, forgesinte ĉion pasintan. Nenia spuro de malĝojo videblis sur la naiva kaj plezura vizaĝo de la knabino.

“Verŝajne pro sia knabiria nematureco, ŝi ankoraŭ ne komprenas tion,” Juehui pensis. Li pretervole sendis sian rigardon al la vizaĝo de Juexin kaj priserĉis ĝin por io.

Juexin ridetante babilis kun Shuying apude staranta. Ŝi montris koleran mienon kaj volis venĝe pinĉi lian brakon. Li malsupren kuris de sur la ŝtuparo kaj ŝi postkuris . Li dufoje ĉirkaŭkuris magnolion. Ne povinte

kuratingi lin, ŝi koleriĝis kaj levis terbulon por ĵeti al li. Li saltis de sur la perono sur la herbejon kaj sin direktis al la ponto.

“Ne forkuru. Mi ne postkuros vin. Revenu,” Shuying laŭte kriis, starante sub la magnolio .

Juexin haltis ĉe la ponta ekstremo. Rigardante ŝin kun rideto, li sinsekve faris kelkajn elspiregojn.

“Rapide revenu, Granda Frato. Estas via vico nun,” ŝi aldonis.

Juexin ankoraŭ staris senmove.

“Bone, vi foriru. Ne gravas, ke vi forestas,” ŝi diris, ŝajnigante sin kolera. Ŝi sin turnis kaj reiris sur la peronon antaŭ la etaĝdomo.

Tuj kiam ŝi sin turnis, Juexin revenis. Kun retenita rideto kaj per leĝeraj paŝoj, li trairis la korton kaj haltis ĉe la ŝtuparo. Shuying staris dorse al li sur la ŝtuparo kun la harplekto pendanta surdorse. Kiam li ekprenis ŝian harplekton, Shufen rimarkis lin. Ŝi ridetante kriis , “Dua Fratino , li troviĝas malantaŭ vi!” Shuying haste turnis sian kapon por rigardi. Li jam enŝovis vergeton en ŝian harplekton. Altirinte sian harplekton, ŝi eltiris la vergeton kaj ĵetis ĝin sur la teron. Ĉiuj ekridis bonhumore.

Rigardante la scenon, Juehui ne povis sin deteni de ekridi. Samtempe alia ideo naskiĝis en li. Homoj estas forgesemaj. Dum tempeto oni povas havigi al si malan humoron. Eble, ĝuste pro tia forgesemo, oni povas plu vivi en sufero. Al Juehui venis portempa kompreno pri sia

Granda Frato, kiu jam forgesis ĉion, tuj post kiam li fose malfermis la tombon de la pasinteco.

* Osmanto (*osmanthus fragrance*) , arbo kun griza ŝelo kaj aromaj floretoj ĉe foliaj akseloj en la periodo de septembro ĝis oktobro.

**Ĝi estas ludilo kun kokplumoj farita el ŝtofo kaj kupra monero. Dum ludado oni senĉese suprenbatis ĝin per piedo por ke ĝi ne falu teren.

15

Ĉe la vesperiĝo de tiu tago, krakfajraĵoj eksplodis senĉese tie kaj ĉi tie. La kvieta strato multe agitiĝis kaj eĉ la pavimaj ŝtonplatoj ekstremitis de brua eksplodo. En diversaj direktoj la bruo leviĝis tiel miksite, ke oni ne povis distingi, el kiu direkto ĝi alflugas. Krakfajraĵoj eksplodis tiel urĝeme kaj tiel laŭte kiel hufkrakado de mloj kaj miloj da galopantaj ĉevaloj.

En la hejmo de la familio Gao, gesinjoroj, sinjoridoj kaj fraŭlinoj ĉiuj kolektiĝis en la ĉefhalo. Ili portis novajn vestojn; la sinjorinoj surhavis eĉ jupojn. Kiel kutime, kiam ili faris oferadon, la viroj staris ĉe la maldekstra flanko kaj la virinoj ĉe la dekstra. Lampoj kaj kandeloj brilis kiel taglumo kaj la du grandaj pordoklapoj en la fronto plene malfermiĝis. Sub la dioniĉo staris oblonga rektangula altaro, kovrita per ruĝa velura tablotuko. En la granda hibaĉo antaŭ la altaro, monteto de dekoj da buloj de lignokarbo arde brulis kiel brileruĝaj pilkoj. Du aŭ tri branĉoj de cipreso siblis en la fajropelvo kaj ellasis fumon, kiu pikis la okulojn kaj naztruojn. Sur la planko estis sternita larga rufa tapiŝo, sur kiu kelkloke kuŝis cipresaj frondoj. Antaŭ la hibaĉo kuŝis granda kuseno kun ruĝa velura tuko por kotoŭi * .

Sur la altaro staris paro da altaj kandeloj kaj granda incensujo. Sur la interna kaj flankaj partoj de la tablo estis multaj vintaso, kies nombron nur kelkaj familianoj bone sciis. Grandsinjoro, pro

grandageco, lasis la aferojn sub prezido de Kerning. Ĉio estis jam preskaŭ preta por lia eniro en la cefhalon por fari riverencojn al la praavoj kaj akcepti bondezirajn riverencojn de siaj posteuloj. En longaj roboj kaj jakoj kun larĝaj manikoj, Keming kaj Ke-an malrapide plenigis tasojn el la vinkruĉo. Post kiam ili plenigis la vintasiojn kaj enmetis brulantajn incensbastonetojn en la incensujon, Kerning iris inviti Grandsinjoron en la interna ĉambro ĉe la dekstra flanko por komenci la ceremonion.

Kiam Grandsinjoro aperis, silento tuj falis en la ĉambro. Keming ordonis bruligi petardojn. La apudstaranta servisto Wen De elrapidis. Ĉe la plene malfermita pordo en la centro, li laŭte kriis, “Bruligu petardojn!” Tuj poste petardoj krake eksplodis. La virinoj retiriĝis tra flankaj pordoj kaj la viroj enviciĝis dorse al la altaro. Unue Grandsinjoro riverencis en la direkto al la korto por esprimi respekton al la dioj de Ĉielo kaj Tero. Poste Keming kaj liaj du fratoj enviciĝis kaj riverencis. Dume Juexin, tenante faskon da incensbastonetoj, portis en la kuirejon la ikonon de Kuireja Dio el ekstere. Li revenis ĝustatempe kaj, viciĝinte kun siaj du fratoj kaj tri kuzoj, riverencis al la Dioj de Ĉielo kaj Tero. Post tio, ĉiuj viroj sin turnis al la niĉo de la praavoj. La virinoj, kiuj kaŝrigardis ekster la pordo, haste enrapidis kaj aliĝis al la vicoj de riverencintoj.

Laŭ la malnova kutimo Grandsinjoro la unua riverencis al la praavoj

kaj reiris en la internan ĉambron. Poste laŭvice riverencis sinjorino Zhou, Kerning, sinjorino Zhang kaj aliaj, kaj laste sinjorino Chen sekvanta sinjorinon Shen. Ili senhaste faris riverencojn unu post alia. Pli ol duonhoro forpasis. Venis la vico de Juexin kaj la aliaj de lia generacio. Juexin gvidis siajn fratojn kaj kuzojn fari naŭ riverencojn. Ĉar tia ceremonio okazis nur unufoje jare, ili tion faris nelerte. Hi eĉ ne povis unuecigi siajn movojn de genuflekxiĝo kaj stariĝo. La du knabetoj Juequn kaj Jueshi estis relative malrapidaj. Antaŭ ol ili faris tri riverencojn surgenuiĝinte, la aliaj jam stariĝis. Do ili ambaŭ haste stariĝis, dum la aliaj jam denove falis sur la genuojn. Ilia embarasiĝo kaŭzis ridojn eĉ iuj apudstarantoj. Sinjorino Wang, ilia patrino, urĝis ilin. Dum ridado de apudstarantoj, ili rapide finis. Ĉar ili estis tro junaj kaj senspertaj, ili ne povis fari tiel bone kiel la pli aĝa generacio. Sekve, Ruijue gvidis Shuying, Shuhua, Shuzhen kaj Shufen sur la ruĝan feltan tapiŝon por riverenci. Ilia moviĝo nature estis malpli rapida, sed tamen multe pli orda. Kvankam Shufen estis la plej juna el ili, ŝi estis same lerta. Poste Ruijue kondukis sian fileton Haichen sur la ruĝan feltan tapiŝon kaj riverencigis lin.

Servistoj forportis la kusenon kaj sterns ruĝan feltan tapiŝon. Kerning denove eniris la internan ĉambron kaj elakompanis Grandsinjoron. Unue la filoj kaj bofilinoj de Grandsinjoro, viciĝinte vizaĝe al li, falis sur la genuojn kaj riverencis por esprimi bondeziron al

li ; poste liaj genepoj faris la samon. Akceptinte ilian riverencadon, li reiris en sian propran ĉambron.

Post la foriro de Grandsinjoro la ĉefhalo pli vigliĝis. Sub la gvido de sinjorino Zhou, Keming kaj la aliaj de lia generacio formis duoncirklon sur la ruĝa felta tapiŝo kaj riverencis unu al alia. Juexin kaj la aliaj de lia generacio disiĝis kaj riverencis al siaj propraj gepatroj aŭ al siaj geonkloj. Fine sinjorino Zhou proponis al ili, ke ili form cirklon kaj riverencu unu al alia. Farante tion, ili diris bondeziron unu al alia ne serioze, sed ŝerceme. Post tio la junuloj disen foriris. Sed Juexin kaj lia edzino devis resti tie kune kun siaj geonkloj por akcepti riverencadon de la geservistoj.

Elkurinte tra la flanka pordo, Juemin kaj Juehui hastis al sia ĉambro, ĉar ili timis, ke geservistoj baros al ili la vojon kaj riverencos al ili. Sed apenaŭ ili preterpasis la fenestron de sinjorino Zhou, ilin haltigis kelkaj geservistoj. Kun maljuna servistino Huang ĉe la kapo, ili respektoplene diris al ili bondeziron el sia koro. Tre kortuŝite, la junuloj ambaŭ klinis sin kun kuntenataj manoj antaŭ la brusto. Poste Zhang, He kaj aliaj servistinoj alpaŝis kaj diris bondezirojn al ili. Fine alpasis Mingfeng, kun vizaĝo iomete pudrita kaj harplekto glate kombita. Super la vatita jako ŝi portis novan orlitan veston el fajna tolo. Post kiam ŝi diris bondeziron al Juemin, ŝi alpaŝis al Juehui, kun naiva rideto sur la vizaĝo. Vokinte Juehui per “Tria Sinjorido”, ŝi sin klinis kaj tuj

rektiĝis. Ŝi ridetis al Juehui, kaj siaflanke, Juehui responde diris sian bondeziron kun plezuro. Bonkora rideto alnaĝis al lia vizaĝo. En tiu momento, ĝuste en tiu tempeto, li forgesis ion pasintan, konsiderante, ke ĉio en la mondo plaĉas al li. Lia konsidero estis pravigebla, ĉar en tiu momento aŭdiĝis nur la voĉoj de ĝojo en la kortodomaro. Ĉiuj ridetis kaj esprimis bondezirojn. La juna Juehui tamen ne pripensis kiel aspektas la vasta mondo ekster la korta muro. Kaj li ek forgesis la almozpetantan knabon, kiun li renkontis la antaŭan nokton.

“Bruligu artfajraĵojn!” laŭte kriis servisto Wen De, kiu jam malsupreniris de la ŝtuparo antaŭ la ĉefhalo. Post jesa respondo, kiu alflugis el ekstere, fajrero flagris en la malluma ĝardeno kaj multaj raketoj kun ore brilaj fajreroj pafiĝis en la aeron. Tuj kiam unu malaperis, alia pafiĝis kaj leviĝis pli alten. Tuj aperis multaj fajraj arboj kun sennombraj arĝentaj floroj en la malluma ĝardeno. Artfajraĵoj sekvis unu alian ĝis entute ok-naŭ estis bruligitaj. Ili estis donaco de sinjorino Zhang. Grandsinjoro elvenis kaj sidiĝis en seĝo ĉe la pordo de la ĉefhalo por rigardi. Liaj filoj kaj bofilinoj staris apud li. Rigardante la spektaklon, li faris komentojn pri la artfajraĵoj.

Juehui kaj liaj fratoj iris al 1a halo, kie ili povis pli klare vidi la prezentadon. Ankaŭ Jueying, Juequn kaj Jueshi aĉetis kelkajn specojn de artfajraĵoj “Gutoj de Oro”, “Kuranta Muso” kaj “Mirakla Libro kun Sagoj” kaj bruligis ilin.

Post la finbruligo, disiris la homoj en la ĉefhalo. Palankenoj leviĝis kaj foriris. Juexin kaj liaj tri onkloj, iris palankene viziti siajn amikojn por esprimi siajn bondezirojn je la fino de la malnova jaro. Starante en la halo, Juehui rigardis Jueying kaj aliajn bruligi siajn proprajn artfajraĵojn.

En la ĉambro de Grandsinjoro jam instaliĝis tablo por maĝango-ludo. La ludantoj estis Grandsinjoro, sinjorino Zhou, sinjorino Zhang kaj sinjorino Wang. Sinjorino Chen en riĉa tualetto, kiu ĵus demetis sian ruĝetan jupon, sidiĝis apud Grandsinjoro por helpi lin ludi. Servistinoj kaj servoknabinoj staris ĉe ĉiu ludanto sub ties dispono. En la ĉambro de Juexin pretiĝis alia tablo por ludo de maĝango. La ludantoj estis Ruijue, Shuying, Shuhua kaj sinjorino Shen. Unue Ruijue cedis sian lokon al Juemin, sed ĉi tiu insistis ne partopreni kaj rifuzis per preteksto. Li staris malantaŭ Ruijue kaj, rigardinte ŝin gajni partion, li eliris. Anstataŭ reiri al sia propra ĉambro, li iris eksteren tra la halo. Li tie vidis Juehui bruligi por siaj kuzoj la artfajraĵon “Mirakla Libro kun Sagoj”. Je eksplodo lumaĵo pafiĝis super la tegmenton kaj perdiĝis en la aero.

Juequn kaj Jueshi krocigis al Juehui por plia bruligo, sed Juemin retenis lin kaj li alpaŝis al Juehui kaj flustris ĉe ties orelo, “Ni iru al la hejmo de Qin.”

Kapjesinte sen diri ion, Juehui sekvis Juemin, spite al la retena alvoko de Jueshi.

De sur la tegmentrando la pendantaj lanternoj ruĝe disradiis nebule kaj

tremetis en la frosta vento. La maljuna pordisto Li sidanta en ege malnova apogseĝo babilis kun palankena portisto, kiu sidis sur la benko senapogila. Vidinte Juemin kaj Juehui, ili respektoplene stariĝis kaj ne sidiĝis ĝis ili transpasis la sojlon.

Transirinte la sojlon kovritan per lado ili vidis nigran kaj malgrasan vizaĝon apud la ŝtona leono ĉe la dekstra flanko. La febla lamplumo malebligis al ili rekoni en li sian ekserviston Gao Sheng. Ili ne donis atenton al li kaj grandpaŝe iris al la strato.

Gao Sheng laboris kiel servisto en la familio Gao dum dek jaroj. Poste li ekhavis emon al opifumado, kaj li ŝtelis kelkajn pentraĵojn de Grandsinjoro kaj forvendis ilin. Kiam lia fiago malkaŝiĝis, li estis ĵetita en malliberejon. Liberigite, li vagis ĉien kiel almozetanta vagabondo. Tamen dum la gravaj festoj li revenis al sia antaŭa mastro por peti etan mondonacon. Pro tio, ke li hontis pro sia ĉifona vesto, li ne havis kuraĝon eniri la kortodomaron. Li do kaŝe atendis ekster la pordego iun serviston, kun kiu li iam laboris, por peti lin informi la mastron pri lia alveno. Li petis nemulte de la mastro, kaj cetere, li petis nur kiam lia malnova mastro ĝoje pasigis feston. Tiel li povis ĉiufoje atingi sian celon. Kaj tio jam fariĝis kutimo. Ankaŭ ĉi-foje li ricevis mondonaceton. Kiel kutime, li kaŝis sin apud la ŝtona leono kaj karesis la glacie malvarman kaj nerifuzantan beston, bildigante al si la festan scenon interne de la kortodomaro. Rigardante la du elirantajn siluetojn, li

rekonis en ili sinjoridojn, el kiuj Tria Sinjorido iam enlite aŭskultis liajn rakontojn ĉe la lampo de opifumado. Li tuj sentis intimecon kaj tiklon alpaŝi kaj reteni ilin por babilado. Tamen post rigardo al siaj ĉifonaĵoj, li frostiĝis en la koro. Li retiriĝis malantaŭ la leonon, eĉ kaŭriĝis kaj kuntiriĝis en bulon timante ke ili vidos lin. Kiam ili iris malproksimen, li stariĝis kaj postsekvis ilian dorsfiguron. Liaj okuloj iom post iom nebuliĝis kaj li ne plu povis vidi ilin. Stupore starante en la mezo de la strato, li lasis al la frosta vento vipadi lian malgrasan korpon volvitan per unu nura ĉifona vesto subŝtofitita. Frotante kelkfoje siajn malsekiĝintajn okulojn, li denove ekiris. Li returnis sian kapon kaj ĵetis sian lastan rigardon al la ŝtona leono. Li foriris malforte kaj malrapide foriris, firme tenante la mondonaceton de la mastro per unu mano kaj premante sian bruston per la alia.

Dume, Juemin kaj Juehui ĝojplene iris per longaj paŝoj, surtretante bruliĝitajn restaĵojn de petardoj. Ili trairis kvietajn kaj movplenajn stratojn, preteriris butikojn, ĉe kies pordo brulis paro da altaj kandeloj kaj fine ili atingis la pordon de Qin. Ili survoje pripensis multajn ĝojigajn aferojn, sed ne pri la homo, kies nomo estis Gao Sheng.

Kvieto regis en la hejmo de Qin. Nur unu kerosena lampo pendis en la libera spaco de la halo.

En tiu negranda kortodomaro loĝis tri familioj kun malsamaj familinomoj. Du el la tri familestroj estis vidvinoj kaj en la tuta korto

loĝis nur du aŭ tri viroj. Kvankam tri familioj vivis kune en la sama korto, la tiea vivo tamen estis kvieta kaj neanimita. Eĉ en la antaŭvespero de la lunkalendara Novjara Tago, la tiea sceno estis ne multe pli vigla ol en la ordinaraj tagoj.

El la tri familioj, la plej kvieta estis tiu de Qin, kiu konsistis nur el ŝi kaj ŝia patrino. Krome Qin havis avinon, kiu loĝis en monaĥinejo kaj malofte revenis al la hejmo, kaj du maljunaj geservistoj, kiuj laboris en ŝia hejmo jam dum pli ol dek jaroj.

Juemin kaj Juehui eniris en la korton kaj la servisto Zhang Sheng salutis ilin. Ĉe la fenestro de sinjorino Zhang, ili vokis, “Onjo” kaj aŭdiĝis ŝia respondo. Kiam ili eniris en la ĉefĉambro, sinjorino Zhang eliris renkonte por bonvenigi ilin. Dirinte “Nian respekton al Onjo je la fino de la jaro”, ili genufleksis kaj faris riverencojn. Kvankam ŝi kelkfoje diris “nenecese”, ŝi tamen ne sukcesis reteni ilin kaj responde salutis. Kiam Qin elvenis el sia ĉambro, ili reverence klinis sin ankaŭ al ŝi. Sinjorino Zhang invitis ilin en sian ĉambron por sidiĝi kaj la servisto alportis teon.

El la interbabilado kun sia onklino, ili eksciis, ke Kerning kaj Juexin jam venis ĉi tien por prezenti la lastan respekton de la jaro kaj sidis por momento. Juemin kaj Juehui babiladis kun sinjorino Zhang longan tempon. Ili invitis sin al sia hejmo — la hejmo de ŝiaj gepatroj — por pasigi la festajn tagojn ŝi akceptis la inviton kaj difinis la daton je la

dua tago de la nova jaro. Morgaŭ — la Novjaran Tagon — ŝi kunportos Qin al la monaĥinejo por esprimi sian bondeziron al la avino de Qin. Ŝi diris al ili , ke ŝi mem Batas kvietan vivon, ke ŝi ne povos resti en ilia hejmo multajn tagojn kaj ke ŝi restigos Qin tie por pli da tagoj. Ŝiaj vortoj multe ĝojigis ilin.

Post momento Qin invitis ilin al sia ĉambro kaj ili foriris kun ŝi.

Ili tute ne atendis, ke estas alia persono en ŝia ĉambro. Tiu estis junulino, kiu surhavis hele indigan senmanikan veston el brokaĵo super hele blua krepa vatita jako. Sidante sur la litrando, ŝi legis libron kun klinita kapo en la lamplumo. Aŭdinte paŝbruon ŝi demetis la libron kaj stariĝis.

Ili stulte staris kaj fikse rigardis ŝin, ne povante eligi vortojn dum longe.

“Ĉu vi ne konas ŝin?” demandis Qin, afektante surpriziĝon.

Antaŭ ol ili respondis, la junulino ekridetis. Sed la rideto estis malgaja kaj kontraŭvola. La rideto profundigis la sulkon sur ŝia frunto, la sulkon, kiu alportis kaj belecon kaj malĝojon al ŝia vizaĝo.

“Jes,” respondis Juehui kun rideto. Kaj Juemin vokis, “Kuzino Mei.” En ilia cerbo ŝia figuro ankoraŭ klare vivis. La pasinteco forrapidis. Nun ŝi staris antaŭ ili, kun la sama aspekto kiel antaŭe : bela, malgaja vizaĝo, svelta figuro, densaj korve nigraj haroj kaj paro da grandaj akvecaj okuloj. La nuraj diferencoj estis: pli profunda sulko sur la frunto,

hartubero anstataŭ harplekto kaj maldike pudrita vizaĝo. Ili ne atendis renkonti ŝin tie kaj tiam.

“Kuzoj ... Kiel vi fartas? ... dum ĉi tiuj jaroj...” ŝi demandis. Kvankam ŝiaj vortoj estis ordinaraj, ŝi tamen elbuŝiĝis ilin kun peno.

“Ni ĉiuj fartas bone. Kaj vi, kuzino Mei?”

Juemin afable demandis. Li trudis al si rideton.

“Mi fartas kiel antaŭe. Dum ĉi tiuj jaroj mi fariĝas pli sentimentala kaj ofte sentas senkaŭzan malĝojon. Kaj mi mem ne scias kial.” Dirante, ŝi kuntiris siajn brovojn kiel antaŭe, sed pli ĉarme. Ŝi aldonis, “Mi estas denaske sentema.”

“Kuzino Mei, mi opinias, ke la medio kaŭzas ŝanĝon,” Juehui klarigis, “sed vi restas senŝanĝa.”

“Kial vi staras anstataŭ sidi? Kian ceremonion vi observas!” Qin interrompis.

Ĉiuj sidiĝis. Qin kaj Mei sidis sur la litrando ŝultro ĉe ŝultro.

“Post nia disiĝo mi ofte sopiris al vi ... Dum ĉi tiuj jaroj mi kvazaŭ havis malgajan sonĝon. Nun mi vekigis el la sonĝo, sed ĉe mi ekzistas nenio krom malplena koro.” Poste ŝi tuj korektis, kion si ĵus diris, “Fakte mi ankoraŭ estas en la sonĝo. Mi ne scias, kiam mi povos vere vekigi. Mi estas nenio bedaŭrinda. Mia maltrankvilo kuŝas en tio, ke mi implikas mian patrino.”

“Ĉu via patrino fartas bone?” afable demandis Juemin.

“Jes, tre bone. Multajn dankojn. Ĉu via patrino fartas bone? Mi ne vidas ŝin jam de kelkaj jaroj,” diris Mei kaj montris ameman rideton.

“Jes, ŝi ofte sopiras al vi,” diris Juehui.

“Dankon al ŝi. Mi nur timas, ke mi ne havos ŝancon por intervidigi kun ŝi,” diris Mei kun iom da ĉagreno. Ŝi iom mallevis sian kapon.

“Kuzino Mei, vi vere ne devus esti tiel pesimisma. Vi ja estas juna. Vi akiros feliĉon estonte. Kiu povas antaŭscii la estontecon? Vi ĉiam diras tiajn malesperajn vortojn!” diris Qin, karesante al Mei la ŝultron. “La nuna situacio estas malsama ol la antaŭa. Ĝi probable alportos al vi feliĉon...” Fininte tiujn vortojn, ŝi ridetante flustris kelkajn vortojn ĉe la orelo de Mei.

La kuntiriĝintaj brovoj de Mei iome malstreĉiĝis kaj delikata ekbrilo fulmis tra ŝia vizaĝo. Ĵetinte rigardon al Qin, ŝi flanken ŝovis defalintajn harojn ĉe la dekstra tempio. La malhela nuboj denove kovris sian vizaĝon. Ŝi malgaje ridetis al Qin kaj diris, “Juehui ĵus diris, ke la medio kaŭzas ŝanĝon. Mi trovas tion signifoplena. Ni troviĝas en malsamaj situacioj. Mi jam postrestas malantaŭ miaj samtempuloj. Mi nur estas sklavo de mia sorto kaj ne povas fari decidon per mi mem. Kiel mi povus havi feliĉon?” diris Mei kaj altiris la manon de Qin kaj malpeze ekpremis ĝin. Turninte sian kapon al Qin, ŝi admiris, “Kuzino Qin, vi estas vere enviinda. Vi havas kuraĝon kaj kapablon. Vi ne falos en mian dilemon.”

Kvankam tiu elkora admiro alportis al Qin momentan konsolan ĝojon, ĝi tamen estis kvazaŭ vento, kiu senrevene forpasis. Restis nur trista rideto: la rideto, kiun iuj virinoj uzas por trakti nesolveblajn problemojn. Qin, kvankam admirata kiel kuraĝa kaj kapabla virino, neeviteble turnis sin al ĝi kelkfoje por helpo.

“Kvankam la medio ludas gravan rolon, ĝi tamen estas kreita de ni homoj. Kial ni ne povas ŝanĝi la medion? Ĉiel ni devas lukti kontraŭ la malfavora medio. Se ni konkeros ĝin, ni akiros por ni feliĉon,” varme diris Juehui. Li tamen ne tute eligis ĉiujn vortojn, kiujn li volis diri.

La sinteno de Mei kaŭzis al Juemin miksitajn sentojn : malĝojo, kontento, surpriziĝo kaj kompatato. Ne nur pro Mei, sed ankaŭ pro Qin kaj si mem. Tamen kiam li vidis la ridetantan vizaĝon de Qin, li iom post iom revenis al la trankvilo. Li eĉ trovis vortojn kaj konsolis al Mei, “Pro tio, ke vi troviĝas en malbona situacio, vi emas malĝoji. Post kelkaj jaroj via situacio pliboniĝos kaj vi liberiĝos de tio. La situacio de Qin fakte ne estas multe pli bona ol la via, escepte de tio, ke vi spertis malfeliĉan geedziĝon similan al inkubo. La mondo estas sama al vi ambaŭ. La diferenco estas, ke vi rigardas ĝian malhelan flankon, dum kuzino Qin ĝian brilan flankon. Tio estas la kaŭzo, kial vi emas malĝoji kaj ŝi nutras esperon.”

“Kuzino Mei, legu novajn librojn, kiam vi estas libera. Tiajn fratino Qin havas,” diris Juehui, kiu konsideris, ke novaj libroj estas

panaceo.

Mei montris subtilan rideton. Ŝi ne tuj donis al ili respondon, sed nur rigardis ilin per sia paro da akvecaj okuloj. Ŝian penson ili ne povis diveni. Direktinte sian rigardon al la lampo, ŝi eligis vespiron. Ŝi retenis la vortojn, kiujn ŝi volis diri. Ŝajnis, ke ŝi kaŝas multajn vortojn en sia brusto kaj ne povas eligi ilin. Ŝi silente dentpremis sian suban lipon. Post momento, ŝi balancis la kapon kaj diris, “Dankon pro via admono. Kvankam ĝi estas bona, ĝi tamen estas senutila al mi. Kian bonon mi povas akiri el legado de novaj libroj?” Post paŭzo, ŝi aldonis, “Ĉio estas nesavebla. Kiel ajn la epoko ŝanĝiĝos, mia situacio restos senŝanĝa.”

Juemin havis nenion por diri, ĉar li sciis, ke ŝiaj vortoj estas pravaj. Ĉio estas nesavebla. Ŝi edziniĝis kaj Granda Frato nun havas sian edzinon. Eĉ se la epoko ŝanĝiĝus favore al ŝi, kiel ŝi povus reedziniĝi al li? Kaj krome la patrinoj de ŝi kaj li fariĝis malamikoj unu kontraŭ la alia. Tiumomente eĉ Juehui komprenis, ke ne ĉiaj problemoj estas solveblaj per libroj.

Ĉiu klopodis trovi konvenajn vortojn en la cerbo. Mei estis la unua, kiu rompis la silenton. “Mi ĵus legis kelkajn ekzemplerojn de *Nova Junularo*,” ŝi diris kaj ĵetis sian rigardon al la gazetoj kun malhele flava kovrilo, stakigitaj sur la tablo antaŭ la lito. “Nature mi ne povas kompreni ĉion. Mi trovas, ke iuj argumentoj estas bonaj. Ĉar mi havis suferan travivaĵon, mi povas kompreni ilin. Leginte tiujn gazetojn, mi

sentis malĝojon en la koro. Ili ŝajne priskribas alian mondon, kiu neniel rilatas al mia situacio en ĉi tiu mondo. Mi eble envias ĉion en tiu mondo. Sed mi komprenas, ke ne mi povas atingi ĝin. Legante ilin, mi sentas min kiel almozetanton, kiu aŭdas ĝojridadon, starante ekster la muro de riĉulo aŭ flaras la bonodoron de manĝaĵoj, preterpasante restoracion. Kiel korpika sento!” La sulko sur ŝia frunto fariĝis pli rimarkebla. Ŝi eligis poŝtukon el sia sino kaj kovrinte la buŝon tusadis kelkfoje. Post tio, ŝi daŭrigis kun amara rideto, “Lastatempe mi ofte tusadas. Ĉiunokte maldormo turmentas min. Kaj mi konstante sentas doloron en la koro.”

“Kuzino Mei, forgesu ĉion pasintan. Ne turmentu vin per ĝi. Vi devas bone zorgi pri via sano. Ankaŭ ni sentas bedaŭron pri vi, vidante vian feblan korpon,” diris Qin kun retenataj larmoj, premante sian korpon kontraŭ tiu de Mei.

Turninte sian kapon al Qin, Mei faris rideton kaj kapobalancis por esprimi sian dankemon al ŝi. Ŝi tamen malĝoje diris, “Kuzino Qin, vi konas mian temperamenton. Ĉio pasinta jam gravuriĝis en mian cerbon. Vi ankoraŭ ne scias, kiamaniere mi pasigas miajn tagojn. Ni ambaŭ havas similajn hejmojn. Krom patrino, mi havas unu pli junan fraton. Tuttage li okupiĝas pri preparado de siaj lecionoj por enira ekzameno de la lernejo, dum mia patrino aŭ ludas maĝangon aŭ faras vizitojn. En la ĉambro nur mi sola restas kaj legas poemojn por pasigi la tempon. Mi eĉ

ne povas havigi al mi personon, kiu interbabilus kun mi kaj aŭskultus miajn plendojn. Je la vido de falanta floro kaj malkreskanta luno, mi sentas korpikon kaj larmas. Ĉio ĉi vekas ĉe mi malagrablajn rememorojn. Jam pasis proksimume unu jaro, de kiam mi forlasis la hejmon de mia mortinta edzo kaj revenis por loĝi kune kun mia patrino. Antaŭ mia fenestro kreskas platano. Kiam mi foriris por edziniĝi, ĝi ekŝosis. La folioj plimultiĝis kaj densiĝis, formante grandan ombrelon. Aŭtune ili fariĝis flavaj kaj falis en la vento. Kiam mi revenis al ĉi tiu urbo, la arbo fariĝis nuda. Mia stato similas tiun de la arbo. Mia tempo por kreskado de abundaj folioj jam forpasis kaj mi nun drivas kiel falantaj folioj en vento ... Pluvegis tra la nokto antaŭ tri tagoj. En la lito mi turniĝadis kaj ne povis endormiĝi. Pluvgutoj tamburis sur la tegmento kaj fenestroj. En la malhela lamplumo, mi pensis pri du versoj el poemo:

La pluvo kaj vento min pelas

al rememoroj sonĝsimilaj ...

Pensu, kiel malĝojiga sceno!... Vi ĉiuj havas morgaŭon, sed kie estas mia morgaŭo? Mi havas nur hieraŭon. Kvankam la hieraŭaj aferoj vundis mian koron, mi tamen trovas konsolon nur el ili.” Ĉe tio ŝi abrupte ŝanĝis sian tonon kaj demandis Juemin kaj lian fraton, “Ĉu via Granda Frato fartas bone?”

Juemin kaj lia frato atente aŭskultis ŝin kaj tre kortuŝiĝis. Aŭdinte ŝian abruptan demandon, ili ŝajnis nekomprenemaj kaj ne povis tuj respondi.

Juehui, pli lerta en pensado ol Juemin, lakone respondis, “Bone. Li diris, ke li jam vidis vin.” La respondon nur Mei komprenis. Qin kaj Juemin rigardis lin mirigite.

“Jes, ni jam renkontiĝis. Je la unua vido mi tuj rekonis lin. Li havas iom pli maljunan aspekton ol antaŭe. Eble li riproĉus min pro tio, ke mi ignoris kaj evitis lin. Mi deziras, sed mi timas vidi lin. Tiam mi timis, ke nia interbabilado vekos memorojn ĉe li kaj kaŭzos malĝojon al mi mem. Krome, mia patrino estis tie., .. Ĵus li venis ĉi tien. Mi aŭdis lin paroli, sed mi ne kuraĝis rigardi lin eĉ tra la fendo de la pordo. Nur kiam li foriris, mi ŝtele rigardis lian dorson.”

Juehui diradis “neeble” kiel respondon al ŝia aserto “eble li riproĉas min”.

Pro la malĝojo de Mei, Qin admonis, “Ne menciuj tiujn malĝojigajn aferojn. Mi timis, ke vi sentas vin malĝoja dum la Novjara Tago, tial mi invitis vin al mia hejmo por nin distri . Sed male, mi tute ne atendis, ke tio vekis ĉe vi pli multe da malĝojaj rememoroj. Estas mia kulpo, ke mi kondukis ilin por renkontiĝi kun vi.”

La malĝojo de Mei malkreskis. Kvankam ŝi ankoraŭ iomete kuntiris siajn brovojn, la malhela nubo jam malaperis de ŝia vizaĝo. Ŝi diris kun rideto, “Ne gravas. Post kiam mi elverŝis tiom da vortoj, mi sentas min iom pli facila. Dum ordinaraj tagoj mi ne povis trovi babilantojn. Cetere, babilado pri pasintaj aferoj ĝojigas min.” Fine ŝi, per afabla

tono, petis detalajn informojn de Juemin kaj Juehui pri ties Granda Frato kaj lia edzino.

*Kotoŭi — riverenci surgenue por esprimi altan respekton.

16

Jam pasis la dek-unua horo, kiam Juemin kaj Juehui forlasis la hejmon de Qin. La stratoj ankoraŭ estis movoplenaj. Paŝante sur la ŝtonplata pavimo de la strato kaj rigardante la butikojn kaj restoraciojn prilumigitajn per kandeloj ili sentis sin multe faciligitaj. La ĵusa okazaĵo jam pasis kvazaŭ malgaja songo.

Ili nur silente iris per grandaj paŝoj, intencante atingi sian hejmon kiel eble plej frue.

Nemalproksime de sia hejmo, kiam ili transiris la vojkruciĝon, ili vidis nigran figuron renkonte al ili. Kun klinita kapo, la figuro malrapide preterpasis ilin, ne ĵetante rigardon al ili.

“Ĉu tiu ne estas Jianyun?” Juehui mirigite diris al Juemin. Turninte sian kapon, Juehui vokis, “Jianyun!”

Tiu haltis kaj levis sian kapon por rigardi. Konstatinte ke estas ili, li alpaŝis kaj diris en ĝoja surpriziĝo, “Ĉu estas vi?”

Ili staris vizaĝo al vizaĝo en la mezo de la strato.

Juehui demandis Jianyun, “Kien vi iras?”

Jianyun faris pretervolan rideton kaj respondis, “Mi faras promenadon surstrate. Ĉar mi solece restis en la ĉambro, mi elvenis promeni. Mi volus iri al via hejmo por prezenti bondeziron, sed mi timas...” Li retenis la vortfluon.

Tiaj vortoj ne estis konvenaj dum la ĝojiga festo. Sed Juemin kaj

Juehui lin komprenis. Kiam li ne sentas solecon en la malprospera hejmo de la onklo?

Tirante lin ĉe la maniko, Juehui demandis, “Kial vi ne iras al nia hejmo? Nun iru kune kun ni. Vi povas loĝi en nia hejmo kelkajn tagojn. Postmorgaŭ fratino Qin venos vivi ĉe ni.”

Je aŭdo de la nomo de Qin, Jianyun montris rideton sur sia longa kaj malgrasa vizaĝo. Li jesis kaj ekiris kune kun ili.

La tri junuloj turnis sin en la kvietan straton. Tretinte restaĵojn de petardoj sur la tero, ili eniris la pordegon de la familio Gao kun la du ŝtonaj leonoj ĉe ambaŭ flankoj kaj kun paro da ruĝpaperaj lanternoj brilantaj ĉe la tegmentrando.

Ene la pordklapoj de la pordista ĉambro estis plene malfermitaj. En la malforta lamplumo, servistoj kaj palankenistoj brue ĵetis kubojn ĉirkaŭ la tablo. Servisto Yuan Cheng fumis tabakon ĉe la pordo. Rimarkinte, ke ili eniras, li ridetante salutis, “Dua kaj Tria Sinjoridoj, jen vi revenas.”

Kiam ili iris internen, ili vidis ankaŭ la grandan pordon de la ĉefhalo plene malfermita. Sub la brila lumo, ankoraŭ amaso da personoj, viraj kaj inaj brue ĵetis kubojn ĉirkaŭ la tablo. Preskaŭ ĉiuj anoj de la pli aĝa generacio estis tie. El ili, ilia kvina onklo Keding kaj sinjorino Wang plej bruis.

La tri junuloj direktiĝis al la ĉefhalo. En iliajn orelojn penetris la

disonanca tintado de moneroj kaj ĵetkuboj en la bovlo, miksata kun ridoj kaj voko. Antaŭ ol ili suriris la ŝtonan ŝtuparon antaŭ la ĉefhalo, Keding subite elkuris el la ĉambro, ridante kaj vokante. Vidinte Jianyun, li haltis kaj interŝanĝis kelkajn salutvortojn. Jianyun siaparte diris bondeziron al li kaj poste eniris la ĉambron kaj riverencis al ĉiuj ĉeestantoj. Keding invitis Jianyun al hazardludo kaj li fine partoprenis post kelkfoja pretekstado. Sonoj de kubĵetado daŭre tintis kaj moneroj daŭre flugis tien kaj tien. Juemin jam reiris al sia ĉambro. Juehui volis reteni Jianyun, sed pro tio, ke tiu mem volis kaj cetere estis nedece fari malinstigon antaŭ la pliaĝuloj, li retiriĝis el la ĉefhalo. Malĝoja, li pensis en si: “Jen mi trovis ludanton por vi.”

Preterpasante la fenestron de Juexin, Juehui aŭdis klakadon de magangpecoj. Li turnis sin en la koridoron kaj eniris en la ĉambron de Juexin. Li restis tie por kelka tempo, rigardante Ruijue kaj aliajn ludi maĝangon. Post tio, li reiris al sia ĉambro .

Juemin skribis sur la kvadrata tablo. Vidinte, ke Juehui eniras, li tuj demetis la plumon kaj fermis sian taglibron. Li ridetis, rigardante Juehui.

“Kian sekreton vi kaŝas de mi?” Juehui moke diris. Preninte libron en la anglo de sur la tablo, li kuŝiĝis sur la lito kaj laŭte legis.

“Kial vi legas dum la antaŭvespero de la Novjara Tago? Kia abomenaĵo!” Juemin grumblis, ĉar la legado ĝenis lian pensadon kaj li ne

plu povis trankvile skribi.

“Bone, skribu sola!” Juehui stariĝis de la lito, metis la libron sur la tablon kaj kolere eliris. Tuj kiam li transiris la sojlon, sonoj de kubĵetado, monerĵetado, ridado kaj babilado vente alflugis al li. Starante sur la ŝtuparo, li rigardis la homojn ridi kaj movigi kvazaŭ en prezentado de teatraĵo.

Subite li sentis solecon. Ĉio ĉi ŝajnis tre malproksima de li. Li estis ĉirkaŭata de malvarma aero kaj subpremata de sennoma melankolio. Neniu montris simpatian aŭ zorgon al li. En tiu stranga medio, li ŝajnis izolita. Li des malpli komprenis tiun strangan medion. Vere, kiel junulo, li ne povis solvi tiun enigmon. Tra lia cerbo laŭvice fulmis la antaŭvesperaj scenoj de pasintaj Novjaraj Tagoj, dum kiuj li ĝoje kaj sindone ridis, ludis kartojn, ĵetis kubojn kaj sin amuzis kune kun siaj gefratoj. Li neniam sentis solecon. Sed nun li tute aliiĝis. Kvazaŭ starante en alia mondo, li rigardis aliajn ridi kaj sin amuzi.

“Ĉu la homoj aŭ la medio ŝanĝiĝis?” li sin demandis. Li mem ne havis definitivan respondon. Li tamen sentis, ke li kaj lia granda familio disiĝas en kontraŭaj direktoj kun ĉiu tago. Samtempe, kiam li memoris tiujn vortojn pri “pura akvo kaj kota akvo” diritajn de maljuna servistino Huang, li sentis sin pikita en la koro.

Por kvietigi sian tumultantan koron, li malsupreniris de la ŝtuparo kaj ĉirkaŭvadis sencele sur la senbaraj vojetoj. Li eniris koridoron kaj pluiris.

Iom post iom la sonoj de ridado kaj babilado malproksimiĝis de li. Li haltigis siajn paŝojn kaj subite trovis sin sub la fenestro de Shuhua. Trans la ĝardeno estis la brile lumanta loĝejo de lia kvara onklo Ke-an. En la ĝardeno staris pergolo de visterio. Li iris tien kaj sidiĝis sur la apogseĝo sub la fenestro. Senmotive li rigardis diagonale la kuirejon, ĉe kies pordo iris kelkaj servistinoj

En la ĉambro de Shuhua iuj babilis. Kvankam la voĉoj estis tre mallaŭtaj, li tamen distingis tre konatan voĉo. "Oni diras, ke unu el ni ambaŭ estos elektita..." La paolanto estis Wan-er, servoknabino de la tria familibrando. Kun longforma vizaĝo, ŝi estis svelta, rapidema en parolado kaj pli aĝa ol Mingfeng je unu jaro.

Tiuj vortoj venis subite kaj altiris la atenton de Juehui. Li pensis, ke neordinaraj vortoj sekvos, kaj li aŭskultis retenante sian spiradon.

"Sendube vi estos elektita, ĉar vi estas pli aĝa ol mi," dirante, Mingfeng ŝprucigis sian ridon.

"Mi diras tion al vi serioze sed vi priridas min. Kia maldankemo!" kolere diris Wan-er.

"Ĉar vi havas bonŝancon kaj mi gratulas vin, kial vi konsideras min maldankema? Mingfeng ridetante diris.

"Kiu voluntas fariĝi kromedzino?" Wan-er des pli koleriĝis kaj ŝia voĉo plenis je ĉagreno.

"Estas ne malbone fariĝi kromedzino. Ankaŭ sinjorino Chen estas

kromedzino de Grandsinjoro...” diris Mingfeng.

“Vi ja havas pikan langon. Atendu kaj vidu, kiun el ni ili elektos. Aŭ mi aŭ vi. Vi ne estu tiel certa, ke vi eskapos el tiu elekto,” Wan-er kontraŭdiris pro senrimedeco.

Juehui preskaŭ aŭdigis krion, sed li tuj regis sin kaj pli atente atendis la respondon de Mingfeng.

Mingfeng mutiĝis, eksciante, ke tio ne estas ŝerco. Ŝi silentis longan tempon. En la ĉambro aŭdiĝis nur regula kaj malrapida tiktakado de la murhorloĝo. Juehui malpacienciĝis, sed li ne volis foriri .

“Se ili vere elektos min, kion mi faru?” Mingfeng diris senespere.

“Vi povos fari nenion alian krom obei, ĉar ni havas malbonan sorton,” Wan-er diris malĝoje.

“Ne, ne ! Mi ne povos obei. Mi ne povos obei ! Mi preferas morti ol fariĝi kromedzino de tiu maljunulo!” ŝi kriis malĝoje, kvazaŭ jam alfrontante fakton. Ŝia voĉo trista kaj tremetanta elflugis el la fenestro.

“Ne maltrankviliĝu. Ni povos elpensi kontraŭrimedon kaj tiam ni ankaŭ povos peti helpon de ŝia sinjorina moŝto. Eble tio ne estas vera. Eble iu fabrikis tion por timigi nin,” Wan-er mallaŭte konsolis, aŭdinte la plendojn de Mingfeng. Ŝi jam kvietiĝis. Konsolante, ŝi ankaŭ pensis pri sia propra sorto.

Juehui sidis senmove sur la apogseĝo sub la fenestro, forgesante la malfruan horon kaj ignorante la ŝercadon kaj ridadon de servistinoj kaj

kuiristo en la kuirejo. Sub la fenestro de lia kvara onklo Ke-an, servistinoj de tempo al tempo ir-reiris, tenante ambaŭmane bovlojn kaj telerojn. Ili rapide iris, ne donante rigardon al li. Alflugis kruda ridado el la kuirejo.

“Ŝajnas al mi, ke vi jam enamiĝis al iu, ĉu ne?” Wan-er flustre demandis Mingfeng, mildvoĉe kaj malrapide.

Tiu ne respondis. Wan-er plu demandis mallaŭte, enplimilda tono, “Ĉu vi jam enamiĝis al iu? Lastatempe via konduto estas stranga. Kial vi ne diras la veron al mi? Mi ne malkaŝos al aliaj, kion vi diras al mi. Ĉar ni traktas nin kiel fratinoj, kial vi tenu sekreton de mi?”

Mingfeng honteme flustris kelkajn vortojn ĉe ŝia orelo. Kvankam Juehui atente aŭskultis, li tamen ne klare aŭdis, kion ŝi diris.

“Al kiu? Diru al mi!” Wan-er mallaŭte demandis kun rideto. Juehui surpriziĝis. Li malpacience atendis la respondon de Mingfeng.

“Mi ne diros al vi,” sonis la tremetanta voĉo de Mingfeng.

“Gao Zhong?” Wan-er insiste demandis. Gao Zhong estis juna servisto, kiu laboris por Keding. Juehui eligis faciligitan elspiron kaj la ŝtono sur la koro defalis.

“Li? Ba ! Kial mi enamiĝu al li? Ŝajnas, ke li amindumas vin, tamen vi ne nur ne konfesas, sed ankaŭ akuzas min pri enamiĝo.” Mingfeng eksplodis per rido.

“Mi demandas vin kun bona intenco, sed viaflanke vi diras tian

absurdaĵon ! Kia impertinentulino!” Wan-er ŝin riproĉis. “Ĉu vi estas certa, ke Gao Zhong ne enamiĝis al vi?”

“Bona franjo, ne plu diru sensencaĵojn. Ni parolu serioze,” Mingfeng petis. Poste ŝi mallaŭtigis sian voĉon, “Vi ne scios, ĉar mi neniam eldiros lian nomon. Nur mi scias.” Je mencio de “li” , ŝi ŝajne ekhavis protektantan forton. Ŝi ne plu timis kaj ŝiaj vortoj turniĝis en plezuran flustron. Ŝi trovis senliman ĝojon en la pura amo.

Ilia interparolo mallaŭtiĝis kaj poste fariĝis flustro miksata kun ridoj. Kvankam Juehui atente aŭskultis, li tamen ne povis kapti ĉiujn vortojn. Li scias, ke Waner elverŝas sian koron. Dum la interparolado alflugis la voko, “Wan-er!” Estis la voĉo de servistino Wang.

Malgraŭ sia kelktempa vokado, Wan-er ne respondis. Ŝi absorbiĝis en la interparolo. Poste la vokado pli kaj pli proksimiĝis, kvazaŭ la vokanto tuj enirus en la ĉambron. Wan-er, ĉesinte paroli, stariĝis kaj grumblis, “Ili vokadas min tuttage. Eĉ dum la festtagoj mi ne havas liberan tempon.” Post tio ŝi eliris.

En la ĉambro restis Mingfeng sola. Ŝi silente sidis senmove. Juehui stariĝis kaj genufleksis sur la seĝo. Premante sian vangon al la fenestra papero, li faris truon en la papero kaj enrigardis tra ĝi. Mingfeng, sidanta en kanseĝo, plantis siajn kubutojn sur la tablo kaj apogis siajn vangojn per la manplatoj, kun la etfingro de la dekstra mano en la buŝo. Ŝi absorbite rigardis la stanan lampon, kies subtenilon volvis cipresaj branĉetoj

kaj grapoloj de arakidoj.

Subite ŝi eligis vesperon kaj diris, “Kio okazos estonte?” Ŝi ripozigis sian kapon sur la tablo.

Sinforgese Juehui malpeze perfingre frapis kelkfoje sur la vitropeco en la mezo de la fenestro. Neniu respondo. Li faris ankaŭ du pli pezajn frapojn kaj mallaŭte vokis, “Mingfeng, Mingfeng.”

Levinte sian kapon, Mingfeng surprizite ĉirkaŭrigardis, sed vidis nenion. Ŝi vespiris, “Mi ĵus sonĝis. Ŝajnis al mi, ke iu vokas min.” Premante la tablon per la manoj, ŝi malvigle stariĝis. La lamplumo projekciis sian figuron de matura knabino sur la kulvualon.

Juehui faris pli rapidajn frapojn kaj kelkfoje vokis. Tiumomente Mingfeng rimarkis, de kie la voĉo venas. Ŝi rapidis al la seĝo ĉe la fenestro kaj oblikve genuiĝis sur ĝi. Apogante duonon de sia korpo kontraŭ la tablo, ŝi demandis, “Kiu vi estas?”

“Estas mi,” Juehui respondis mallaŭte. “Levu la kurtenon. Mi volas demandi vin pri io.”

“Estas vi, Tria Sinjorido?” Mingfeng mirigite rekonis la voĉon. Ŝi rullevis la paperan kurtenon kun flora desegnaĵo kaj vidis la streĉitan vizaĝon de Juehui premitan kontraŭ la fenestra vitropeco. Ŝi surprizite demandis, “Kian aferon vi havas?”

“Mi jam aŭdis, kion vi ĵus diris...”

Ŝi interrompis la parolon de Juehui kaj diris kun paliĝinta vizaĝo, “Ĉu

vi aŭdis ĉion, kion ni diris? Ni parolis nur por ŝerci unu kun la alia.”

“Nur por ŝerci unu kun la alia? Ne trompu min. Se vi vere estos elektita iun tagon, kion fari tiam?” diris Juehui ekscitite.

Mingfeng stulte rigardis lin kaj silentis longan tempon. Larmoj perlis de sur ŝiaj vangoj, sed ŝi ne forviŝis ilin. Decidinte en la koro, ŝi firme diris, “Mi ne obeos ! Mi certe ne edziniĝos al aliulo. Mi ĵuras al vi!”

Li haste premis sian manon sur la vitropecon kvazaŭ por kovri ŝian buŝon, dirante, “Mi kredas vin. Ne faru ĵuron.”

Kvazaŭ subite vekiĝinte el sonĝo, ŝi frapis la vitropecon de interne kaj urĝe petis, “Tria Sinjorido, bonvolu tuj foriri. Oni vidos nin kunesti.”

“Diru al mi la detalojn, alie mi ne foriros,” li insistis .

“Bone, mi diru. Sed post tio vi devas foriri, mia bona sinjorido...” ŝi konfuzite diris.

Juehui kapjesis ekster la fenestro.

“Oni diras, ke Grandsinjoro Feng volas preni kromedzinon. Lia edzino vizitis nian Grandsinjoron. Ŝi diris, ke ni servoknabinoj ĉiuj havas belan vizaĝon, kaj ŝi petis de li unu knabinon. Laŭdire nia Grandsinjoro elektos unu el la servoknabinoj de la unua aŭ la tria familibrando. Wan-er informiĝis pri tio de sia Sinjorino kaj ŝi diris al mi. Rilate al nia penso, vi jam aŭdis ... Bona sinjorido, bonvolu tuj foriri, por ke oni ne vidu vin ĉi tie.” Post tio ŝi abrupte faligis la kurtenon kaj ignoris lin kiel ajn li frapis la vitropecon kaj vokadis. Ŝi ne plu levis la paperan kurtenon.

Senrimeda, Juehui descendis de sur la seĝo. Starante sur la ŝtuparo, li pensis pri multaj aferoj. Kvankam li fikse rigardis la kuirejon, li nenion vidis.

En la ĉambro Mingfeng ankoraŭ genuis en la seĝo. Aŭdinte nenian sonon kaj pensante, ke li jam foriris, ŝi zorgeme rullevis la kurtenon kaj elrigardis. Kiam ŝi vidis ke Juehui ankoraŭ staras tie, ŝi kortuŝiĝis. Ŝi tuj mallevis la kurtenon kaj frotis al si la okulojn.

17

Juehui reiris al sia ĉambro. En la ĉefhalo la kubĵetado jam ĉesis, tamen multaj personoj tie ankoraŭ laŭte babilis. La klakado de maĝangopecoj en la ĉambro de Juexin daŭris sed ne estis tiel laŭta kiel antaŭe. La ĉielo komencis paliĝi. La jaro finiĝis. La malnova jaro malaperis en la mallumo kaj la nova alvenis kun lumo.

Post nelonge, kiam Juehui eniris la ĉambron, ankaŭ Jianyun eniris. Li diris nenion kaj sidiĝis sur la seĝon ĉe la fenestro.

“Ĉu vi malgajnis?” Juehui demandis.

“Jes,” Jianyun malklare respondis kaj deturnis sian kapon.

“Kiom?”

“Ses juanojn,” respondis Jianyun deprimate.

“Tio ĝuste estas duono de via monata salajro,” diris Juemin, levinte subite sian kapon de super la skribaĵo sur la tablo.

“Jes ja,” Jianyun diris malĝoje, “mi intencis aĉeti kelke da anglalingvaj romanoj per tiu sumo.”

“Kial do vi partoprenis en la hazardludo? Mi volis reteni vin, sed mi timis, ke mi malĝojigos vin,” diris Juehui simpatie.

Ĵetinte rigardon al li, Jianyun plendis, “Mi scias, ke hazardludo estas sensenca. Ĉiufoje post hazardludo mi profunde pentis. Multfoje mi faris decidon ne plu hazardludi, sed kiam oni invitis min al vetludo, mi ne havis la kuraĝon por rifuzi...”

Ekstere eksplodis petardoj en ne tre proksima loko. Respondante, petardoj krakis ankaŭ en pluraj kortodomaroj. Ekster la fenestro aŭdiĝis paŝbruo. Vokado de Onklo Keding al servisto Su Fu alflugis el la ĉefhalo.

“Estas preskaŭ la horo fari oferadon al la dioj,” diris Juemin, ferminte sian taglibron. Kun seriozo li metis ĝin en la tirkeston de la skribtablo kaj ŝlosis ĝin. La elektra lampo, kiu brilis esceptokaze tra la nokto, paliĝis en la griza taglumo enpenetranta tra la fenestro.

Juemin eliris la unua. Li levis la kapon kaj vidis la malhele bluan ĉielon. Ondo da frosta aero renkonte atakis lin. Kuntirinte siajn ŝultrojn, li alrapidis al la ĉefhalo. Kiam li preterpasis la fenestron de la maldekstra ĉambro, li vidis multajn tetasojn kun ruĝa desegnaĵo sur la kvadrata tablo. Servistoj Yuan Cheng, Su Fu, Wen De, Zhao Sheng kaj Li Gui verŝis teon en la tasojn kaj portis po ses tasojn en pleto al la ĉefhalo. Tie Kerning kaj Ke-an transmetis ilin sur la altaron.

Ĉiuj tetasoj estis pretaj, tamen la familianoj kolektigintaj en la ĉefhalo ankoraŭ atendis moĉion alportotan el la kuirejo. Atendante, ili, kun lacaj ridetoj, malvigle babilis pri okazaĵoj dum la kubĵetado kaj maĝangludado. Iuj, starante apud la arde brulanta hibaĉo, etendis la manojn super gi por varmigi. Grandsinjoro, kiu jam ellitiĝis, laŭte tusadis en sia ĉambro.

Ankaŭ Juehui kaj Jianyun eliris el la ĉambro. Ili babiladis, starante ĉe la sojlo kaj rigardante la scenon en la ĉefhalo.

La ĉielo paliĝis iom post iom. Kiam venis la tempo fari oferadon al la

dioj, Juehui forlasis Jianyun kaj eniris en la ĉefhalon. Pro tio, ke Juequn diris malbonaŭgurajn vortojn en la ĉefhalo, Grandsinjoro skribis la frazon “Knaba parolo ne detruas bonŝancon” sur ruĝa paperslipo kaj algluis ĝin sur la fosto de la hala pordo. Vidinte ĝin, Juehui nereteneble kaŝridis.

Ekster la halo petardoj komencis eksplodi. Tri cenoj da petardoj estis bruligitaj sinsekve. Post kiam ĉiuj finis riverenci, la krakado de petardoj ankoraŭ ne ĉesis, sed jam plene tagiĝis.

En la matena krepusko Juexin kaj liaj tri onkloj denove palankenis por fari vizitojn kaj prezenti Novjarajn salutojn. La virinoj de la familioj, tretante restaĵojn de petardoj, eliris tra la pordego kun ĝojaj ridoj kaj suriris la straton. Tio estis la malnova kutimo.

“Iri eksteren”, kiu okazis unufoje en ĉiu jaro. Ĉar nur tiumomente en la jaro ili havis ŝancon aperi senkaŝe sur la strato, ili ĉiuj scivole satĝuis la kvietan straton en la matena nebulo. Ili ŝajne emis resti sur la strato, sed, timante renkonti fremdajn virojn, ili rapide reins en la kortodomaron. La eksplodoj de krakfajraĵoj cesis kaj la ridoj malaperis. La strato denove dronis en momenta kvieto.

La grava tempo de la tago forpasis. En la domaro la plejparto de la familianoj baldaŭ enlitiĝis, ĉar ili maldormis tra la tuta nokto kaj ne plu povis elteni la lacon. Iuj kiel Juexin kaj Kerning ne enlitigis pro tio, ke ili devis zorgi pri kelkaj aferoj. Kaj iuj kiel Juemin kaj lia frato dormis

ĝis la tempo por vespera oferado al la dioj, eĉ forgesante tagmanĝi.

La festaj tagoj de la lunkalendara Novjaro forpasis seninterese. Ĉiujare dum tiuj tagoj oni havis preskaŭ la saman programon difinitan. En la domaro regis hazardludado kaj klakado de maĝangopecoj. Dum tiuj tagoj la tintado de kubĵetado neniam ĉesis de mateno ĝis nokto. Jianyun, kiu opiniis hazardludon sensencaĵo, ofte partoprenis en ĝi. Por plezurigi aliajn, li senhezite faris tion, kion li mem ne volis. Li spertis kaj malgrandan malĝojon kaj malgrandan ĝojon. Finfine li gajnis la monsumon, kiun li antaŭe perdis.

La duan tagon de la unua monato Qin kaj ŝia patrino venis al la familio Gao por prezenti Novjaran saluton. Sinjorino Zhang loĝis tie nur tri tagojn, tamen ŝi konsentis, ke Qin restu tie ĝis la dek-sesa tago de la monato Qin alportis al la juna generacio nemalmulte da plezuro. Tuttage ili multe sin amuzis per ludoj kaj interesaj rakontoj en la ĝardeno. Neniu ĝenis ilin. Kelkfoje ili ĵetis kubojn en la pavilono ĉe la lago. Tiu, kiu gajnis monon en la ludo, sendis serviston por aĉeti vinon kaj frandaĵojn per la gajnita mono. Ili starigis malgrandan fornon en la ĝardeno por prepari mangaĵojn. Ruijue, Shuying kaj Qin lerte kuiris. Tial ili tri alterne preparis mangaĵojn kaj aliaj helpis ilin laŭbezone. Ili portis la preparitajn mangaĵojn en la pavilonon aŭ alian kvietan lokon, kie instaliĝis tablo. Dum manĝado ili gaje faris vinludon.

Iun tagon venis gasto, kiun Qin invitis. Ŝi, kunlernantino de Qin,

nomiĝis Xu Qianru. Ŝia hejmo situis oblikve kontraŭ la kortodomaro de la familio Gao. Ŝi estis graseta kaj havis dek ok aŭ dek naŭ jarojn, ŝi kondukis senafekte kaj malkaŝeme, en la maniero de moderna lernantino. Kiel Qin, ankaŭ ŝi soife esperis, ke la lernejo de Juemin enskribos knabinojn. Tial ŝi havis inklinon amikiĝi kun ili. La patro de Qianru estis ano de la Societo Tongmenghui*. Dum siaj junaj jaroj li studis en Japanio. Poste li redaktis ĵumalon kontraŭ Qing-dinastio. Li ankaŭ studis kemion en Germanio. Nun li oficis kiel funkciulo en la Buroo de Fremdlandaj Aferoj de Provinca Registaro. Lia penso estis pli avangarda ol ĉe ordinaraĵoj. Ankaŭ ŝia patrino studis en Japanio. La patrino mortis antaŭ kvin jaroj, sed la patro rifuzis reedziĝi. Tial en la hejmo estis nur solfilino kaj maljuna mamnutristino, kiu prizorgis ŝin ekde ŝia naskiĝo. Kreskinte en tia medio, Qianru kompreneble rimarkinde diferencis de Qin en temperamento.

Jianyun ankoraŭ restis en la hejmo de la familio Gao kaj loĝis en la ĉambro de Jueying. Dum tiuj tagoj ankaŭ li sentis sin pli ĝoja. Kvankam Juemin traktis lin relative flegme, tamen Juexin, Juehui, Jueying kaj aliaj sin tenis amike al li.

La okan tagon de la monato, post du-tri-taga aranĝado, la junuloj invitis la pliaĝulojn ĝui artfajran spektaklon en la ĝardeno. Ne povinte rezisti al ilia entuziasmo, ĉiuj venis, escepte de la avo, kiu rifuzis la inviton, ĉar li ne povis elteni la noktan froston.

La invititoj eniris la ĝardenon. Dekstre ĉiuj elektraj lampoj en la klostro jam estis lumigitaj . Inter bambuoj pendis malgrandaj lanternoj ruĝaj, verdaj, flavaj kaj alikoloraj. Elektraj lampoj instaligis ankaŭ sur la balustradoj ĉe ambaŭ flankoj de la ŝtona ponteto, kiu speguliĝis en la akvo, kvazaŭ lunarko brilanta. Fine ili atingis la pordon de la pavilono “Aromo ce Vesperiĝo”. Sub la tegmentrando en ruĝaj lanternoj kun verdaj franĝoj, brulantaj kandeloj eligis palan ruĝan lumon, donante fantaziecon al la medio, kvazaŭ en sonĝo.

Ili ĉiuj sidigis en la supra etaĝo kaj dekelkaj geservistoj alportis teon kaj nargileojn al ili. Sidante antaŭ la larĝe malfermitaj fenestroj, ili povis okule ĉirkaŭpreni ĉion eksteran. Tamen escepte de kolore lumigitaj vidaĵoj en la proksimo, etendiĝis nur vasto de nedistingebla mallumo, en kiu sporade flagris koloraj punktoj kaj kelkloke videblis brila lamplumo.

“Kie estas artfajraĵoj? Vi ree trompas min,” sinjorino Zhou ridetante diris al apudaj Qin kaj Ruijue.

“Atendu momenton. Kiel mi kuraĝus trompi vin, onklinon?” respondis Qin kun rideto. Turninte sian kapon, ŝi trovis, ke Juexin, Juemin kaj iliaj kuzoj ĉiuj forestas kaj Jianyun babilas kun Keming, Ke-an kaj Keding. La sinjorinoj senĉese bombardis Qianru per demandoj kaj ŝi senkaŝe kaj ĝoje respondis. Kvankam iuj demandoj estis sensignifaj al ŝi, ŝi tamen dons konvenajn respondojn laŭ sia opinio.

Escepte de la etaĝdomo, silento regis la ĝardenon. En la mallumo

aperis kvazaŭ iom pli hela peco da mallumo, de kie venis akuta sono kaj brile ruĝa lumstrio tranĉis la mallumon, leviĝis alten kaj subite diseriĝis en multajn maldikajn falantajn orfadenojn. Tuj poste, brilaĵo simila al anserovo pafiĝis en la aeron, eksplodis kun brua krakado kaj transformiĝis en sennombrajn arĝentajn florojn dise flugantajn. Post tio, blua lumstrio rekte soris, sanĝis sian koloron en la aero, kaj verdaj pluveroj sekvis ruĝajn. Kiam la verdaj pluveroj malaperis, malhele verda koloro prezentiĝis antaŭ la okuloj de la rigardantoj. Shufen premis sin al la korpo de sia patrino sinjorino Wang kaj haharidis, kriante, “Bele, bele!”

“Kia spektaklo!” admiris sinjorino Zhou kun rideto al Qin sur sia ronda vizago. “Kie vi aĉetis ilin?” ŝi demandis.

Ridetante, Qin fingromontris al Qianru kaj diris, “Demandu ŝin, Onjo!”

Qianru respondis, “Mia patro havigis al ni laŭ mia peto.”

Denove verda lumstrio aperis en la mallumo. Leviĝinte en la aero, anstataŭ fali, ĝi faris cirklojn, senĉese ŝanĝante sian koloron, kaj poste subite malaperis kaj falis, oni ne sciis, kien. Samtempe levigis tri aŭ kvar inkandeskaj brilaĵoj. En la aero ili eksplodante eligis laŭtan bruon kaj tuj multaj arĝentaj floroj flirtis, prilumante la apudlagan pinaron kaj boatojn ĉe la transa bordo.

“Ho, ili bruligas artfajraĵojn en la boato. Mi ne plu miras, ke la

artfajraĵoj leviĝas de malsamaj lokoj,” diris sinjorino Wang al sia edzo Ke-an, kiu faris kapbalancon kaj ridetis.

La lageto estis absolute kvieta dum momento. Streĉante siajn kolojn, la rigardantoj ankoraŭ absorbite rigardis la nepenetreblan mallumon. Qianru paŝis al Qin kaj flustris kelkajn vortojn.

“Ĉu finiĝis?” laute demandis Keding kun bedaŭro.

Kiam li estis preta stariĝi, subite la supraĵo de la lageto lumiĝis. Krakante, multaj arĝente blankaj arbetoj ekfloris kaj tuj elkreskis el la akvo, ŝprucigante orajn floretojn. Post momento, la arbetoj malaltiĝis kaj la brila bildo iom post iom kreskis ĝis neniigo. Antaŭ la okuloj de la supraetaĝaj rigardantoj vizie ankoraŭ restis orbrila sceno. Tamen post kelka tempo ĉio denove kvietiĝis kaj regis nur vasta nepenetrebla mallumo.

Subite la aero ektremetis kaj melodio de fluto ŝvebis de la bordo, akompanate de dukorda muzikilo, kies tono estis tre malalta. La klara kaj belsona melodio de la fluto ŝajnis rakonti belan okazaĵon. Ĝi alflugis en la etaĝdomon, penetris en ĉies koron kaj liberigis ĉiujn de la bagatelaj zorgoj. La melodio ankaŭ revekis ĉe ĉiuj ĉeestantoj ĉarmajn revojn, kiujn ili jam nutris. La aŭskultantoj silente ebriiĝis en rememoroj, kun la fluta melodio mole ŝvebanta ĉirkaŭ iliaj oreloj.

“Kiu ludas la fluton? Kiel lerte!” sinjorino Zhou admire demandis Qin, kiam la melodio estis proksima al finiĝo.

“Nia fraŭlino Shuying,” tuj respondis servoknabino Wan-er, kiu plenigis la forneton de nargileo per tabako por sinjorino Zhou. Aŭdinte la laŭdon, ŝi sentis ĝojon por sia fraŭlina mastro.

“La ludanto de la dukorda muzikilo estas Juexin,” aldonis Qin.

Je finiĝo de la fluta muziko, leviĝis manklakado kaj ĝoja ridado en malproksimo. Tamen tiuj sonoj, frapiĝinte kontraŭ la akvosurfaco, disiĝis kaj sub akviĝis. Pere de venteto, nur malmultaj mallaŭtaj sonoj elflugis kaj alblovis en la pavilonon. En la aero la postvivanta muziko de la fluto ankoraŭ drivis.

Denove leviĝis bela melodio de la fluto ĉi-foje gaja. Kun la fluta muziko, iu viro kantis. Lia sonora voĉo skuis la tutan nokton kaj dispelis la postvivantajn sonojn. La kanto vekis ĉies rememorojn. Ili rekonis la voĉon de Juemin.

La kantado ne daŭris longe kaj malaperis en la mallumo kune kun la flutmuziko. Post momento denove ekŝvebis la voĉo de Juemin, kiu kantis popularan kanton. Kiam li venis al la dua kantfrazo, multaj voĉoj, viraj kaj virinaj, akutaj kaj basaj, intermiksiĝis kaj kune leviĝis, formante kompleksan ĥoron. Tamen el la kantado, ĉiu voĉo rimarkeble distingiĝis. Eĉ la klara ina voĉo de Shuying ne kunfandiĝis kun la alta vira voĉo de Juemin. Ŝia kantvoĉo forte sin ĵetis al la pavilono, kunfrapiĝis kontraŭ ĉies vizaĝo, entrudigis kaj plenigis iliajn orelojn. La restanta voĉo impetis ĉien, kunfrapiĝante kontraŭ la kvar muroj kaj ŝajne

skuante la tutan etaĝdomon.

La kantado subite haltis. Sekvis eksplodo de ridegoj , kiuj karambolis unu kun alia. Iuj disrompiĝis en fadenajn erojn, neniam rekunigeblajn; novaj estigis, kuratingis tiujn, kiuj ankoraŭ ne disrompiĝis, kaj dispecigis ilin. La ĉeestantoj ŝajne sentis ridegojn karamboli, fuĝi kaj postkuri en la mallumo.

Ruĝaj kaj verdaj malgrandaj lanternoj komencis aperi, flosantaj unu post alia. Post iom da tempo lanternoj kovris la akvospacon, kiun la spektantoj fikse rigardis. Malrapide moviĝante, la lanternoj farbis la akvosupron per miraklaj variantaj koloroj, kiuj sensone drivis surakve. Subite la lanternoj rapide flankeniĝis, formante pasejon en la mezo. Denove leviĝis ridoj, iom malpli laŭtaj of antaŭe. Malgranda boato plena de ridoj malrapide alglitis kaj haltis ĉe la ponteto. Ridoj pli klare penetris en la etaĝdomon. Juexin kaj liaj fratoj surbordiĝis kaj la boato trapasinte sub la pontarkon malrapide veturis antaŭen. Ekster ĉies atendo venis alia boato, kiu ankaŭ haltis ĉe la ponteto. Kelkaj knabinoj — Shuying, Shuhua, Shuzhen kaj servoknabino Mingfeng — eliris el la boato, tenante lanternon en la mano.

La gejunuloj ascendis en la supran etaĝon kaj ĝi fariĝis ankoraŭ pli movoplana.

“Panjo kaj Tria Onklo, ĉu vi guis la spektaklon?” Juexin ridis kaj laŭte demandis.

“Ne malbone,” respondis Kerning, admire balancante la kapon.

“Vere interese,” Keding laŭte admiris “Morgaŭ vespere mi invitos vin spekti drakan dancon. Mi mem faros preparojn por bruligo de la drako.”

Jueying, kiu staris ĝuste malantaŭ lia dorso, aprobe manklakis la unua kaj ankaŭ ĉiuj gejunuloj ekmanklakis kune kun li.

Vere la artfajra spektaklo alportis multan ĝojon kaj kvazaŭ ĉielarko ornamis la vivon de la pli aga generacio. Sed post nelonge ĉio fariĝis pasinta okazaĵo. Nur la ĝardeno, kiel kutime, solece restis en la frosta kaj malluma nokto.

* Rudimenta organizo de Kuomintango.

18

Je la nova tago de la jaro la tri fratoj, Jueying, Juequn kaj Jueshi, estis multe okupitaj. De la mateno ĝis la nokto ili iradis tien kaj reen por rigardi servistojn fari fajroŝprucigajn tubojn kaj informiĝi pri la drakodanco.

Tiun matenon du palankenportistoj dehakis du dikajn bambuojn en la ĝardeno. Ili segis ilin en mallongajn pecojn, kiujn ili transportis en la ĉevalstalon. Aliaj palankenportistoj kolektiĝis tie kaj donis helpon al la farantoj de fajroŝprucigaj tuboj. Iuj skrapis bambutubojn, aliaj faris fuzeojn kaj triaj plenigis tubojn per pulvo kun pulvorigitaj kupraj moneroj — laŭdire, pro tiaspeca pulvo, flamoj el la tuboj brulos alkroĉiĝante al la homa korpo kaj ne defalos. Ĉiuj laboris kun granda fervoro por kontentigi kaj ĝojigi ĉiujn dum la nokto, kiam drakodanca ludado okazos. Baldaŭ dekelkaj fajroŝprucigaj tuboj estis pretaj. La palankenportistoj eksponis ilin en la pordista ĉambro.

Kiam vesperiĝis, Keding, post oferado al la dioj, ordonis al servistoj fari aranĝojn por drakodanca ludado. En la ĝardeno metiĝis kelkaj kvadrataj tabloj kun kelkaj seĝoj sur si kiel portempa spektejo. Keding mem sigelis paketojn da moneroj por donaci al la ludantoj de la drakodancado. Li kelkfoje iris eksteren por certiĝi, ĉu ili venas. Li ankaŭ sendis serviston al la strata ekstremo por informiĝi kie estas la ludantoj de drakodanco.

Kun tiel bona aranĝado, Keding opiniis, ke ĉio iros laŭ lia volo, ĉar li jam ricevis informon tage, ke la ludantoj alvenos. Kun trankvila koro, li reiris en la ĉambron kaj interbabilis kun aliaj familianoj.

Je la oka ankoraŭ neniuj sciigoj alvenis. Duonhoron forpasis kaj ludantoj ankoraŭ ne aperis, eĉ ne aŭdiĝis iliaj tamburado kaj gongado. “Kvina Onklo, kie estas la ludantoj?” Juequn kaj Jueshi malpacience demandis lin kvar aŭ kvin fojojn.

“Ili tuj venos,” li respondis. Kvankam li sentis sin iom maltrankvila, li tamen havis certecon en la koro. Shuying kaj ŝiaj fratinoj, kiuj atendis en la ĉefhalo, ridetante rigardis lin. Tirante lin je la basko, ankaŭ Shufen demandis lin, ĉu la ludantoj venos.

Kiam la horloĝo batis la naŭan, ankoraŭ ne montriĝis signo de la drakodancistoj. Ĉiuj sentis la intereson malkreskantan. Jianyun pensis pri lecionoj donotaj en la sekva tago, ne plu interesiĝis pri la ludo kaj diris ĝisrevidon al la familio. Lia foriro kaŭzis al Keding ankoraŭ pli grandan maltrankvilon.

“Ili ne venos,” Shuhua diris al Shuying, moken priirante Keding, kiu maltrankvile paŝadis tien kaj reen en la ĝardeno, de tempo al tempo elpoŝigante sian poŝhorloĝon. Li eliris longpaŝe, tamen li baldaŭ revenis sen ajna sciigo pri la ludantoj.

Je kvarono post la naŭa aŭdiĝis tamburado kaj gongado en malproksimo. “Ili venas!” Keding parolis al si faciligite.

Ĝuste tiumomente eniris servisto Gao Zhong. Vidinte lin kaj pensante pri la turmenta atendado, Keding eksplodis per insultoj, “Kia fripono! Kial vi perdis tiel longan tempon por informiĝi? Kien vi iris vin amuzi?”

Kun ambaŭ brakoj mallevitaj ; Gao Zhong rekte staris senparole dum longa tempo. Post kiam lia mastro elverŝis sufiĉe da insultoj, li malrapide respondis, “Mi atendis ĉe la stratfino longan tempon, sed nenia drakolanterno aperis. Mi trairis kelkajn stratojn, sed ankoraŭ ne vidis. Poste mi renkontis unu drakolanternon, kies ludantoj sendis informilon al ni hodiaŭ. Mi kaptis ilian ĉefludanton kaj insistis venigi ilin. Sed ili jam multe suferis de brulaĵoj kaj la drako jam fariĝis bambua skeleto. Ili neniel konsentis veni. Ili diris, ke ili devas reiri por flegi brulvundojn kaj ne volas veni kiom ajn multe da trinkmono oni donacos al ili. Mi povas fari nenion krom raporti al vi.”

Aŭdinte lian raporton, Keding pli koleriĝis kaj insultis, “Kia sentaŭgulo ! Vi kapablas nur manĝi. Vi eĉ ne povas venigi drakolanternon. Nun vi iru. Nun tuj iru kaj ĉiaokaze venigu unu, alie mi maldungos vin!”

Kvankam Gao Zhong servis en la kortodomaro nur tri aŭ kvar jarojn, li bone konis la temperamenton de la mastroj. Kiam ili koleriĝis, ili fariĝis senraciaj. Por sekure vivteni sin, la servistoj siaflanke povis fari nenion alian ol obei ilin. Kun mallevita kapo li ne kuraĝis kontraŭdiri kaj nur jesis respektplene. Kiam la mastro mansvinge foririgis lin, li

obeeme eliris sen vortoj .

La deka horo alproksimiĝis, sed drakolantemo ankoraŭ ne venis. Tute senesperigite, Jueying, Juequn, Jueshi kaj Shufen volis iri en sian ĉambron por enlitiĝi. Xu Qianru, ilia gasto, kiu loĝis en la oblikve kontraŭa rezidejo, diris ĝisrevidon kaj foriris. Keding malpacience kaj malgoje paŝadis tien kaj reen en la ĝardeno, ne sciante, kion li devas fari.

Kiam la horloĝo batis la dekan, Gao Zhong anhelante enkuris kaj balbutis, “Drakolanterno venas.” Keding efektive aŭdis tamburadon kaj gongadon en malproksimo kaj tio fariĝis pli kaj pli klara kaj laŭta. Ĝojo tuj alnaĝis sur lian vizaĝon. Gao Zhong parade diris al sia ĝojplena mastro, “Ili volis turniĝi en alian straton, sed mi insiste tiris ilin ĉi tien.”

“Bone, bone farite ! Rapide envenigu ilin,” Keding laŭdis lin kaj iris inviti siajn fratojn kaj bofratinojn rigardi la drakdancan ludadon. Fakte la novaĵon jam cirkuligis Jueying, Juequn kaj Jueshi. La du lastaj knaboj saltetis tien kaj reen pro ĝojo.

Post kvaronhoro la granda loĝejo animiĝis. Escepte de Grandsinjoro, ĉiuj familianoj kolektiĝis sur la provizora spektejo por rigardi la ludadon. Akompanate de tamburado kaj gongado, la drakolanterno eniris kaj haltis en la korto. Tiam la pordego jam estis fermita, por ke eksteruloj ne ŝteliru enen.

Kun sencesa tamburado kaj gongado la drako komencis svingiĝi. La

tuta drako konsistis el naŭ partoj el bambuaj lamenoj. En ĉiu parto kandelo brulis sub la papera ŝelo kun desegnitaj skvamoj. ĉiu parton subtenis unu ludanto per bambustango. Antaŭ la drako ludanto tenis globon kiel ĝian ludilon. La drako postkuris la globon, kiun oni tenis en la mano. Kun granda lerteco ĝi ĵen tumis la kapon ĵen svingis la voston, ĵen skuis la kapon. Ĝi ruliĝis dekstren kaj tuj leviĝis ; poste liven kaj rapide saltis, kvazaŭ vera drako fluganta en la aero. La tamburado kaj gongado plivigligis ĝian dancadon.

Subite petardoj eksplodis kun fajreroj ŝprucantaj en la aeron. La drako furioze turniĝadis. Eksplodantaj petardoj falis sur ĝian korpon kaj ĝi fuĝis ĵen dekstren ĵen maldekstren, saltante tien kaj tien surprizite. La bruo de la tamburoj kaj gongoj plifortiĝis, kvazaŭ la vundita drako hurlus en la aero.

La juna servisto Gao Zhong alligis longan ĉenon da petardoj al ekstremo de longa bambustango. Tenante la alian finon de la stango kaj starante sur eskalo apogita kontraŭ muro, li eksplodigis petardojn super la drako. Apude atendinte kelkan tempon, iuj palankenportistoj alterne bruligis fajroŝprucigajn tubojn celantajn al la nudaj korpoj de la ludantoj. La drako ekfuriozis kaj klopode ruliĝis sur la tero por eviti la alpaŝatajn fajrerojn al sia tremanta kaj ruliĝanta korpo. Homvoĉoj bruas kaj tamburado kaj gongado surdige sonis senĉese. La palankenistoj ekridis, same kiel la rigardantoj sur la improviza spektosidejo. Nature la

ridado de la lastaj estis ĝentila, ne kiel tiu de la antaŭaj. Poste, Wen De, Li Gui, Zhao Sheng kaj aliaj servistoj samtempe instalas kvin aŭ ses fajroŝprucigajn tubojn kaj celumis ilin al la ludantoj el kelkaj direktoj, tiel ke ĉi tiuj ne povis eviti. Tiu taktiko bone efikis. Kvankam la drako malespere ruliĝis tien kaj tien, la nudaj korpoj de la ludantoj estis trafitaj de sprucantaj fajreroj, el kiuj iuj tuj defalis kaj aliaj brulis sur la haŭto, tiel ke kelkaj ludantoj laŭte kriis pro doloro. Mallevinte siajn manojn, ili senmove staris, firme tenante la stangon kiel apogilon kaj lasis la palankenistojn pafi al ili per fajroŝprucigaj tuboj. Senhelpaj, ili forte skuis sian korpon, por faligi la fajrerojn algluiĝantajn surkorpe. La haŭto de iliaj korpoj jam ŝanĝis sian koloron. Je ektuŝo de la fajreroj la korpo eligis mallaŭtan sibladon kaj tremetis. Tiam spektantoj ekridis pli kontente. La pafantoj kun bruligitaj tuboj alpremiĝis al la ludantoj, volante, ke ĉi tiuj petu indulgon pro neeltenebla brulvundo.

La ludantoj havis fortikajn korpojn kaj fortajn brakojn, sed ili lasis sin sendefende brulvundiĝi per atakoj de la fajroŝprucigaj tuboj. Kvankam ili sentis doloron, ili nur eligis furiozajn kriojn, ŝajnigante sin spitemaj al la doloro por montri sian kuraĝon. Samtempe ili ankaŭ provokis, “Bruligu viajn fajroŝprucigajn tubojn disponeblajn!”

La fajroŝprucigaj tuboj atakis ilin de pli proksimaj lokoj. Finfine, ne povante elporti la doloron, ili disfuĝis. Tiel la majesta drako dismembriĝis en naŭ partojn. Ĉiu ludanto tenis unu el ili kaj kuris

tien kaj tien, sen konsidero pri siaj kunludantoj : La paperaj skvamoj de la drako jam defalis kaj ĝia tuta korpo — de la kapo ĝis la vosto — jam fariĝis skeleto pro la fajra atako.

Portante korpopartojn de la drako, iuj ludantoj kuris al la pordego tamen ĝi estis fume fermita kaj, ne povante eliri , ili devis rein spiteme en la korton. Sub la direktado de la mastro, Gao Zhong, Zhao Sheng kaj aliaj servistoj postkuris ilin, tenante fajroŝprucantajn tubojn. Sur la ebena placo ne estis arbo aŭ aliaj lokoj por ŝirmi. Iuj ludantoj rapidis al la interna pordo, kiu tamen estis ekrane barita de homa muro kun multaj kapoj videble moviĝantaj. Kaj tie Keding staris kun fajra tubo en la mano. Vidinte, ke fuĝantaj ludantoj, alpremiĝas, li ekbruligis la tubon kaj pafis fajrerojn en diversaj direktoj. La juna ludanto, kiu tenis la globon, estis trafita de la fajra atako de Keding, dum kuro al la interna pordo. Fajreroj ŝprucis sur lian korpon, tiel ke li tuj fuĝis kun trista ŝriko. Sed li ne povis ne retirigi sub la atako de servisto Wen De, kaj la junulo skuis sin kun la frunto kovrita de ŝviteroj. Tiumomente, celumante sian fajran tubon al la ludanto, kiu ludis la parton de la draka vosto, Keding subite vidis la globtenanton tremi apude. Li rikane diris, “Ĉu vi sentas malvarmon? Mi donu al vi fajron.” Li turnis la tubon al tiu. La junulo surprizigis kaj defendis sin per la paperkovrita globo, kiu estis ankoraŭ sendifekta . Ĝi ekflamegis kaj baldaŭ cindriĝis . La palankenistoj kaj servistoj jam

ĉirkaŭis la ludantojn kaj forte atakis ilin per fajraj tuboj por elvringi el ili indulgopeton. Ĝuste tiumomente la fajroŝprucigaj tuboj elĉerpiĝis kaj la atako venis al la fino. La pordego malfermiĝis . Dum malĝoja tamburado kaj gongado, la ludantoj, kun vestoj pendantaj sur la ŝultroj, lace eliris laŭvice, tenante la bambuan skeleton de la drako. Vundita en la kruro, la juna globtenanto lame elpaŝis, grumblante.

Paŝinte la ludantojn, Keding diris kun bedauro, “Estas bedaŭrinde, ke la fajroŝprucigaj tuboj estis malmultaj, alie ni estus povintaj fari pli fortan atakon kontraŭ ili . Ĉu vi kontentiĝis pri la spektaklo? Mi invitos vin spekti ankaŭ morgaŭ vespere.”

“Sufiĉe , jam sufiĉe ,” severtone diris Juehui, kiu staris malantaŭ Keding. Keding returnis la kapon kaj ĵetis al li rigardon, ne komprenante, kion li celis. Aliaj nur respondis, “Nenecese.” La tri knaboj Jueying, Juequn kaj Jueshi, kiuj estis la plej viglaj dum la ludado, jam malaperis en la homamaso. Ĉiuj kontente disiris kaj reiris al sia ĉambro. La servistoj forigis la provizoran spektejon.

Juemin kaj Juehui iris malantaŭe. Juehui iris al Qin kaj ŝin demandis, “Kuzino Qin, ĉu tio vin interesas?”

“Ne, mi ne multe interesiĝas pri tio,” respondis ŝi flegme.

“Kiel vi pensas pri la spektaklo?” demandis Juehui insiste. “Mi ne pensis pri ĝi ,” ŝi koncize respondis.

“La spektaklo estis seninteresa. Kiam mi estis knabeto, mi

interesiĝis pri ĝi, sed nun ne,” diris Juemin.

“Ĉu ĝi vere ne tuŝis vian koron?” demandis Juehui severe.

Senkomprene, Juemin turnis la kapon kaj ĵetis rigardon al li, dirante malaprobe, “Ĉu tia ludo kun triviala gusto povus esti kortuŝa?”

“Ĉu la homoj povas havi neniom da kompato?” demandis Juehui indigne.

“Vi troigas,” opiniis Qin. “Kiel la ludo rilatas al kompato? Kvina Onklo kaj aliaj kontentiĝis kaj la ludantoj ricevis sian pagon. Ili ĉiuj ricevis, kion ili deziris. Ĉu tio ne estas bona?”

“Vi ja indas je la titolo de riĉa fraŭlino,” Juehui rikanis, “kiel inteligentulo, vi eĉ ne travidas tion. Ĉu oni rajtas bazi sian feliĉon sur la sufero de aliaj? Ĉu vi opinias, ke oni rajtas bruligi la korpon de aliaj, se ili pagas? Evidente viaj okuloj ankoraŭ ne malfermiĝis sufiĉe larĝe.”

Qin ne plu parolis. Kiam ŝi ne povis respondi al demando, ŝi fermis sian buŝon por mediti kaj ne prezenti hastan argumenton— tio estis ŝia kutimo. Tamen ŝi ne sciis, ke ŝia juna cerbo ne povas doni konvenan respondon al tiu demando.

19

La nokto de la dekkvina tago estis serena. Sur la ĉielo, kelkaj steloj brilis, blankaj nuberoj ŝvebis kaj la plena luno similis jadan pladon inkrustitan en la blua firmamento.

Tiun nokton ĉiuj familianoj laŭkutime faris oferadon al la dioj. Ili rapide finis la ceremonion. Jueying kun Juequn eliris surstraten por rigardi drakodancon. Ruijue, Shuying kaj aliaj fratinoj, pensante pri la foriro de Qin en la sekva tago, sentis bedaŭron pri disiĝo. Kvankam la du hejmoj estis proksimaj, ili havis malmultan ŝancon sin amuzi kun Qin dum kelkaj tutaj tagoj. Cetere la dekkvina tago estis la lasta festotago de la Novjaro, kaj post tio ili ne povis sate sin amuzi pro la propraj aferoj. Ili do kolektiĝis en la ĉambro de Juexin kaj interkonsiligis kiel pasigi la nokton. Fine ili ĉiuj aprobis la proponon de Juexin remi sur la lago.

Ruijue volis iri kun ili. Sed pro tio, ke ŝia fileto Haichen insiste retenis sin por kuna amuziĝo, ŝi vole-nevole restis en la ĉambro. Entute ili estis ok: Juexin kaj liaj du fratoj, Shuying kaj ŝiaj du fratinoj, Qin kaj Mingfeng, kiu kunportis kankorbon kun vino kaj manĝaĵoj.

Ili eniris en la ĝardenon unu post alia kaj paŝis antaŭen laŭ la klostro. El ĉiuj Shuzhen estis la plej malkuraĝa kaj tiris Mingfeng kiel sian akompananton. Kvieto regis en la ĝardeno. Elektraj lampoj brilis malhele

kaj solece. Iliaj ombroj vidiĝis sur la tero kovrata de lunlumo en la oblonga rektangula ĝardeno. Ili malrapide iris babilante. Kiam ili preteriris la florbedon, subite aŭdiĝis neordinare tragika krio. Nigra ombro transsaltis la artefaritan monteton kaj per alia salto atingis la tegolan tegmenton de la klostro. Shuzhen estis tiel timigita, ke ŝi alpremis sian korpon al Mingfeng. Shuhua surprizite demandis senĉese, “Kio estas tio?”

Ĉiuj haltigis siajn paŝojn. Tamen nenia moviĝo okazis en la ĉirkaŭaĵo. Juehui frapis sian piedon sur la teron, sed neniun respondo venis. Transpasinte la balustradon kaj starante sur la florbedo, li levis kelkajn ŝtonetojn kaj ĵetis ilin dufoje sur la tegmenton. Aŭdiĝis nur la sono de la ruliĝo de la ŝtonetoj sur la tegoloj. Tuj sekve de tio, ili aŭdis miaŭadon de kato kaj ĝian fuĝadon. “Estas vi damnindaĵo!” Juehui ridetante insultis. Li resaltis en la klostron. Vidinte, ke Shuzhen timeme alpremĝas al Mingfeng, li diris ridetante, “Kia malkuraĝulino! Kia honto!”

“Mia patrino diris, ke estas fantomoj en la ĝardeno,” Shuzhen argumentis per tremetanta voĉo, firme premante la manon de Mingfeng.

“Fantomoj? Kiu vidis ilin per siaj propraj okuloj?” plu demandis Juehui ridetante. “Via patrino trompas vin, sed vi kredas ĝin. Kia sentaŭgulino!” Ĉiuj eksplodis per ridoj.

“Shuzhen, se vi timas fantomon, kial vi iras kune kun ni en la

ĝardenon?” demandis Juexin, kiu antaŭiris.

Delasinte la manon de Mingfeng, Shuzhen ĵetis timeman rigardon al ĉiuj kaj heziteme respondis, “Resti kun vi ĉiuj estas plezuro al mi. Mi sentus bedaŭron, se mi ne venus kune kun vi.”

“Prave dirite, vi vere estas mia bona kuzino. Nu, mi protektu vin. Ne timu. Mi staru apud vi kaj fantomoj ne kuraĝos aperi,” diris Qin kun rideto. Alpaŝinte al Shuzhen kaj altirinte ŝin al si, Qin iris kun si brako en brako.

“Sinjoro Jiang* estas ĉi tie, ĉiuj spiritoj evitu,” diris Shuhua sarkasme. Ĉiuj ridegis.

Ili eniris la maldensan bambuaron laŭ pado, kie lamplumo mankis. Lunlumo verŝiĝis vertikale de super la bambuoj. Je kaplevo, oni povis vidi la klaran bluan ĉielon. La supraj branĉoj de la bambuoj susure tremetis. Aŭdiĝis ankaŭ lirlado de fluo. Proksime al la ekstremo de la bambua bosko, ili trovis rivereton antaŭ si.

Juehui, intence montrante sian sentimon al fantomo, postiris, akompanante Mingfeng. Subite li flankeniĝis kaj kuris inter la bambuojn. Aŭdinte la bruon, la antaŭirantoj ĉiuj returnis la kapon por rigardi. Juemin demandis, “Tria Frato, kion vi volas fari?”

Ne respondante, Juehui silente elektis maldikan bambuon kaj penis eltiri ĝin, sed vane. Li disrompis ĝin kaj forigis ĝian pinton. Tenante ĝin en la mano kaj prove pikbatinte per ĝi la teron kelkfoje, li

kontente diris, “Ĝi povas bone servi kiel apogbastono dum irado.” Kaj li reiris apud Mingfeng.

Ĉiuj ekridis, rigardante lin. Juemin diris kun rideto, “Mi pensis, ke vi freneziĝas kaj volas elfosi ian trezoron tie. Ho, nur tion vi faris.”

“Trezoron? Ĉiumomente vi pensas pri trezoro ! Vi ja raviĝas per la rolo, kiun vi ludos en la teatraĵo *Trezorinsulo*,” Juehui kontraŭatakis sarkasme.

Ridante kaj parolante, ili marŝis antaŭen. Kiam ili eniris la pinarbareton, ili trovis, ke tie regas malhelo. Lunlumo estis barita de pinglofolioj de pinoj kaj nur lumpunktoj falis teren tra la foliaro. Kiam ili atingis la plej densan parton de pinarbareto, ili eĉ ne povis distingi la vojstrion. Tamen ili jam al kutimiĝis al la zigzaga vojeto. En la mallumo ili palpis sian vojon.

Juehui antaŭiris kaj palpis per la bambua stango. De tempo al tempo aŭdiĝis laŭta sono, kiu vekis ĉe la irantoj teruron pro la neimagebla mallumo kaj majesta bruoj de la pinoj. Kun streĉita koro, ili malrapide antaŭeniris. Qin lasis Shuzhen alpremiĝi al ŝia sino kaj protektis ŝin per la brakoj.

Iom post iom heliĝis antaŭe. Abrupte ili venis al la lago. Antaŭ iliaj okuloj kuŝis vasta blanko de akvo, sur kies surfaco lunlumo brile saltetis. La ronda luno flosis sur la akvosupraĵo kaj estis de tempo al tempo aliformita en ovalon sub puŝado de delikate moviĝantaj ondoj. De

tempo al tempo aŭdiĝis bruetoj de fiŝoj svariĝantaj por manĝo. Nemaŭdeksime dekstre sin etendis arka ponteto. Maldekstre en malproksimo malklare videblis la enlaga pavilono kaj la zigzaga ŝtonponteto kondukanta al ĝi.

Ili staris ĉe la lago kaj silente rigardadis la akvosupraĵon. Subite peco da ŝtono falis en la akvon kaj la spekulata luno, dispuŝate, fariĝis granda cirklo. Kvankam la luno baldaŭ prenis sian antaŭan formon, la ondaj cirkloj disetendiĝis kaj fine malaperis.

Returninte la kapon, Juemin rigardis la ridetantan Juehui kaj dins, “Jen denove via faro!”

“Kial vi staras ĉi tie senmove? Kion vi ankoraŭ atendas? Tie estas la boato, ĉu ne?” Juehui fingromontris la boaton alligitan al la trunko de saliko trans la lago nomaŭdeksime de la ponteto.

“Ni jam vidis ĝin. Via parolo estas superflua,” rapide respondis Shuhua, kiu altiris sian harplekton de malantaŭ la dorso. Ludante kun ĝi kaj rigardante la brilan lunon sur la ĉielo, ŝi komencis plengorĝe kanti poemon de Su Dongpo** pri luno.

Shuhua apenaŭ kantis la du versojn “Al firmamento blua mi demandas, en kiu tempo reaperos luno brila”, la sonora voĉo de Juemin daŭrigis, “En la palac' ĉiela mi ne scias, je kia kalendaro kalkuliĝas tagoj.” Poste Qin kaj Shuying aliĝis al ilia kantado. Juexin elprenis la kunportitan flagoleton kaj ekludis ĝin. Vidinte, ke Juexin ludas

flagoleton, Shuying deprenis la fluton el la mano de Juemin, dirante, “La sono de flagoletto estas tro delikata. Mi ludu fluton.” Leviĝis la trilado de la fluto, kiu supersonis la flagoleton. Tamen la trista sono de la flagoletto jam saturis la aeron kaj kelkfoje aŭdiĝis.

Juehui malrapide laŭiris la lagon al la ponteto kaj alvokis Mingfeng. Li diris kelkajn vortojn al Mingfeng kaj ŝi, respondinte, reiris al Shuying kaj la aliaj. Kiam Juehui atingis la pontetan ekstremon, li trovis, ke li estas sola kaj Mingfeng ne sekvas lin. Li do sin turnis kaj reiris al siaj gefratoj. En tiel kvieta kaj bela medio, li jam komencis tediĝi. Li ĉiam sentis, ke li estas iom diferenca de siaj gefratoj, kaj ke io vulkano-simila estas eruptonta el sub la trankvila surfaco de la familio.

La kanto finiĝis, la sonoj de la fluto kaj flagoletto ĉesis. Kiam Shuying metis transverse la fluton ĉe la buŝo por blovi, Juehui retenis ŝin, dirante, “Ludu en la boato. Kial vi estas tiel hastema?” Ili ĉiuj laŭiris la lagon, direkte al la ponteta ekstremo, kun Juehui ĉe la kapo kaj Mingfeng ĉe la vosto. Post kelka tempo ili jam transpasis la ponteton.

Kiam ili suriris herbejon, Juexin iris malligi la boaton kaj proksimigis ĝin al la bordo, por ke la aliaj sekure enboatiĝu. Sidiginte de la pobo, li firme ektenis pagajon kaj komencis remi.

La boato malrapide flosis sub la pontarkon kaj glitis al la larĝejo. Sidante ĉe la pruo, Mingfeng malfermis la kunportitan kankorbon kaj prenis el ĝi spice kuiritan viandon, melonsemojn, senŝelajn arakidajn

grajnojn, botelon da vino kaj kelkajn vintasetojn. Ŝi transdonis ilin al Shuying kaj Shuhua, kiuj metis ilin sur la rondan tableton en la mezo de la boato. Juemin eltiris la korkon de la botelo kaj elverŝis vinon por ĉiuj. En la brila lunlumo, la gejunuloj komencis kune trinki vinon.

En malproksimo la arkoponteto baniĝis en la lunlumo, kvazaŭ vualita de gazo. Kelkaj elektraĵoj lampoj ĉe la ponteta ekstremo brilis nebule. La boato malrapide turniĝis nerimarkite. Rigardinte la brilan lunon dum longa tempo, ili mallevis la kapon kaj trovis, ke la ĉirkaŭa sceno jam aliiĝis. Sur unu bordo staris kruta rokmuro kaj sur la alia sidis vico da konstruaĵoj alfrontantaj la lagon. Jam tute videblis la enlaga pavilono vualita per lun- kaj lamplumo.

Ĉirkaŭrigardinte, Juehui sentis alsvarmantajn vortojn en la gorĝo. Li eligis laŭtan krion, kiu, barite de rokmuro, revenis kaj penetris en ĉies orelojn.

“Vi havas vere laŭtan voĉon,” Juexin ridetante diris al li. Kaj tuj poste li plengorĝe kantis melodion el pekina opero. Tiumomente la boato jam ĉirkaŭiris la rokmuron kaj veturis preter la Fiŝhokejo. Aliborde la vico da konstruaĵoj cedis al densaj arbedoj.

“Granda Frato, venu trinki vinon. Ne remu plu. Lasu ĝin drivi,” Shuying diris, rigardante Juexin.

“Ĉi tie estas bona sidloko, sufiĉe vasta por unu sidanto,” Juexin respondis. Ĉesinte remi, li levis vintason kaj trinketis. Poste li enmetis

kelkajn arakidajn grajnoj en la buŝon kaj maĉis. La boato stabile tangetis. Post finmaĉo de la arakidaj grajnoj, Juexin parolis al si, “Prefere ni alligu la boaton sub la Fiŝhokejo. Mi volas surbordiĝi.” Antaŭ ol aliaj respondis, li albordiĝis la boaton. Kvankam malfacile, li tamen sukcesis flankenigi ĝin al la piedo de la Fiŝhokejo. Li elboatiĝis kaj suriris la ŝtonan ŝtuparon kondukantan supren. Post momento lia kapo aperis malantaŭ la ŝtona balustrado sur la Fiŝhokejo kaj li ridetis, rigardante ilin.

Shuying prenis manplenon da melonsemoj, ĵetis al Juexin, sed li sin turnis kaj malaperis. Oni nur aŭdis lin kanti arion de pekina opero supre. La kantvoĉo pli kaj pli foriĝis.

“Estas bedaŭrinde, ke unu persono mankas ĉi nokte,” diris Qin, kiu ŝajne sentis malkontenton.

“Ĉu temas pri bofratino Ruijue?” iuj demandis

Shuhua, krake senŝeligante melonsemojn. Qin skuis sian kapon.

“Mi scias. Temas pri kuzino Mei...” diris Juehui, sed Juemin interrompis lin. Ĵetinte rigardon al li Juemin riproĉetis, “Mallaŭte. Vi estas vere babilema. Granda Frato preskaŭ aŭdis.”

“Ne gravas, eĉ se li aŭdus. Malgraŭ ĉio, li jam intervidiĝis kun kuzino Mei,” Juehui senkulpigis sin necedeme.

“Granda Frato jam renkontis kuzinon Mei? ...” surprizite demandis Shuhua.

“Unua Sinjorido,” Mingfeng ridetante kriis ĉe la pruo. Ili ĉiuj direktis sian rigardon supren kaj vidis, ke Juexin, kun streĉita kolo, atente aŭskultas ilian interparolon. Ili tuj ĉesis paroli.

Malrapide descendinte de la ŝtona ŝtuparo, Juexin enboatiĝis kaj sidiĝs ĉe la pobo. Li demandis, “Kial vi ĉesis paroli, kiam vi vidis min?” Lia voĉo entenis iom da amaro.

“Ni jam forgesis, kion ni ĵus diris. Unuvorte, tio ne koncernas vin,” diris Juemin, kaŝante la veron.

“Mi klare aŭdis, ke vi parolas pri kuzino Mei kaj mi,” diris Juexin kun amara rideto. Li forpuŝis la boaton de la bordo kaj lasis ĝin malrapide drivi al la mezo de la lago.

“Vere. Qin volis diri , ke estus pli bone, se kuzino Mei estus ĉi tie ĉi-nokte,” diris Juehui malkaŝe. Tiumomente, la boato jam atingis la mezon de la lago kaj dawre drivis antaŭen malrapide.

“Kuzino Mei neniam venos ĉi tien la tutan vivon!” Juexin suspiris, rigardante la ĉielon. Tiam la boato flankeniĝis kaj akveroj plaŭdis en ĝin. Li tuj stabiligis la boaton.

Sur la ĉielo aperis kelkaj grize blankaj nuboj kaj la luno iom post iom glitis al la nuboj. Ĉiuj rigardis Juexin.

“Fakte , mankas ne nur kuzino Mei, sed ankaŭ kuzinoj Hui kaj Yun, nevinoj de sinjorino Zhou. Antaŭe, kiam ili vizitis nin — tiam nia plej aĝa fratino ankoraŭ vivis — kian ĝojon ni havis ! Poste la plej aĝa fratino

forpasis kaj ili forlasis la provincan ĉefurbon jam antaŭ tri jaroj. Kiel flugas la tempo!” diris Shuying al Juexin duonsopire kaj duonemocie.

“Ne malĝoju. La patrino diris al mi, ke kuzino Hui letere informis, ke ili revenos al la urbo post unu aŭ du jaroj ,” intermetis Shuhua.

“Ĉu vere? Ĉu vi ne trompas min?” demandis Shuying kun rideto. Poste, turninte la kapon, ŝi diris al Qin, “Kuzino Qin, vi jam morgaŭ reiros hejmen. Se ni remos ĉi tie morgaŭ nokte, vi forestos, kaj tiam estos ne tiel vigle kiel hodiaŭ . Malgraŭ ĉio, ni volenevole disiĝos. Ĝuste kiel proverbo diras, ‘Ne troviĝas en la mondo senfina festeno’.”

“Estas pli bone disiĝi pli frue. Kia turmento, se oni malrapide disiĝas en konsterno kaj timo!” kolere diris Juehui.

“Sciu , popoldiro diras, ‘Kiam la arbo falas, simioj disiras’. Sed nun la arbo ankoraŭ ne falis!” diris Juexin.

“Tun tagon ĝi falos. Se oni disiĝos pli frue, oni povos preni sian propran vojon,” diris Juehui, kvazaŭ elverŝinte ĉiujn siajn plendojn akumulitajn dum multa tempo.

“Kuzino Qin, mi ne volas, ke ni disiĝu. Kiel soleca oni sin sentos unuope!” maltrankvile diris Shuzhen, kiu sidis inter Qin kaj Shuying, kaj kiu subite levis la kapon, rigardante Qin kvazaŭ por peti helpon. En la klara voĉo de la knabino jam troviĝis la semo de malĝojo. Antaŭ la okuloj de Juehui aperis paro da vinditaj piedetoj en broditaj ŝuoj el ruĝa sateno ; ĉe liaj oreloj aŭdiĝis mizera kaj malĝoja plorado . La

malĝojo de la tuta ekzisto de la knabino forte premis la koron de la aliaj, tiel ke ili nature kompatis ŝin. Tamen la kompato estis nur portempa kaj momenta, ĉar antaŭ ĉiuj kuŝis la nekonebla estonteco — malĝoja estonteco, ĉiu pensis pri sia afero, kun timo pri la malcerta estonteco.

Subite la surfaco de la akvo malheliĝis kaj la ĉielo griziĝis. La luno kaŝis sin en nubojn, portempe ne disverŝante sian lumon. Ekregis kvieto. Nur la regula plaŭdado de la remiloj rompis la kvieton de la nokto.

“Malrapide,” ordonis Juexin al Mingfeng, kiu sidis de la pruo.

Shuzhen haste alpremis sian korpon al Qin kaj la lasta firme brakumis ŝin. La ĉielo sereniĝis kaj ĉio en la ĉirkaŭaĵo subite heligis. La luno elglitis kaj forlasis la nubaron, sin direktante al la vasta bluo. La enlaga pavilono kaj la zigzaga ponteto klare videblis en la fronto. La lunlumo projekciis iliajn ombrojn sur la akvosurfaco kvazaŭ en bildo. Sur la maldekstra bordo estis umearbareto. La umefloroj jam velkis. Nur la nudaj branĉoj kun restanta aromo fiere staris en la malvarma lunlumo, ĵetante sian ombron oblikve sur la akvosurfacon. Dekstre estis vasta deklivo, sur kiu maldense kreskis kelkaj salikoj. Ĉe la bordorando kuŝis malgranda akvobaraĵo, kiu ĉirkaŭe enfermis pecon da lago kiel cisternon. En la baraĵo troviĝis arkoforma truo, por ke la ekstera lagakvo povu enflui tra ĝi.

“Ne timu. Bone sidu. La luno brilas nun. Kiel bola pejzaĝo!” diris Qin, frapetante Shuzhen sur la ŝultron.

Shuzhen sidis rekte. Ŝi direktis sian rigardon al la ĉielo, ĉirkaŭen, al ĉiuj en la boato kaj fine al Qin. Ŝi, senkomprene, demandis, “Kuzino Qin, kial ni devas disiĝi? Ĉu ne estus bone, se ni kunestu ĉiutage?”

Ĉiuj ekridis. Frapetante ŝian ŝultron, Qin ameme diris, “Stultulino, kiel ni povus kunesti ĉiutage, kiam ĉiu havas sian propran fendaĵon?”

“Estonte ĉiuj foriros. Ankaŭ vi. Estonte, kiam vi estos plenkreska, vi edziniĝos kaj vivos kun via edzo. Tiam vi forgesos nin ĉiujn,” diris Juexin duonmoke kaj duonemocie.

Kial virinoj devas forlasi siajn karulojn kaj edziniĝi al membro de alia familio por vivi akompanante sian edzon? Tiun demandon ŝi sekrete elmetis al sia patrino kelkfoje, sed ŝi ne ricevis komprenigan respondon. Je mencio de “edzo”, ŝi instinkte ruĝiĝis kaj sentis neklarigeblan hontemon.

“Mi ne edziniĝos, mi absolute ne edziniĝos estonte, ŝi respondis malkaŝe.

“Ĉu vi volas resti hejme kiel maljuna fraŭlino, do?” diris ridetante Juemin, kiu sidis oblikve kontraŭ ŝi.

Tuj poste ankaŭ Juehui demandis, “Kial vi vindas viajn piedojn, se vi absolute ne edziniĝos?”

Shuzhen ne povis trovi vortojn por respondi. Ŝi faris buŝgrimacon kaj mallevis la kapon, silente karesis siajn vinditajn piedetojn, kiuj ankoraŭ doloretis. La vortoj de la patrino svarmis en sian menson. Jes, la patrino

diris, ke kiam ŝia bofratino edziniĝis al la familio Gao, ŝi estis primokita ĝuste pro siaj nevinditaj normalaj piedoj. Tiun tagon, kiam ŝi venis al la familio Gao kiel novedzino, ŝi apenaŭ eniris en la novbuduaron kaj sidiĝis sur la litrando, iu intence levis ŝian jupon por pririgardi ŝiajn nevinditajn piedojn. El tio, kion la patrino diris, Shuzhen ekkonis la malfeliĉon de nevinditaj piedoj, kaj el la skurĝado de la patrino al ŝi, ŝi ekkomprenis la feliĉon de vinditaj piedetoj. Ŝi ricevis skurĝadon, longe suferis, multe larmis kaj pasigis longajn sendormajn noktojn, kaj ŝi eĉ sukcesis fari siajn piedojn tiel nenormalaj. Tamen, kian rezulton ŝi akiris el tio? Ŝi fariĝis la objekto, per kiu la patrino paradis, kaj samtempe ŝi fariĝis la primoka objekto de siaj gefratoj. Alvenas ne la admiroj kaj honoro, kiujn la patrino profetis, sed la moko kaj kompatado, kiujn la patrino ne atendis. Nun ŝi ĵus atingis la aĝon de dek tri jaroj, freŝe juna, jam fariĝis viktimo. Kun la paro da deformitaj piedoj, kiuj ofte doloretis, ŝi ne povis kompari sin kun siaj pli aĝaj fratinoj. Des pli ŝi fariĝis timema kaj malforta pro la deformato de la korpo. Ŝi metis sian nuran esperon honori kaj sin venĝi sur edziniĝon. Karesante la deformatajn piedetojn, ŝi pensis: Kiel ŝi povas diri, ke ŝi ne edziniĝos? Tamen eĉ la espero estis fora kaj malplena. Ŝajnis al ŝi, ke ĉio nun komencis ŝanĝiĝi. Eĉ en ĉi tiu malgranda boato estas kvar paroj da nevinditaj piedoj. Kiel ŝi povus esti tiom certa pri tiu espero?

Subite ŝi falis en la sinon de Qin kaj ploris mallaŭte.

Konsiderante, ke ŝi ploris pro disiĝo, sed ne pro alia kialo, ĉiuj ridetante konsolis ŝin. Siaflanke ŝi ploradis kun pli granda malĝojo, klinante la kapon. Ĉar la konsolado neniel helpis, ili ĉiuj ĉesis konsoli ŝin. Juemin eĉ diris, “Vidu, vi malpurigis la veston de kuzino Qin”, sed eĉ tio ne levigis sian kapon. Preninte la fluton, Shuying komencis ludi la melodion *Malĝoja Autuno*. La fluto ŝajnis plorvoĉe rakonti pri malĝoja travivaĵo. La flutmuziko flosis sur la akvo, ĝi jen sinkis, jen malmergiĝis, jen disiĝis jen kuniĝis.

Subite leviĝis longa suspiro malantaŭe. Turninte la kapon al la pobo, ĉiuj vidis, ke Juexin rigardas la ĉielon, brakumante siajn genuojn. La boato kviete drivis. Tuj antaŭe staris la pavilono, granda kaj majesta, kvazaŭ io sekreta estus enfermita en ĝi.

“Kial ni ankoraŭ restas ĉi tie?” Juehui mire demandis.

Neniu respondis al li. Manipulante la direktilon, Juexin ĝiris la boaton dekstren kaj lasis ĝin gliti sub la ponteton, kiu preskaŭ tuŝis ties kapon. Ili ĉiuj instinkte movis la korpon flanken, kaj pro tio la boato forte skuiĝis. Kiam ili stabiligis la boaton, ili jam forlasis la ponteton malproksimen kaj baniĝis en la klara lunlumo.

“Kio okazis?” Shuzhen konsternite demandis al Qin, rektiginte sian korpon. Qin ne respondis. Tamen Shuhua ŝprucigis ridon.

La akvosurfaco larĝiĝis, ondetoj eĉ ne vidiĝis sur la brile blanka vasto. En la lunlumo la lagakvo malrapide fluanta antaŭen aspektis glata, ĉarma

kaj nature trankvila, sen ia moviĝo.

“Vidu, la lagakvo vere similas satenon!” admiris Juemin, rigardante la akvon absorbite.

“Ĉi-nokte la luno vere estas bela. Bedaŭrinde estas malvarme. Estus bone, se ni nun troviĝus en aŭtuno,” diris Qin.

“La homo ne estas facile kontentigebla. Iel ili malkontentiĝas pri tio kaj tio.” Dirante “Vidu, nebulo falos”, Juexin ordonis al Mingfeng remi rapide. “Mi timas, ke jam estas malfrue.”

La akvo turniĝis iom post iom kaj la akvosurfaco mallarĝiĝis. Arbedoj kaj konstruaĵoj malaperis el la vido. Ambaŭborde staris artefaritaj montetoj. Dekstre sur la montosupro, estis kabano rigardanta la lagon. Pro tiea rapida fluo, la boato traveturis dum momento. Juexin zorge manipulis la remilon kaj ĉirkaŭirigis la boaton, kiu sin turnis malantaŭ artefaritan monteton. Tie la lago estis mallarĝa, kun malalta ĉirkaŭmuro sur unu bordo kaj artefarita monteto sur la alia. Ĉi tie tre altis la ĉielo kaj la luno aspektis malgranda. Nebulo jam pendis super la akvo kaj vualis ĉion. La frosta aero komencis ataki ilin. Por kontraŭstari la froston, iuj el ili eltrinkis la restantan vinon en la taso aŭ interpretis unu al alia. Sono de tamburado kaj gongado alflugis neklare, kvazaŭ el alia mondo. Juexin kaj Mingfeng forte remadis.

“Ĉu la afero pri via klerigo estas decidita? Mi aŭdis, ke via guvernisto alvenos morgaŭ,” Qin mildvoĉe demandis Shuzhen. Dum tiuj tagoj,

kuraĝigite de Qin, la du fratinoj Shuhua kaj Shuzhen decidis daŭrigi la lernadon, kaj post kelkfoja postulado, ilia patrino jam konsentis, ke ili lernu kune kun siaj junaj kuzoj sub la guvernisto.

“Jes, estas decidite. Mi jam faris la necesajn preparojn,” Shuzhen respondis senhezite.

“Mi ne atendis, ke vi sukcesos en tio tiel facile,” Qin ĝoje diris.

“Estas nenio stranga en tio,” Juehui intermetis, “ja estas nenecese por ŝi elspezi kroman groŝon. Cetere la filinoj de aliaj patrinoj havas altan klericon, dum ŝiaj estas ne multe klerigitaj. Kio fierinda estas en tio por ŝi? La patro de Shuzhen ne zorgas, ĉu liaj filinoj lernas aŭ ne. La avo nur timas, ke iu virino en la familio faros ion hontindan antaŭ la publiko. Sed li ne kontraŭas, ke ili lernu hejme, precipe legu ‘librojn de saĝuloj’ ...” Je mencio de “libroj de saĝuloj”, Juehui sentis kvazaŭ raŭpoj rampus sur la haŭto kaj ne povis subpremi sian ekridon. Lia eksplikado faris la tutan aferon tiel klara kiel taglumo por la aliaj.

La boato jam venis antaŭ la kurbiĝon de la lago. La blanka nebulo pendis super la vasta akvo, tamen la silueto de la arkoponteto riviĝis en la nebulo. La elektraĵ lampoj ĉe la ponteta ekstemo, kiuj dise brilis en la lunlumo, jam fariĝis ruĝflavaj sub la nebula vualo. Ili jam faris rondiron laŭ la bordo de la lago.

La boato malrapide veturis tra la nebulo. Ĝui lunluman pejzaĝon tra nebulo, tio estis freŝa sperto por ili. Ĉiuj en la boato absorbigis en

pririgardado de la ĉirkaŭaj pejzaĝoj, eĉ sen konscii, ke ili jam atingos la etagdomon “Aromo Ĉe Vesperigo” post momento. Juexin demandis, ĉu ili elboatigos aŭ ne.

“Estas jam malfrue. Prefere ni reiru por preni tangjuan***-ojn,” Juehui respondis la unua. Neniu kontraŭis al lia propono. Sekve Juexin albordigis la boaton ĉe la saliko. Post kiam ĉiuj surbordiĝis, li alligis la boaton al la arbotrunko kaj foriris kune kun la aliaj direkte al la ponteto.

Dumvoje Juemin ne povis deteni sin de admirado, “Mi neniam estis tiel feliĉa kiel ĉi-nokte.” Ankaŭ aliaj konsentis kun li. Tamen Juexin pensis en si, “Se Mei estus ĉi tie!” Ankaŭ Qin sentis bedaŭron, ke Mei forestas. Estos bone, se oni invitos Mei ĉi tien por ŝin amuzi iun tagon, ŝi pensis.

Apenaŭ irinte el la ĝardeno, ili vidis Jueying kaj Juequn enkuri anhele. Kun ekscito, Jueying demandis Juexin, “Grand Frato, ĉu vi jam legis la ‘ekstran folion’ de la ĵurnalo? Oni komencis militi!”

“Kia ‘ekstra folio’? Kiu komencis militi?” Juexin demandis, senkomprene.

Dirante “Mem legu ĝin”, Jueying fiere prezentis la presaĵon per sia mano. La presaĵo estis la “Urĝa Ekstraĵo” aldona al *Nacia Ĵurnalo*.

“La provincestro jam ordonis komenci punan batalon kontraŭ generalo Zhang,” Juexin legis kun streĉita koro, “sur la fronto pafado jam komenciĝis.”

* Sinjoro Jiang Ziya estas fama strategiisto en mitologia romano, kiu studis taoismon kaj kapablis manovri per sorcaj fortoj en militado kaj sukcesis helpi la fondon de Zhou-dinastio. La citita frazo ofte surskribigis sur konstruaĵo en la malnova Ĉinio.

**Su Dongpo (1037 - 1101), fama verkisto.

*** Globa frandaĵo farita el faruno de glueca rizo, interne kun farĉo. Oni kutime manĝas ĝin en la dekkvina tago de la Novjaro.

20

“Ĉu estas novaĵo?” Ruijue demandis malĝojmiene al Juexin, kiu ĵus transpasis la sojlon de la ĉambro.

“La situacio fariĝas pli malfavora,” li skuis la kapon, “la provincaj trupoj denove ege malvenkis en la batalo. La trupoj de generalo Zhang jam alvenas al la Norda Pordego de la urbo.” Li iris al la fenestro kaj sidiĝis sur kanseĝo.

“Mi esperas, ke ne okazos strataj bataloj,” diris Ruijue konsternite.

“Kiu povas antaŭscii? Tio dependas de tio, ĉu la provincestro pretas cedi la teritorion,” diris Juexin maltrankvile. Por konsoli ŝin, li aldonis, “Mi tamen opinias, ke la afero povos esti pace solvita.”

Ruijue silente eniris la internan ĉambron. Ŝi malvigle iris al la lito kaj sidiĝis sur la litrando. Ŝi, rigardis la ridetantan Haichen dum dormado kaj karesis lian rozan vangon per sia mano. Dum tiu momento, li estis ekstreme valora al ŝi. Ŝajnis, ke iu volus depreni lin for de ŝi. Ŝi ne volis forlasi lin kaj ŝi stulte sidis ĉe li por gardi lin, absorbite rigardante la fenestron. Kvieto regis ekster la ĉambro. La horloĝa pendolo regule svingiĝis kaj ĝia tiktakado kvazaŭ batus ŝian koron.

Aŭdiĝis peza kaj rapida paŝbruo en la ekstera ĉambro. Evidente iu haste eniris. Surprizite, Ruijue tuj stariĝis kaj iris al la ekstera ĉambro. Tie ŝi vidis ke Juemin interparolas kun Juemin, starante ĉe la skribotablo.

“Kian novaĵon vi aŭdis, Dua Frato?” Ruijue konsternite kaj

maltrankvile demandis, starante ĉe la sojlo.

“Mi ĵus vidis, ke la vunditajn soldatojn oni transportas en la urbon, unuj post aliaj. Mi ne scias kiom,” Juemin diris ekscitite. “Estas vere terure. Ili sangmakule kuŝis sur brankardoj, iuj kun vunditaj brakoj kaj aliaj kun disrompitaj gamboj. Ili sangis la tutan vojon, kriante kaj ĝemante. Mi klare vidis sangantan karnopecon pendantan ĉe la liva tempio de vundito. La vundito kuŝis sur flanko. Lia vizaĝo morte palegis. Ege terurveke!...” Post paŭzo, li aldonis, “Verŝajne la bataalkampo trovigas nemalproksime de la urbo. Se ili venos refoje, stratbataloj estos neeviteblaj.”

“Ĉu nia tereno estas sekura?” Ruijue demandis maltrankvile.

“Eble. Mi esperas, ke la malvenkantaj soldatoj ne bruligos ĉie kiel lastfoje,” respondis Juemin.

Juexin, kiu restis silenta ĝis nun, subite stariĝis kaj diris maltrankvile, “Ni havis pacan vivon nur dum du-tri jaroj, kaj nun tia afero okazas. Ili ne lasas vin vivi kviete. Kian signifon la vivo havas?” Poste li eliris, lasante Ruijue kaj Juemin en la ĉambro.

Post momento Juehui kaj Shuhua eniris. “Ni ree havas spektaklon.” La sonora voĉo de Juehui rompis la netolereblan kvieton.

“Ĉu vi ne timas, Tria Frato? Vi ŝajnas ĝoja,” malĝoje diris Juemin, ĵetinte ekrigardon al li.

“Kion ni timu? La vivo estas tro kvieta. La militaj akrobataĵoj

instigos ĝin al plia animiĝo. Tamen nia lernejo eble ne donos lecionojn morgaŭ,” diris Juehui senatente.

“Kian kuraĝon vi havas, Tria Frato!” Ruijue mirigite rigardis Juehui

“Eĉ malkuraĝulo povas fariĝi sentima, se li spektas tian farson multfoje. Por honeste paroli, ili militis multajn jarojn, tamen mi restas mi mem. Kion ni timu?”

La vortoj de Juehui ne kapablis forpeli la teruran senton. Ĝuste tiam Mingfeng levis la pordokurtenon kaj vokis ilin al vespermanĝo.

“Mi ne havas apetiton,” Ruijue malvigle diris la unua.

“Ankaŭ mi,” diris Shuhua .

“Vi vere estas senutilaj timemulinoj. Aŭdinte iom da novaĵo, vi eĉ perdas vian apetiton,” moke diris.

Juehui kaj eliris la unua .

Post la tagmanĝo la tri fratoj Juexin, Juemin kaj Juehui interbabilis kelkan tempon en la ĉambro kaj post tio ili eliris por informiĝi pri la situacio. Kiam ili atingis la pordegon, ĝi estis firme riglita per longa stango. Tie regis malhelo. La maljuna pordisto diris al ili , ke la stratoj estas fermitaj al trafiko. Ili reiris en la korton, babilante pri la forto de ambaŭ partioj.

“Atendu, ke ili interŝanĝos pafojn ĉi-nokte,” diris Keding, kiam li renkontis ilin ĉe la interna pordo. Post tio, li avertis ilin zorgeme, “Estu singardemaj dum dormado. Se io okazos, zorgu unu pri alia!”

Tiun nokton la kortodomaro estis pli kvieta of antaŭe. Neniu kuraĝis paroli laŭte kaj ili mildigis eĉ siajn paŝojn. Je ĉiu eta sono neatendita, ili ĉiuj maltrankviliĝis kun forte batanta koro. En la kuirejo la fajro jam frue estingiĝis, ĉar neniu havis apetiton por kroma nokta manĝeto. La virinoj pakis siajn valoraĵojn kaj kaŝis ilin en la kelon aŭ sur sia korpo. En ĉiu ĉambro, aŭ geedzoj aŭ gefiloj, rigardante unu la alian, sendorme pasigis la longlongan nokton kun lacaj okuloj kaj terurigita koro.

Kun streĉita vizaĝesprimo, Kerling iris de ĉambro al ĉambro por komuniki la konsilon de Grandsinjoro, ke ĉiuj estu singardemaj ĉiumomente kaj ke ĉiuj prefere enlitigu sen demeto de la vestoj, por povi pli facile forkuri, se io neatendita okazos.

Tio des pli konsternis ilin, kvazaŭ terskua katastrofo venus baldaŭ. Siaflanke, Juehui ekhavis iom ŝanĝitan animstaton. Forkuri? Kien oni forkuru? Li ekkomprenis, ke la afero ne estas ludo. Antaŭ liaj okuloj disvolviĝis bildo de okazaĵo: kuglo alflugis, falis sur ŝtonplaton kaj resaltis en la korpon de la servisto staranta ĉe la ŝtona cisterno. Premante la vundon, li eligis akutan krion, falis teren, konvulsiis kaj mortis, lasante flakon da sango sur la tero. La okazaĵon Juehui vidis propraokule. Okazinta antaŭ pli of to jaroj, ĝi tamen restis freŝa en lia memoro. Kiel aliaj homoj, ankaŭ li vivis realan vivon kaj konsistis el sango kaj karno. Pensante pri la terurveka okazaĵo, li ne povis liberigi

sin de malagrabla, eĉ konsterna sento. La lamplumo pikis al li la okulojn. “Kia lamplumo!” li pensis en si malkviete. Li vere esperis, ke ĝi tuj estingiĝos kaj li mem troviĝos en absoluta mallumo .

Ĉirkaŭ la deka subite aŭdiĝis klara pafo, kies eĥo ondadis en la aero dum momento.

“Ili komencas pafi,” Juemin flustris al Juehui, levinte la kapon de sur la tablo, kun pala vizaĝo, kaj senbrilaj okuloj .

Sekvis tri-kvar pafoj.

“Mi juĝas, ke la situacio ankoraŭ ne estas strecita. Eble la gardstarantaj soldatoj pafis por timigi urbanojn,” diris Juehui en perforte trankviligita tono. Antaŭ ol li finis, la pafoj subite tre densiĝis, sed post momento ĉesis. Mallongan tempon poste ree leviĝis pafoj tre densaj kiel batantaj pluvgutoj. De tempo al tempo kugloj sible flugis super la tegmento. Iuj trafis tegolojn kaj faligis ĝin sur la teron. Haichen ekploris en la najbara ĉambro. Tragika vokado aŭdiĝis de ekstere .

“Ĉio finita, ĉio finita!” veis Ruijue en la najbara ĉambro. Post kiam Haichen ĉesis plori, Grandsinjoro tuj komencis tusadi laŭte en sia ĉambro.

Bum! Neordinara tondro vibriĝis la aeron, kaj poste bruis klakado, kvazaŭ sennombraj sableroj falus el la ĉielo, skuante la tutan domon.

“Kanono! Ekpafis kanonoj,” diris Ruijue en la najbara ĉambro per voĉo mallaŭta kaj tremetanta.

Bum, bum, bum ! Tri obusoj eksplodis. Je la eksplodo de la lasta obuso, oni aŭdis laŭtan bruon de malantaŭ la kortodomaro. La domoj skuigis dum momento. Ŝajnis, ke parto de la ĉirkaŭmuro disfalis.

“Ĉio estas perdita! Ili pafas obusojn tiamaniere — ni certe ne povas eskapi. Mi iru por pririgardi, kio estas trafita. Ŝajnas al mi, ke la muro breĉiĝis . Mi volas scii, kiel statas Tria Onklo kaj lia familio,” diris Juexin, malespere piedfrapetante en la najbara ĉambro.

“Ne eliru. Estas pli danĝere ekstere. Ne eliru!” Ruijue plorvoĉe admonis.

Eliginte longan vespiron, Juexin diris, “Nun ni ĉiuj tri estas kune. Se obuso eksplodos ĉi tie, ni ĉiuj estos perditaj .”

“La kugloj kaj obusoj ne havas okulojn. Estas egale, ĉu vi eliras aŭ ne, ĉar morto trafos vin. Preferinde ni ĉiuj mortu kune,” diris Ruijue plorsingulte. Ilia fileto Haichen denove laŭte ekploris, akompane de brua eksplodado de obusoj.

“Kiel mi povus vivi plu tiamaniere ! Se mi devas morti, mi mortu tuj.” La voĉo de Juexin estis tragika, malespera kaj terurveka. En la apuda ĉambro Juehui ne plu povis aŭskulti kaj li firme kovris la orelojn per la manoj.

Akuta kaj trista krio superflugis en la aero, kvazaŭ ĝi intence tordus la malfortajn korojn. La elektraĵ lampoj subite estingigis, tuj faligante la tutan domon en mallumon. “Bruligu lampojn!” oni kriis ĥore. Okazis

blinda moviĝo en la ĉambroj. Juemin kaj Juehui restis silentaj kaj ne intencis bruligi lampon. Juehui rigide kuŝis en la lito ; Juemin sidis ĉe la tablo. Ili faris nenian moveton.

La kanonpafoj provizore ĉesis, dum fusiloj ankoraŭ pafadis dense. Subite el malproksimo alflugis bruaj homvoĉoj. Krioj kaj batalvokoj intermiksiĝis. Oni ne povis distingi, ĉu sonas huraado, aŭ vekriado pro surpriziĝo aŭ trista alvokado. Tamen tio prezentis terurplenan scenon : Dum sturmado eksplodaj fajreroj flugis tien kaj tien ; trembrilantaj bajonetoj pikis la karnan korpon de forkurantoj kaj skarлата sango ŝprucis el pikvundoj ; multaj vivantoj falis kaj fariĝis kadavroj kun rompita kapo aŭ disrompitaj kruroj ; la postkurantoj, kiel sangosoifantaj sovaĝbestoj, lasis siajn viktimojn ĉie ...

En la kortodomaro regis nur mallumo, teruro kaj maltrankvilo, dum ekstere de la urbo, sur kamprandoj kaj montodeklivoj, multaj riskantoj luktis, agoniis kaj mortis. Tiu penso senĉese turmentis Juemin kaj Juehui, kiuj neniel povis trankviligi sian menson. Eĉ en mallumo, kun ruĝaj kaj blankaj ombroj dancantaj antaŭ iliaj okuloj, ili ne havis kvietan momenton.

“Kiel terura epoko!” Juexin malĝoje diris kun longa vespiro en la apuda ĉambro. Tio vekis simpatian eĥon ĉe Juemin kaj Juehui.

“Kion ni faru do? Tuj elpensu kontraŭrimedon !”

Ruijue kriis malespere kaj tristvoĉe.

“Ruijue, iru dormi por kelka tempo. Vi aspektas tre laca,” Juexin konsolis sincere.

“Kiel mi povus fermi miajn okulojn en tia tempo? Obusoj minacas fali ĉiumomente.” Ruijue diris plorvoĉe.

“Ne malgoju, Ruijue. Ni povas fari nenion kontraŭ la morto. Tio dependas de nia sorto. Prefere ripozu malgraŭ ĉio.” Juexin ankoraŭfoje admonis ŝin kun ŝajnigita trankvilo.

En la apuda ĉambro Juemin flamigis alumeton kaj lumigis la lampon. La grajnogranda flamo, malforte flagranta, ĵetis sian palan lumon al malgranda parto de la ĉambro. Kiam Juemin turnis sian senbrilan rigardon al la pala vizaĝo de Juehui, li surpriziĝis kaj ekkriis,

“Ho, kiel pala vi estas !”

Senmove kuŝante en la lito, Juehui mallaŭte kontraŭdiris, “Ankaŭ vi havas same palan vizaĝon.” Ili rigardis unu la alian, ne povante trovi konvenajn vortojn. Kugloj pluvis sur la tegmenton senĉese ; obusoj el muĝantaj kanonoj eksplodis en la aero, tremigante domojn, kies framoj eĉ knaris. Haichen denove ekploris.

“Estas senutile atendi ĉi-maniere. Ni devas enlitiĝi, laŭ mi.” Juehui stariĝis kun firma volo, malbutonumante.

“Tio estas bona ideo. Sed estas nenecese senvestigi vin,” Juemin admonis al Juehui, sed li jam engovis sin sub la kovrilon sen vestoj. Li firme kovris sian kapon per litkovrilo, sub kiu la eksplodaj sonoj de

kugloj kaj obusoj vere malklariĝis .

La sekvan tagon la vetero sereniĝis. La suno, portante novajn radiojn, leviĝis el la horizonto kaj prilumis la kortodomaron, kiu restis sendifekta escepte de dispecigitaj tegoloj kaj splitoj de obusoj sur kelkaj lokoj. Sur la tegmentoj estis kelkloke amasetoj da tegolpecoj kaj angulo de tegmentofirsto estis forprenita de obuso. Tamen jam formortis eksplodaj sonoj de fusiloj kaj kanonoj.

Frumatene, Juemin kaj Juehui iris al la ĉambro de sia duonpatrino, kie ili vidis sinjorinon Zhang kaj ŝian filinon Shuying kun nekombitaj haroj kaj lacaj trajtoj. Sur la planko sternaĝis dika litkovrilo ; ĉio en la ĉambro estis en malordo ; kvar kvadrataj tabloj estis vicekunmetitaj meze de la ĉambro. Ili aŭdis, ke sinjorino Zhou kaj Shuhua lastnokte dormis. sub tiuj tabloj, ĉirkaŭite de peplomoj, tiel firme ke venteto ne povus enpenetri . Ili pensis, ke ili tiamaniere povos teni sin sekuraj de kugloj. Ilia duonpatrino diris, ke ankaŭ sinjorino Zhang kaj Shuying dormis tie. Ĉar obuso falis en la ĝardenon malantaŭ ilia dormoĉambro, kaj angulo de muro breĉiĝis pro eksplodo, ili tuj formovis sin. Dormis tie ankaŭ Jueren, la fileto de sinjorino Zhang, nun kun li lia mamnutristino ludis eksterdome.

“Ĉirkaŭ la tria frumatene,” sinjorino Zhou diris, “ŝajnis al mi, ke obuso flugis super via tegmento, trafis la firston kaj disrompis multajn tegolojn. Ruijue, plorante, kuris ĉi tien, portante Haichen. Timante, ke

via ĉambro estis trafita de obuso, mi plengorĝe vokis vin, sed mi ricevis nenian respondon. Ekstere dense flugis kugloj. Neniu kuraĝis eliri por pririgardi vin. Poste Mingfeng eliris kaj vidis, ke via pordo estas firme fermita kaj nenia damaĝo okazis al via ĉambro. Sciante, ke vi estas sekuraj, ni liberiĝis de maltrankvilo. Ĉi-nokte vi neniel dormu tiel profunde. Zorgu pri vi !” Generale sinjorino Zhou estis rapidema parolanto. Tiom da vortoj gi eligis senhalte per unu spiro. El ŝia buŝo la vortoj elfluis kiel rulataj bidoj sur la glata ŝtonpeco senhalte, ĝis la elĉerpiĝo de ŝia ruliga forto.

“Mi emas vekigi ec pro brueto dum dormado. Mi ne scias, kial mi havis tiel profundan dormon lastnokte, eĉ dum furioza eksplodado ekstere,” Juemin diris al sia duonpatrino.

Juexin kaj Kerning eniris.

“Ĉu la situacio boniĝis?” demandis sinjorino Zhou. Post rigardo al iliaj kvietaj vizagoj, ŝi jam trankviliĝis.

“Eble la danĝero pasis,” Keming ridetante respondis en la tono de sia kutima sobreco. “La stratoj estas trapaseblaj. Neniu soldato troviĝas. Kvieto regas sur la stratoj, nenia paniko. Oni diris, ke la malamikaj trupoj okupis la arsenalon. La provinca instanco petis la britan konsulon interveni, kaj la provincestro promesis aksiĝi. Verŝajne ne okazos militaj konfliktoj. Ni ĉiuj spertis nenecesan timon dum la tuta nokto.” Poste li diris al sia edzino sinjorino Zhang, “Reiru al via ĉambro

por ripozi. Lastnokte vi lacigis vin kaj vi aspektas dormema nun. ..”
Post tio li turnis sin al sinjorino Zhou kaj afable diris, “Bofranjo, vi estis ĝenita lastnokte. Ankaŭ vi ripozigu vin dum iom da tempo.”

Post kelka babilado, Kerning reiris kune kun la edzino kaj filino al sia ĉambro. Juexin kaj liaj du fratoj restis en la ĉambro, babilante kun sinjorino Zhou dum iom da tempo.

La tago forpasis kviete. Ĉiuj pensis, ke eble ne okazos militaj konfliktoj. Tamen, kiam la suno subiris, la paca situacio subite ŝanĝiĝis.

Tiumomente ĉiuj familianoj escepte de Grandsinjoro, sidante en la korto, babiladis pri la okazaĵo de la antaŭa nokto, kiam servisto Yuan Cheng, anhelante enkuris kaj anoncis, “Sinjorino Zhang alvenas.” Post momento sinjorino Zhang eniris tra la flanko pordo. Ŝin sekvis Qin kaj junulino. Ili surhavis simplajn vestojn sen jupeoj. Kvankam ili tri havis malsamajn vizaĝesprimojn, ili ĉiuj tamen montris konsterniĝon, kvazaŭ ili renkontus ion eksterordinaran.

La sidantoj ĉiuj stariĝis por saluti ilin. Post tio, kiam oni volis inviti ilin al konversacio, subite tondris el la blua ĉielo. Fajra globo flugis tra la aero kaj tuj io ŝajne eksplodis, eligante bruon. Ili ĉiuj haste kaj malorde enkuris en la ĉefhalon.

Post kvar-kvin eksplodoj de obusoj, estis momenta kvieto. Poste aŭdiĝis pafoj de fusiloj. Ili venis el la nordorienta angulo de la urbo, densaj kiel pluvego torenta. Ankaŭ maginpafiloj ekbruis. Iliaj pafoj

nedistingeble miksiĝis kun tiuj de fusiloj. Subite la bruo iĝis urĝa, kvazaŭ miloj kaj miloj da militĉevaloj algalopus. Tiumomente kanonoj instalitaj sur la urb muro ekpafis. Ĉi-foje pafoj sonis de pli proksime of lastnokte kaj dekelkaj kanonoj samtempe muĝis. La fenestroj kaj tabulaj vandoj knaris. Eĉ la tero tremetis. Verŝajne tertremo okazis.

En la ĉefhalo la familianoj, senparolaj kaj paliĝintaj, rigardis unu alian.

Ili ĉiuj sentis teruron neelteneblan, konsciante, ke ili alproksimiĝas al la fino de la vivo. Sen ĝemado, sen lamento, sen barakto kontraŭ la morto, ili nur kviete atendis. Kvankam Juexin intervidiĝis kun Mei, kiu revenis en la kortodomaron post kelkara sperto de incidentoj, tio ne alportis al ili novan senton. La swebanta teruro de morto forpelis el ili ĉiujn aliajn sentojn.

La ĉielo malheligis iom post iom. La kanonado portempe ĉesis, dum pafado de fusiloj klakadis tiel dense kiel antaŭe. La penso “Kiel pasigi ĉi tiun nokton?” ekturmentis ĉiujn. Ĝuste tiumomente, surdiga eksplodo leviĝis en tre proksima loko. La muroj tuj forte vibris. Disflugante, la restanta bruo sputiĝis kiel krakfajraĵoj , miksite per disrompigo kaj faligo de tegoloj

“Ĉio estas perdita ! Ĉio estas perdita !” diris la paliĝinta sinjorino Zhou kun tremetanta voĉo, stariĝinte kaj turninte sin al sia ĉambro. Kiam ŝi estis levonta la pordokurtenon, ŝi preskaŭ karambolis kun

Mingfeng, kiu elkuris el la ĉambro.

“Kio okazis? Kio okazis?” multaj demandis.

Kun kadavra vizaĝo, Mingfeng anhelis, ne povante eligi vortojn dum longa tempo.

Levinte la pordokurtenon, Grandsinjoro eliris el sia ĉambro kaj lin sekvis lia kromedzino sinjorino Chen.

La familianoj en la halo ĉiuj stariĝis. “Kio okazis?” li demandis kelkfoje.

Post longa paŭzo, Mingfeng, multe terurite, elbalbutis, “Mi estis en la ĉambro de fraŭlino Shuying ... granda obuso falis ... traboris la tegmentrandon ... fenestrovitroj krevis pro la eksplodo ... Fumo leviĝis ekster la fenestro ... kaj mi elkuris...”

“Ne estas bone, ke ni ĉiuj kolektiĝas unuloke. Unu aŭ du obusoj mortigus la tutan familion. Ni devas elpensi kontraŭrimedon,” diris panike Grandsinjoro, kiu estis trafita per atako de tusado

“Miaopinie ni povas nur fuĝi,” Kerning proponis, “ĉiuj disiru kaj rifuĝu en sekuraj hejmoj de parencoj . Paĉjo iru al la familio Tang. Tie estas tre sekure.”

“Jam neblas iri al la distrikto ĉirkaŭ la Orienta Pordego. Eble pli sekure estas ĉe la Suda kaj Okcidenta Pordegoj,” diris sinjorino Zhang, kiu fuĝis el la orienta parto de la urbo, ĉar ŝia domo estis okupita de malamikaj trupoj. Tiam Mei estis en sia hejmo. Ŝi volis reiri

al sia propra hejmo, tamen la stratoj ĉirkaŭ ĝi estis baritaj. Ŝi vole-nevole fuĝis en la hejmon de familio Gao kune kun Qin kaj ŝia patrino.

Antaŭ ol sinjorino Zhang finis siajn vortojn, granda susuro sonis super la tegmento. Oni sciis, ke plia obuso flugis trans la domon. Tuj poste eksplodo aŭdiĝis en pli malproksima loko — eble en la najbara kortodomaro.

Ili ĉiuj kuris eksteren. Kiam ili atingis la portikon, ili estis retenitaj de servistoj, kiuj diris, ke la pordego estas jam ŝlosita, ĉar gardostarantoj ĉie en la stratoj malpermesis trairon.

Ili povis fari nenion krom retiriĝi. Nun ilia penso pri rifuĝo forfalis kaj ili eniris en la ĝardenon laŭ la propono de Juexin.

La ĝardeno ŝajnis alia mondo. Kvankam pafoj de kanonoj kaj fusiloj obsedis iliajn orelojn, la ĉirkaŭa sceno tamen influis tiel, ke ili forgesis, ke ili troviĝas en teruro. Tie kreskis verdaj herboj kaj ruĝaj, blankaj floroj. Regis viveco en la ĝardeno. La krepuska vualo, kiu kovris la ĝardenon, pentriĝis per alia tavolo de mistera koloro. Kvankam ili ĉiuj kun streĉita koro, ne havis emon doni atenton al la bela pejzaĝo, tamen ĉiu floro, ĉiu herbo, ĉiu arbeto kaj ĉiu ŝtonpeco rimarkeble staris tie kaj entrudiĝis en ĉies okulojn.

Ili trairis la pinarbareton kaj atingis la lagon. La vesperruĝo reflektiĝis sur la hele blua lagakvo, kiu fariĝis rozkolora. Vespera

nebulo jam vualis la akvon. Ne donante zorgan pririgardadon, ili laŭiris la lagon borderitan per pinarbareto en la direkto al la apudlaga domo.

La domo sin lokis ĝuste ĉe la ekstremo de la pinarbareto. Ĉirkaŭirinte malgrandan vojkurbon, ili venis al la antaŭa pordo de la domo. Tufoj kaj tufoj da bambuaj branĉoj ŝirmis ĝian tegmenton el malhele grizaj tegoloj. Antaŭ la pordo kelkaj magnolioj prospere floris, kaj la blankaj floroj elsendis penetran aromon.

Keming malfermis la pordon. Grandsinjoro la unua eniris kaj aliaj sekvis lin. Servisto Su Fu bruligis la kerosenan lanternon. Grandsinjoro lace kuŝiĝis sur ripozlito, dum aliaj sidiĝis sur seĝoj aŭ sur taburetoj. La domo konsistis el tri grandaj ĉambroj, kaj en la meza ili sin trovis. Post momento eniris kelkaj geservistoj. Ili tuj komencis ordigi la du ĉambrojn en ambaŭ flankoj kiel provizorajn loĝejojn, unu por la mastroj kaj la alian por la mastrinoj. Dank' al la multo de laborantoj cio estis baldaŭ ordigita.

Tiutempe la kanonado jam cesis kaj la fusilaj pafoj maldensiĝis kaj fine venis al nulo. Tra la malfermitaj fenestroj alfrontantaj la lagon, oni vidis vaston de klara akvo. Lunarko alte pendis sur la ĉielo kaj disverŝis pale arĝentajn radiojn, kiuj pliigis la friskon de la akvo. Sur la transa bordo la domo “Aromo ĉe Vesperigo” solece staris en la arĝenta lumo kun brile blankaj floroj ĉe la fronto. Baniĝante en la arĝenta lunlumo, la artefaritaj montetoj, rokmuroj, persikarboj kaj salikoj sin

montris en diversaj koloroj kaj formoj, kvazaŭ ili sekreton kaŝus de la homa mondo.

Dum tiuj tagoj Mei maltrankviliĝis pro la sopiro al sia patrino kaj frato, kiuj restis en la hejmo. Nun ŝi iom distriĝis per la sceno. Apogante sin sur la fenestro, ŝi pririgardis la domon “Aromo ĉe Vesperigo” sur la transa bordo, kvazaŭ sercante ion tie. Post kelka tempo ŝi turnis sian rigardon al la salikoj ĉe la lago kaj malĝoje diris, al Qin, “Mi venis ĉi tien antaŭ kvin jaroj.” Starante apud ŝi, Qin senparole rigardis la ĉielon. La tavoloj de nuboj sur la ĉielo similis blankajn ondojn. La luno glitis malrapide tra ili. Qin klinis la kapon por rigardi Mei. Fingromontrante salikojn ĉe la lago, Mei diris al ŝi:

“Tiuj pendantaj salikfrondoj iam volvis mian koron ... kaj nun ... alia printempo venas.”

“Kuzino Mei, aŭskultu min,” diris Qin, tirante ŝin ĉe la maniko. Ŝi ne respondis al Mei, sed pensis pri alia afero. “Vespere de la dekkvina de la unua monato, ni remis ĉi tie. Ni ĉiuj pensis, kiel bona afero estus, se ni invitus vin por kune amuziĝi ci tie. Vere vi venis nun. ..”

Mei turnis la kapon por rigardi Qin. Ŝi ne portis ĝojan mienon, sed larmoj brilis en ŝiaj okuloj. Karesante unu manon de Qin, ŝi diris, “Kuzino Qin, mi tre dankas vin pro via afableco. Sed kian bonon mi alportus, se mi venus ĉi tien? Ĉu vi ne konas mian koron? Kvankam la pejzaĝo restas senŝanĝa kiel antaŭe, tamen kiu herbo, arbo, roko aŭ

akvo ne vekas ĉe mi malĝojan rememoron? Eĉ se mia koro mortus, mi ne povus facile forgesi miajn pasintaĵojn.”

Surprizite, Qin ĵetis rigardon al Mei kaj post tio kaŝrigardis la starantojn malantaŭ ŝi. Rimarkinte, ke neniuj aŭskultas Mei, ŝi alproksimigis sian kapon al Mei kaj diris ĉe ŝia orelo, “Kuzino Mei, kial vi diris tion ĉi tie? Ĉu vi ne timas, ke ili aŭdos vin? Fakte es-tas facile forgesi la pasintecon. Kial vi ĝenas vin per tiaĵoj?”

Ĉe tio, Qin aŭdis paŝbruon post la dorso. Turninte la kapon malantaŭen, ŝi vidis Ruijue kondukantan Haichen.

“Pri kia sekreto vi ambaŭ interparolas ĉi tie?” demandis Ruijue kun rideto.

Sin turninte, Mei, kun iom ruĝiĝinta vizaĝo, ne povis tuj eligi respondon, tamen Qin prenis la paroltemon. Ŝi ridetante diris, “Vi ja venas ĝustatempe, Bofranjo. Ni estis kritikantaj vin pro tio kaj alio.” Aŭdinte tion, ankaŭ Mei ekridetis. Ŝi tuj argumentis, “Ne kredu ŝin, Bofranjo!”

“Kompreneble mi ne povas kompari min mem kun kuzino Qin. Ŝi legis multajn librojn kaj nun lernas en moderna lernejo. Ŝi estas bela, kuraĝa...”

“Kaj kio pli?” demandis Qin, ŝajnigante sin serioza.

“Kio pli ... Tre multe !” diris Ruijue kaj nereteneble ekridis. Ŝi alpaŝis kaj turnis la konversacion al alia temo. Ŝi diris al Mei, “De longe

mi deziris renkonti vin. Mi ofte aŭdis ilin menciis vian nomon. Unue mi aŭdis, ke vi foriris al gubernia urbo kaj poste, ke vi revenis al la provinca ĉefurbo. Sed mi ne havis bonŝancon renkonti vin. Hodiaŭ, kia vento alblovis vin ĉi tien? Tio estas vere neatendita ĝojo... Ŝajnas al mi, ke mi vidis vin ie antaŭe.”

“Ne eble. Mi ne estas sufiĉe feliĉa por tio,” diris Mei kaj ekridetis kun kunpremitaj lipoj. Tamen ŝi tuj retenis la rideton kaj aldonis, “Vi tamen nun estas pli plena ol en via foto.” Antaŭ ol Ruijue respondis, ŝi prenis la maneton de Haichen kaj demandis, “Ĉu li estas Haiĉjo?”

Kun rideto, Ruijue respondis, “Jes.” Klininte la kapon, ŝi diris al Haichen, “Fileto, voku ŝin per ‘onjo’.”

Haichen ekrigardis Mei per siaj malgrandaj okuloj kaj senhezite salutis ŝin.

Kun milda rideto Mei klinis sin kaj prenis lin en siajn brakojn. Karesante lian vangon, ŝi diris, “Li vere similas Grandan Kuzon, precipe lia paro da brilaj okuloj.” Ŝi poste demandis, “Kian aĝon vi havas?”

“Li ankoraŭ ne atingis la aĝon de kvar jaroj,” Ruijue respondis anstataŭe.

Mei tuŝigis sian vangon al tiu de Haichen, kisis ĝin kaj kelkfoje nomis lin “dolĉuleto”. Fine ŝi redonis lin al Ruijue. “Bofranjo, vi vere estas feliĉa, ke vi havas tiel belan fileton,” ŝi diris. Ŝia tono iom ŝanĝiĝis.

Qin tuj turnis la konversacion al alia temo. Ili tri ĝoje babiladis. Ruijue subite trovis, ke ŝi tre ŝatas Mei, kvankam ŝi unua-foje kunestis kaj babilis kun ŝi.

Ĉi-nokte ĉiuj frue enlitiĝis. Keming kaj Juexin reiris al siaj ĉambroj, tiel ke ili povis zorgi pri ĉio. Ankaŭ Juemin kaj Juehui dormis en sia ĉambro. Ili pensis, ke estas pli libere dormi en la propra ĉambro, of kune kun la avo en la sama ĉambro. Spertinte kelkfojan obuseksplodadon, ili jam fariĝis pli kuraĝaj.

21

Neniu el la familianoj havis bonan dormon tra la tuta nokto. Apenaŭ tagiĝis, Grandsinjoro jam komencis forte tusadi senĉese. Ankaŭ la aliaj vole-nevole ellitiĝis tre frue.

Post tualetado, Qin kaj Shuying akompanis Mei promeni en la ĝardeno, babilante pri ŝanĝoj okazintaj post ilia disiĝo. Ne okazis granda damaĝo en la ĝardeno, escepte de tio, ke ŝrapnelo falis en la pinaron kaj difektis du pinojn.

Sur la stratoj la trafiko ankoraŭ stagnis. Ĉe la vojkruciĝoj staris patrolantaj soldatoj kaj surstrate sin lokis kelkaj gardostarantoj. Sed pasantoj, akirinte permeson de gardostarantoj, povis trairi la stratojn.

La kuiristo de la familio Gao jam iris al bazaro por aĉeti legomojn. La pordego de la urbo tamen restis fermita du tagojn kaj kampuloj ne povis eniri la urbon por vendi legomojn, tial mankis freŝaj legomoj en la bazaro. Malgraŭ ke la kuiristo faris sian plejeblon, li ne povis havigi al la familianoj bongustajn pladojn.

Tiutage oni matenmanĝis en la apudlaga domo. En la meza ĉambro metiĝis du rondaj tabloj, unu por la maljuna generacio kaj la alia por la juna. Kvankam ili ne satmanĝis dum du aŭ tri tagoj, ili tamen tuj perdis la apetiton, vidinte la malabundan tablon. Ili malvigle prenis iom el la bovlo kaj forlasis la tablon. Nur Juemin kaj Juehui alkroĉiĝis al sia manĝaĵo kaj englutis du bovlojn da rizaĵo. Juexin sidis diagonale

kontraŭ Mei. Kelkfoje li ĵetis al ŝi kaŝrigardon kaj ankaŭ ŝi kelkfoje direktis sian rigardon al li. Kiam iliaj rigardoj okaze renkontiĝis, Mei aŭ mallevis la kapon aŭ deturnis sian rigardon. Ŝi eksentis ondadon en la koro, ne sciante, ĉu tio estas ĝojo aŭ malĝojo. Estis feliĉe, ke oni koncentris sian atenton sur Juemin kaj Juehui kaj ne rimarkis sian konduton.

“Vi ja havas bonan apetiton. Vi eĉ ne volas forlasi vian bovlon, pro malabundo de la legomaj pladoj,” diris Shuhua ridetante al Juemin, post kiam la avo eliris el la ĉambro.

Vi estas riĉaj fraŭlinoj. Kompreneble vi estas malsamaj ol ni,” replikis Juehui la unua, kiam li finmanĝis la lastan buŝplenon da rizaĵo kaj demetis la bovlon. “Por ĉiu manĝo vi devas havi kokaĵon, anasaĵon, fiŝaĵon kaj viandon. Ĉu vi scias, kion ni prenas en manĝbutiko dum niaj lernejaj tagoj? Spinaco, brasiko, toŭfuo kaj sojfabo kazeo! ... Sed nun vi spertas suferon. Mi esperas, ke la situacio daŭros ankoraŭ kelkajn tagojn. Mi vidu, kion vi faros?” Li volis daŭrigi, tamen Juemin kaŝe ekpuŝis lian kubuton por retenigi lin. Vidinte, ke kelkaj pliaĝuloj montras malgajon, Juehui bridis sian parolon kaj stariĝis, forpuŝinte la seĝon.

“Mi alparolis Duan Fraton. Kial vi intervenis?” Shuhua paŭtis kaj ĵetis ekrigardon al Juehui. Dirinte tiujn vortojn, ŝi turnis sian kapon kaj donis nenian atenton al li.

Post la matenmanĝo Juemin kaj liaj du fratoj eliris por esplori la

situacion kaj ankaŭ pririgardi la hejmon de Qin. Sur la strato ne estis multaj pasantoj. Antaŭ la pordo de ĉiu loĝejo staris kvar aŭ kvin personoj. Ili aŭ streĉis la kolon por ĉirkaŭrigardi aŭ babilis pri la okazaĵoj. Je interspaco de dekelkaj paŝoj gardis plene armitaj soldatoj, el kiuj iuj tien kaj reen laŭiris la murojn, tenante pafilon en la mano. Pasante preter ili, Juexin kaj liaj du fratoj ne estis retenitaj de ili. Ili do grandpaŝe marŝis antaŭen.

Ĉe la vojforko kvin aŭ ses personoj, starante antaŭ barilo, legis kun levita kapo la oficialan anoncilon algluitan sur la muro. Ankaŭ Juexin kaj liaj du fratoj legis la afiŝon, kiu temis pri la ekŝigo de la provinestro. En ĝi li modeste diris, ke la milita konflikto estis kaŭzita de tio, ke li “ne havas sufiĉajn virtojn por priservi la popolon kaj ne estas sufiĉe kompetenta por forigi ties malfeliĉon” , tiel ke li alportis suferon al siaj oficiroj kaj soldatoj kaj malfeliĉon al sia popolo. Nun li decidis forlasi la regpotencon, por ke “la milito ne daŭru kaj la urbo ne mizeru.”

“Nun li diras tiujn vortojn belajn nur pro tio, ke la malamikaj trupoj kampadas ekster la urbomuro. Kial li ne ekŝigis pli frue?” moke diris Juehui post finlego de la afiŝo.

Aŭdinte, kion Juehui diris, Juexin surprizite ĉirkaŭrigardis. Feliĉe neniu sin trovis ĉirkaŭe kaj li trankviliĝis . Ektirinte Juehui ĉe la maniko, li mallaŭte avertis, “Gardu vian langon ! Ĉu vi ne volas vian vivon?”

Ĉesinte paroli, Juehui trairis la palisar-barilon, sekvante siajn du fratojn. Antaŭ la malnova templo, dekkelkaj fusiloj konuse staris sur du lokoj. Kaj dekkelkaj soldatoj staris apude kun senesprima vizaĝo. Duone malfermita estis la pordo de la butikoj apud la templo. El tie Juexin prenis ĵurnalon kaj fluglegis ĝin. La sinteno de la ĵurnalo ekŝanĝiĝis. Kvankam ĝi ankoraŭ amasigis laŭdajn vortojn pri la eksprovincestro, ĝi tamen nuligis la titolon “ribela armeo” pri la malamikaj trupoj. Eĉ la komerca societo kaj konfuceanisma organizaĵoj, kiuj antaŭe aperigis siajn severajn kritikojn kontraŭ la malamikaj trupoj, nun ĵurnale esprimis sian bonvenigon al ili. Dekkelkaj famaj ĝentilhomoj de la loko aperigis sian peton en la ĵurnalo, ke generalo Zhang de la malamikaj trupoj eniru en la urbon por “administri la provincon”. La gvidanto de tiuj ĝentilhomoj estis Feng Leshan.

“Jen denove li!” rikanis Juehui.

“Ŝajnas, ke paciĝis,” diris Juexin kun faciligita koro. Ili jam trairis du stratojn kaj alvenis al la ekstremo de la tria. Antaŭ ili la palisar-barilo estis fermita. Du soldatoj tie gardis kun pafiloj. Ili devis sin turni kaj trairi strateton. Apenaŭ ili eniris ĝin, ili estis retenitaj de gardostarantoj.

“Haltu. Kien vi iras?” malice demandis gardisto kun malgrasa vizaĝo.

“Ni iras viziti parencon, kiu loĝas nemalproksime,” respondis

Juexin ĝentile.

“Netrapaseble. Malpermesite trapasi!” Post tiuj simplaj vortoj la soldato fermis sian buŝon. Li ekrigardis la pafilon en la mano kaj poste fiksas la rigardon sur la bajoneton. Li montris fieran mienon, kvazaŭ ĝi signifus al Juexin kaj liaj du fratoj, ke, se ili ne obeos lin kaj movos unu paŝon antaŭen, li pikos ilin per la bajoneto.

Vole-nevole ili turnis sin senparole kaj preteriris la antaŭan strateton. Ili volis ĉirkaŭiri per alia vojo, sed ili ne sukcesis, kvankam ili multe klopodis.

Ili decidis hejmeniri. Survoje, kun maltrankvila koro, ili timis, ke la revena vojo estas barita. Ili rapidigis siajn paŝojn, dezirante tuj atingi la hejmon. Sur la stratoj estis malmulte da pasantoj kaj la pordoj de butikoj kaj riĉaj loĝejoj estis fermitaj en silento. La senanima sceno pliigis ilian timon. Kiam ili preterpasis gardostaranton, ilia koro forte batis. Ili timis, ke tiu baros al ili la vojon, sed feliĉe li lasis ilin trapasi.

Finfine ili atingis la hejmon.

Plejparto de familianoj troviĝis en la ĝardeno. Enirinte en la ĝardenon, ili unue iris al la apudlaga domo. Tie ili vidis la avon kaj onklojn ludi maĝangon sur du apartaj tabloj.

“Vi eĉ havas plezuran senton ludi maĝangon,” pensis Juehui. Vidinte, ke Juemin elŝteliĝas, li sekvis lian ekzemplon. Juexin staris apud la avo

por raporti informojn akiritajn de ili.

Nature la informoj alportis al la avo grandan konsolon. Sed sinjorino Zhang ankoraŭ iom maltrankvilis, ĉar ŝi ne sciis el tiuj informoj kiel statas ŝia hejmo. Tamen ŝia maltrankvilo daŭris nur momenton. Kiam ŝi akiris favoran pozicion en la ludado, ŝi forgesis pri ĝi. Juexin interŝanĝis kelkajn vortojn kun siaj pliaĝuloj, sed vidinte, ke ili atentis la ludadon, li eliris.

Elirinte el la domo, li staris sub la magnolio dum iom da tempo. Li sentis sin enua. Li ŝajnis soifi al io, kio estis ĝuste antaŭ liaj okuloj. Sed li sciis, ke li ne povas akiri ĝin. Li sentis malplenen kaj mankojn en la vivo. Apogante sin kontraŭ la trunko, li stulte kaj distriĝeme rigardis la freŝan verdaĵon etendiĝantan antaŭ liaj okuloj. Birdoj ektrilis sur la arbo. Paro da turdoj lude saltetis sur branĉo, faligante neĝe blankajn magnolipetalojn sur la kapon de Juexin. Li rigardis tiujn du birdojn forflugi dekstren. Lia koro plenis je forta sopiro. Li bedaŭris, ke li ne povas farigi birdo kaj flugi en la vasta spaco kune kun ili. Klininte la kapon, li pririgardis sian korpon. Kelkaj petaloj ŝvebe falis de sur la kapo kaj ŝultroj. Li levis la petalon sur la brusto per du fingroj kaj lasis ĝin malpeze kaj malvigle ŝvebfali teren.

Antaŭe, de malantau la artefarita monteto aperis virina figuro. Kun mallevita kapo, ŝi malrapide paŝis, tenante salikvergon en la mano. Ŝi subite levis la kapon kaj vidis Juexin stari sub la arbo. Ŝi haltis kaj

movetis la lipojn, kvazaŭ volante diri ion, sed ŝi sin turnis senparole kaj foriris. Ŝi surhavis nigran satenan veston super hele verda silka jako. Ŝi estis neniŭ alia ol Mei.

Juexin tuj eksentis froston tra la korpo. Li ne sciis, ĉu ŝi evitas lin. Li do postkuris ŝin per malpezaj paŝoj por informigi pri la kialo.

Malantaŭ la artefarita monteto, li vidis nur herbojn kaj florojn, sed ne sian figuron. Kun stranga sento, li atente observis kaj trovis sian nigran satenan veston tra fendego en la dekstra flanko. Li ĉirkaŭiris la monteton. Antaŭ li etendiĝis ovalforma herbejo, sur kiu maldense kreskis kelkaj persikarboj. Starante sub persikarbo, ŝi mane tuŝis ion sur la maldekstra manplato, kun klinita kapo.

Li nesindeteneble eligis krion “Mei!” kaj iris renkonte al ŝi.

Levinte la kapon, ŝi senparole rigardis lin. Ĉi-foje ŝi ne evitis lin.

Alpaŝinte antaŭ ŝin, li demandis kun ekscitita voĉo, “Mei, kial vi ĉiam evitas min?” Ŝi klinis la kapon kaj karesis la mortantan papilion sur sia manplato. Ĝi ankoraŭ malforte movis siajn flugilojn. Dum longa tempo ŝi ne donis respondon.

“Ĉu vi ankoraŭ ne volas pardonon min?” Lia voĉo fariĝis amara.

Levinte la kapon, ŝi fiksrigardis lin dum kelka tempo, antaŭ ol ŝi diris kun monotona voĉo, “Granda Kuzo, vi ne kulpis al mi. Pli ŝi ne diris.

“Do vi ne volas doni al mi pardonon?” li diris preskaŭ plorvoĉe.

Ŝi ekridetis, funebre, ne gaje. Ŝia rigardo mole karesis lian vizaĝon

senĉese. Premante la bruston per la dekstra mano, ŝi mallaŭte diris, “Granda Kuzo, ĉu vi ne konas mian koron? Ĉu mi iam priplendis vin?”

“Kial do vi ĉiam evitas min? Ni jam disiĝis longan tempon, sed nun, kiam ni ree renkontiĝas, vi eĉ ne volas diri al mi pli ol kelkajn vortojn. Ĉu vi scias, kian senton mi havas en la koro? Kiel mi povus ne pensi, ke vi ankoraŭ malamas min?” li diris kun suferanta koro .

Mallevinte la kapon, ŝi firme kunpremis la lipojn. Falto sur ŝia frunto fariĝis pli videbla. Ŝi malrapide diris, “Mi neniam malamis vin. Mi nur timas ofte renkonti vin, ĉar tio rememorigas la pasintaĵon.”

Juexin stulte rigardis ŝin, ne povante respondi dum longa tempo. Klininte sian korpon, Mei malpeze metis la papilion sur la herbejon kaj diris ameme, “Kiel kompatinde! Kiu difektis vin tiel?” Kvankam tiuj vortoj sonis dusence, ŝi tamen ne intencis tion. Ŝi aldonis, “Mi foriru, Granda Kuzo. Mi iros rigardi ilin ludi maĝangon.” Ŝi sin direktis al la apudlaga domo.

Levinte la kapon, Juexin rigardis tra larmoj ŝian pendantan hartuberon kun hele verda lanfadeno ĉirkaŭ ĝi. Kiam li vidis, ke ŝi malaperos malantaŭ la artefarita monteto, li nesinteneble kriis, “Mei!”

Ŝi sin turnis kaj staris ĉe la monteto, atendente lian alproksimiĝon.

“Granda Kuzo,” ŝi ame vokis kaj ekrigardis lin per siaj akvecaj okuloj.

“Se vi povas montri kompaton al papilio, ĉu mi ne indas je via

kompato?” li mallaŭte diris, retenante siajn larmojn.

Ne respondante, ŝi apogis sin kontraŭ la monteto kun klinita kapo.

“Supozeble vi hejmeniros morgaŭ kaj ni havos nenian ŝancon por renkontiĝi poste. Ĉu ni vivos aŭ mortos, ni ŝajnos vivi en du malsamaj mondoj. Ĉu vi ne bedaŭras adiaŭi min senparole?” Li diris plorsingulte.

Ŝi peze spiris, ne donante respondon.

“Mei, mi estas kulpa... Tiam mi estis senrimeda ... Edziĝinte, mi forgesis vin ... Mi ne konsideris vian suferon,” li diris kun same mallaŭta voĉo. Pro hasteco, liaj vortoj sonis intermite. Li elpoŝigis poŝtukon, sed li ne forviŝis la larmojn, lasante ilin ruliĝi sur la vangoj. “Poste, mi sciis, ke vi multe suferis. Estas mi, kiu kaŭzis tion. Pensante pri tio, kiel mi povus trankviliĝi? Sciu, ankaŭ mi spertis sufiĉan suferadon. Ĉu vi ne volas eĉ diri al mi pardonan vorton?”

Ŝi levis la kapon. Ŝia okulparo brilis. Fine ŝi ne plu povis sin deteni de plorado. Ŝi elbalbutis, “Granda Kuzo, nun mia menso estas tiel konfuzita kiel implikitaj haroj ... Kion vi deziras, ke mi diru?” Premante mane la bruston, ŝi tusadis kelkfoje.

Vidinte, ke ŝi dronas en profunda malĝojo, li eksentis surprizan atakon de miksiĝantaj sentoj de pento, kompato kaj amemo. Senkonscie li alproksimiĝis al ŝi kaj forviŝis la larmojn de sur ŝia vizaĝo per sia poŝtuko.

Komence ŝi lasis lin fari tion. Sed post momento, ŝi subite forpuŝis lin kaj amare diris, “Ne estu tiel proksima al mi. Vi ne devas vekti suspekton.” Ŝi volis foriri.

“Kian suspekton mi timas nun? Mi jam estas edziĝita kaj havas infanon... Tamen mi ne devas malgojigi vin tiagrade. Malĝojo difektas sanon. Zorgu pri via sano.” Li tiris ŝian brakon por reteni ŝin, aldonante, “Kiel vi povus eliri kun tiel multaj larmoj sur la vizaĝo?” Tiumomente li malĝojis nur pri ŝia sorto kaj nur pensis pri ŝi, forgesante sian propran malĝojon.

Ŝi iom post iom sufokis la malĝojon. Preninte la poŝtukon el lia mano, ŝi forviŝis la larmojn kaj redonis ĝin al li. Ŝi malgaje diris, “Dum ĉi tiuj jaroj en kiu tago mi ne pensis pri vi! Je la antaŭvespero de la lunkalendara Novjara Tago, kiam mi vidis vian dorsfiguron en la hejmo de Qin, mi sentis min multe konsolita. Mi tre deziris vin vidi, sed mi timis renkonti vin. Tiun tagon mi evitis vin en la bazaro kaj poste mi pripentis. Ankaŭ mi ne povis agi laŭvole. Mi havas mian patrinon kaj vi vian edzinon. Ŝi estas tiel bonkora, ke ankaŭ mi ŝatas ŝin. Miaflanke, mi ne volas rememorigi vin pri pasintaĵoj. Mi ne zorgas pri mi mem. Mia vivo estas jam finita, sed mi volas malĝojigi nek vin nek ŝin. Mia patrino ne scias, kion mi pripensas en la menso, kaj ŝi nur scipovas juĝi ĉion laŭ sia vidpunkto. Mian malĝojon ŝi neniel povas kompreni. Mi preferas morti ol vivi tiamaniere.” Ŝi eligis longan vespiron.

Juexin premis sian bruston silente, ĉar lia koro multe doloris lin. Ili rigardis unu la alian. Post kelka tempo, li malgaje ridetis. Fingromontrante la herbejon, li diris, “Ĉu vi ankoraŭ memoras, ke ni ruliĝadis sur ĉi tiu herbejo, kiam ni estis infanoj ? Foje, kiam mia fingro estis pikita de insekto, vi suĉis mian vundon. Ankaŭ sur ĉi tiu herbejo, ni kune ĉasis papiliojn kaj kolektis semojn de balzaminaj floroj. La loko restas sama nun, ĉu ne? ... Iun tagon okazis luneklipso. Ni ĉirkaŭiris en la ĝardeno kun tabureto sur la dorso, asertante, ke ni eltenas suferojn anstataŭ la luno... Ĉu vi ankoraŭ memoras ? Antaŭe, kiam vi lernis kune kun ni en nia hejmo, kiom da belaj perspektivoj ni imagis al ni antaŭ la olelampo! Tiutempe ĝojo vere ebriigis nin. Ni neniam atendis tian sekvon hodiaŭan. Li parolis kiel viziulo, kvazaŭ klopodante rememori la scenojn de la pasinteco.

“Nun mi vivas de rememoroj,” Mei diris mallaŭte, “kelkfoje rememorigo forgesigas ĉion. Kiom mi sopiras al la senzorgaj tagoj de la infaneco! Estas bedaŭrinde, ke tempo ne povas retroiri . Granda Kuzo, nepre zorgu pri via sano.. .”

Antaŭ ol ŝi finis sian parolon, ili aŭdis iun alproksimiĝi. Poste aŭdiĝis la voĉo de Shuhua, “Kuzino Mei, ni serĉis vin longan tempon. Ni ne pensis, ke vi kaŝas vin ĉi tie.”

Mei tuj retroiris unu paŝon, por ke ŝi tenu sin pli malproksime de Juexin. Kaj poste ŝi returnis la kapon por rigardi. La venantoj estis Qin,

Shuying kaj Shuhua. Ili tri alpaŝis al Mei. Rigardante la larmomakulitan vizaĝon de Mei, Shuhua ridetante demandis kun intenca miro, “Kuzino Mei, ĉu Granda Frato ofendis vin? Kial vi ploradis ĝis ŝveliĝo de viaj okuloj?” Shuhua direktis sian atentan rigardon al la vizaĝo de Juexin. Kvankam li klopodis eviti, ŝi tamen rimarkis. Ŝi diris, “Kial ankaŭ vi ploris? Vi disiĝis por kelkaj jaroj, vi devas ĝoji, kiam vi nun intervidiĝas. Kial vi kaŝas vin ĉi tie kaj ploradis unu al la alia?” Aŭdinte tion, Mei klinis la kapon kun ruĝiĝinta vizaĝo. Dum Juexin deturnis sian kapon, murmure sin defendante, “Hodiaŭ miaj okuloj doloras.”

Aŭdinte kion Juexin diris, Shuying moke intermetis, “Estas strange. Kial viaj okuloj doloras ĝuste kiam kuzino Mei venis, sed ne antaŭe nek poste?”

Qin ektiris Shuying ĉe la maniko, signante ke ŝi ĉesu, ĉar tiumomente Ruijue venis, gvidante sian fileton. Sed Shuying ne ĉesis ĝis la parolo finiĝis per unu spiro. Kiam ŝi konsciis, jam estis tro malfrue.

Juĝante la parolon de Shuying kaj la situacion, Ruijue eksentis suspekton. Nenion dirante, ŝi ridetante transdonis Haichen sub la zorgon de Juexin. Kaj poste ŝi alpaŝis al Mei kaj diris, “Kuzino Mei, ne malĝoju. Ni promenu aliloken. Vi devas trankviliĝi.” Intime ĉirkaŭprenante la brakon de Mei, ŝi gvidis ŝin ĉirkaŭ la artefaritan monteton.

Shuying kaj Shuhua volis iri kune kun ili, tamen Qin retenis ilin. Qin

diris kun emocio, “Lasu ilin solaj. Ili eble sekrete interparolos pri io. Laŭ mi Bofranjo estas bona al kuzino Mei kaj tre ŝatas ŝin.” Kvankam ŝi direktis la vortojn al Shuying kaj Shuhua, ŝi tamen celis Juexin.

22

Du tagojn poste la trafiko reviviĝis sur la stratoj. La trupoj sub la komando de generalo Zhang ankoraŭ kampadis ekster la urbo. Oni diris, ke la eksprovincestro forlasos la urbon en la sama tago kaj la urba sekureco metiĝos sub la provizoran administradon de move komisiita garnizona komandanto. Kvankam la milita konflikto jam venis al la fino, la urbo estis en malordo kaj la popolanoj estis malkvietaj.

Sur stratoj vagis malgrandaj grupoj de venkitaj soldatoj, kiuj aspektis mizeraj. Iuj el ili perdis la kepojn, aliaj vindgamaŝojn kaj triaj vagis kun malbutonumita uniformo. Iuj eĉ deŝiris sian militistan signon. Ili aŭ trenis aŭ tenis aŭ portis surŝultre aŭ dorse la pafilojn, kiuj jam fariĝis senutilaj. Sed ili ankoraŭ ne perdis sian kutiman arogantecon. Kun minaca vizaĝesprimo, ili tiranadis surstrate. Tio rememorigis iliajn antaŭajn malbonaĵojn kaj pliigis la teruran etoson.

Matene Zhang Sheng, la servisto de sinjorino Zhang iris al la hejmo de la familio Gao. Li raportis, ke la plotono da soldatoj, kiuj loĝis en ŝia domo, jam forlasis ĝin kaj, ke restas tie kiel gardantoj nur du maljunaj soldatoj, kiuj laŭdire baldaŭ forlasos. Neniu soldato eniris en iliajn loĝĉambrojn, tial ili perdis nenion el siaj havaĵoj. Li aldonis, ke la servisto de Mei jam serĉis ŝin en la hejmo de sinjorino Zhang kaj ke li hejmenirigos ŝin el la hejmo de la familio Gao post du tagoj. La novaĵo trankviligis sinjorinon Zhang kaj Qin, kaj ili ne plu parolis pri

hejmeniro.

Posttagmeze sinjorino Qian, la patrino de Mei, sendis serviston al sinjorino Zhou por esprimi dankon pro tio, ke la lasta bone zorgis ŝian filinon Mei. Li diris, ke sinjorino Qian estas tre danka kaj ŝi venos al sinjorino Zhou por ŝin persone danki kelkajn tagojn poste, kiam la situacio paciĝos. Li ankaŭ komunikis vortojn de sinjorino Qian al Mei, ke tiu trankviliĝu, ĉar ĉiuj familianoj estas sekuraj kaj ke, se ŝi volas resti en la familio Gao, ŝi povas fari tion.

Mei volis reiri kune kun la servisto, sed ŝi fine decidis resti, ĉar sinjorino Zhou kaj Qin insiste retenis ŝin.

Kvankam la atmosfero ekstere plenis de teruro, la ĝardeno tamen dronis en kvieto. En tiel paca medio, la tempo rapide forfluis. Nerimarkite vespero alglitis.

La malluma nokto ankoraŭ ne falis, tamen la lunkorno, jam pendis sur la ĉielo. La aero saturiĝis de aromo ĉe la vesperkrepusko. Ju pli la ĉielo malheligis, des pli la luno brilis. Nokto bela, varma.

Sed en la kortodomaro antaŭ tagmanĝo, subite la trankvila atmosfero estis rompita. Unue la patro de sinjorino Wang sendis servistojn por hejmenirigi ŝin. Ili diris, ke laŭ onidiro, rabado okazos en la nokto. Ĉar la familio Gao estis la plej riĉa en la ĉirkaŭaĵo de la Norda Pordego, ĝi estis neeviteble prirabota la unua. Preferinde oni evitu. Kvar palankenoj forportis sinjorinon Wang kaj ŝiajn kvin infanojn.

Ankaŭ Qian'er kaj Mamnutristo Yang de Shufang iris kun ili. Tuj poste la familio Zhang foririgis sinjorinon Zhang kaj ŝiajn infanojn Shuying, Jueying kaj Jueren pro la sama kaŭzo. Vidante tion, sinjorino Shen, la edzino de Keding, volis, ke li sendu ŝin kaj ŝian filinon Shuzhen al ŝia gepatra domo. El la virinoj de la familio restis nur sinjorino Zhou kaj Ruijue, kies gepatraj domoj ne troviĝis en la urbo. Kvankam ili havis du aŭ tri parencojn loĝantajn en la urbo, estis ne oportune por ili rifuĝi portempe en iliaj hejmoj. Cetere ili devis akompani la gastojn en la hejmo. Vespere neniu pasanto sin trovis surstrate. Krom soldatoj, neniu kuraĝis iri eksteren.

Grandsinjoro matene jam iris al la hejmo de la familio Tang, kies mastro estis lia kuzo. Lia kromedzino sinjorino Chen reiris al la hejmo de sia maljuna patrino. Post kelktempa restado, Ke-an iris al la hejmo de sia bopatro. Nur Keming restis kaj skribis leteron en sia studĉambro. Nun el la granda familio restis nur la familibranĉo kun Juexin kiel ĉefo. En la granda familio, kies ekzisto dependis de la malnovaj moraloj, subite aperis interna malpleno. Kiam katastrofo falis, tiuj, kiuj dum ordinaraj tagoj kunvivis, rifuĝis por sia propra sekureco.

Ne povante hejmeniri, sinjorino Zhang, la patrino de Qin, restis en la hejmo de la familio Gao, kun la familibranĉo de Juexin. Ŝi fakte estis korinklina al tio. Eĉ se ŝi povus reiri hejmen, ŝi ne volus forlasi ilin. Ŝi diris al Juexin, "Mi jam estas en maljuna aĝo. Mi travivis multon, sed

mi ankoraŭ ne vidis, ke bonuloj ricevas malbonan rekompenco. Via patro kondukis bone la tutan vivon. Neniu katastrofo okazos al liaj gefiloj. Mi kredas, ke la Ĉielo estas justa. Pri kio do mi timu?”

Tio, kion ŝi diris, ne povis liberigi ilin de maltrankvilaj zorgoj. Kiam la nokto estis ankoraŭ neprofunda, jam neniu sono aŭdiĝis surstrate. Hundo komencis boji. En ordinara tempo malofte aŭdiĝis bojado, sed ĝi estis eksterordinare laŭta tiun nokton. La tempo treniĝis tre malrapide. Minuto ŝajnis tiel longa kiel jaro. Je pli laŭta bruo, oni ekpensis, ke rabantaj soldatoj enstrudiĝis. En iliaj cerboj aperis sceno de bajonetoj, glavoj, sango, fajro, nudaj korpoj de virinoj, moneroj disĵetitaj sur la tero, oscedantaj ledkofroj kaj kadavroj baniĝantaj en sango. Ili kun malespera strebado luktis kontraŭ la nevenkebla kaj nevidebla forto, sed ili fariĝis pli kaj pli malfortaj, kaj la teruro ĉirkaŭis ilin pli feroce.

Tiutempe ili vere volis fermi siajn okulojn al ĉio kaj perdi ĉiajn sentojn, tamen eĉ la malforta lamplumo povis dolore piki al ili la okulojn. Ĝi komprenigis al ili, en kia situacio ili sin trovas. Unuflanke ili preĝis, ke la tempo forpasu pli rapide kaj la suno leviĝu pli frue, sed aliflanke ili komprenis, ke ju pli rapide la tempo fluas, des pli alpremiĝas la terura momento. Ili estis kvazaŭ enkarcerigitaj atendantaj la mortpunon. Kvankam ili estis homoj kun malsamaj temperamentoj kaj pensoj, la teruro de morto signifis la samon al ĉiuj. Al

la virinoj minacis sufero kaj teruro pli timigaj ol la morto.

“Kuzino Mei, se la rabantaj soldatoj vere eniros, kion ni faru?” Qin demandis. Tiumomente ĉiuj kolektiĝis en la ĉambro de sinjorino Zhou por interkonsiliĝi pri kontraŭrimedoj. Kiam Qin eligis, “Kion ni faru?”, ŝia koro tremetis. Ŝi ne kuraĝis plu pripensi.

“Mi havas nur ĉi tiun vivon,” Mei malvarme diris, sed kun funebra voĉo. Post tio ŝi tuj kovris sian vizaĝon per ambaŭ manoj. Ŝia penso nebuliĝis. Antaŭ ŝiaj okuloj aperis blanka vasto de akvo ondanta kaj etendiĝanta senlime.

“Kion mi faru?” Ruijue mallaŭte parolis al si. Ŝi komprenis, kion Mei diris. Ŝi pensis, ke ŝi povos nur havi tiun finon, sed ŝi ne volis preni tiun vojon, forlasinte siajn karulojn. Rigardante Haichen, kiu petole ludis antaŭ ŝi, ŝi kvazau sentis, ke kelkaj glavoj pikas al ŝi la koron.

Qin silente stariĝis kaj paŝadis tien kaj reen en la ĉambro. Ŝi luktis kontraŭ la teruro. Ŝi kriis en la koro “absolute ne”, kaj volis trovi aliajn solvojn. Ŝi pensis, ke ŝi bezonas ne nur la vivon, sed ankaŭ ion alian. Tiumomente el ŝia cerbo malaperis ĉiuj novaj pensoj, ĉiuj novaj libroj kaj gazetoj, la sociaj teatraĵoj de Ibsen kaj la verkoj de la japana verkistino Josano Akiko. Ŝi kvazaŭ vidis honton kaj humiliĝon stari ĝuste antaŭ si, malice ridantaj kaj mokantaj ŝin. Ŝi pensis, ke ŝi ne povos vivi kun ili, ĉar ŝi havas sian propran fieron. Ŝi rigardis ĉirkaŭen : Mei

kovris sian vizaĝon per ambaŭ manoj, sidante sur la kuŝseĝo ; Ruijue faligis larmojn, tenante la manon de sia infano ; ŝia patrino vespiradis kun sia dorso al la lampo. Kaj ŝi direktis sian rigardon al Shuhua, Juemin kaj aliaj. Ŝi ne povis trovi iun el ili, kiu kapablis savi ŝin, sed ŝi konsideris, ke ili estas tre valoraj al ŝi kaj ŝi ne povas forlasi ilin. Ŝi sentis sin laca kaj malespera. Nur tiam ŝi ekkomprenis, ke ŝi diferencas en nenio de Mei, Ruijue kaj aliaj. Ŝi estis fakte same malforta kiel ili.

Qin sidiĝis sur libera seĝo. Ŝi mallevis la kapon al tetablo kaj mallaŭte ekploris.

“Kio okazas al vi, mia filineto?” kriis sinjorino Zhang malĝoje. “Ĉu vi volas peli min al pli granda malĝojo per via plorado?” Ŝiaj larmoj nereteneble fluis.

Qin nek respondis nek levis la kapon. Ŝi nur ploradis mallaŭte. Ŝi priploris sin mem pro frakasiĝo de la bela songo, kiun ŝi sukcesis krei post multjara klopodado. Ŝi strebadis, multe penadis kaj insiste ĉasadis, kaj akiris nur iom da rezulto. Tamen kompare kun la teruro, ŝia rezulto ŝajnis sensignifa. Nun la malnova socia sistemo atakis ŝin de alia flanko, kaj ŝi povis en sola palpebrumo frakasi ĉion, kion ŝi pene konstruis en la menso dum dekelkaj jaroj. Ŝi rememoris la frazon “klopodi kondukti kiel vera homo” diritan de Ibsen. Kian utilon la sonora frazo povis alporti en ĉi tiu momento? Ŝi ploradis, ne nur pro la teruro, sed ankaŭ pro tio, ke ŝi jam vidis sian veran vizaĝon. Antaŭe, ŝi

opiniis sin kuraĝa kaj estis tiel ludata de aliaj. Tamen ĉi-momente ŝi trovis sin ekstreme malforta. Ĉi tie, kiel porko aŭ ŝafo, ŝi atendis esti buĉita, sen ajna forto rezisti.

Tion, kion ŝi pripensis en la menso, komprenis nek ŝia patrino, nek aliaj, nek Juemin, kiu pensis, ke li plej bone konas ŝin. Ĉiuj aliaj opiniis, ke ŝi ploras pro la teruro, kaj siaflanke, ili estis turmentataj de la sama teruro. Ili ne povis trovi vortojn por konsoli ŝin, sed nur sentis, ke la plorado pikas al ili la koron kiel glavo. Juemin volus brakumi Qin por konsoli ŝin, tamen mankis al li kuraĝo.

Ne povante plu pacience resti en la ĉambro, Juehui eliris. Li surpriziĝis, kiam li vidis, ke en la orienta angulo de la ĉielo ruĝeta lumo sputiĝas, grandiĝas kaj fajreroj flirtas en ĝi de tempo al tempo. Li pretervole ekkriis, “Fajro!” Li sentis, ke la sango koaguliĝas tra la tuta korpo.

“Kie?” surprizite demandis unuvoĉe kelkaj en la ĉambro, “Kie estas fajro?” Juexin tuj elkuris kaj Shuhua lin sekvis. Post momento ĉiuj staris sur la ŝtuparo por pririgardi.

La fajra lumo sur la ĉielo estis sangoruĝa. Alfrontante la scenon, ĉiuj eksentis, ke la vivo iom post iom malkreskas kaj ŝajne estos forronĝita.

La luno englitis en la nubaron, kaj la ĉielo malheliĝis, kio des pli kontrastis kun la grandiĝanta brulego. La ruĝa lumo jam kovris

malgrandan parton de la ĉielo, ruĝiĝante ŝtonplatojn sur la tero kaj tegolojn sur la tegmento. Fajreroj dancis en la fajra lumo. Rigardante la terurvekan spektaklon, ĉiuj sentis nenian dubon pri la definitiva perdo de la vivo.

“Estas certe, ke la lombardejo brulas. Ve, ili forrabis la tutan havaĵon kaj eĉ ne indulgas la domon,” diris sinjorino Zhang vespirante.

“Kion ni faru?” diris Ruijue konsternite, kiu pro maltrankvilo jam perdis ĉiujn ideojn.

“Ni, alivestiĝu kaj fuĝu,” Juemin proponis.

“Kien ni fuĝu nun? Kiu zorgus pri la loĝejo?” Juexin kontraŭdiris. “Se neniu restos por zorgi la domojn, la ribelantaj soldatoj forbruligos ilin post prirabado.” Fakte ankaŭ li mem ne havis bonan ideon.

Subite aŭdiĝis klaraj pafoj, rompante la noktan kvieton. Ekstere hundoj furioze ekbojis, kaj homa kriado leviĝis en malproksimo.

“Perdite! Ĉi-foje ni certe ne povas fuĝi!” Juexin diris per raŭka voĉo, piedfrapetante. Post momento, li kriis laute, “Ĉu ni ĉiuj atendu ĉi tie la morton? Ni devas ĉiamaniere fuĝi el ĉi tie.”

“Fuĝi, kien ni fuĝu?” maltrankvile diris sinjorino Zhou plorante, “se ni elfugos kaj renkontos ribelantajn soldatojn surstrate, ili certe mortigos nin. Preferinde ni restu hejme.”

“Eĉ se ni restos hejme, ni devas trovi sekuran rifuĝejon. Estos bone, se unu plia el ni povos saviĝi. Nia familibranko devas konservi

iun por daŭrigi la familian linion.” La voĉo de Juexin plenis de malĝojo kaj indigno. Poste li daŭrigis per ŝanĝita voĉo, “Dua kaj Tria Fratoj, vi tuj akompanu la virinojn en la ĝardenon. Tie estas lokoj por kaŝiĝi. Se tiuj kaŝejoj estos trovitaj, tie estas ligo. Via bofratino scias, kiel teni sian honoron.” Ĉe tio li avide ekzamenis Ruijue de la kapo ĝis la piedoj kaj poste ĵetis rigardon al Mei. Larmoperloj pluve elkuris el liaj okuloj. Kvankam li penis regi sin, kvazaŭ tre decidema, tamen fakte li sentis nenion certan en la koro.

“Kaj vi?” la aliaj demandis unuvoĉe.

“Iru kaj zorgu pri vi mem. Mi havas rimedon por elturniĝi,” li malvarme diris kun altrudita trankvilo, post momento.

“Se vi ne foriros, ankaŭ ni ne,” firme diris Juehui.

Sonis kelkaj sinsekvaj pafoj. La brulego tamen ne plu grandiĝis.

“Tria Frato, kial vi ĉiam zorgas pri mi? Ili virinoj estas gravaj!” Juexin senĉese piedfrapetis la teron pro maltrankvilo. “Se ĉi tie ne estos zorganto de la domo kaj soldatoj venos, ili certe priserĉos la ĝardenon.”

Ruijue, kiu dumtempe senparole tenis Haichen en sia brakumo, subite demetis lin kaj, irinte al Juexin, decideme diris al Juemin kaj Juehui, “Dua kaj Tria Fratoj, vi tuj akompanu ilin eksteren. Bonvolu preni Haiĉjon. Mi restu ĉi tie por akompani vian Grandan Fraton. Mi zorgos pri li.”

“Vi, vi restas por akompani min? Kio estas via intenco?” diris

Juexin surprizite. Delikate forpuŝinte Ruijue, li malĝoje aldonis, “Kia bono estiĝos, se vi restos ĉi tie? Tuj foriru, alie estos malfrue.” Dirante, li maltrankvile piedfrapetadis.

Prenante al li la brakon, Ruijue plorsingulte diris, “Ankaŭ mi ne forlasos vin. Se vi devas morti, ni mortu kune.” Haichen alpaŝis kaj tiris Ruijue ĉe la basko, malĝoje petis, “Mi ne foriras, panjo.”

Pro tio, Juexin farigis des pli konfuzita. Li riverencis al Ruijue kelkfoje kaj petis, “Por nia fileto, ne faru tion. Kia bono estiĝos, se vi mortos kune kun mi? Kaj estas ne certe, ke mi mortos. Se ili venos, mi havos rimedon por trakti ilin. Se ili vidos vin, kio okazos? Viaflanke, vi devas zorgi vian purecon. Krome, vi estas graveda...” Li ne povis plu paroli.

Ruijue stulte fiksrigardis Juexin sen palpebrumo, kvazaŭ ŝi ne konus lin. Ŝi staris tiamaniere antaŭ li, por ke lia avida rigardo restu sur ŝia vizago pli da tempo. Poste ŝi diris al li kun trista kaj mola voĉo, “Bone, mi obeas vin. Mi foriru.” ŝi diris al Haichen ke li voku “Paĉjo”, poste ŝi turnis sin kaj foriris.

*

*

*

Tiun nokton, escepte de Juexin, ili ĉiuj dormis en la apudlaga domo. Tra la malfermitaj fenestroj, ili povis vidi la malgajan rebrilon de la luno sur la akvo. La ruĝa lumo sur la ĉielo iom post iom forigis. Ĉio prezentis sin ordinara, krom tio, ke bojado vekis eksterordinaran

teruron. La lagakvo, portante lunlumon, ete trembrilis kiel kutime. Tamen ĝi fariĝis pli mistera kaj pli malvarma en la okuloj de la mizeraj rifuĝintoj. Precipe Ruijue kaj Mei volis scii, kiel profunda la lago estas. Ili eĉ pensis : Kiel ili sentos sin, se ili kuŝos sur ĝia fundo?

Forpasis iom da terurplena tempo. Vidinte, ke Juehui aspektas laca, sinjorino Zhou diris, ke li enlitiĝu.

Post momento, kiam li enlitiĝis kaj duondormiĝis, sinjorino Zhou subite venis al lia lito. Si levis la kulvualon kaj vekis lin. Klininte sian rondan vizaĝon super lin, ŝi milde sed serioze diris ĉe lia orelo, “Oni denove pafas nun. Ŝajne proksime. Estu singarda. Neni el endormiĝu. Se io okazos, mi tuj informos vin.” Ŝia varma elspiro tuŝis lian vizaĝon. Kun zorgemo, ŝi bone aranĝis la litkovrilon por li, mallevis la kulvualon kaj malpeze foriris.

Kvankam ŝi ne alportis bonan novaĵon al li, Juehui tamen sentis sin goja, ĉar ŝi traktis lin kiel patrino.

23

Tri aŭ kvar tagojn poste, denove animigis la kortodomaro de la familio Gao. La rifuĝintoj revenis unuj post aliaj. Kvankam la situacio ne estis tiel bona, la urba ordo jam restariĝis kaj la loĝantoj trankviliĝis tagon post tago. Nur unu afero kaŭzis al loĝantoj zorgon : soldatoj multiĝis kaj vidiĝis ĉie sur la stratoj .

Posttagmeze Juemin kaj Juehui iris al la lernejo. Kvankam oni jam denove funkciigis la lernejon, kelkaj instruistoj tamen estis forpermesitaj kaj la nombro de lernantoj malpliĝis je triono. Tiun tagon Juemin kaj Juehui ne havis lecionojn. Restinte kelkan tempon en la lernejo, ili hejmeniris. Kiam ili trairis la Nordan Pordegon, ili vidis multajn trupojn enveni tra ĝi. La soldatoj spirege kuris. Kvankam ili estis venkintoj, iliaj uniformoj tamen ne estis en ordo. Iuj el ili dorsportis pezajn pakojn, aliaj eĉ surhavis du kepojn aŭ ŝultroportis du pafilojn. La plejparto de la soldatoj aspektis lacaj .

Nelonge post kiam ili atingis la hejmon, ili aŭdis onidiron, ke la nove venintaj trupoj ne iros aliloken sed kantonmentos dise en civilaj domoj en la areo de la Norda Pordego. Komence oni ne kredis tion, sed kiam venis alia sciigo, ke soldatoj jam enloĝigis sin en malgrandajn rezidejojn ĉe la strata ekstremo, la mastroj de la familio Gao trovigis en paniko kaj konfuzo. Ili ĉiuj kolektiĝis en la ĉefhalo por trovi kontraŭrimedojn.

Enirinte, servisto Gao Zhong, kun konsternita vizaĝesprimo, raportis, ke soldatoj venos por kantonmenti. La virinoj fuĝis en la ĉambrojn por sin kaŝi, kvazaŭ soldatoj tuj enirus en la halon. Anstataŭ Grandsinjoro, kiu ankoraŭ ne revenis, Keming eliris por kontakti. Lin sekvis liaj fratoj kaj nevoj.

Ekster ilia atendo, ili vidis unu palankenon en la halo. Apude, servosoldato alparolis servistojn Yuan Cheng kaj Wen De. Li ne estis lokano de la urbo. Mezstatura, li portis uniformon en malordo. Li tens sin tre arogante. Ruĝiĝinte kaj montrante du vicojn da senordaj kaj flavaj dentoj, li diris ion, akompanate de manfrapoj sur la brusto. Vidinte Keming alproksimiĝi, li impertinente esprimis sian intencon dirante, ke la edzino de lia rotestro volas loĝi en la kortodomaro por kelka tempo. Dirinte tion, li, anstataŭ montri rideton, minace ekrigardis la vizaĝon de Keming per siaj larĝigitaj okuloj. Li prenis la manieron de ordonanto.

Keming senĉese rulis siajn okulglobojn pro kolero. Lia vizaĝo tuj paliĝis. En lia memoro neniuj alparolis lin en tiel impertinenta maniero dum lia tuta vivo, escepte de la du jaroj, kiam li studis en Japanio. Dum la vivdaŭro de kvardek du jaroj, li iam funkciis kiel pli-malpli altranga oficisto, prenis diversajn honorajn titolojn de ofico, kaj nun li estis fama advokato de la provinca ĉefurbo. Ĉu en la hejmo ĉu en socia vivo, li estis respektata kaj aliaj ĉiam obeis lin kun klinita kapo. Sed nun la

servosoldato kun malneta uniform alparolis lin sen ajna respektemo kaj eĉ senskrupule atencis lian rajton de posedanto. La humiliĝo estis tiel kruda, ke li ne povis elteni. Li vere volis vangfrapi la servosoldaton, tamen li rimarkis la pistolon ĉe lia talio. Li, posteulo de klasika erudito havis kaj sian propran fieron kaj sian propran prudenton. Li ankaŭ tenis en la menso la moralinstruon “takte kaj sekure vivi” . Tial li nur rigardis la servosoldaton per larĝigitaj okuloj longan tempon. Regante sian koleron, li diris al li ke ne estas konvena ĉambro kaj plie ne estas oportune por la edzino de la rotestro loĝi sola ĉi tie. Li petis al la servosoldato trovi pli bonan lokon.

“Ne estas konvena ĉambro? Ĉu la salono ne estas konvena loko?” La servosoldato streĉis siajn pintajn okulojn, kiuj formis literon V. Dirante, li frapetadis la pistolon. Blankaj saliveroj el inter liaj flavaj dentoj preskaŭ disflugis sur la vizaĝon de Keming.

“Ni batalis, riskante nian vivon por vi, dum vi ĝuis plezuron en la hejmo. Sed nun vi eĉ ne volas pruntedoni ĉambron al ni? Ni nepre okupos la salanon ! ” Post tio li levis la pordokurtenon de la palankeno kaj diris, “Sinjorino, bonvolu eliri . Estas senutile argumenti kun ili. Preteratenton.”

El la palankeno eliris virino kun aĝo de pli ol tridek jaroj . Ruĝe pudrita, ŝi portis helkoloran borderitan jakon kun duonmanikoj kaj svelta talio, kaj borderitan pantalonon kun larĝaj tuboj. Ĵetinte straban ekrigardon al la

viroj starantaj en la halo, ŝi, kun alte levita kapo, sekvis la servosoldaton en la direkto al la ekstera salono.

Keming mutiĝis de kolero. Li volis postkuri por reteni ilin, sed kiam li eklevis sian piedon, li tuj opiniis nedeca tion, ke li, ĝentilhomo, postkuru la putino- similan virinon ĝuste antaŭ la vizaĝoj de siaj nevoj kaj servistoj. Li haltigis siajn paŝojn kaj senrimede rigardis la virinon kaj servosoldaton eniri la eksteran salonon.

Alia granda humiliĝo kaptis lin. En tiu lukse meblita salono, multaj altranguloj kaj eminentaj personoj plezure pasigis sian tempon kaj tie diskutis pri gravaj politikaj okazaĵoj. Malgraŭ lia malaprobado, la fakto estis, ke la loko por mondume ripozi kaj interparoli fariĝas la litĉambro de tiu putino-simila virino ! Li apenaŭ povis kredi, ke tio estas vera. Sed en la salono vere sin prezentis tiu ruĝe pudrita vizaĝo kaj tie ŝi babiladis kun la servosoldato en volupta tono. La pudrita vizaĝo pikis liajn okulojn kaj tiuj voluptaj vortoj liajn orelojn. Li ne povis elteni plu. Li ne devis lasi siajn laŭleĝajn posedrajton kaj loĝrajton laŭvole atencitaj de aliaj laŭ ties volo. Li devus alpaŝi por protekti la leĝon. Aliflanke li pensis, ke se li permesos al la virino loĝi en la salono, tio ne nur profanos la dignoplenan lokon, sed ankaŭ cirkuligos voluptan venenon kaj demoralizos la tutan familion. Inspirite de la ideo “defendi moralon” kaj “protekti la leĝon”, li longpaŝe iris al la pordo de la salono kaj levinte la kurtenon, li eniris. Li severtone diris al la

virino, ke ŝi ne povas loĝi ĉi tie kaj ŝi tuj translokiĝu. Ĉi tie loĝas laŭleĝa heredanta familio, kiu ĝuas la plej altan reputacion en la urbo. Kun fervoro, li eligis tiujn vortojn unuspire sen ajna timo, sen konsidero pri la rezulto kaŭzota de ili.

Malantaŭ li staris liaj du fratoj Ke-an kaj Keding, kiuj tre maltrankviliĝis pro lia ago. Dum la Revolucio de 1911, Ke-an estis timigita de ribelantoj, kiam li oficis kiel la estro de gubernio Xichong, kaj li alivestita fuĝis al la provinca ĉefurbo, forlasante la ofican sigelilon de la guberniestro. Tial li fariĝis timema. Kelkfoje li ektiris Keming ĉe la maniko por reteni lin, sed kiam li vidis, ke lia malhelpo ne efikas, li konsternite forfuĝis, cedante sian pozicion al Juemin kaj Juehui.

Kiam Keming parolis, la servosoldato estis preta agi, sed la vortoj de la virino malhelpis lin. Parolante, ŝi ridetis sen flamiĝemo. Ŝia frivola rigardo balais la vizaĝon de Keming, kvazaŭ lude karesante lian malgrasan kaj beletan vizaĝon, kiu ankoraŭ havis spuron de juneco. De tempo al tempo ŝi aŭ ridetis aŭ metis sian fingron sur la lipoj, ŝajnigante sin atenteme aŭskulti lin. Kvankam ŝia koketa konduto neniel efikis ĉe Keming, kiu afektis ne vidi ŝin, tamen — Keding, 33-jara, starante malantaŭ li, interesiĝis pri ŝi. Li ec observis detalojn de ŝia agmaniero. Ŝi havis pufe rondan vizaĝon, kurbaĵn brovojn, paron da ĉarmaj kaj fluidecaj okuloj kaj nek tro grandan nek tro malgrandan buŝon

— tiuj mankis al lia edzino. Precipe ŝia aminda kaj svelta staturo estis pli bela ol la malalta kaj a dika korpo de lia edzino sinjorino Shen. El ŝiaj ridetoj kaj strabaj rigardoj produktiĝis nerezistebla forto. Subite ŝia rigardo falis sur la blankan vizaĝon kun alteta nazo de Keding, kiu senkonscie ruĝiĝis. Ŝi malrapide deturnis sian rigardon, montrante delikatan rideton. Tiumomente Keming jam finis sian parolon. Li staris en kolero.

“Ĉu vi jam sufiĉe parolis?” ŝi demandis tute sen kolero, kun flanken klinita kapo. Kun larĝigitaj okuloj, Keming staris muta longan tempon.

Subite la virino faris decidon. Ŝi diris al la servosoldato, “Bone, ni foriru, por ke ni ne kaŭzu malŝaton. Ĉi tie ili ne akceptas nin, kaj ni certe povas trovi iujn, kiuj bonvenigos nin.” Dirinte, ŝi sin direktis al la pordo. Ŝi malrapide movis siajn piedojn kaj delikate skuis sian korpon, kvazaŭ intence prenante amindan manieron. Keming kaj la aliaj haste flankeniĝis por ŝin tralasi.

La servosoldato ne emis foriri. Li volis flamiĝi, sed lia mastrino retenis lin. Li vole-nevole sekvis ŝin malgaje.

La portistoj forportis la palankenon kaj la servosoldato ĝin sekvis. Li ĵetis malaman rigardon al Keming, kolereme sakrante, "Eĉ du loĝantojn vi ne ŝatas akcepti. Post momento mi venigos la tutan roton da soldatoj por loĝi ĉi tie. Ĉu vi ŝatas tion? Mi ne estas facile ofendebla." Post tio, li malaperis kune kun la palankeno.

Aŭdinte la sakradon, Keming sentis malĝojon en la koro. Kaj krome, por trakti roton da soldatoj, li ne povis elpensi kontraŭrimedon. Li melankolie retiriĝis internen.

Ke-an eliris el interne Keding rakontis al li kiel Keming malbone traktis la aferon kaj kiel li ofendis la edzinon de la rotestro. “Se la tuta roto da soldatoj vere kantonmentos ĉi tie, ĉio en nia loĝejo certe estos ĵetita en plenan kaoson. Estus ne grave, se la virino kaj la servosoldato loĝus ĉi tie. Kaj plie, ni povus rifuzi loĝadon al aliaj soldatoj per tio. Nun la bona ŝanco forglitis el inter niaj fingroj ,” Keding diris kun granda bedaŭro.

“Laŭ mi estas pravo en tio, kion Keming diris. Malgraŭ ĉio, ni devas gardi nin kontraŭ malbona ago,” penseme diris Ke-an, karesante sian lipharon en la formo de inversa V.” Sed tamen, ne forgesu pri la moralinstruo ‘takte kaj sekure vivi’ . Estas preferinde agi laŭ la situacio.”

Keding kaj Ke-an iris internen, babilante pri la ĵusa okazaĵo. Jueying, Juequn kaj Jueshi sekvis ilin. Ankaŭ Juemin kaj Juehui sin direktis internen. Kiam ili eniris en la ĉefhalon, ili vidis kolektiĝintajn virinojn kun Keding kiel la centro. Kompreneble ankaŭ Ke-an ĉeestis. Juemin kaj Juehui sciis, pri kio ili babilis. Ili malrapide iris al la homamaso. Keding vere ripetis, kion li ĵus diris en la halo. Ili ne interesiĝis pri tio kaj volis foriri . Ĝuste tiam Juexin revenis.

Keding rakontis la samon al Juexin, kaj poste asertis, ke Keming

traktis la aferon sen pripenso. Ekster la atendo de la ĉeestantoj, Juexin diris, ke tio ne gravas kaj ke li havas kontraŭrimedon.

Juexin havis mezlernejan kunlernanton, kiu oficis kiel sekretario de generalo Zhang. Hodiaŭ li renkontis lin en la bazaro, kie lia oficejo troviĝis. Lia kunlernanto menciis la aferon pri loĝado de soldatoj en civilaj loĝejoj, kaj li promesis, ke li sendos anoncon al la familio Gao, post kiam li reiros al la komandejo. Tamen ĉiuj ankoraŭ ne trankviliĝis. Ili petis Juexin tuj skribi leteron por venigi la anoncon de generalo Zhang. Baldaŭ Juexin finskribis la leteron en la ĉambro kaj forsendis serviston Yuan Cheng kun ĝi. Sed eĉ tio ne povis trankviligi ilin. Ili timis, ke la roto da soldatoj entrudiĝos, antaŭ ol la leterportanto revenos. Kaj plie, tiuj soldatoj venos por fari vengon. Estos malfrue, se ili ricevos la anoncon de generalo Zhang poste. Ju pli ili pripensis, des pli ili timis. Ili ĉiuj kaŝe grumblis, ke Keming ne devis forpeli la virinon.

Post longa tempo, la servisto Yuan Cheng ankoraŭ ne revenis. La loĝantoj de la kortodomaro dronis en brula maltrankvilo. Post nelonge, soldato kun pafilo pendanta sur la ŝultro venis al la pordo de la kortodomaro kaj barbare algluis al la tabulo kun verso de koplo sur la pordo blankpaperan noton, kiu legiĝis “Loĝejo por la n-a plotono de n-a roto, n-a bataliono, n-a regimento, n-a divizio. Informiĝinte pri tio, ankaŭ Keming sentis sin streĉita, se ne paroli pri Ke-an, Keding kaj aliaj, kiuj jam sin montris senrimedaj. Feliĉe Yuan Cheng finfine revenis,

kunportante la anoncon, antaŭ ol la plotono da soldatoj atingis. Ĉiuj nun elturniĝis el la maltrankvilaj zorgoj. Ke-an kaj Keding persone deŝiris la paperslipon de sur la pordo kaj algluis al ĝi la anoncon, sur kiu estis skribita “Ordono de generalo Zhang : soldatoj estas malpermesataj loĝi en ĉi tiu civila logejo”.

Kun faciligita koro, la familianoj pasigis tiun tagon en paco. Nokte ili enlitiĝis tre frue kaj dormis profunde. Nur Keding ne povis endormiĝi. Li revokis la dumtagan okazaĵon al sia memoro. Kvankam li kuŝis apud sia edzino sinjorino Shen, tamen antaŭ liaj okuloj palpebrumadis la paro da ĉarmaj okuloj, kiujn li neniel sukcesis forigi. Tiuj okuloj grandiĝis iom post iom, ĝis la alloga vizaĝo tute reveliĝis. Ĝi vere estis lia nova eltrovo, ĉar li neniam vidis tiel belan vizaĝon kaj tiel ĉarman rideton sur ĝi. Ĝuste pro tio, ke li neniam vidis ĝin, la vizaĝo donis al li tre profundan impreson, kaj jam fariĝis nerezistebla al li. Subite li ricevis revelacion, ke tio estas senhonta kaj ke li ne devas pensi pri tiu virino, sed fakte li ne povis ne pensi pri ŝi, ĉar li jam ne povis regi sin mem.

“Kial tio estas senhonta? Kial mia patro havas kromedzinon? Ĉu mi devas vivi kun tiu malalta kaj grasa larĝbuŝulino ĝis la morto?” li pensis. Li flanken turnis sian vizaĝon kaj ĵetis malican rigardon al sia edzino, kiu eligis malpezan ronkadon. “Ne gravas,” li murmuris al si. “Mia patro ne riproĉos min.” Li montris kontentan rideton.

24

La sekvan matenon, Zhang Sheng, la servisto de sinjorino Zhang hejmenirigis ŝin kaj Qin. Mei petis hejmeniri, sed sinjorino Zhou retenis ŝin. En la sama posttagmezo sinjorino Qian alvenis per palankeno por doni dankesprimon al sinjorino Zhou.

La sinjorinoj estis forgesemaj. Cetere ili estis malproksimaj kuzinoj unu de la alia. Kelkajn jarojn post ilia disiĝo, ili tute forgesis la malagrablaĵon okazintan inter ili. Sinjorino Zhou varmkore akceptis sinjorinon Qian kaj havis intiman babilon kun ŝi. Post tio, ili ludis maĝangon, kune kun Mei kaj Ruijue. Poste, kiam Juexin revenis de sia ofico, Ruijue cedis sian lokon al li. Sidante vizaĝo kontraŭ vizaĝo, li kaj Mei malmulte interparolis kaj nur interŝanĝis okazajn mornajn rigardojn. Juexin ne havis korinklinon al ludado de maĝango kaj li kelkfoje misludis. Rimarkinte tion, Ruijue venis kaj staris malantaŭ li por helpi. Li ofte returnis la kapon por rigardi ŝin. Ilia maniero estis kaj natura kaj intima.

Vidinte ilian intimecon, Mei sentis tordiĝon en la koro. Ŝi pensis, ke se ŝia patrino estus sciinta pri ŝia enamiĝo al Juexin antaŭ lia fianĉiĝo al Ruijue, ŝi nun ne troviĝus en malĝojo kaj soleco. Je la penso pri sia malfeliĉa vivo kaj estontaj malĝojaj tagoj, ŝi ne plu povis regi sin. Ludpecoj de maĝango komencis flosi antaŭ ŝiaj okuloj. Kun tordita koro, ŝi stariĝis kaj petis Ruijue ludi anstataŭ ŝi, preteksante, ke ŝi eliros pro ia

afero. Ruijue ĵetis mildan rigardon al ŝi kaj sidiĝis senparole. Kiam Mei malrapide eliris, Ruijue dufoje levis la kapon por rigardi ŝian dorsfiguron.

Mei reiris en la ĉambron de Shuhua, en kiu ŝi loĝis dum tiuj tagoj. Tie neniu troviĝis. Kuŝiĝinte sur la lito, ŝi elfosis en la memoro detalojn pri si kaj Juexin. Ju pli ŝi pripensis, des pli malĝoja ŝi fariĝis. Fine ŝi ne povis teni sin de mallaŭta plorado kaj per poŝtuko kovris siajn okulojn. Post longe, ŝi ŝajnis senti sin multe faciligita. Tamen ĉiuj okazaĵoj de la pasinteco kaj estanteco peze premis sian koron. Ŝi kuŝis kun senfortaj korpo kaj membroj kaj iom post iom endormiĝis.

“Kuzino Mei,” milda voĉo vokis ŝin. Malferminte siajn okulojn, ŝi vidis Ruijue starantan ĉe la lito.

“Kial vi ne ludas maĝangon, bofranko?” ŝi demandis kun laca rideto. Ŝi volis sidiĝi sur la lito, sed Ruijue ne lasis ŝin tion fari, premante ŝian korpon. Ruijue sidiĝis sur la litrando kaj ame rigardis ŝian vizaĝon. Ŝi respondis, “Mi lasis mian lokon al onklino Shen. Post tio ŝi demandis kun miro, “Vi ploris pro kio?”

“Ne, mi ne ploris,” Mei respondis kun altrudita rideto.

“Ne mensogu al mi. Viaj okuloj jam ŝveliĝis pro plorado. Diru al mi, kio okazis.” Ŝi firme premis la manon de Mei.

“Mi ĵus havis inkubon kaj mi ploris en la sonĝo,” Mei senemocie diris kun altrudita rideto. Ŝia mano premata de Ruijue komencis tremeti.

“Kuzino Mei, vi certe kaŝas ion en la koro. Kial vi ne diras la veron al mi? Ĉu vi ne kredas, ke mi sincere amikiĝas kun vi kaj sincere donos al vi helpon?...” diris Ruijue plena de simpatio.

Senparola, Mei nur fiksis sian melankolian rigardon sur la afablan vizaĝon de Ruijue. La falto sur sia frunto pli klare videbliĝis kaj siaj brovoj kuntiriĝis. Ŝi malvigle skuis la kapon. Ŝiaj okuloj subite ekbrilis. Ŝi devige elpuŝis kelkajn vortojn, “Vi ne povos doni al mi helpon, bofranko.” Deturninte la kapon, ŝi mallaŭte plorsingultis, premante sian vizaĝon sur la kapkusenon.

Ankaŭ Ruijue sentis korpremiĝon. Karesante la ŝultrojn de Mei, jen leviĝantajn jen malleviĝantajn ŝi malĝoje dins, “Mi komprenas, kion vi pripensas, kuzino Mei.” Ŝi mem inklinis ekplori. “Mi scias, ke vi du antaŭe havis intiman rilaton... Tiam li vere ne estus devinta edziĝi al mi ... Nun mi ekkomprenis, kial li tiel ŝatas umeflorojn ... Kuzino Mei, kial vi ne edziniĝis al li tiam? Ni tri ĉiuj faris eraron ... Nun ni tri ĉiuj falis en la neelsaveblan dilemon ... Mi vere volus flankeniĝi kaj lasi vin ambaŭ feliĉe kunvivi. Mi...”

Retenante larmojn, Mei jam ĉesis plori. Ŝi levis la kapon, aŭdinte ploradon de Ruijue. Karesante ŝian bruston, ŝi atenteme aŭskultis Ruijue, sed ŝi tuj deturnis la kapon por ne alfronti ŝian plene larmomakulitan vizaĝon. Kiam ŝi aŭdis la lastajn vortojn de Ruijue, ŝi tuj sidiĝis kaj kovris ŝian buŝon per la mano. Sen pliaj vortoj, Ruijue apogis

ŝian kapon sur la ŝultron de Mei, plorsingultante.

“Vi miskomprenas min, bofranjo,” diris Mei. Tuj poste, ŝi korektis sin, dirante, “Mi vere ne volas mensogi al vi ... Estas niaj patrinoj, kiuj apartigis nin. Eble la sorto destinas tion, ke mi kaj li ne devas interligiĝi ... Se vi flankeniĝus, kian utilon tio alportus? Estas neeble, ke mi kaj li kunvivu dum la tuta vivo... Vi estas ankoraŭ juna, dum mia koro jam maljuniĝis ... Vidu la faltojn sur mia frunto. Ili montras al vi, kiom da vivsuferoj mi jam spertis ... Mi jam estas sur malsuprenira vojo, dum vi troviĝas en florado de la vivo ... Bofranjo, mi vere envias vin... En la homa mondo, mia vivo nur signifas simplan pasigon de tagoj. Mia ekzisto nur signifas ŝarĝon por aliaj .” Ŝi montris amaran rideton.

“Kiel popoldiro diras, nenio estas pli tragika, ol la morto de la koro . Mia koro jam mortis. Mi ne devus ĝeni vin en via domo...” ŝia voĉo ŝanĝiĝis. Ŝia tuta korpo tremetis, kvankam tre delikate, Ruijue tamen povis tion rimarki. “Kiel mi povus trankviliĝi ĉi tie?...” Post paŭzo, Mei daŭrigis kun malgaja rideto, “Se estas virinoj kun mizera sorto, jen mi estas ekzemplo. Neniu en mia familio komprenas min. Mia patrino nur zorgas pri siaj propraj aferoj. Mia frato estas ankoraŭ tre juna. Kiu konas miajn aferojn? ... Kelkfoje, kiam mi vere ne povas mildigi mian kortordiĝon, mi ploradas sola en la ĉambro aŭ kun la kapo enŝovita en litkovrilon por ne aŭdigi mian ploron... Bofranjo, ne ridu pri mia plorema. Nur de la lastaj jaroj mi estas plorema. Ekde kiam mia patrino

kaj lia duonpatrino kverelis, mi ofte ploris. Ankaŭ post kiam ni forlasis la provincan ĉefurbon, mi ploris kelkfoje. Tio estas destinita. Mi pensas, se lia patrino ne mortus, la afero estus tute malsama, ĉar ŝi tre ŝatis min. Lia patrino kaj la mia estis sangaj fratinoj kaj tenis tre intiman rilaton... Al kiu mi povus elverŝi miajn suferojn? Estas neniu, kiu volas aŭskulti mian plendon. Mi povas fari nenion krom engluti miajn larmojn..." ŝi paŭzis. Kovrante la buŝon per poŝtuko, ŝi dufoje tuis.

"Poste mi estis edziniĝita kontraŭ mia volo. Mi ne rajtis mem decidi. En la hejmo de mia edzo mi vivis tre mizeran vivon dum unu jaro. Eĉ nun mi ankoraŭ ne komprenas, kiel mi povis pasigi tian vivon. Tiam mi ne kuraĝis faligi larmojn, kvankam mi tre volis plori. Se mi estus vivinta en la hejmo de mia edzo unu aŭ du jarojn pli, mi ne estus ĉi tie hodiaŭ ... Por mi plori estis plezura afero. Mi nur rajtis fluigi larmojn, ĉar oni malpermesis al mi fari aliajn aferojn... Tamen lastatempe mi malofte larmis. Eble mia larmofonto baldaŭ sekiĝos. Du Fu^{*} diris, 'Eĉ se vi larmados ĝis la ostoj reveliĝos, la ĉielo kaj tero tamen ne kompaton montros'. Sed kiel mi povus trankviligi mian koron se mia larmofonto ne sekiĝos? ... Lastatempe, kvankam miaj larmoj malmultiĝis, mia koro tamen ofte doloretis min, kvazau ĉiuj larmoj enfluus en la koron. Ne malĝoju pro mi, bofranko. Mi ne indas je via kompato... Mi decidis ne renkontiĝi kun li, sed mi sentas, ke io altiras min al li kaj

samtempe io forpuŝas min de li. Mi bone scias, ke mi perdis ĉiajn esperojn, tamen mi sopiras al io dum ĉi tiuj tagoj. Ne riprocu min ... Nun ., mi jam decidis foriri . Bonvolu rigardi la aferon kiel inkubon. Ne prenu min kiel senkoran virinon...” Kiam ŝi parolis, ŝi ne larmis, sed nur malgaje ridetis. Ŝi ne larmis, sed ŝia koro ploris per sangaj larmoj.

Ĉiu vorto el ŝia malĝoja kaj malfeliĉa rakonto peze premis sur la koron de Ruijue, mildan kaj senteman. Ruijue atenteme aŭskultis ĉiun vorton. Ankaŭ ŝi ĉesis plori . Levinte la kapon, ŝi kun malgaja rideto kviete rigardis la vizaĝon de Mei, kiu dume montris nenian rideton. Larmoj makulis sian maldike pudritan vizaĝon, sed ili neniel detruis ŝian belecon. Kiam Mei ĉesis paroli, ŝi skuis la kapon kelkfoje kontraŭ la vizaĝo de Mei, kvazaŭ ŝi estus petolema knabino. Sur ŝiaj vangoj iom post iom aperis la ridaj kavetoj. Ŝi montris rideton — rideton malgajan, kortusan.

Ŝi tute forgesis sian propran malĝojon. Premante ambaŭmane la ŝultrojn de Mei, ŝi diris kun intima kaj klara voĉo, “Kuzino Mei, mi ne sciis, ke vi spertis tiom da suferoj. Mi ne devus eltiri de vi tiajn vortojn. Mi estas tre egoisma. Via situacio ja estas multe pli malbona ol la mia. Venu ĉi tien ofte. Kuzino Mei, mi vere ŝatas vin. Mi donas la tutan koron al vi. Vere, mi diris tion elkore. Mi havis pli aĝan fratinon, kiu malfeliĉe mortis. Se vi ne rifuzas min, ni estu fratoj . Mi konsolu vin, se ne aliaj . Se vi nur vivus feliĉe, ankaŭ mi sentus

min ĝoja. Ofte vizitu mian hejmon... Se vi promesas al mi, ke vi ofte vizitos mian hejmon, tio signifas, ke vi ne malŝatas min kaj donas al mi pardonon...”

La rigardo de Mei fariĝis tre milda. Ŝi dankeme rigardis Ruijue per sia paro da akvecaj okuloj. Depreninte ŝiajn manojn de sur siaj ŝultroj, ŝi firme premis ilin en la siaj. Ŝia korpo alpremiĝis al tiu de Ruijue. Post momento, ŝi diris, “Bofranjo , mi ne scias kiel vin danki.” Dirinte, ŝi klinis la kapon kaj absorbite karesadis ŝian paron da grasetaj manoj.

Mei tuis kelkfoje. Vidinte, ke Mei malforte anhelas, Ruijue fiksas siajn okulojn al ŝi kun zorgemo. Ŝi demandis maltrankvile, “Ĉu vi ofte tusadas?”

“Kelkfoje , ofte nokte. Lastatempe estis pli bone. Nur la brusto ofte doloras min.”

“Ĉu vi prenas medikamentojn? Vizitu kuraciston kaj resanigu vin ĝustatempe,” Ruijue diris kun granda zorgemo.

“Antaŭe mi prenis iom, sed la medikamentoj ne tiel efikis. Nun mi prenas bolusojn. Mia patrino diris, ke mia malsano ne estas grava. Tonikoj kaj bona ripozo sufiĉas,” Mei diris. Ŝia voĉo sonis aparte kompatveke.

Ruijue multe emociiĝis kaj estis kaptita de sento de forta simpatio. Ŝi avide rigardis la vizaĝon de Mei kaj samtempe firme tenis siajn manojn. Ŝiajn respektivajn sentojn ili ne povis priskribi per vortoj. Kun klinita

kapo ili mallaŭte interbabilis kelkan tempon.

Fine Ruijue stariĝis kaj diris, “Estas tempo eliri.” Ŝi iris al la tablo, malfermis tualetan skatolon, glate aranĝis la harojn antaŭ speguleto kaj iom pudris sin. Ŝi altiris Mei al la tablo, kombis kaj maldike pudris ŝin. Post do, ili eliris mano en mano.

* Du Fu (712 - 770 p . K .) granda ĉina poeto same fama kiel Li Bai.

25

La terurplena tempo rapide forpasis kaj paco estis restarigita. Almenaŭ supraĵe oni devos vivi en paco, forgesinte la inkuban militon.

Ŝanĝoj fakte komenciĝis. Generalo Zhang estis elektita de la ĉefoj de la aliancaj trupoj kiel milita gvidanto, kaj poste li enoficiĝis kiel civila administranto. Kun regpotenco en la mano, li deklaris, ke li praktikos reformojn.

Pro tio, nova etoso aperis en la socia vivo. Studentoj denove komencis aktivi. Tri novaj gazetoj eldoniĝis. La kunlernantoj de Juemin kaj Juehui iniciatis la semajnan gazeton *Aŭroro*, en kiu oni aperigis novaĵojn pri movado de nova kulturo, enkondukis novajn ideojn, kritikis kaj atakis malnovajn malraciajn ideojn kaj socisistemon.

Juehui entuziasme partoprenis laborojn de la semajna gazeto *Aŭroro*. Krome li ofte aperigis en ĝi artikolojn, kiujn li nature skribis ĉefe surbaze de novaj gazetoj el Ŝanhajo kaj Pekino, ĉar li ankoraŭ ne profunde studis la novajn ideojn nek zorge observis la socian situacion. Li posedis nenion, escepte de kelkaj konkretaj spertoj de la vivo, iom da scioj akiritaj el libroj kaj junula fervoro. Juemin okupiĝis pri lernejaj lecionoj dumtage kaj regule iris al la hejmo de Qin por helpi ŝin lerni vespere, kaj li ne estis fervora subtenanto de la gazeto.

La gazeto estis varme akceptita de la junularo. En malpli ol semajno la mil ekzempleroj de ĝia unua numero elĉerpiĝis. La dua numero same

sukcesis. Kiam la tria numero aperis, ĝi jam havigis al si ĉirkaŭ tricent abonantojn. La elito de la gazeta personaro konsistis el Zhang Huiru kaj Huang Cunren, kunlernantoj de Juehui, kaj Zhang Huanru, frato de Zhang Huiru, kiu lernis en la Supera Normala Lernejo. Ili ĉiuj estis plej admirataj amikoj de Juehui.

Post la ekeldonado de la semajna gazeto, kelkaj ŝanĝoj okazis en la vivo de Juehui. Por la unua fojo li trovis laboron, al kiu li povis dediĉi sian energion. Liaj ideoj, presitaj sur papero, distribuiĝis en miloj da ekzempleroj. Legantoj en diversaj lokoj informiĝis pri liaj pripensoj ; iuj eĉ sendis simpatiajn kaj aprobajn leterojn. En liaj okuloj, lia ĝojo eĉ karakteriziĝis de fantazio kaj nobleco. Li volis pasigi la tutan postkursan tempon en la gazetaj laboroj, sed timante, ke tio eble kaŭzos oponon de la avo kaj implikaĵojn al Granda Frato, li kaŝis sian ideon de ili .

Sed la kaŝo de Juehui fiaskis. Iun tagon Keming legis en lia ĉambro la gazeton kaj la artikolon verkitan de Juehui. Senparole li eligis nur sardonan ridon kaj foriris. Tamen li ne raportis tion al sia patro. De tiam, Juehui estis des pli singarda en la hejmo. Sian laboron, aktivadon kaj deziron li kaŝis de la familianoj, inkluzive de Juexin, ĉar li sciis, ke Granda Frato ne tute aprobas, kion li faras.

Juehui pli kaj pli interesiĝis pri la nova vivmaniero. En agado, sian junulan entuziasmon li montris ĝis la ekstremo. Dum tre mallonga tempodaŭro la redakcio de la gazeto disvolvigis en malgrandan grupon

por studi kaj propagandi la novan kulturon. Ĉiudimanĉe dekkelkaj junuloj varme diskutis pri diversaj sociaj problemoj, sidante ĉirkaŭ tabeloj sub unu granda matotegmento de la parko Shaocheng, aŭ ili kolektiĝis kelkope en ies hejmo unu aŭ du vesperojn ĉiusemajne por interparoli pri individuaj planoj por la estonteco kaj pri helpoj al aliaj. Tiuj junaj semantoj kun aĝo de ĉirkaŭ dudek jaroj jam infektiĝis je humanismaj kaj socialismaj ideoj. En diskutoj kaj interparoloj ili eĉ troige metis sur siajn ŝultrojn la devojn de socia reformado kaj liberigo de la homaro.

La folioj de presprovaĵoj, la ritma funkciado de la presmaŝino, la belaspektaj folioj nove presitaj kaj la leteroj senditaj de nekonatoj — ĉio ĉi tio impresis freŝe kaj interese en la vivo de Juehui. Antaŭe li neniam sonĝis pri ili, tamen nun ili fariĝis realaj, okupante lian junan koron soifantan al agemo.

Iom post iom Juehui profunde eniĝis en la novan medion; samtempe la distanco inter li kaj lia familio grandiĝis. Li opiniis, ke la familianoj ĉiuj ne povas kompreni lin. La avo ĉiam portis neintiman, severan vizaĝon ; sinjorino Chen ĉiam havis ruzeman vizaĝon pudritan pale ruĝa ; la duonpatrino montris komplezemon, sed ne veran zorgon pri li ; Granda Frato kiel antaŭe praktikis sian "riverencismon" ; la plena vizaĝo de bofratino, kies ventro ŝveliĝis pro gravedeco, magriĝis. Post lia dorso la geonkloj riproĉis, ke li perdis ĝentilecon kaj fariĝas

aroganta al ili. Iufoje ili kritikis lian konduton eĉ antaŭ lia duonpatrino kaj petis ŝin riproĉi lin.

Nun en la kortodomaro la ununura familiano, kiu proksimiĝis al li, estis Juemin. Sed tiu nutris sian propran esperon kaj faris siajn devojn. Ideologie ili eĉ havis rimarkeblan distancon inter si.

Estis ankoraŭ alia persono. Ĉiufoje kiam li ekpensis pri ŝia nomo, lia koro moliĝis. Almenaŭ unu persono amis lin. La junulino pure kaj sincere amis lin kaj ĉiumomente preĝis por lia feliĉo. Ĉiufoje kiam li vidis ŝian paron da komunikpovaj okuloj, brulantaj pro pura amo, li sentis, ke aspiro kreskas en lia koro. El ŝia okulparo li povis trovi ĉion bezonatan, eĉ la celon de la vivo. Foje, kiam li estis atakata de emocio kaj aspiro, li vere volis forĵeti ĉion por akiri tiun paron da okuloj. Kaj li opiniis tion farinda.

Sed kiam li iris en la eksteran mondon en la novan medion, kaj havigis al si novajn amikojn, lia vidkampo vastiĝis. Li sentis, ke alia pli vasta mondo etendiĝas antaŭ li. Tie estis solida vejno por enteni lian junan bolan sangon ; tie estis indaj laboroj, por kiuj li povis oferi sian vivon. Li venis al pli klara kompreno, ke la signifo de la homa vivo ne estas tiel simpla kaj ke la junulina okulparo estas sensignifa kompare kun la vasta mondo. Li ne povis forĵeti ĉion nur por akiri tiun paron da okuloj.

Lastatempe li legis vervoplenan artikolon en *Luktado* , duonmonata

gazeto el Pekino. En ĝi la aŭtoro diris, ke la modernaj ĉinaj junuloj ne estas luksaĵoj. Ili naskiĝas ne por ĝui plezuron, sed por sperti suferojn. Vivante en ĉi tia malluma socio, ili havas gravan respondecon. Ili devas preni sur siajn ŝultrojn ĉiujn sociajn problemojn por solvi ilin unu post alia. Kompreneble ili ne havas energion por zorgi pri aliaj aferoj. Ĉe la fino de la artikolo la aŭtoro predike admonis siajn junajn legantojn, “Vi devas vin gardi kontraŭ enamiĝo. Ne facile implikiĝu en amaferon.” Kvankam la teoria bazo de la artikolo estis malforta, siatempe ĝi tamen vere konvinkis nemalmulte da junuloj, precipe tiujn, kiuj nutris aspiron sindoni por servi al la socia progreso kaj ambicion reformi la socion. Ĝi ankaŭ multe influis Juehui. Li legis ĝin kun tremetanta koro kaj ekstreme kortuŝite ĵuris fariĝi tia junulo, kian la verkisto postulis. Tiumomente en lia menso aperis la bela aspekto de imagita socio. La amo de la pura junulino tute forvaporigis el lia kapo.

Tamen tio estis nur momenta. Kiam li estis okupita en la ekstera mondo, li vere forgesis Mingfeng. Sed kiam li revenis al la hejmo — la dezerteca hejmo, li ne povis ne pensi pri ŝi kaj ne povis ne afliktiĝi pro sopirado al ŝi. En lia menso okazis konflikto inter du fortoj — inter la socio kaj Mingfeng. Ŝi estis sola. Cetere ŝi staris kontraŭ la tuta feŭdisma etiko kun ĉiuj anoj de la familio Gao kiel siaj malamikoj. En lia mensa konflikto Mingfeng tute frakasiĝis.

Pri tio Mingfeng mem kompreneble sciis nenion. Ŝi ankoraŭ kovis

ardan amon al li kaj ofte kaŝe benis lin. Ŝi atendis, foje preĝante, ke li iun tagon savos ŝin el la ŝlimejo. Ŝia vivo ne plu estis tiel mizera kiel antaŭe kaj ŝiaj mastroj kondukis pli afable al ŝi. Kaj la pura amo kuraĝigis ŝin, alportis al ŝi sorĉajn miraĝojn kaj igis ŝin forgesi ĉion realan. Tamen ŝi ĉiam estis humila. Eĉ en la miraĝlando, ŝi ne havis sufiĉan kuraĝon. Ŝi eĉ ne imagis ke ŝi kaj li kunvivus egalece. Ŝi volis nur esti obeema sklavo sub lia sola dispono. Ŝajnis al ŝi, ke tio estus ŝia plej granda feliĉo, se ŝi nur povus realigi tiun sonĝon. Sed la realo ofte kontraŭas la homan volon. Ĝi senkompatate detruas la esperojn de multaj homoj. Post nelonge Mingfeng jam eksciis, kia fino atendas ŝin.

Nelonge post la eldono de la kvara numero de la gazeto *Aŭroro*, Juehui kaj Juemin iris iun vesperon al la hejmo de Qin. Sinjorino Zhang kaj Qin babilis ĉe la fenestro. Vidinte ilin eniri, sinjorino Zhang ordonis al servistino elpreni du seĝojn kaj invitis ilin kunbabilii.

“Mi jam legis la trian numeron de via gazeto. Mi estas certa, ke vi estas la verkinto de la artikolo atakanta la malnovmodan familion. Kial vi uzis la strangan nomon Glavtinto kiel vian pseŭdonimon?” Qin diris al Juehui kun rideto.

Ridetante Juehui argumentis, “Kiel vi certiĝis, ke la verkinto estas mi? Mi insistas, ke ne.”

“Mi ne kredas vin. Mi rekonas vian esprimmanieron en la artikolo. Se vi neas, mi demandu Duan Kuzon.” Ŝi dume turnis la kapon por

rigardi Juemin, kiu ridetante kapjesis.

“Do mi petas, ke vi skribu unu aŭ du artikolojn por nia gazeto, ĉu bone?” Juehui petis, kaptante la ŝancon.

“Vi scias, ke mi ne estas bona verkanto. Kial vi pikas al mi la vundon? Sufiĉas, ke mi estu leganto,” respondis Qin modeste.

“La kvara numero estas presata. En ĝi troviĝas artikolo, kiu rekomendas mallongan hararon al virinoj. Sed ĝi estas verkita de viro. Oni diskutis pri la problemo ankaŭ en Ŝanhajaj gazetoj. En grandaj urboj kiel Ŝanhajo kaj Pekino iuj virinoj jam tondis al si la harplektojn. En nia provinco neniuj menciis tion. Estas dezirinde, ke vi virinoj skribu artikolojn por esprimi vian opinion. Nia gazeto volonte aperigos ilin.”

Qin subtile ridetis. Ŝia paro da brilaj okuloj fiksiĝis sur Juehui. Ŝi diris varme sed mallaŭte, “En la lernejo, ni varme diskutas pri tiu problemo jam de kelkaj tagoj. Nature plejparto el ni aprobas fortondon de la harplektoj. Du aŭ tri kunlernantinoj volis tondi al si la harplektojn, sed ili timis, ke io eventuale okazos al ili. Tial ili ne kuraĝis tondi. Al ĉiuj mankas decidemo kaj kuraĝo. Xu Qianru jam decidis fortondi siajn harplektojn, sed ŝi ankoraŭ ne faris. La komenco estas vere nefacila. Ni devas multe propagandi en la gazetaro.”

“Kaj vi?” Juehui demandis ridetante, kvazaŭ intence defiante Qin.

Qin ĵetis rigardon al sia patrino. Sinjorino Zhang kuŝis en la kanseĝo kun ridetanta vizaĝo kaj duone fermitaj okuloj, kvazaŭ sen atento pri ilia

interparolo. Pri tiu kutima sinteno de sinjorino Zhang, Juemin kaj Juehui ne sentis surpriziĝon. Ili ne plu atentis ŝin.

“Mi? Atendu kaj vidu.” Alia rideto ekludis sur la vizaĝo de Qin. Juehui pensis, ke ŝi estas vere saĝa. Ŝi ne donis definitivan respondon nek montris malfortecon.

“Kaj via artikolo?” Juehui ne malstreĉis sian demandadon.

Ridetante, ŝi ne donis respondon. Post iom da meditado, ŝi mallaŭte diris, “Bone, mi skribos por via gazeto... Pri hartondado la avantaĝoj kompreneble estas multaj, kiaj konformeco al higieno, ŝparo de tempo, oportuneco al laboro kaj malpliigo de malestimaj sentoj al virino. Tiuj punktoj ĉiuj povas esti pridiskutataj. Mi ne scias, ĉu la artikolo aperigita en via gazeto havas samajn opiniojn kiel mi. Se jes, estas nenecese por mi skribi artikolon.”

Ĝojmiene, Juehui tuj diris, “Ne tute samajn opiniojn ŝi havas. Rapide elskribu. Ni certe aperigos ĝin en la venonta numero.”

Post momento Qin demandis Juemin : “Kiam okazos la amuza prezentado de via lernejo? Ĉi tiu semestro baldaŭ finiĝos.”

“Verŝajne ĝi ne okazos. Nun oni eĉ ne mencias ĝin,” respondis Juemin. “Pasintjare ni uzis multan tempon por provludi la teatraĵon *Trezorinsulo*. Tamen ni eĉ ne havos ŝanon por prezenti ĝin sur la scenejo. Vere domaĝe! Tute pro la milita konflikto. Mi ankoraŭ memoras, ke Juehui kaj mi estis obsedataj de timo, ke ni havigos al ni malstriktajn

okcidentajn vestojn aŭ eĉ tute ne scios kiel surmeti ilin, antaŭ ol ni suriros la scenejon. En nia lernejo, escepte de la anglo sinjoro Zhu, kiu portas okcidentajn vestojn ĉiutage, kaj la lernejestro, kiu havas okcidentajn kostumojn kaj portas ilin laŭkutime dum la ĉiujara amuza prezentado, ja neniu alia portas tian veston.”

“Krom tio, ankaŭ la enskribo de knabinoj nuliĝis pro la milita konflikto. Ĉi tiu semestro baldaŭ finiĝos, sed neniu mencias ĝin, eĉ la lernejestro restas silenta pri ĝi. Fakte li estas tia homo, kiu ŝatas fari promesojn sen efektivigo,” diris Juehui kun indigno. Juemin ĵetis al li malkontentan rigardon, kvazaŭ riproĉante, ke li ne devas sciigi Qin pri tio.

Tio, kion Juehui diris, vere efikis. La vizaĝo de Qin malheliĝis. Kun zorgemo, ŝi mallaŭte demandis Juemin, “Ĉu vere?” Ŝi avide atendis lian respondon, esperante, ke li pruvos, ke Juehui diris la vortojn nur por trompi ŝin.

Juemin ne kuraĝis rigardi ŝiajn okulojn. Li timis vidi ŝian vizaĝesprimon post la mensa bato. Li deturnis la kapon kaj respondis kun melankolia voĉo, “Mi ne scias, kiel la afero statas nun. Tamen laŭ nuna stato, eble malgrandas la espero enskribi knabinojn. Estas ne facile iniciati aferon. Kaj cetere tio ankaŭ bezonas grandan kuraĝon.” Sciante, ke liaj vortoj senesperigos ŝin, li klopodis konsoli ŝin, “Qin, nia lernejo ne estas tiel bone funkciigata. Ne estas bedaŭro, ke vi ne povas eniri ĝin.

Mi konsilas al vi studi en altlemejo de Ŝanhajo aŭ Pekino, se vi havos ŝanon. Cetere vi abiturientiĝos nur en la venonta jaro. Ĉar nia lemejo enskribas lernantojn, kiuj havas la klerecon de abituriento, vi tiel havos pli grandan certecon, kiam vi partoprenos en la enira ekzameno post via diplomitiĝo. Tiam oni eble jam estos nuliginta la malpermeson enskribi knabinojn.” La vortojn Juemin diris nur por konsoli ŝin, ne konsiderante kiom da eblo troviĝas en ili.

Komprenante tion, Qin diris plu nenion. Ŝi sciis, ke estas multaj videblaj kaj nevideblaj obstakloj ĉirkaŭ ŝi, kiuj baras al ŝi la vojon al feliĉo. Por venki tiujn obstaklojn, ŝi devas havi pli da kuraĝo kaj energio.

Tri tagojn poste Qin finis sian artikolon. Sur la blankaj folioj ŝia manskribo sin montris bela kaj nets. Juehui forprenis ĝin kiel trezoron. La kvina numero de la gazeto aperigis ĝin kun notoj de Juehui ĉe ĝia komenco. Poste la artikolo de Xu Qianru aperis en la sesa numero. Pro tio, pli ol dudek lernantinoj alsendis aprobajn leterojn. Dum mallonga tempo la problemo pri fortonto de harplektoj al virinoj skuis la publikon. Xu Qianru fariĝis la vojhakanta pioniro, kiu trarompis ĉiajn obstaklojn kaj starigis la ekzemplon.

Iun matenon Qin iris en la lernejon. Ĉe angulo de la sportejo, starante ĉe saliko, Xu Qianru ridetante babiladis kun lernantinoj ĉirkaŭ si. Qin enpuŝis sin en la grupon. Vidinte, ke aliaj koncentras sian rigardon sur ŝian kapon, ankaŭ ŝi direktis sian rigardon al ŝi. Kun mirego ŝi trovis

ŝian kapon aparte alloga hodiaŭ . Qianru turnis la kapon por respondi demandon de kunlemantino malantaŭ si. Ŝia nuko briletis antaŭ la okuloj de Qin, kiu vidis pecon da neĝe blanka haŭto super la malalta kolumo . Pli supre estis nete tonditaj haroj, loze pendantaj malantaŭ la oreloj. La antaŭa glata dika harplekto jam cedis lokon al mallonge tonditaj haroj, kiuj ĝuste atingis la orelradikojn. Ŝia kapo montriĝis des pli freŝe aminda kaj altira, precipe kiam ŝi elokvente parolis en gracia maniero.

Kvankam Qin aprobis fortondon de harplektoj ŝi tamen timis, ke la aspekto de la kapo poste fariĝos nebela. Vidinte la kapon de Xu Qianru, ŝi liberiĝis de la maltrankvilo. Tamen ŝi subite sentis sin mizera antaŭ Xu Qianru. Kun envio kaj admiro, ŝi rigardis ŝian nukon kaj intime babilis kun ŝi. Ŝi eĉ sentis honoron, ke ŝi havas Xu Qianru kiel sian amikinson.

“Kiel vi fortondis la harplekton?” demandis Qin kun rideto.

Ridetante, Qianru rigardis Qin. Kun gesto ŝi klarvoĉe diris, “Tondilon en la mano . La harplekto tuj falis.” Ĉe tio ŝi imitis la manieron de tondado per fingroj .

“Mi ne kredas, ke tio tiel simplas,” diris iu kunlemantino. “Kiu tondis la harojn al vi?”

“Kiu povas esti?” Qianru ridetis. “Tio estis neniu alia ol mia maljuna mamnutristino. Krom ŝi, en mia hejmo ne estas alia, kiu povas fari tion. Mia patro kompreneble ne tondas al mi la harojn.”

“Maljuna mamnutristino? Ĉu ŝi volis fari tion?” demandis Qin

mirigite.

“Kial ne? Ŝi faras tion, kion mi volas. Ŝi ĉiam min obeas. Ĉar mia patro aprobas mian ideon, li nature ne levas kontraŭadon. Eĉ se li kontraŭus, li povus fari nenion. Mi faras, kion mi volas. Neniu rajtas malhelpi min.” Kiam Qianru parolis, ŝi sin montris tre decidema, kun fiera rideto sur la vizaĝo.

“Bone dirite. Morgaŭ ankaŭ mi fortondos al mi la harplekton,” diris malalta lernantino kun ruĝiĝinta vizaĝo.

“Wen, mi scias, ke vi estas sufiĉe kuraĝa por fari tion,” Qianru aprobe balancis la kapon al la kunlernantino. Ŝia rigardo balais la vizaĝon de ĉirkaŭstarantoj. Ŝi scivolis, kial neniu eĥas krom tiu. “Kiu alia kuraĝas fortondi al si la harplekton?” ŝi moke demandis.

“Mi,” sonis akuta voĉo en la malantaŭo. Enŝoviĝis lernantino kun malgrasa vizaĝo. En la lernejo ŝi ŝatis sportojn. Pro tio, ke ŝi estis la plej aĝa lernantino, ŝi ricevis la kromnomon “Maljuna Miss*”. Ankaŭ ŝi estis plenumanto de siaj vortoj.

La rigardo de Qianru falis sur la vizaĝon de Qin. Ŝi demandis, “Kaj vi?”

Qin abrupte sentis, ke si ne povas elteni ŝian rigardon. Ŝia vizaĝo tuj skarlate ruĝiĝis. Kun mallevita kapo ŝi eligis nenion vorton dum longa tempo. Ŝi mem ne estis certa, ĉu ŝi havas sufiĉe da kuraĝo fortondi al si la harplekton.

“Qin, mi komprenas vin. Via situacio estas malfacila,” diris Qianru per sonora voĉo. Qin ne sciis, ĉu Qianru primokas aŭ simpatias. “En tia ĝentilhoma familio oni rajtas nur voĉlegi poemojn, fari divenan drinkludon, ludi maĝangon, kvereladi kaj simile. Jam estas grandanima favoro, ke oni permesas al vi lerni en la lernejo. Se vi faros ion originalan, ekzemple fortondi la harplekton kiel viroj, certe ĉiuj familianoj forte oponos. En via familio estas multaj konfuceanoj .

Ĉiuj ĉirkaŭstarantoj eksplodis de ridego. Ili ĉiuj pafis sian rigardon al la vizaĝo de Qin, kiu tuj sentis akran atakon de hontemo kaj pento. Ŝiaj larmoj nereteneble elverŝiĝis. Ŝi silente foriris sola

Qianru daŭrigis, “Nun granda kuraĝo estas bezonata por fortondi la harplekton. Ĝus kiam mi venis al la lernejo, sekvis min knabo-lernantoj kaj friponoj. Gestante kaj ridante, ili kriis al mi fivortojn kiel ‘mal-granda bonzino’ kaj ‘anaspostaĵo’ , sed mi iris antaŭen, spite al tio. Kiam mi ekiris, la maljuna mamnutristino persvadis min palankeni por eviti tiajn malbonulojn. Mi ne timas. Mi volas provi mian kuraĝon. Kial mi timu ilin? Ankaŭ mi estas homo. Mia afero koncernas neniun alian. Mi faros, kion mi volas... Ili povas fari nenion kontraŭ mi.” Poste, grincigante la dentojn, ŝi indigne diris, “Tiuj voluptemuloj ja estas abomenaj. Ili alkroĉiĝas ĉie. Kiel homo kun malforta volo povus elteni tion? Unuvorte, ĉiuj viroj estas malvirtaj, neniuj el ili estas bona.”

“Do vi ne edziniĝos, ĉu?” diris kunlernantino, kiu ŝatis fari

ŝercojn, ŝprucigante sian ridon.

“Mi? Mi ne edziniĝos,” Qianru fiere diris. Kaj ŝi moke daŭrigis, “Malsimile al vi, mi ne tage kaj nokte sopiras al ideala edzo. Vi ĉiam parolas pri via kuzo. Kiu scias, kian rilaton vi ambaŭ havas. Rong, ĉu via kuzo skribas leterojn al vi?” Parolante, ŝi ne povis deteni sin de rido.

Rong estis tiu ŝercema lernantino. Aŭdinte tion, ŝi tute ruĝiĝis. Ŝi ekkriis la unua por venĝo kaj aliaj knabinoj sekvis ŝin. Kun rideto Qianru fuĝis el la homamaso.

Kiam ŝi kuris al la klasĉambro, ŝi subite vidis Qin gape starante sub alia saliko. Tiam ŝi ekpensis, ke ŝi ne devus diri tiujn vortojn al Qin. Pro konsciencriproĉo ŝi volis iri al Qin por peti pardonon, sed ŝi apenaŭ faris du paŝojn, aŭdiĝis sonorado por komenci lecionon.

En la klasĉambro Xu Qianru kaj Qin okupis unu saman pupitron. Sur la podio 50-jara ĉinlingva instruisto, kun presbiopaj okulvitroj, klarigis klasikan eseon el la lernolibro. Sed la lernantoj turnis neniom da atento al li. Iuj legis romanon, aliaj mallaŭte voĉlegis el lernolibro de la angla, triaj trikis kaj kvaraj interflustris.

Vidinte, ke Qin distrite rigardas la malfermitan lernolibron sur la pupitro, Qianru deŝiris folion el notlibro, skribis kelkajn liniojn kaj senvorte alpuŝis ĝin al ŝi. La linioj legigis, “Ĉu vi malamas min? Tiujn vortojn mi diris senintence. Mi ne volis primoki vin. Se mi scius, ke tiaj

vortoj pikus vin, mi ne dirus. Pardonu min.”

Leginte, Qin malrapide prenis la plumon, skribis kelkajn liniojn sur la sama papero kaj ŝovis ĝin al Qianru. Ŝiaj linioj diris, “Vi miskomprenas min. Mi ne malamas vin. Male mi admiras kaj envias vin. Vi havas kuraĝon, sed mi ne. Vi scias mian esperon kaj mian deziron. Vi scias ankaŭ mian situacion. Kion mi faru, viaopinie?”

“Mi ne kredas, ke vi estas malkuraĝa. Ĉu vi ankoraŭ memoras vian diron, ke ni devas defii ĉion kaj firme luktadi por elhaki vojon por fratinoj de venontaj generacioj?”

“Nur nun mi vidas, ke mi vere estas malkuraĝa. Mi starigis al mi esperon. Mi decidis renkonte marŝi al ĝi, spite al ĉio. Sed kiam mi alproksimiĝis al ĝi, mi sentis timon kaj skrupulojn. Mi ne kuraĝis marŝi kun firmaj paŝoj.”

“Ĉu vi ne scias, ke tiamaniere vi lokos vin en pli mizeran situacion?”

“Mi amas kaj mian estontecon kaj mian patrinon. Ŝi kontraŭas tiajn aferojn kiel lernigo de knaboj kaj knabinoj en la sama lernejo kaj fortondo de harplekto al virinoj. Antaŭe mi pensis, ke mi devas fari, kion mi volas, malgraŭ moko kaj riproĉoj de la patrino kaj parencoj. Sed kiam mi povas facile kontentigi mian deziron nur post eta klopodo, mi ekpensas pri la granda bato, kiun mia ago trudos al mia patrino. Mia koro moliĝas kaj mia volo ŝanceliĝas. Kiel vidvino, ŝi pene plenkreskigis min. Ŝi ĉiam tiel amas kaj zorgas min. Kontraŭe, mi

kaŭzas al ŝi mokojn de la socia publiko, riproĉojn de parencoj kaj disrompiĝon de sia espero. La bato estas tiel peza, ke ŝi ne povas elteni. Por ŝi, mi preferas oferi mian estontecon.”

“Qin, ĉu vi ne scias, ke tia ofero estas sensignifa? Se ni devas oferi nian vivon, ni ne rajtas fordoni nin nur por unu persono, sed por sennombraj fratinaj de venontaj generacioj. Se pro nia ofero, ili akiros feliĉon, tia oferado estos inda kaj signifoplena.” La senordaj ideografiaĵoj de Qianru perfidis sian senliman indignon. Du folioj konsumiĝis per la skriboj.

“Qianru, tio estas la diferenco inter ni. Via racio povas konkeri emociion, dum la mia ofte estas konkerita de emocio. Teorie mi ne povas aserti, ke viaj vortoj ne estas pravaj sed fakte estas neeble por mi agi laŭ viaj vortoj. Kiam mi ekpensas pri mia patrino, mia koro moliĝas. Miaopinie, mi preferas oferi mian vivon por la patrino, kiu amas min kaj estas amata de mi, ol por tiuj fratinaj de venontaj generacioj, kies vizaĝojn mi eĉ ne povos vidi.”

“Ĉu tiuj vortoj elvenas el via korfundo? Se via patrino edzinigos vin al analfabeta fikomercisto aŭ mezaĝa oficisto aŭ riĉa dando, ĉu vi ne ribelos kontraŭ tio? Ĉu vi povos oferi vian vivon por ŝi pro tio? Tuj respondu al mi. Ne evitu!” Denove furioze malordaj ideografiaĵoj.

“Ne demandu min pri ĉi tiu problemo, ne demandu min pri ĉi tiu problemo, mi petas.” Estis du larmogutoj sur la paperfolio.

“Mi elmetu al vi alian demandon. Mi scias, ke vi kaj via kuzo Juemin enamiĝas unu al la alia. Ni supozu, ke via kuzo estus filo de malriĉa familio kaj filo de riĉa familio samtempe sendus svatistino al via patrino. Se vi insistus edziniĝi al via kuzo, via patrino dirus al vi kun larmoj, ‘Mi pene plenkreskigis vin kun la espero, ke vi edziniĝos al riĉa familio por vivi feliĉe. Tiel mi povus trankviliĝi. Sed nun vi insistas edziniĝi al malriĉa homo por travivi suferojn. Vi ne indas esti mia filino.’ Kion vi tiam farus? Jes, mi scias, ke kiam patrino elektas sian bofilon, ŝi demandas sian filinon, ‘Ĉu vi volas ĝui feliĉan vivon aŭ sperti mizeron?’ La elekto de la patrino nature estas ĝui feliĉan vivon. La spiritan malĝojon de senama geedziĝo ŝi ne prenas en konsideron. Ĉu la patrino havas la rajton postuli de sia filino tian oferon? Ne, ŝi ne havas tian rajton. Ekzemple, vi rakontis al mi ion pri via Granda Frato kaj kuzino Mei. Se via patrino aranĝus por vi la saman sorton kiel tiun de Mei, ĉu vi obeus ŝin? Ĉu vi volus esti manipulata de aliaj la tutan vivon kiel Mei?” Ĉe la fino Qianru aldonis ses-sep demandsignojn.

“Ne demandu min pri ĉi tiu problemo, mi petas. Mia koro estas terure konfuzita. Lasu min fari zorgan pripensadon.”

“Kial vi ankoraŭ ne malfermis viajn okulojn? Ne hezitu plu. Ĉar vi vivas en la malnovmoda familio jam de longa tempo, la malnova moro profunde radikiĝis en via menso. Se vi ne klopodos tute elturniĝi el ĝi ,

vi renkontos la saman sorton kiel Mei...”

Ĉi-foje Qin ne respondis. Qianru turnis la kapon por rigardi ŝin. Kiam ŝi vidis larmoperlojn en la okuloj de Qin, ŝia koro moliĝis. Ŝi etendis sian manon kaj firme tenis la manon de Qin sur la genuo. Ŝi sentis ŝian manon tremeti kaj ŝi premis ĝin pli firme. Se ili ne estus en la klasĉambro, ŝi vere estus brakuminta Qin. Ŝi ĵetis sian rigardon al la podio kaj vidis la instruiston skribi sur la nigra tabulo kun la dorso al la lernantinoj. Ŝi alŝovis sian buŝon al la orelo de Qin kaj diris mallaŭte, “Eble miaj vortoj estis tro drastaj. Sed mi faris tion pro amzorgo al vi. Mi esperas, ke vi fariĝos kuraĝa junulino. Mi ne volas, ke vi ricevu la saman sorton kiel Mei. Mi konsilas vin kolekti kuraĝon por lukti. Tiu, kiu marŝas kun la epoko, estos pagita. Sed tiu, kiu postrestas de la epoko, pentos la tutan vivon.”

Qin ne respondis. Tamen, turninte sian kapon, ŝi dankeme ekrigardis Qianru kaj silente balancis la kapon.

Finiĝis la ĉinlingva leciono de du lernohoroj. Stariĝinte, Qianru tiris Qin eksteren. Ĉe la pordo ili haltis por cedi vojon al la instruisto. Li subite rimarkis la kapon de Qianru. Ĵetinte terurplenan rigardon al ŝiaj mallongaj tonditaj haroj, li haste forkuris, kvazaŭ li estus renkontinta diablon. Kun alte levita kapo Qianru sekvis lin eksteren. Ŝia vizaĝo eĉ ne ruĝiĝis. Ŝi nur eligis serion da sarkasmaj ridoj. Poste ŝi tiris Qin al saliko sur la sportejo por elverŝi sian koron. Ĉar la instruisto, kiu devis uzi la

trian lernohoron petis forpermeson, ili babiladis preskaŭ unu horon kaj poste reiris al la klasĉambro por la 4-a lernohoro de la mateno.

Posttagmeze, kiam Qin kaj Qianru volis hejmeniri, la malalta lernantino Wen kaj “Maljuna Miss” retenis ilin, petante, ke Qianru fortondu al ili la harplektojn.

Dekkelkaj lernantinoj interpuŝiĝis en la litĉambro de Wen. Riglinte la pordon, ili sidigis ŝin ĉe la fenestro. Qianru tuj fortondis ŝian harplekton. Tenante la tondilon en la mano, Qianru tondetis siajn harojn ĝis ŝi montris sin kontenta. “Maljuna Miss” ne estis tiel zorgema pri siaj haroj kiel Wen. Qianru rapide aranĝis ŝiajn harojn post mallonga tempo.

Subite sonis frapoj sur la pordo. Tio signis, ke la inspektoro alproksimiĝas. Ili malfermis la pordon kaj disiris.

Qin kaj Qianru trairis kelkajn stratojn. Qin sentis, ke la pasantoj fiksas la rigardon sur ilia kapo kaj vizago, kvazaŭ ankaŭ ŝi estus fortondinta al si la harplekton. Nun ŝi estis eksponata sub la rigardoj de malestimo kaj humiligo. Samtempe en iliajn orelojn svarme penetris fivortoj el la buŝoj de tiuj kiuj sekvis ilin. Kun ruĝiĝinta vizaĝo ŝi ne kuraĝis levi la kapon por babili kun Qianru. Ŝi nur rapidigis siajn paŝojn antaŭen.

Ĉe vojkruciĝo, kiam Qianru diris ĝisrevidon, Qin tamen insiste retenis ŝin, volante, ke ŝi akompanu ŝin ĝis ŝia domo. Qin diris, ke sola

iranto eble renkontos malagrablaĵon, sed du irantoj kuraĝigos unu la alian.

Fakte Qin havis kroman intencon por inviti Qianru al sia hejmo. Ŝi volis profiti la ŝancon por observi la sintenon de sia patrino pri fortando de harplekto de knabinoj, kaj aliflanke, ŝi esperis, ke Qianru konvinkos ŝian patrinon per sia elokventa lango. Kvankam sinjorino Zhang ne komentis pri hartando antaŭ la vizaĝo de Qianru, tamen el la parolo kaj sintenado de sia patrino, Qin eksciis, ke tiu kontraŭas fortondon de harplekto.

Vespere, kiam Qianru jam hejmeniris, sinjorino Zhang vee diris, “Eĉ tiel bona junulino lernas inventi originalaĵon. Kun tia kapo ŝi similas nek fraŭlinon nek bonzinon, tamen pro frua morto de sia patrino, ŝi estas libera de severa edukado kaj faras, kion ŝi volas. Kia ŝi fariĝos estonte? Estas bedaŭrinde.” Dirante, ŝi eligis vesperon. Ŝi sentis, ke la mondo fariĝas pli stranga tagon post tago. Ŝi ne kapablis diveni la estontan aspekton de la mondo. Ŝi penis rememori la oran tempon, kiun ŝi pasigis dum siaj junaj tagoj. Subite ŝi trovis Qin portantan vizaĝesprimon de petemo kaj parolemo. Ŝi mirigite demandis, “Kian aferon vi havas, mia filineto?”

“Panjo, mi volas fortondi mian harplekton kiel Qianru,” diris Qin kun mallevita kapo .

“Kion vi diris! Kiel Qianru? Ĉu vi volas, ke aliaj primoku min pro

mia malserioza eduko al vi?” sinjorino Zhang surprizite diris kvazaŭ neatendite trafita de granda bato. Ŝi eĉ ne kredis siajn orelojn.

“Ne estas malbone, se mi imitu Qanru!” Qin respondis kun ruĝiĝinta vizaĝo. Kvankam ŝi sentis, ke duono de la espero jam foriĝis, ŝi tamen streĉis sian kuraĝon, “En nia lernejo multaj kunlernantinoj jam fortendis siajn harplektojn. Estas multaj avantaĝoj de hartondo, kiel ekzemple, oportuneco kaj belaspekteco ...” Kiam ŝi estis preta fari detalan klarigon, ŝia patrino interrompis ŝin.

Sinjorino Zhang malpacience svingis la manon, “Mi ne aŭskultas vin. Mi ne povas konvinki vin, ĉar vi havas multajn pravigojn. Vi havas multajn apartajn postulojn: hodiaŭ vi volas fari ĉi tion kaj morgaŭ tion... Nun mi diru al vi alian aferon. Antaŭ kelkaj tagoj via onklino Qian venis por svati vin. Ŝi diris, ke la proponanta familio estas riĉa kaj la filo estas bela. Kvankam li ne havas grandan klercon, la riĉaĵo de lia hejmo tamen sufiĉe vivtenos lin la tutan vivon. Via onklino urĝis min konsenti al la edziĝa propono. Sed mi pensis, ke vi certe ne konsentos, tial mi simple rifuzis ŝin, pretekstante, ke vi estas ankoraŭ juna kaj vi krome estas mia solfilino. Ni prefere prokrastu vian edziniĝon je kelkaj jaroj ... Sed nun estas pli bone edzinigi vin pli frue, alie vi faros novaĵon ĉiutage. Se vi makulos vian reputacion, neniue edzinigos vin,” sinjorino Zhang malrapide diris kun laca rideto.

Qin ne sciis, kion ŝia patrino havas en la menso, sed la vortoj jam

donis sufiĉe grandan baton al Qin. “La proponanta familio estas riĉa”, “la filo estas bela”, “li ne havas grandan klerecon”, “estas pli bone edzinigi vin pli frue” — tiuj vortoj sonis alterne ĉe ŝiaj oreloj. Antaŭ ŝiaj okuloj aperis longega vojo, kiun kovris kadavroj de junulinoj. La vojo etendiĝis sen fino. Ŝi komprenis, ke la vojo estis konstruita antaŭ miloj da jaroj. La tero estis saturita de sango kaj larmoj de tiuj junulinoj, kiuj estis katenitaj kaj pelitaj sur la vojon. Oni igis ilin surgenui, elverŝigis iliajn sangon kaj larmojn sur la teron kaj lasis iliajn korpojn esti disŝiritaj kaj englutitaj de sovaĝaj bestoj. Komence ili ĝemadis, malĝoje ploradis kaj preĝadis, esperante, ke oni savos ilin de la vojo. Sed post nelonge ilia espero diskrevis kaj iliaj sango kaj larmoj elĉerpiĝis. Ili falis kaj tie faris la lastan spiron. Dum miloj da jaroj la vojo ruinigis sennombrajn junulinajn vivojn kaj elsuĉis sangon kaj larmojn de sennombraj junulinoj. Sur la vojo ne estis senmakulitaj kadavroj. Tiuj junulinoj ĉiuj tute elverŝis siajn sangon kaj larmojn, kaj faris lastan luktadon, antaŭ ol ili fermis siajn ankoraŭ fajrantajn okulojn kaj falis teren. Ho! Tie enteriĝis sennombraj korŝiraj historioj!

En Qin naskiĝis soifanta sento por sin turni al la justeco. En ŝia menso kelkaj granda demandoj ŝvebis — “Sinofero, al kiu tia sinofero alportis feliĉon finfine?” “Ĉu nunaj kaj estontaj junulinoj devas daŭre oferi sian junecon kaj tute elverŝi siajn larmojn kaj sangon, nur pro tio, ke tiu vojo

sate sorbis la sangon kaj larmojn de junulinoj dum la pasintaj jarmiloj?”

“Ĉu virinoj povas servi nur kiel ludiloj de viroj?” Ŝia lasta granda demando estis “Ĉu vi volus forlasi vian amaton kaj servi kiel ludilo de alia?” Ŝajnis, ke ŝi jam genuas sur la vojo, aŭdis plorĝemon kaj antaŭ ŝiaj okuloj malklare aperis la sceno de sango kaj karno. Ŝi ne havis kuraĝon respondi la demandojn. Kia justeco ! Ŝia espero tute frakasiĝis. Ŝi ne plu povis elteni kaj ekploris, kovrante la vizaĝon per ambaŭ manoj.

SinJORINO Zhang mire stariĝis kaj iris al Qin por milde konsoli ŝin,

“Kio okazas, mia filineto? Kiuj vortoj pikas al vi la koron?”

Qin ploradis kun ankoraŭ pli granda malĝojo. Ŝi liberigis sin de la mano de sia patrino, kvazaŭ ŝi luktus kontraŭ iu. Ŝi malĝoje murmuris,

“Mi ne prenos tiun vojon. Mi volas fariĝi vera homo, vera homo kiel viro... Mi ne prenos tiun vojon. Mi prenos novan vojon, novan vojon !”

* Miss - (angle) fraŭlino.

26

En la sama nokto, kiam Qin ploris dolore, Mingfeng estis alvokita antaŭ sinjorinon Zhou en malfrua nokto. La malhela lumo de olelampo rivelis la altiran sed senespriman vizaĝon de sinjorino Zhou. Mingfeng ne sciis, kion ŝia mastrino diros al ŝi, tamen ŝi estis certa, ke ŝi ne dons bonan sciigon al ŝi. Ŝi ekmemoris, ke la maljuna edzino de Feng Leshan vizitis Grandsinjoron kaj sinjorinon Chen en tiu tago posttagmeze. Kun tremetanta koro, ŝi staris antaŭ sinjorino Zhou. Eĉ ŝia rigardo ŝanceliĝis. Dum la konversacio la pudrita ronda vizaĝo de sinjorino Zhou ŝveliĝis en grandan rondaĵon kaj senĉese skuiĝis antaŭ siaj okuloj. Tio des pli timigis ŝin.

“Mingfeng, vi laboris ĉi tie kelkajn jarojn. Estas jam sufiĉe,” sinjorino Zhou ekdiris malrapide, kvankam ŝi ĉiam parolis pli rapide ol aliaj. Ju ph ŝi pluparolis, des pli rapide ŝi eligis la vortojn, kvazaŭ bidoj senhalte ruladus sin en glata telero. “Mi pensas, ke vi certe volas forlasi ĉi tiun lokon. Hodiaŭ Grandsinjoro diris, ke vi estos donacita al Feng Leshan kiel konkubino. La unua tago de la venonta monato estos bonaŭgura. Oni tiun tagon irigos vin al la familio Feng. Hodiaŭ estas la dudek-oka. Restas ankoraŭ tri tagoj. De morgaŭ vi bezonos fari nenion. Bone ripozu du tagojn por vin pretigi. En la hejmo de la familio Feng vi devos bone priservi gegrandsinjorojn Feng. Laŭdire grandsinjoro Feng kondukas strange kaj grandsinjorino Feng estas flamiĝema. Obeu ilian

bontrovon. Ne estu obstinema... Ili havas ankaŭ filojn, bofilinojn kaj nepojn, kiuj loĝas kun ili. Vi devas respekti ankaŭ ilin. Vi servas kiel servoknabino ĉe mi, sed vi ne ricevis ion el tio. Nun mi aranĝas vian edziniĝon kaj sentas trankviliĝon en la koro. La familio Feng estas sufiĉe riĉa. Se vi nur kontentos pri via pozicio kaj kondutos dece, vi ne bezonos maltrankviliĝi pri vestoj kaj nutraĵoj dum la tuta vivo. Via situacio estos multe pli bona ol tiu de Xi-er... En via kelkjara servado, mi rekompencis vin per nenio. Morgaŭ mi farigos por vi du kompletojn da bonaj vestoj kaj preparos kelkajn juvelojn...” La plorado de Mingfeng interrompis ĝin. Kvankam ĉiu vorto glave pikis al Mingfeng la koron, ŝi tamen povis fari nenion krom lasi ilin ponardi. Ŝi ne havis armilon por defendi sin. Ŝia espero tute frakasiĝis. Oni eĉ estis deprenonta la amon, de kiu dependis ŝia vivo. Kvankam la maljunulon kun stranga temperamento ŝi estis priservonta per sia junco, neniu estis montronta kompaton al ŝi. En tiaj hejmoj la sorto de konkubinoj estis klara : malĝoja plorado, kruela batado kaj spirita turmentado. Tiuj fariĝos la grava parto ankaŭ de ŝia vivo. La nura diferenco nun estis, ke ŝi devos meti sian korpon sub la laŭplaĉan turmentadon de la maljunulo kun stranga temperamento.

Fariĝi konkubino — kia honto tio estis! “Konkubiniĝi” estis unu el la insultaj vortoj de servoknabinoj . Post okjara penlaborado kaj fidela priservado, tio estis ŝia nura repago — submetiĝi sub la turmentadon de

alia. Ŝia perspektivo estis nepenetreble malluma. Eĉ la luma radio, kiun ŝia pura amo alportis, estis disrumpita. La afabla vizaĝo de junulo glitis de antaŭ ŝi kaj sekve multaj torditaj vizaĝoj kun malica rideto minace alpremiĝis. Ŝi timeme kovris sian vizaĝon per ambaŭ manoj, kvazaŭ baraktante kun timiga vizia figuro. Subite sonis voĉo ĉe ŝiaj oreloj, “Ĉio estas destinita. Vi neniel povas ŝanĝi ĝin.” Ŝi estis tute kaptita de nerezistebla malespero. Ŝi nereteneble ploris malĝoje.

La vortoj de sinjorino Zhou ruliĝadis kiel bidoj. Ili torentis kaj malfacile ĉesis. Nun ŝi aŭdis ŝian malĝojan ploradon kaj ekatentis la neordinaran agmanieron de Mingfeng. Ferminte la buŝon kun mirego, ŝi atente observis ŝian konduton. Ŝi ankoraŭ ne komprenis, kial Mingfeng ploras tiel ĉagrene, tamen ŝi estis kortuŝita. Ŝi mildvoĉe demandis, “Mingfeng, kio okazas al vi? Pro kio vi ploras?”

“Sinjorino, mi ne volas foriri!” Mingfeng diris plorvoĉe, “mi preferas esti servoknabino ĉi tie dum la tuta vivo por priservi la sinjorinojn, fraŭlinojn kaj sinjoridojn ... Sinjorino, mi petas, ne forsendu min. Mi ankoraŭ ne sufiĉe faris servadon ĉi tie ... Nur ok jarojn mi restis ĉi tie... Sinjorino, mi estas ankoraŭ juna. Ne forsendu min, mi petas...”

La tragika sceno tuŝis la malofte tuŝitan patrinecan instinkton de sinjorino Zhou, kaj ŝi diris kun malĝoja rideto, “Mi konjektis, ke vi ne volos, ĉar grandsinjoro Feng vere estas en profunda aĝo. Vi estas sufiĉe juna por esti lia nepino. Sed tio estas intenco de nia grandsinjoro kaj mi

devas obei. Se vi bone priservos grandsinjoron Feng, via situacio ne estos malbona. Malgraŭ ĉio, tio estas pli bona ol edziniĝi al malriĉa junulo, al kiu mankas vestoj kaj nutraĵoj...”

“Sinjorino, mi preferas suferi froston kaj malsaton ol fariĝi konkubino...” Post tiuj vortoj Mingfeng sentis sin elĉerpita. Ŝiaj kruroj cedis kaj ŝi falis sur la genuojn. Tenante la genuojn de sinjorino Zhou, ŝi petegis, “Sinjorino, ne forsendu min, mi petas. Mi volas esti servoknabino ĉi tie dum la tuta vivo. Mi volas priservi vin la tutan vivon ... Sinjorino, kompatu min. Mi estas ankoraŭ juna ! ... Vi povas bati min, insulti min laŭplaĉe. Nur ne sendu min al la familio Feng. Mi ne volas vivi tie ... Mi timas. Mi timas vivi tie ... Sinjorino montru al mi vian bonkorecon Kompatu min ... Sinjorino, ne irigu min tien !”

Ŝi estis konkerita de pli granda malĝojo. Ŝi sentis, ke io tajde leviĝas el ŝia korfundo . Multaj tragikaj vortoj svarmis al la gorgo, sed estis retenitaj, kvazaŭ ŝia buŝo estus ŝtopita . Ne povante eligi vorton plu, ŝi nur mallaŭte plorsingultis kun kreskanta malĝojo. Ŝajnis al ŝi, ke nur elkora plorado povas moderigi sian malĝojon .

Ŝia plorado vekis paseon ĉe sinjorino Zhou. Rigardante la plorantan knabinon, kiu, genuante, klinis la kapon super siaj genuoj, ankaŭ ŝi sentis malgajon. Ŝia patrineca amo tute kirliĝis. Anstataŭ forpuŝi Mingfeng, ŝi milde karesis ŝiajn harojn, kiel ŝia propra patrino. Ŝi ame kaj simpatie diris, “Ankaŭ mi ne volus forsendi vin al la familio

Feng. Tamen nia grandsinjoro jam donis promeson. Li estas obstinema. Li ĉiam agas laŭ sia volo. Estante lia bofilino, kiel mi povus kontraŭstari lian volon? ... Nun ĉio estas nesavebla. Ĉiaokaze vi devos foriri la unuan tagon de la venonta monato ... Ne ploru. Plorado ne helpas.. . Tie vi certe vivos bone. Ne timu. Bonkorulo ĉiam ricevas bonan rekompencan... Tuj stariĝu. Reiru por enlitiĝi.”

Mingfeng des pli firme ĉirkaŭprenis la gambojn de sinjorino Zhou, sentante, ke nur ili povas elsavi ŝin. Kun sia lasta klopodo ŝi malespere petis plorvoĉe, “Sinjorino, ĉu vi vere ne volas savi min? Ĉu vi sentas neniom da kompato al mi? ... Savu min. Mi preferas morti ol iri al li!” Levinte la kapon, ŝi alfrontis sinjorinon Zhou per sia plene larmomakulita vizaĝo. Ŝi prenis sian manon kaj petis, “Sinjorino, savu min.” Ŝia voĉo sonis triste.

Sinjorino Zhou skuadis la kapon, malĝoje dirante , “Elturniĝo ne eblas. Mi ne rajtas reteni vin. Eĉ mi ne povas ne obei la ordonon de Grandsinjoro.. . Tuj stairĝu . Enlitiĝu nun.” Dirante, ŝi liberigis sian manon de tiu de Mingfeng por helpi ŝin starigi.

Mingfeng silente stariĝis sub la helpo de sinjorino Zhou. Senrimede starante antaŭ ŝi, Mingfeng aspektis kiel songanto. Post momento ŝi promenis sian rigardon en la ĉirkaŭa malhelo. Ŝia plorado malkreskis ĝis plorsingultado. Kaj fine ŝi tute sukcesis bridi sin. Ŝi penis sufoki la malĝojon. Forviŝinte la larmojn per la basko, ŝi malvarme kaj malgaje

diris, “Sinjorino, mi obeas vin. ..” Sinjorino Zhou lace stariĝis kaj interrompis ŝin “Bone, mi trankviligas, car vi volas obei.”

Mingfeng sciis, ke estas vane peti plu. Ŝi konis la temperamenton de la sinjorino. Ŝi malvigle diris, “Sinjorino, mi iru enlitiĝi.” Post tio ŝi, malrapide paŝante, foriris. Ŝi firme premis la bruston per la mano, timante, ke ŝia koro eksplodus.

Vidinte Mingfeng eliri, sinjorino Zhou suspiris. Tiumomente ŝi naskis simpaton en la koro. Ŝi sentis bedaŭron, ĉar ŝi ne povis helpi ŝin elturniĝi. Sed unu horon poste ŝi jam tute forgesis ĉion pri la servoknabino.

Mallumo regis kaj neniu vidiĝis en la korto. Pala lamplumo brilis en la ĉambro de Juehui. Mingfeng, kiu volis reiri al la servistina ĉambro, estis altirita de la lamplumo kaj senbrue iris al la fenestro de lia ĉambro. La kurteno el blanka gazo pendis super la triklapa fenestro. Lamplumo elfiltriĝis kaj ĵetis belan desegnaĵon sur la teron. Nun en ŝiaj okuloj la kurteno, vitrofenestroj kaj la ĉambro fariĝis tre amindaj. Starante sur la ŝtona ŝtuparo, ŝi fikse suprenrigardis la kurtenon el blanka gazo. Ŝi penis reteni sian spiradon kaj resti kiel eble plej sensone por ne ĝeni lin en la ĉambro.

Post kelka tempo la kurteno el blanka gazo bele kalejdoskopis. Miraĝe aperis belaspektaj personoj, viraj kaj virinaj, lukse vestitaj kaj bonkonduktaj. Ili preterpasis ŝin kaj, ĵetinte al ŝi malestiman rigardon

rapide foriris kun flanken turnita kapo. En la homfluo subite sin prezentis la persono tage kaj nokte sopirata. Ĵetinte al ŝi afablan rigardon, li haltis, ŝajne parolonta, sed la sekvantaj personoj forte alpuŝiĝis kaj malaperigis lin. Ŝi okule serĉis lin, sed la kurteno sensone kaŝis malantaŭ ŝi ĉion en la ĉambro. Nenio videbliĝis.

Alproksimiĝinte al la fenestro, ŝi klopodis enrigardi kun streĉita kolo, sed la fenestrobreto estis tro alta por ŝi. Farinte du provojn, sed vane, ŝi malespere retroiris kelkajn paŝojn. Tamen pro malzorgo ŝi tuŝis fenestrotabulon kaj eligis subtilan sonon. Sekve de tio aŭdiĝis tuso en la ĉambro, ĝuste de tiu persono. Li ankoraŭ ne enlitiĝis. Ŝi atendis tie, dezirante, ke li levu la kurtenon por rigardi. Tamen silento ree regis ene. Aŭdiĝis nur la susureto de skrapado de plumo sur papero.

Ŝi denove alproksimiĝis kaj faris du malpezajn frapojn sur la fenestro, esperante, ke li aŭdos. Sed nur kelkaj sonetoj elflugis. Ŝajnis, ke li movetis la seĝon. Kaj poste aŭdiĝis pli rapida susuro de plumo.

Ŝi sciis, ke delikata frapado ne efikas, sed se ŝi peze frapus la fenestron, ŝi ĝenus lian fraton Juemin, kiu loĝis kun li en la sama ĉambro. Malgraŭ tio, kun lasta espero, ŝi ree aliris al la fenestro kaj faris tri delikatajn frapojn, aldonante per mallaŭta voko “Tria Sinjorido”. Ŝi retroiris du paŝojn kaj silente atendis. Ŝi estis certa, ke li montros sian vizaĝon. Sed post kelka tempo ankoraŭ nenia sono respondis al ŝia voko.

Nur la plumo pli rapide skrapis sur papero. Poste ŝi aŭdis, ke li parolis al si mire, “Jam la dua horo nun? ... Mi ankoraŭ havos lecionojn morgaŭ ...” La plumo denove skrapis la paperon.

Ŝi stupore staris. Ŝi komprenis, ke ŝia daŭra frapado sur la fenestro ne helpas, ĉar li ne aŭdos ĝin. Tamen ŝi ne riproĉis lin, sed male ŝi des pli amis lin. Liaj vortoj alkrociĝeme ŝvebis ĉe ŝiaj oreloj. Por ŝi ili sonis pli bele ol melodio. Ŝi remaĉis la vortojn, sentante, ke li ĝuste troviĝas apud ŝi, vigla kaj varma kiel kutime.

Subite ŝi estis kaptita de alia penso. Ŝi pensis, ke li bezonos virinon, kiu amas lin, zorgas pri li kaj priservas lin. En la mondo neniuj tiel arde amas lin kiel ŝi. Ŝi volas fari ĉion por li. Tamen unu muro staris inter li kaj ŝi. Post nelonge, precize post tri tagoj, oni sendos ŝin al la familio Feng. Kiam ŝi troviĝos tie, ŝi neniam havos ŝancon renkontiĝi kun li. Kiel ajn ŝi estos insultata kaj kiel ajn ŝi malĝoje ĝemados, li neniel informiĝos. Kaj li ne povos savi ŝin. Disiĝo, la eternal disiĝo estas pli korŝira ol la morto. Ŝi sentis, ke tia vivo ne indas je ŝia bedaŭro. Kiam ŝi diris al sinjorino Zhou, “Mi preferas morti ol iri al grandsinjoro Feng”, ŝi ne intencis minaci ŝin, sed ŝi vere pensis pri “morto”. Unua Fraŭlino, kiam ŝi vivis, ofte diris al ŝi, ke “morto” estas la nura elirejo por la virinoj kun malbona sorto. Mingfeng plene kredis tion.

Longa suspiro en la ĉambro vekis ŝin el la konfuzitaj pensoj. Kun malgaja sento, ŝi vagigis sian rigardon ĉirkaŭen. Kvieto kaj mallumo

volvis ŝin. Subite simila sceno de antaŭ kelkaj monatoj venis en ŝian memoron. La diferenco estis, ke ŝi estis en la ĉambro kaj li ekster la fenestro. Kaj la onidiro, kiun li subaŭskultis ekster la fenestro, nun jam farigis realo. Ŝi remaĉis la detalojn de tiu nokto. Pensante pri lia sinteno kaj liaj vortoj “Mi ĵuras al vi, ke mi ne amos aliajn...,” ŝi sentis sian koron dolore tordita. Ŝiaj okuloj malsekiĝis de larmoj. La lamplumo kompateme karesis ŝiajn okulojn. Avidigardante la lamplumon, ŝi estis iom post iom kaptita de deziro enkuri la ĉambron, surgenuiĝi antaŭ li, ploure rakonti al li siajn suferojn kaj peti, ke li savu ŝin el la malfeliĉa situacio. Ŝi volis esti lia sklavo, ami kaj priservi lin la tutan vivon.

Ŝi decidis enkuri, tamen inka mallumo subite falis. La lamplumo en la ĉambro estingiĝis. Ŝi larĝigis la okulojn, sed ŝi nenion vidis. Ne povante movi siajn piedojn, ŝi staris solece en la mallumo. Senkompate la mallumo atakis ŝin de ĉirkaŭe. Post kelka tempo ŝi komencis movi la piedojn kaj sin direktis al sia ĉambro. En ŝiaj okuloj nenio ekzistis plu. Ŝi nur palpiris en la mallumo. Post longa tempo ŝi atingis la pordon de sia ĉambro kaj eniris, puŝmalferminte la neriglitan pordon.

En la ĉambro la meĉodebrulaĵo de la olelampo pli malfortigis la palan lamplumon. Malhelaj ombroj vidiĝis tie kaj tie. Ĉe ambaŭ flankoj de la ĉambro kuŝis kelkaj korpoj kiel kadavroj sur la lignotabulaj litoj. Peza ronkado leviĝis el la lito de la korpulenta servistino Zhang. Ĝi karambolis kun la muroj, donante timigan impreson. Kiam Mingfeng

eniris, ŝi surpriziĝis de la sceno. Ŝi tuj haltis kaj rigardis ĉirkaŭen kun streĉita atento. Malvigle irinte al la lampo, ŝi eltiris la meĉon kaj forigis la meĉodebrulaĵon. La ĉambro tuj multe pliheliĝis. Malbutonumonte, ŝi subite estis subpremata de malĝojo. Kaj ŝi surventre falis sur la liton kaj ekploris kun la kapo sur la litkovrilo. Post tempeto ŝiaj larmoj jam malsekigis grandan pecon de la litkovrilo. Ŝia malĝojo kreskis. Ŝia plorado vekis la maljunan servistinon Huang, kiu demandis kun malklara voĉo, “Mingfeng, pro kio vi ploras?”

Plorante, Mingfeng ne donis respondon. Post diro de kelkaj konsolaj vortoj Huang turnis sin sur alian flankon kaj denove falis en profundan dormon. Mingfeng ploris kaj ploris ĝis ŝi eniris sonĝlandon.

En la sekva tago Mingfeng tute ŝanĝis sian konduton. Tuttage ŝi portis senridan mienon, sin montris distriĝema dum la laboro kaj tenis sin fore de aliaj. Ekvidante iun, ŝi tuj suspektis, ke tiu jam sciigis pri ŝia afero. Ŝi ŝajne vidis malestimon kaj mokon sur ties vizaĝo kaj ŝi tuj fuĝis. Vidinte geservistojn aŭ palankenistojn interbabili, ŝi tuj suspektis, ke ili interparolas pri ŝia afero. Vortoj kiel “kromedzino” kaj “konkubino” ŝajne estis sur ĉies lipoj, eĉ ŝiaj mastroj komencis elbuŝigi ilin. Ŝi ŝajne aŭdis kvinan sinjoron Keding diri, “Kiel bedaŭrinde estas, ke oni edzinigos tiun belan knabinon al tiu maljunulo.” Alian fojon ŝi ŝajne aŭdis la korpulentan servistinon Zhang malestime diri en la kuirejo, “Ba, la nematura junulino konkubinĝos al la maljunulo. Se estus mi, mi

neniel konsentus, kiom ajn da mono li havas!” Ĉie aŭdiĝis similaj mokoĵ kaj insultoj. Mingfeng kuraĝis iri nenien. Escepte de la tempo de tagmanĝo kaj vespermanĝo, ŝi ĉiam kaŝis sin aŭ en sia ĉambro aŭ en la ĝardeno. Kelkfoje servoknabinoj Wan-er, Qian-er kaj Xi-er babilis kun ŝi, sed ili estis tre okupitaj. Ili povis havi nur malmulte da libertempo por viziti kaj konsoli ŝin. Maljuna servistino Huang milde interbabilis kun ŝi, sed antaŭ ol ŝi finis paroli, Mingfeng faris pretekston kaj foriris. Ŝi timis aŭdi tiajn vortojn kiel “kondukti dece” kaj “obeema al via sorto”.

Dum tiuj du tagoj Mingfeng volis sin turni al Juehui por rakonti pri la afero. Ĉiumomente ŝi atendis la ŝancon. Tamen, lastatempe Juehui kaj Juemin ŝajnis pli okupitaj ol antaŭe. Ĉiutage ili iris frumatene al la lernejo kaj hejmenvenis malfrue posttagmeze ; post vespermanĝo ili eliris kaj ne revenis ĝis la deka horo; reveninte, ili skribis artikolojn kaj legis librojn en la ĉambro. Estis malfacile por Mingfeng renkontiĝi kun Juehui. Eĉ se ili renkontiĝis, li nur ĵetis kelkajn amemajn kaj afablajn rigardojn aŭ montris rideton al ŝi , sed malofte haltis por diri kelkajn vortojn al ŝi. Kompreneble tiuj estis signoj de lia amo, kaj ŝi konsideris, ke li okupiĝas pri seriozaj aferoj. Kvankam li sin montris iom fremda de ŝi , ŝi tamen ne naskis plendojn kontraŭ li.

Sed ŝi havis nur du tagojn. Tiel mallonge! Ŝi devis interparoli kun Juehui por diri al li sian malĝojon kaj aŭdi liajn opiniojn. Ĉiaokaze ŝi

devis interkonsiliĝi kun li pri la afero. Tamen li ŝajne sciis nenion pri la afero, nek havis tempon por ŝi. En la ĝardeno ne estis liaj piedsignoj. Nur dum la tagmango ŝi povis lin vidi, sed fininte la mangon li tuj foriris tiel haste, ke ŝi eĉ ne povis kuratingi lin por interŝanĝi kelkajn vortojn. Li revenis tre malfrue en la nokto. Estis neeble por ŝi havigi al si ŝancon interbabili kun li kiel antaŭe.

La 30-a tago de la monato fine alvenis. En la kortodomaro estis malmultaj kiuj sciigis pri la afero de Mingfeng. Ŝia afero staris ekster la scio de Juehui pro du kaŭzoj . Unue, pro neatendita okazaĵo en la redakcio de la gazeto, Juehui koncentris sian tutan energion sur ĝi kaj ne havis tempon zorgi pri hejmaj aferoj ; due, kiam li estis hejme, li okupis sin pri skribado de artikoloj kaj legado de libroj kaj ne havis ŝancon informiĝi pri la afero de Mingfeng.

Al Juehui la 30-a estis nur la lasta tago de la monato, dum al Mingfeng ĝi estis la lasta tago de la vivo. Ŝia sorto estis decidota tiun tagon : eble ili disiĝos por eterne, eble ili restos kune por ĉiam. Sed tiu lasta eblo ŝajnis nula. Tion ŝi sciis. Kompreneble ŝi tiam deziris lian savon, por ĉiam esti ĉe li. Sed ilin apartigis nefaligebla muro. Tio estis la malsamo de socia pozicio. Ankaŭ tion ŝi sciis. Kiam ŝi foje diris al li “Ne, ne, mi ne havas tian benplenan sorton”, ŝi jam komprenis tion. Kvankam li promesis preni ŝin, tamen Grandsinjoro, la sinjorinoj kaj aliaj en la kortodomaro ĉiuj staris kontraŭ ili. Kion li povus fari? Eĉ sinjorino

Zhou povis fari nenion krom obei la ordonon de Grandsinjoro, por ne paroli pri Juehui kiel lia nepo. Ŝia sorto ŝajne estis decidita, jam neŝanĝebla. Tamen ŝi ne povis forlasi la lastan esperon. Ŝi ne povis volonte preni la vojon de pereco sen ajna bedaŭro. Ŝi volis pluvivi kaj bone pluvivi. Ŝi volis kapti iun ajn esperon. Ŝajnis, ke ŝi trompas sin mem ĉar ŝi sciis, ke ekzistas nenia espero kaj ne povas ekzisti ia espero.

Tiun saman nokton, kun tremetanta koro, ŝi atendis por renkontiĝi kun Juehui. Kiam li revenis, jam estis la naŭa. Alpaŝinte al la fenestro kaj aŭdinte la voĉon de Juemin, ŝi sentis timon. Hezitema, ŝi nek kuraĝis eniri nek volis foriri kun bedaŭro, ĉar, se ŝi preterlasus la nokton, ŝi ne plu povus intervidiĝi kun li por eterne.

Post malpacienca atendado, Mingfeng aŭdis paŝbruon en la ĉambro. Sciante, ke iu eliras, ŝi tuj sin kaŝis flanken. Nigra silueto efektive eliris. Estis Juemin. Vidinte lin iri malproksimen, ŝi haste eniris en la ĉambron.

En la lumo de elektra lampo Juehui skribis kun mallevita kapo super la tablo. Aŭdinte la paŝbruon, li ne levis la kapon kaj eĉ ne distingis kies paŝbruo ĝi estas. Li absorbiĝis en skribado de artikolo.

Vidinte, ke li ne levas la kapon, Mingfeng alpaŝis al la tablo kaj timeme sed mildvoĉe vokis, “Tria Sinjorido.”

“Estas vi, Mingfeng?” li diris, levinte la kapon mire. Li ekridetis al ŝi. “Kion vi volas?”

“Mi volas vidi vin. ..” Alparolante, ŝi stulte rigardis lian ridetantan

vizaĝon.

Antaŭ ol ŝi finis sian parolon, li prenis la paroltemon, “Ĉu vi plendas kontraŭ mi, pro tio ke mi ne interparolis kun vi dum ĉi tiuj tagoj? Ĉu vi pensas, ke mi ignoras vin?” Li milde ridetis. “Ne, ne suspektu. Vidu, kiel okupita mi estas dum ĉi tiuj tagoj! Mi kaj preparas lecionojn kaj skribas artikolojn kaj faras aliajn aferojn.” Fingre montrante grandan amason da manuskriptoj kaj kelkajn gazetojn, li diris, “Mi estas tiel okupita kiel formiko... Post du tagoj, mi estos libera. Post du tagoj ... Mi promesas al vi tempon por interbabili . Post du tagoj .”

“Post du tagoj ...” ŝi malespere kaj malĝoje skandis, kvazaŭ ŝi ne komprenus ilian sencon. Poste ŝi distriĝeme demandis, “Post du tagoj?”

“Jes,” li ridetante respondis. “Post du tagoj, mi finos tiujn aferojn. Nur atendu du tagojn. Post du tagoj mi interbabilos kun vi pri multaj aferoj.” Post tio, li ree klinis la kapon por daŭrigi sian skribadon.

“Tria Sinjorido, mi volas diri kelkajn vortojn al vi...” Ŝi penis reteni larmojn kaj sufoki la plorvoĉon.

Koncize dirinte, “Mingfeng, ĉu vi ne vidas, ke mi estas okupita?”, li levis la kapon. Kiam li vidis larmojn brili en ŝiaj okuloj, lia koro moliĝis. Ekpreninte ŝian manon, li stariĝis kaj mildvoĉe demandis kun zorgemo, “Kiu miskulpigis vin? Ne malĝoju.”

Li volis forlasi sian laboron kaj promeni kun ŝi en la ĝardeno por konsoli ŝin. Sed kiam li pensis, ke li devos morgaŭ matene prezenti

la artikolojn kaj kiam li ekpensis pri la batalo de la gazeto, li ŝanĝis sian ideon.

“Estu pacienca. Post du tagoj mi certe bone interkonsiliĝos kun vi. Kaj mi certe donos helpon al vi. Morgaŭ mi serĉos vin. Nun lasu min skribi en trankvilo.” Dirinte, li forlasis ŝian manon. Vidinte, ke ŝi avide rigardas lin, li sentis impulson de emocio. Ne sciante kial, li subite ambaŭmane prenis ŝian vizaĝon kaj kisis ŝian buŝon. Farinte rideton al ŝi, li reiris al la seĝo. Ĵetinte alian rigardon al ŝi kaj klininte la kapon, li prenis la plumon por daŭrigi la skribadon. Tamen lia koro brue batis, ĉar li la unuan fojon kisis ŝin.

Senparole Mingfeng stulte staris tie. Ŝi eĉ ne konsciis tion, pri kio ŝi pensas kaj kian senton ŝi havas tiam. Ŝi delikate karesis siajn lipojn kisitajn la unuan fojon. Post momento ŝi ree murmuris, “Post du tagoj ...”

Aŭdiĝis fajfado ekstere. Juehui levis la kapon kaj urĝis ŝin, “Tuj foriru. Dua Sinjorido revenas.”

Kvazaŭ vekiĝinte el la sonĝo, Mingfeng tuj paliĝis. Ŝiaj lipoj movetiĝis, sed ili ellasis neniun vorton. Ŝi kelkfoje direktis sian tre mildan kaj iom malgajan rigardon al li. Subite ŝiaj okuloj ekbrilis kaj larmoj eltorentis. Ŝi devige elpelis la voĉon el la gorĝo, “Tria Sinjorido.” La voĉo sonis ekstreme tragika. Juehui surprizite levis la kapon kaj vidis ŝian dorsfiguron malaperi ĉe la pordo.

“Virinoj vere estas strangaj,” li vee parolis al si. Poste li ree mallevis

la kapon por skribi.

Juemin eniris. Li tuj demandis, “Ĉu Mingfeng ĵus venis?”

“Jes,” Juehui simple respondis post longa moment. Li ne levis la kapon de la skribaĵo por rigardi lin.

“Ŝi ne estas tiel ordinara kiel aliaj servoknabinoj. Ŝi estas kaj saĝa kaj ĉarma, kaj krome iom legopova. Kia domaĝo ! ...” Juemin veis.

“Kion vi diris? Pro kio vi diris ‘kia domaĝo?’” Juehui surprizite demandis, demetinte la plumon.

“Ĉu vi ankoraŭ ne scias, ke Mingfeng baldaŭ edzinigos?”

“Mingfeng baldaŭ edziniĝos ! Kiu diris tion al vi? Mi ne kredas ! Ŝi estas tro juna !”

“La avo jam donis ŝin al Feng Leshan kiel lian konkubinon.”

“Feng Leshan? Mi ne kredas! Li estas grava membro de la Konfuceanisma Societo, ĉu ne? Li jam aĝas sesdek jarojn. Ĉu li ankoraŭ prenas kromedzinon?”

“Ĉu vi forgesis, ke Feng Leshan kaj aliaj aperigis liston de belaj aktorinoj de teatraĵo? *Tajdo de Studentoj* publikigis artikolon por severe ataki ilin pro tio. Tiaj homoj kiel li povas fari ĉion, ĉar ili estas riĉaj kaj famaj en la provinco. Morgaŭ li forprenos ŝin. Mi vere sentas bedaŭron pri Mingfeng. Ŝi estas nur deksepjara!”

“Kial mi ne informiĝis pri tio pli frue? ... Ho, mi certe aŭdis tion, sed kial mi ne povas rememori ion pri tio?” Juehui laŭte diris. Li tuj

stariĝis kaj sin direktis eksteren. Li ŝiris al si la harojn, tremetante tra la tuta korpo.

“Morgaŭ!”, “geedzigo!”, “konkubino!” kaj “Feng Leshan ”— tiuj vortoj vipadis la kapon de Juehui. Li sentis sian kapon diskrevonta. Post kiam li eliris el la pordo, tragika krio tuj sonis ĉe liaj oreloj. Li subite trovis, ke la malluma mondo ĉirkaŭas lin. Tomba kvieto regis, kvazaŭ ĉiuj estaĵoj formortus. Kien li devas iri en ĉi tiu vasta mondo? Li ĉirkaŭvadis. Li ŝiris al si la harojn kaj frapis al si la bruston. Tio tamen ne povis kvietigi lian koron.

Li subite ekkomprenis. Ŝi, kun agonianta malespero, ĵus venis por peti helpon. Ĉar ŝi fidas lian amon kaj ĉar ŝi amas lin, ŝi venis tien por peti lin plenumi sian promeson, por peti lin protekti ŝin kaj elsavi ŝin el la manoj de Feng Leshan. Tamen, kion li dons al ŝi? Nenion. Li dons nenion — nek helpon nek simpatiecon nek kompaton. Li forsendis ŝin eĉ sen aŭskulti ŝian malĝojan rakonton. Nun ŝi foriris, ŝi foriris eterne. Morgaŭ nokte, kuŝante en la sino de tiu damninda maljunulo, ŝi malĝoje priploros sian ruinigitan junecon kaj samtempe malbenos tiun, kiu trompe akiris ŝian puran amon kaj poste sendis ŝin en la tigran faŭkon. Tiu penso estis tro terura, ke li ne povis elporti.

Iri al ŝi, li devis iri al ŝi por peti pardonon.

Alpaŝinte al la pordo de la servistinoj, li malpeze puŝmalfermis ĝin. Nigra mallumo regis en la ĉambro. Li mallaŭte vokis “Mingfeng”

dufoje, sed neniŭ respondo venis. Ĉu ŝi jam enlitiĝis? Li ne povis eniri por vekti ŝin, ĉar kelkaj aliaj servistinoj dormis tie. Li reiris al sia propra ĉambro, sed ne povante sidi kviete, li denove eliris. Ankoraŭfoje li aliris al la pordo de la servistinoj. Li malpeze puŝmalfermis la pordon kaj ronkado el la ĉambro renkonte atakis lin.

Li eniris en la ĝardenon kaj ĉirkaŭvadis en la malluma umearbareto dum longa tempo. Li laŭte vokadis “Mingfeng”, sed li ne ricevis respondon. Lia kapo kunfrapiĝis kun branĉoj de umearboj kelkfoje, tiel ke lia vizaĝo gratvundiĝis kaj sangis. Li tamen ne sentis doloron. Fine li malespere reiris al sia ĉambro. Tie la ĉambro komencis turniĝadi ĉirkaŭ li... .

Fakte ŝi, kiun li serĉis, ne troviĝis en la ĉambro de la servistinoj, sed en la ĝardeno.

Elirinte el la ĉambro de Juehui, Mingfeng vere konsciis, ke jam restas nenia espero. Ŝi ne malkontentis kontraŭ li, sed male des pli amis lin. Kaj plie, ŝi kredis, ke li amas ŝin tiel arde kiel antaŭe. Ŝiaj lipoj, kiujn li ĵus kisis, ankoraŭ brulis ; ŝia mano, kiun li ĵus prenis, restis varma. Tio pruvis lian amon kaj samtempe tion, ke ŝi tuj perdos lian amon kaj iros al tiu vampira maljunulo. Ŝi por eterne ne povos revidi lin. Ŝia estonta vivdaŭro nur portos senliman suferadon. Kial ŝi devas alkrociĝi al la senama mondo kun bedaŭro? Fine ŝi farris sian decidon.

Anstataŭ reiri al sia ĉambro, ŝi rekte sin direktis al la ĝardeno. Ŝi palpis en la mallumo kun granda peno, antaŭ ol ŝi atingis sian celokon — la bordon de la lago. La akvo malhele trembrilis. Fiŝoj de tempo al tempo saltetis el la akvo. Stupore starante, ŝi revokis al sia memoro multajn pasintaĵojn. En ŝia cerbo reaperis la scenoj de rilatado inter ili unu post alia. Iom post iom ŝi al kutimiĝis al la mallumo. Antaŭ ŝiaj okuloj herboj kaj arboj malklare riviĝis kaj fariĝis tre amindaj. Ŝi klare sciis, ke ŝi disiĝos de ĉio ĉi.

La mondo estis tiel kvieta. Ĉiuj endormiĝis. Ili tamen restis vivantoj. Ĉiuj vivis, nur ŝi, ŝi tuj mortos. Dum la vivdaŭro de dek sep jaroj, ŝia memoro registris nur batadon kaj insultadon, malĝojan ploradon kaj penlaboradon, kaj krome, la amon, por kiu ŝi oferos sian vivon nun. La vivo donis al ŝi malpli da feliĉo ol al aliaj ; kaj nun, kvankam ŝi estis juna, ŝi tamen tuj forlasos la mondon antaŭ aliaj.

Morgaŭ, ĉiuj havos morgaŭon, tamen antaŭ ŝi etendiĝis mallumo, la daŭra kaj senlima mallumo, kie ne estas morgaŭo. Jes, neniam estis morgaŭo en ŝia vivo. Morgaŭ, kiam birdoj kantos sur branĉoj kaj la matensuno orumos arbopintojn kaj disgutos sennombrajn brilajn perlojn sur la akvon, ŝi jam estos ferminta la okulojn por ĉiam.

La mondo kun tiuj belaĵoj estas tiom aminda. En ĝi ŝi neniam vundis iun. Kiel aliaj knabinoj, ankaŭ ŝi havis belan aspekton, saĝan kapon kaj korpon de sango kaj karno. Kial oni nur surtretas ŝin, vundas

ŝin, ne montras al ŝi mildan ekrigardon aŭ simpation, eĉ ne donas al ŝi kompatan suspiron?

Ŝi obee akceptis ĉiajn malfeliĉojn sen ajna plendo. Fine ŝi sukcesis akiri konsolon — la puran kaj viran amon, kaj trovis sian heroon, kiun ŝi adoris. Ŝi kontentiĝis pri tio. Sed lia amo ne povis savi ŝin kaj male pliigis la suferojn en ŝia memoro. Lia amo promesis al ŝi multajn belajn revojn, tamen ĝi ĵetis ŝin en la malluman abismon.

Ŝi amis la vivon kaj amis ĉion, sed la pordo de la vivo fermiĝis antaŭ ŝi, nur restigante al ŝi la vojon al ruiniĝo. La vojo videble etendiĝis antaŭ ŝi. Pensante, ŝi ekrigardis sian korpon kun timo. Kvankam ŝi ne bone vidis, ŝi tamen klare sciis, ke ŝia korpo estas ĉasta kaj pura. Kvazaŭ oni volis ĵeti ŝin sur tiun vojon, ŝi nesindeteneble kompate kaj amekaresis ĝin. Tiumomente, ŝi farts sian lastan decidon. Ŝi ne plu hezitis. Ŝi atente observis la kvietan akvosurfacon. Ŝi volis ĵeti sin en la kristale klaran lagon, kiu povis servi kiel bona loĝloko por ŝia korpo kaj kie ŝi povis bone konservi sian ĉastan korpon.

Kiam ŝi estis preta salti en la akvon, ŝi abrupte retenis sin. Ŝi pensis, ke ŝi ne devas mortigi sin tiamaniere. Almenaŭ ŝi devas revidi lin kaj malkaŝi al li, kion ŝi pripensas. Eble li povos doni helpon por savi ŝin. Ŝi sentis lian kison bruli sur ŝiaj lipoj kaj lian vizaĝon flosadi antaŭ ŝiaj okuloj. Ŝi amis lin tigrade, ke ŝi ne volis perdi lin. El la vivo ŝi ricevas tiel malmulte — nur lian amon. Ĉu ŝi eĉ ne rajtis ĝui tion? Ĉu ŝi ne rajtis

ĝui tiom malgrandan feliĉon? Kial ŝi vole-nevole forlasu la mondon en tiel juna aĝo, dum aliaj daŭras plu vivi? Tiuj demandoj ŝvebis en ŝia cerbo.

Antaŭ ŝiaj okuloj riveliĝis bildo de paradizo, kie multaj knabinoj de riĉaj familioj, samaĝaj kiel ŝi, ĝoje sin amuzis, ridetante babiladis kaj ĝuis plezurojn. Ŝi sciis, ke tio ne estas vizio. En ĉi tiu senlime vasta mondo ĉie troviĝis tiaj feliĉaj knabinoj kaj ĉie troviĝis tiaj paradizoj, sed nun ŝi vole-nevole metos la finon al sia vivo ĉi tie. Eĉ nun neniu faligas iujn simpatiajn larmojn aŭ diras al ŝi iujn konsolajn vortojn. Ŝia morto ne estos perdo al la mondo aŭ al la kortodomaro. Oni baldaŭ forigos ŝin el sia memoro, kvazaŭ ŝi entute ne ekzistus en la mondo.

“Ĉu mia ekzisto estas tiel soleca?” ŝi pensis. Ŝia koro plenis de malĝojaj plendoj, por kiuj ŝi ne povis trovi lokon por elverŝi. Denove larmoj vualis ŝiajn okulojn. Ŝi sentis sian forton cedi kaj ŝi sidiĝis sur la tero. Vokoj “Mingfeng” ŝajne sonis ĉe ŝiaj oreloj. Ŝi rekonis lian voĉon. Retenante larmojn, ŝi atente aŭskultis.

Ĉirkaŭe regis tomba silento. Ĉiaj homvoĉoj formortis. Ŝi silente aŭskultis, esperante, ke samaj vokoj refoje aŭdiĝos. Tamen post longa tempo alflugis neniu plua sono. Ŝi ricevis subitan revelacion. Li ne povis iri al ŝi, ĉar la muro eterne apartigis ilin. Li apartenis al alia socia rondo. Li havos siajn proprajn estontecon kaj aferojn. Ŝi ne rajtas deteni lin, malhelpi lin kaj alkroĉi lin al si por eterne. Ŝi devas forlasi lin. Lia ekzisto estas pli grava ol la sia. Ŝi ne rajtas igi lin oferi ĉion por savi ŝin. Ŝi

devas foriri , foriri por eterne el lia vivo.

Tiel pensante, ŝi faris decidon definitivan. Kortordiĝo denove atakis ŝin. Ŝi firme premis la bruston per la mano. Sidante en la sama loko, ŝi bedaŭreme rigardis cion en la mallumo. Ŝia menso estis okupata de li sola. Pensante, ŝi montris malgajan rideton sur la vizaĝo, sed larmoj plenigis ŝiajn okulojn.

Fine, malforte stariĝinte, ŝi dufoje vokis per ekstreme mola kaj funebra voĉo, “Tria Sinjorido, Juehui”, kaj ĵetis sin en la lagon.

La trankvila akvosurfaco malkvietiĝis. Granda plaŭdo leviĝis en la aeron de la silenta nokto kaj ŝvebis longan tempon, antaŭ ol malaperi tute. Du aŭ tri tragikaj krioj el la supraĵo de la lago, kvankam tre mallaŭte, eĥis tra la nokta ĉielo. Post fortega tumultado la akvo denove kvietiĝis. Nur la restanta sono de tragikaj krioj ĉirkaŭvadis en la aero, kvazaŭ la tuta ĝardeno mallaŭte ekplorus.

27

Juehui finskribis la artikolon, sed la tutan nokton li ne bone dormis. Matene de la unua tago de la sekva monato li vekiĝis tre malfrue. Post kiam lia frato urĝis lin dufoje, li ellitiĝis. Kiam li kaj Juemin haste atingis la lernejon, ili estis jam malfruaj je pli ol dek minutoj

En la klasĉambro la angla instruisto estis leganta el la verko *Revivigo*. Kiel la aliaj kunlernantoj, Juehui atente aŭskultis, pretigante sin por respondi eventualajn demandojn de la instruisto. Kompreneble li ne povis koncentri sian tutan atenton sur la libron. Li ne povis ne pensi pri Mingfeng kaj li ne povis kvietigi sian tremetantan koron, kiam li ekpensis pri ŝi. Tamen tio ne signifis, ke li volas teni Mingfeng. Ne. Post dumnokta meditado li fakte decidis forlasi la knabinon. Tiu decido kredeble igis lin suferi, sed li konsideris, ke li povas elporti kaj li havas ĉiujn pravigojn por elporti ĝin. Kaj krome, li faris la decidon surbaze de du subtenaj punktoj: la sindonem fervoro de la junulo kun avangardaj ideoj kaj memrespekto de etburĝaro.

Post la lecionoj de la lernejo li spertis la konflikton inter kontraŭdiraj pensoj sur la hejmenira vojo. Kun paliĝinta vizaĝo, li restis senparola. Juemin, konante lian koron, ne multe parolis al li.

Ili atingis la hejmon. Kiam ili trairis la internan pordon, ili renkontis la pornuptan palankenon de la familio Feng, akompanatan de du servistoj. Malĝoja plorado aŭdiĝis en la palankeno. Kvankam ĝi estis

tre mallaŭta, ĝi tamen penetris en la orelojn de Juehui. Ne distinginte, kies voĉo ĝi estas, li kredis, ke ŝi foriras, foriras por eterne.

La palankeno foriris, kunportante la ploran voĉeon. En la korto ankoraŭ restis geservistoj kaj palankenistoj, kiuj kolektiĝis kaj laŭte babiladis. La servisto Gao Zhong, kun ruĝiĝinta vizaĝo, murmure insultis, “Maljuna fripono”, kaj alia servisto Wen De admonis lin ne paroli maldece. Sciante, ke ili babilas pri Mingfeng, Juehui eĉ ne kuraĝis alfronti ilin kaj haste iris internen.

Kiam ili iris enen, melankolia voĉo renkontis ilin. “Kial vi revenas tiel frue hodiaŭ?” La demandanto estis Chen Jianyun, sur kies vizaĝo montriĝis la pala koloro de resaniĝo. Ĵus li babilis kun Juexin. Vidinte ilin, li renkonte iris al ili. Juexin senparole turnis sin en la koridoron, direkte al sia ĉambro.

“Ni lastatempe ofte revenas frue. Ni havas nur unu lernohoron posttagmeze, ĉar la finekzameno alproksimiĝas,” Juemin afable respondis. “Ĉu vi jam resaniĝis?” li demandis.

“Dankon. Mi jam tute resanigis,” Jianyun respondis kun altrudita rideto, sekvante Juemin kaj Juehui li eniris en la ĉambron. Sidiĝinte en kanseĝo, li eligis vespiron.

“Kial vi ĉiam aspektas negaja, Jianyun?” Juemin demandis.

Ĵetinte la lernolibron sur la tablon, Juehui iris al la lito kaj kuŝiĝis senvorte.

“Kiel tragika la vivo estas !” diris Jianyun, malĝoje skuante la kapon.

Juemin subite ekpensis pri la vortoj “eble pro mia malforta korpo aŭ pro frua morto de miaj gepatroj” ofte diritaj de Jianyun, sekve admonis lin kun simpatio, “Jianyun, liberigu de mensa streĉiĝo. Ne pensu pri tiuj malagrablaĵoj .”

“Kiel tragika! Kiel tragika!” Kvazaŭ ne aŭdinte Juemin, Jianyun nur elverŝis siajn vortojn. “Mi venis ĉi tien hazarde. Kiam mi vidis, kiel ŝi eniras en la palankenon plorante kaj baraktante, ankaŭ miaj larmoj elruliĝis. Ankaŭ ŝi estas homo! Kial oni donacis ŝin kiel objekton?...”

“Ĉu vi aludas Mingfeng?” Juemin demandis emocie.

“Mingfeng?” Levinte la kapon kaj ĵetinte rigardon al Juemin, Jianyun indigne diris, “Mi parolas pri Wan-er. Ĉu vi ne renkontis la palankenon?”

“Wan-er? Ĉu Mingfeng ne estas edzinigita do?” Juehui demandis kun miro kaj ĝojo, sidiĝinte en la lito.

“Mingfeng ...” Jianyun ĉesis paroli post tiu vorto. Li direktis sian senspiritan rigardon al Juehui kaj mallaŭte diris, “Ŝi... ŝi jam ĵetis sin en la lagon kaj mortis.”

“Kio? Mingfeng jam mortigis sin?” Juehui stariĝis pro hororo. Malespere ŝirante siajn harojn, li grandpaŝe iris tien kaj reen en la ĉambro.

“Oni diris tion. Ŝia kadavro jam forportiĝis. Mi ne vidis per miaj

propraj okuloj...”

“Aha, mi komprenas. Ĉar Mingfeng sin mortigis, la avo anstataŭigis ŝin per Wan-er. En liaj okuloj servoknabinoj ne estas homoj. Li povas donaci ilin laŭplaĉe ... Mingfeng vere estis ribelema virino. Ĝi eĉ faris tion!” Juemin diris kun indigno kaj bedaŭro.

“Sed Wan-er suferos,” Jianyun diris, “vidinte sin barakti antaŭ la palankeno, ĉiu larmus. Laŭ mi, ĝi eble sekvos la ekzemplon de Mingfeng...”

“Kiel kruela la avo estas ! Malgraŭ morto de unu, li eĉ fordonis alian. Kial li ruinigas tiujn bonajn knabinojn tiamaniere?” Juemin diris indigne.

Juehui, kiu restis senparola kun streĉita vizaĝo , irinte al Jianyun, freneze skuis lian brakon kaj diris, “Diru al mi, kiamaniere Mingfeng sin mortigis !”

Jianyun surprizite ekrigardis Juehui, ne komprenante kial li tiel ekscitiĝis. Li respondis emocie, “Mi ne scias. Eble neniu scias. Mi aŭdis, ke maljuna servisto Zhao trovis ŝian kadavron en la lago kaj alvokis aliajn por elakvigi ŝin. Oni forportis ŝin kaj ĉio finiĝis ... Kiel tragika... la vivo kaj la mondo estas!”

Juehui atente rigardis la malgrasan, malsanecan vizaĝon de Jianyun. Li abrupte forlasis la brakon de Jianyun kaj senvorte elkuris, forlasante Jianyun kaj Juemin en la ĉambro.

“Kio okazas al Juehui?” Jianyun mallaŭte demandis al Juemin.

“Nun mi ekkomprenas,” Juemin parolis al si, balancante la kapon.

“Vi komprenas, dum mi ne!” diris Jianyun, klinante la kapon. Li ĉiam montris sin tiel diskreta kaj modesta.

“Ĉu vi ne povas vidi, ke amo estas la kaŭzo de la afero?” Juemin laŭte diris indigne. Neniu respondis al li en la neeltenebla silento de la ĉambro. Ekster la fenestro la okazaj paŝbruoj ŝajnis surtreti lian koron.

Post iom da tempo Jianyun malrapide levis la kapon. Li direktis sian distriĝeman rigardon ĉirkaŭen kaj murmurs al si, “Mi... komprenas... komprenas..”

Stariĝinte, Juemin paŝegadis kelkan tempon en la ĉambro. Poste li sidiĝis en seĝo ĉe la kvadrata tablo. Li pafis la rigardon al la vizaĝo de Jianyun. Iliaj rigardoj renkontiĝis. Ili interŝanĝis melankoliajn rigardojn. Jianyun denove mallevis la kapon.

“Ĉio estas pro la amo, Juemin diris aflikte. “Nun mi komprenas kiel Juehui kaj Mingfeng rilatis unu kun la alia. Antaŭe mi havis tian konjekton.. . Mi ne atendis, ke ŝi havos nunan tragikon. Kiel ribeleman temperamenton ŝi havis ! ... Vere bedaŭrinde! Se ŝi naskiĝus en riĉa familio...” Juemin ŝajne ne povis paroli plu. La interna konflikto speguliĝis sur lia vizaĝo.

Post kelkaj minutoj li ekscitite diris, “Ĉio estas pro la amo ... Granda Frato multe malgrasiĝis lastatempe. Li sin montras malgaja ĉi tiujn tagojn.

Ĉu tio ne estas pro la amo? ... La amo, la amo devus alporti feliĉon, sed kial ĝi alportis tiom da ĉagreno?...” Lia voĉo tremetis. Tiutempe li ekpensis pri sia propra afero kaj li preskaŭ ekploris pro sia estonteco. Antaŭ liaj okuloj aperis malhela ombro de lia estonteco. La vivo de Granda Frato estis ekzemplo por li.

Jianyun ne sciis la veran kaŭzon de la malĝojo de Juemin, konsiderante, ke lia malĝojo estas kaŭzita de simpatio. Kaj samtempe, tiuj vortoj de Juemin vekis lian ĉagrenon. La malĝojo en lia vivo estis pli granda ol tiu de aliaj kaj li des pli bezonis simpation de aliaj . Kvankam li plenis de malĝojo en la koro, li tamen ne povis trovi iun, al kiu li povis elverŝi sian koron. Li ĉiam opiniis sin sensignifa, senkapabla kaj nekomparebla kun aliaj. Li vivis ekstreme humile kaj ĉiam traktis aliajn kun honesta koro, sed li siavice rikoltis malestimon kaj flegmon. Kvankam li okaze ricevis iom da simpatio, kiu nur estis supraĵa, li tamen sentis, ke ĝi estas pli ol tiom , kiom li rajtas ricevi.

Li, kiu plenkreskis sub tretado, vere ne plendis kontraŭ la vivo, sed pace, eĉ timeme elportis malestimon kaj indiferenton. Tiel li vivis multajn jarojn. Nun vidinte, ke Juemin .montras tiel profundan simpation pro la malfeliĉo de alia, Jianyun trovis lin homo, kiu povis aŭskulti liajn suferojn. La vortoj longe enfermitaj interne de li fariĝis la forto por antaŭenpuŝi lin.

Kolektinte sian kuraĝon, li faris kelkajn provojn kaj sukcesis malfermi

sian buŝon, “Juemin , aŭskultu min. ..” Li paŭzis. Enrigardinte Juemin kaj vidinte lian afablan rigardon, li daŭrigis, “Post ĉi-foja grava malsano, mi ne scias, kial mi ofte pensas pri morto. Kompreneble estas preferinde morti ol vivi tiamaniere kiel mi, sed mi iagrade timas morti. Pensu, nun mi vivas jam en tiel soleca kaj kompatinda situacio, kiel soleca kaj mizera mi sentos min post la morto! Neniu funebros pri mi kaj neniu venos por rigardi mian tombon. Soleca, eterne soleca. Kia soleco ... Mi dankas vin pro viaj vizitoj al mi dum mia grava malsano. Mi neniam forgesos tion mian tutan vivon. Mi estas vere dankema al vi ! ...”

“Kial vi menciis tion?” Juemin sentis sin malinda je tiuj vortoj. Li volis deturni la temon de la koriversacio.

“Mi insistas pri miaj vortoj. Juemin, se mia vivo indas je via simpatio, ĉu vi promesas, ke post mia morto, vi iros al mia tombo por rigardi min en printempo kaj aŭtuno, dufoje ĉiujare?” Jianyun diris malgaje.

“Kial vi diris tiajn malagrablajn vortojn, Jianyun? Ĉu vi ne vidas, ke ni jam havas sufiĉe da malĝojo?” Kvankam kun riproĉa tono, Juemin tamen parolis tre milde.

Ekfrotinte siajn okulojn, Jianyun daŭrigis, “Mi devas diri , mi devas rakonti al vi mian aferon. Nun estas nur vi, kiu povas aŭskulti mian rakontadon ... Ĉar Granda Frato havas sian malĝojon kaj Juehui la sian, mi ne povas aldoni la mian al ili ... Mi jam enamiĝis al junulino. Ankaŭ

mi mem scias, ke mi arogas al mi la amon kaj ŝi ne akceptos mian amon. Homoj kia mi ne povas pari kun tia junulino. Mi ofte diras al mi mem, ‘Ne sonĝu plu. Kial vi enamiĝis al ŝi? Ĉu vi meritas amon? Forlasu vian senesperan amon.’ Tamen fakte mi ne povas tion fari . Mi ne povas ne sopiri al ŝi. Aŭdinte ŝian nomon, mi ne povas kvietigi mian batantan koron ; vidinte ŝian vizaĝon, mi ŝajne ricevas benon. Mi ofte kaŝe vokadas ŝian nomon. Kelkfoje ŝia nomo alportas al mi konsolon kaj kuraĝigon, sed kelkfoje pli grandan malĝojon. Kiam mi mencias ŝian nomon, mia sopirado al ŝi fariĝas pli arda. Mi deziregas tuj kuri al ŝi por elverŝi mian amon. Sed mi ne havas kuraĝon. Kiel mi — sensignifa kaj senkapabla — povus elverŝi mian amon al ŝi?...

“Mi ne komprenas kiel ankaŭ mi, elkreskinta sub tretado kaj malestimo, posedas la instinkton de amo. Kial mi amas ŝin? Ŝi estas tiel nobla kaj pura, ke mi timas eĉ mencii la vorton ‘amo’ al ŝi ... Kiel grandan malĝojon alportas al mi tia amo, la malespera amo ! ... Kompreneble tio estas mia kulpo. Mi ne povas plendi kontraŭ ŝi, ĉar ŝi scias nenion pri tio! ... Mi estas turmentata de tiu amo tuttage ...

“Ĉiufoje kiam mi iras al la familio Wang por doni lecionojn, mi rigardas ŝian fenestron. Kelkfoje ŝi estas en la ĉambro. La blanka kurteno de ŝia fenestro vekas ĉe mi multajn revojn, belajn revojn. Mi kvazaŭ vidas sian agadon en la ĉambro kaj sentas min staranta tuj apud ŝi. Sed la konsolo estas momenta, ĉar post tempeto, mi ekpensas pri mia

humila deveno kaj mi denove falas en ŝliman dilemon ... Kiam ŝi estas hejme, mi aŭdas ŝian tuson kaj ŝian voĉon, tiel belan. Nur post penado mi povas koncentri mian atenton sur mian instruadon al la etaj lernantoj ... Kelkfoje kiam ŝi estas en la lernejo, mi ne aŭdas sian voĉon kaj mi sentas solecon.. .

“Mia sano malboniĝas pro ŝi, sed ŝi ne scias tion. Kaj neniuj scias tion. Eĉ se ŝi sciiĝus pri tio, ŝi maksimume montrus kompaton al mi, sed ne povas ami min ... Mi scias, ke neniuj virinoj amas min. Mi estas homo sensignifa ! Kvankam estas tiom da lumo kaj amo en la mondo, ili tamen ne estas por mi. Mi estas homo forlasita de la feliĉo...” Li paŭzis. Juemin restis senparola.

Elpoŝiginte poŝtukon, Jianyun forviŝis siajn larmojn. Poste lia humila kaj melankolia rigardo balais la vizaĝon de Juemin. Kun amara rideto li malrapide diris, “Juemin, ne priridu miajn malsaĝajn vortojn. Mi ne estas vera konanto de mia pozicio. Kelkfoje mi tute forgesas, kia homo mi estas; kelkfoje pro malespero mi eĉ plendas kontraŭ miaj gepatroj, pro tio, ke ili naskis min en ĉi tia pozicio. Se mia pozicio estus alia, kiel ekzemple via, mi ne suferus tigrade... Juemin, mi vere envias vin ! Mi ofte pensas, eĉ preĝas, ke se mi troviĝus en via pozicio kaj povus alproksimiĝi al ŝi por babili laŭplaĉe kiel vi, mi volonte mallongigus mian vivon je dek jaroj ...

“Mi ofte malsaniĝas, kelkfoje ĝuste pro ŝi. Ankaŭ dum la malsano

mi sopiris al ŝi, kaj des pli soife. Mi preĝis ĉiutage, ke ŝi vizitu min en la malsanulejo. Mi sekrete vokadis ŝian nomon, esperante, ke ŝi aŭdas min iun tagon ... Kiam mi aŭdis paŝbruon, mi pensis, ke ŝi alvenas. Sed mi tre bone konas ŝian paŝbruon, ĉar ŝiaj paŝoj surtretas sur mian koron ĉiutage. Tamen ŝi faris neniun viziton al mi...

“Kiam vi kaj via frato vizitis min, mi kvazaŭ vidis ŝin inter vi, ĉar vi ofte kunestas kun ŝi. Okaze kiam vi menciis sian nomon en via interparolo, mia koro brue batis. Mi eksentis, ke mi fartas multe pli bone. Sed vi foriris post mallonga tempo — mi ne scias kiam vi revizitos min! Pensante pri mia soleco kaj forlasiteco post via foriro, mi ekhavis la senton, kvazaŭ mi tuj mortus. Vi ne sciis, per kia rigardo mi rigardis vin kaj kun kia sento mi esprimis mian dankemon al vi. Mi volis peti vin transdoni mian saluton aŭ bondeziron al ŝi, sed mi timis, ke vi ekkonos mian sopiradon, kaj pro tio priridos kaj riproĉos min. Mi ne kuraĝis eldiri eĉ unu vorton.

“Duafoje, kiam vi vizitis min, mi vidis la artikolon verkitan de ŝi en la gazeto *Aŭroro*, kiun Juehui tenis en la mano. Mi volis pruntepreni de li la gazeton por zorge legi, sed, mi ne sciis, kial mi ne sukcesis elmeti la peton. Mi timis, ke se mi elmetus mian peton, vi ekkonus mian sekreton kaj pro tio riproĉus kaj ignorus min. Kvankam poste mi konsideris mian skrupulon ridinda, mi tamen vere troviĝis en dilemo... Post via foriro mi memore legis la titolon de ŝia artikolo multfoje, multfoje.” Liaj ambaŭ manoj kunpremiĝis kaj tordiĝis

kelkfoje. Juemin eligis abruptan tusadon.

“Mi tuj finos miajn vortojn al vi,” Jianyun daŭrigis, apartiginte siajn manojn, “mi ne devus okupi vian tempon per miaj bagateloj. Sed escepte de vi, neniu volas aŭskulti min... Mi pensas, ke vi certe enamiĝis al ŝi. Vi kredeble ne ĵaluzas kontraŭ mi pro tio. Kiu povus ĵaluzi kontraŭ homoj kia mi? Mi vere envias vin. Mi esperas, ke vi kaj ŝi geedziĝos feliĉe ... Ĉu vi promesos, ke vi ambaŭ iros al mia tombo por rigardi min, se mi ne povos ĝisvivi tiun tagon? Mi ne scias, kiel multe mi dankos vin tiutempe en mia tombo. Ĉu vi pretas doni al mi la promeson?” Li rigardis la vizaĝon de Juemin per petegaj okuloj.

Ne povante elteni tian rigardon, Juemin deturnis la vizaĝon. Kiam Jianyun parolis, Juemin ofte ŝanĝis la vizaĝesprimon, sed li ĉiam restis senvorta kun firme fermita buŝo. Fine, li estis subpremita de simpatio kaj kompatio. Li ne povis deteni sin plu kaj malĝoje diris sinforgese, “Mi promesas. Mi promesas.” Li ne povis eligi vortojn plu.

“Mi vere ne scias, kiel danki vin.” Larmoj ruliĝis sur la malgrasaj vangoj de Jianyun kaj ekbrilo de ĝojo fulmis tra lia humila kaj malgaja vizaĝo. Kvankam la promeso estis malgranda, ĝi tamen servis kiel absolute granda konsolo en lia sensignifa ekzisto.

Tiutempe, en la vasta mondo, estis multe da lumo, feliĉo kaj amo. Tamen al tiu humilulo, kiu estis senigita je ĉio, krom la malprospera hejmo de sia onklo, restis nur tiu malgranda promeso.

28

Adiaŭinte Jianyun, Juemin eniris en la ĝardenon kun ekscitiĝo kaj malĝojo. Li pensis, ke Juehui certe estas tie, kaj vere li trovis lin ce la lagbordo.

Kun klinita kapo Juehui paŝadis tien kaj reen sur la bordo. Kelkfoje li subite haltis, fikse rigardis la kvietan lagon dum momento aŭ eligis longajn vespirojn kaj poste, sin returninte, ekmarŝis grandpaŝe. Li ne rimarkis la alproksimiĝon de Juemin.

“Tria Frato,” vokis Juemin, elirinte el la umearbareto. Li rekte sin direktis al Juehui.

Levinte la kapon kaj ĵetinte rigardon al Juemin, Juehui haltis senvorte.

Juemin iris antaŭ lin kaj demandis kun zorgemo, “Kiel pala vi estas ! Kio okazas al vi finfine?”

Senvorte Juehui ekpaŝis antaŭen. Alrapidinte al li Juemin tiris lian manikon kaj sincere diris, “Mi tute komprenas vin. Ĉar la afero jam venis al tia situacio, kion vi povas fari? ... Estas pli bone forgesi ĝin.”

“Forgesi? Mi neniam forgesos ĝin!” Juehui indigne respondis, kun malamo brilanta en la okuloj. “En la mondo estas multaj aferoj, kiujn oni ne povas facile forgesi. Ĵus mi staris ĉi tie kaj rigardis la lagakvon dum longa tempo. Ĉi tie estas la loko de ŝia sinofero. Mi volis trovi ŝian spuron sur la akvo, sed la kvieta akvo indikas nenion. Kiel abomeninde ! Kial la akvo montriĝas tiel kvieta englutinte ŝian korpon?” Liberiginte sin

de la mano de Juemin, li pugnigis sian manon por doni baton al la akvosurfaco. "... Tamen ŝi ne malaperis sen ajna postsigno. Jen la herboj kaj arboj ĉiuj atestas. Mi ne kuraĝas imagi al mi la senton, kiun ŝi havis antaŭ ol sin ĵeti en la akvon. Sed mi devas imagi, ĉar mi estas ŝia murdinto. Ne, ne nur mi, sed ankaŭ nia familio kaj nia socio estas murdintoj ! ..."

Juemin emociite firme tenis la manon de Juehui kaj sincere diris, "Tria Frato, mi komprenas vin kaj simpatias kun vi. Dum ĉi tiuj tagoj mi pensis nur pri mia propra feliĉo, pri mia propra estonteco kaj propra amo. Mi ankoraŭ memoras, ke kiam ni estis knaboj, ni ĉiam lernis eĉ guvernisto kaj nin amuzis kune. Se mi finis mian lernadon pli frue, mi ĉiam atendis vin kaj inverse. Estis same, kiam ni lernis en mezlernejo kaj nun lernas en la Lernejo de Fremdlandaj Lingvoj. En la hejmo ni ambaŭ relernas lecionojn kune kaj helpas unu la alian ... Sed de pli ol duonjaro, mi multe malproksimiĝis de vi pro miaj propraj aferoj ... Kial vi ne diris al mi vian aferon pli frue? Alie ni povus elpensi bonan kontraŭrimedon post interkonsiliĝo. Antaŭe ni ofte citis la proverbon 'Du kapoj estas pli bonaj ol unu', ĉu ne?"

Kun du grandaj larmoperloj ĉe la okulanguloj, Juehui diris kun amara rideto, "Dua Frato, ĉion tion ankaŭ mi memoras, sed estas tro malfrue nun. Mi ne pensis, ke ŝi prenos tiun vojon. Mi vere amas ŝin. Sed kiel ni povus geedziĝi en nia medio? Eble mi estas tro egoisma.

Eble mi estas blindigita de aliaj aferoj. Estas mi, kiu mortigis ŝin ... Nun ŝi metis la finon al sia vivo en la lago kaj Wan-er, kun larmoj, iris al la familio Feng por suferadi. Mi neniam forgesos la aferon. Ĉu mi havos kvietajn tagojn en la estonteco?...”

Sur la vizaĝo de Juemin aperis penta esprimo. Larmoj elruliĝis el liaj okuloj sub la orkadritaj okulvitroj. Li malĝoje murmuris, “Estas vere malfrue.” Li pli firme premis la manon de Juehui.

“Dua Frato, ĉu vi ankoraŭ memoras la vesperon de la dek-kvina tago de la unua monato?” demandis Juehui kun voĉo plena de sopiro kaj aflikto. Juemin silente balancis la kapon. Juehui daŭrigis, “Kiel multe da ĝojo ni havis tiun vesperon! Tio kvazaŭ okazis hieraŭ . Sed kie nun mi povas trovi ŝin? ... Me trovi ŝian voĉon kaj ŝian vizaĝesprimon mi povas? Ŝi ĉiam kredis, ke mi povas savi ŝin, tamen mi forlasis ŝin. Mi ruinigis ŝin . Mi estas respondeca pri ŝia morto . Mi ne havas kuraĝon ... Antaŭe mi riproĉis , ke Granda Frato kaj vi ne havas kuraĝon. Sed nun mi trovas min sendiferenca de vi ambaŭ. Nutrite de la samaj gepatroj kaj elkreskinte en la sama familio, ni tri same ne havas kuraĝon ... Mi malamas min mem ! ...”

Juehui tiel emociiĝis, ke li ne povis paroli plu. Li spiregis. Li sentis sin tiom varma, kvazaŭ la korpo ekbrulus. Li ŝajne havis multajn vortojn en la koro, sed lia gorĝo estis ŝtopita. Li ankaŭ sentis la koron tremetadi. Liberiginte sin de la mano de Juemin, li frapadis sian bruston per

pugno. Juemin firme retenis lian manon, sed Juehui freneze baraktis kontraŭ li, ne komprenante kion li mem faras. Nenio ekzistis en lia menso. Impulsate de emocio, li luktis kontraŭ la forto pezanta sur li. Li jam forgesis, ke tiu, kiu staras antaŭ li, estas la frato arde amata de li. Tiumomente lia forto tiel multe pliiĝis, ke Juemin preskaŭ ne povis regi lin. Fine Juemin sukcesis puŝi lin al apuda umearbeto, kie li deprime apogis sin kontraŭ la trunko, spiregante kun malferma buŝo.

“Ne kondutu tiel!” ameme diris Juemin kun ruĝiĝinta vizaĝo, rigardante Juehui.

“En ĉi tiu familio mi ne povas vivi plu! ...” diris Juehui post longa paŭzo, parolante pli al si ol al Juemin. Klininte la kapon, li denove tordis siajn manojn.

La vizaĝesprimo de Juemin ŝanĝiĝis. Li volis paroli, sed ne eligis vorton. Li direktis sian rigardon jen al la vizaĝo de Juehui jen al la umearbareto. Pigo ekblekis sur branĉo. Iom post iom liaj okuloj ekbiilis kaj lia vizaĝesprimo mildiĝis. Al lia vizaĝo alnaĝis rideto — rideto kun larmoj. Larmoj perlis el liaj okulanguloj.

Li diris, “Tria Frato ... kial vi ne fidus min kiel antaŭe? Antaŭe pri ĉiaj aferoj vi kaj mi interkonsiliĝis. Ĝojon kaj malĝojon ni dividis. Kial vi ne faras tion kiel antaŭe?..”

“Ne ! Ĉar ni ambaŭ ŝanĝiĝis!” Juehui indigne diris. “Vi havas vian amon, dum mi perdis ĉion. Kion ni povas dividi inter ni?” Li tiel diris

ne por piki la koron de Juemin, sed por elverŝi sian koleron. Li sentis, ke estas malseka kadavro inter li kaj lia frato.

Levinte la kapon, Juemin movis la buŝon, kvazaŭ ekparolonte laŭtvoĉe, sed li tuj firme kunpremis la lipojn. Mallevinte la kapon, li restis silenta longan tempon. Relevinte la kapon, li diris pete, “Tria Frato, ĵus mi konfesis mian kulpon. Ĉu vi ankoraŭ ne pardonas min? Ĉu vi ne vidas kiel mi pentas? Ni helpu kaj subtenu unu la alian kiel antaŭe. Ni marŝu kune antaŭen.”

“Sed tio neniom helpas. Estas tro malfrue nun ! Mi ne volas marŝi antaŭen,” Juehui malespere diris. Li ŝajne senarmigis sin. Lia indigno tute malaperis.

“Vi eldiras eĉ tiajn vortojn! Ĉu vi pretas forlasi ĉion nur pro Mingfeng? Vi tute kontraŭas al viaj kutimaj vortoj kaj agmaniero!” Juemin riproĉis.

“Ne, ne tiel,” Juehui haste senkulpigis sin. Sed li tuj ĉesis paroli. Evitinte la demandan rigardon de Juemin, li diris malrapide, “Ne sole pro Mingfeng.” Poste li diris indigne kaj ekscitite, “Mi entute tediĝas de tia vivo.”

“Vi ne rajtas diri tiujn vortojn. Vi kaj mi ambaŭ estas ankoraŭ junaj. Ni ankoraŭ ne vere komprenas la vivon,” Juemin admonis kun zorgemo.

“Ĉu ni ne vidis jam sufiĉe? Atendu. Mi estas certa, ke okazos pli terura afero en proksima estonteco!” La vizaĝo de Juehui ruĝiĝis de indigno.

“Vi ĉiam estas tiel flamiĝema. Ĉar la afero jam forpasis, kion vi povas fari? Ĉu vi ne konsideras vian estontecon? Estas strange, ke vi eĉ forgesis tiujn vortojn, kiujn vi ŝatas diri.”

“Kiuj vortoj?”

Anstataŭ doni al li rektan respondon, Juemin recites:

Ni estas junuloj, ne monstroj nek malsaĝuloj. Ni devas strebi por akiri nian feliĉon.

Juehui silentis. La rapide ŝanĝiĝanta vizaĝesprimo perfidis la furiozecon de lia interna batalo. Kun nodiĝintaj brovoj li iom malfermis la buŝon kaj diris kun intensigita voĉo, “Mi estas junulo.” Li ripetis indigne, “Mi estas junulo!” Poste li dubeme diris malrapide, “Mi estas junulo?” Kompreneme li diris, “Mi estas junulo.” Kaj fine li decide diris, “Mi estas junulo, jes, mi estas junulo!”

Li ekprenis la manon de Juemin kaj okule ekzamenis lian vizaĝon. El la frateca manpremo kaj la firma rigardo, Juemin komprenis tion, pri kio lia frato pensas. Rekuraĝigita, li respondis la firman manpremon de la frato. Nun ili denove interkompreniĝis.

Post la vespermanĝo Juemin kaj Juehui babilis kelkan tempon en la ĉambro de Juexin. Juemin proponis promeni surstrate kaj Juehui konsentis. Survoje ili interparolis pri la nuno kaj estonteco. Ili ambaŭ montriĝis ekscititaj. Dum la pasinta duonjaro ili neniam interbabilis tiel longe.

Sur la malhela ĉielo amasiĝis nigraj nuboj. Estis malvarmete ĉe la

vesperiĝo. Sur la kvietaj stratoj vidigis malmulte da pasantoj. Nur ĉe la pordoj de kortodomaroj kolektiĝis kelkaj servistoj kaj palankenistoj babilantaj.

Preterpasinte du aŭ tri domblokojn, ili vidis du lignotabulojn kun verdaj ideogramoj sur flava fono, pendantajn ĉe ambaŭ flankoj de la pordo ĉe la strata ekstremo. Unu legis, “La Oficejo de Advokato Gao Keming”, kaj la alia “La Oficejo de Advokato Chen Kejia”.

“Kiel ni venis ĉi tien?” diris Juemin. Poste ili eniris en dezertecan strateton zigzagan kaj pavimitan per rondaj ŝtonetoj. La vojo estis malfacile irebla por iliaj piedoj en ledŝuoj. Ĉe ambaŭ flankoj de la strateto staris nealtaj argilaj ĉirkaŭmuroj de kortoj. Altaj soforoj en kortoj etendis siajn branĉojn trans la murojn.

Interne de iu korto kreskis du granatarboj, de sur kiuj la brilkoloraj floroj jam defalis, tiel ke restis nur senbrilaj helruĝaj granatetoj pendantaj en la densa foliaro. Tiu peco de la strateto estis eksterordinare kvieta. La malgrandaj kortopordoj nigre lakitaj estis fermitaj, tra kiuj unu-du personoj okaze en- aŭ eliris.

“Ni reiru. Ŝajne ekpluvos,” Juehui diris, rimarkinte la kolektiĝantajn nigrajn nubojn sur la ĉielo.

“ŜŜ!” Juemin rapide ektiris sian fraton ĉe la maniko kaj flustris ĉe lia orelo, “Rigardu.”

Antaŭ ili iu persono eliris el korta pordo. Li iris renkonte al ili.

Levinte la kapon kaj vidinte ilin, li tuj sin turnis kaj reiris en la korton kaj brue fermis la pordon.

“Kvina Onklo! Kion li faras ĉi tie?” Juehui, kiu estis akrevida, mire diris mallaŭte. “Kial li montriĝas tiel ŝtelira kaj forkuris, ekvidinte nin?”

“Silentu! Ni iru tien por pririgardi, kia loko ĝi estas,” Juemin atentigis sian fraton.

Ili ambaŭ malrapidigis siajn paŝojn kaj katpaŝe iris al la korta pordo. Ili malpeze puŝis la pordon, sed ĝi ne cedis. Ili silente staris por aŭskulti la moviĝon en la korto. Interne ŝajne sonis paŝbruo, sed kiam ili atente aŭskultis, nenia sono aŭdiĝis. Levinte la kapon kaj ekrigardinte la freŝe lakitajn pordoklapojn, ili rimarkis la ruĝan paperslipon algluitan al la pordo, sur kiu skribiĝis “Rezidejo de Familio Gao”.

Elŝovinte sian langon, Juemin ridetante fortiris Juehui.

“Strange! ‘Rezidejo de Familio Gao’ estas nia hejmo, ĉu ne?” Juehui scivoleme demandis, elirinte el la strateto .

“En la urbo kredeble nia ne estas la sola familio kun la nomo Gao ... Sed ĉu vi rimarkis la manskribon?”

Juehui miris pro lia demando, sed li tuj komprenis lin kaj replikis kun rideto, “Ĉu tio ne estas manskribo de Kvina Onklo? Jes, certe lia, mi ĝin rekonis.”

“Jes, ĝi estas lia manskribo,” Juemin diris, kapjesante. Tamen li subite demandis sin kun mira voĉo, “Kial li algluis ĝin ĉi tie?”

“Ĉar li loĝas ĉi tie,” Juehui kompreninte diris, ridetante. Li ekkomprenis ĉion.

“Li loĝas ĉi tie? ... Ĉu li ne loĝas en nia kortodomaro?” Juemin mire demandis, nekomprenante kion Juehui aludas.

“Evidente li nun havas du loĝejojn... Antaŭ nelonge Gao Zhong menciis tion, sed mi ne atentis. Nun mi ekmemoras ... Nu, baldaŭ ni vidos farson en nia familio !”

“Ankaŭ mi ekkomprenis. Sed mi timas, ke aliaj familianoj ankoraŭ ne scias,” Juemin ridetante diris.

“La loko ne malproksimas de la advokata oficejo de Tria Onklo. Kiel li povus ne ekscii? Iun tagon oni sciigos pri tio. Certe ni vidos farson!” Juehui malestime diris. Tiumomente li ekhavis strangan senton, ke lia morala forto staras super lia malplena kaj pereonta granda familio. Li ne opiniis tion troigita.

“Ho ve, ekpluvas!” konsternite diris Juemin, kiu sentis guton da akvo fali sur la frunton, kiam li estis respondonta. Li rapidigis siajn paŝojn.

Dirinte “Ni kuru. Tuj ekpluvegos,” Juehui ekkuris.

Post nelonge pluvegis. Kiam ili rapidis en sian domon, iliaj roboj jam tramalsekiĝis.

“Mingfeng, alportu lavakvon!” Juehui kriis, kiam li preteriris la fenestron. Li ne konsciis sian eraron.

“Ĉu vi vokis Mingfeng? Ŝi...” Juemin ĉesis paroli.

Turninte la kapon malantaŭen kaj, ĵetinte rigardon al Juemin, Juehui diris nenion. Lia mieno tuj ŝanĝiĝis. Post momento, li deprime vokis, “Onjo Huang.” Kiam respondo aŭdiĝis, li diris, “Ni volas lavi la vizaĝon.” Li malvigle eniris en sian ĉambron kaj ŝanĝis la malsekan robon. Lia vigleco, kun kiu li trakuris la pluvegon, jam tute foriĝis.

Maljuna servistino Huang eniris, tenante poton en la mano. Kiam ŝi vidis kiel ili aspektas, ŝi komencis bonkore riproĉeti ilin, preskaŭ kun larmo. “Se via patrino ankoraŭ vivus, ŝi absolute ne permesus al vi damaĝi vin mem tiamaniere. Vi ambaŭ devas bone zorgi pri via sano pro via mortinta patrino. Mi restas ĉi tie tute pro vi ambaŭ, alie mi estus jam longe foririnta. Nun Mingfeng estas for, nur mi zorgas pri vi. Mi ne scias, kiu priservos vin, se mi mortos. Nun la akvo fariĝas kota ĉi tie. Mi vere ne volas plu loĝi ĉi tie.” Tiuj sentimentalaj vortoj de la maljuna servistino vekis ilian memoron pri pasintaĵoj.

Post kiam ili surmetis sekajn vestojn, ŝi eligis vesperon kaj eliris, lamante per siaj piedetoj.

Juehui eliris el la ĉambro. La pluvo jam ĉesis, kaj la aero estis tre freŝa kaj malvarmeta. Li staris sur la ŝtuparo dum momento. Direktinte sian rigardon al la lamplumo de diversaj ĉambroj, li paŝis al la halo. Li aŭdis laŭtleĝadon en la studĉambro.

Jueying voĉlegis, “Infanoj devas ne loĝi en la plej bona parto de la loĝejo, nek sidi sur honora sidloko, nek iri en la mezo de la vojo, nek

eniri tra la ĉefa pordo...”*

Juequn voĉlegis, “El inter ĉefkrimoj la plej granda estas malobservo de fila lojaleco...”**

Shuzhen voĉlegis, “Ne turnu vian kapon malantaŭen dum irado, ne montru viajn dentojn dum parolo ; ne movu viajn genuojn dum sidado ; ne skuu vian korpon dum promenade...”***

Juehui ne povis elteni plu sin turninte, li iris internen. La sono de laŭtlegado alkroĉiĝis al li. Post du paŝoj li haltis. Li sentis kordoloron. Senspirite rigardinte ĉirkaŭen, li ekdubis pri siaj okuloj. Antaŭ lia vizaĝo ŝvebis viziaj figuroj kaj ĉe liaj oreloj sonis malplena voĉo. Li ne sciis, kie li nun troviĝas.

“Tio estas ilia edukado!” La parolvoĉo malĝentile penetris en liajn orelojn kaj kirliĝis en lia cerbo. Li surprizite turns sian kapon kaj vidis Juemin stari apude. Li ekprenis Juemin ĉe la maniko en bonveniga maniero, kvazaŭ li renkontus konaton en vasta dezerto. Lia ago konfuzis Juemin. Ili ambaŭ silente iris internen — du solecaj koroj en la enorma mondo.

* * *

“Tria Sinjorido!” Juehui aŭdas konatan voĉon. Li levas la kapon kaj rigardas en la direkto de la voĉo. El malantaŭ granda pinarbo aperas la ridetanta vizaĝo de Mingfeng. Ŝia paro da brile nigraj pupiloj vigle ruliĝadas. Ŝi svingas manon al li . Ĵetinte la libron, li stariĝas kaj rapidas

al ŝi.

Kiam li estas proksima al la pinarbo, ŝi subite retiras siajn kapon kaj manon kaj malaperas malantaŭ la arbon. Antaŭ liaj okuloj fulmas purpura ombro kaj post tio sonas susurado ĉe liaj oreloj. Evidente ŝi fuĝis, tretante defalintajn branĉojn kaj foliojn. Sed kiam li atente rigardas, li ne povas trovi en kiu direkto ŝi perdiĝis. Dubante, li denove aŭdas sian arĝentan voĉon sonantan ĉe la dekstra flanko. Li turnas la kapon por rigardi. Tie montriĝas nur vizaĝo, pli bela kaj pli karnoplana. Kiam li kuras tien, la vizaĝo subite foriĝas . Post momento ĝi riveliĝas aliloke . Fine ŝia tuta korpo sin montras. Ŝi forkuras laŭ la vojo apud la rivero. Li postkuras ŝin. Li miras pri la luksaj vestoj, kiujn ŝi portas. Li neniam vidis ŝin en tia tualeteto .

Ŝi kuras tre rapide. Ŝia malpeza harplekto sin svingadas tien kaj reen. De tempo al tempo ŝi turnas la kapon kaj ridetas al li. Sed neinklina halti, ŝi forte kuras al la riverbordo. Ĉar ŝi alproksimiĝas al la bordo, li laŭte vokretenas ŝin por atentigi, ke ŝi ne falu en la riveron pro mispaŝo. Tamen, antaŭ ol li finas paroli, ŝi subite stumblas, tre proksime al la bordo.

Juehui eligas surprizitan krion kaj ĉionspite alkuras al ŝi. Ĉe ŝia flanko li vidas, ke ŝi, kun la kapo sur la kuntenitaj manoj, komforte kuŝas surdorse kun ridetanta vizaĝo, plezure rigardante la bluan sennuban ĉielon.

“Ĉu vi stumble vundiĝis?” demandas Juehui kaj klinas la kapon por pririgardi sian vizaĝon.

Brue ridinte, ŝi stariĝas kaj mantire kondukas lin al la roko ĉe la rivebordo por sidiĝi. Ili rigardas unu la alian. Sube la blanke flava riverakvo de tempo al tempo furioze frapas la bazon de roko.

“Juehui ,” ĝi vokas, prenante lian manon.

Li ŝajnigas sin ne aŭdi ŝin. Ŝi vokas ankoraŭfoje, sed li restas silenta.

“Kial vi ne respondas al mi?” ŝi demandas kolere.

“En ordinaraj tagoj vi ne vokas min tiamaniere, li fierce diras, skuante la kapon.

“Sed nun mia pozicio estas malsama ol antaŭe,” ŝi respondas fiere, “nun mi ne estas via servoknabino . Ankaŭ mi estas rica fraŭlino, kiel fraŭlino Qin.”

“Vere? Kial mi ne aŭdis pri tio?” li demandas kun miro kaj ĝojo.

“Sed nun vi vidas per viaj propraj okuloj. Nenio povas malhelpi nin. Ni ambaŭ estas egalrajtaj. Ĉu vi renkontis mian patron?”

“Via patro? Mi neniam aŭdis, ke vi havas patron.”

“Mia patro, nun li estas riĉa. Li ĉiam sopiradis al mi kaj ĉie petis informon pri mi. Poste, ĝuste kiam via avo estis edzinigonta min al la familio Feng, mia patro eksciis, ke mi estas en via domo. Li turnis sin al via duonpatrino por interkonsiliĝi kiel forkonduki min. Estas ŝi, kiu elpensis bonan rimedon. Ŝi metis miajn malnovajn vestojn ĉe la

lagbordon kaj diris al aliaj , ke mi ĵetis min en la akvon... Mi venis ĉi tien kun mia patro. Jen estas lia ĝardeno. Ĉu vi ne vidas tiun domon okcidentstilan? Mi kaj mia patro loĝas tie. Nun ekzistas nenio baro inter ni . Mi volas demandi, ĉu vi ankoraŭ amas min aŭ ne.”

Juehui direktas sian rigardon al la nealta okcidentstila domo en la direkto, kiun ŝi montras. Aŭdinte ŝiajn vortojn, li sentas grandan gojon. Tamen li petoleme kontraŭdemandas, “Kion vi faros, se mi amas vin? Kaj kion vi faros, se ne?”

“Se jes, mi kontentigos ĉiajn postulojn, kiujn vi elmetos,” ŝi malrapide finparolas. Sur ŝia vizaĝo ludas ruga nuboj.

“Ĉu vere?” li demandas kun miro kaj ĝojo. “...”

“Silentu!” Antaŭ ol li eligas pliajn vortojn, ŝi retenas lin per mansigno. “Mia patro vokas min. Mi foriru. Estas pli bone, ke li ne vidu vin.”

Ŝi forlasas lin sur la roko, desaltinte, malaperas inter arboj. Stulte rigardante ŝian dorsfiguron, li ŝajne aŭdas fremdan voĉon voki sin. Atendante, li sopiras al ŝia alveno. Kvankam ŝi ne petas lin atendi surloke, li tamen kredas, ke ŝi certe revenos, kaj krome, li ne scias, kiun vojon preni por eliri . Li eĉ ne komprenas, kial li kuŝas en ĝardeno de alia kun la libro en la mano. Li atendas longan tempon.

Subite aperas purpura figuro antaŭ li. Ŝi alvenas. Ĉi-foje ŝi aspektas malpli vigla ol antaŭe. Kun mallevita kapo , ŝi malrapide aliras, kvazaŭ pensante pri grava afero.

Suririnte la rokon, ŝi sidiĝas kontraŭ li kiel antaŭe. Kun pendanta kapo ŝi malĝoje diras, “Nia afero estas finita.”

Li miras pri ŝia rapide ŝanĝita sinteno, dubeme demandante, “Kiu afero estas finita?” Li ambaŭmane levas ŝian vizaĝon. Ŝia okulparo ŝvele ruliĝas pro plorado. Ŝia vizaĝo estas makulita de larmoj, de sur kiu la pudro jam estas forlavita, kio pruvas, ke ŝi ploradis longe.

“Vi ploris ! Kio malĝojigas vin tiagrade?” li demandas konfuzite.

Liaj vortoj pikas al ŝi la vundon kaj ŝi denove ekploras. Li penas konsoli ŝin. Kiam ŝi iom kvietiĝas, ŝi komencas rakonti : ŝia patro volis edzinigi ŝin al mezaĝa oficisto kun la celo akiri multan monon kiel fianĉigan donacon kaj bonan oficon. Ŝi diris al la patro, ke ŝi jam havas amaton kaj neniel edziniĝos al iu alia. Tamen ŝi ne sukcesis ŝanĝi la decidon de la patro. Reirinte al sia ĉambro, ŝi longe ploregis.

Finparolinte, ŝi ekploras kun klinita kapo.

Siaflanke, Juehui sentas, ke li denove falas en la abismon. Dum sia mallonga vivdaŭro, li jam perdis multon. Ĉiaokaze, li pensas, li neniel perdu la reakiritan knabinon. Li devas firme teni ŝin al si.

Fuĝi! La ideo flagras en lia cerbo kiel fajrero. Li pensas, ke ili havas nenian vojon krom fuĝi. Li malkaŝas la ideon al ŝi.

Kun ĝojo ŝi aprobas lian ideon. Ridetante tra larmoj, ŝi diras, ke si havas rimedon por fuĝi. Desaltinte de la roko, ŝi kondukas lin laŭ zigzaga vojstreko gis konkava parto de la riverbordo. Boato estas serure ligita

al saliko. Ŝi malligas la boaton. Ili ambaŭ saltas en ĝin kaj ekremas.

“La rivero ŝveliĝas. La boato estas malfacile manipulebla sur ĝi. Estu singarda,” ŝi diras al Juehui kun iom da maltrankvilo.

“Ne gravas. Mi gardas min. Nun restas nur ĉi tiu elirejo,” respondas Juehui.

La boato ekmoviĝas direkte al la transa bordo. Komence ĝi iras stabile kaj rapide, sed iom post iom la vento plifortiĝas kaj ondoj ekfuriozas. Ondegoj leviĝas, kvazaŭ englutonte la boaton. La boato forte dancas. Ju pli ĝi veturas antaŭen, des pli la rivero larĝas. La komence videbla transa bordo retiriĝas poiome. Kun granda peno ili ambaŭ forte remas. La malgranda boato ankoraŭ dancas en la mezo de la rivero. Ili povas nek haltigi ĝin nek trovi por ĝi rifuĝejon kontraŭ la vento. Ondegoj leviĝas kaj subpremas ilin kiel montoj. Tuj surfo forte sin ĵetas sur la boaton. Ili aŭ sukcesas eviti aŭ eltenas. Iliaj vestoj tute malsekiĝas. Cetere ili devas ŝirmi siajn okulojn de tempo al tempo. Post kiam ondego falis, ili forte remas kelkfoje, tiel ke la boato veturas antaŭen iom da distanco. Dua ondego alruliĝas, dancigas kaj senigas la boaton je rezistpovo.

“Miaopinie ni neniel povos atingi la transan bordon, se ni remas ĉi-maniere,” li diras malespere.

“Sed ni povas fari nenion krom remi,” ŝi diras melankolie.

“Vidu, kio estas tio?” Juehui diras konsternite, turninte la kapon

malantaŭen kaj rigardinte. Vaporŝipo postkuras plenrapide.

“Mia patro postkuras. Rapide remu!” ŝia vizaĝo paliĝas. Dirinte kun tremanta voĉo, ŝi firme tenas la remilon kaj energie remas. En la vento kaj ondado la boato ankoraŭ malrapidas dum la vaporŝipo alproksimiĝas.

Ondego frapas la tribordon, tiel ke la boato skuiĝas kaj preskaŭ renversigas. Ili ambaŭ haste stabiligas ĝin, sed ĝi ankoraŭ drivas. Aŭdiĝas pafoj de malantaŭe. Kuglo pafiĝas al la boato. La du remantoj klinas la kapon por eviti. La kuglo flugas ĝuste super la kapo de Juehui kaj estas glutita de ondegas.

Sekvas alia pafo. La malalte fluganta kuglo falas ĝuste apud la korpon de Juehui. Tuj surfo ĵetigas al la boato, kiu dekstren ekkliniĝas, pro kio Mingfeng ekmalstreĉas sian manon. La remilo tuj forglitas el ŝia mano en la akvon kaj en palpebrumo estas forpuŝata de ondoj. Mingfeng eligas konsternitan krion.

“Kio okazas al vi?” Juehui surprizite demandas. Ondego sin ĵetas sur lian vizaĝon kaj li sufoke englutis buŝplenon da akvo. Li ankoraŭ firme tenas la remilon, ne forviŝante akverojn de sur la vizaĝo. Kun granda peno li tenas sian paciencon. Kiam li povas malfermi la okulojn, la distanco inter la vaporŝipo kaj boato des pli malpliĝas. La blanka sulko sur la rivero alrapidigas al ili, kunportante bruegon.

“Ni prefere remu returnen.” Ŝia vizaĝo des pli paliĝas. La akveroj sur

ĝi similas al larmoj post malĝoja plorado. Ŝiaj haroj malorde algluiĝas al la frunto. Ŝi panike diras, “Ni ne povas fuĝi nun. Lasu min reiri, tiel ke mi ne kompromitu vin. Mi ne estas grava. Se mi nur reiros, ili ne faros al vi malutilon.” Dirante, ŝi eksplodas per plorego.

Ne respondante, Juehui nur forte remas. Sed lia forto jam elĉerpiĝis. Sidante kontraŭ li, ŝi malĝoje ploradas, kio pikas lian koron. Antaŭe etendiĝas blanka vasto sen videbla bordo ; malantaŭe bruas vaporŝipo kaj homoj sur ĝi. Ondado ŝajne malpliĝas, sed lia paro da manoj kun la remilo tute ne efikas. Eĉ en tiu malespera situacio, li ĉionspite luktadas. Lia ununura penso estas : Ne forlasu ŝin.

Tamen la espero tute neniĝas. Li jam ne povas remante movi la boaton, kiu dancadas en la vento kaj ondado. Li povas fari nenion krom atendi morton. Li scias, ke se li nur ekmovos la manon aŭ flankenigos la korpon, li povos renversi la boaton. Li kaj ŝi ambaŭ kune oferos sian vivon ĉe la fundo de la rivero. Tiel ŝin ne povos preni aliaj. Tamen li neniel povas toleri la penson, ke ŝi mortu. Li ekhezitas kaj ĉesas remi. Li volas, ke la ondoj aŭ la postkuranta vaporsipo decidu ilian sorton. .

Tuj poste li vidas sin prenata al la vaporŝipo. Li stariĝas por savi ŝin. Tiumomente la boato renversiĝas kaj disrompiĝas, antaŭ ol li konscias, kio okazis. Li rapide kaptas pecon da tabulo flosanta sur la akvo. Li vidas, ke ŝi estas brakumata, ne povante liberigi sin. Ŝi ankoraŭ senĉese

direktas sian rigardon al li. Etendante ambaŭ manojn al li, ŝi svingadas ilin. Ŝi laŭte vokas lian nomon, plorante. Li respondas al ŝi plengorĝe. Li freneze vokas ŝin, ĝisraŭke kriante per sia tuta forto. Tamen la vaporŝipo sin returnas kaj ekveturas for.

Ondado supersonas ŝian voĉon. Ŝia vizaĝo iom post iom malklariĝas. Senrimede li vidas sin forkaptita, dum li mem drivas solece sur la akvo, savate de neniuj. Fine la vaporŝipo ne videblas. En malproksimo restas nur strio da nigra fumo, kiu ŝajne prezentas ŝian malespere baraktantan figuron. Ŝia tragika kriadado miksas kun la ondado. Sur la larĝa rivero li perdas sian tutan forton. Li ŝajne estas puŝata kaj tirata de io en la akvo. Li sentas, kvazaŭ io tiras kaj puŝas lin kaj baldaŭ ellasos ĝin. Kvankam lia voĉo fariĝas tre malforta, li tamen stulte vokadas ŝian nomon. La strio da nigra fumo jam malaperis el la vido. Sed li ankoraŭ fikse rigardas la direkton, en kiu la vaporŝipo forveturis. Liaj manoj malstreĉe lasas la lignopecon. Ondego sin ĵetas sur lin kaj senlima mallumo alpuŝas sin antaŭ liajn okulojn.. .

*

*

*

Li vekigis el la sonĝo. Ekzistis nek ondoj nek vaporŝipo. Kuŝante sur la mato en la lito, li firme kaptis pecon da maldika litkovrilo kaj peze premis ĝin sur la brusto. Lia koro forte batis. Ŝajnis al li, ke li jam unufoje mortis. Li malrapide fortiris la litkovrilon kaj aŭdis la batadon de sia koro. Ĉe anguloj de liaj okuloj ankoraŭ restis larmospuro.

Tra la gaza kulvualo li vidis, ke la olelampo sur la tablo feble lumas en la funebra atmosfero de la ĉambro, interne de la vualo malgaje zumis moskito. Ekster la fenestro jam pluvis oni ne scias kiom longe. Pluveroj frapadis la ŝtonplatojn, kvazaŭ batante lian koron.

Li konsciis, ke ĉio ĵus okazinta estas nur sonĝo . Tamen gi klare gravuriĝis en lia memoro, kvazaŭ ĝi vere okazus. Ekscitite, li sentis inklinon elverŝi sian koron al iu. Li turnis la kapon por rigardi sian fraton, kiu dormis apud li. Lia frato profunde dormis kun rideto. Eble li estis en bela sonĝo. Rigardinte lian vizaĝon dum iom da tempo, Juehui faris kelkajn elspirojn. Post kelka tempo sennoma malĝojo denove atakis lin.

* El la ĉina klasika verko *Libro pri Ritoj*.

** El la ĉina klasika verko *Libro pri Fileco*.

*** El la ĉina klasika kolekto *Kvar Libroj por Virinoj*.

29

En la familio Gao la morto de Mingfeng kaj la edziniĝo de Wan-er baldaŭ estis forgesitaj. La du okazaĵoj ne alportis gravan influon al la vivo de la granda familio. Du servoknabinoj forestis, sed la mastro tuj aĉetis novajn. Qixia anstataŭis Mingfeng kaj, Cuihuan prenis la lokon de Wan-er. Nombre, nenio ŝanĝo okazis. (Qixia, el kamparana familio, estis memstara dungito. Cuihuan, samaĝa kiel ŝia juna mastrino Shuying, estis vendita, post kiam ŝia patro — ŝia ununura karulo — mortis.) Post nelonge neniu plu menciis la nomon de Mingfeng. Nur en la menso de Xi-er, Qian-er, maljuna servistino Huang kaj aliaj, ŝia nomo ofte revokis amaran rememoron.

Ankaŭ Juehui de tiam ne plu menciis ŝian nomon. Supraĵe li ŝajne tute forgesis ŝin, sed ankore ŝi restigis al li malfacile kuraceblan vundon. Tamen li ne havis tempon por funebri pri ŝi, ĉar okazis alia afero ekster lia hejmo.

Post eldono de la sesa numero de la semajna gazeto *Aŭroro*, ekcirkulis la onidiro, ke la aŭtoritatoj likvidos la redakcion. La sciigo kredeble ekscitis Juehui kaj aliajn, sed ili ne donis sufiĉan atenton al ĝi, ĉar pro sensperteco, ili ne kredis, ke generalo Zhang ordonos al siaj subuloj tion fari. La sepa numero de la gazeto eldoniĝis sen malhelpo. La nombro de abonantoj pliiĝis. Ili luis kiel sidejon de la redakcio supraetaĝan ĉambron en la bazon. Ĉiuvespere iuj anoj libere iris

tien por renkontiĝo. Krom dimanĉe, la sidejo dumtage neniam malfermiĝis, tiel ke eĉ Juexin, kiu oficis tie, ne sciis, ke Juehui ofte iras tien.

La ĉefa parto de la vendado iris en la teretaĝo de la bazaro ; supraetaĝe plejparto de la ĉambroj estis vakaj escepte de pli ol dudek butikoj. La sidejo de la redakcio izole sin trovis inter malplenaj ĉambroj.

Ĉe vesperiĝo du aŭ tri junaj studentoj malfermis la pordon, ŝaltis la lampon kaj iom bone aranĝis meblojn. Post dekelkaj minutoj la varma renkontiĝo komenciĝis. Fakte la ĉeestantoj ne estis multaj, el kiuj ses aŭ sep estis oftaj vizitantoj. Okaze venis junulinoj kiel Xu Qianru, kiu mem ĉeestis dufoje. Ili ne havis formalajn kunvenojn, sed familiare interbabiladis pri diversaj temoj. Ĉion, kion ili ne menciis en la hejmo, ili tie pridiskutis senĝene . Ili babiladis ridante. La ĉambro fariĝis ilia klubo.

Juehui ofte vizitis la lokon. Kelkfoje li venis kun Juemin, sed li ne venis ĉiuvespere kaj Juemin venis malpli ofte ol li . Marde vespere Juehui senescepte venis, ĉar la gazeton oni ĉiam presis merkrede matene. Tiun vesperon ankaŭ Zhang Huiru kaj Huang Cunren venis por kune redakti kaj prepari la finan tekston.

La oka numero de la gazeto estis preparata por presi la tagon post la morto de Mingfeng. Juehui venis al la redakcio laŭkutime. Tie li vidis, ke Xu Qianru legas el ĵurnalo al ŝiaj kelkaj amikoj anoncon de Polica

Sekcio pri malpermeso de fortonto de harplektoj de virinoj. Juehui jam legis ĝin. Li aŭdis, ke la anonco estas preparita de klerulo de Qing-dinastio. La enhavo de la anonco estis nelogika kaj malprofunda, eĉ en lingvo malbonstila. Tial la legado de Xu Qianru vekis ridojn.

“Kia sensencaĵo!” ŝi diris, indigne ĵetinte ĝin sur la plankon kaj sidiĝis sur kanseĝo.

“Estas pli bone aperigi ĝin en la rubriko *Kion Oni Diras* de la oka numero,” Huang Cunren proponis, ridetante.

“Bone!” kriis Xu Qianru la unua.

Ĉiuj aprobis tion. Tamen Zhang Huiru proponis, ke oni verku artikolon por severe refuti ĝin. Ankaŭ tion ĉiuj jesis. Ĉiuj petis Huang Cunren skribi la artikolon, sed li puŝis la taskon al Juehui. Por Juehui tio estis ŝanco elverŝi siajn plendojn. Senrifuze li sidiĝis ĉe la tablo kaj komencis skribi.

Unue li skribis la titolon “Post Lego de la Anonco de la Polica Buroo pri Malpermeso de Fortonto de Harplektoj de Virinoj” kaj poste li komencis la artikolon. Dum la skribado li kelkfoje okulumis la anoncon, kun la plumo en la buŝo. Aliaj staris ĉirkaŭ la tablo, rigardante lin.

Baldaŭ la artikolo estis preta. Ĝi estis nelonga. Juehui legis ĝin al la aliaj, kiuj certigis ĝian uzeblecon. Poste Huang Cunren ŝanĝis kelkajn vortojn kaj decidis aperigi ĝin sur la unua paĝo de la gazeto. Nur

Wu Jingsi, malpli juna kaj diskreta avertis, “Ĝi certe levos laŭtan bruon.”

“Ne timu,” Zhang Huiru diris ekscitite, “ju pli laŭte, des pli bone.”

Matene de dimanĉo la oka numero de la gazeto eldoniĝis . Posttagmeze Juemin kaj Juehui iris al la oficejo de Juexin kiel kutime. Post kelktempa interbabilado Juehui sola ŝteliris al la redakto. Tie estis Zhang Huiru, Zhang Huanru, Huang Cunren kaj du-tri aliaj. Juehui demandis ilin pri la disvendo de la numero. Ili diris, ke estas ne malbone. Ĝus ili iris al du agentejoj por peti informon pri la vendado. Oni diris, ke kiam la numero alvenis, nemalmultaj aĉetis ĝin.

“Vi ankoraŭ ne pagis vian abonon,” Huang Cunren, kiu funkciis kiel kontisto de la organizaĵo, ridetante diris al Juehui.

Tiu fosis en la poŝo. “Mi pagos morgaŭ . Mi hodiaŭ ne havas monon,” li ridetante diris kun bedaŭro.

“Do, morgaŭ nepre alportu,” Huang Cunren diris , ridetante .

“Li ja estas lerta en elvringado de mono. Ankaŭ mi ne povas eviti lian elpremon,” Zhang Huiru intermetis, alpaŝante. Kun rideto sur la triangula vizaĝo, li petoleme fingromontris al Huang Cunren. “Hodiaŭ mi havis interesan travivaĵon. Matene, antaŭ ol eliri , mi elprenis el la kesto maldike vatitan robon nove faritan lastjare , kaj surmetis ĝin. En la nuna sezono, mi aspektis vere ridinda kun vatita robo sur la korpo. Eble mia fratino suspektis, ke mi perdis la prudenton. Mi diris, ke mi

sentas malvarmon kaj insistis ĝin porti. Ŝi povis fari nenion kontraŭ mi. Haha...” Liaj vortoj ridigis la aliajn. Ridante, li diris, “En la vatita robo mi eliris. Kiel varmege ! ... Mi sentis brulon en la koro. Feliĉe la lombardejo estas nemalproksime de mia hejmo. Mi eniris kaj deponis ĝin tie. Kiam mi eliris el ĝi, mi sentis kaj grandan malpezecon kaj grandan freŝecon, kaj pli ol tio, mi ekhavis monon por pagi la abonon. Mi ĵus renkontis surstrate Huanru, kiu ne hejmeniris hodiaŭ. Kiam mi rakontis tion al li, ankaŭ li ne povis deteni sin de ridado.” Ĉiuj ridis, kaj ankaŭ Huiru ridis kun ili.

“Kion vi diros al via fratino, se ŝi demandos vin pri la vatita robo?” demandis Juehui.

“Mi jam pretigis min. Mi diros, ke pro varmego mi demetis kaj restigis ĝin ĉe amiko. Tio ne kaŭzos suspekton. Se mi ne povos trompi ŝin, mi simple diros al ŝi la veron. Eble ŝi reaĉetos ĝin per sia mono,” Zhang Huiru fiere respondis.

“Mi vere...” Antaŭ ol Juehui finis la vortojn “Mi vere vin admiras”, eniris du policianoj.

“Ĉu vi ankoraŭ havas ekzemplerojn de la freŝa numero?” demandis la policano kun barbo.

Huang Cunren elprenis unu ekzempleron kaj donis al ili, dirante, “Jes, unu ekzemplero por tri kupraj moneroj.

“Ni ne aĉetas vian gazeton. Ni alvenis laŭ ordono de la

aŭtoritatoj,” diris la juna policano, “ni forportos ĉiujn restantajn ekzemplerojn en stoko.” Li prenis la du restantajn pakojn de gazetoj.

“Oni postulas, ke vi iru al nia Buroo kune kun ni. Ne ĉiuj, sed du sufiĉas,” afable diris la policano kun barbo.

Surprizite, ĉiuj ekrigardis unu alian por momento kaj alpaŝis, dirante, ke ili volas iri kun ili.

“Tro multe. Mi diris, ke du sufiĉas,” embarasite diris la barbulo-policano, svingante sian manon. Poste li elektis Juehui kaj Zhang Huiru kaj tiuj sekvis ilin. La aliaj postiris.

Kiam ili estis malsuprenirontaj la ŝtuparon, la barbulo-policano subite returnis la kapon kaj diris al Juehui, “Lasu! Ne iru kun ni. Reiru do!”

“Pro kio vi faras tion finfine? Per kia rajto vi konfiskis niajn gazetojn?” Zhang Huiru indigne demandis.

La juna policano jam malsupreniris la stuparon, kunportante la gazetojn. “Mi faras tion laŭ la ordono de la supera instanco,” respondis afable la policano kun barbo, kiu postiris. Malsuprenironte, li haltis kaj, returninte la kapon, admonis, “Vi estas junaj kaj ne komprenas multe. Prefere restu ĉe via lernado. Ne eldonu gazeton nek ŝovu la nazon en tion, kio ne koncernas vin.” Fininte sian parolon, li malrapide descendis malsupren.

Ili reiris al la ĉambro por interkonsiliĝi.

Ĉiuj indigne diskutis, elmetante siajn opiniojn . Post longa tempo, antaŭ ol ili venis al rezulto, venis alia policano, kiu liveris oficialan leteron. Malferminte la koverton, Zhang Huiru lake legis ĝin, kiu eksplicite deklaris, “Pro tio, ke via gazeto aperigis drastajn artikolojn, kiuj multe ĝenas la ordon de la ŝtato, ni petas vin tuj ĉesigi ĝian eldonadon...”

La vortigo de la letero estis ĝentila, sed severa. Tio vere estis originala maniero malpermesi eldonadon de gazeto. Tiamaniere la vivo de la semajna *Aŭroro* estis fortranĉita. Falis malĝojiga silento. La oficiala letero faris ne malgrandan baton al tiuj, kiuj ame vartis la gazeton kiel novnaskiton. Kun sincera koro kaj sindonemo ili soifis fari ion utilan ; nemulte spertaj, ili vidis strion da espero per sia proksima vido ; kvankam malforte, ili montris al ordinaraj popolanoj strion da espero ; dank’ al la semajna gazeto, ili konatiĝis kun multe da same varmaj koroj junaj ; en ilia amikeco kaj konfido, ili trovis konsolon. Sed nun ĉio estis finita.

La mallonga tempodaŭro de ok aŭ naŭ semajnoj ŝajnis prezenti magian songon. Kiel bedaurinda songo !

“Nun mi komprenas, ke ĉio estis hipokrite farita ! Generalo Zhang estas sama kiel la malnova provincestro, ĉu ne?” Zhang Huiru indignis.

“Ĉu vi ne vidas, ke la malnovaj fortoj tiel profunde radikiĝis en nia socio?” Huang Cunren stariĝis kaj aflikte diris, gratante al si la

mallonge tonditan hararon. “Ec dek homoj, kia generalo Zhang, ne povas reformi ion!”

“Unuvorte, lia reformado estas falsa,” Zhang Huiru daŭrigis, “lia tiel-nomata reformado estas nenio alia ol dungi kiel liajn konsilantojn kelkajn studentojn, kiuj lernis eksterlande, kaj preni kelkajn studentinojn kiel liajn konkubinojn.”

“Sed kiam li garnizonis aliloke lastjare, li invitis kelkajn personojn kun novaj pensoj el Ŝanhajo kaj Nankino por fari paroladon,” Huang Cunren diris pretere .

“Sufiĉe!” Zhang Huiru diris kun malestima rideto. “Ĉu vi forgesis pri lia parolado okaze de la bonveniga kunveno? ... Lia sekretario preparis la tekston de lia parolado antaŭtempe, sed kiam li recitis ĝin, lia memoro estis tiel konfuzita, ke li venis al la kontraŭa signifo de la teksto. Lia bonveniga parolado estis tia, ke la aŭskultantoj ne sciis, ĉu ridi aŭ plori . Tiaj ridindaĵoj certe multas!”

Huang Cunren eksilentis. En lia menso estis pli grava problemo por meditado. Rilate al Zhang Huiru, liaj vortoj nek helpis al solvo de la gravaj problemoj antaŭ liaj okuloj nek malpliigis lian indignon. Lia koro kaj cerbo brulis kaj li sentis elkurantan vortfluon.

“Miaopinie, ŝanĝu la nomon sed restigu la saman enhavon de la gazeto. Daŭrigu ĝian eldonadon. Ni defiu ilin,” Zhang Huiru indigne diris.

“Bone, mi aprobas tion!” diris Juehui, kiu tenadis sin silenta.

“Sed ni devas elpensi sekuran kontraŭrimedon,” Huang Cunren penseme diris, levinte la kapon el profunda meditado. Ilia longtempa diskutado kondukis al la fina decido, ke ili elsendu informilojn al la abonantoj por deklari ĉesigon de la eldonado de *Aŭroro*, kaj samtempe faru preparadon por enkonduki novan semajnan gazeton. Krome, ili interkonsentiĝis, ke la nuna redaktejo transformiĝu en legĉambron, kie la novaj gazetoj kaj ĵurnaloj de la anoj eksponiĝos, por provizi la legantan publikon per senpaga servo. Ankaŭ tio helpas al dissemado de nova kulturo.

Tiel decidinte, ili ne plu sentis malgajon kaj brulan indignon. Ĉar ili jam trovis kontraŭrimedon, ili tuj komencis la novan laboron.

Kia belaĵo estas la entuziasmo! Ĝi ebligis al tiuj junuloj konkeri ĉiujn malfacilojn en mallonga tempo. La sekvan tagon ili pretigis la legĉambron, kaj du tagojn poste aperigo de la nova semajna gazeto *Por la Popolamaso* jam estis bone preparita.

Pro venonta semestra ekzameno la lecionoj de mardo estis nuligitaj. Tiun tagon Juemin kaj Juehui iris partopreni en la inaŭgura ceremonio de la legĉambro kaj revenis hejmen ĝuste de la vespermanĝo. La vivo de tiu tago restigis al Juehui bonan impreson. Li neniam spertis tian emocion. Babilado kun ridado, amikeco, sincereco, konfido ... Li neniam ĝuis tiel belan scenon. La tekunsido de dekkelkaj junuloj verŝajnis frateca

renkontiĝo en harmonia familio. Tamen tiuj familianoj estis interligitaj ne de sanga rilato kaj proprieto, sed de sama bona volo kaj sama idealo. En tiu rondo li simple sentis sinceran kontaktiĝon inter fidelaj koroj tute liberaj de la kateno de individuaj interesoj. Tie li ne plu estis fremda kaj soleca homo. Li amis la aliajn ĉeestantojn kaj estis amata de ili ; li komprenis ilin kaj estis komprenata de ili ; li konfidis ilin kaj estis konfidata de ili. Komence li aranĝis ĉion kun la aliaj, kaj poste, kiam ĉio estis preta kaj la tekunsido komenciĝis, ankaŭ kun la aliaj li trinkis teon kaj manĝis kukojn, kontente dividante la plezuron de la renkontiĝo. Ili libere babiladis pri diversaj agrablaĵoj .

Tiumomente, ĉio obskura kaj tragika ŝajnis ne ekzisti plu.

“Se ni ofte renkontiĝos tiamaniere!” ĝoje diris Juehui al Juemin. Li preskaŭ larmis de ĝojo. Tiu kortuŝite balancis la kapon.

Tamen la tekunsido venis al sia fino. Sur la revenvojo, babilante kun Juemin pri diversaj aferoj, Juehui sentis varmecon en la koro. Sed atinginte la hejmon kaj enirinte la vestiblon, li tuj estis kaptita de soleco. Li kvazaŭ falus en frostan abismon aŭ troviĝus sur senhoma dezerto. Antaŭ liaj okuloj floris fguroj, senescepte de tiuj kun malnovaj ideoj. El ili li sukcesis trovi neniun kun modernaj ideoj, kaj eĉ neniun, kun kiu li povis paroli.

“Kia soleco! Kiel netolerebla soleco!” Juehui plende veis. Lia afliktiĝo kreskis. Ĉe la vespermanĝa tablo li vidis spuron de afliktiĝo

sur ĉies vizago. Lia duonpatrino riproĉe prirakontis la taktikon de sinjorino Wang kaj sinjorino Shen ; malantaŭe aŭdiĝis insultado de sinjorino Wang al servoknabino Qian-er ; post momento okazis buŝa batalo inter sinjorino Shen kaj sinjorino Chen en la korto. Juehui rapide finis la manĝon. Li elrapidis, kvazaŭ persekutate de io timiga.

Tuj poste Juemin eliris. La du fratoj iris promeni kune.

“Ni iru al tiu ‘Rezidejo de Familio Gao’ por pririgardi, ĉu bone?”

Juemin proponis kun rideto. “Bone,” Juehui koncize respondis.

Senparole ili paŝadis sur la strato. Post nelonge ili atingis la dezertecan strateton.

Estis bela tago. Neniu nombro troviĝis sur la ĉielo. La luno leviĝis de malantaŭla arbosuproj, farbante la strateton per arĝenta koloro iom post iom. Ne aŭdiĝis homa voĉo. Interne de la korta muro, cikadoj intermite ĉirpis. Tretante sian malhelan ombron, ili malpeze paŝis sur la vojo pavimita per rondaj ŝtonetoj. Fine ili atingis la pordon de la “Rezidejo de Familio Gao”. Kiel antaŭe la du nigre lakitaj pordoklapoj estis firme fermitaj. Ili ekpuŝis ilin, sed nenio okazis. Ili preteriris kaj sin direktis antaŭen. Kiam ili atingis la ekstremon de la strateto, ili sin returnis. Preterpasante sub la soforo, ili aŭdis grakadon de birdoj super la kapo. Haltinte, ili levis la kapon por rigardi. Sur la granda branĉforko de la soforo estis nesto de korvoj. Ili ŝajne vidis graketantajn korvidojn kun streĉitaj koloj.

Tiu sceno, kvankam tre ordinara, multe kortuŝis la du junulojn. Ilia kapo ne povis malleviĝi dum longa tempo ; iliaj piedoj, kvazaŭ radikiginte, ne moviĝis ; iliaj korpoj alproksimiĝis automate Juemin etendis sian tremetantan manon kaj firme premis tiun de Juehui. Li diris kun funebra voĉo, “Ni ĝuste similas tiun paron da senpatrinaj korvidoj .” Li eklarmis. Ne respondante, Juehui nur firme premis lian manon.

Abrupte supre de iliaj kapoj aŭdiĝis grakado de korvo kaj svingado de flugiloj. Nigra ombro fulmis antaŭ iliaj larmantaj okuloj. La korvo rapide enflugis en la neston. La du korvidoj ameme alpremiĝis al ĝi, graketante ; ĝi patrine kisis iliajn bekojn. En la nesto bolis ĝojaj kaj harmoniaj sonoj.

“Ili nun havas patrinon,” Juemin amare diris. Li klinis la kapon kaj ekrigardis Juehui. Larmoj brilis en ties okuloj .

“Ni reiru,” Juemin diris.

“Ne. Lasu min stari ankoraŭ momenton,” Juehui respondis. Li denove levis la kapon kaj rigardis la neston.

Alflugis muziko de fluto el la korto. La muziko estis amosopira melodio, bela sed malgaja. Ĝi ŝajnis enteni eternan malĝojon. Antaŭ iliaj okuloj kvazaŭ montriĝis jena sceno : Junulino apogas sin al la fenestrobreto, rigardante la krescentan lunon. Ŝi sopiras al sia amato, kiu vojaĝas malproksimen. Ŝi enverŝas sian sopiron en la maldike longan

bambutubon, el kiu elvenas kortuŝite malĝojaj tonoj. La muziko de fluto rakontas pri amara amhistorio ; en ĝi ŝvebas la malgojo de soleca ekzisto.

Ili tre bone konis la popularan melodion, ĉar en ilian korton oni ofte venigis blindulon, kiu vivtenis sin per kantado. Li kantis tiajn ariojn en falseto. Kvankam la vortoj de la kanto estis vulgaraj, ili tamen estis voĉoj de la homa vivo. Kaj nun ili denove troviĝis en la sama medio.

“Iu alvenas!” Juemin subite singardeme diris. Li volis foriri , tirante Juehui , ĉar li sciis, kiu alvenas.

Returninte la kapon, Juehui vidis, ke la palankeno de Keding alvenas en ilia direkto de malproksime. Servisto Gao Zhong spiregante kuretis apud ĝi.

“Ne timu! Ni staru kun la dorso al li kaj ŝajnigu ne vidi lin,” diris Juehui . Ĉar, jam starante tie, li ne volis foriri , Juemin vole-nevole devis restis tie.

Baldaŭ la palankeno pasis preter ili. Gao Zhong vokis la pordiston kaj la pordo malfermiĝis. La paŝbruo de la palankenistoj sin kaŝis en la korton. La pordo denove fermiĝis. Tiumomente la flutmuziko subite interrompiĝis .

“Nun ni reiru,” Juehui diris, turnante sian korpon.

Ili malrapide iris. Antaŭ ol ili eliris el la strateto, alia palankeno

alvenis renkonte al ili. Kun miro, ili vidis ĝin preterpasi. Ĝin sekvis servisto Zhao Shen de Ke-an, same spiregante.

“Estas strange. Ĉu ankaŭ Kvara Onklo iras tien?” Juemin mirigite diris, elirinte el la strateto.

“Kial ne?” Juehui diris kun ironia rideto. “Malgraŭ tio, ke li havas bonan manskribon kaj li scipovas montri sin seriozmiena, li faris multajn komikajn strangaĵojn hejme, ĉu ne?” En lia menso aperis diversaj anekdotoj pri Ke-an kiel amorado inter li kaj servoknabino, kaj lia invito de aktorino al la hejmo por foti en teatraj kostumoj. “Ili ĉiuj estas samaj, ne diferencas unu de la alia ! Tamen ili altrudas al si la severan aspekton de pliaĝuloj kontraŭ ni kaj riproĉas, ke ni ne posedas la ĝentilecon de posteuloj!” li indigne diris. “Nur Granda Frato timas ilin kaj ceremonie kontaktas kun ili . Mi ne timas ilin.”

“Tamen Granda Frato tiel kondukas ne volonte,” Juemin senemfaze diris.

Kiam ili revenis en la hejmon, Juemin komencis relerni lecionojn por la semestra ekzameno. Lia temperamento estis tia: li estis optimisma, sed kelkfoje forgesema. Kvankam li ne kontentiĝis pri tio kaj ĉi tio, li tamen forgesis ilin nur post tempeto. Kiam li malfermis la libron, li povis koncentri sian penson al ĝi. Juehui ne estis tia. Li estis pli fervora kaj pli flamiĝema ol lia frato. Ankaŭ li volis relerni lecionojn, sed kiam li malfermis la libron, li sentis pli

grandan malkvietiĝon. Netolerebla soleco komencis turmenti lian koron kaj sennoma malĝojo ekvolvis lin. Lia seĝo kvazaŭ metiĝus sur fajro, tiel ke li ne povis sidi trankvile sur ĝi dum momento. Kun longa vespiro li fermis la libron kaj stariĝis.

“Kien vi volas iri?” demandis Juemin kun zorgemo.

“Promeni ekstere. Mia koro estas tre malkvieta.”

“Bone, revenu baldaŭ. Ĉar la semestra ekzameno okazos postmorgaŭ, vi devas bone relerni viajn lecionojn,” diris Juemin afable.

Jesinte, Juehui eliris kaj sin direktis al la ĝardeno.

La ĝardeno ŝajnis alia mondo. Lia animo iom kvietiĝis, dum li vagadis malrapide.

Arĝente blanka lunlumo sterniĝis sur la tero. Ĉie aŭdiĝis malgaja ĉirpado de griloj. La supla reto de la nokto saturita de aromo vualis ĉion en lia vidkampo. La tuta vualita vidaĵo, eĉ herboj kaj arboj, ne tiel reale aspektantaj kiel dumtage, fariĝis malklaraj kaj iluziaj, kaŝante siajn detalojn kaj sekreton, kvazaŭ en sonĝo.

Juehui estis altirita de la sceno. Kun kvieta koro li ĝuis ĉion ĉirkaŭ si kaj lia intereso kreskis. Li senhaste iris laŭ la vojo, kiun li kaj liaj gefratoj prenis tiun nokton, kiam ili remis sur la lago. Sed li ne revokis en sia memoro la tiaman scenon kaj ludkamaradojn.

Li suriris la arkan ponteton. Apogante sin kontraŭ la balustrado, li klinis la kapon kaj observis la akvosurfacon dum momento. La malhela

figuro de lia kapo reveliĝis sur la akvo. En lian larĝigitan vidkampon en-
glitis la blua ĉielo sur akvo, sur kiu la duonluno malrapide moviĝis.
Ekster lia atendo aperis bela vizaĝo el la akvo, la vizaĝo, kiun li trezore
amis. Pensante pri ŝi, li sentis subitan kortordiĝon.

Li deturnis la kapon, ĉar li ne kuraĝis ĵeti plu sian rigardon al la
akvo. Li rapide trapasis la ponteton.

Trairinte la ponteton, li iris sur la herbejon. La boato alligita al la
saliko entrudiĝis en liajn okulojn kaj eltiris pensojn pri la pasinteco. Li
rapide evitis ĝin kaj reiris al la transa bordo per la arka ponteto.

Li paŝetadis laŭ la apudlaga vojstreko. Ĉe la ekstremo de la pinareto li
ĉirkaŭiris la kurbiĝon kaj atingis la apudlagan domon. Li volis malfermi
la pordon por ripozi, sed subite vidis fajrlumon leviĝi el trans la artefarita
monteto. Li surpriziĝis kaj preskaŭ eligs krion. Starante silente sub
magnolio, li fikse rigardis tien dum momento. La neforta fajrlumo
leviĝis de tempo al tempo. Kial fajrlumo aperas nun ĉi tie? Kaj cetere ne
aŭdiĝis homvoĉo ! Li neniel sukcesis solvi la demandon. Kuraĝigite, li
katpaŝe sin direktis tien.

Malantaŭ la monteto li vidis nenion. La fajrlumo troviĝis post la
oblikve antaŭa monteto. Li iris al ĝi. Ĉirkaŭirinte ĝin, li vidis junulinon
bruligi monpaperojn por mortintoj, kaŭrante.

“Kion vi faras ĉi tie?” li laŭte demandis kun mirego.

Surprizite, la altkreska junulino stariĝis kaj rigardis lin, vokante “Tria

Sinjorido”.

Estis servoknabino Qian-er de la kvara familibranĉo. Li diris, “Estas vi ! Mi preskaŭ surpriziĝis. Por kiu vi bruligas monpaperojn? Kial vi bruligas ilin ĉi tie?”

Demetinte la paperaĵojn, ŝi alpaŝis kaj petis, “Tria Sinjorido, ne malkaŝu al aliaj. Se mia sinjorino sciigis pri do, ŝi riproĉos min.”

“Diru al mi por kiu vi bruligas tiujn oferaĵojn.”

Kun klinita kapo ŝi diris, “Mingfeng jam mortis semajnon... Mi pensas, ke ŝi mortis mizere. Tial mi kaŝe aĉetis kelkajn oferaĵojn por bruligi por ŝi. Per tio mi esprimas mian dankemon al ŝi pro ŝia bona traktado al mi, kiam ŝi vivis... Mi pensis, ke se mi bruligas ilin ĉi tie, mi povas eskapi el la okuloj de aliaj. Kiu atendis, ke vi Tria Sinjorido venos ! Tria Sinjorido, Mingfeng estis via servoknabino kaj ŝi priservis vin ok aŭ naŭ jarojn. Kompaton al ŝi . Lasu min bruligi kelkajn monpaperojn, por ke ŝi ne suferu froston kaj malsaton en la subtera mondo...” Tiujn vortojn ŝi eligis plorvoĉe.

“Nu, bruligu senĝene. Mi ne malkaŝos tion al aliaj,” li afable diris. Premante sian manon sur la brusto, li sentis pikon en la koro. Li silente senpalpebrume rigardis ŝin bruligi la oferaĵojn. Lian senton ŝi neniel povis scii.

“Kial vi dividas tiujn oferaĵojn en du amasojn?” li demandis malĝojvoĉe.

“Ĉi tiu amaso estas por Wan-er,” ŝi diris, fingromontrante la amason.

“Wan-er? Ŝi ankoraŭ vivas, ĉu ne?” li surprizite diris.

“Ŝi petis min bruligi por ŝi. Kiam ŝi eniris en la palankenon, ŝi diris al mi, ‘Mi mortos frue aŭ malfrue. Eĉ se mi ne mortos, mi ne povos vivi plezure. Estas preferinde morti ol vivi. Vi prenu min kiel mortinton. Kiam vi bruligos monpaperojn por Mingfeng, bruligu kelkajn por mi. Prenu min kiel mortinton...’ Hodiaŭ mi do bruligas kelkajn por ŝi.”

Aŭdinte ŝian malgajan voĉon kaj pensante pri tiuj du tragikaj historietoj, kiel li povus priridi la junulinon, kiu malsaĝe faris tion? Ĉiaokaze li ne devis ridi kaj ne havis inklinon ridi. Kun granda peno, li diris, “Bruligu! Vi prave faras tion.” Post tio li stumble foriris. Li ne kuraĝis returni la kapon por ĵeti alian rigardon al ŝi.

“Kial ekzistas tiom da malĝojo en la mondo?” li duonsvene murmuris al si. Kun vundita koro li eliris el la ĝardeno.

Preteririnte la fenestron de Juexin, li vidis brilan lamplumon kaj aŭdis mildan voĉon. Li sentis, kvazaŭ li fuĝus el alia mondo. Li subite memoris la vortojn, kiujn lia franca instruisto diris en la klasĉambro antaŭ kelkaj tagoj, “La francaj junuloj ĉe via aĝo ne konas malĝojon.” Tamen, li, ĉina junulo, kvankam tiel juna, jam estis subpremita de malĝojo.

30

La somera libertempo alvenis. En tiuj tagoj Juemin havis pli multe da ŝanco esti kun Qin, kaj Juehui pli multe da tempo por kunesti, interbabili kaj labori kun siaj junaj amikoj. Post nova klopodado la nova gazeto eldoniĝis kaj varbis novajn legantojn. Ĉio iris glate.

Dum la libertempo alia grava afero okazis en la familio Gao. Oni celebris la sesdek-sesan naskiĝtagon de Grandsinjoro Gao.

Keding estis la unua, kiu proponis okazigi grandiozan ceremonion por celebri tiun festotagon. Li opiniis, ke oni devas asigni specialan sumon da mono el la familia kaso por fari preparojn. Li eĉ diris, “Ĉiaokaze ni ricevas tiom da lupagoj ĉiujare, ke ni havas sufiĉe da mono. Laŭ la informo de intendanto Liu Sheng, kvankam okazis milita konflikto, ĉi-jare la rikolto de grenoj estas bona. Ni ricevos pli multe da rento Ne gravas elspezi relative multe!”

La informon de intendanto Liu Sheng ĉiuj sciis. Ke-an tre aprobis la proponon de Keding. Post iom da kalkulado Keming, kiu respondecis pri la familia kaso, konsentis. Li prezentis la proponon al Grandsinjoro kaj faris kelkajn aranĝojn laŭ ties deziro.

La dato alproksimiĝis. Donacoj tajde alfluis. Oni starigis oficejon por akcepti gratulajn donacojn kaj disdoni invitkartojn. Multaj intense laboris. Pro la celebrado Juexin eĉ petis de la kompanio forpermeson por unu semajno.

En la korto oni aldonis multajn elektraĵajn lampojn kaj pendigis silkajn festonojn ĉie. La tuta kortodomaro estis pompe ornamita. Provizora scenejo estis starigita sur la korto antaŭ la halo. Oni estis invitonta famajn teatraĵajn trupojn por prezenti tie operojn de Pekino kaj Sichuan-provinco por tri tagoj. Parto de la halo estis ĉirkaŭita per blua tolo kiel tualetejo por aktoroj, kaj krome du lokoj estis aranĝitaj en la ekstera salono por tualetado de famaj aktorinoj. Keding decidis la liston de la prezentotaj operoj. Li montris sin elstara specialisto pri tio. Ke-an helpis lin.

Ĉiuj okupiĝis pri siaj propraj taskoj, escepte de Juemin kaj Juehui, kiuj ofte forestis el la hejmo anstataŭ ion fari. Nur dum la tri tagoj de celebrado, ili devigite restis en la hejmo kaj montris sin al gastoj de tempo al tempo.

Dum tiuj tri tagoj ili ekhavis sperton, kiun ili neniam akiris antaŭe. Kvankam ili malŝatis sian familion en ordinaraj tagoj, almenaŭ ili tamen konis ĝin. Dum la celebrado ĝi tute aliiĝis. Ĝi iĝis operejo kaj foiro plenaj de homoj, rumoro kaj nenaturaj, ridetantaj vizaĝoj. Eĉ ilia ĉambro estis okupata de gastoj, kiujn ili ne bone konis. Jen malgranda grupo da blinduloj-muzikistoj ludis zimbalonon, kantante la ariojn gratulajn al naskiĝtago ; jen kelkaj blinduloj kantis obscenajn ariojn akompanate de hucinoj * . Viroj pene kantis per falseto, dum virinoj imitis viran bason. Tria grupo ludis malantaŭ kurteno, ili eligis erotikajn

amindumajn voĉojn de viroj kaj virinoj, tial la gejunuloj ne estis permesitaj aŭskulti.

La operludo komenciĝis posttagmeze de la unua tago. Escepte de kelkaj gratulaj pecoj, la plejparto de la operoj el la listo ne prezentiĝis. La kaŭzo ne estis, ke la aŭtoritato de la “specialisto” ŝanceliĝis, sed pro tio ke kelkaj el la honoraj gastoj petis prezenti pli interesajn, pli subtilajn pecojn kaj eĉ postulis, ke oni ludu artisme. Kiam venis la peco, kiu ruĝigis la vizaĝon de virinaj kaj junaj rigardantoj sed ĝojigis la mezaĝan kaj maljunan rigardantaron, servisto Wen De venis sur la scenejon por sonorvoĉe legi sur ruĝa paperslipo, “La honora sinjoro xxx premie donacas al aktoro xxx (de virinaj roloj) la sumon de xx juanoj.” La menciita aktoro tuj esprimis dankon al la donacinto, dum kontenta rideto montriĝis sur la majesta vizaĝo de la honora sinjoro.

Sed eĉ tio ne tute kontentigis la honorajn gastojn.

Kiam opero, finiĝis, la aktoroj, kiuj ricevis donacmonon, devis deiri de la scenejo en operaj kostumoj kaj trinki vinon kun ili. Siaflanke la ĝentilhomoj amore palpis la aktorojn aŭ brakumis ilin. Ili kondutis tiel triviale, ke la gejunuloj surpriziĝis kaj la servistoj flustris unu al alia.

Grandsinjoro Gao estis la centro de la celebra aktivado. Vidinte ĉion ĉi, li kontente ridetis. Li ree direktis sian rigardon al la scenejo kaj fiksis ĝin, ĉar tiam lia plej ŝatata aktoro de virinaj roloj aperis sur la

scenejo.

Kun rideto Keming, Keding kaj Ke-an navete iris inter la gastoj, zorgante pri ties postuloj kaj deziroj. Kaj Juexin sekvis ilin.

Vidinte ĉion ĉi per siaj propraj okuloj, Juemin kaj Juehui nutris fortan antipation. En tiu familio, en tiu medio, ili tute sentis sin fremduloj. La bruaj krioj kaj ridado ŝajnis al ili lingvo, kiun ili ne povis kompreni ; tiuj estaĵoj, kiuj ridis, kriis kaj drinkis, ŝajnis al ili tute stranga speco de homoj. Multaj vizaĝoj estis konataj de ili, sed kiam ili zorge rigardis, la vizaĝoj ŝajnis neniam viditaj. Kelkfoje ili ambaŭ scivolis, kie ili troviĝas kaj kion ili devas fari el la konduto de aliaj ili konsciis, ke ili ne estas bezonataj tie. Sed Kering, Juexin kaj aliaj ne permesis al ili foriri , ĉar ankaŭ ili estis gastigantoj. Kiel figurantoj, ili estis lokitaj ĉe la tablo kun gastoj de malpli alta rango. Ili mekanike agis — altrudi al si rideton, tosti kun levita vintaso kaj preni manĝaĵojn kiel maŝino, ne kiel veraj homoj .

La unuan tagon Juehui eltenis ; tiun nokton li havis multajn malagrablajn sonĝojn. La duan tagon li jam perdis paciencon kaj elŝteliĝis posttagmeze. Li vizitis siajn junajn amikojn, de kiuj li ricevis unue mokojn kaj poste konsolon. Fine li kolektis kuraĝon por hejmeniri kaj elteni novan humiligon ("humiligo" estis lia vorto) . Sed la trian tagon li trovis nenian ŝancon ŝtele eliri .

Mei venis kun sia patrino, sinjorino Qian. Kun ridetanta vizaĝo ŝi

portis brile helkoloran jakon kaj blankan jupon. Ruijue varme akceptis ŝin. Ili interbabiladis longan tempon. Nokte Mei foriris tre frue. La sekvan matenon ŝi sendis mallongan leteron al Ruijue ŝi malsaniĝis. Dum tiuj tagoj sia malsano graviĝis. Ŝia malsaneca vizaĝo pli beliĝis pro antaŭmorta brilo. Tio vekis bedaŭron eĉ ĉe tiuj, kiuj estis malmulte sentemaj. Ili sciis, ke tiu bela stelo baldaŭ falos.

Sed en la familio Gao oni ne multe sentis bedaŭron pri ŝi. Juexin estis unu el la malmultaj bedaŭrantoj kaj eble plej zorgis pri ŝi. Tamen estis multaj nevideblaj obstakloj inter li kaj ŝi — almenaŭ Juexin tiel opiniis — kaj ili nur povis rigardi unu la alian de malproksime, por tiel interŝanĝi senvoĉajn vortojn. Ili penis eviti ŝancon interbabili solaj. Ili ambaŭ pensis, ke tiamaniere ili povas malpliigi la malĝojon unu al la alia, sed la efiko pruviĝis mala. Li malgrasiĝis tagon post tago, same kiel ŝi, la lasta eĉ ofte sputis sangon.

Ankaŭ sinjorino Zhou ŝatis Mei, sed ŝi ne povis vere kompreni ŝin kaj doni al ŝi veran konsolon. Fakte neniu povis doni tian konsolon. Eĉ Ruijue, kiu bone komprenis Mei kaj intime rilatis kun ŝi, ne povis doni al ŝi veran konsolon.

Ankaŭ Qin venis. Ŝi tranoktis en la ĉambro de Shuying. La sekvan matenon ŝi frue hejmeniris, pretekstante ke ŝi fartas nebone. Ŝi vere havis saĝan kapon — ŝajniĝi sin malsana. En la sama tago ŝi sendis pere de servisto Zhang Sheng leteron al Juemin, petante, ke li vizitu ŝin

en ŝia hejmo.

Ricevinte ŝian leteron, Juemin tuj trovis ŝancon elŝteliĝi kaj iris al la hejmo de Qin. Ili libere elverŝis sian koron unu al la alia. El la hejmo de Qin li revenis kun ĝojo en la koro. Ekster sia atendo li estis vidita de Juexin, kiu renkonte venis al li ĉe la pordo de la ĉefhalo.

“Vi iris al Qin, ĉu ne?” Juexin mallaŭte demandis.

Juemin mutiĝis pro surprizo. Fine li kapjesis.

“Mi vidis, ke Zhang Sheng kaŝe donis al vi leteron kaj mi scias, ke Qin ŝajnis sin malsana. Mi scias, kiel vi ambaŭ rilatas unu kun la alia,” Juexin mallaŭte diris. Li ridetis amare. Juemin silentadis. Ankaŭ li ridetis, sed kontente.

Rigardinte ĉirkaŭen, Juexin vidis Keming preteriri. Kun altrudita rideto sur la vizaĝo, li interŝanĝis kelkajn vortojn kun li. Kiam Keming foriris, Juexin daŭrigis sian parolon al Juemin per mallaŭta voĉo kaj kun ŝanĝita vizaĝesprimo.

“Vi estas feliĉa. Vi povas fari vian aferon laŭvole ... Ankaŭ mi volas viziti malsanulinon, sed mi ne havas la liberon por tion fari. Malgraŭ ke ŝi grave malsaniĝas, mi ne povas iri al ŝia hejmo por vidi ŝin. Hodiaŭ ŝi skribis leteron al via bofratino, en kiu ŝi diris, ke mi aspektas malsane. Ŝi petis, ke via bofratino admone min liberigu de maltrankvilaj zorgoj. Kiel mi povus liberigi min de maltrankvilaj zorgoj? Mi klare scias, ke ŝi bezonas mian konsolon nun, sed ŝi... ŝi ...” Lia parolo interrompiĝis.

Aŭdinte tion, Juemin kortusiĝis kaj diris, “Granda Frato, vi vere multe suferas. Forgesu kuzinon Mei. Sopirado al ŝi signifas suferadon al vi mem. Kaj cetere, kiam vi donas lokon al ŝi en la koro, ĉu vi ne sentas vin kulpa al Bofratino? Vi tre amas ŝin, ĉu ne?”

Juexin tute paliĝis. Li rigardis Juemin per siaj okuloj plenaj de larmoj, ne povante eligi vortojn. Poste li kolere diris intermite, “Ŝi admonis min per tiuj vortoj, kaj nun ankaŭ vi admonas min tiel. Kaj ĉiuj admonas min tiamaniere... Via penso tute ne diferencas de la ilia ! ... Kian utilon tiuj vortoj alportas nun?. ..” Antaŭ ol fini sian parolon, li turns sin kaj foriris.

Juemin ekkomprens, ke Juexin deziris eltiri de li alian respondon. Tamen kian alian respondon li povus doni al sia Granda Frato? Pensante pri la nekonsekvenco de a vortoj kaj agoj de Granda Frato, li sentis, ke li ne povas kompreni lin. En la familio ĉie troviĝis enigmoj, nesolveblaj enigmoj.

Starante tie, Juemin sendis sian rigardon al la sceno de sentprovoka amindumado inter klaŭno kaj virina rolo, kaj poste al tiuj multaj spektantoj honoraj, malpli gravaj kaj tute negravaj, kiuj ĉiuj kontente ridetis. Li mem ridetis pro malestimo. Li tute forgesis la vortojn de Juexin. Malrapide paŝante, li cerbumis pri sia grava afero. Denove belaj iluzioj aperis laŭvice antaŭ liaj okuloj.

Li vidis per la mensaj okuloj aferojn pasintajn kaj estontajn, pri li kaj

ŝi. Li nutris optimisman senton, ĉar ŝi donis al li kuraĝon kaj certecon. Ŝi tute fidis lin, kaj esprimis al li sian decidon, ke ŝi ne malesperigos lin.

Ĉio iris glate inter li kaj ŝi. Komence, post kiam li helpis ŝin lerni la anglan, ili interbabiladis pri siaj propraj temperamentoj, aspiroj kaj esperoj, kaj poste pri diversaj bagateloj en ŝia vivo. Kaj fine ili elverŝis sian koron unu al la alia kaj interkompreniĝis. Ilia interrilato tiel pliprofondiĝis, ke ili sentis, ke ili estas nedisigeblaj. Ilia paroltemo iris de ĝeneralaj amaferoj kaj tiuj inter parencoj, kiel ekzemple inter Juexin kaj Mei, ĝis tiu inter ili mem.

Li ankoraŭ memoris, kiel ŝi, kun ruĝiĝinta vizaĝo kaj mallevita kapo, ludis kun paĝoj de libro kaj ŝajnigis sin kvieta, dirante, ke ŝi tre bezonas lin kaj neniel forlasos lin en la estonteco. Ŝi diris ankaŭ, ke ŝi decidis preni la novan vojon, spite al ĉiaj obstakloj sur la vojo, al ĉiaj malfacila situacio kaj izoliteco. Kaj ŝi tre bezonas tian homon kiel li, kiu povas kompreni, konsoli kaj helpi ŝin. En la koro ili ambaŭ jam interkompreniĝis. Tio, kio mankis al ili, estis nur buŝa deklaro pri tio. Kaptante la ŝancon, li aŭdigis la vortojn, kiujn li volis diri antaŭ longe, penante montri kia heroo li estas. Li eĉ diris, ke li volonte oferus ĉion por ŝi. Sekvis ankaŭ ŝia promeso.

Efektive ĉiu vorto de ili sufiĉis por dekoble interkomuniki. Ili ĝuis reciprokan konfidon kaj kune nutris certecon pri realigo de la espero. Tiu

babilado inter ili kvazaŭ levis la kurtenon ; ilia grava afero solviĝis. Tio okazis ĝuste tiun tagon.

Antaŭ liaj okuloj aperis bela iluzio pri ilia estonta vivo, kompreneble tre troigita. Li estis blindigita de la caĉarma okazaĵo , forgesinte pri eventualaj baroj.

Starante sur la ŝtuparo, li ree vidis la amindumantajn personojn sur la scenejo kaj tiujn kontente ridetantajn spektantojn. Li aŭdis serviston Wen De sonore legi sur la scenejo, “Honora s-ro Chen donacas al Zhang Xiaotao dudek juanojn.” Vidinte kiel la aktoro, kiu ricevis la mondonacon, ridetante riverencas al la donacinto, Juemin malestime subridis. Li sentis, ke ili ne plu estas timigaj baroj al li. Li turnis siajn okulojn malproksimen kaj rigardis la vivon laŭ sia idealo ĝis lia dorso estis frapetita de mano.

Ĝi estis de li konata mano kaj ĝi retiris lin al la reala vivo. Turninte la kapon, li vidis Juehui kun rideto malantaŭ li. Li demandis, “Ĉu ankaŭ vi eliris?”

“Kompreneble . Ĉi tie estas kaj sufoke varmege kaj brae. Kiel mi povus resti kviete?” Juehui kontente ridetis, “Vin certe trafis bona ŝanco.” Li jam legis tion sur la vizaĝo de sia frato.

La vizaĝo de Juemin fariĝis ruĝeta. Kapjesante, li diris, “La afero inter mi kaj Qin jam decidiĝis. Ni jam faris la unuan paŝon. Hodiaŭ ni klare interparolis pri ĉio . Nun ni devas fari la duan paŝon...”

Kontenta rideto ludis sur lia vizaĝo. Lia ne tre penetra rigardo pafiĝis tra la orkadraj okulvitroj kaj balais la vizaĝon de Juehui.

Eksterordinara rideto — ĵaluza rideto — fulmis tra la vizaĝo de Juehui. Kvankam li penis reteni ĝin, ĝi tamen montriĝis, sed malfacile rimarkeble. Li naskis senton, kiun li neniam antaŭe spertis. Sekrete ankaŭ li amis Qin. Malgraŭ ke li diris al Juemin, ke li amas Qin kiel sangan fratinon, malgraŭ ke li amis alian junulinon, kiu oferis sian vivon pro li, malgraŭ ke li esperis, ke ilia amafero iros glate kaj Juemin prenu ŝin kiel lian bofratinon, tamen kiam li informiĝis, ke tiu, kiun li amas, apartenas al alia, li ne povis ne senti ĵaluzon. Sed tiu sento daŭris nur palpebrumon. La sento tuj ŝanĝiĝis. Li sekrete riproĉis sin pro la sento kaj eksentis sin kulpa al sia frato.

“Gardu vin. Ne estu tiel optimisma ! ...” Kvankam estis pravo en tiuj vortoj, Juehui tamen diris tion, kiam li estis ankoraŭ regata de ĵaluzo.

“Nenia problemo ekzistas.” Aŭdinte kion Juehui diris, Juemin, kiu estis ĉe la ekstremo de ĝojo, sentis neniom da deprimado. Li aldonis, “Vi estas tre kuraĝa. Kial vi nun troviĝas sub la pezo de tiaj zorgoj?”

El lia honesta parolo Juehui sciis, ke Juemin ne konas lian penson. Li ridetis, dirante, “Vi pravas. Mi deziras al vi sukceson.”

Pretervole Juehui turnis sian rigardon al la scenejo. Tie dum surdiga gongado kaj tamburado kelkaj roluloj kun nuda torso faris transkapiĝojn

kaj poste du aŭ tri antikvaj generaloj interbatalis. La avo, kiu sidis tuj antaŭ scenejo, kun turnita kapo, ridetante babilis kun grizbarba gasto. Vidinte la vizaĝon plenan de lentugoj kaj faltoj, kaj la kolbaso-similan nazon, Juehui sentis grandan indignon. Firme premante sian pugnon, li malame diris tra grincigitaj dentoj, “Li eĉ venis ĉi tien !”

“Kiu?” Juemin mire demandis. Li ankoraŭ ne rimarkis la gaston, kiu babilis kun la avo.

“Feng Leshan, tiu murdisto!” diris Juehui, montrante la direkton.

“Mallaŭte! Ĉu vi ne timas, ke aliaj aŭdos vin?” Juemin rapide avertis lin.

“Timi? Mi ĝuste volas, ke aliaj aŭdu min. Vi ĵus parolis pri kuraĝo, ĉu ne?” diris Juehui kun ironia rideto.

Juemin ne povis tuj trovi vortojn por konsoli sian fraton. Dum li pensadis por trovi manieron kvietigi sian fraton, li tamen estis elsavita. Liaj savantinoj estis Shuhua kaj Shuzhen, kiuj alportis nebonan novaĵon, kiun Juemin tiumomente ne povis scii.

“Dua Frato, la nova konkubino de grandsinjoro Feng venis. Ĉu vi volas ŝin vidi?” Shuzhen ridetante diris, ĝoje tirante lin ce la maniko.

“Lian novan konkubinon mi ne konas. Kial mi vidu ŝin? Estas strange!” Juemin diris kun miro kaj dubo.

“Ĉu ŝi ne estas Wan-er?” demandis Juehui. Li tuj komprenis. “Kie ŝi troviĝas nun?” Lia demando kvazaŭ eltirus iun el tombo.

“En mia ĉambro. Estas neniu alia. Ĉu vi iras vidi ŝin?” diris Shuhua kun mistera rideto.

“Jes ,” diris Juehui. Li foriris kun Shuhua kaj Shuzhen, forlasante Juemin sola, ĉar li diris, ke li ne volas iri .

“Wan-er vere meritas kompaton. En la familio Feng ŝi suferas multe. La maljunulo ŝatas ŝin, sed li havas strangan temperamenton kaj emas turmenti ŝin. Kiam lia edzino flamiĝas, eĉ li timas ŝin. Ŝi ofte elverŝas sian koleron al Wan-er. ...” Shuhua murmure diris survoje. Ŝajnis, ke ŝi kontentas ke ŝi informiĝis pri tiel multaj aferoj.

Ili tri eniris en la ĉambron. Ene jam estis aliaj, ne kiel Shuhua diris. Krom Wan-er kun beleta kaj ovala vizaĝo, estis Ruijue, Shuying, Qian-er, Xi-er kaj Cuihuan, la servoknabino de la tria familibranĉo. Wan-er estis vestita pli lukse ol antaŭe. Krome ŝi estis dike pudrita kaj portis paron da pendantaj orelingoj. Ŝi aspektis nur iom malgrasa. Tiutempe ŝi rakontis al Qian-er kaj Xi-er siajn travivaĵojn en la familio Feng. Ruijue kaj Shuying aŭskultis sin kun okuloj plenaj de larmoj.

Ĉar Wan-er sidis ĉe la fenestro oblikve kontraŭ la pordo, Juehui tuj vidis ŝin, kiam li eniris. Ŝi tuj stariĝis, faldinte sian malgrandan ventumilon. Kun rideto ŝi vokis, “Tria Sinjorido”, kaj klinis sian korpon por fari riverencon.

Respondante al ŝia riverenco, Juehui balancis la kapon kaj salutis per ambaŭ kunpremitaj manoj. Vidinte, ke ŝi ankoraŭ staras, li ridetante

diris, “Sidigu . Ne estu ceremonia. Vi nun estas la nova konkubino de grandsinjoro Feng kaj nia gasto.” Dirante, li sentis malĝojon, ĉar li ekpensis pri Mingfeng.

Kun ruĝiĝinta vizaĝo Wan-er klinis la kapon senparole. Ruijue , kiu sidis sur la litrando, sendis riproĉan rigardon al Juehui kaj mildvoĉe diris, “Tria Frato, ŝi sentas kortordiĝon, dume vi primokas ŝin.”

“Mi diris tiujn vortojn senintence,” li senkulpigis sin. Li subite rememoris, kion Qian-er diris al li en la ĝardeno, kiam ŝi bruligis monpaperojn. Li kompatis kaj simpatiis al Wan-er. Li volis fari aŭ diri ion bonan por ŝi. Li diris al Ruijue, “Vi ec riproĉas min senĝene? Ŝi hodiaŭ revenis, sed anstataŭ inviti ŝin rigardi operon, vi kune elverŝas larmojn en la ĉambro. Kia regalo al gasto !”

“Tria Frato, mi ne povas superi vin per vortoj . Kiel pikan langon vi havas !” diris Ruijue, ŝajnigante sin kolera. Ŝi svingis la plumventumilon en sia mano kelkfoje . Shuhua kaj Shuzhen ekridis.

“Se vi ne povas, mi provu !” Shuying diris. Vidinte, ke Wan-er ankoraŭ staras, ŝi diris, “Wan-er , sidiĝu. Ne estu ĝentila al li.”

Juehui jam trovis tabureton kaj sidiĝis. Ankaŭ Wan-er sidiĝis silente.

Shuying diris al Juehui, “La operoj estas neniom interesaj . Tiuj gastoj vere estas senhontaj. Ili nur elektas obscenajn pecojn. Wan-er ne havas multe da ŝanco reveni ĉi tien. Ŝi volas private babili kun Qian-er. Kaj aparte mi tre sopiras al ŝi ekde nia disiĝo antaŭ kelkaj monatoj. Tial

ni decidis renkontiĝi ĉi tie. Ili bone interbabilis ĝis vi intervenis. Respondu, pro kio vi, estante sinjorido, venis ĉi tien.”

“Laŭ via diro vi volas forpeli min. Fakte mi estas forironta : Ĉi tie estas kaj sufoke varmege kaj homplene. Mi ne bedaŭras foriri,” Juehui diris, sed li ne pretigis sin foriri .

“Tria Frato, se vi volas foriri , kial vi tenas vin ĉi tie? Ne estu tiel aroganta. Iu jam proponis fianĉinon al Dua Frato. La sekva vico estas via,” Shuhua intermetis. Pro sia parolemo ŝi malkaŝis la sekreton.

“.. Proponis fianĉinon al Dua Frato? Kiu proponis?” Juehui demandis mirigite.

“Estas Feng Leshan. La proponita fianĉino estas filino de lia nevo, samaĝa kiel Dua Frato. Tamen ŝi estas flamiĝema,” Shuhua ridetante respondis.

“Ŝi estas pli juna ol Dua Sinjorido je kelkaj monatoj,” Wan-er aldonis. “Kaj ŝi havas placan aspekton.”

“Denove estas tiu damninda maljunulaĉo,” li indigne sakris. Li tuj stariĝis kaj diris, “Mi iru diri tion al Dua Frato!” Dirante, li sin direktis eksteren. Li returnis la kapon kaj ĵetis ekrigardon al Wan-er, kvazaŭ adiaŭante iun, kiu foriros por eterne. Li vidis, ke Wan-er kaj Qian-er interbabilas mallaŭte kaj ke Shuhua kaj Shuzhen faras grimacojn al li. Li ankaŭ diris en la koro, “Mi tuj diru tion al Dua Frato.” Li kvazaŭ akiris tre gravan sciigon.

Elirinte el la ĉambro kaj apenau atinginte la ŝtonan ŝtuparon antaŭ la maldekstra alo, li eksentis malesperon. Li vidis, ke Juemin staras apud la avo kaj Feng Leshan, kaj ke svingante grandan orkoloran faldeblan ventumilon, Feng Leshan ridetante faras demandojn al Juemin kaj tiu eĉ respondas respektoplene. “Kial vi montras ĝentilecon al li? Vi interparolas kun la murdisto ! Ĉu vi ne scias, ke li estas via malamiko? Li estas detruanta vian amon !” Juehui riproĉis Juemin en la koro.

* * *

Finfine Juemin informiĝis de Juehui, kaj Juexin petis lian opinion pri la afero, laŭ la ordono de la avo. Fakte “peti opinion” ne estas tio, kion la avo volis. Li nur donis ordonojn. Kaj Juexin opiniis lian ordonon obeenda, kvankam li ne aprobis ties decidon.

Al Juemin tio kompreneble estis ne malgranda bato, sed li ne estis timigita. Lia respondo estis simpla Ne!

Li diris, “Mia geedziĝo devas esti metita sub mia konsidero. Nun mi ankoraŭ estas juna kaj mi devas fini mian lernadon. Mi ne volas edziĝi nun.” Ankoraŭ multajn vortojn li kaŝis en la koro.

“Mi ne povas transdoni al la avo vian aserton, ke via geedziĝo devas esti metita sub via konsidero. Miaopinie, vi povas diri al li, ke vi estas tro juna. Sed por nia familio edziĝo de dek-naŭ-jarulo ne estas tro frua. Mi edziĝis je la aĝo de dek naŭ jaroj. En la okuloj de la avo tio ne estas akceptebla pravigo,” diris Juexin heziteme.

“Laŭ via opinio tio estas nenio farebla,” Juemin kolere diris.

“Tion mi ne celas,” Juexin tuj senkulpigis sin, sed li ne povis eldiri pliajn vortojn.

Juemin firme fiksis sian rigardon sur la vizaĝo de Juexin, kvazaŭ volante travidi lian koron. Penso fulmis en lia cerbo. Li emfaze diris, “Ĉu vi ne memoras, kion vi diris al mi posttagmeze? Ĉu vi volas, ke mi ripetu vian tragedion?...”

“Sed la avo...” Juexin volis defendi sin per la vortoj de la avo. Li trovis, ke tio, kion Juemin diris, estas ne malprava, sed la ordono de la avo devas esti obeita.

“Ne menciuj la avon plu. Mi volas, preni mian propran vojon,” Juemin intermetis, antaŭ ol lia frato finis sian parolon. Li tuj reiris al sia ĉambro.

Kvankam la nokto jam profundigis, li ne inklinis enlitiĝi. Post longa interkonsiliĝo li kaj Juehui konsentis pri jeno : rezisti, kaj se tio fiaskos, fuĝi. Unuvorte, neniel submetiĝi.

Juehui plenenergie kuraĝigis Juemin tion fari. Unuflanke li simpatiis kun Juemin kaj aliflanke li volis, ke Juemin starigu ekzemplon, elhakante novan vojon por li kaj la kuzoj. Sekve Juemin ekscitite skribis al Qin mallongan leteron, intencante kaŝi ĝin inter paĝoj de libro kaj sendi al ŝi la sekvan matenon. La letero legiĝis:

Qin,

Kian ajn novaĵon pri mi vi aŭdos, neniom kredu ĝin, ĉar nun iu jam proponis fianĉinon al mi. Ĉar mi jam promesis doni min al vi, mi neniam nuligos mian promeson. Vi konfidas min, kaj mi esperas, ke vi konfidus min ĝis la fino. Mi montru al vi, kiel mi kuraĝe batalos kaj kiamaniere mi gajnos vin!

Juemin

Leginte la leteron dufoje, Juemin fiere diris, “Ĝi estas grava memorsigno en nia amhistorio. ” Li donis ĝin al Juehui, demandante, “Kaj via opino?”

“Vera kavaliro de la mezepoko vi estas !” Juehui mokete laŭdis, leginte ĝin. Li nereteneble ekridis en la koro, pensante, “Mi vidu kiel vi batalos.”

Apenaŭ la celebrado de la naskiĝtago de Grandsinjoro Gao forpasis, Feng Leshan jam alsendis oficialan svatanton kaj Grandsinjoro Gao nature tuj konsentis. Estante bofilino kaj duonpatrino, sinjorino Zhou opiniis, ke ne estas dece por ŝi esprimi sian propran ideon. Fakte ŝi ne kontraŭis la decidon de Grandsinjoro. Nur nun Juexin sentis la graviĝon de la situacio. Li sciis, ke la misa geedziĝo kondukos al granda eraro, ĉar tio signifas pereon de alia juna vivo. Kontraŭstari? Li ne havis kuraĝon kontraŭstari la avon. Post cerbumado li decidis sin turni al superstiĉo.

Akirinte la naskiĝdaton de fraŭlino Feng, Juexin petis sortodiveniston

kompari ĝin kun tiu de Juemin. Li esperis, ke la sortodivenisto donos la respondon “malbonaŭgura geedziĝo”. Li eĉ intencis subaĉeti lin por la dezirata respondo. Tamen, kontraŭe al lia espero, la rezulto estis : Bonaŭgura geedziĝo kaj riĉa familio. Informiĝinte pri tio, sinjorino Zhou des pli korinklinis al la geedziĝo. La sortodiveno, kiun Juexin antaŭe opiniis utila, nun fariĝis abomeninda. Tenante la paperslipon skribitan de la sortodivenisto en la mano, li priridis sian malsaĝecon kaj samtempe malĝojis pri la perspektivo de Juemin. Li volis disŝiri la paperslipon plenan de sensencaĵoj , sed mankis al li la kuraĝo. Poste li vespere diris, “Ĉiaokaze mi faris mian plejebulon.” Li pensis, ke li povas fari nur tiom.

Ĉio estis sekrete farita. Juemin mem sciis nenion. En la familio Gao tiaj aferoj ĉiam estis sekrete faritaj. La koncernatoj estis nur marionetoj, kiuj ne rajtis zorgi pri tio.

Tiuj , kiuj pli frue fariĝis marionetoj , faris el aliaj marionetojn nun. Ĉiam devas tiel iri la aferoj. La leĝo neniam ŝanĝiĝos — tio estis la opinio de Grandsinjoro kaj similaj. Tamen, malgraŭ ĉio, ili miskalkulis pri Juemin, ĉar li ne estis tia homo, kiu pretas esti marioneto.

Tute male al la pli maljuna generacio, Juemin tre zorgis pri sia gefianĉiĝo kaj ĉie petis informojn, ne sentante sinĝenon. Samtempe Juehui helpis lin. Juenun, Juehui kaj Qin formis malgrandan grupon, kiu ofte diskutis pri taktiko de batalo, kiel nuligo de la gefianĉiĝo kaj

publikigo de la rilato inter Juemin kaj Qin.

La unua batalo estis, ke Juemin klare esprimis sian sintenon al Granda Frato. Juexin diris ke li ne estas la decidanto de la afero. Li sin turnis al sia duonpatrino kaj petis, ke ŝi nulgu la gefianĉiĝon, sed ŝi diris, ke nur la avo rajtas fari la finan decidon. Al la avo li ne povis rekte paroli kaj li ne havis fortan proparolanton. En la hejmo la avo estis ĉio. Juemin ne povis trovi simpation ĉe aliaj.

Post kelkaj tagoj la afero des pli malboniĝis. Ne estis oportune por Juemin viziti Qin. Kvankam la patrino de Qin, sinjorino Zhang simpatiis al li, ŝi tamen ne povis nek volis doni helpon al li. Kaj por eviti suspekton ŝi admonis, ke li malofte vizitu Qin, ĉar anoj de la familio Gao cirkuligis onidiron, ke ŝi, lia onklino, instigas lin kontraŭstari la gefianĉiĝon kaj ŝia celo estas edzinigi sian filinon al li. Aŭdinte tion, Qin ploradis pro kolero.

La unua batalo de Juemin tute fiaskis. Li komencis la duan. Ekstere li deklaris, ke se lia familio ne konsideros lian opinion, li alprenos la lastan rimedon. Kompreneble tiuj vortoj ne povis enflugi en la orelojn de la avo kaj tial neniom ili efikis.

Poste Juemin informiĝis, ke lia naskiĝdato kaj tiu de la proponita fianĉino estos interŝanĝitaj kaj post tio la dato estos decidita. Li sciiĝis pri tio nur du semajnojn post la celebrado de la naskiĝtago de la avo.

Juexin transdonis al la avo la opinion de Juemin. La avo tuj kolere

refutis, “Kiu kuraĝas diri , ke mi malpravas? Mi plenumos tion, kion mi konsentis !”

Juemin paŝadis sola en la ĝardeno kelkajn horojn. Li demandis sin, “Cedi aŭ lukti ĝis la fino?” Li sin montris hezitema. Tuj kiam ili faros decidon, ĉio fariĝis neŝanĝebla. Se li fuĝus kaj forlasus la familion, li renkontus multajn malfacilojn en la estonteco. Kiel vivteni sin estos granda problemo. En la hejmo li ne bezonis zorgi pri nutraĵoj kaj vestoj, sed kion fari se li fuĝus eksteren? Per kio li vivtenu sin? Pri tiuj problemoj li neniam pensis. Kiam la afero altrudiĝis ĝis lia nazo, li estus devinta fari tujan decidon, sed li tamen hezitis.

Li ree sin turnis al Juexin por interkonsiliĝi. Ĉe la komenco li rekte venis al la afero, demandante, “Ĉu vere mi ne povas elturniĝi?”

“Mi opinias, ke ne,” Juexin diris melankolie.

“Ĉu vi vere faris la plejebulon?” li demandis malespere.

“Jes.”

“Kion mi devas fari nun, viaopinie?”

“Kion vi devas fari? Mi scias, kion vi pripensas. Sed mi ne kapablas helpi vin. Vi obeos la avon, mi esperas. Ĉar ni vivas en ĉi tiu epoko, ni rajtas nur esti viktimoj,” Juexin diris malrapide kaj malĝojvoĉe. Li preskaŭ larmis.

Kun sardona rideto Juemin diris, “Ho nerezistismo! Ho riverencismo!” Li eliris el la ĉambro sen returni la kapon. Li pensis en

si, “Mi interkonsiliĝu kun Tria Frato !”

*Huĉino— ĉina populara muzikilo kun du kordoj, ludata per arĉo.

31

La sekvan matenon, kiam Juexin iris saluti la avon en ties ĉambro, tiu kontente diris al li, ke la boparenciĝo kun la familio Feng estas jam decidita kaj la oficiala gefianĉiĝa soleno okazu iun tagon post du monatoj, kaj ke li nun iru interŝanĝi naskiĝdatojn kun la nomita familio. La avo elprenis almanakon, malferminte ĝin kaj montris al li la diritan daton. Juexin jese respondis al liaj demandoj. Kiam Juexin retiriĝis el la ĉambro, li renkontis Juehui, kiu faris misteran rideton al li.

Tuj kiam Juexin eniris en sian ĉambron, la avo sendis servistinon Qian por revoki lin. Enirinte en la studĉambron de la avo, li vidis lin kolere riproĉi Juehui. Portante blankajn robon kaj pantalonon el silko, la avo sidis sur sofo. Lia kromedzino, sinjorino Chen pomade kombita kaj dike pudrita, surhavis helkoloran borderitan bluzon el krepo kun malstriktaĵ manikoj. Sidante sur la brakapogilo de la sofo, ŝi masaĝe frapetadis la dorson de la avo per la pugnoj. Juehui senvorte staris antaŭ la avo.

“Ribelo ! Ec tia afero okazis efektive ! Revenigu vian Duan Fraton !” la avo laŭte diris al Juexin tuj kiam tiu eniris. Juexin ne sciis, kio okazis.

Dume la avo lake tusadis. Sinjorino Chen rapidigis sian pugnofrapetadon sur lia dorso, akravoĉe admonante, “Trankviligu vin, Grandsinjoro. Je tia granda aĝo ne ruinigu vian sanon pro kolero. Ili ne

meritas tion !”

“Ĉu li kuraĝus malobei min? Ĉu li kuraĝus kontraŭstari min?” Kun ruĝiĝinta vizaĝo la avo daŭrigis intermite, eliginte du elspirojn, “Li malĝojas pri mia decido ! Ne ! Nepre venigu lin, ke mi punu lin !”

Jesante, Juexin jam duone divenis, kio okazis.

“Estas la moderna lernejo, kiu kulpas pri lia malboniĝo. Antaŭe mi diris, ke vi knaboj ne eniru la lernejon, sed vi ne obeis min. Kio okazas nun! Eĉ via Dua Frato malboniĝis tiagrade, ke li ribelas kontraŭ mi... De nun la knaboj de la familio Gao ne estas permesataj iri al la moderna lernejo ! Ĉu vi aŭdas min?” Tusado sekvis liajn vortojn.

“Jes, jes,” Juexin respondis, starante konsternite. Ĉiu vorto de la avo batis lin, kvazaŭ surdiga tondro.

Juehui staris apud Juexin. Li tamen havis tute malsaman senton ol tiu. Kvankam li trovis la atmosferon prema, li tamen ne sentis konsterniĝon . Li ridis en la koro kaj penis : “Tuj malkaŝiĝos la vero !”

La avo ĉesis tusi. Tre laca, li klinis sin malantaŭen kaj fermis siajn okulojn. Sinjorino Chen svingadis la rondan ventumilon super lia kapo, forpelante muŝojn. Juexin kaj Juehui respektoplene staris antaŭ li, atendente lian ordonon. Poste, kiam sinjorino Chen mansignis al ili, ili iris el la ĉambro.

Elirinte, Juehui diris, “Granda Frato, Dua Frato restigis al vi leteron. Iru al mia ĉambro por legi ĝin.”

“Kion vi diris al la avo? Kial vi ne diris al mi, antaŭ ol al la avo? Kiel malsaĝa vi estas!” grumbles Juexin kontraŭ Juehui.

“Malsaĝa? Mi volas , ke li sciuj ! Mi volas, ke li komprenu, ke ni estas homoj, ne ŝafoj, kiujn oni povas buĉi laŭvole.”

Juexin sciis, ke tiuj vortoj celas lin. Kvankam ili pikis al li la orelojn kaj koron, li tamen vole-nevole eltenis. Li havis sian mensan dilemon. Eĉ se li farus sinceran klarigon al Juehui, tiu ne povus kredi lin.

Ili ambaŭ eniris en la ĉambron de Juehui. Tiu prezentis al Juexin la leteron de Juemin. Juexin apenaŭ havis kuraĝon por legi ĝin, sed fine li legis:

Granda Frato,

Mi jam faris la aferon, kiun neniu el nia familio kuraĝis fari — mi fuĝas por rompi la gefianĉiĝon. Neniu zorgas pri mia estonteco kaj sorto, tial mi decidis preni mian propran vojon. Tion mi faras kun firma volo. Mi volas luktadi ĝis la fino kontraŭ la malnova forto. Se vi ne nuligos la gefianĉiĝon, mi ne revenos ĝis la morto. Nun la afero ankoraŭ povas esti elsavita. Memoru nian fratecon kaj donu al mi helpon.

Juemin

skribita je la tria

horo nokte

Leginte, li tuj paliis . La leterpapero falis teren el liaj tremetantaj fingroj. Li murmuris, “Kion mi povas fari?” Poste li diris, “Li ne volas konsideri mian malfacilon.”

“Tio ne koncernas vian malfacilon. Kion vi faros finfine?” Juehui diris serioztone

Juexin tuj stariĝis, kvazaŭ surprizite. Li koncize diris, “Mi iru trovi lin.”

“Vi ne povos trovi lin,” ironie ridetis Juehui.

“Ne povos?” malklare ripetis Juexin.

“Neniu scias lian adreson.”

“Vi certe scias lian adreson, vi certe scias ! Diru al mi, kie li troviĝas? Tuj dire al mi!” petis Juexin.

“Mi scias, sed mi absolute ne diros al vi !” Juehui deideme respondis.

“Ĉu vi ne kredas min?” Juexin amare demandis.

“Estas egale, ĉu mi kredas vin aŭ ne. Viaj ‘nerezistismo’ kaj ‘riverencismo’ povas fari nenion of ruinigi la vivon de Dua Frato. Unuvorte, vi estas tro malforta !” Juehui indigne diris, longpaŝe irante tien kaj reen en la ĉambro.

“Mi nepre renkontos lin. Nepre diru al mi lian adreson !”

“Absolute ne.”

“Vi certe eldiros ĝin, ĉar la avo kaj aliaj premos vin eldiri !”

“Mi ne eldiros ! En nia hejmo neniŭ metos min al torturo,” diris Juehui sentime. Tiumomente li nur ĝuis la mallongtempan kontenton de venĝo kontraŭ la familio, sed li ne pensis pri la suferado de sia Granda Frato.

Juexin malespere eliris. Baldaŭ li revenis. Li volis ankoraŭfoje interkonsiliĝi kun Juehui pri konkreta rimedo, sed tio venis al nenia rezulto. Li mem ne kapablis elpensi kompromisan solvon, kiun kaj la avo kaj Juemin povus akcepti.

En la sama tago okazis familia kunveno en la ĉambro de sinjorino Zhou. La ĉeestantoj estis sinjorino Zhou, Juexin kaj lia edzino, Shuhua kaj Juehui. Ili dividiĝis en du partiojn : Juehui unuflanke kaj la aliaj aliflanke. Ili unuvoĉe provis persvadi Juehui, ke li eldiru la adreson de Juemin kaj revenigu lin. Ili diris multajn oreplaĉajn vortojn kaj eĉ promesis, ke ili penos nuligi la gefianĉiĝon paŝo post paŝo, sed Juehui tute rifuzis .

Nun kiam ili ne sukcesis eltiri informojn el Juehui kaj ne povis akcepti la kondiĉon de Juemin, kaj Juexin kaj sinjorino Zhou tiel maltrankviliĝis, ke ili sin turnis al Keming por prokrasti la interŝanĝon de naskiĝdataj notoj je kelkaj tagoj malantaŭ la dorso de Grandsinjoro. Aliflanke ili sendis informiĝi pri la adreso de Juemin.

Tri servistoj Yuan Cheng, Su Fu kaj Wen De estis senditaj por serĉi Juemin, sed vane. Juemin bone sin kaŝis. Neniu sciis lian

kaŝejon.

Keming alvokis Juehui en sian ĉambron. Li dons al li seriozan riprocadon — vane ; li milde admonadis lin — vane ; li elokvente persvadis lin kelkan tempon — vane. Juehui ĉiam insistis, ke li ne scias.

SinJORino Zhou kaj Juexin alkroĉiĝis al Juehui, petante, ke li revenigu Juemin kaj promesante, ke ili akceptos ĉiujn kondiĉojn, se nur Juemin revenos. Juehui jam firme decidis : Antaŭ ol akiri sekuran garantion, li absolute ne revenigos Juemin.

SinJORino Zhou riproĉis Juehui kelkan tempon kaj ekploris pro kolero. Kvankam ŝi indulgis Juemin kaj Juehui en ordinaraj tagoj, ŝi tamen zorgis pri ilia estonteco. La situacio estis serioza. Ŝi ne volis vidi la malfeliĉan finon kaj ŝi des pli volis zorgi pri sia reputacio. Ŝi kontentiĝis nek pri la sinteno de Juehui, kiu defiis la maljunan generacion, nek pri la kontraŭrimedo de Juemin, kiu ribelis kontraŭ la patriarko kaj fuĝis por eviti la proponitan fianĉiĝon. Tamen ŝi neniel sukcesis elpensi solvon de la problemo.

Estante en malfacila situacio, Juexin vere ne sciis kion fari . Li volus deklari , ke Juemin juste agas, sed li ne povis doni al li helpon. Li ne povis helpi Juemin, kaj devis stari sur la flanko de la avo por sub premi lin, tiel ke Juehui prenis lin kiel malamikon. Se li ne revenigos Juemin, li malobeos la ordonon de la avo ; se li revenigos Juemin, li

sentos sin kulpa al li. Sed fakte li ne kapablis trovi lin. Juemin estis lia sanga frato kaj li amis lin. Mortante, la patro konfidis liajn gefratojn al li, ke li eduku kaj kreskigu ilin anstataŭ la patro. Sed nun Juemin falis en tian situacion, kiel li ne sentas sin kulpa al la patro? Pensante pri tio, li povis fari nenion krom plori en la ĉambro kune kun sia edzino.

Ne estis eble por Grandsinjoro scii pri tiuj aferoj. Li nur sciis, ke lia ordono devas esti obeita kaj lia reputacio protektita. Pri la feliĉo de aliaj li neniom zorgis. Li nur insistis, ke Juexin revenigu Juemin. Ofte li flamis. Li riproĉis Juexin, Keming kaj eĉ sinjorinon Zhou.

Tamen la riproĉado neniel efikis. Juemin montris nenian emon cedi. Ĉar oni ne povis trovi lin, premforton oni ankaŭ ne povis uzi. La afero cirkulis en diversaj anguloj de la kortodomaro. Sed Grandsinjoro ripete atentigis, ke estas malpermesite malkaŝi gin al la ekstera mondo.

Tempo forpasis tagon post tago. Grandsinjoro flamiĝis de tempo al tempo. Nenia rideto alnaĝis al la vizaĝo de la membroj de la familibranĉo de Juexin, dum la anoj de aliaj familibranĉoj kaŝe ridis kun malica ĝojo pro ilia malfeliĉo.

Iun tagon, post sekreta renkontiĝo kun Juemin, Juehui hejmeniris kun malĝoja koro. Li forlasis lian fraton, kiu malespere luktadis kontraŭ la familio, kvazaŭ li dirus adiaŭ al la luma mondo. En liaj okuloj la

familio estis nur dezerto, la bazloko de malnovaj fortoj, la stabejo de liaj malamikoj. Reveninte, li tuj sin turnis al Juexin por kolere diri, “Granda Frato, ĉu vi volas helpi Duan Fraton aŭ ne? Jam unu semajno pasis.”

“Kion mi povas fari?” malespere diris Juexin, disetendante siajn brakojn. “Sed nun estas vi, kiu maltrankviliĝas,” li pensis.

“Do vi lasas la aferon daŭri tiamaniere, ĉu ne?”

“Daŭri ! Hodiaŭ la avo diris, ke se li ne revenos post duonmonato, li forpelos lin el la hejmo por eterne kaj deklaras en la ĵurnalo, ke Juemin ne plu apartenas al la familio Gao,” Juexin aflikte diris.

“Ĉu la avo vere estos tiel malmolkora?” malgaje kriis Juehui, sed li ne perdis kuraĝon.

“Kial ne? Li nun estas ĉe la ekstremo de kolero... Kaj krome, li planas samtempe aranĝi la edziniĝon de Dua Fratino.”

“La edziniĝo de Dua Fratino? Al kiu la avo edzinigos sin?”

“Ĉu vi ankoraŭ ne scias tion? Ŝi edziniĝos al la filo de advokato Chen Kejia, sed iliaj naskiĝdataj notoj ankoraŭ ne estas interŝanĝitaj. Tria Onklo kredeble aprobas la geedziĝon, ĉar li estas intima kolego de Chen Kejia.”

Al Juehui tiu nomo estis tre konata. Chen Kejia estis la dua cefo de la Konfuceanisma Societo. Liaj amimplikaĵoj estis sur ĉies lango.

Aŭdinte tion, Juehui ruĝiĝis pro kolero. Li laŭte insultis, “Ĉu

bonuloj povas troviĝi en lia familio? Mi scias, ke ili, filo kaj patro, adultis kun la sama servoknabino. Poste kiam ŝi gravediĝis, ŝi estis akceptita de la filo kiel edzino.”

“Ne. Dua Fratino edziniĝos al lia frato. La onidiro pri la servoknabino estas nekredinda. Sed tio ne koncernas nin. La afero de Dua Fratino tamen estas sub la respondeco de alia. Kaj cetere Feng Leshan estas la svatanto.”

“Ĉu tio ne koncernas nin? Ĉu vi ne domaĝas, ke Dua Fratino edziniĝos al tia familio? Tio signifas, ke plia aminda juna vivo baldaŭ estos ruinigita. Mi estas certa, ke ŝi ne volas!” diris Juehui indigne.

“Kion ŝi povas fari, se ŝi ne volas? Ĉiaokaze ŝia edziniĝo estos decidita de aliaj.”

“Tamen ŝi estas tiel juna. Ĉi-jare ŝi estas nur dek-sesjara!”

“Ĉi-jare ŝi estas dek-sesjara. Venontjare ŝi estos dek-sepjara — jam la aĝo edziniĝi. Kiam via bofratino edziniĝis, ŝi estis nur dek-okjara. Se ŝi edziniĝos je juna aĝo, ŝi ne sin turnos al rezisto estonte.”

“Sed se oni fuŝdecidos ŝian sorton je ŝia juna aĝo sen peti ŝian opinion, ŝi bedaŭros la tutan vivon. Ĉu ili ne pensas pri tio? Kiel malestiminda ago!” Juehui eĉ sakris.

“Kial vi tiel koleras?” Juexin malĝoje diris. “Ili nur scias, ke ilia volo devas esti obeita. Tial la rezisto de Dua Frato pruviĝos senutila.”

“Senutila? Ankaŭ vi parolas tiel? Estas ne strange, ke vi ne volas helpi lin !”

“Kion alian mi povas fari?” Juexin konsideris sin la plej malfeliĉa homo en la mondo.

“Ĉu vi jam ne memoras, kiel nia patro konfidis nin al vi ĉe sia morto? Ĉu vi ne sentas vin kulpa al la patro?” Juehui indigne riproĉis Juexin.

Anstataŭ respondi Juexin komencis plorsingulti.

“Se mi troviĝus en via pozicio, mi ne estus tiel molosta kaj sentaŭga kiel vi. Mi farus mian propran decidon kaj rifuzus la geedziĝo-proponon de la familio Feng. Tion mi nepre farus!”

“Sed pri la avo?” demandis Juexin, levinte la kapon post longa tempo.

“La epoko de la avo jam forpasis. Ĉu vi volas, ke Dua Frato oferu sian vivon pro la antaŭjuĝoj de la avo?”

Juexin denove klinis la kapon kaj silentis.

“Vi vere estas malkuraĝulo!” kriis Juehui. Post tio, li foriris.

Juexin estis forlasita sola en la ĉambro. Ene regis soleco kaj malhelo. La aero peze subpremis lin. Liaj “nerezistismo” kaj “riverencismo” jam perdis forton kaj ili ne povis harmoniiĝi kun la realeco de la granda familio. Por kontentigi ĉiujn aliajn familianojn, li eĉ fordonis sian feliĉon, sed li ne akiris pacon kaj trankvilon. Li memvole

prenis la ŝarĝon de sur la ŝultroj de la patro kaj starigis kiel sian vivocelon subtenon kaj helpon al siaj gefratoj kaj fordonon de ĉio por ili. Tamen rezultis, ke li forpelis unu fraton kaj la alia insultis lin kiel malkuraĝulon. Per kiaj vortoj li povus konsoli sin mem?

Post longtempa meditado li skribis tre sinceran leteron al Juemin. En ĝi li malkaŝis sian fidelan kaj sinceran koron. Li parolis pri sia malfacila situacio kaj malĝojo, rakontis pri amikeco kaj amo inter fratoj kaj fine petis, ke Juemin tuj revenu pro la honoro de la mortinta patro kaj por la paco de la familio Gao.

Li iris al Juehui, donis al li la leteron kaj petis lin transdoni ĝin al Juemin.

Juehui legis la leteron kun larmoj, silente skuante la kapon. Leginte, li metis ĝin en la koverton.

Juehui alportis la respondan leteron de Juemin. Legiĝis en ĝi interalie:

Atendinte tiel longan tempon, mi ricevis de vi nur unu leteron tian. Por honeste diri, mi sentas senliman malesperon... Vi ripetfoje petas — revenu, revenu! Skribante ĉi tiun leteron, mi sidas en malgranda ĉambro kiel forkurinta malliberigito, ne kuraĝante moved, timante ke mi povus esti kaptita kaj eskortita al la malliberejo por mortkondamnitaj. La malliberejo estas mia hejmo kaj la provosoj anoj de mia familio. Ili unuigas kiel bando por mortigi min orfon. Neniu el ili zorgas pri mia feliĉo kaj neniu amas min. Jes, vi esperas, ke mi revenos. Se mi

revenos, vi elturniĝos el la embaraso, vi povos reakiri trankvilon kaj vi vidos plian viktimon. Nature vi ĝojos pri tio, dum mi dronos en la maro de suferoj ... Forfetu vian iluzion. Se miaj kondiĉoj ne estos akceptitaj, mi absolute ne revenos. En mia hejmo jam nenio povas vekti ĉe mi sopiron. Mi jam forportis tiom da malĝojaj rememoroj, kiuj ofte subpremas min kaj malpliigas mian kuraĝon antaŭenmarŝi. Tamen mia amo subtenas min. Eble vi miras, kial mi havas tiel grandan kuraĝon. Jes, eĉ mi ne imagis tion antaŭe. Nun mi posedas ŝian amon. Mi komprenas, ke mi luktas ne nur por mi mem, sed ankaŭ por la feliĉo de ni ambaŭ . Por ŝia feliĉo mi volas luktadi ĝis la fino... Granda Frato, ĉu vi divenas, kion mi nun pripensas? Mi pripensas la ĝardenon de nia hejmo, la antaŭajn kunludantojn kaj la tempon de mia infaneco. Vi estas mia granda frato. Helpu min pro la mortinta patro. Por ŝi kaj por ŝia feliĉo, helpu nin, eĉ se vi ne konsideras min. Vi devas doni helpon al ŝi. Almenaŭ, kiam vi ekpensas pri ŝia feliĉo, vi devas kortuŝiĝi. Unu kuzino Mei jam sufiĉe tordas ĉies koron. Ne kreu plian kuzinon Mei.. .

Larmoj ruliĝis sur la vangoj de Juexin, kiu ne konsciiĝis pri tio. Li ŝajne falis en profundan abismon de malespero. Ĉirkaŭ li regis mallumo. Videblis nek radio nek strio da lumo. Li nur murmuris, “Li ne komprenas min, neniuj komprenas min.”

Juehui tute ne atendis, ke li murmuris tiajn vortojn. Li sentis kaj indignon kaj kompaton. La leteron li ne nur legis, sed ankaŭ konsilis al Juemin aldoni kelkajn vortojn. Li opiniis, ke ĝi kortuŝos Juexin kaj kuraĝigos lin doni helpon al Juemin. Li volis riproĉi Juexin, sed kian rezulton tio alportus? Juexin jam fariĝis homo sen propra volo.

“Tiu familio estas absolute senespera. Mi preferas forlasi ĝin,” Juehui pensis. Dum tiu momento la pesimisma penso pri la afero de Juemin jam malaperis el lia menso. Kaj plie li naskis en si alian personon, kiu ekĝermis kaj verŝajne rapide kreskos.

*

*

*

Dum tiuj tagoj pluraj personoj suferis pro la afero de Juemin. Kompreneble Juemin mem estis inter ili. Li loĝis en la hejmo de sia kunlernanto Huang Cunren. Kvankam tiu traktis lin tre bone kaj amzorge, tamen pro sia sensperteco, li sentis sin tre embarasita, vivante en la rifuĝejo — sin tuttage kaŝante en malgranda ĉambro, li ne havis liberon por agi, nek fari , kion li deziris, nek renkonti tiujn, kiujn li deziris, kaj ĉiam estis turmentata de sopiro kaj teruro.

Juemin ĉiun tagon atendis, atendis bonan novaĵon. Sed nur malbonajn novaĵojn Juehui portis al li. La espero malheliĝis tagon post tago, sed ĝi ne tute neniigis. Tial Juemin ankoraŭ havis kuraĝon elteni ĉion ĉi. Samtempe Juehui senĉese kuraĝigis lin per paroloj pri fina venko ; la amo de Qin, la figuro de Qin donis al li grandan forton. Juemin sukcesis

elporti ĉion. Li neniam pensis pri cedo.

Dum tiuj tagoj Qin vere okupis lian tutan menson. Li ofte ekpensis pri ŝi kaj eĉ dumtage revis pri ŝi. Ju pli li sopiris al ŝi, des pli li deziris renkontiĝi kun ŝi. Tamen li ne povis iri al ŝi, ĉar ŝia patrino estis hejme. Kvankam la du loĝejoj distancis nemalproksime unu de la alia, renkontiĝo tamen neblis kaj eĉ korespondi estis malfacile. Kiam Juehui venis, li volis skribi leteron kaj petis lin transdoni al Qin. Sed ekpreninte la plumon, li ne sciis kiel komenci la leteron kaj timis, ke se li ne detale priskribos sian situacion, ŝi des pli maltrankviliĝos. Li decidis trovi ŝancon por interparoli kun ĝi. La ŝanco baldaŭ alvenis. Juehui aranĝis la renkontiĝon sen ajna peno.

Sciante, ke ŝia patrino forestas, li kondukis Juemin al la hejmo de Qin.

Juehui, restiginte Juemin ekster la pordo, eniris kaj salutis Qin. Li fiere diris al ŝi, “Kuzino Qin, mi alportas al vi bonaĵon.”

Portante blankan tolan bluzon, Qin oblikve kuŝis enlite kun libro en la mano, kvazaŭ endormiĝonta. Aŭdinte la voĉon de Juehui, ŝi tuj rektigis sin en sidan pozon. Forĵetinte la libron kaj aranĝinte la harojn ĉe la tempioj, ŝi malvigle demandis, “Kian bonaĵon?”

Ŝia vizaĝo aspektis flava kaj malgrasa kaj ŝiaj palpebroj mallevigis de tempo al tempo, kvazaŭ ŝi ne dormus dum sinsekvaj noktoj.

“Vi malgrasiĝis!” Juehui senkonscie diris, forgesante respondi al ŝi.

“Vi ne venis al mi en la lastaj tagoj,” diris Qin kun amara rideto. “Kiel iras la afero de Dua Kuzo? Kial li ne skribas al mi leteron?” Dirante, ŝi malvigle stariĝis .

“Kelkajn tagojn? Mi venis ĉi tien antaŭhierau, ĉu ne? Vidu, hodiaŭ mi venas en abunda ŝvito. Kial vi ne dankas min?” Juehui diris ridetante. Elpoŝiginte naztukon, li forviŝis ŝvitperlojn de sur la frunto.

Qin ekprenis desegnititan rondan ventumilon de sur la tablo kaj transdonis ĝin al Juehui. Ŝi plendis, “Sciu , kiel longe miaj tagoj treniĝas ĉi tie! Tuj diru, kiel iras lia afero.” Ŝi larĝe malfermis siajn okulojn, en kiuj riveliĝis melankolio kaj maltrankvilo.

“Li cedis,” li senpripense diris, motivite de forta impulso mensogi al ŝi. Kiam li eniris en la ĉambron, li ne pensis pri tia mensogo.

“Li cedis?” ŝi malĝoje ripetis. Poste ŝi decideme diris, “Mi ne kredas!” La mensogo ne formis fortan baton al ŝi dum mallonga tempo.

Ŝiaj vortoj pruviĝis ĝustaj , ĉar ĝuste tiumomente subite aperis alia junulo en ŝia ĉambro. Ŝiaj okuloj ekbrilis. Kun miro kaj ĝojo ŝi eligis krion, “Vi!” Ĉu la krio esprimas dubon, miron, ĝojon aŭ riproĉon, ŝi mem ne povis distingi. Ŝi volis sin ĵeti al li, sed ŝi tuj haltis. Ŝi firme fiksis sur li sian rigardon, kiu sendis multajn vortojn.

“Estas mi, Qin,” diris Juemin, kiu vere estis kaptita de miksita emocio de ĝojo kaj malĝojo, kvankam ĝi ankoraŭ ne atingis tian gradon kaj ridi kaj plori . “Mi devus veni por rigardi vin pli frue. Nur pro tio,

ke mi timas renkonti vian patrinon, mi venis hodiaŭ.”

“Mi sciis, ke vi venos. De longe mi scias tion,” ŝi ĝoje diris. Larmoj senĉese elruliĝis el ŝiaj okuloj . Poste ŝi direktis riproĉan rigardon al Juehui, dirante, “Tria Kuzo, vi mensogis al mi. Mi sciis, ke vi mensogis al mi. Mi ne kredas, ke li cedos. Mi kredas lin.”

“Kiu estas li? Li estas kiu?” Bonkora rideto alnaĝis al la vizaĝo de Juehui. Li ne povis trovi konvenajn vortojn por respondi al ŝi. Li do primokis ŝin per gurditaj frazoj.

Ŝi tamen ne ruĝiĝis. Ŝi fiere fingromontris Juemin kun kontenta rideto kaj okulparo plena de amemo.

Juehui antaŭe ne atendis tian agmanieron de ŝi, sed ĝi donis bonan impreson al li . Li turns la rigardon al Juemin kaj vidis, ke Juemin fiere staras tie kiel heroo, ĉar ŝi donis al li troajn laŭdojn.

Nur nun Juehui komprenis, ke lia konjekto estas tute malĝusta. Li konjektis, ke ilia renkontiĝo certe kaŭzos malĝojon kaj larmojn, kaj prezentos scenon de tragedio. En lia familio tia sceno ofte okazis. Tamen la realo pruviĝis ĝuste mala al lia konjekto. Ili ambaŭ estis subtenataj de amo kaj konfido, el kiuj ili akiris esperon kaj konsolon, kvazaŭ nenia obstaklo povus deteni unu de la alia. Ili jam estis kunligitaj de nerezistebla forto. Ĉe ili ekzistis nek malĝojo nek malespero, nur reciproka konfido. Dum tiu momento Juemin kaj Qin vere prezentis amoscenon ĝuste antaŭ liaj okuloj. Kvazaŭ strio da lumo

en la malluma mondo, ŝi donis al li esperon. Li kredis, ke Juemin neniam cedos eĉ sen lia kuraĝigo. Kiel facile estis por fervora junulo kiel Juehui kredi homojn !

“Sufiĉe , ne teatrumu plu. Se vi havas ion por diri, tuj eldiru unu al la alia. Ni ne havas multe da tempo,” Juehui ridetante diris al ili. Li demandis, “Ĉu vi volas, ke mi iru eksteren?” Li diris en la koro, “Mi ĉiam povas trovi vortojn por primoki vin.”

Ili ridetis al li, donante al li nek atenton nek respondon. Ili sidiĝis mano en mano sur la litrando kaj intime interbabilis.

Sin turninte, Juehui ekprenis libron de sur la tablo kaj foliumis. Ĝi estis *Verkoj de Ibsen*, en kiu troviĝis kelkloke spuroj de faldado kaj substrekoj. Atente foliumante, li trovis, ke Qin antaŭ nelonge legis *Malamikon de la Popolo*. Li pensis, ke eble ŝi penis trovi kuraĝigon kaj konsolon el ĝi. Li nereteneble ekridetis kaj turns la kapon por rigardi ŝin. Ŝi estis absorbita en intima babilado kun Juemin. Afabla rideto igis ŝian malgrasan vizaĝon pli bela. Li ĵetis aliajn kelkajn rigardojn kun envio al sia frato. Poste li turns la okulojn al la libro, svingante la ventumilon. Finleginte la unuan akton, li turnis la kapon por rigardi ŝin. Ŝi ankoraŭ interbabilis kun li. Post legado de la dua akto, li vidis, ke ili ankoraŭ ne finis interparoli. Kiam li finlegis la tutan pecon, ili ankoraŭ dronis en ĝoja interbabilado.

“Nu, kiel do? Kiel babilemaj vi estas !” Juehui urĝis.

Levinte la kapon kaj ekrigardinte lin, Qin ridetis kaj denove ekbabilis.

“Dua Frato, foriru. Vi jam sufiĉe interbabilis,” Juehui denove urĝis post duonhor.

Kiam Juemin estis respondonta, Qin diris, “Momenton! Estas ankoraŭ frue. Ne estu tiel urĝema!” Ŝi firme tenis la manon de Juemin, kvazaŭ timante, ke li tuj foriros.

“Mi devas reiri,” Juehui insistis.

“Bone, reiru. Mia mizera ĉambro ne povas restigi viajn noblajn piedojn,” diris Qin. Tamen vidinte Juehui iri al la pordo, ŝi kaj Juemin unuvoĉe revokis lin.

“Tria Frato, ĉu vi vere foriras? Ĉu vi ne volas doni al mi iom da helpo?” petis Juemin sincere. Juehui ridetante diris, “Mi nur ŝercas, sed vi ignoras min tiagrade, ke mi sentas min tre soleca. Kuzino Qin, mi restis ĉi tie jam tiel longe, sed vi nek petis min sidiĝi sur seĝo nek babilis kun mi. Ĉar Dua Frato ĉeestas, vi forgesas min.”

Juemin kaj Qin ekridis. Qin ridetante senkulpigis sin, “Mi havas nur unu buŝon. Kiel mi povus interbabili kun du samtempe? Tria Kuzo, estu obeema. Hodiaŭ lasu min kaj vian fraton babili pli longe. Morgaŭ ni ambaŭ interbabilos ĝissate,” Qin konsolis lin kiel infanon.

“Ne trompu min. Mi ne havas tian feliĉon kiel Dua Frato.”

Juemin vokis, “Tria Frato”, sed kiam li sin pretigis plu diri, Qin lin interrompis, “Vi havas pikan langon. Mi ne povas superi vin en

vortado. Respondu, ĉu vi ŝatas Xu Qianru. Ŝi estas multe pli bona ol mi. Oni povas kalkuli ŝin kiel novan junulinon. Ĉu vi volas, ke mi prezentu vin al ŝi?” Ŝi montris ruzan rideton sur la vizaĝo.

“Eble mi ŝatas ŝin kaj eble mi ne ŝatas ŝin. Ĉu tio koncernas vin? Ankaŭ ne estas necese, ke vi prezentu sin al mi. Ĉu si ne konas min?” Juehui petole diris. Kreskis lia intereso pri la ŝerca disputo.

“Vi diris prave kaj mi tiel pensas. Ili ambaŭ estas modernaj kaj entuziasmaj,” Juemin ridetante diris, aprobe balancante sian kapon al Qin, antaŭ ol ŝi respondis.

Kompreneble Juehui komprenis, kion ili diris.

Mansvinginte, li ridetante diris, “Mi ne sekvos vian ekzemplon. Mi ne scipovas prezenti dramon scenon kiel vi, kiam mi havos rendezuon.” Li deturnis sian kapon. En lia menso la penso aperis : Tiu, kiun mi volas, estas vi, Qin ! Sed tiu penso estis tuj forpelita de la dua : Mi jam sendis la vivon de junulino al la morto. Mi ne plu bezonas amon. Li nur ridetis, amare ridetis.

La interparolo inter Juemin kaj Qin venis al la fino, kaj ili devis disiĝi, sed Juemin vere ne volis forlasi la cambron. Al li, ne nur ŝi, sed ankaŭ ĉio en la ĉambro estis valora. Li hezitis. Rigardante ŝin, li pensis pri sia malgranda rifuĝejo, pri la vivo en soleco kaj atendado en ĝi, kaj li ne havis kuraĝon por reiri tien. Tamen Juehui staris tuj apud li. La urĝa rigardo de Juehui atentigis, ke li povas fari nenion alian ol

reiri tien. Kvazaŭ antaŭsentante tujan falon el la brila ĉielo en malluman abismon, Juemin malespere kaj malĝoje diris en tono iom agonia, “Mi foriru.” Sed li ne kapablis movi siajn piedojn. Li volis konsoli ŝin per kelkaj vortoj, tamen li ne povis trovi konvenajn vortojn dum la urĝa momento de disiĝo. Li nur diris, “Ne sopiru al mi.” Tio kontraŭis al lia intenco. Fakte li deziris, ke ŝi sopiru al li ĉiumomente.

Starante antaŭ Juemin, Qin rigardis lin per sia paro da akvecaj okuloj. Ŝi streĉis la orelojn, atendente liajn neordinarajn vortojn. Tamen post longa tempo li eldiris nur kelkajn vortojn. Ŝi sentis malesperon.

Timante, ke li tuj foriros, ŝi tuj retenis lin, dirante, “Ne tuj foriru. Momenton. Mi havas pli por diri al vi.” Ŝi tiris lian manikon.

Li englutis la vortojn kvazaŭ frandaĵojn. Li stulte rigardis ŝian ekscititan vizaĝon kaj lia rigardo penetris en ŝiajn okulojn tra la okulvitroj. Liaj lipoj malrapide movetis. Kun altrudita rideto li diris, “Ne maltrankviliĝu. Mi ne tuj foriros.” Lia ridetanta vizaĝo similis plorantan vizaĝon. Juehui pensis, ke li efektive ploras.

Qin sentis, ke la milda rigardo de Juemin karesas ŝiajn okulojn kaj vizaĝon, kvazaŭ ĝi dirs, “Diru, diru! Mi atente aŭskultos ĉiun vorton de vi eldirotan.” Ŝi volis trovi vortojn, kiuj eterne konsolus lin kaj igu lin neniam forgesi, sed vane. Rigardante lin, ŝi maltrankviliĝis. Ŝi timis, ke li tuj sin turnos kaj foriros. Ŝi ankoraŭ tenis lian manikon sen malstreĉiĝo. Ŝi ne pesis siajn vortojn, sed eldiris, kio venis en ŝian kapon

sen konsidero, ĉu gi estas necesa aŭ rilatas al ili.

“Qianru diris al mi, ke Wen kaj ‘Maljuna Miss’ de nia lernejo veturos al Pekino por studi. Ili vere ne eltenas plu ĉi tiun socian medion. Iliaj familioj riproĉas ilin pro fortonto de la harligo,” Qin komencis. Ŝi ne klarigis al Juemin, kiuj Wen kaj “Maljuna Miss” estas, kvazaŭ li jam bone konus la nomojn. Kun granda atentemo Juemin ŝajne multe interesiĝis pri tio.

“Eble Qianru mem foriros. Ŝia patro estis atakita de aliaj pro ŝi. Li indigniĝis kaj diris, ke li rezignos sian oficon en la Buroo pri Fremdlandaj Aferoj kaj transloĝiĝos al Ŝanhajo aŭ Nankino kune kun sia filino.” La vortojn de Qin Juemin ankoraŭ atenteme aŭskultis.

“Kuzino Mei serioze malsaniĝis lastatempe. Ŝi sputas sangon ĉiutage, sed ne multe. Ŝi ne volas preni medikamentojn. Tion ŝi kaŝas de sia patrino kaj petis min ne diri tion al aliaj. Ŝi diris, ke ju pli da tagoj si vivas, des pli da suferoj ŝi ricevas. Ŝi preferas morti pli frue. Ŝia patrino sin okupas tuttage pri vizitado kaj maĝangoludado kaj montras malmulte da zorgo pri ŝi, dum bofratino Ruijue ofte zorgas pri ŝi kaj sendas al ŝi medikamentojn kaj bezonaĵojn. Hieraŭ mi kaptis ŝancon diri al ŝia patrino pri ŝia malsano. Ŝi fariĝis maltrankvila. Verŝajne tio, kion kuzino Mei diris, estas prava, sed mi ne povas rigardi senfare, dum ŝi mortas. Ne diru tion al Granda Frato. Ŝi petis, ke mi neniel malkaŝu al li ŝian sangosputadon.”

Post tiuj vortoj Qin trovis, ke liaj okuloj pleniĝas de larmoj, kiuj ruliĝas trans la okulvitroj. Liaj lipoj movetiĝis. Ŝajnis, ke li volas diri ion, sed li ne sukcesis. Tamen ŝi jam tute komprenis. Ŝi volis plu diri, sed ŝi estis kaptita kaj konkerita de subita sennoma malĝojo. Ŝi sentis sian gorĝon ŝtopita. Kun angoro ŝi fine eligis plorvoĉan krion, “Mi ne povas diri plu! Retroirinte kelkajn paŝojn ŝi ambaŭmane kovris sian vizaĝon, lasante larmojn libere elflui.

“Kuzino Qin, mi foriru,” Juemin malĝoje diris. Li neniel volis foriri, sed li devigite ekiris. Li ne atendis, ke la ĝoja renkontigo finiĝos per plorado, malgraŭ ke ili nomis sin novaj kaj bravaj gejunuloj.

“Ne foriru ! Ne foriru !” Qin kriis malĝoje, demetinte la manojn de sur la vizaĝo kaj etendinte ilin al Juemin.

Juemin volis sin ĵeti al ŝi, sed lia brako estis kaptita de Juehui. Li haltis kaj turnis la kapon por rigardi la kaptinton. Juehui ne ploris. Liaj sekaj okuloj elsendis fortan brilon. Juehui ekturnis sian vizaĝon por signi, ke li foriru. Turninte la kapon, Juemin konsolis Qin per malĝoja voĉo, “Qin, ne ploru. Mi certe venos. Niaj loĝejoj troviĝas tre proksime unu al la alia. Se mi havos ŝancon, mi certe venos viziti vin... Mi reiru. Bone zorgu pri via sano. Atendu mian bonan novaĵon.” Sen plua hezito li sekvis Juehui eksteren, lasante Qin en la malheliĝanta ĉambro.

Okule sekvinte ilin eksteren, Qin postkuris. Ĉe la pordo ŝi haltis.

Apogante sin kontraŭ la pordokadro, ŝi atente rigardis iliajn dorsfigurojn. Kiam Juemin kaj Juehui iris surstrate, la plorado de Qin kvazaŭ ankoraŭ sonis ĉe iliaj oreloj. Ne interŝanĝante vortojn, ili faris grandajn paŝojn. Alproksimiĝante al la hejmo de Huang Cunren, Juehui subite haltis kaj diris al Juemin per klara voĉo, “Via afero certe sukcesos, vi certe triumfos. Ni jam sufiĉe oferis.” Post paŭzeto li diris kun decidema kaj preskaŭ kruela voĉo, “Se aliaj oferoj necesas esti faritaj nun, ili estu viktimoj .

32

Dum la lastaj tagoj Juexin estis senĉese riproĉata de la konscienco. Li konsideris, ke ĉiaokaze li devas helpi Juemin, alie fariĝos dumviva bedaŭrindaĵo. Post kelktaga meditado kaj interkonsiliĝo kun la duonpatri-no kaj edzino, li decidis iri al la avo por propeti Juemin. Li ĉirkaŭfrazo parolis pri tio, kion Juemin opiniis — kompreneble li ne menciis la aferon inter Juemin kaj Qin — petante, ke la avo prokrastu la gefianĉiĝon ĝis Juemin povos memstare vivteni sin. Li parolis tre kortuŝe — li faris preparadon kelkajn noktojn kaj eĉ surpaperigis sian parolon. Li estis certa, ke liaj vortoj tuŝos la koron de la avo.

Tamen tute kontraŭe al lia atendo, la avo ne montriĝis tia homo, kian li imagis. Li estis tre obstina. Li ne bezonis racion plu, nek aŭskultis la voĉon de racio. Tio, pri kio li zorgis, estis : Ĉar lia aŭtoritato estis atakata, li devis restarigi ĝin per severaj rimedoj ; la ordono de gepatroj, la vortoj de svatanto kaj la geedziĝo decidita de la familestro — tiuj neŝanĝeblaj principoj devis neniam esti pridemandataj de la juna generacio, alie la malobservantoj estos nepre punitaj. Pri la feliĉo kaj espero de tiuj gejunuloj li neniom zorgis. Tial la persvada parolo de Juexin nur kaŭzis lian furiozan riproĉadon. Fine la avo diris, ke la proponita geedziĝo absolute ne povos esti nuligita. Se Juemin ankoraŭ ne revenos en la fino de la monato, li deklaras per ĵurnalo, ke Juemin ne apartenas al la familio Gao, kaj li devigos Juehui anstataŭe

edziĝi al la junulino.

Juexin ne kuraĝis diri plu kaj nur jesadis. Eltirinte sin el la ĉambro de la avo, li tuj venigis Juehui kaj diris al li la decidon de la avo. Li ripetis ĉion, kion la avo diris, kaj per tio minacis Juehui. Li kredis, ke Juehui verŝajne revenigos Juemin nur pro sia propra intereso. Sed Juehui fariĝis multe pli rafinita ol antaŭe, kaj plie li jam faris mensan preparadon. Anstataŭ eldiri sian opinion pri la vortoj de la avo, li eligis nur du ironiajn ridojn. Li fiere pensis en si : “Se ofero estos necesa, mi absolute ne estos la viktimo.”

“Miaopinie, estas plej bone persvadi vian Duan Fraton reveni, alie vi devos akcepti la proponitan geedziĝon” diris Juexin, intencante konverti la silentan fraton.

“Se la avo vere havas tian intencon , li do faru tion. Iun tagon li pentos. Mi ne timas. Mi havas pli bonan kontraŭrimedon!” Juehui fiere diris.

Juexin apenaŭ kredis siajn orelojn. El sia frato, li ŝajne povis trovi nenion kompreneblan.

“Mi tute ne komprenas, kial vi tiom malfortas, tiel sentaŭgas!” sarkasme diris Juehui.

Juexin tuj ruĝiĝis kaj poste paliĝis. Li tremetis de kolero. Kiam, eldirinte “vi” jam kelkfoje, li penis diri ion, la pordokurteno leviĝis . Eniris servisto Yuan Cheng, kiu raportis kun spirego, “Sinjorino Qian

alsendis mesaĝon : Fraŭlino Mei forpasis.”

“Fraŭlino Mei? Kiam ŝi mortis?” Ruijue surprizite demandis kun pala vizaĝo, elkurinte el la interna ĉambro.

Oni diris, ke ŝi mortis post la sepa ĉi-matene, respektoplene respondis Yuan Cheng.

La murhorloĝo sonore batis la naŭan. Morta silento regis en la ĉambro. Ĉiuj longan tempon restis senvortaj .

“Pretigu mian palankenon,” ordonis Juexin kun serioziĝinta mieno.

“Ankaŭ mi iru,” Ruijue diris plorvoĉe, falinte sur kanseĝon.

“Vi eliru,” Juexin diris al Yuan Cheng. Jesinte, la servisto eliris, flanken puŝinte la pordokurtenon.

Juexin alpaŝis al Ruijue kaj konsolis, “Ruinjo , ne iru. Vi estas graveda. Vi ne povos elteni malĝojon. Kiam vi vidos tiun tragikan scenon, vi certe malĝojiĝos. Vi devas zorgi vian sanon.”

“Mi tre sopiras al ŝi... Tiun tagon, kiam mi pretigis min por reveni per palankeno de ŝia hejmo, tirante mian manon, ŝi petis, ke mi ofte vizitu ŝin kaj ke mi la venontan fojon kunportu Haiĉjon al ŝia hejmo. Ŝiaj larmoj abunde elfluis. Mi ne atendis, ke ŝi ne povos vidi nin plu... Mi volas iri rigardi ŝin... Revidi ŝin lastfoje ... Mi iros tien por danki ŝin pro boneco, kiun ŝi montris al mi dumvive,” Ruijue diris intermite.

“Ruinjo, vi devas prizorgi vian sanon. Sciu, vi estas ĉio, kion mi havas nun. Se io malfeliĉa okazos al vi, ĉu tio ne signifos mian

morton?” La voĉo de Juexin estis tre trista.

Starante ĉe la skribtablo, Juehui silente rigardis la fenestran kurtenon el blanka gazo. Tiu novaĵo ne estis neatendita bato, ĉar li jam antaŭvidis ĝin. En lian menson svarmis la vortoj de Mei, kiujn Qin komunikis, “Ju pli da tagoj mi vivos, des pli da suferoj mi ricevos. Mi preferas morti pli frue.” Kvankam ŝi eldiris tiujn vortojn el sia propra buŝo, tamen ne estis facile tolereble vidi la pereon de ŝia malforta, aminda juna vivo.

Lia cerbo estis okupata de multaj ideoj de malĝojo kaj indigno. Kun retenita emocio li malvarme diris, “Jen ankoraŭ unu viktimo!” Li sciis, ke Juexin povas aŭdi lin kaj kompreni, kion li diris. Li turnis sian kapon kaj renkontis la malĝojan rigardon de Juexin. Li ŝajnigis sin parolanta al si, “La malĝojo ankoraŭ ne finiĝis! Okazos pli teruraj aferoj.” Ankaŭ tiuj vortoj celis Juexin.

Elirinte el la ĉambro, Juexin sentis kapturigon kaj molecon tra la korpo. Streĉante sian energion, li faris kelkajn paŝojn. Li subite sentis, ke io brula leviĝas el la koro, kaj li penis reteni ĝin. Sed por kvietigi tikladon en la gorĝo, li sputis gluecan mukaĵon dolĉan kaj fiŝodoran. Senkonscie li direktis sian rigardon al la tero kaj vidis mukaĵon ruĝan. Lia korpo tuj malvarmiĝis, kvazaŭ li falus en fridan kelon. Premante mane la bruston, li sin pretigis reiri en sian ĉambron, sed li tuj ŝanĝis la ideon. Silente forviŝinte la mukaĵon per piedo, li iris antaŭen

kun streĉita energio.

Tuj kiam Juexin eliris el la palankeno, li aŭdis ploradon en la hejmo de la familio Qian. Li rapide iris internen al la ĉambro de Mei.

Tie estis la patrino, la juna frato de Mei, Qin kaj servistino, kiuj ploris ĉirkaŭ la kadavro. Vidinte lin eniri, ĉiuj ĉesis plori por saluti lin.

“Unua Sinjorido, kion mi faru?” plorante demandis sinjorino Qian kun distaŭzitaj haroj kaj larmoplena vizaĝo.

“Ni tuj preparu funebran aferon,” Juexin malgaje respondis. Poste li demandis, “Ĉu ĉerko jam estas aĉetita?”

“Mi jam sendis serviston Wang Yong aĉeti, sed li ankoraŭ ne revenis,” sinjorino Qian diris, akompanate de plorado. “Mei mortis jam antaŭ pli ol du horoj, sed nenio estas farita. En la hejmo estas nur mi, virino, kaj via kuzo juna, kaj la servisto devas komuniki la informon al diversaj lokoj. Kion mi povas fari? Kiel malorda la ĉambro estas! Mia koro estas tre konfuzita.”

“Ne maltrankviliĝu, Onjo. Mi laŭeble helpos vin,” Juexin decideme respondis, tute forgesante pri sia sangospito.

“Unua Sinjorido, vi estas bonkorulo. Mei certe dankos vin en la subtera mondo,” sincere diris sinjorino Qian.

La vorto “danki” pikis la koron de Juexin kiel pinglo. Li sentis sin plena de vortoj, sed li ne povis eligi ilin. Li deziris ekplori plengorge. “Ĉu Mei dankos min?” li pensis en si. Estas mi, kiu sendis sin al la

morto. Li alpaŝis al la lito de Mei. Ŝi kviete kuŝis en la lito kun la okuloj fermetitaj. Ŝiaj haroj estis disŝutitaj sur la kapkuseno, sia vizaĝo estis pala kiel papero kaj la falto sur la frunto pliprofondiĝis. Ŝia buŝo estis iom malfermita, kvazaŭ ŝi farus la lastan spiron, antaŭ ol ŝi povis eldiri ion. La lipoj estis ruĝe makulitaj de sputita sango malzorge forviŝita. Maldika litkovrilo kovris ŝiajn manojn kaj malsupran korpon.

“Mei , mi venas vidi vin,” mallaŭte diris Juexin. Liaj okuloj estis vualitaj de larmoj. Li sentis grandan kortordiĝon. Li ne povis sufoki la penson : “Ĉu ni tiamaniere disiĝas por eterne? Vi ne restigis al mi eĉ vorton. Kial mi ne venis pli frue? Se mi venus pli frue, mi povus vidi vian buŝon moviĝi, aŭdi vian voĉon kaj ekscii, kion vi pripensis.” Li ankaŭ sekrete preĝis, “Mei, mi jam estas ĉi tie. Tuj eldiru, kion vi ankoraŭ ne elbuŝigis. Mi aŭskultas vin.”

Elpoŝiginte naztukon, li forviŝis siajn larmojn kaj klinis la kapon por ankoraŭfoje pririgardi sian vizaĝon. Muŝeto faligis sin sur sian frunton kaj li forpelis ĝin per malpeza mansvingo. Mei kuŝis kiel malvarma ŝtono. Li komprenis, ke eĉ se li krius ĝis raŭkiĝo, ŝi ne povus aŭdi lin nek povus denove moviĝi. Inter ili staris “eterneco”. Ili por eterne ne povos alproksimiĝi. Li pentis, malĝojis, ekploris malespere.

Lia plorado estigis reploradon de sinjorino Qian kaj ŝia juna filo. Qin alpaŝis kaj admone diris, “Granda Frato, nun ne estas tempo plori . Ni devas tuj fari aranĝojn por la enterigo de kuzino Mei. Plorado ne povas

revivigi mortinton. Onklino Qian jam estas ekster si. Via plorado des pli konfuzas ŝin. Se la mortinta kuzino Mei sciis, ŝia koro estus vundita pro tio.”

En la oreloj de Juexin tiuj vortoj estis pikaj. “Mi jam multfoje vundis sian koron, ne nur ĉi-foje,” li pensis. Sed li ne povis diri tiujn vortojn. Kun retenitaj larmoj li ĉesis plori kaj eligis longan vespiron.

“Ne riproĉu Unuan Sinjoridon. Antaŭe li tiel bone rilatis al Mei. Eĉ ilia geedziĝo estis proponita. Mi bedaŭras, ke mi ne konsentis, alie ni ne havus la hodiaŭan malfeliĉon!” sinjorino Qian plorante diris.

“Granda Kuzo, ni rapidu.. Ne lasu ŝian korpon longe senŝirma,” Qin intence intermetis, sciante, ke la vortoj de sinjorino Qian malĝojigas Juexin.

“Nu,” Juexin vee diris. Post tio li interkonsiliĝis kun sinjorino Qian pri la funebrado.

Aĉeti necesajojn, enirigi la ĉerkon en la ĉambron, lavi kaj vesti la korpon de Mei fare de servistino kaj meti Mei en la ĉerkon — ĉio ĉi estis rapide farita. Nun estis tempo fermi la ĉerkon.

Mei kuŝis en la ĉerko, tiel ke nur ŝia vizaĝo videblis. Ankoraŭ restis la antaŭa aspekto : fermetitaj okuloj kaj iom malfermita bugo. Ŝajnis, ke ŝi volis diri ion, sed ne sukcesis. Juexin ĵetis al ŝi la lastan rigardon kun bedaŭro. Li avide rigardis tiun karan vizaĝon, pensante, ke ŝia aspekto malaperos el lia vivo post kelkaj minutoj. Li ne povis lasi ŝin

neniiĝi. Li volus levi la funebran tukon kaj brakporti ŝin el la ĉerko al dezerteca loko, sed li ne havis kuraĝon. Li direktis malaman rigardon al la lakisto kaj volus forpeli lin. Ĉar post kiam la lakisto ekmovos la manon, li ne plu povos vidi ŝian vizaĝon.

Fine Juexin ordonis fermi la cerkon. Ĝuste kiam la lakisto sin pretigis surmeti ruĝan satenpecon, sinjorino Qian subite firme kaptis la randon de la ĉerko. Malĝoje plorante, ŝi diris al la vizago de Mei, “Mei, vi rifuzas fermi vian buŝon. Ĉu vi havas ion por diri? Eldiru ! Mi aŭskultas vin... Mei, estas mi, kiu ruinigis vin. Mi estis blinda kaj ne sciis, kion vi havis en la koro. Estis mi, kiu disigis vian interligon kun Juexin, tiel ke vi suferis la tutan vivon kaj venis al tiel mizera fino ... Nun mi pentas pri tio. Mi komprenas, ke mi eraris ... Mei, ĉu vi aŭdas min? Kial vi ne respondas? ... Ĉu vi malamas min? Nu, vi faru venĝon kontraŭ mi dum via transmorta vivo. Vi ruinigu min kiel mi ruinigis vin. Mi nur petas, ke vi ne forlasu min dum via transmorta vivo kaj ni rilatiĝu kiel patrino kaj filino... Mei, respondu al mi! ... Mia mizera filino! Mi foriru kun vi ! Mei, Mei...”

Sinjorino Qian forte piedbatadis la teron kaj frapadis sian kapon kontraŭ la ĉerko. Larmoj kaj nazmuko plene kovris ŝian vizaĝon. La admonoj de la aliaj ne efikis. Fine oni fortiris sin kun granda peno.

La ruĝa satenpeco surmetiĝis, kovrante ĉion en la ĉerko. La lakisto alnajlis la satenpecon al la ĉerko kaj poste surmetis la ĉerkokovrilon.

Li sigelis la ĉerkon per mastiko. Ĉio estis rapide farita. De tiam Mei eterne forestis el la ĉambro. Restis ŝia ĉerko, kiu devis esti forportota la saman tagon.

Unu post alia venis kelkaj funebrantoj , kiuj estis parencoj de sinjorino Qian : sinjorino Zhou (la duonpatrino de Juexin) kun Shuhua kaj Haiĉjo, sinjorino Zhang (la patrino de Qin) kaj tri aŭ kvar virinoj. Tiuj lastaj baldaŭ foriris. Ruijue sukcesis intervidigi Haiĉjon kaj Mei, kvankam la ĉerko baris inter ili. Kun scivola sento ankaŭ Haiĉjo ploris kune kun la plenkreskuloj . Juexin petis sian duonpatrinon hejmeniri , kunportante Haiĉjon. Krom la patrino kaj juna frato de Mei kaj ilia servisto, ankaŭ Juexin, Juehui, Shuhua kaj Qin eskortis la ĉerkon de Mei al la sepultejo. Juehui venis tre malfrue, sed li estis ĝustatempa por partopreni en la malgaja funebra procesio.

La sepultejo estis en granda templo. Pro manko de riparado la templo sin montris tre dezerteca. En la korto antaŭ la ĉefhalo de la templo kreskis altaj sovaĝaj herboj. La malgrandaj ĉambroj ĉe ambaŭ flankoj de la korto estis konservejoj de ĉerkoj. Iuj ĉambroj estis malfermitaj, malkaŝante kadukajn meblojn. Videblis altaro kun rompita piedo, tabuloj kun nomoj de mortintoj falintaj sur la tablon kaj blovrompitaj paperslipoj kun funebraj surskriboj. Aliaj ĉambroj estis firme fermitaj, kaŝante ĉion en si. Iuj malgrandaj ĉambroj entenis tri aŭ kvar ĉerkojn sen ia ajn meblo. Laŭdire tiuj ĉerkoj estis alportitaj

antaŭ preskaŭ dudek jaroj kaj apartenis al oni ne scias kiuj. Escepte de musoj, neniu vizitis ilin.

La ĉambro de Mei estis rapide bone aranĝita. La ĉerko, altaro kaj nomtabulo estis orde metitaj. La servisto bruligis monpaperojn ĉe la piedo de ŝtuparo antaŭ la ĉambro. Apogante sin sur la ĉerko, sinjorino Qian denove ploradis, akompanate de plorado de la juna frato de Mei. Qin provis konsoli sinjorinon Qian, sed kiam ŝi pensis pri la tuta vivo de Mei, pri la amikeco inter si kaj Mei kaj pri la vidata sceno, ŝi estis tiel tuŝita, ke ŝi mem nereteneble ekploris plenvoĉe.

Ilia plorado penetris en la orelojn de Juexin, kiu staris senkonscie antaŭ la altaro. Liaj larmoj elfluis senbare. Li apenaŭ sciis kial. Li eĉ pensis, ke en la ĉerko kuŝas ne ŝi sed iu alia. Ŝi ankoraŭ vivas, ankoraŭ rigardas lin per sia malgaja mieno kaj ankoraŭ rakontas al li sian malĝojan vivon. Large malferminte siajn okulojn iom post iom, li rigardis tra larmoj. La funebra nomtabulo kun nigraj ideogramoj sur ruĝa fono klariĝis, pligrandiĝis kaj alproksimiĝis. “Kuŝejo de mia fratino Qian Meifen” — tiuj vortoj senkompate kaj senerare saltis en liajn okulojn. Ŝi sendube mortis. Ŝia ĉerko ĝuste kuŝis malantaŭ la altaro. Ŝia patrino malĝoje ploradis, mane batante la kovrilon de la ĉerko; ŝia juna frato malgaje vokis “franjo”, apogante sian kapon kontraŭ la ĉerko; Qin — minacata de la sama sorto de Mei — mallaŭte ploris, apogante sin sur la ĉerko kun la kapo sur la brako.

La larmoj de Juexin eltorentis libere. Ĉi-foje li sciis, kial li elverŝas larmojn. Li elpoŝigis poŝtukon kaj forviŝis ilin. Ne povante elteni la scenon, li transpaŝis la sojlon kaj eliris. Li vidis la serviston Wang Yong bruligi oferaĵojn, starante sur la ŝtuparo. Juehui eliris el la ĉefhalo de la templo per firmaj paŝoj. Kun sia juneco, Juehui ŝajne estis la ununura, kiu posedis sufiĉe grandan forton en tiu medio — tion Juexin vere sentis dum tiu mallonga tempo.

“Ni reiru,” diris Juehui, kiu alpaŝis al Juexin. La servisto jam finbruligis la oferaĵojn. Ĉe la piedo de la ŝtuparo restis nur amaso da nigra cindro kelkloke brulanta. La vento supren levis cindron kaj poste flirtigis ĝin ĉien.

“Jes,” Juexin respondis malvigle. Sin turninte, li eniris kaj admonis, ke ili ne ploru plu. Ne estis facile por larmanto persvadi plorantojn. Tiumomente Qin plorsingultis, sinjorino Qian senvoĉe larmis kaj la juna frato de Mei ankoraŭ ĉagrene kriis, “Franjo, franjo...”

Forlasonte, ili riverencis antaŭ la funebra nomtabulo. Ĝuste kiam ili sin turnis, la juna frato de Mei eligis plorvoĉe kontraŭ la ĉerko, “Franjo, ni foriras. Nur vi kuŝas sola ĉi tie. Kiel solece!” Tiuj simplaj vortoj sonis korŝire kaj denove eltiris ĉies larmojn. Kun emocio Qin ameme konsolis lin kaj akompanis lin eksteren, tenante lian manon.

Sinjorino Qian, kiu jam ĉesis plori, estis denove agitata de tiuj vortoj de sia filo. Starante antaŭ la altaro, ŝi rigardis la kandelojn,

incensbastonetojn kaj la funebran nomtabulon. Post kelka tempo ŝi diris intermite, “Mei, via frato diris prave. Vi sentos vin soleca. .. Ĉi tie estas tro kvieta... tro dezerteca... Vi restos sola kaj neniu karulo akompanos vin ... Ĉi-nokte revenue. Vi certe rekonos vian hejmon ... Ĉiuvespere mi bruligos lampon kiel antaŭe en via ĉambro, tiel ke vi povos vidi ĝin... Viajn aĵojn mi ne movos... Vi, Mei — mia filineto...” La vortojn ŝi eligis kun granda peno. Ŝi volis plu diri , sed la brusto doloris sin kaj ŝia gorgo estis ŝtopita. Ŝi vole-nevole eliris kune kun aliaj .

Kvankam Juexin ne foriris la lasta, li tamen la lasta eniris en palankenon. Li turnis la kapon por rigardi la ĉambron de tempo al tempo, kiam ili ekiris. La lasta, kiu forlasis, estis Juehui, kiu ne prenis palankenon. Li sola denove eniris en la ĉambron kaj iradis ĉirkaŭ la ĉerko. Kiel aliaj, li diris adiaŭajn vortojn al Mei. Li ne ploris nek malĝojis. Tio, kion li havis, estis nur plenbrusta indigno. Li diris per voĉo kun intermiksita amo kaj malamo.

“Nur plorado, kelkaj vortoj kaj kelkaj larmoj jam sufiĉis por enterigi ĉi tiun amindan kaj junan vivon. Kuzino Mei, mi bedaŭras, ke mi ne povas eltiri vin el la ĉerko kaj komprenigi al vi, kiamaniere vi estis mortigita!”

33

La sekvan tagon posttagmeze Juehui iris al la kaŝejo de Juemin kaj rakontis al li la morton de Mei, kio eltiris de li larmojn. Ili interbabiladis nur malpli ol horon. Juehui diris ĝisrevidon kaj Juemin akompanis lin ĝis la pordo. Juehui jam transpaŝis la sojlon, kiam Juemin alvokis lin.

“Kian aferon vi ankoraŭ havas?” Juehui alpaŝis kaj demandis.

Kun afabla rideto Juemin rigardis lin senparole longan tempon.

Kompreneme, Juehui ame demandis, “Dua Frato, ĉu vi sentas vin soleca ĉi tie?... Mi estas certa, ke vi sentas solecon. Ankaŭ mi. Neniu el la familio komprenas min. Onjo Huang petis informon pri vi, kiam ŝi eniris en mian ĉambron. Je mencio de vi ŝi larmis. Ankaŭ la duonpatrino, bofratino, dua kaj tria fratinoj ofte petas de mi informon pri vi. Sed iliaj koroj distancas tre malproksime de la mia kaj la via. En la hejmo mi estas izolita. Tamen mi devas elteni kaj ankaŭ vi. Vi certe triumfos.”

“Sed mi iom timas...” Juemin ne povis fini la frazon. En liaj okuloj larmoj trembrilis.

“Kion vi timas? Vi certe triumfos,” Juehui ridetante kuraĝigis.

“Mi timas solecon. Mia koro estas tre soleca!”

“Ĉu ne estas du koroj, kiuj eĥas la vian?” Juehui diris, penante teni la rideton.

“Ĝuste pro tio, ke la du koroj restas tre proksimaj al la mia, mi

ofte deziras esti kun vi. Ŝi ne povas veni ĉi tien kaj vi nun foriras...”

Juehui sciis, ke liaj okuloj malsekiĝas, sed li ne volis, ke lia frato rimarku tion. Deturninte sian rigardon de lia vizaĝo al alia loko, Juehui frapetis lian ŝultron, dirante, “Dua Frato, estu pacienca. Vi certe triumfos. Vi povas treniĝi tra ĉi tiuj tagoj, ĉu ne?” Tiumomente lia parolo estis rompita de alia voĉo.

“Kial vi ne babilas ene? Estu singardaj,” senhaste diris Huang Cunren, kiu staris apud ili.

“Do mi reiru,” diris Juehui. Interŝanĝinte saluton kun Huang, li sin turnis kaj ekiris. Li aŭdis Huang diri, “Do ni eniru por iom interbabili.”

Survoje Juehui murmuris al si mem, “Ni certe triumfos.” Sed li malĝoje pensis : Ĉu ni vere povos venki? Kiam la venko alvenos finfine? Kiam li eniris en la hejmon de Qin, li decideme diris al si, “Mi ne zorgu tion. Malgraŭ ĉio, ni devas luktadi ĝis la fino.”

Dirinte saluton al sia onklino, li eniris en la ĉambron de Qin. Je la vido de Qin li unue diris, “Mi venas de Dua Frato. Li volas, ke mi diru al vi, ke li bone fartas.”

Qin skribis leteron. Aŭdinte lin, ŝi tuj demetis la plumon,, kaj diris kun rideto, “Dankon. Dankon. Mi skribas leteron al li.”

“Sendube, la leterportanto estos mi,” diris Juehui ridetante. Senintence li okule kaptis “Kuzinjo Mei” kelkloke en la letero. Li

demandis, “Ĉu vi skribas al li pri kuzinjo Mei? Mi jam diris al li. Kio estas via opinio pri la morto de kuzinjo Mei?”

“En la letero mi diris, ke mi absolute ne fariĝos dua kuzinjo Mei. Kaj plie mia patrino aludis tion. Hieraŭ, kiam ŝi vidis la mizeran morton de kuzinjo Mei kaj la tragikan ploradon de onklino Qian, ankaŭ ŝi tre emociiĝis. Ŝi diris, ke ŝi volonte helpos min,” diris Qin, montrante decideman kaj plezuran vizagesprimon. Ŝia vizaĝo ne aspektis tiel senviveca kaj malgrasa kiel antaŭ kelkaj tagoj.

“Bone, vi devas sciigi lin kiel eble plej frue,” Juehui diris kaj urĝis Qin finskribi la leteron. Poste ili interbabilis kelkan tempon.

Ankoraŭfoje Juehui iris al Juemin kaj transdonis la leteron al li. Juemin kaj Huang Cunren ĝoje interbabilis kaj Juehui enmiksitis sin en la babiladon plenan je espero.

Post ĉirkaŭ unu horo Juehui hejmeniris. Kiam li iris al la avo, li vidis ke kelkaj subaŭskultis kun etenditaj koloj ĉe la fenestro de ties ĉambro. En lia familio ofte okazis tiaj aferoj. “Ne zorgu pri tio,” li pensis. Enirinte en la ĉefhalon, li sin pretigis levi la pordokurtenon de la ĉambro de la avo, kiam li aŭdis plorplendadon de virino — lia kvina onklino. Poste elflugis kolera insultado kaj tusado.

“Mi antaŭ longe diris, ke vi prezentos farson al ni,” Juehui murmuris al si mem. Li ne levis la pordokurtenon.

“Tuj revenigu lin. Mi punos lin! ... Terure li kolerigis min!”

diris la avo kun tremetanta kaj kolera voĉo en la ĉambro. Sekvis kelktempa tusado, en kiu enmiksiĝis mallaŭta plorado de Kvina Onklino.

Keming jesadis sinsekve. Post kelkaj minutoj, je leviĝo de la pordokurteno, Keming elvenis kun ruĝiĝinta vizaĝo. Tiam Juehui jam eliris el la ĉefhalo.

Unu el la subaŭskultantoj ĉe la fenestro estis Shuhua. Vidante Juehui, ŝi alpaŝis kaj demandis, “Tria Frato, ĉu vi informiĝis pri la afero de Kvina Onklo?”

“Mi delonge scias,” diris Juehui, kapjesante. Li mallaŭte demandis Shuhua, “Kiel ili informiĝis pri tio?” Li montris per pintigita buŝo al la ĉambro.

Shuhua diris parade, “Kvina Onklo prenis konkubinon kaj luis propran loĝejon. Neniu el la familio sciiĝis pri tio. Li forprenis ĉiujn orajn kaj arĝentajn juvelaĵojn de Kvina Onklino, pretekstante ke li pruntedonos ilin por kopiado de la desegnaĵoj, sed longe ne redonis ilin. Kvina Onklino pridemandis lin kaj li ĉiam nur murmuris. Fine, kiam ŝi premis lin ĝis la ekstremo, li diris, ke li perdis ilin. Dum la lastaj du monatoj li forestis tuttage kaj revenis tre malfrue. Kvina Onklino okupiĝis pri ludado de maĝango kaj ne suspektis lin. Hieraŭ matene ŝi hazarde trovis virinan foton en lia poŝo. Demandate, li rifuzis eldiri la veron. Farante aĉetojn en la bazaro posttagmeze, ŝi hazarde vidis,

ke virino sidas en la palankeno de Kvina Onklo. Tiu virino eliris el la palankeno ĉe la pordo de la bazaro kaj servisto Gao Zhong sekvis ĝin. Hodiaŭ Kvina Onklino kun preteksto retenis Gao Zhong en la hejmo kaj premis lin eldiri la aferon de Kvina Onklo. Fine Gao Zhong diris la veron. El la juveloj, kiujn Kvina Onklo forprenis, iuj estas forvenditaj al lombardistoj kaj aliaj estas donacitaj al lia nova konkubino. Informiĝinte pri tio, Kvina Onklino malkaŝis la veron al la avo... La konkubino estas putino, kies kronnomo estas ‘Lundo’ ...”

Shuhua senĉese parolis, kvazaŭ ŝi neniam povus fini. Juehui montris neniom da scivolo pri tio, kion ŝi rakontis. Cetere li sciis pli multe ol ŝi. Li ja vidis propraokule Kvaran Onklon eniri en la “Rezidejon de Familio Gao”. Li sciis, ke la malplena granda familio suriras la vojon al degenero. Nenia forto povos retiri ĝin. Efikos nek klopodado de la avo nek tiu de iu ajn. Eĉ la avo mem jam suriris la vojon de pereco. Ŝajnis, ke nur ili staras sur la vojo kondukanta al lumo. Ankoraŭfoje li troige sentis, ke lia morala forto superas tiun de la disfalanta granda familio. Kuraĝigite de entuziasmo, li sentis, ke li neniam estis tiel ekscitita kiel hodiaŭ. Li kredis, ke la batalo inter patro kaj filo baldaŭ finiĝos. Tiuj, kiuj luktadas por akiri liberecon, amon kaj rajton de klerigo, ne plu renkontos mizeran finon. La epoko de Mei baldaŭ komplete neniigis kaj cedos al alia nova epoko — la epoko de Qin, aŭ pli ĝuste la epoko de Xu Qianru t. e. la epoko de li kaj Juemin. La forto de la juna

generacio absolute ne cedos al la malnova familio, dekadenco, malforta kaj entenanta eĉ diversajn pekojn. La venko estos certa kaj neniam forto povos depreni ĝin de ili. Li havis tian memfidon. Li abrupte ekskuis sian korpon, kvazaŭ volante forigi la pezan ŝarĝon de multjaraj suferoj de sur siaj ŝultroj. Li direktis sian fieran kaj malaman rigardon ĉirkaŭen. “Atendu kaj vidu. Via fino baldaŭ alvenos,” li pensis.

Kredeble Shuhua ne komprenis lian senton. Vidinte, ke Juehui ne respondis kaj ne interesigas pri tio, kion ŝi diris, ŝi silente foriris. Ŝi haste eniris en la ĉefhalon kaj ŝtelrigardis tra la pordo de la ĉambro de la avo.

Juehui reiris en sian ĉambron. Post nelonge, tra la fenestro li vidis Keming eniri kun Keding. Post momento aŭdiĝis la insultado de la avo en la ĉambro — evidente la avo riproĉis Keding. “Ne zorgu pri tio!” li pensis. La insultado ŝajne ĉesis. Ekster la fenestro multaj kuradis ir-reire, kvazaŭ io neatendita okazus. Juehui murmuris al si, “Mi jam diris, ke niaj familianoj ŝatas farson.”

Ekstere aŭdiĝis vokado. Viroj kaj virinoj spirege kuris.

“Rapidu, la avo tuj batos Kvinan Onklon!” ekscitite diris knabo al alvenanto, haltiginte kuradon ekster la fenestro. La knabo estis Juequn.

“Kial vi elkuris?” La demandanto estis Jueying.

“Mi venigu Sesan Fraton por rigardi! ... Plenkreskulo kia Kvina Onklo estas batota!” Juequn ridetante diris kaj forkuris.

“Plenkreskulo estas batota!” — tiuj vortoj ektuŝis la scivolon de

Juehui. Li eliris el la ĉambro kaj sin direktis al la ĉefhalo. Ĉe la pordo de la ĉambro de la avo, kvar aŭ kvin virinoj ŝtelrigardis kun klinitaj korpoj tra fendetoj de la pordokurteno. Ne volante aliĝi al ili, li iris de la ĉefhalo al la fenestro. Tie multaj starantoj subaŭskultis la interparolon en la ĉambro. Surgenuante en du seĝoj ĉe la fenestro, kelkaj gluis siajn vizagojn al la fenestropapero por kaŝrigardi tra truetoj en la papero.

Ne aŭdiĝis batado. Neniu estis batata.

“Vi jam estas patro de plenkreska filino, sed vi ne scias bone konduti ! Vi devus doni bonan ekzemplon al via infano ! Shuzhen, hontigu lin ke li, tiel senhonta, malindas esti via patro !” insultis la avo.

Aŭdinte tion, Juehui nereteneble subridis.

Dufoje tusinte, Grandsinjoro paŭzis momenton. Sekvis laŭta riproĉado

“Kia honto ! Por kio taŭgas via klereco ! Vi trompakiris de via edzino juvelojn kaj lombardis ilin. Kia skandalo ! Mi donas al vi limtempon de tri tagoj por reakiri ilin!” Post kelktempa riproĉado li fine diris, “Vi besto, mi dorlotis vin, ĉar vi estis saĝa infano. Mi neniam imagis, ke vi levos tian skandalon. Diru, en kio vi montris vian dankemon al mi? Vi trompis min, dum mi traktis vin kiel bonan filon. Vi, vi bruto! Frapu vian vangon! Mem fapu!”

“Paĉjo, mi eraris. Pardonu min pro mia unua mispaso. Mi

neniam kuraĝos tion ripeti,” petis Keding kun kompatinda voĉo.

“Ne , mi ne indulgos vin ! Vangofrapu vin mem !” tondris Grandsinjoro, frapante la tablon.

Aŭdiĝis klare vangfrapado. Motivite de scivolo, Juehui reeniris en la ĉefhalon kaj iris al la pordo de la ĉambro. Li mallaŭte diris, “Mi vidu.” Li milde forpuŝis Shuhua, kiu rigardis tra la fendeto de la pordokurteno kun klinita korpo. Li alproksimiĝis al la pordokadro kaj atente rigardis internen.

Surgenuante , kun rektigita torso, Keding alterne frapadis siajn vangojn per ambaŭ manplatoj. Lia blanka, regultrajta kaj longa vizaĝo estis senĉese frapadata ĝis ruĝiĝo , honte antaŭ sia edzino kaj filino.

“Ĉesu!” ordonis Grandsinjoro. Keding tuj retiris la manojn.

“Respondu, de kie alvenas viaj nutraĵoj, vestoj kaj aliaj necesajoj?” demandis Grandsinjoro.

“Ĉiuj estas donitaj de vi, paĉjo,” respondis Keding.

“Cu vi scias, ke se oni mallaboreme sidas kaj manĝas, la tuta ricaĵo estos forkonsumita? Vi bruto, se mi mortos, de kiu vi dependos?” Ju pli Grandsinjoro parolis, des pli kolera li fariĝis. Li ordonis, “Denove vangofrapu ! Pli peze !”

Keding levis la manon kaj frapadis la vangon.

Sed la humiligo ankoraŭ ne kontentigis Grandsinjoron, kiu daŭre insultadis. Fine li volis, ke Keding konfesu, kiel li konatiĝis kun

malbonaj amikoj, devojiĝis kaj rilatiĝis kun ĉiesulino, kiel li luis malgrandan rezidejon por ŝi kaj kiel li trompakiris el sia edzino juvelojn kaj lombardis ilin.

Keding senĉese elverŝis ĉion, kion li faris, ĵetis insultojn al si mem, kaj eĉ malkaŝis al sia patro multajn aferojn, kiujn tiu antaŭe ne suspektis. Li konfesis, ke li prunteprenis monon en la nomo de sia patro. Li listigis unu post alia la ŝuldojn, kiujn li devis repagi, kaj eĉ ŝuldojn en hazardludoj. Fine li denunciis Ke-an. Li diris, ke Ke-an donis helpon al lia agado kaj parte respondecis pri tiuj ŝuldoj. Unuvorte li elverŝis ĉion, kion li povis. Tio estis ekster la atendo ne nur de Grandsinjoro, sed ankaŭ de Juehui.

En Kvina Onklo Keding kaj sia frato Juemin, Juehui rekonis du tute malsamajn tipojn. Kvankam sin lokante en sieĝo de malamikoj, Juemin, 19-jara junulo, inspirate nur de kredo kaj entuziasmo, ĉiospite kaj brave luktadis kontraŭ la malfavora medio kaj senarmigis la familion kontraŭ li. Keding, 33-jara viro, kiu havis 13-jaran filinon, ec genuis sur la tero kun rektigita torso, frapis siajn vangojn, superŝutis sin per insultoj, humiligis sin mem kaj kompromitis aliajn. Ĉu agmaniere ĉu parole, li montris nenian rezistemon. Li senhezite faris, kion lia patro ordonis, kvankam li fakte ne kredis liajn vortojn. Sub la sama minaco de la obstina maljunulo, la tipoj de du generacioj kondukis tute malsame ! Unu, forlasinte la hejmon kaj sin kaŝante en malgranda

ĉambro aliloke, insistis pri sia propra opinio kaj per tio vanigis la ordonon de la avo ; la alia, genuante antaŭ la maljunulo, kondukis malkuraĝe kaj hipokrite, servante al aliaj kiel primokindajo. Tiel pensante, Juehui ne povis ne senti fieron kaj ĝojon pro sia propra generacio. Li pensis, “Tia homo nur troviĝas en via generacio, sed ne en la nia.” Sin turninte, li foriris.

“Bruto, de kie vi povas akiri monon por kovri tiom da ŝuldoj? Ĉu vi opinias min milionulo? Nun ĝenas inundo, militkonflikto, banditoj kaj alta agroimposto. Se ni malŝparus monon kiel akvon kaj senfare konsumus tiamaniere kiel vi, kiel longe mia riĉaĵo povus daŭri? Kio restos por la sekvanta generacio? Ĉu vi ne donos doton al via filino Shuzhen, kiam ŝi edziniĝos? Ĉu vi taŭgas kiel ŝia patro!” Insultante, Grandsinjoro laŭte tusadis.

Poste li ordonis, ke Shuzhen venigu Ke-an. Li volis severe riproĉi lin. Post nelonge Shuzhen revenis kaj diris, ke li ne estas hejme. Sekve de tio lia kolero pliiĝis. Frapante la tablon, li insultis tiun kaj ĉi tiun. Kaj denove Keding fariĝis lia insultato. Malgraŭ tio, Grandsinjoro neniel povis kvietigi sian koleron. Li demandis Shuzhen, “Kie estas via Kvara Onklino? Venigu ŝin.”

Sinjinorino Wang de la kvara familibranĉo subaŭskultis ĉe la fenestro. Ŝi volis fuĝi, sed estis tro malfrue. Kiam Shuzhen eliris kaj vokis ŝin, ŝi devigite streĉis sian kuraĝon por eniri , kvankam ŝi iom timis.

“Ĉu paĉjo vokas min?. ..” Sinjorino Wang respektoplene demandis kun altrudita rideto.

Grandsinjoro laŭte demandis ŝin, “Kien Ke-an iris?” Ŝi respondis ke ŝi ne scias. Li demandis, kiam Ke-an revenos. Ŝia respondo estis la sama.

“Kial vi scias nenion pri li, via edzo? Kia stultulino !” Grandsinjoro ekfrapis la tablon kaj riproĉis.

Sinjorino Wang ne havis konvenajn vortojn por respondi. Kun klinita kapo ŝi sentis kaj honton kaj koleron. Ŝi ŝajne vidis sinjorinon Shen fari grimacon kontraŭ ŝi, sed kiel bofilino, ŝi ne rajtis fari moveton antaŭ Grandsinjoro. Ŝi eklarmis, sed ŝi nenion sonon kuraĝis eligi. Ŝi devigite englutis siajn larmojn.

Denove Grandsinjoro tusadis forte kaj kelkfoje sputis mukaĵon. Sinjorino Chen, kun turnita korpo, masaĝe frapetadis sur lia dorso per la pugnoj, dirante, “Ne kolerdifektu vian sanon pro ili. Ili ne indas tion.”

Post longtempa tusado Grandsinjoro reakiris sian spiron. Lia kolero jam malaperis . Li estis subite kaptita de nespertita malĝojo kaj baldaŭ konkerita de ĝi. Li sentis ekstreman lacon. Li nur emis ripozi kun fermitaj okuloj, volante vidi nenion. Klininte sin malantaŭen kontraŭ la dorsapogilo de la sofo, li mansvingis al la starantoj antaŭ si, dirante, “Vi ĉiuj foriru. Neniu restu. Mi ne toleras vidi vin.” Li eligis longan vespiron.

Aŭdinte tiun longe atendatan ordonon, ĉiuj tuj retiriĝis el la ĉambro. Ankaŭ Keding stariĝis el sia surgenua pozicio kaj eliris ŝtelpaŝe. En la ĉambro restis nur Grandsinjoro kaj lia kromedzino, sinjorino Chen.

Grandsinjoro, dezirante ripozi sola kviete, forsendis ankaŭ sian kromedzinon. Kuŝante sur la sofo, li ete anheladis kun okuloj duonmalfermitaj. Multaj malhelaj homfiguroj sin alpuŝis kaj preterflugis liajn okulojn. El ili li ne trovis eĉ unu afable ridetantan vizaĝon. En lia malklara vizio liaj filoj diboĉis, grumblis kontraŭ li kaj primokis lin; liaj nepoj fiere iris sur la nova vojo. Juemin eĉ malobeis al lia ordono kaj siavice li estis senpova puni la junan ribelanton. Kaj li mem kuŝis tie senforta kaj kaduka, izolita kaj sen prizorgo far aliaj. Li neniam sentis tian solecon kaj malesperon kiel nun.

Li pripensis kiel li kreis la grandan familion kaj ties riĉan posedaĵon kaj kiel li despote aranĝis kaj komandis ĉion, kontente manovrante kun la celo prosperigi la familion tagon post tago. Sed lia klopodado kaŭzis al li la hodiaŭan solecon. Kvankam hodiaŭ li volis teni la situacion per sia lasta peno, tio tamen pruviĝis neebla. Evidente la familio nun troviĝas sur la subira vojo. La fina elnodiĝo estis antaŭvidebla. Kvankam li ne deziris, ke tio okazu, li tamen ne kapablis malhelpi kun malplenaj manoj. Li mem estis jam finita. Neniu kredis lin, sed male ĉiuj trompis lin. Ĉiu el ili prenis sian propran vojon. Eĉ Keding, kiun li plej ŝatis, faris tiun hontindan aferon. Kaj ankaŭ Ke-an. Ili ĉiuj kovas

sonĝon ! Se la familio Gao disfalus, ĉu ili havos rimedon por vivteni sin? Kia estonteco atendas tiujn famili-ruinigantojn, kiuj nur scipovas forkonsumi ĉion senfare? Ĉio estas perdita, ĉio estas perdita ! Antaŭe li revis pri la brila perspektivo de “kvar generacioj sub la sama tegmento”. Sed post kiam la revo realiĝis, kian elreviĝon li ricevis nun!

Malespero, disreviĝo kaj mallumo atakis lin, kiu kuŝis senforta. Neniu donis atenton al li kaj dividis lian malĝojon kaj forlasitecon. Tiumomente li ekkomprenis sian veran pozicion en la familio. Li sentis, ke li jam perdis ne nur sian fieron, sed ankaŭ ĉion, de kio li dependis en la vivo. La unuan fojon li sentis malesperon, disreviĝon kaj mallumon, kaj sentis ke li verŝajne misfaris. Sed li ne sciis, en kio li misfaris. Kaj eĉ se li sciis, jam estis tro malfrue.

Ĉe liaj oreloj kvazaŭ sonis kverelado inter Keding kaj lia edzino. Li ankaŭ ŝajne aŭdis multajn malkonkordajn rumorojn. Sinjorino Shen, kun abundaj larmoj sur la vizaĝo, malfermis sian larĝan buŝon kaj diris, “Paĉjo, mi metu ĉion mian sub vian decidon.” Vangofrapante sin, Keding diris kun kompatinda mieno, “Ili ĉiuj diris, ke mia paĉjo repagos miajn ŝuldojn. Ĉiaokaze nia familio estas la plej riĉa en la distrikto ĉe la Norda Pordego. Ni havas neelĉerpeblan monon.” Li hasteme mankovris siajn orelojn, sed la bruoj ankoraŭ entrudiĝis tra ili senkompate. Lia cerbo estis tute konfuzita de ili. Li volis stariĝi kaj iri aliloken por eviti ilin. Post kelkaj provoj, premante mane la braka-

pogilon de la sofo, li sukcesis kun granda peno stariĝi. Li faris du paŝojn al la lito. Subite kapturniĝo kaptis lin. La ĉambro ekturmiĝis renverse kaj pro tio ankaŭ li ŝanceliĝis. Mallumo alpremiĝis al liaj okuloj kaj li sciis nenion plu ĝis sinjorino Chen akute vekis lin konsternite.

34

Grandsinjoro Gao malsaniĝis.

En la lito li ĝemadis. Kelkaj famaj kuracistoj estis venigitaj por kuraci lin. Bovlo post bovlo da nigra kaj amara dekoktaĵo el strangaj drogherboj estis englutitaj de li. Du tagoj pasis. Kvankam la kuracistoj diris, ke la malsano ne estas serioza, tamen post kiam Grandsinjoro prenis la dekoktaĵon, lia malsano pligraviĝis. La trian tagon li rifuzis engluti ĝin. Pro insisto de Keming kaj Juexin li tamen prenis iom.

Dum kelkaj sinsekvaj tagoj, anstataŭ iri al sia advokata oficejo, Keming restis hejme por akompani kuracistojn kaj zorgi pri donado de dekoktaĵo al Grandsinjoro. Li jam konfidis sian oficejon al la sekretario, petante, ke tiu sin turnu al alia advokato Chen Kejia, kiam helpo estos bezonata en la oficejo.

Kelkfoje Ke-an sin ekzercis en kaligrafio kaj verkis poemojn, kelkfoje vizitis operejon kaj kelkfoje iris al “Rezidejo de Familio Gao” por sin amuzi. Dume, profitante de la tempo, kiam Grandsinjoro tute perdis la povon jungi lin pro malsano, Keding tuttage ludis maĝangon kaj amindumis virinojn en “Rezidejo de Familio Gao”. Li restis hejme nur matene kaj nokte, ĉar li devis iri al Grandsinjoro por lin saluti laŭregule dum tiuj du tempopunktoj.

La malsano de Grandsinjoro ne alportis grandan tumulton al la familio. Kiel antaŭe, oni ankoraŭ ridis, ploris, kverelis kaj batalis unu kontraŭ alia. Eĉ tiuj malmultaj, kiuj sin montris melankoliaj pro lia malsano, opiniis la malsanon negrava, malgraŭ ke li malsaniĝis pli kaj pli serioze, pliĝuste, li malfortiĝis kun ĉiu tago.

Ĉar la drogherboj ne multe efikis kontraŭ la malsano de Grandsinjoro, oni sin turnis al superstiĉo por helpo. Ĉe iuj ofte estas tiel, ke kiam ilia kredo al homoj ekŝanceliĝas, ili sin turnas al dioj por helpo. La tiel nomata helpo de dioj ne estas tiel simpla kiel votado kaj sortokonsultado per lotoj, sed alprenas kompleksan formon. Tio estas elpensita de simplaj kapoj kaj nur aliaj simplaj kapoj povas kompreni ĝin. Tamen nun ĝi estis elmetita de sinjorino Chen, kiu zorgis pri Grandsinjoro, aprobita de sinjorinoj kaj praktikita sub prezidado de sinjoroj, kiuj estis konsiderataj kiel kleruloj bone konantaj “la librojn de sanktuloj kaj saĝuloj”.

Komence de la ceremonio kelkaj taoistoj preĝadis, frapante tamburon kaj cimbalojn. Dum profunda nokto sinjorino Chen preĝante benopetis sola en la korto. Juehui klare vidis ŝian agadon tra fenestra vitro antaŭ altaro kun naŭ incensbastonetoj kaj paro da kandeloj brulantaj, la nete tualetita sinjorino Chen en ruĝeta jupo fojrefoje surgenuiĝis kaj riverencis, preĝante. Forpasis unu nokto, du noktoj, tri noktoj... La rezulto estis — “Diablo prenu!” Juehui sakris al ŝi. “Vi nur taŭgas por fari tian

aferon ! "

Alia speco de la ceremonio estis oferado fare de Keming, Ke-an kaj Keding. Ankaŭ ĝi okazis en profunda nokto. En la korto staris altaro, sur kiu metiĝis altaj kandeloj, dikaj incensbastonetoj kaj oferitaj fruktoj. Ĉi tiu okazaĵo estis multe pli solena. La troa seriozeco de tiuj sinjoroj, kiuj prezidis la oferadon, donis komikan impreson. Ankaŭ ili surgenuiĝis kaj riverencis kiel sinjorino Chen, sed ili finis tre rapide, ne longigante la procedon kiel ŝi. Tamen Juehui observis ilian surgenuan riverencadon kaj tiun de sinjorino Chen kun la sama sento kaj donis al ili la saman komenton — “Diablo prenu!” Laŭ lia konstato Ke-an antaŭ kelkaj horoj ankoraŭ rigardis prezentadon de sia amata aktorino en teatro, dum Keding ludis maĝangon kaj trinkis vinon en “Rezidejo de Familio Gao”. Sed nun ili surgenuis tie, legante preĝojn, ke ili volonte mortos anstataŭ sia patro.

Ĝuste kiam Juehui pensis, “Tio estas ĉio, kion vi kapablas fari, nova speco sekvis. En liaj okuloj tiu speco vere estis nova, ĉar ĉi-foje ne temis pri “diablo prenu !” kiel li komentis antaŭe, sed “kapti diablon”— sorĉisto estis invitita por kapti la diablon.

Iun vesperon, kiam la nokta vualo apenaŭ falis, ĉiuj ĉambropordoj de la familio Gao estis firme fermitaj. La tuta kortodomaro ŝajnis senhoma templo. Sorĉisto kun pinta vizaĝo venis. Kun pendantaj nekombitaj haroj kaj en stranga ornatu, li disŝutis brulantan rezinan

pulvoron laŭvoje, tute simile kiel en teatraĵo. En la korto li kuris tien kaj ĉi tien, gestante kaj eligante korŝirajn kaj timigajn kriojn. Enirinte en la ĉambron de la malsanulo, saltetante kaj kriante, li renversis objektojn kaj eĉ ŝutis brulantan rezinan pulvoron sub la liton. Malgraŭ ke la malsanulo en la lito eligis pli laŭtan ĝemadon pro pli granda sufero kaŭzita de la bruado kaj teroro, la sorĉisto faris sian laboron pli kaj pli fervore. Li eĉ faris minacajn gestojn al la malsanulo, tiel ke tiu surprizite kriis. La tutan ĉambron okupis densa nigra fumo, krakantaj fajreroj kajodoro de brulanta rezino. Tiu kaoso daŭris proksimume unu horon, antaŭ ol la sorĉisto hurle eliris. Post kelka tempo homvoĉoj revenis al la korto.

Tamen prezentiĝis dua programero de la sorĉisto. Laŭdire, ne sufiĉis, ke li kaptis nur la diablon en la ĉambro de la malsanulo. En la kortodomaro troviĝis diabloj ĉie — multaj en ĉiu ĉambro. Estis decidite, ke oni okazigu ĝeneralan priserĉadon por kapti ĉiujn diablojn en ĉiuj ĉambroj la sekvan vesperon. La sorĉisto diris, ke se ĉiuj diabloj estos kaptitaj, Grandsinjoro tute resaniĝos.

Iuj ne kredis lian aserton kaj aliaj ne konsentis, ke li kaptu diablojn duan fojon, sed neniu kuraĝis kontraŭstari. Keming kaj Juexin ne aprobis tiun faron. Tamen sinjorino Chen decideme insistis pri tio; la sinjorinoj konsentis; Ke-an kaj Keding diris, “Ne gravas, se oni provos.” Keming kontraŭvole kapjesis kaj Juexin ne kuraĝis nei. Kvankam Juehui estis

sufiĉe kuraĝa kontraŭdiri, tamen neniuj staris ĉe lia flanko.

La duafoja farso prezentiĝis je la difinita tempo. Ĉiuj ĉambroj ricevis la ridindan sed samtempe timigan turmentadon. Iuj evitis, infanoj ploris, virinoj vespiris kaj viroj skuis la kapon.

Juehui sidis en sia ĉambro. Kvankam lignotabula vando baris lian vidon, li tamen povis orele “vidi” la tumultadon en la ĉambro de Juexin. Li aŭdis ankaŭ korŝiran kriadon. Li pleniĝis de indigno, sentante, ke lia korpo ne povas moviĝi pro subpremo. Li volis stariĝi kaj liberigi sin de la peza subpremado. Li ne povus partopreni en la absurda farso. Decidinte, li atendis malantaŭ fermita pordo.

Post nelonge la sorĉisto venis al la pordo de la ĉambro de Juehui. La pordo estis firme riglita — en la tuta kortodomaro nur tiu pordo estis firme fermita. La sorĉisto frapis sur la pordo kaj kelkaj servistoj helpis frapi, sed ne efikis. Ili komencis pugnobati la pordon, vokante, “Tria Sinjorido”, sed neniom efikis. Interne de la ĉambro Juehui laŭte diris, “Mi ne malfermos la pordon . Ne estas diabloj en mia ĉambro.” Li alpaŝis al la lito kaj kuŝiĝis, mane kovrante siajn orelojn por rezisti kontraŭ la ekstera vokado.

Subite iu perforte skuis la pordon. Juehui stariĝis el la lito kun ruĝiĝinta vizaĝo. Li ŝajne vidis la distaŭzitajn harojn kaj larmomakulitan vizaĝon de Mingfeng. Li forte koleriĝis. Irinte al la pordo, li laŭte kriegis, “Mi ne malfermos la pordon ! Kion finfine vi volas fari per

viaj fiaj agoj ?”

“Juehui, tuj malfermu la pordon,” estis la voĉo de lia tria onklo Keming.

“Tria Sinjorido, tuj malfermu la pordon,” aŭdiĝis la voĉo de sinjorino Chen.

“Bone, vi venigis viajn helpantojn,” pensis Juehui. Li indigne kontraŭdiris, “Mi ne malfermos!” Kun pugnoj kunpremitaj, li paŝadis en la ĉambro. Li sentis, ke lia cerbo tuj krevos. Li murmuris al si plurfoje, “Mi malamas ! Mi malamas ! ...”

La eksteraj voĉoj ne malstreĉiĝis, sed male pli kaj pli fortiĝis, pli kaj pli laŭtiĝis . Kaj plie la homoj ekster la pordo kriadis indigne.

“Tria Sinjorido, ĉu vi ne konsideras la malsanon de via avo? Ĉu vi ne volas, ke li resaniĝu pli frue? Kial vi ne malfermas la pordon? ... Kiel respektomanka nepo vi estas!” Juehui rekonis la akutan voĉon de sinjorino Chen en la bruoj. La malplaĉa voĉo, kun nerezistebla forto, frapis lin kaj li sentis sin vundita. Lia indigno kreskis.

“Juehui, vi devas esti racia. Ĉiuj esperas, ke via avo resaniĝos. Estu prudenta. Tuj malfermu la pordon. ..” Alia voĉo interrompis la parolon de Keming.

“Tria Frato, tuj malfermu la pordon. Mi havas vortojn por diri al vi,” aŭdiĝis la voĉo de Juexin.

Juehui malĝoje diris en si, “Ankaŭ vi tiel diras ! Ĉu ne sufiĉas, ke

vi mem fariĝis malkuraĝulo?” Li sentis, ke lia koro tuj krevos.

“Nu , mi malfermu por vi,” li diris al si kaj malfermis la pordon. Tuj kiam la pordo malfermiĝis, aperis kelkaj vizaĝoj ruĝiĝintaj pro kolero. Ili volis sin alpuŝi en la ĉambron. La sorĉisto nature estis la unua.

“Momenton!” Juehui retenis lin. Li staris ĉe la pordo, kvazaŭ li defendus montpasejon. Ankaŭ lia vizaĝo ruĝiĝis. Kaptite de indigno kaj inspirite de entuziasmo, li tute forgesis, ke inter ili estas liaj geonkloj kaj pliĝa frato. Li indigne kaj malestime demandis, “Kion finfine vi volas fari?” Lia malama rigardo balais ilian vizaĝon.

La demando embarasis ilin. Keming kaj Juexin ne inklinitis diri, “kapti diablojn”, ĉar ili tute ne kredis tion.

“Kapti diablojn por via avo,” diris la parfumita sinjorino Chen, kiu paŝis antaŭen, mansignante, ke la sorĉisto eniru.

“Kapti diablojn? Al diablo!” Juehui sputis la insulton sur ŝian vizaĝon. “Laŭ mi, vi ne volas kapti diablojn, sed vi deziras, ke la avo mortu pli frue. Vi timas, ke li ne mortos pro malsano. Vi volas kolerigi kaj timigi lin gismorte!” li sakris spiteme.

“Vi...” Keming ne povis daŭrigi sian parolon. Li paliĝis pro kolero, balbutante.

“Tria Frato!” Juexin vokis por haltigi la parolon de Juehui.

“Rilate al vi, vi devus honti pri vi mem!” diris Juehui, fikse

rigardante la vizaĝon de Juexin, “Kiel edukita homo, vi ne devus fariĝi tiel stulta. Iu malsaniĝas, kaj vi turnas vin al sorĉisto. Eĉ se vi perdis racion, vi ne rajtas ludi kun la vivo de la avo. Lastnokte mi propraokule vidis ke la sorĉisto tiel teruris lin. Vi pretendas esti liaj amplenaj filo kaj nepo, sed kiam li malsaniĝas, vi ne lasas lin kvieta ! Lastnokte mi propraokule vidis la farson pri kaptado de diabloj . Mi volis vidi, kiel vi turmentas lin per tiu farso, kaj mi vidis. Vi faris tumulton dum la tuta lasta nokto, sed vi ne kontentiĝis pri tio. Vi volas tion daŭrigi ĉi-vespere. Bone, mi donu vangofrapon al tiu, kiu kuraĝos eniri en mian ĉambron. Mi ne timas vin!” Juehui unuspire eldiris tiujn vortojn kun indigno, sed li ne konsciis, ke li parolas kun tro ofenda tono. En ordinaraĵ tagoj tiaj incitaj vortoj eble alportus al li multe da implikaĵoj. Sed nun ĝuste pro tio, li gajnis venkon. Starante ĉe la pordo, li tre firme plantis sian korpon sur la tero kaj etendis la brakojn por bari la vojon. Li aspektis tre serioza kaj pafis fieran rigardon. Kun plena fido pri sia praveco, li tute ignoris ilin. Li pensis: “Se vi mem volas fari tiun fiaĵon, kial mi respektu vin!”

Keming ruĝiĝis de honto. Li komprenis, ke Juehui diris la veron. Li, kiu antaŭe studis en Japanio kaj nun estis fama advokato en la provinca ĉefurbo, nature ne kredis je la rimedo “kapti diablojn” kaj ankaŭ sciis, ke ĝi alportos nenian bonon. Tamen por ke li hejme ne implikiĝu en malagrablan disputadon kaj rikoltu la renomon de “bona filo”

ekstere de la familio, li eĉ faris, kion li ne volis. Tiutempe, estis vere, ke li ne zorgis pri la trankvilo de la malsanulo nek konsideris pri la farto de la malsanulo, kaj plie li propraokule vidis pasintnokte kian influon sur la malsanulo la rimedo “kapti diablojn” havis... Nun li ne havis pravigon nek kuraĝon por riproĉi Juehui. Fingromontrante al Juehui, li diris, “Vi, vi. ..” , kaj post tio, sin turninte, li foriris silente.

Juexin sentis kaj koleron kaj penton. Liaj larmoj elfluis, sed li ne forviŝis ilin. Vidinte, ke Keming foriras, ankaŭ li forŝteliĝis.

En ordinaraĵ tagoj sinjorino Chen ĉiam montris sin aroganta, pro la potenco kaj influo de la avo, sed nun vidinte, ke Keming foriras, ŝi nenion plu diris, kvazaŭ perdinte sian subtenanton. Ŝi kredis je la rimedo “kapti diablojn” kaj ŝi zorgis pri la malsano de Grandsinjoro, tial ŝi tute ne povis kompreni, kion Juehui diris. Ŝi malamamis lin, ĉar li perdis sian vizaĝon antaŭ aliaj. Sed se ŝi alfrontus sola kontraŭ Juehui sen ĉeesto de Grandsinjoro kaj Keming, ŝi ne povus lin superi . Ŝi ĵetis kelkajn neprovokajn insultojn al Juehui kaj foriris kun honto, svingante sian korpon. Sed en la koro ŝi insultis la nepon, kiu ne amis nek respektis sian avon.

Post kiam sinjorino Chen foriris, la aliaj tuj disiĝis. Neniu helpis la sorĉiston . Kvankam li grumblis kaj iu servistino kaŝe plendis pri Juehui, tamen ĉifoje Juehui gajnis plenan venkon. Tio estis ekster lia atendo.

35

Tiun nokton Juehui dormis bonege. La sekvan matenon li iris vidi la malsanan avon. Li pensis, ke tiu almenaŭ ĵetos al li kelkajn insultojn.

La kulovualo estis duone levita, kaj oni povis vidi la torson de la avo. Li kuŝis surflanke kun sia eksteren turnita kapo sur alta kapkuseno. Lia sensanga kaj malgrasa vizaĝo aspektis des pli magra. Lia buŝo iom malfermiĝis. Saliveroj brilis sur ambaŭ pintoj de lia liphararo en formo de inversa V. Kalva kiel antaŭe, li havis super la altaj vangostoj paron da grandaj kaviĝintaj okuloj, kiuj jen fermiĝis jen malfermiĝis. La avo nun sin montris tre malforta kaj kompatinda kun nenia signo de la antaŭa majesta kaj timiga Grandsinjoro Gao.

La avo spiradis malfacile. Kiam li vidis Juehui alproksimiĝi, li larĝigis siajn okulojn por atente rigardi lin. Iom post iom li montris rideton kvankam malfortan kaj triste impresantan.

“Jen vi venis,” diris la avo. Li neniam parolis tiel afable al Juehui.

Juehui jesis. Li ne komprenis, kial la avo subite fariĝis tiel bonkora.

“Venu al mi,” la avo pene diris kun altrudita rideto. Juehui alproksimiĝis al la lito.

“Donu al mi duontason da teo,” diris la avo.

Irinte al la kvadrata tablo, Juehui elverŝis duontason da varma teo kaj alportis ĝin antaŭ la avon. Kiam la avo levis la kapon, li tuj prezentis la

tason ĉe lian buŝon. Malfacile trinketinte iom da teo, la avo skuis la kapon, dirante, “Jam sufiĉe.” Kaj li lace kuŝiĝis . Juehui remetis la tason sur la tablon kaj reiris al la lito de la avo.

“Vi estas tre bona,” la avo intermite diris kun malforta voĉo, post kiam li rigardis Juehui longan tempon. “Ili diris, ke ... vi havas strangan temperamenton... Diligente lernu.”

Juehui restis silenta.

“Mi nun iom komprenas,” malrapide diris la avo, elspirinte. “Ĉu vi vidis vian duan fraton?”

Juehui rimarkis ŝanĝiĝon en lia voĉo kaj vidis du grandajn larmogutojn ĉe liaj okulanguloj. Pro la neatendita afableco kaj amemo, kiun li neniam antaŭe ricevis de la avo, li elbuŝigis la vorton “jes”.

“Mia... mia temperamento... Nun mi ne montros mian koleron plu... Mi volas vidi lin. Venigu lin ... Mi ne plu...” diris la avo. Li eltiris la dekstran manon el sub la litkovrilo kaj forviŝis per ĝi siajn larmojn.

SinJORINO Chen, kiu ĵus finis kombi siajn harojn, pudri kaj farbi siajn brovojn,. eniris el la najbara ĉambro. Vidinte la situacion, si riproĉis Juehui, “Tria SinJORido, vi estas sufiĉe granda por esti prudenta. Vi ne devas ĉagreni vian avon, ĉar Ii estas grave malsana.” Ŝi ankoraŭ memoris la pasintnoktan okazaĵon.

“Ne riproĉu lin,” haste diris la avo, retenante ŝin. SinJORINO Chen

malĝoje paŭtis kaj silentiĝis. La avo urĝis Juehui, dirante, “Tuj revenigu vian duan fraton... Portempe oni ne parolos pri la gefianĉiĝo ... Mi timas, ke mia vivo ne daŭros longe ... Mi volas vidi lin... vidi vin ĉiujn.”

Juehui eliris el la ĉambro de la avo. Anstataŭ iri eksteren, li eniris en la ĉambron de Juexin. Tiu kaj Ruijue interbabilis. Ili ambaŭ portis malĝojon sur la vizaĝo.

“La avo petis min revenigi Duan Fraton. Li diris, ke oni portempe ne parolos pri la gefianĉiĝo,” ĝoje diris Juehui.

Juexin demandis kun miro kaj ĝojo, “Ĉu vere?” Li apenaŭ kredis siajn orelojn.

“Kompreneble. La avo diris, ke nun li ekkomprenas,” Juehui fiere diris. “Mi diris, ke ni triumfos. Jen ni triumfas finfine!” Li ekridis tre ĝoje.

“Diru al mi, kiel li diris al vi,” Juexin ridetante stariĝis kaj ekprenis la manon de Ruijue, kiu tamen volis retiri ĝin, sed li jam kaptis ŝian manon per la sia. La geedzoj tre ĝojis. La granda problemo solviĝis tiel facile, kio al ili ŝajnis miraklo. Ili pensis, ke ĝi alportos al ili feliĉon.

Juehui ripetis, kion lia avo diris al li. Juexin kaj lia edzino atente aŭskultis. Ju pli Juehui parolis, des pli ĝoja li fariĝis. Antaŭ ol li finis paroli, la pordokurteno leviĝis kaj servistino eniris, dirante, “Grand-

sinjoro vokas Unuan Sinjoridon.” Juexin tuj eliris.

Juehui restis kaj babiladis kun sia bofratino. Poste, kiam Haichen eniris, kondukate de la mamnutristino, Juehui ludis kun li kelkan tempon.

Juehui rapidis al la loĝejo de Juemin — li vere kuris tien. Komence, kiam li estis hejme, li ne sentis urĝemon. Li pasigis iom da tempo per ĝoja babilado. Nur kiam li surstratiĝis, li trovis, ke li prokrastis la aferon kaj li estus devinta sciigi Juemin pri la novaĵo pli frue.

La novaĵo alportis grandan ĝojon al Juemin. Interŝanĝinte ĝojajn vortojn, ili urĝe forlasis la hejmon de Huang Cunren.

Unue ili iris al Qin. La novaĵo alportis al ŝi grandan ĝojon, kiel ili atendis. La brila estonteco staris antaŭ la to gejunuloj pli proksime ol iam antaŭe. Ŝajnis, ke ĝi staras tuj ĉe iliaj manoj kaj ili povas preni ĝin post eklevo de la mano. Ĝi aperis ne kiel miraklo, sed kiel rekompenco de ilia multjara suferado kaj rezulto de la luktado. Tial ĝi estis pli kara por ili .

Tiamaniere ili pasigis tempon en ekscita babilado. Poste Juemin kaj Juehui malrapide sin direktis hejmen. Juemin preparis vortojn por diri al la avo, al la duonpatrino kaj al sia Granda Frato. Li pleniĝis de ĝojo. Li opiniis, ke li revenas en triumfo.

Juemin eniris tra la pordo, trapasis la halon kaj fine atingis la internon de la korto. Li trovis nenian ŝanĝon. Lia hejmo aspektis same

kiel antaŭe. Li pensis, ke la hejmo almenaŭ iom ŝanĝiĝis. Kial ŝi aspektis same kiel antaŭe?

Tamen li fine trovis ŝanĝon. En la ĉambro de la avo ŝajne okazis tumulto. Iuj eniris kaj aliaj eliris, ĉiuj haste, kun konsterna vizaĝesprimo, ne kuraĝante laŭtigi sian voĉon.

“Kio okazas?” demandis Juehui mirigite. Ekpreninte la brakon de Juemin, li rapide iris, tirante lin. Antaŭsento subite kaptis lin kaj lia animstato tuj ŝanĝiĝis.

“Verŝajne la.. avo..” La gorĝo de Juemin estis ŝtopita. Lia koro komencis tremeti. Li timis, ke la espeso, kiu ŝajnis tiel proksima, jam forflugis.

La du fratoj eniris en la ĉambron de la avo, kie estis plena de homoj. Ili ne povis vidi la avon, ĉar antaŭstarantoj baris al ili la vidon. Ili ŝajne aŭdis strangan mallaŭtan sonon. Neniu donis atenton al ili, kiuj fine sukcesis interpuŝiĝi tra la homamaso. Ili vidis, ke la avo sidas sur la sofo antaŭ la lito, spasme spirante kun klinita kapo. Tio estis la stranga sono, kiun ili aŭdis. Ili ne komprenis kio okazis al li.

Vidinte tion, Juemin ne povis sufoki impetan emocion. Li volis sin ĵeti sur la korpon de la avo. Keming retenis lin. Keming mirigite ekrigardis lin, sed restis silenta, nur skuante la kapon.

“La avo petis min revenigi lin. Li volas vidi lin,” Juehui diris al Keming, alpaŝinte.

“Jam tro malfrue,” Keming mallaŭte diris, malĝoĝe skuante la kapon.

“Tro malfrue!” la vortoj peze frapis la kapon de Juehui. Li apenaŭ komprenis ilian signifon. Tamen vidante la avon spasme spiradi, li ekkomprenis, ke nun estas vere tro malfrue. Ili — la avo kaj la nepo — disiĝos por eterne sen interkompreniĝo.

Ne povante regi sin, Juehui ĉionspite rapidis antaŭ la avon. Skuante lian manon, li laŭte kriis, “Avo, avo! Mi jam revenigis Duan Fraton !”

La avo nur malpeze spiradis en spasmoj anstataŭ doni respondon.

Juexin kaj aliaj volis fortiri Juehui, sed tiu simple alpremis sin al la genuoj de la avo. Skuante lin, Juehui malĝoĝvoĉe vokis, “Avo!” Starante apud Juehui, Juemin atente rigardis lin.

Subite la avo vespiris kaj large malfermis siajn okulojn. Li rigardis Juehui, kvazaŭ li ne konus sian nepon. Li mallaŭte demandis, “Kial vi faras bruon?” Li levis la manon kaj mansvingis, ke Juehui foriru.

Kun kapo supren levita, Juehui fikse rigardis lian malgrasan vizaĝon. Iom post iom la nebuleco malaperis el la vizaĝo de la avo. Liaj lipoj malfermiĝis. Ŝajnis, ke li volis paroli, sed nenio elvenis el lia buŝo. Li turnis la kapon kaj rigardis Juemin. Liaj lipoj denove moviĝis. “Avo!” Juemin vokis. La maljunulo ŝajnis ne aŭdi lin. Tiu direktis sian rigardon al Juehui. Liaj lipoj ree moviĝis kaj la muskoloj sur la malgrasa vizaĝo malstreĉe kuntiriĝis. Li ŝajne altrudis rideton, sed du aŭ tri

larmoj falis. Li etendis sian manon kaj karesis la kapon de Juehui. Poste, retirinte la manon, li mallaŭte diris, “Vi alvenis. Kaj li ... li ... li...” Ekpreninte la manon de Juemin, Juehui diris, “Li estas ĉi tie. Li estas ĉi tie. ...” Ankaŭ Juemin vokis, “Avo!”

“Vi revenis... Pri la gefianĉiĝo ni ne parolu plu... Vi devas bone lernadi...” Li malfacile eligis veon kaj daŭrigis malrapide, “Memoru ... honorigi nian familion... Mi estas tre laca... Vi ne foriru ... Mi foriros...” Lia voĉo pli kaj pli mallaŭtiĝis. Lia kapo kliniĝis iom post iom. Fine li tute fermis sian buŝon.

Alpaŝinte, Keming dufoje voikis “paĉjo”, sed la maljunulo ne respondis. Palpinte lian manon, Keming plorvoĉe diris, “La mano malvarmiĝis.”

Ĉiuj alpaŝis de ĉirkaŭe, laŭte vokante lin. La vokado fine ĉesis. Ĉiuj surgenuiĝis kaj eksplodis per laŭta plorado. Dum mallonga tempo, ili dronis en malĝoja plorado, forgesinte ĉion alian.

La sciigo pri la morto cirkulis pli rapide ol io ajn. En kelkaj minutoj la tuta kortodomaro informiĝis pri la morto de Grandsinjoro. Parto de la servistoj rapidis al parencoj de la familio Gao por komuniki la funebran informon. Baldaŭ alvenis kondolencantoj. El ili la virinoj aliĝis al la plorantoj, priplorante samtempe sian propran malĝojan sorton.

La laboro komenciĝis. Taskoj estis disdonitaj al viroj kaj virinoj.

Tri aŭ kvar parencinoj estis alsenditaj sidi kaj plori ĉe la kadavro. La mortinto estis jam metita en la liton, de sur kiu la kulovualo estis forigita.

La laboro marŝis rapide. Multaj streĉe agadis samtempe. Portretoj de praavoj, altaro, aliaj mebloj kaj bildrulaĵoj estis alportitaj en la ĉambron malantaŭ la ĉefhalo. Baldaŭ enportiĝis la ĉerko aĉetita antaŭ kelkaj jaroj, kiun oni tenis aliloke. Laŭdire ĝia prezo estis nealta — nur mil uncoj da arĝento.

Laŭinvite alvenis la taoisto por “vojaĝvidi” al la alia mondo. Per aŭgurado li decidis la favoran horon por enĉerkigi la kadavron. Oni rapide pretigis mortovestojn kaj aliajn necesajojn. La kadavro de Grandsinjoro estis banita, vestita kaj metita en la ĉerkon. La objektoj, kiujn li ŝatis dumvive, plenigis la ĉerkon ĝisrande.

Post la enĉerkigo de la mortinto preskaŭ jam venis vesperkrepusko Granda aro da bonzoj — entute cent ok — estis venigitaj. Tenante po brulantan incensbastoneton per ambaŭ manoj, ili preĝante rondiradis en kaj el la ĉefhalo, supren kaj malsupren de la korta ŝtuparo. Juexin kaj liaj tri onkloj sekvis ilin, ambaŭmane tenante po brulantan incensbastoneton. Juexin antaŭiris siajn onklojn, ĉar li estis “la patro de la unua pranepo” de Grandsinjoro.

La deka la sekvan matenon estis la horo por sigelado de la ĉerko. La dato kaj la horo estis antaŭfiksitaj de la taoisto. Tiumomente la tuta

kortodomaro bolis en malĝoja plorado. Iuj vere elverŝis sincerajn larmojn. Juehui ne partoprenis en la ceremonio, ĉar onidire lia naskiĝjaro konfliktiĝis kun la horo por sigelado de la ĉerko. Krom li, estis ankau kelkaj aliaj, kiuj estis malpermesitaj preni parton en la ceremonio. Juehui sciis, ke tio estas sensencaĵo dirita de la taoisto, sed li ne kontraŭis. “Mi jam diris adiaŭ al la avo,” li pensis. “Mi ne bezonas zorgi vian diablan ludon. Fermi kaj fiksi la kovrilon de la ĉerko kaj tiam ĉio finiĝos.”

La morto de Grandsinjoro alportis grandan ŝanĝon al la hejmo. Pro lia morto ĉio haltis. La ĉefhalo fariĝis funebra salono kun pendantaj funebraj ornamaĵoj ; la halo estis uzata kiel preĝejo. Virinoj malĝoje ploradis en la funebra salono kaj bonzoj preĝadis en la preĝejo. En la funebra salono pendis funebraj rubandoj kaj rulaĵoj kun benopetantaj vortoj kaj desegnaĵoj pri la subtera mondo. Diabloj denove aperis tiuloke.

Ĉiuj okupiĝis pri ceremonioj por la mortinto. Pliĝuste dirite, ili faris ĉion por teni sian honoron kaj montri riĉecon. Tri tagojn poste la oficiala funebrado komenciĝis. Sennombraj donacoj alsvarmis, grandiozaj ceremonioj okazis, multe da kondolencantoj alvenis. Tio, kion oni deziris, tute realiĝis. Tio nur suferigis la virinojn, kies tasko estis priplori la mortinton malantaŭ la funebra kurteno. Ju pli la kondolencantoj multiĝis, des pli ilia plorado multiĝis . Tiukaze, la

plorado servis kiel arto por akcepti la gastojn. Ekzemple, kiam ili estis babilantaj aŭ manĝantaj, la funebra muziko aŭdiĝis de ekstere, tiam ili devis ekplori plengorĝe. Nature ju pli malĝoje, des pli bone. Tamen fakte ili pli ofte hurle lamentis sen larmoj, pro tio, ke iliaj larmoj elĉerpiĝis. Kelkfoje ili faris ridindajn erarojn, prenante gasto-foriradon por gasto-alveno. Post kiam ili ploradis longe, ili trovis, ke ili ploradis vane. Iufoje kiam gastoj jam eniris, absoluta silento regis malantaŭ la funebra kurteno. Je suflorado de ceremonia anoncanto, ili subite komencis ploradi.

Rilate al “la patro de la unua pranepo” Juexin kaj la filoj de la mortinto, kvankam ili estis postulataj plori per sangaj larmoj, ili tamen tuttage restis malantaŭ la funebra kurteno, nek plorante nek respondante la kondolencojn de gastoj. Kiam kondolencantoj alvenis, ili senmove arkigis sin surgenuje sur la planko kovrita per mato; kiam la kondolencantoj foriris, ili aŭ simple kuŝis aŭ sidiĝis por interbabili.

Tiun tagon Juemin kaj Juehui havis mizeran tempon. Dum aliaj okazoj ili povis alpreni la kontraŭrimedon de negativa rezisto — ignorado, sed en ĉi tiu okazo de oficiala funebrado, ili devis — montri sian vizaĝon por “teni la situacion”. Kredeble ili agis kontraŭ sia volo kaj ne donis sufiĉan atenton al tio.

Ili estis lokitaj en la halo por respondi la kondolencon de la gastoj, alivorte, ili devis akompani ĉiun gaston per kelkaj surgenuaj riverencoj.

Kiam la ceremonia anoncanto deklamis, “La lojalaj filoj kaj nepoj dankas vin”, ili faris dankon al gastoj per surgenuaj riverencoj. Ili jam faris nemalmultajn surgenuajn riverencojn. Ili kaŝridis ciufoje, kiam ili vidis, ke Juexin kaj iliaj onkloj portante kanaban ĉapon kun longa rubando post la dorso, malstrikta kanaban veston super blanktola robo, kanaban zonon ĉe la talio kaj pajlajn sandalojn, malrapide iradis kun mallekita kapo, tenante funebran bastonon en la mano. Hi ekhavis la saman senton, kun kiu ili spektis farsojn.

Tiamaniere Juemin kaj Juehui estis enfermitaj hejme la tutan tagon. La sekvan tagon post la matenmanĝo ili ambaŭ elrapidis. Juehui foriris la unua. Li iris al la legĉambro por fari kelkajn aferojn. Li ne hejmenvenis ĝis la vespero. Kiam li atingis la hejmon, Juemin ankoraŭ ne revenis.

La halo estis kvietaj; la preĝantaj bonzoj jam disiris. Juehui iris internen, sed li trovis neniun en la ĉefhalo. Sur la paro da kandeloj antaŭ la funebra nomtabulo de la mortinto sidis grandaj meĉobrulaĵoj. Vakso fluida gutadis kaj plenigis la kandelingojn. La incensbastonetoj en la incensujo jam finbrulis.

“Kial estas tiel dezerte hodiaŭ? Kie ili forestas?” li murmuris al si. Irinte al la altaro, li forigis la meĉobrulaĵojn per pinĉilo kaj bruligis incensbastonetojn.

Subite elflugis la voĉo de Keding el la ĉambro de la avo, “Ne. Se estus dividitaj nur la kampoj kaj objektoj, sed ne la antikvaĵoj kaj

penetraĵoj, tia dividado ne estus kompleta.”

“Dumvive , paĉjo tre ŝatis tiujn antikvaĵojn kaj penetraĵojn. Li kolektis ilin kun granda peno. Kiel filoj, ni ne devus dividi ilin laŭplace,” Keming diris, spiregante.

“Miaflanke, mi ne interesiĝas pri ili. Tamen se ili ne estas dividataj nun, iu alproprigos ilin sola,” Ke-an laute diris kun kolero. “Ĉio, kio apartenis al paĉjo, devas esti egale dividita inter ni ĉiuj.”

“Bone ! Ĉar vi postulas dividadon, ni faros dividon morgaŭ ! Por honeste paroli, mi ne havas intencon alproprigi ilin al mi sola,” diris Keming, tusante dufoje pro kolero.

“Tria Frato, vi kredeble ne alproprigos ilin al vi. Estante advokato, vi ricevas grandan enspezon. Ĉu vi interesiĝas pri tiuj etaj aĵoj?” Keding diris kun ironia rideto.

En la ĉambro aŭdiĝis tumulto kaj virinaj voĉoj. Je eklevo de la pordokurteno, Keding eliris, grumblante, “Testamento? Legaco? Ili ĉiuj estas falsaj. Tia divido ne estas justa !” Post tio, li iris eksteren.

Juexin, deprimita, eliris el la ĉambro.

“Vi komencas dividi la havaĵojn jam nun ! Kiel rapide!” Juehui moke diris.

“Mi kaj la duonpatrino kondukas nur kiel marionetoj. Laŭ la testamento de la avo, mi ricevos la akciojn de la Komerca Kompanio de Okcidenta Sichuan, kiuj valoras trimil juanojn, sed Kvara Onklo

ankoraŭ ne tre volonte konsentas pri pri tio,” Juexin malĝoje diris.

Juemin ĵus eniris de ekstere. Aŭdinte kion Juexin diris, li demandis, “Kaj nia patroflanka onklino?”

“Krom iom da havaĵoj, la onklino ricevos nur akciojn valorantajn kvincent juanojn kiel legaĉon. Dume, sinjorino Chen ricevos domon laŭ la testamento de la avo. Sciu, nur nia familibranĉo bone rilatas al la onklino. Kiu volus pledi por ŝi?” Juexin diris kun emocio.

“Kial vi ne pledu por ŝi?” Juemin riproĉis.

“Tria Onklo alvenas,” Juehui intermetis mallaŭte.

La pordokurteno leviĝis kaj, tusante, Keming malrapide eliris el la ĉambro de la avo.

36

Alproksimiĝs la dato por Ruijue naski infanon, pro kio sinjorinoj Chen, Shen kaj Wang kaj kelkaj servistinoj maltrankviliĝis. Komence ili kaŝe babilis inter si pri tio kaj poste iun tagon sinjorino Chen, kun serioza vizaĝesprimio, parolis al Keming kaj liaj fratoj pri “katastrofo de sanga lumo”.

Se mortinta korpo de unu el la maljuna generacio restis hejme, kaj iu virino estis akuŝonta, la sanga lumo de la akusintino pafiĝus al la mortinto, tiel ke multe da sango elŝprucus el la mortinta korpo. Por eviti la katastrofon, la gravedulino devis forlasi la kortodomaron. Tamen tio ne sufiĉis, ĉar la sanga lumo povis reveni. Tial ŝi devis loĝi ekster la urbo. Eĉ tiel, la urba pordego ne povis bari la sangan lumon, tial ŝi devis transiri ponton kaj loĝi transe. Krom tio, estus pli sekure, se oni konstruigus falsan tombon el brikoj por protekti la ĉerkon. Nur tiamaniere oni povis eviti “katastrofon de sanga lumo”.

Sinjorino Shen aprobis tiun rimedon la unua, kaj sinjorino Wang kaj Keding subtenis ĝin. Komence Ke-an ŝajne tion ne aprobis, sed post kiam sinjorino Wang faris klarigon per kelkaj vortoj, li plene konsentis. Fine ankaŭ Keming kaj sinjorino Zhou jesis. El la maljuna generacio nur sinjorino Zhang de la tria familibranĉo tenis sin silenta. Unuvorte, ĉiuj decidis fari , kion sinjorino Chen diris. Ili volis, ke Juexin tuj agu laŭpostule. Ili diris, ke la intereso de la avo estas super ĉio.

Kvankam tiuj vortoj sonis al Juexin kiel tondro el serena ĉielo, li tamen paceme akceptis ilin. Li montris neniom da ribelemo — la tutan vivon li neniam eligis ribelajn vortojn. Kiel ajn maljustan traktadon li ricevis, li preferis engluti larmojn, koleron kaj amaron, ol kontraŭstari iun ajn. Li toleris ĉion, senkonsidere ĉu lia tolero estas malutila al la feliĉo de alia aŭ ne.

Reirinte en sian ĉambron, Juexin parolis al Ruijue pri tiu afero. Anstataŭ plendi, ŝi nur ploradis. Ŝia ploro montris ŝian kontraŭstaron. Tamen tio taŭgis por nenio, ĉar ŝi ne havis forton por protekti sin mem, nek Juexin povis ŝin protekti. Ŝi devigite submetiĝis al la disono de aliaj.

“Sciu, mi absolute ne kredas tion, sed kion mi povas fari? Ili ĉiuj diris, ke estas preferinde kredi ol ne kredi,” Juexin malĝojvoĉe diris, malespere disetendante la brakojn.

“Mi ne riproĉas vin. Mi nur plendas kontraŭ mia malbona sorto,” Ruijue plorsingultis. “Mia patrino ne troviĝas en la provinca ĉefurbo por zorgi pri mi. Kiel vi povus havi fifamon de nelojaleco? Eĉ se vi riskus, mi absolute ne konsentus.”

“Ruinjo, pardonu min. Mi estas tro molosta por protekti mian propran edzinon. Ĉar ni jam kunvivis kelkajn jarojn... eble mian malfacilon vi povas kompreni .

“Ne parolu... tiel,” diris Ruijue, forviŝante larmojn per poŝtuko, “mi komprenas ... vian... malfacilon. Vi jam suferis ... sufiĉe. Vi

traktas min... tre bone ... Mi povas fari nenion krom danki vin.”

“Danki min? Ĉu tio ne sonas kiel insulto? Vi jam elportis multe da suferoj por mi ! Vi baldaŭ akuŝos, kaj via sano ne estas bona, sed mi devas sendi vin el la urbo al la dezerteca loko, kie vi loĝos maloportune. Mi sentas min kulpa al vi. Ĉu edzinoj de aliaj familioj povus ricevi tian malbonan traktadon? Kial vi diris, ke vi dankas min?” Dirinte, Juexin eksplodis per plorado, ambaŭmane prenante la kapon.

Reteninte larmojn, Ruijue silente stariĝis. Ŝi eliris senvorte. Post momento ŝi revenis kun Haichen. Lia mamnutristino sekvis ŝin.

Juexin estis viŝanta larmojn en la ĉambro. Ruijue prezentis Haichen antaŭ lin, kaj diris, ke li voku “paĉjo” kaj prenu la manon de sia patro por ke li brakumu lin.

Juexin prenis Haichen en siajn brakojn, ĵetis al li kelkajn amemajn rigardojn kaj kelkfoje kisis lian vangon. Poste li lasis lin sur la teron kaj kondukis lin al Ruijue. Li diris per amara voĉo, “Mi estas senespera homo. Vi bone eduku Haiĉjon. Mi esperas, ke li estonte ne fariĝos homo kia mi.” Poste li eliris, frotante la okulojn per la mano.

“Kien vi iras?” demandis Ruijue kun zorgemo.

Li turnis la kapon por rigardi ŝin. Larmoj vualis liajn okulojn. Kun granda peno li diris, “Mi iras eksteren de la urbo por trovi loĝejon.” Post tio li eliris.

Tiun tagon Juexin revenis tre malfrue. Estis ne facile lui loĝejon, sed li

sukcesis la sekvan tagon. La loĝejo estis domo kun tri ĉambroj lummarkaj, kun malgrandaj paperumitaj fenestroj, argilplanko kaj malsekaj muroj en malgranda korto. Li ne povis trovi pli konvenan loĝejon, kiu konformis al la du postuloj — “ekster la urbo” kaj “trans la ponto”.

La loĝejo estis definitive luita. Antaŭ ol Ruijue transloĝiĝis, sinjorino Chen iris tien kun servistino por pririgardi. Ankaŭ sinjorinoj Wang kaj Shen inspektis la domon. Nenia opono estis levita kontraŭ la loĝejo.

Juexin komencis prepari la transloĝon de sia edzino. Ruijue volis mem ordigi siajn pakaĵojn, sed Juexin retenis ŝin. Li insistis, ke li zorgu pri ĉio por ŝi. Li sidigis ŝin, ke ŝi senfare rigardu. Por ne vanigi lian bonan intencon, ŝi konsentis sidi senmove. Ĉiufoje kiam li elprenis aĵon, kiun li opiniis necesa, li prezentis ĝin al ŝi, demandante, “Kunportu ĝin, ĉu bone?” Ŝi ridetante kapjesis, kaj li metis ĝin en valizon aŭ korbegon. Rilate al lia ĉiufoja sama demando, ŝi ĉiam ridetante kapjesis aŭ varme diris, “Bone!” Eĉ se la prezentita aĵo estis senutila al ŝi, ŝi ne diris ne.

Kiam la pakaĵoj preskaŭ estis pretaj, Juexin ridetante diris al ŝi, “Vidu! Kiel bone mi pretigis ilin ! Mi komprenas, kion vi deziras kaj kion vi bezonas.”

Ŝi ridetante diris, “Vi efektive komprenas mian koron. Mian bezonon vi tute scias. Vi lerte ordigis. Se mi veturos foren ankoraŭfoje,

mi petos vin prepari mian pakaĵon.” La lastan frazon ŝi diris senpripense.

“Ankoraŭfoje? Ankoraŭfoje, kien ajn vi veturos, mi kompreneble iros kun vi. Mi absolute ne lasos vin iri sola !” Li diris kun rideto.

“Mi volas viziti mian panjon, sed ni devos iri kune. La sekvan fojon mi absolute ne forlasos vin,” ŝi ridetante respondis.

Juexin paliĝis kaj haste klinis sian kapon. Poste li levis la kapon kaj diris kun altrudita rideto, “Jes , ni iros kune.”

Ili trompis unu la alian, ne volante riveli sian efektivan penson. Kvankam ili emis plori en la koro, ili tamen montris rideton sur la vizaĝo, rideton, kiu ne povis kaŝi ilian malĝojon. Ili ambaŭ sciis tion. Li sciis ŝian koron kaj ŝi la lian. Tamen ili intence kaŝis sian veran senton en la rideto kaj en plezura babilado. Ili preferis ridi sur la vizaĝo kaj samtempe plori en la koro, ol vidi la amatan elverŝi eĉ unu larmon.

Shuhua kaj Shuying eniris, Juemin kaj Juehui sekvis, sed ili ĉiuj nur vidis tion, kion ambaŭ montris sur la vizaĝo.

Sed Juemin kaj Juehui ne estis silentemaj. Juehui demandis, “Granda Frato, ĉu vi vere forsendos nian bofratinon?”

Kvankam Juehui aŭdis tion, li tamen ne kredis. Li opiniis, ke oni nur serĉe diris. Sed kiam li ĵus venis de ekstere, li renkontis serviston Yuan Cheng ĉe la interna pordo. La mezaĝa servisto afable salutis, “Tria Sinjorido”, kaj Juehui haltis kaj ekbabilis kun li.

“Tria Sinjorido, ĉu vi opinias tion bona, ke la juna sinjorino

transloĝiĝu el la urbo?” La nigra malgrasa vizaĝo de la servisto fariĝis pli nigra kaj liaj brovoj kuntiriĝis.

Juehui surprizite ĵetis al li ekrigardon kaj respondis, “Mi ne aprobas tion. Laŭ mi, ne povas esti vere, ke ŝi transloĝiĝos.”

“Tria Sinjorido, vi ankoraŭ ne scias, ke Unua Sinjorido jam ordonis, ke mi kaj Bofratino Zhang priservu la junan sinjorinon tie. Laŭ nia opinio ne estas bone por ŝi transloĝiĝi. Oni jam venigis masoniston por konstrui falsan tombon por la ĉerko. Eĉ se ŝi devos transloĝiĝi, oni devas trovi bonan lokon por ŝi. Nur riĉuloj havas tiom da tabuoj. Kial Unua Sinjorido ne kontraŭstaris? Ni estas subuloj kaj ne komprenas multe, sed laŭ ni homaj vivoj estas gravaj ĉiaokaze. Tria Sinjorido, ni petas vin persvadi Unuan Sinjoridon kaj sinjorinon Zhou.” Kun larmoplenaj okuloj la servisto ekscitite daŭrigis, “Ni devas zorgi pri la juna sinjorino. Kiu el ni en la kortodomaro ne deziras, ke la juna sinjorino bone fartu. Se ŝi...” Balbutante, li ne povis plu diri.

“Bone, mi persvadu. Mi tuj turnos min al Unua Sinjorido. Trankviliĝu. Nenio okazos al la juna sinjorino,” Juehui decideme respondis, kortuŝite kaj emociite.

“Dankon al vi, Tria Sinjorido. Sed neniel menciu mian nomon,” diris mallaŭte la servisto, kaj sin turninte, li iris al la pordista ĉambro.

Senprokraste Juehui iris al la ĉambro de Juexin. Tio, kion li vidis en la ĉambro, tute konfirmis la vortojn de la servisto.

Kun brovoj kuntiritaj Juexin ĵetis rigardon al Juehui kaj silente balancis la kapon.

“Ĉu vi frezeziĝas?” Juehui mirigite diris, “ĉu vi kredas tiujn sensencaĵojn?”

“Mi kredas tiujn sensencaĵojn?” Juexin respondis senpacience, “por kio taŭgas tio, ke mi ne kredas ilin? Ili ĉiuj insistas pri tio!” Juexin malespere tordis siajn manojn.

“Vi devas kontraŭstari ,” diris Juehui indigne. Anstataŭ al Juexin li direktis sian rigardon al la pejzaĝo ekster la fenestro.

“Granda Frato, prave diris Tria Frato,” diris Juemin. “Mi admonas vin ne transloĝiĝi la bofratinon. Iru fari klarigadon al ili. Ili ekkomprenos. Ankaŭ , ili havas prudenton.”

“Prudenton?” Juexin diris senpacience, “eĉ Tria Onklo, kiu klerigis sin multajn jarojn kaj plie studis juron en Japanio, devigite kapjesis. Ĉu miaj vortoj efikos? Mi ne povas akcepti la fifamon de nelojaleco. Mi povas fari nenion krom obei, sed via bofratino suferos...”

“Kian suferon mi ricevos? Estos pli kviete, se mi transloĝiĝos... Kaj krome, mi ricevos priservon kaj havos akompanantinon. Mi pensas, ke mia vivo certe estos komforta,” Ruijue intermetis kun altrudita rideto.

“Granda Frato, , vi denove cedas ! Kial vi ĉiam submetas vin? Vi devas memori , ke vi jam donis grandan pagon ! Sciu, ŝi estas via

edzino ! Pensu pri ŝia vivo ! Ĉiuj en la kortodomaro deziras, ke ŝi bone fartu!” Juehui diris kun ekstrema indigno, ekpensante pri la vortoj de la servisto. “Prenu Duan Fraton kiel ekzemplon. Ĝuste pro via cedemo, li preskaŭ fariĝis viktimo, ruinigante sian kaj alies vivon. Dank’ al lia ribelemo, li gajnis la nunan venkon.”

Aŭdinte tion, Juemin fiere ridetis, pensante, ke ĝuste kiel Juehui diris, li mem batalakiris sian propran feliĉon.

“Tria Frato, ne diru plu. Tio ne estas la intenco de via Granda Frato, sed la mia,” Ruijue tuj senkulpigis Juexin.

“Ne, Bofranjo, tio ne estas via intenco nek tiu de Granda Frato , sed de la aliaj,” Juehui laŭte diris kun ruĝiĝinta vizaĝo. Li tuj sincere admonis Juexin, “Granda Frato, faru luktadon!”

“Luktado, venko,” diris Juexin kun doloro en la koro, ŝajne mokante sin mem. “Prave , vi triumfas. Vi ribelas kontraŭ ĉio, vi malestimas ĉion, kaj vi triumfas. Ĝuste pro tio, ke vi triumfas, mi fiaskas. Ili koncentras sur min sian tutan malamon al vi. Vi ofendis ilin, sed ili sin venĝis kontraŭ mi sola. Ili malamas min, primokas kaj insultas min malantaŭ mia dorso kaj nomas min ‘sinjoro elportanto’ ... Vi povas ribeli, forlasi la familion kaj fuĝi eksteren ... Sed mi? Kion mi povas fari? Ĉu mi povus fuĝi sola? ... Multaj aferoj estas ekster via scio. Pro la gefianĉiĝo de Dua Frato, mi suferis multajn riproĉojn. Kaj Tria Frato, vi redaktas gazeton kaj konatiĝas kun tiuj novaj amikoj.

Ankaŭ mi ricevis multe da sufero pro tio. Mi kaŝas ĉiujn suferojn en la koro. Nur mi scias mian suferadon. Vi povas diri al mi ‘ribeli’ kaj ‘lukti’ , sed al kiu mi povus diri tujn belajn vortojn?”

Ĉe tio Juexin ne povis regi sin plu. Elfluis larmoj, kiujn li longe retenis. Li ne volis, ke liaj larmoj estu viditaj, des malpli eltiri larmojn de aliaj ... Li sentis, ke li estas peze subpremata kaj ne plu povas elteni. Li rapidis al la lito kaj falis sur ĝin.

Tiumomente rompiĝis la defensiva limo de Ruijue. Retirinte sian ŝajnigitan rideton, ŝi klinis la kapon sur la tablon kaj mallaŭte ekploris. Shuying kaj Shuhua konsolis ŝin plorvoĉe. La okuloj de Juemin malsekiĝis pro larmoj. Li pentis, ke li zorgis nur pri si mem, tute ignorante la suferon de Granda Frato. Li pensis, ke li ne rajtas trakti sian fraton tiel rigore kaj serĉis vortojn por konsoli lin.

Tamen la animstato de Juehui tute malsamis. Li ne elverŝis eĉ unu larmoguton. Li observis la agmanieron de Juexin de flanke. Nature tiuj vortoj de Juexin malĝojigis lin, sed li konsideris, ke li ne devus montri simpatian al Granda Frato. En lia koro malamo superis amon.

Antaŭ liaj okuloj aperis vasto da lagakvo, ĉerko, kaj la nuntempo... la estonto. Ĉion ĉi li ne povis forgesi. Kiam li ekpensis pri tio, lia koro estis tordita de malamo. Kiel siaj du fratoj, li ricevis la amsenton de sia bonkora patrino. Post kiam lia patrino mortis,, restiginte la memoraĵon de amo al malgranda grupo da homoj, li faris kion lia patrino instruis al li

— ami kaj helpi aliajn, respekti pliaĝulojn kaj bone trakti servistojn. Sed nun li vidis propraokule, kiel liaj pliaĝuloj hipokrite kondutas kaj kiel en la familio kreskas la malluma forto, kiu ruinigas la amon. Per siaj propraj okuloj li vidis ankaŭ, ke kelkaj amindaj vivoj estis oferitaj por nenio. Tiuj vivoj estis tiel karaj al li, ke li ne volis perdi ilin, sed fine ili eterne disiĝis de li. Li ne nur ne povis savi ilin, sed ankaŭ estis devigita vidi, ke aliaj amindaj junaj vivoj iras sur la sama vojo al ruiniĝo. Simpation li ne povis montri, malgraŭ, ke li estis lia frato.

Senparole li eliris. Kiam li atingis la eksteran ĉambron, la mamnutristino eniris, tenante la manon de Haichen. Tiu vokis kun plenvanga rideto, “Tria Onklo.” Respondante, Juehui sentis grandan korporemon.

Reirinte en sian ĉambron, Juehui sentis subitan solecon, kiun li neniam antaŭe spertis. Liaj okuloj iom post iom malsekiĝis. En liaj okuloj — la mondo similis scenejon de tragedio, plenan de larmoj kaj suferoj. Multaj vivas por ruinigi sin mem aŭ aliajn. Krom tio, ili povas fari nenion. Baraktado en malĝojo kondukas al neevitebla ruiniĝo kaj eĉ kompromitas aliajn — la sorto de lia plej aĝa frato klare prezentigas antaŭ lia vizaĝo. Kaj plie li sciis, ke tio estas ne sole la sorto de lia frato, sed ankaŭ multaj aliaj iras sur la sama vojo. “Kial ekzistas tiom da afliktoj en la mondo?” li demandis. Diversaj malagrabloj ŝvarmis en lia cerbo..

“Kial eĉ la servisto Yuan Cheng povas kompreni, sed Granda Frato ne?” Juehui demandis sin dubeme.

Li estis ĉirkaŭita de malĝojo kaj ne povis trovi elirejon. Poste li kuraĝigis sin per la vortoj, “Malgaŭ ĉio, mi neniel kondutos kiel ili. Mi prenos mian propran vojon kaj marŝos antaŭen, eĉ tretante iliajn kadavrojn.”

Li forlasis la hejmon por iri al la legĉambro kaj renkonti siajn novajn amikojn.

*

*

*

Juexin sufokis portempe la malĝojon. Li akompanis Ruijue al ties nova loĝejo ekster la urbo. Kunirantoj estis sinjorino Zhou, Shuying, Shuhua kaj du geservistoj Bofranjo Zhang kaj Yuan Cheng. Poste ankaŭ Juemin kaj Qin iris tien.

Ruijue ne ŝatis sian novan loĝejon. Post sia edziniĝo al la familio Gao, ŝi neniam disiĝis de Juexin. Sed nun ŝi devigite loĝis sola. La disiĝo daŭros almenaŭ unu monaton. Estis la unua fojo, sed tiel longtempa disiĝo, kaj plie ŝi devas loĝi en tiel humida kaj tiel malhela loko. Tiel ŝi pensis. Eĉ se ŝi volus konsoli sin per agrablaj ideoj tio ne eblus efektive. Sed antaŭ la vizaĝo de aliaj ŝi devis subpremi sian malĝojon. Kvankam kiam aliaj okupiĝis pri lokado de mebloj, ŝi kaŝe elverŝis larmojn, tamen kiam ili babilis kun ŝi, ŝi parolis ridetante, kio iom trankviligis tiujn, kiuj zorgis pri ŝi.

Baldaŭ alvenis la tempo por disiĝo kaj ĉiuj estis dirontaj ĝisrevidon al ŝi, antaŭ ol reiri al la urbo.

“Kial vi ĉiuj reiros samtempe? Franjo Qin kaj Tria Fratino foriru iom poste, ĉu bone?” Ruijue diris kun granda bedaŭro.

“Se malfrue, la pordego de la urbo fermiĝos. Ĉi tiu loko longe distancas de la urbopordo. Morgaŭ mi vizitos vin,” Qin respondis, ridetante.

“Urbopordo,” Ruijue diris dufoje, kvazaŭ nekompreneble. Sed fakte ŝi klare sciis, ke nun ne nur longa peco da vojo, sed ankaŭ kelkaj urbopordoj staras inter ŝi kaj li. La urbopordo apartigis ilin de la vespero ĝis la morgaŭa tagiĝo. Eĉ se ŝi mortus tie, li ne sciis pri tio kaj ne povus veni por prizorgi ŝin.

Pro maltrankvilo ŝiaj larmoj elfluis. “Ĉi tie estas timige dezerteca,” ŝi senkonscie diris.

“Ne gravas, Bofranjo. Morgaŭ mi transloĝiĝos ĉi tien por akompani vin,” konsolis ŝin Shuhua.

“Mi interkonsiliĝos kun panjo. Kaj ankaŭ mi venos por akompani vin,” diris Shuying kun emocio.

“Ruinjo, pacienciĝu. Vi alkitimiĝos post kelkaj tagoj. Ĉi tie estas du geservistoj. Ili estas fidindaj. Ne timu. Morgaŭ Dua Fratino vere transloĝiĝos ĉi tien por akompani vin. Se mi nur povos eltiri tempon, mi vizitos vin ĉiutage. Pacienciĝu. Rapide forpasos la tempo de pli ol

unu monato,” Juexin konsolis ŝin kun altrudita rideto. Fakte li volis brakumi ŝin kaj ĝissate plori .

Ankaŭ sinjorino Zhou diris kelkajn vortojn. Poste ili ekiris. Ruijue akompanis ilin ĝis la pordo kaj apogante sin kontraŭ la pordo, rigardis ilin eniri en palankenojn unu post alia.

Subite Juexin eliris el sia palankeno kaj reiris al Ruijue por demandi, ĉu ŝi ankoraŭ bezonas ion alian. Ŝi ne respondis, dirante, ke ŝi kunportis ĉion, kion ŝi bezonas. Ŝi diris, “Morgaŭ kunportu Haiĉjon. Mi tre sopiras al li. Bone prizorgu Haiĉjon. Nepre ne skribu al mia panjo. Se ŝi sciigos, ŝi maltrankviliĝos.”

“Antaŭ du tagoj mi jam skribis al ŝi sen sciigo al vi, ĉar mi estis certa, ke vi ne lasos min fari tion,” informis Juexin mildvoĉe .

“Vi ne devus skribi. Se panjo scias, ke mi nun...” Ŝi englutis la sekvantajn vortojn. Ŝi timis, ke ŝiaj vortoj vundos lian senton.

“Tamen ni devas sciigi ŝin ĉiaokaze. Se ŝi venos ĉi tien por viziti vin, tiam estos unu pli, kiu povos zorgi pri vi,” Juexin mallaŭte argumentis. Li ne kuraĝis pense esplori la vortojn, kiujn ŝi englutis.

Ili ambaŭ rigardis unu la alian. Ŝajnis, ke ili havas nenion por diri , sed fakte miloj kaj miloj da vortoj kirliĝis en ilia koro.

“Mi foriru. Vi povas ripozi kelkan tempon,” Juexin ridetante diris. Li staris kelkajn minutojn kaj vole-nevole foriris. Antaŭ ol eniri en la palankenon, li turnis la kapon por rigardi ŝin de tempo al tempo.

“Venu frue morgaŭ,” diris Ruijue. Apogante sin kontraŭ la pordo, ŝi sencese svingis la manon al li. Nur post kiam lia palankeno malaperis ĉe la vojkurbiĝo, ŝi reiris malfacile en la ĉambron paŝon post paŝo.

Ŝi volis elpreni kelkajn aĵojn el la korbego, sed ŝi sentis senfortecon en la kruroj kaj brakoj. Svena sento kaptis ŝin kaj ŝiaj kruroj cedis. Ŝi malfacile iris al la lito kaj sidiĝis sur la litrando. Ŝi subite sentis moviĝon de la feto en la ventro kaj kvazaŭ aŭdis ĝian voĉon. Tiumomente ŝi estis vere atakita de malĝojo kaj indigno. Ŝi kolere frapadis sian ventron per sia senforta mano, dirante, “Vi suferigas min!” Ŝi mallaŭte ploris ĝis la servistino enrapidis por konsoli ŝin, aŭdinte la ploradon.

La sekvan tagon Juexin vere venis tre frue, kunportante Haichen. Shuhua transloĝiĝis ĉi tien laŭpromese. Ankaŭ Shuying venis, sed ŝi ne akiris la permeson de sia patio kaj tial ne povis loĝi ekster la urbo. Poste ankaŭ Qin venis. En la malgranda korto denove leviĝis mallongtempa ĝojo kaj rido.

Tamen en ĝojo kaj rido tempo forpasis pli rapide. Fine alvenis la momento de disiĝo. Ĉe ekiro, Haichen subite ekploris, rifuzante hejmeniri. Li diris, ke li volas resti kun sia patrino. Tio kompreneble ne estis ebla. Post kiam Ruijue diris multajn belajn vortojn, li ridis tra larmoj kaj konsentis reiri kune kun la patro.

Ruijue akompanis Juexin ĝis la pordo kiel en la antaŭa tago. “Venu pli frue morgaŭ,” ŝi petis. Larmoj brilis en ŝiaj okuloj.

“Mi timas, ke mi ne povos veni morgaŭ . Masonisto konstruos falsan tombon por la avo. Ili volas, ke mi supervidu lian laboron,” li diris melankolie. Sed kiam li rimarkis larmojn ĉe ŝiaj okulanguloj, li bedaŭris malesperigi ŝin. Li korektis, “Mi klopodos veni, mi certe venos morgaŭ . Kial vi tiel emas ĉagreniĝi, Ruinjo? Zorgu pri via sano. Se vi malsaniĝos, tio igos min. ..” Ĉe tio li bridis sian vortfluon. “Ankaŭ mi mem ne scias kial,” ŝi diris bedaŭre kun malgaja rideto sur la vizaĝo. Ŝiaj okuloj rifuzis forlasi lian vizaĝon. Ŝi karesis la vangon de Haichen.

Ĉiufoje kiam vi foriras, mi sentas, kvazaŭ mi ne povus revidi vin. Mi tre timas. Mi mem ne scias, kial mi timas.” Dirante, ŝi frotadis siajn okulojn per mandorso.

“Kion vi timas? Ni distancas tre proksime kaj mi venas ĉiutage. Nun Tria Fratino restos ĉi tie por akompani vin,” Juexin konsolis ŝin kun altrudita rideto. Li ne kuraĝis pensi plu.

“Ĉu estas tiu templo?” ŝi subite demandis, fingromontrante la dekstran elstaran tegmenton. “Mi aŭdis, ke la ĉerko de kuzino Mei kuŝas tie. Mi volas viziti ŝin iutage.”

Rigardante en tiu direkto, Juexin paliĝis. Li tuj deturnis sian kapon . Timiga penso ekrongis lian cerbon. Li etendis la manon por preni la ŝian. Li firme tenis ŝian molan manon, kvazaŭ iu estus deprenonta ŝin. “Ruinjo, ne iru tien!” li diris dufoje kun tia tono, kiun Ruijue ne povis forgesi dumlonge, kvankam ŝi ne sciis, kial li insistas, ke ŝi ne iru

tien.

Ne atendente vortojn de ŝi, li abrupte forlasis ŝian manon, dirante, “Mi foriru.” Poste li diris, ke Haichen dufoje voku “panjo”, antaŭ ol li grandpaŝe eniris en la palankenon. La du portistoj surŝultrigis la palankenon. En ĝi, Haichen vokadis “panjo”, dum Juexin silente englutis siajn larmojn.

Reveninte hejmen, antaŭ ol Juexin eniris en la funebran salonon, li vidis sinjorinon Chen eliri el ĝi. “Unua Sinjorido, kiel la juna sinjorino fartas?” ŝi ridetante demandis.

“Ĝenerale bone. Dankon pro via zorgo,” respondis Juexin kun altrudita rideto.

“Ŝi baldaŭ akuŝos, ĉu ne?”

“Eble post kelkaj tagoj.”

“Do, la afero ne urĝas. Sed Unua Sinjorido, bonvolu memori, ke vi ne rajtas eniri ŝian ĉambron, post kiam ŝi naskos la infanon,” diris serioze al li sinjorino Chen, foriginte sian rideton. Dirinte, ŝi foriris, postlasante sian kutiman parfumon.

Tiujn vortojn Juexin aŭdis jam trifoje. Tamen ŝi eldiris ilin kun tia tono en tia situacio, ke li longan tempon estis muta pro kolero. Li stulte rigardis ŝian dorson. Eĉ kiam Haichen vokis lin kun levita kapo, li ne aŭdis lin.

37

Kvar tagojn poste Juexin iris al la nova loĝejo de Ruijue kiel kutime. Tiun tagon, pro tio, ke li devis fari kelkajn aferojn en la hejmo, li atingis ĝin iom malfrue. Tiam estis post la tria posttagmeze.

Li rapidis en la korton, vokante “Ruinjo”. Apenaŭ metinte unu piedon trans la sojlon, li devis ĝin repreni. La grasa servistino Bofranjo Zhang staris ĉe la pordo, barante al li la vojon. Ŝi diris, “Unua Sinjorido, vi ne povas eniri.” Kvankam ŝi ne eligis aliajn vortojn, li jam komprenis.

Juexin obeeme retiris sian piedon kaj malgaje staris en la meza ĉambro longan tempon. Subite li estis kaptita de streĉiteco kaj eliris. Post li brue fermiĝis la pordo de la ĉambro de Ruijue. En ĝi aŭdiĝis paŝbruo kaj mallaŭta voĉo de fremda virino.

Starante ĉe la fenestro, li distriĝeme rigardis herbojn kaj florojn en la malgranda korto. Li ekhavis strangan senton. Eĉ li mem ne povis determini, ĉu ĝi estas dolĉa aŭ amara, ĝoja aŭ malgoja, indigna aŭ kontenta. Ŝajnis al li, ke ĝi entenas ilin ĉiujn. Antaŭ kelkaj jaroj li havis iom similan senton, sed ĝi fakte multe diferencis de la ci-foja. Li ankoraŭ memoris, ke kelkajn jarojn antaŭe, kiam li troviĝis en ŝajne simila, sed fakte malsama situacio kiel nun, li emociite dankis ŝin kaj prizorgis ŝin kun ĝojaj larmoj. Li sentis malĝojon pro ŝia mizera baraktado, kaj ĝojon pro la donaco, kiun ŝi alportis al li. Kiam li vidis ŝin sperti ĉiujn suferojn kaj fine gajni la venkon, lia animstato ŝanĝiĝis de

streĉiteco al trankvilo, de malĝojo al ĝojo. Li vidis sian infanon, sian unuan infanon. Li ankoraŭ memoris kiel li prenis de la akuŝistino la bebon volvitan en vindotuko kaj kiel li dankeme kaj ameme kisis ĝian ruĝan vizaĝeton. En la koro li ĵuris, ke li amos ĝin kaj fordonos ĉion por ĝi, car li jam konfidis sian vivon al la novnaskito. Kaj li iris al la lito de sia edzino kaj rigardis ties palan kaj lacan vizaĝon. Karesante ŝian manon, li demandis pri ŝia sano. Per siaj okuloj li eldiris multajn vortojn plenajn de dankemo kaj arda amo, vortojn neaŭdeblajn por aliaj. Kaj siaflanke ankaŭ ŝi rigardis lin kaj la bebon per siaj fieraj amplenaj okuloj. Ŝi dankeme diris al li, “Mi sentas min bona nun. Vidu, ĉu ĝi ne estas aminda? Donu al ĝi nomon rapide.” Sur ŝia vizago radiis ĝoja brilo, la ĝoja brilo de tiu, kiu fariĝis patrino la unuan fojon.

Tamen sammaniere ŝi kuŝis en la lito hodiaŭ. Ŝi komencis ĝemi mallaŭte. En la ĉambro aŭdiĝis paŝbruoj kaj mallaŭtaj sed serioztonaj parolvoĉoj. Ĉio ĉi ŝajnis sama kiel antaŭe. Sed nun li kaj ŝi troviĝis en tia loko. Du pordoklapoj apartigis ilin, malebligante lin eniri por ekrigardi ŝin, kuraĝigi ŝin, konsoli ŝin kaj dividi la suferon kun ŝi. Kun sento tute malsama kiel antaŭe, li atendis ĉion, kio okazos. Al li mankis ĝojo kaj kontento, sed restis nur teruro kaj pento. “Mi suferigas ŝin” — nur tiu penso okupis lin.

“Kiel vi sentas vin, Juna Sinjorino?” estis la voco de la servistino.

Regis longa silento.

“Aj! .. huj ... aj ... Doloras min!”

Subite malĝoja kriado elflugis el la fenestro kaj penetris en liajn orelojn. La kriado tremetigis lian koron. Kunpremante siajn dentojn, li firme pugnigis siajn manojn kun penado. “Tio ne estas ŝia voco,” li pensis. “Ŝi neniam eligas tiel laŭtan kriadon.” Tamen kiu alia povus eligi tian kriadon krom ŝi?” Tio certe estas ŝi, estas Ruijue,” li murmuris al si.

“Huj ! ... Min doloras ... dolore ! ... Aj !” Des pli korŝire sonis la krio, preskaŭ ne homa. En la ĉambro paŝbruoj, voĉoj, tintoj de bovloj kaj teleroj miksiĝis kun la kriado. Mane kovrante la orelojn, li murmuris al si, “Tio certe ne estas ŝi, certe ne estas Ruinjio. Ŝi ne povas kii tiel.” Li freneze iris al la fenestro kaj streĉis sian kolon por rigardi, sed la fenestroklapo estis firme fermita. Li nur aŭdis voĉojn, sed ne povis vidi la efektivan situacion en la ĉambro. Li malespere deturnis sin.

“Juna Sinjorino, vin eltenu. Ĉio fariĝos bona post momento,” estis la voĉo de fremdulino.

“Doloras min ! ... Huj !” sonis ankoraŭ krio.

“Bofranjo, estu pacienca. La doloro daŭras nur momenton. Ĉio fariĝos bona post momento,” diris Shuhua.

La kriado malkreskiĝis ĝis malforta ĝemado.

Subite la pordo malfermiĝis. La servistino rapide elvenis, eniris en la kuirejon kaj reiris en la ĉambron, ambaŭmane tenante pelvon da varma

akvo. Post hezito li eniris en la mezan ĉambron kaj senrimede rigardis la duonfermitan pordon. Foje videblis moviĝanta figuro. Lia koro forte batis, sed li ankoraŭ ne ekhavis la ideon eniri. Kiam la servistino eliris el la alia ĉambro kaj sin direktis al la ĉambro de Ruijue, li faris decidon sekvi ŝin. Sed ŝi tuj fermis la pordon post sia eniro.

Li kelkfoje ekpuŝis ĝin. Elvenis nenia reago el la ĉambro. Li malespere lasis sian manon fali. Kiam aŭdiĝis kriado de interne, li forte ekpuŝis kaj frapis la pordon.

“Kiu estas tie?” demandis la servistino en la ĉambro.

“Lasu min eniri!” Lia voĉo plenis de teruro, malĝojo kaj indigno.

Neniu respondis kaj neniu malfermis la pordon por li. Lia edzino ankoraŭ laŭte kriadis.

“Enlasu min! Bofanjo Zhang, enlasu min!” li kriis indigne, pugnante la pordon.

“Unua Sinjorido, vi ne povas eniri! Mi ne kuraĝas malfermi la pordon por vi. Sinjorinoj Zhou, Wang kaj Chen jam ordonis tion al mi...” laŭte diris la servistino Zhang malantaŭ la pordo.

Ŝi ŝajne plu parolis, sed li jam ne aŭskultis ŝin. Li komprenis, kion ŝi diris. Li ekmemoris la vortojn, kiujn liaj pliaĝuloj diris al li en la hejmo. Lian esperon kaj kuraĝon tute forpelis tiuj vortoj. Li malespere staris antaŭ la pordo, ne povante trovi vortojn por refuti la servistinon Zhang.

“Kie estas Unua Sinjorido? Kie li estas?” Ruijue tragike kriis en la ĉambro . “Kial li ne venas al mi?... Bofranjo Zhang, venigu Unuan Sinjoridon ! Doloras min ! ... Huj ! ...” La kriado premis la koron de Juexin.

“Ruinjo, mi estas ĉi tie, mi estas ĉi tie ! Ruinjo, mi venas ! Malfermu la pordon ! Tuj enlasu min ! Ŝi volas vidi min ! Lasu min enen !” Li furioze kriis per sia plena voĉo, forte pugnante la pordon.

“Kie vi estas, Juexin? Kial mi ne povas vidi vin? ... Tio doloras min ! Kie vi estas? ... Kial vi ne lasas lin enen? .. Huj ! . . .”

“Ruinjo, mi estas ĉi tie ! Mi tuj envenos ! Mi gardos vin ! Mi ne forlasos vin ! Lasu min eniri ! Vi lasu min enen ! Ĉu vi ne kompatas ŝin, kiam ŝi tiel afliktiĝas?” li raŭke kriis, forte pugnante la pordon.

Silento regis en la ĉambro. Tuj poste tumulta moviĝo aŭdiĝis. “Bofranjo”, “Juna Sinjorino” — la vokado enmiksiĝis kun rapida paŝado. Li pensis, ke si certe svenas. Kun pli granda streĉiteco, li kriis plengorge, “Ruinjo, mi estas ĉi tie. Ĉu vi povas aŭdi min?”

La vokado en la ĉambro ĉesis. Ŝajnis, ke Ruijue parolas. Poste aŭdiĝis ŝia malforta ĝemado.

Kelka tempo forpasis.

“Huj! dolore! ... Kial vi ne savas min! ... Juexin, kie vi estas? Kial ankaŭ vi ne venas savi min? ... Dolore! ...” ŝi denove kriis en la cambro.

“Mi estas ĉi tie! Ruinjo, mi diras, ke mi estas ĉi tie ! Mi estas ĉi tie!

Ruinjo, ĉu vi aŭdas min? ... Lasu min enen! Tria Fratino, vi estas prudenta, malfermu la pordon por mi ! Enlasu min!” li furioze kriis.

Ŝia kriadado denove ĉesis. Neniu parolis en la ĉambro. Subite aŭdiĝis sonora plorado de bebo en la terura silento.

“Dankon al la Ĉielo! Dankon al la Tero! ” li diris ĝojplene. Li sentis sin faciligita, kvazaŭ ŝtono falus de sur la koro. Li pensis, ke ŝia sufero tuj finiĝos.

Nun teruro kaj malĝojo foriris malproksimen. Li denove sentis nepriskribeblan ĝojon. Liaj okuloj pleniĝis de larmoj. Kun emocio li pensis, “Poste mi duoble amos ŝin kaj flegos ŝin. Mi amos ankaŭ mian duan infanon.” Sola li kaj ridis kaj ploris ekster la pordo.

Longa tempo pasis. “Bofranjo!” — la terurveka vokado subite elflugis el la ĉambro, kvazaŭ ŝtonego falus sur lian kapon.

“Ŝiaj manoj malvamiĝas!” Shuhua diris plorvoĉe.

“Juna Sinjorino!” vokis la servistino.

Vokado kaj kriadado laŭtis tra la tuta ĉambro, kvankam estis nur du personoj ene, krom la akuŝistino. Estis tiel triste.

Juexin konsciis, ke katastrofo falas. Sen plua pensado li forte pugnis la pordon, kiu brue knaris. Sed tio ne efikis. Neniu donis atenton al li. Li raŭke kriis, “Ruinjo! Lasu min enen !” Tamen la du lignaj pordoklapoj baris al li la vojon. Ili eĉ rifuzis doni al li lastan ŝanon savi ŝin aŭ vidi ŝin. La espero tute vaporiĝis.

La virinoj en la ĉambro ekploris, dum li ankoraŭ kriis ekster la pordo, “Ruinjo, mi vokas vin. Ĉu vi aŭdas min?...” Tio estis ne nur malĝoja kaj furioza kriadado, sed ankaŭ voĉo de vivo. En ŝin li elverŝis sian tutan amon kaj li volis revoki ŝin de sur la vojo al alia mondo, kvazaŭ penante savi ŝian vivon, kaj ankaŭ la sian. Li komprenis, kio okazos al li sen ŝia ekzisto.

Sed la morto alvenis.

Interne iu alproksimiĝis al la pordo. Li konjektis, ke la servistino venas por malfermi la pordon. Sed estis la akuŝistino, kiu portis la novnaskiton en la sino. Ŝi diris tra la fendeto de la pordo, “Gratulon al vi Unua Sinjorido. Vi ricevis knabon.” Dirinte, ŝi sin turnis kaj foriris. Juexin aŭdis, ke frapetante la bebon, ŝi diris al si, “Malfeliĉe, ke vi perdas la patrinon, kiam vi ekvidas la mondon.”

Tiuj vortoj tranĉis al li la koron. Li ne havis la ĝojon de patro. La bebo kvazaŭ ne estis lia amata infano, sed lia malamiko, la malamiko, kiu deprenis la vivon de lia edzino.

Kaj indigno kaj malĝojo firme kaptis lin. Li pli energie pugnis la pordon. Tamen la du malgrandaj pordoklapoj firme staris kvazaŭ rokego.

Li volis ĉionspite enkuri, fali sur la genuojn ĉe la lito de sia edzino, pripenti siajn kulpojn en ĉi tiuj jaroj kaj peti de ŝi pardonon, sed estis tro malfrue. Nun eĉ la malforta lignotabula pordo fariĝis absoluta monarko, barante ilian lastan amon kaj malpermesante al li diri la lastan adiaŭon al

sia amatino kaj malĝoje plori antaŭ sia vizaĝo.

Lia cerbo eklumis : Lian edzinon forrabis ne tiu malgranda, malforta pordo, sed la tuta socia sistemo kun ĝiaj feŭdismaj moraloj kaj superstiĉoj. Ĉio ĉi peze subpremis lin dum multaj jaroj. Ĝi deprenis lian junecon, lian feliĉon, lian estontecon kaj du virinojn, kiujn li plej amis. Li nun sentis la pezon de la ŝarĝo kaj volis liberigi sin de ĝi. Li baraktadis sub ĝi. Tamen li samtempe komprenis, ke li estas senforta kaj malkuraĝa homo kaj ne povas rezisti kontraŭ ĉio ĉi tio. Li malesperiĝis kaj abrupte falis sur la genuojn antaŭ la pordo, kordolore plorante. Li priploris ne ŝin, sed sin mem. Lia plorado respondis al tiu en la ĉambro. Sed kiel malsamaj tiuj du voĉoj estis !

Du palankenoj haltis ĉe la pordo de la korto. Lia duonpatrino sinjorino Zhou kaj alia virino eniris. Servisto Yuan Cheng sekvis ilin, spiregante.

Tuj kiam sinjorino Zhou eniris, ŝi aŭdis la ploradon. Ŝia vizaĝo tuj paliĝis. Ŝi konsternite diris al la virino, “Estas perditaj !” Ili rapide eniris en la mezan ĉambron.

Vidante, ke Juexin surgenuas tie, sinjorino Zhou surprizite kriis, “Kion vi faras, Juexin?”

Turninte la kapon malantaŭen kaj ekrigardinte, Juexin tuj stariĝis kaj diris disetendante la brakojn, plorsingulte, “Panjo, Ruinjo, Ruinjo.” Nur tiam li rimarkis la gastinon. Li salutis ŝin kun hontema kaj malĝoja

voĉo kaj riverencis al ŝi. Post tio li laŭte ploris. El la ĉambro elflugis plorado de la bebo.

Anstataŭ paroli , la gastino viŝis siajn okulojn per poŝtuko.

Yuan Cheng vokis kaj la pordo malfermiĝis. Sinjorino Zhou lasis la virinon eniri , dirante, “Bonvolu eniri , sinjorino Li. Ne estas permesite al mi eniri en la akuŝejon.”

Sinjorino Li eniris. Aŭdiĝis nova laŭta plorado en la ĉambro.

“Ruijue, Ruijue, ĉu vi ne bedaŭras foriri tiamaniere? Kial vi ne atendis min por intervidiĝi? Via panjo venis. Mi veturis longan distancon kaj venis prizorgi vin. Mi havas multajn vortojn por diri al vi. Diru al mi, kion vi havas en la koro ! ... Ruijue, revivigu ! Via panjo venis malfrue. Kial vi ne volis atendi min unu plian tagon? ... Kiel mizere vi mortis ! Mia malbonsorta filino ! Kiel solece vi kuŝas ĉi tie! Se mi venus unu tagon pli frue, vi ne mortus tiel kompatinde... Mia filino, mia malbonsorta filino ! Mi sentas min kulpa al vi. ..”

Sinjorino Zhou kaj Juexin klare aŭdis siajn vortojn. Kvazaŭ pingloj, la vortoj pikis al ili la koron.

38

Juexin estis sola en la ĉambro. Juehui eniris kaj ekscitite diris al li ,
“Granda Frato, mi ne povas loĝi en la hejmo plu. Mi volas foriri !”

Malheliĝis . Grize blanka duonlumo regis en la ĉambro. La elektra lampo ankoraŭ ne lumis. Sidante ĉe la skribotablo kaj apogante sian mentonon per ambaŭ manoj sur la tablo, Juexin silente rigardis la malgrandan enkadrigitan foton de li kaj Ruijue faritan ĉe ilia geedziĝo. Kvankam li ne povis klare vidi la foton en la duonlumo, la trajtoj de Ruijue tamen jam profunde gravuriĝis en la koro. Ŝiaj plenaj vangoj , afabla rideto , viglaj okuloj kaj malprofundaj ridkavetoj, ĉiuj ŝajne riveligis sur la foto. Li fikse rigardis kun larmoj. Subite la voĉo de Juehui ĝenis lin. Li turnis la kapon kaj vidis liajn radiantajn okulojn.

“Vi volas foriri? Kien?” demandis Juexin surprizite.

“Al Ŝanhajo, al Pekino, al ajna loko. Unuvorte mi volas forlasi nian hejmon !” respondis Juehui fidoplene.

Juexin silentis longan tempon. Li nur sentis korŝiron kaj li firme premis sian bruston per mano. Ekster la fenestro cikado malgaje ĉirpis sur arbo.

“Mi nepre foriros! Kion ajn ili diros, mi nepre foriros!” daŭrigis Juehui, kvazaŭ kverelante. Kun manoj en la poŝoj de la robo, li malpacience faris kelkajn paŝojn en la ĉambro. Li ne imagis, ke la paŝoj tretas la koron de Juexin.

“Kaj via Dua Frato?” Juexin abrupte pene demandis.

“Kelkfoje li diris, ke li foriros, kelkfoje li diris ke ne. Mi opinias, ke li ne foriros en mallonga tempo. Li ne povos forlasi Qin,” Juehui malpacience respondis. Poste li aldonis decideme, “Malgraŭ ĉio, mi volas foriri .”

“Jes, vi volas foriri, vi povas foriri, al Ŝanhajo, al Pekino, al ajna loko!” Juexin diris plorvoĉe.

Juehui ne respondis. Li ne komprenis, kion Juexin celas per siaj vortoj.

“Kaj mi? Kien mi iru?” diris Juexin malgaje, kovrinte sian vizaĝon per ambaŭ manoj.

Juehui ankoraŭ faris longajn paŝojn en la ĉambro. Li ĵetis afliktan rigardon al Juexin de tempo al tempo.

“Tria Frato, ne foriru,” diris Juexin pete, “ĉiaokaze , vi ne povas foriri .” Li demetis siajn manojn de sur la vizaĝo.

Juehui ankoraŭ tenis sin silenta, sed li haltigis siajn paŝojn. Li sendis afliktan rigardon al Juexin.

“Ili ne lasos vin foriri ! Ili certe ne lasos vin foriri!” pene diris Juexin, kvazaŭ argumentante.

“Hm , hm,” ekridis Juehui ironie kaj diris serioze, “ili ne lasos min foriri . Do mi nepre foriros kontraŭ ilia volo !”

“Kiamaniere vi povos foriri? Ili elmetos multajn pravigojn por vin

bari. Ĉar la ĉerko de la avo ankoraŭ kuŝas en la hejmo, la kulta ceremonio ankoraŭ ne okazis kaj lia korpo ankoraŭ ne estas enterigita. Via foriro ne estas pravigebla.” Tiumomente Juexin ŝajne turnis sin al “ili” por helpoj.

“Min ne koncernas la ĉerko de la avo. La kulta ceremonio okazos en la venonta monato kaj la ĉerko estos forportita en la templon. Ĉu mi ne povos foriri? Mi ne timas. Ili ne kuraĝas trakti min tiamaniere kiel ili traktis la bofratinon!” Je mencio de la ĉerko, la indigno de Juehui pliiĝis, tiel ke li kruele eldiris la vortojn.

“Ne menciu vian bofratinon. Bonvolu neniam plu mencii vian bofratinon ! ... Ŝi ne povos reviviĝi,” Juexin malĝoje diris, mankuante kun petega mieno.

“Vi ne bezonas malĝoji tiagrade. Post kiam la funebro finiĝos, vi povos reedziĝi. La tempodaŭro ne superos tri jarojn!” diris Juehui kun ironia rideto.

“Mi ne prenos alian virinon, mi ne prenos alian virinon por la tuta vivo. Ĝuste pro tio mi konfidis la novnaskitan Yun’ er al mia bopatrino,” klarigis Juexin senforte, skuante la kapon. Lia voĉo sonis kiel tiu el la buŝo de maljunulo.

“Kial vi lasis al ŝi forporti ankaŭ Haiĉjon?”

“Haiĉjo revenos post du aŭ tri monatoj. Pensu, kian utilon ĉi-tiea medio donas al tiu senpatrina infano? Li ĉiutage kriadus por vidi sian

patrinon kaj neniu vartus lin. Post kiam la avo estos enterigita, mi revenigos lin. Mi zorge edukos lin. Li estas mia espero. Mi ne povas perdi lin. Mi ne povas doni lin al alia virino laŭ mia bontrovo.”

“Tio estas via nuna intenco. Sed post kelka tempo vi ŝanĝos vian decidon. Vi ĉiuj estas tiaj. Mi jam multfoje vidis tion okazi. Nia patro estas tipa ekzemplo. Kiam panjo ĵus mortis, li ekstreme malĝojis. Sed li prenis alian virinon malpli ol du jarojn poste. Vi diras, ke vi ne faros tion, sed ili volas, ke vi faru. Ili diros, ke vi ankoraŭ estas juna kaj Haiĉjo bezonas prizorgantaron, kaj vi konsentos. Se vi ne konsentos, ili devigos vin konsenti,” Juehui dins kun malvarma rideto .

“Ili povas devigi min fari aliajn aferojn, sed mi neniel konsentos pri tiu afero,” Juexin afliktiĝe argumentis. “Kaj plie, ĝuste pro Haiĉjo, mi des pli malkonsentos.”

“Do mi respondu al vi kun via sama sento: Mi nepre foriros!” Juehui nereteneble ŝprucigis ridon.

Juexin silentis longan tempon. Poste li afliktiĝe diris, “Mi ne donos al vi helpon. Mi vidu kiel vi foriros !”

“Estas egale, ĉu vi donos al mi helpon aŭ ne. Sed mi diru al vi: kiam vi malfermos viajn okulojn por trovi min, mi jam estos for!” diris Juehui decideme.

“Sed vi ne havas monon.”

“Mono! Mono ne prezentas problemon. Se la familio ne donis al

mi monon, mi prunteprenos ĝin de aliaj. Mi nepre foriros. Mi havas multajn amikojn. Ili certe donos al mi helpon!”

“Ĉu vi ne povas prokrasti?” demandis Juexin senespere.

“Kiom longe?”

“Du jarojn, ĉu ne bone? Post via diplomitiĝo el la Lernejo de Fremdaj Lingvoj,” mildvoĉe admonis Juexin, kiu pensis, ke Juehui ŝanceliĝas. “Tiam vi povos trovi oficon aŭ daŭrigi vian studadon. Unuvorte la situacio fariĝos multe pli bona.”

“Du jarojn? Tro longe ! Nun mi ne povas elteni eĉ momenton. Mi bedaŭras, ke mi ne povas tuj forlasi lasi la urbon!” Juehui pli ekscitiĝis.

“Du jaroj ne estas longa tempo. Vi ĉiam estas tiel urĝema. Vi devas zorge pripensi. Ĉiuj aferoj bezonas paciencon. Kia malutilo estiĝos, se vi prokrastos du jarojn? Vi jam toleris dek ok jarojn, do ĉu neblas elteni ankoraŭ du jarojn?”

“Antaŭe miaj okuloj ankoraŭ ne tute malfermiĝis , antaŭe mi ne havis kuraĝon, kaj antaŭe en la hejmo estis kelkaj, kiujn mi amis. Sed nun restas nur malamikoj.”

Post longa silento Juexin malĝojvoĉe demandis, “Ĉu ankaŭ mi estas via malamiko?”

Juehui rigardis sian fraton kun kompatato. Li sentis sian koron iom post iom moliĝi. Li afable diris al Juexin, “Granda Frato, mi kompreneble amas vin. Ni iam preskaŭ venis al interkompreniĝo, sed nun ni distancas

tre malproksime unu de la alia. Nature vi pli amas bofratinon kaj kuzinon Mei ol mi. Sed mi ne komprenas, kial vi metis ilin sub la disponon de aliaj. Precipe la kazo de la bofratino. Se vi tiam estus iom pli kuraĝa, vi estus povinta savi la bofratinon. Sed nun estas tro malfrue. Tamen vi ankoraŭ parolas al mi pri obeemo kaj volas, ke mi sekvu vian ekzemplon. Mi esperas, ke vi ne admonos min per tiaj vortoj poste, alie mi malamos vin kaj vi fariĝos mia malamiko.” Post tio Juehui sin turnas kaj direktis eksteren, sed Juexin revokis lin. Larmoj elfluis el la okuloj de Juehui. Li pensis, ke estas la lasta fojo por li elverŝi larmojn antaŭ la vizaĝo de Granda Frato.

“Ne, vi ne foriru,” diris Juexin plorvoĉe. “Poste ni interkompreniĝos. Mi havas miajn proprajn malfacilojn en la koro, sed nun mi ne parolu pri tio ... Malgraŭ ĉio, mi donos helpon al vi. Mi turnu min al ili por interkonsiliĝi. Se ili ne konsentos, ni interkonsiliĝos pri aliaj rimedoj. Mi nepre helpos vin akiri sukceson.”

Tiumomente la elektra lampo subite eklumis. Ili rigardis la larmantajn okulojn unu de la alia kaj interŝanĝis pardonajn vortojn per ilia rigardo. Ili restis intimaj fratoj. Ili disiĝis. Ili pensis, ke ili jam interkompreniĝis, sed fakte ne. Disiĝinte de sia frato, Juehui sentis ekstreman ĝojon, ĉar li baldaŭ forlasos la familion. Dume Juexin malĝoje ploradis en la ĉambro, konsciante, ke ankoraŭ unu karulo forlasos lin, tiel ke li vivos pli malgajan kaj pli solecan vivon en la hejmo.

Juexin plenumis sian promeson. Du tagojn poste li private babilis kun Juehui.

Tiun posttagmezon Juexin iris en la ĉambron de Juehui kaj diris al li, “Via afero fiaskis.” Ili sidis ĉe apudaj flankoj de kvadrata tablo. Juexin parolis kun senespero, sed li ne tute malesperiĝis.

“Unue mi iris al panjo. Ŝi ne havas definitivan opinion pri via afero. Kvankam ŝi ne aprobas vian foriron, ŝi tamen ne forte insistas pri sia opinio. Nature ŝi esperas, ke ni havos bonan estontecon. Ŝi sentas kaj malĝojon kaj penton pri la morto de via bofratino. Ŝi kaj la patrino de Ruijue faris la funebrajn aranĝojn por via bofratino, ĉar mi ne devis fari tion. Mi estis pli bona al Mei ol al via bofratino. Mi vidis Mei, antaŭ ol ŝi metiĝis en la ĉerkon, kaj mi person faris funebrajn aranĝojn por ŝi.” Li komencis plorsingulti. “Kompatinda Ruijue ! Pasis preskaŭ tri semajnoj post ŝia forpaso, sed escepte de panjo kaj onklino, neniue el nia familio iris vidi ŝin . Kvina Onklino eĉ malpermesis al Kvara Fratino iri al la templo, kvazaŭ postmorte Ruijue estus misaŭgura fantomo. Mi ne atendis, ke tia homo kia Ruijue venus al tia fino. La servistoj estas bona] al ŝi. Ili ĉiuj iris vidi ŝin. Ĉiufoje kiam mi vidis ŝian patrinon, mi sentis mian koron kvazaŭ trancita de glavo. Ĉiuj ŝiaj vortoj ŝajne entenis siajn profundajn sencojn. Ili riproĉe celis min. Vi ne povas imagi al vi kiel tristas mia koro!” Post tio, li eklarmis.

Komence Juehui atente auskultis la vortojn de sia frato pri lia foriro,

sed tiu deturnis la paroltemon al la morto de lia bofratino, kio ankaŭ altiris la atenton de Juehui. Aŭskultante, li kunpremis la lipojn kaj pugnigis la manojn. Li jam forgesis sian propran aferon. Antaŭ liaj okuloj aperis la karnoplana vizaĝo kaj poste ĉerko. Iom post iom la ĉerko malgrandiĝis kaj transformiĝis en du, tri pliajn ĉerkojn. Ankoraŭ tri virinaj vizaĝoj sin prezentis — unu estis graseta ; dua estis funebra kaj malĝoja ; tria estis naiva kaj vigla. La nombro de vizaĝoj pliiĝis, kvar, kvin... Ĉiuj konataj de li. Poste multaj vizaĝoj aperis kaj tuj tute neniigis. Antaŭ liaj okuloj restis nur unu vizaĝo — la vizaĝo de lia frato, malgrasa kaj larmomakulita. Li mallaŭte parolis al si, “Mi ne ploru.” Li firme premis la tablon per la pugnoj. Li vere ne elverŝis eĉ guton da larmoj.

En la ĉambro regis suferiga kvieto. El la halo alflugis la bruo de preĝado de bonzoj, akompanate de frapado de gongo kaj tamburo.

Post iom da tempo Juexin eligis vespiron.

Elpoŝiginte tukon kaj forviŝinte siajn larmojn, li malrapide daŭrigis, “Mi parolis pri via afero, sed mi forportis la paroltemon tro malproksimen.” Li volis rideti, sed ne sukcesis. “Panjo diris, ke ŝi ne povas fari la finan decidon. Ŝi petis min iri al Tria Onklo. Post kiam mi diris vian aferon al li, li severe kritikadis. Li ankoraŭ riproĉis min, ke mi ne komprenas la ceremonian kutimon. Li diris, ke nur post kiam la avo estos enterigita, vi estos permesita foriri . En la funebra salono estis aliaj homoj, kiuj ĉiuj apogis Trian Onklon. Ankaŭ sinjorino Chen

eldiris mokajn vortojn kaj menciis la aferon de la diablokaptado. Ŝi aludis, ke la morto de la avo rilatas al via tiama konduto. Sed ŝi ne kuraĝis klare deklari tion, kaj plie neniu apogis ŝin...”

“Hm! Eĉ se ili publike apogus ŝin, mi ne timus,” Juehui diris kun malvarma rideto. “Nu ! Mi vidu, kion ili faros kontraŭ mi!”

“Kion ili faros kontraŭ vi?” Juexin daŭrigis, “ili faros nenion kontraŭ vi. Tamen ili ekhavas pli multan materialon por ataki min. Ili ne alprenos rimedon kontraŭ vi. Ili ne permesos al vi foriri , eble pro mi.” Li malĝoje gratis siajn harojn. “Ili diris, ke la vojaĝo per boato aŭ sur tero estas danĝera, kaj multe pli danĝere, se oni renkontos banditojn ; Ŝanhajo estas malvirta urbo, ke vi malboniĝos se vi iros tien ; sendi knabojn en lernejon por lerni estas malbona afero, kaj la avo forte oponis kontraŭ tio dumvive ; la lernejoj en Ŝanhajo estas pli fiaj kaj nur konvertas la lernantojn al dandoj aŭ tumultantoj . Jen onklo diris tion jen onklino diris alion. Fakte ilia intenco estas malpermesi al vi foriri . Laŭ ilia opinio vi devas ne nur atendi ĝis la avo estos enterigita, sed resti hejme por eterne.”

“Ĉu vi violas ke mi restu por eterne?” demandis Juehui abrupte.

Longan tempon Juexin restis silenta, ĉar li konsideris, ĉu ekzistas alia rimedo. Li sciis, ke Juehui certe foriros, kaj plie li jam promesis doni helpon al li. Li penseme diris, “Estas bone ne foriri portempe. Estus tute egale, se vi foriros la venontan printempon.”

Juehui stariĝis kaj forte frapis la tablon per sia pugno. Li decideme diris, “Ne, mi nepre foriros ! Mi insiste agos kontraŭ ilia volo. Mi montros al ili kia mi estas. Mi volas esti ribelanto kontraŭ la malnova moralo.” Dirinte, li paŝadis tien kaj reen je du fojoj en la ĉambro. Li senĉese diris la vorton “ribelanto”, kvazaŭ li ne komprenus ĝian sencon. Poste li iris al la skribotablo kaj prenis la litografitan informilon pri la kulta ceremonio de la avo, kiun Juexin ĵus alportis. Li foliumis la aldonajn foliojn skribitajn de Tria Onklo pri la vivo de la avo. Li kolere diris, “Kiel belaj vortoj! ‘Klerigo kondukas al prudento, ŝparemo al bona aranĝado de hejmaferoj’ . Kiu el nia familio estas prudenta , kvankam ili estas klerigitaj ?”

Juexin haste diris, “Tio estas la ĵus presita specimeno. Ne disŝiru ĝin!”

Juehui ekridetis. Li metis la informilon sur la tablon kaj diris, “Kial vi pensas, ke mi disŝiros ĝin?” Poste li demandis al Juexin, “Kio estas via opinio?”

“Mi proponas, ke vi foriru la venontan jaron,” Juexin petante diris, rigardante Juehui.

“Ne, ne. Mi havas mian propran rimedon,” insistis Juehui, “ĉu vi aprobas kaj donos al mi helpon aŭ ne, mi tamen foriros ! Mi ne deziros revidi vin por eterne !” Li denove paŝadis en la ĉambro.

Levinte la kapon, Juexin stulte rigardis Juehui. Post kelka tempo liaj okuloj ekbrilis. Li diris kun subita decido, “Mi diris, ke mi helpos

vin. Nun mi certe donos al vi helpon... Vi plenumos, kion mi ne povas. Ni agu sekrete. Ĉu vi ne diris, ke iu pruntedonos al vi monon por la vojaĝo? Ankaŭ mi povas havigi al vi. Estas bone havigi al vi pli da mono. Se io okazos, kontaktu min! Laŭ mi, nenio grava okazos al vi post la foriro.”

Juehui alpaŝis al Juexin kaj prenis lian brakon. Li laŭte demandis kun miro, “Ĉu vere? Ĉu vi volonte donos al mi helpon?”

“Mallaŭte, alie oni aŭdos nin. Neniam diru al aliaj, ke mi donis al vi helpon. Post via foriro, mi povos ŝajnigi min nescia. Vi povos skribi leteron por riproĉi min, tiel ili des malpli suspektos min. Pli la detaloj ni interkonsiliĝu aliloke post momento. La ĝardeno estas konvena loko. Estas neoportune babili ĉi tie,” Juexin serioze diris mallaŭte.

“Prave, estas ja iom neoportune,” enflugis klara virina voĉo. La pordokurteno leviĝis. Eniris Juemin kaj Qin. La parolinto estis Qin, kiu ekridis, kiam ŝi eniris. Juemin diris, “Via plano vere estas bona.”

“Kial vi subaŭskultis ekstere, anstataŭ eniri?” riproĉis Juexin.

“Ĉar ni aŭdis, ke vi parolas pri sekreta agado, sekve ni kaj subaŭskultis kaj servis kiel viaj gardostarantoj. Tio estis elpenaĵo de Qin,” Juemin subtile ridetis al Qin. Ankaŭ ŝi respondis per delikata rideto. Ruĝeta nuboj eksvebis sur ŝia vizaĝo, sed ŝi ruĝiĝis pro io alia. Post tempeto la ruĝeta nuboj malaperis de ŝia vivoplena kaj ĉarma vizaĝo. Juehui fiksas sian rigardon sur ŝia vizaĝo kaj amare ridetis al ŝi.

Ankoraŭfoje ruĝeta nubo aperis sur ŝia vizaĝo. Deturninte la kapon, ŝi iris al la skribotablo kaj sidiĝis sur la kanseĝo.

“Kuzinjo Qin, mi baldaŭ foriros, sed vi eĉ malpermesas al mi sendi al vi pli da rigardoj!” Juehui diris ŝerce kaj plende. Juexin kaj Juemin ekridis.

Qin direktis sian rigardon al Juehui. Ŝi rigardis lin tiel milde, kiel pliaĝa fratino rigardas sian karan frateton. Malgaja rideto fulmis tra ŝia vizaĝo. Ŝajnis, ke ŝi volis paroli, sed ne sukcesis. Tamen ŝia kutima rideto revenis al ŝia vizaĝo. Ŝi bonintence diris, “Rigardu min laŭ via plaĉo. Se vi ankoraŭ ne sufiĉe rigardas, mi donacos mian foton al vi, ĉu bone?”

“Bone, vi mem donas la promeson kaj ili servas kiel atestantoj,” diris Juehui bonhumore, “mi nepre akiros la foton morgaŭ.”

“Mi plenumos, kion mi promesis. Ĉu mi iam trompis vin?” diris Qin ridetante.

Juehui pensis, “Vi ĉiam havas spritajn vortojn. Mi embarasos vin per aliaj vortoj.”

Li diris, “Unu foto ne sufiĉas! Poste mi skribos leteron por peti foton de vi kaj Dua Frato kune.”

Tiuj vortoj vere pruviĝis efikaj. Ŝi ŝajnigis ne aŭdi ĝin. Ŝi deturnis la kapon kaj ekfoliumis libron sur la tablo.

“Konsentite. Mi certe donacos ĝin al vi,” respondis Juemin

ridetante anstataŭ ŝi. Poste li diris al Juexin, “Granda Frato, nia afero bezonas vian helpon. Onklino jam konsentis kaj panjo supozeble ne kontraŭos. Post kiam la funebra tempo de la avo finiĝos, ni proponos nian geedziĝon. Tamen mi esperas, ke nia geedziĝa ceremonio okazos en la nova maniero.

Juexin kuntiris siajn brovojn, pensante, ke prezentiĝas ankoraŭ malfacila problemo. Li tuj respondis, “Estos longa tempo ĝis tio. Ni parolu pri via afero kiam ĝia tempo venos. Kredeble ni trovos solvon.” Li eldiris la lastan frazon por konsoli Juemin. Fakte li pensis, ke eble ili povos fari nenion.

“Ankaŭ vi foriru al Ŝanhajo. Mi atendos vin tie,” Juehui ekscite diris.

“Ne estas certe, ke ni povos iri al Ŝanhajo. Se la onklino ne volos foriri, estos nedece forlasi ŝin. Ĉiuokaze ni devas atendi almenaŭ du jarojn, antaŭ ol ni povos foriri kune.”

“Kiel solvi la problemon pri studado de Qin en la lernejo?” Juehui demandis kun zorgemo.

“Ŝi abiturientiĝos la venontan jaron. Tiam la Lernejo de Fremdaj Lingvoj eble nuligos la malpermeson pri akcepto de knabinoj. Alie, ŝi mem povos prepari siajn lecionojn por unu aŭ du jaroj kaj poste enskribiĝi al universitato en Ŝanhajo. Kiel vi opinias, Qin?” Juemin turnis la kapon por demandi.

Levinte la kapon, ŝi ridetis anstataŭ malĝoje mieni kaj tenis sin silenta. Ŝi kredis Juemin kaj ankaŭ komprenis, ke li prizorgas ŝin.

Juehui ne parolis plu. Li silente rigardadis Qin kaj Juemin. Jen li enviis Juemin, konsiderante, ke tiu estas pli feliĉa ol li mem, jen li sentis ĝojon pri si mem, ĉar li sola povos baldaŭ forlasi la abomenindan familion kaj iri al Ŝanhajo por krei sian novan aferon. Ŝanhajo estis urbo plena de aktivadoj novaj kaj nekonataj al li. Tie ankaŭ troviĝis la prospera amasa Movado de Nova Kulturo kaj kelkaj junaj plumamikoj, kiujn li konis nur laŭnome.

“Estas pli bone iri al la ĝardeno por interkonsiliĝi. Dua Frato, vi iru kun Qin la unuaj,” diris Juexin, verŝajne ekmemorinte ion gravan. Tiumomente ili subite aŭdis la raŭkan vokadon de la servisto Yuan Cheng, “Unua Sinjorido!” Juexin diris al Juehui, “Tria Frato, ankaŭ vi iru. Mi estos tie post momento. Vi atendu min en la domo ‘Aromo ĉe Vesperigo’.” Dirinte, li haste eliris.

Qin, Juemin kaj Juehui restis en la ĉambro kaj interŝanĝis kelkajn vortojn. Juemin kaj Qin eliris la unuaj. Kaj post momento ankaŭ Juehui elpaŝis el la ĉambro. Juehui vidis, ke Juexin babilas en la korto kun Yuan Cheng, kaj poste legas funebran skribrulaĵon, kiun la servisto transdonis al li.

Juehui iris al Juexin. La funebra skribrulaĵo legiĝis jene:

La tua familio ploras pro perdo de la karulino; la edzo sentas brulan

maltrankvilon pro la aldona korpreno, ke la novnaskito neniam ricevos patrinan amon; la bopatrino transprenas la senfine lacigan devon eduki la infanon.

Juehui sciis, ke tio estas funebra skribo sendita de la frato de la bofratino . Kun korpreno , li foriris . Li volis trovi Juemin kaj Qin en la ĝardeno, sed apenaŭ elirinte el la koridoro kaj trapasinte la pordon de la ĝardeno, li aŭdis la maljunan servistino Huang voki lin.

“Tria Sinjorido, oni preparis kukojn el hirundnesto*. Mi scias, ke vi ŝatas ilin, do mi rezervis kelkajn por vi . Kiam vi volos manĝi voku min, kaj mi vaporumos ilin kaj alportos al vi,” diris la servistino Huang, rigardante lin kun rideto.

“Bone, alportu al mi je la deka nokte,” Juehui dankeme diris. Post tio li eniris en la ĝardenon.

Juexin ankoraŭ staris tie, distriĝeme rigardante la funebran skribrulaĵon. Sciante, ke Juexin sopiras al la juna sinjorino, la servisto sentis korprenon. Kun la supra fino de la rulaĵo en la mano, li klinis la kapon, atendente ordonon de Juexin. Post longa tempo Juexin volvis ĝin kaj ordonis al la servisto meti ĝin en la ĉambron, post kio li sin direktis al la ĝardeno. “Nia familio bezonas ribelanton,” li pensis. “Mi nepre helpos Trian Fraton akiri sukceson. Pere de li, mi povos doni al ili malgrandan baton.” Li nereteneble murmuris al si, “Atendu kaj vidu. Ne ĉiuj familianoj estas obeemaj kiel mi!”

*Hirundnesto — nesto el hirunda sekrecio, manĝebla kaj rigardata en la ĉina gastronomio kiel valora nutraĵo.

39

“Se Juehui foriros, nia rondo estos pli kvieta,” diris emociite la plej aĝa rondano Wu Jingshi en la legĉambro. Li diris al Juehui, “Xu Qianru foriris antaŭ nelonge, kaj ankaŭ vi baldaŭ foriros...”

“Kaj tiom pli, mankos al ni bona helpanto,” diris Zhang Huiru.

Juehui foliumis ĵumalon sur la tablo. Je ekvido de la vizaĝo de siaj amikoj, li ekpensis pri ilia kuna laborado kaj vivado, kaj pri la sincera konsolo, simpatio, kuraĝigo, helpo, espero kaj ĝojo hejme neakireblaj, kinjn ili dons al li. Dum tiuj monatoj li venis tien preskaŭ ĉiutage kaj renkontiĝis kun ili. La loko kaj la homoj jam fariĝis nemalhavebla parto de lia vivo. Li neniam imagis al si, ke li disiĝos de ili, sed nun li forlasos ilin kaj veturos malproksimen. Li sentis honton, bedaŭron kaj dankemon. Li pensis: post lia foriro, ĉio iros kiel kutime, la legĉambro malfermiĝos al la publiko ĉiutage, la rondanoj alvenos ĉiutage kaj la gazeto eldoniĝos ĉiusemajne, sed li ne povos partopreni en la laboroj. Li foriros, foriros malproksimen. Li ne plu povos dividi malĝojon kaj ĝojon kun ili, ne plu povos aŭdi Huang Cunren elpremi kotizon kaj ne plu povos aŭskulti Zhang Huiru rakonti pri sia sperto en lombardejo. Tiumomente li eksentis grandan bedaŭron pri multaj, multaj nepluaĵoj. Li melankolie diris, “Mi ne devus forlasi vin kaj foriri sola. Nun estas multaj aferoj farindaj kaj vi estas tiel okupitaj. Sed mi laboris preskaŭ neniom, sekve ne gravas, se mi mankos al

vi.”

“Kion vi diris, Juehui! Ĉar vi troviĝas en tia familia situacio, ju pli frue vi foriros, des pli bone. En Ŝanhajo vi faros pli grandan progreson en lernado kaj pliigo de viaj scioj. Tie vi povos renkontiĝi kun niaj plumamikoj, konatiĝi kun novaj amikoj kaj trovi pli multajn kaj pli signifoplenajn laborojn. La tiea Movado de Nova Kulturo estas pli varma ol ĉi-tiea. Ŝanhajo estas pli moderna ol nia damninda urbo. Ĉi tie eĉ la virinoj kun mallonge tondita hararo ne povas eliri sen renkonti mokojn ! ...” Huang Cunren kuraĝigis.

“Kaj cetere vi povos ofte sendi al ni kontribuaĵojn. Vi povos provizi nian gazeton per pli bonaj kaj pli freŝaj informoj, kaj per pli enhavoriĉaj kaj pli varmaj artikoloj ,” intermetis Zhang Huiru.

“Jes, mi certe sendos al vi kontribuaĵojn regule. Ĉu bone aŭ malbone mi skribos, mi sendos por ĉiu numero unu pecon,” ekscitite diris Juehui.

“En la estonto ni nepre multe korespondu unu kun la alia,” diris Huang Cunren.

“Kompreneble. Mi atendas viajn leterojn certe pli malpacience ol vi la miajn. Post kiam mi forlasos vin, mi certe sentos solecon. Mi ankoraŭ ne scias, ĉu mi povos trovi en la malsupra baseno tiel bonajn amikojn kiel vi...” diris Juehui kun bedaŭro.

Zhang Huanru ekridetis kaj diris, “Sed niaflanke ni timas, ke ni ne

povos trovi tiel bonan amikon kiel vi.”

“Ĉi-foje mi povas foriri , tute dank’ al viaj helpoj, precipe Cunren, kiu jam donis al mi kelkajn grandajn helpojn,” Juehui sincere diris. Li dankeme rigardis Huang Cunren, kiu afable ridetis, kaj li diris, “Kion vi diris! Tio estas nenio! Se vi troviĝus en mia situacio, vi agus kiel mi.” Poste li demandis, “Ĉu vi jam alportis al mia hejmo viajn pakaĵojn? Kion alian vi havas?”

“Nenion pli,” Juehui respondis. Poste li klarigis, “Ne estas nenio, sed mi ne povos kunporti pli da aĵoj . Mi restigas multajn librojn en la hejmo. Mia Granda Frato promesis poste sendi ilin al mi. Mi timas, ke se la familio malkovros mian aferon pro iu mia eta malzorgo, tio kaŭzos multajn ĝenojn. Sekve mi stele alportis miajn pakaĵojn al via hejmo frumatene.”

Tuj poste Juehui demandis, “Ĉu la boato vere ekveturos post du tagoj, Cunren?”

“Ankaŭ mi ne estas certa pri tio. Parenco donos al mi informojn. Mi esperas, ke la boato ekveturos unu aŭ du tagojn pli malfrue, tiel ke ni povos renkontiĝi ankoraŭ kelkfoje. Kaj plie, la amikoj de nia rondo morgaŭ okazigos adiaŭan festenon honore al vi,” diris Huang Cunren.

“Adiaŭa festeno? Nenecese,” Juehui rifuzeme diris, “ estas bone babili pli longan tempon kiel nun. Kial adiaŭa festeno?”

“Ni nepre faros tion. Ĉar ni baldaŭ disiĝos, ni ankaŭ devas havi

gajan kolektiĝon. Ĉi-foje mi havas monon en la mano. Ne necesas lombardi mian veston,” diris Zhang Huiru. Tiuj lastaj vortoj ridigis ĉiujn ĉeestantojn.

“Ĉi-foje ni ĉiuj regalos Juehui. La elspezo estos dividita inter ni ĉiuj,” diris Huang Cunren ridetante.

“Ankaŭ mi pagu mian porcion,” diris Juehui.

“Kompreneble vi ne devas pagi,” diris Wu Jingsi. Ĝuste kiam li volis plu diri, enkuris junulo. Ĉiuj levis la kapon kaj direktis la rigardon al li.

La enkuranto estis Chen Chi, samklasano de Juehui, kaj membro de la rondo. Kun ruĝiĝinta vizaĝo, li anhelis pro kurado. Tuj kiam li enkuris, li diris, “Mi malfruiĝis!”

“Tio ne gravas. Vi ofte malfruas, tial vi nomiĝis ‘Chi’^{*},” diris Zhang Huiru humure.

Donante nenian atenton al Zhang, la junulo diris al Huang Cunren, “Cunren, mi ĵus renkontis vian parencon sinjoron Wang. Li petis min komuniki al vi, ke la ekira tempo de la boato ŝanĝiĝis al morgaŭ matene.”

“Morgaŭ matene?” Juehui mirigite diris, “ĉu oni ne diris, ke ĝi ekiros post du tagoj?”

“Se mi mensogus al vi, mi ne estus homo ! Mi propraorele aŭdis, ke ĝi ekiros morgaŭ matene.”

“Vi diris, ke vi morgaŭ okazigos adiaŭan festenon honore al mi,” Juehui malespere diris.

“Ne gravas. Do ni tion faru hodiaŭ. Jam estas ne frue. Ni tuj iru al restoracio. Eble vi bezonos hejmeniri frue por fari kelkajn aranĝojn,” Zhang Huiru vankore diris.

“Lasu! Mi tuj hejmeniru!” Juehui diris maltrankvile. Li ekpensis pri siaj du fratoj en la hejmo.

“Vi ne povas foriri,” kelkaj rondanoj unuvoĉe kriis, “ni ne lasos vin foriri.”

Vidinte la embarasitan mienon de Juehui, Huang Cunren mirigite demandis, “Kial tuj hejmeniri? Ĉu vi ne volas preni unu manĝon kune kun ni? Post ĉi-foja disiĝo, ni ne scias kiam ni havos tian ŝancon.”

Antaŭ ol Juehui respondis, la rondanoj eldiris kelkajn retenajn vortojn. Zhang Huiru komencis reinstali la vandotabulojn^{**} por fermi la ĉambron. Li estis forta kaj la laboro ne estis malfacila por li. Zhang Huanru kaj Chen Chi helpis lin. Huang Cunren ordis la dokumentojn

La situacio mutigis Juehui. Li diris kun amara rideto, “Bone, mi ne foriros.” Li silente iris al restoracio kune kun siaj amikoj kaj iom post iom sentis ekzaltan ĝojon inter ili.

Kiam ili eliris el la restoracio, jam falis la nokta vualo. Venteto de frua aŭtuno karesis iliajn brulajn vizaĝojn. Kun subŝtofito robo el nigre griza tolo, Juehui sentis iom da frosto. Starante sub tegmentrando, ili

rigardis interpusiĝantajn pasantojn sur la strato. Wu Jingshi la unua alpaŝis al Juehui kaj etendis sian manon, dirante, “Mi foriru, ĉar mi havas kelkajn aferojn por fari. Morgaŭ matene mi ne iros adiaŭi vin. Nun ni diru adiaŭ ĉi tie. Bonan vojaĝon.” Ili ambaŭ manpremis. Juehui diris, “Dankon, dankon...” Post la adiaŭado, Wu Jingshi perdiĝis en la homfluon. Poste kelkaj aliaj adiaŭis Juehui. Ankaŭ Zhang Huanru adiaŭis lin kaj reiris al sia lemejo.

“Ni akompanu vin ĝis via pordo,” proponis Zhang Huiru. La vizaĝon de Juehui rigardis lia paro da brilaj okuletoj sur la ruĝa triangula vizaĝo. Juehui kapjesis. Ili kvar enmiksitis sin en movplenan homfluon. Trapasinte du stratojn, Chen Chi adiaŭis.

Ili iris en kvietan straton. En la lunlumo la stratlampoj pale brilis. La pordegoj de riĉaj domoj ŝajnis nigraj faŭkoj. Altaj soforoj en kelkaj kortoj ĵetis siajn ombrojn sur la arĝente blankajn ŝtonplatojn. La branĉoj kaj foliaro estis klare projekciitaj surtere, nek tretite de homaj paŝoj nek movite de la vento. Ili similis la pentraĵon de majstro.

“Kial ci tiu urbo estas tiel kvieta?” Juehui pensis. Li ne havis inklinon paroli, sed levis la kapon kaj silente rigardis la ankoraŭ ne tiel rondan lunon glitantan sur la blua ĉielo.

“Kiel ĉarma luno! La brila luno vere similas al diafana akvo! Postmorgaŭ jam estos la Aŭtunmeza Festo^{***},” Zhang Huiru admiris. Poste li elmetis demandon al Juehui, “Ĉu vi ne sentas bedaŭron forlasi

ĉi tiun lokon?”

Antaŭ ol Juehui respondis, Huang Cunren diris, “Kio bedaŭrinda ekzistas ĉi tie? En Ŝanhajo li trovos pli bonan medion.”

“Miaj kelkaj karuloj estas ĉi tie. Pensu, kiel mi povus ne senti bedaŭron?” Juehui pene diris. Per “kelkaj karuloj” li aludis ilin ambaŭ kaj kelkajn en la hejmo.

Fine ili atingis lian pordon. La vorto “adiaŭ” signis la disiĝon.

Enirinte en la korton, anstataŭ iri al sia ĉambro, li sin direktis al la ĉambro de Juexin. Tiu kaj Juemin interbabilis en la ĉambro.

“Granda Frato, mi ekiros morgaŭ matene,” diris Juehui post kelka hezito.

“Morgaŭ matene? Ĉu vi ne diris, ke vi ekiros la tagon post la Aŭtunmeza Festo?” Juexin tuj paliĝis. Li forpuŝis la seĝon kaj stariĝis.

Ankaŭ Juemin surprizite starigis kaj rigardis la vizaĝon de Juehui.

“La dato ŝangiĝis, ĉar la boaton luis parenco de Huang Cunren, li decidis la daton. Ankaŭ mi sciiĝis pri tio nur ĉi-vespere,” Juehui diris ekscitite.

“Kiel urĝe!” Juexin senespere murmuris al si, apogante sian manon sur la skribtablo. “Do, restas al ni nur ĉi nokto.”

“Granda Frato,” Juehui emociite vokis. Kun larmoj en la okuloj, Juexin turnis la kapon por rigardi lin. Juehui daŭrigis, “Mi volis hejmenveni pli frue por manĝi kune kun vi, sed ili insiste retenis min por

adiaŭa festeno. Tial mi revenis nun...” Li englutis la finon de la frazo.

“Mi iru informi Qin. Ŝi havas aferojn por diri al vi. Morgaŭ estos malfrue por ŝi,” diris Juemin kaj ekiris eksteren.

Retenante lin, Juehui diris, “Ĉu vi ne scias, kioma horo estas nun? Al ŝia hejmo? Ĉu vi volas frapi sur ŝian pordon? Tio fuŝus mian aferon.”

“Do ŝi ne havos ŝancon intervidiĝi kun vi,” Juemin senespere diris, “ŝi plendos kontraŭ mi, ĉar ŝi diris al mi tion kelkfoje.”

“Ni iros al ŝi tre frue morgaŭ matene, mi pensas, ke ni certe havos sufiĉan tempon,” Juehui konsolis Juemin, vidinte lian maltrankvilan mienon. Fakte li mem ankoraŭ ne sciis, ĉu ili morgaŭ matene povos iri renkonti Qin.

“Ĉu viaj pakaĵoj ĉiuj estas pretaj?” demandis Juexin kun zorgemo.

“Jes Mi jam sendis ilin al la kajo. Ne estas multaj, nur litaĵpako, korbego kaj malgranda valizo.”

“Ĉu vi portas kun vi sufiĉe da vestoj? Kunportu sufiĉe multe. La vetero pli kaj pli malvarmiĝas,” admonis Juexin kun larmoj en la okuloj. Lia rigardo ree ekzamenis la korpon de Juehui.

“Sufiĉe, pli ol sufiĉe. Trankviliĝu,” Juehui kapjese respondis.

“Vi ne havas sufiĉe da manĝaĵoj por la vojo. Ĉe mi estas kelkaj ladskatoloj da ŝinko, kiujn oni donacis al mi. Vi kunportu ilin,” diris Juexin. Ne atendente la respondon de sia frato, li eniris en la internan ĉambron kaj eliris kun kvar ladskatoloj en sia brakumo.

“Fakte mi ne bezonas tiel multe. Ne mankos al mi manĝaĵoj survoje,” Juehui dankeme diris, vidinte Juexin paki la ladskatolojn.

“Ne gravas. Ili ne alportos malutilon al vi. Ĉiuokaze mi ne bezonas ilin.” Pakinte ladskatolojn, Juexin metis ĝin antaŭ Juehui.

“Rilate al vojaĝkosto, ni agu laŭ la maniero interkonsentita lastfoje,” Juexin diris, “mi poste sendos monon al poŝtoŭicejoj en Chongqing, Hankou kaj Ŝanhajo respektive kaj vi persone ĝin prenu. Jam morgaŭ mi poŝtigos ĝin. Ĉu sufiĉas la sumo, kiun mi donis al vi hierau? Se ne, mi donu ankoraŭ iom al vi.

“Sufiĉe, jam sufiĉe. Neoportune kunporti tro multe da arĝentaj moneroj survoje. Feliĉe la vojoj estis sufiĉe sekuraj lastatempe,” Juehui respondis.

“Jes, feliĉe la vojoj estis sufiĉe sekuraj lastatempe,” Juexin mekanike ripetis.

Juemin kaj Juehui interŝanĝis kelkajn vortojn.

“Tria Frato, vi devas enlitiĝi nun. Morgaŭ vi ellitiĝos tre frue kaj vi pasigos kelkajn tagojn sur la boato. Vi devas bone ripozi,” Juexin afable diris.

Juehui donis malklaran respondon.

“Poste vi vivos sola. Zorgu pri via vestado kaj manĝado. Vi ĉiam preteratentis tion. La tiea vivo ne similos al tiu en la hejmo. Se vi malsaniĝos, neniuj prizorgos vin,” Juexin diris kun zorgemo.

Juehui donis alian malklaran respondon.

“Survoje ofte skribu leterojn al mi. Mi poŝtos viajn librojn al Ŝanhajo, post kiam vi atingos ĝin,” estis vortoj de Juexin.

Juehui murmure jesis.

“En Ŝanhajo elspezu tiom, kiom vi bezonos. Mi respondecos pri viaj monrimedoj, senkonsidere en kiun ajn lernejon vi enskribiĝos. Estu libera de zorgoj. Se mi nur estos en la hejmo, ili ne povos fari ion malutilan kontraŭ vi,” Juexin daŭre parolis. Larmoj jam ruliĝis sur lia vizaĝo.

Juehui malklare respondis, penante subpremi la malĝojan senton.

“Vi estas feliĉa. Vi tuj eliros vin el la amara maro, sed ni...” Juexin ne plu povis paroli. Liaj kruroj cedis, kaj li retroiris du paŝojn kaj falsidiĝis sur seĝon. Li kovris ambaŭ okulojn per la dekstra mano.

“Granda Frato,” Juehui malgaje vokis. Juexin ne respondis. Juehui alpaŝis al li kaj refoje vokis lin. Demetinte, la manon kaj ĵetinte ekrigardon al li, Juexin i skue diris, “Mi sentas min bone. Estas nenio. Enlitiĝu.”

Juehui kaj Juemin eliris.

Kiam li vidis la lamplumon en la ĉambro de sinjorino Zhou, Juehui diris, “Mi volas paroli kun panjo.”

“Pro kio vi iras paroli kun ŝi? Ĉu vi diros vian aferon al ŝi?” Juemin mirigite demandis

“Ne por tio,” Juehui ridetante respondis. “Mi volas paroli kun ŝi antaŭ mia forlaso. Eble tio estos la lasta intervido kun ŝi.”

“Bone, iru,” Juemin mallaŭte diris. “Sed gardu vian langon. Ne kaŭzu al ŝi suspekton.” Post tio, Juetmin iris al sia ĉambro kaj Juehui sola eniris en la ĉambron de sia duonpatrino.

Sidante sur kanseĝo, sinjorino Zhou babilis kun Shuhua. Vidinte Juehui eniri, ŝi ridetante diris, “Denove vi ne revenis por vespermanĝo.”

Li ridete diris “Jes” kaj haltis malproksime de ŝi.

“Vi vagas ekstere tuttage. Kion vi faras ekstere? Zorgu pri via sano!” sinjorino Zhou afable diris.

“Mi havas bonan sanon. Vagadi ekstere estas pli bone, ol sidi hejme kaj suferi riproĉojn,” sin pravigis Juehui ridetante.

“Kiel vi emas argumenti!” riproĉis sinjorino Zhou ridetante. “Ne estas mirige, ke viaj Kvara Onklo kaj Kvina Onklo klaĉis kontraŭ vi hodiaŭ kaj eĥis viaj Kvara Onklino, Kvina Onklino kaj sinjorino Chen. Por honeste paroli, vi vere estas tro malcedema. Vi timas neniun. Eĉ mi ne povas jungi vin,... Estas strange. Vi kaj via Granda Frato estas naskitaj de la sama patrino, sed vi du estas tute malsamaj laŭ temperamento. Neniu el vi similas al via patrino. Via Granda Frato estas tro cedema, dum vi tro malcedema. Neniu el vi estas elsavebla!” Shuhua ridetis, rigardante Juehui.

Juehui volis argumenti, sed li retenis siajn vortojn. Li eksentis, ke li devas aludi al ŝi, ke li foriros . Almenaŭ ŝi scios lian senton post lia foriro. Li faris paŝon antaŭen al ŝi.

Vidinte a agmanieron kaj hezitemon de Juehui, sinjorino Zhou afable demandis, “Kian aferon vi havas? Ĉu vi venas interkonsiliĝi kun mi pri via lernado en Ŝanghajo?”

Ŝiaj vortoj atentigis lin, kaj li ekmemoris la averton de Juemin. Li konsideris, ke estas pli bone por li ne paroli multe, alie lia afero afero malkaŝigos. Li altrudis ridon kaj rekte respondis, “Nenion. Mi iru enlitiĝi nun. Ĵetinte du ekrigardojn al la ronda vizaĝo de sinjorino Zhou kaj poste sendinte sian rigardon al Shuhua, li turns sin kaj eliris. Kiam li trapasis la pordon, li ŝajne aŭdis sinjorinon Zhou diri al Shuhua pri lia stranga temperamento. Li amare pensis, “Ni verŝajne ne havos ŝanon revidi unu la alian. Post la foriro, mi ne revenos al la hejmo, kiel birdo eskapinta el la kago”

Elirinte el la ĉambro, Juehui paŝis en la ĉefhalon. Paro da geknaboj faritaj el papero solece staris antaŭ la nomtabulo de la avo. Elektraĵ lampoj lumis. Sur la altaro paro da kandeloj portis grandajn nigrajn meĉodebrulaĵojn . Malantaŭ la blanka funebra kurteno la nove lakita ĉerko de la avo estis metita sur du malaltaj benkoj. La falsa tombo por protekti la ĉerkon estis forigita antaŭ nelonge. El la ĉambro de la avo elflugis babilado de sinjorinoj Chen kaj Wang. Subite sinjorino

Wang eligis haha-ridojn — ŝiaj kutimaj ridoj, falsaj kaj malplenaj. Li turnis sian kapon kaj ekrigardis la pordon de la avo kun blanks tolkurteno. Poste lia rigardo falis sur la nomtabulon de la avo. Li kuntiris siajn brovojn. Apenaŭ foriginte la meĉodebrulaĵojn per pinĉilo, li aŭdis paŝbruon. Li turnis la kapon kaj vidis serviston Su Fu eniri .

“Tria Sinjorido, mi forigu ilin,” diris la servisto kun kelkaj grizaj mentonharoj.

“Kial neniuj trovigas ĉi tie? La incensbastonetoj tuj fimbros,” diris Juehui.

“La ordono ne estis tiel klara, tial oni kaptis la ŝancon por ripozi,” respondis la servisto Su Fu ridetante kun bedaŭro.

Juehui diris nenion kaj eliris el la ĉefhalo.

*Chi signifas en la ĉina “malnova”.

** Vandotabuloj— moveblaj tabuloj per kiuj oni formas vandon de butikoj anstataŭ muron kun pordo kaj fenestroj de la flanko de strato.

*** Ĝi okazas je la 15-a de la oka monato lunkalendara.

40

Tiun nokton Juehui dormis nur tri aŭ kvar horojn. Antaŭ tagiĝo li vekigis. Kuŝante en la lito, li pensis pri tio kaj alio ĝis elkrepuskiĝo.

Estis la tempo ekiri. Li ne povis resti pli longe en la hejmo, ĉar li devis iri kune kun Juemin al Qin.

Surstrate estis kviete. Vidiĝis nur kelkaj kuiristoj kun legomkorboj, kampuloj kun du siteloj vektoportataj por sterko kaj du kolportistoj. La ĉielo estis sennuba. Ora sunlumo brile prilumis la muron de la kontraŭa domo. Sur branĉoj de soforo sennombraj paseroj senĉese ĉirpadis, bonvenigante la leviĝantan sunon.

Ĉe malgranda kortodomaro Juehui haltis. Li diris kun larmoj, “Mi foriras, Granda Frato. Vi reiru.” Li firme premis la dekstran manon de Juexin.

“Bedaŭrinde mi ne povas akompani vin malproksimen,” Juexin vee diris, rigardante lin per larmantaj okuloj. “Bone zorgu pri via sano survoje. Ofte skribu al mi.”

“Mi foriras,” Juehui ripetis. Li ree firme ekpremis la manon de Juexin kaj sinforgece diris, “Ne malĝoju. Ni certe revidos unu la alian. Estas certe, ke ni havos ŝancon renkontiĝi.” Li abrupte forlasis lian manon, kvazaŭ forĵetinte ĝin. Li sin turnis kaj ekiris. De sur lia maldekstra mano pendis kvar ladskatoloj da ŝinko bone pakitaj.

Juehui du-trifoje turnis la kapon malantaŭen por rigardi Juexin kaj tiu svingis sian brakon al li, starante ĉe la pordo de la kortodomaro. Kiam la dorso de Juehui perdiĝis iom post iom, Juexin ankoraŭ staris tie, svingante la manon en la direkto, kie li malaperis, kvankam tiu ne povis vidi lin.

Atinginte la hejmon de Qin, ili ambaŭ iris al la ĉambrofenestro de Qin. Juemin donis du malpezajn frapojn al la fenestrovitro. Aŭdis tusado de Qin. Post bruado de paŝoj la kurteno leviĝis kaj la vizaĝo de Qin sin montris. Kun nekombitaj haroj, ŝi aspektis dormema. Evidente ŝi ĵus ellitiĝis. Ŝi ridetis al ili. Rimarkinte la mienon de Juehui, ŝi mirigite demandis mallaŭte, “Hodiaŭ?”

Juemin kapjese diris, “Ĝuste nun”

Ŝi surpriziĝis kaj ŝia vizaĝesprimo ŝanĝiĝis. Iom klininte sian kapon malantaŭen, ŝi mallaŭte diris, “Kiel urĝe!”

Juehui tuj alproksimiĝis al la fenestro. Li levis siajn okulojn kaj du-trifoje vokis, “Kuzinjo Qin.” Lian vidkampon okupis ŝia vizago tra la fenestrovitro.

“Vi foriras?” ŝi dubeme demandis. Ŝia milda rigardo senĉese direktiĝis malsupren kaj balais lian vizaĝon, kvazaŭ ion serĉante. “Kiam vi estos en Ŝanhajo ne forgesu min. Ĉu vi forgesos min?” Ŝi malgaje ridetis.

“Ne. Mi ofte sopiros al vi. Vi scias, ke mi ofte sopiras al vi.” Juehui skuetis la kapon al ŝi.

Subite ŝi ŝajne ekmemoris ion kaj kapbalance diris, “Atendu. Ne foriru tuj.” Ŝia vizaĝo tuj malaperis.

Juehui atendis. Post momento ŝi denove montris sian ridetantan vizaĝon. “Mi donacu al vi la aĵon kiun mi promesis al vi antaŭe.” Dirante, ŝi elŝovis pecon da papero tra la fendeto inter la fenestrklapoj. Juehui prenis ĝin kaj trovis, ke ĝi estas ŝia freŝdata foto. Kiam li denove sendis ĝojplenan kaj dankeman rigardon al ŝi, la kurteno jam malleviĝis. Li volis stari tie ankoraŭ momenton, sed Juemin urĝis lin foriri. Li ankoraŭfoje vokis “Kuzinjo Qin”, sed li ne aŭdis ŝian respondon. Ĵetinte ankoraŭ rigardon al la fenestro, li decideme foriris.

Survoje Juemin kaj Juehui multe interbabiladis. Kiam ili atingis la kajon, Huang Cunren kaj Zhang Huiru jam atendis tie longan tempon.

Zhang Huiru ekscitite kaptis la manon de Juehui kaj laŭte diris, “Kial vi venis tiel malfrue? Se vi malfruus plian momenton, la boato jam ekirus.”

“Ne, ni atendus sinjoron Gao,” diris ridetante mezaĝa komercisto, kiu staris apude. Li estis la parenco de Huang Cunren, sinjoro Wang, Juehui jam konis lin kaj prezentis lin al Juemin.

“Juehui, venu por pririgardi viajn pakaĵojn,” diris Huang Cunren. Li kondukis lin en lian kajuton. Ankaŭ Juemin enbarkiĝis.

“Vian litaĵ-pakon mi jam elvoivis. Jen vidu, mi jam sternis vian litaĵaron en ordo... Ĉi tiu pakaĵo entenas kukojn kaj biskvitojn, kiujn mi,

Huiru kaj Huanru donacas al vi por bezono sur la vojo,” diris Huang Cunren, montrante tien kaj tien. Juehui nur balancis la kapon.

“Dum la vojaĝo sinjoro Wang zorgos pri ĉio; vi ne bezonos ĝeni vin. Li akompanos vin ĝis Chongqing . De tie la vojaĝo estos facila. Ne forgesu viziti mian kuzon en Chongqing. Li povos doni al vi helpon,” Huang Cunren tre zorgeme diris.

La boato ankrita najbare estis luita de ŝtata funkciulo. Sur ĝi sin lokis korpogardistoj. Sur la kajo estis liaj multaj adiaŭantoj. Timomente brue eksplodis de fajrokrakaĵoj. La boato ekiros.

Zhang Huiru eniris en la kajuton kaj diris, frapetante ŝultron de Juehui, “Ne forgesu sendi al ni multajn leterojn kaj artikolojn, Juehui !”

“Ankaŭ vi devos multe skribi al mi,” diris Juehui ridetante.

“La boato baldaŭ ekveturos. Vi tri surbordiĝu,” diris sinjoro Wang, enirinte en la kajuton. Li jam diris ĝisrevidon al siaj adiaŭantoj.

Juehui manpremis kun Zhang Huiru kaj Huang Cunren, kaj akompanis ilin al la pruo.

Juehui firme premis la manon de sia frato kaj kore diris, “Dua Frato, ĝis revido. Poste kiam vi ekhavas liberan tempon, pli ofte kontaktiĝu kun Cunren kaj Huiru. Se estos problemo , ili povos doni al vi helpon.” Li denove sin turnis al Huang Cunren kaj Zhang Huiru kaj diris, “Mi esperas, ke vi traktos mian fraton kiel min. Vi komprenos lin. Li estas bona homo.”

“Kompreneble. Ne necesas via atentigo. Mi kaj Juemin jam tre familias. Mi estas certa, ke li volonte partoprenos en la laboro de nia gazeto,” Huang Cunren diris intime kaj kuraĝige.

“Dua Frato, konsentu,” Juehui persvadis, vidinte Juemin heziti.

“Juemin , venu. Ni bonvenigas vin.” Zhang Huiru varme etendis sian manon al Juemin.

“Bone, mi konsentas,” Juemin diris decideme. Li prenis la etenditan manon de Zhang Huiru kaj poste premis la manon de Huang Cunren. Post tio, li demandis Juehui, “Tria Frato, ĉu vi havas aliajn vortojn? Mi surbordiĝos.”

“Ne ,” Juehui respondis. Poste li diris en alia tono, “Ho jes, ankoraŭ unu afero. Kiam vi vidos Jianyun, transdonu mian saluton al li. Mi ne havis tempon por viziti lin . Li estas malsana . Li devas zorgi pri sia sano.”

“Bone, mi certe komunikos al li , kion vi diris. Ĉu vi ankoraŭ havas aliajn vortojn?” Juemin demandis amare.

“De maljuna onjo Huang mi vere sentas bedaŭron disigi. Bone traktu ŝin.”

“Mi scias. Kaj kio pli?”

“Kuzinjo Qin...” Juehui bridis sin. Poste li decideme diris, “Nenion por diri. Sed mi esperas, ke vi ambaŭ baldaŭ venos al Ŝanhajo .”

Dirinte “bonan vojaĝon”, Juemin surbordiĝis kun Zhang Huiru kaj Huang Cunren.

Ili rigardis lin, starante sur la kajo, dum li rigardis ilin, starante sur la pruo. Ili mansvingadis unu al alia.

La boato ekmoviĝis kaj iom post. iom retiriĝis de la bordo. Ĝi sin turnis. La homfiguroj malgrandiĝis kaj subite tute malaperis. Juehui ankoraŭ staris sur la pruo. En lia vido ŝajne restis iliaj figuroj kun svingiĝantaj manoj. Li sentis siajn okulojn vualiĝi kaj li ekfrotis ilin per la mano. Tamen kiam li demetis la manon, iliaj figuroj tute foriĝis el lia vido.

Ili — la frato kaj la du amikoj jam for, jam nevideblaj. Ĉio ĵus okazinta ŝajnis songo. Li ne plu povis vidi ilin. Kaj nun, ĉirkaŭe, kristale klara akvo, montoj, arboj ... Apude tri boatistoj, remis, kantante.

Regis nova sento. Ĝojo? Tristo? Li nur klare konsciis, ke li jam forlasis la hejmon. Smeralda akvo, senĉese fluanta, estis portonta lin al la nekonata urbego, kie kreskas ĉio nova, viglas nova movado, estas vasta popolamaso, vivas liaj sinceraj plumamikoj entuziasmaj.

La akvo, la benoplena akvo, portos lin de la hejmo, kie li loĝis dek ok jarojn, al la nekonata urbo kaj la nekonata homamaso. La perspektivo frapis la okulojn. Li ne havis tempon por bedaŭri la forĵetian, dek-okjaran vivon. Li ĵetis lastan rigardon al la naskoloko. “Ĝis revido!”

li diris mallaŭte. Li fiksas sian rigardon al la akvo smeralda, senĉese fluanta...

Postskribo

Bakin

Kun granda ĝojo mi sciigis, ke samideano Wei Yida (Vejdo) esperantigis mian romanon *La Familio*. Dum la 30-aj jaroj, mi esperis, ke naskiĝos Esperanta versio de unu el miaj romanoj, kaj mi eĉ intencis fari tradukadan provon persone, ĉar tiam mi ofte kontaktis kun Esperantaĵoj kaj havis relative multajn ŝancojn uzi Esperanton. Sed pro tio, ke mi ne povis elmeti rigoran postulon al mi mem kaj hezitis fari decidon, timante, ke mi ne povus fini la tradukadon, post kiam mi komencos tion fari. Mi prokrastis la aferon tagon post tago kaj ĉesis konsideri pri traduko de miaj verkoj kiam mia nivelo de Esperanto malboniĝis pro mia malofta kontakto kun Esperanto.

Pasis pli ol kvardek jaroj, dum kiuj mi travivis la ok jaran Kontraŭjapanan Rezistmiliton kaj dek-jaran “Kulturan Revolucion”, sed mia korinklino al Esperanto neniam malpliigis. Mi sentas min ekscitita pro la disvolviĝo de la Esperanto-movado dum lastaj kvardek jaroj. Kaj ankaŭ mia deziro ne nuliĝis, ĉar tion, kion mi volis fari sed ne povis, samideano Wei Yida anstataŭ mi sukcesis plenumi, kaj plie plenumi tre bone. Li faris la tradukadon ne laŭ la mallongigita anglalingva eldono, sed laŭ la ĉinlingva originalo reviziita de mi en

1957 (reeldonita en 1977). Mi esperas, ke iutage eldoniĝos kompleta anglalingva versio de la verko, ĉar mi ne ŝatas la tradukon kun ĉapitroj fortranĉitaj el la originala verko.

La Familio ne estas aŭtobiografia romano, sed mi registris en ĝi kelkajn verajn okazintaĵojn. Kvankam en Ĉinio, ŝajne neniigis la feŭdaj familioj kun kvar generacioj sub la sama tegmento kia estis la familio Gao, la veneno de la feŭda socio tamen ankoraŭ restas kvazaŭ malpura akvo stagna ĉe la korta murangulo, kiun ni povas tute forigi nur per niaj senlaca penado kaj necedema luktado. Dum iu periodo, eĉ mi mem misopiniis, ke miaj romanoj jam “fortempiĝis”, sed ĝis hodiaŭ mi ankoraŭ sentas la nerompeblan kaj mil-kanalan ligitecon al mia antaŭa feŭda familio. Kia teruraĵo! Kaj mi ekkomprenas, ke miaj romanoj ne “fortempiĝis”.

Kompreneble, ili “fortempiĝos” iutage en la estonteco, kiam tiu malpura akvo estos plene forigita. La nova socio tamen senescepte konstruiĝas sur la malnova. Se ni volas koni la hodiaŭajn homojn, ni ne devas forgesi la hieraŭajn okazaĵojn, ĉar ni venis el la hieraŭo. Por mi, *La Familio* ankoraŭ restas alarmilo, oreŝire sonoranta alarmilo!

La 24-an de septembro, 1982